

A.Kerbel

# **Esperanto**

## **per 501 vortoj**

Hajfo  
2017

De la aŭtoro:

Tiu ĉi tri-rerakonta lernolibro estas dediĉata al mia edzino Hava.

# Rerakonto unua

Aelita.

## 1 litero

Esperanto	[English]												
<table border="1"><tr><td>A</td><td>Litero A</td></tr><tr><td>B</td><td>Litero Bo</td></tr><tr><td>C</td><td>Litero Co</td></tr></table>	A	Litero A	B	Litero Bo	C	Litero Co	<table border="1"><tr><td>A</td><td>Litero Ej</td></tr><tr><td>B</td><td>Litero Bi</td></tr><tr><td>C</td><td>Litero Si</td></tr></table>	A	Litero Ej	B	Litero Bi	C	Litero Si
A	Litero A												
B	Litero Bo												
C	Litero Co												
A	Litero Ej												
B	Litero Bi												
C	Litero Si												

**litero** = English: letter

## 2 -j

A

Litero **A**

A A A  
A A A

Literoj **j** **A**

B

Litero **Bo**

B B B  
B B B

Literoj **j** **Bo**

### Esperanto-literoj – literoj anglaj

<b>A a</b>	(a)	<b>p</b> uzzle, <b>u</b> gly, <b>b</b> us, Tel- <b>A</b> viv.
<b>B b</b>	(bo)	<b>b</b> us, <b>b</b> rown, <b>b</b> ed.
<b>C c</b>	(co)	<b>t</b> sunami, Mao <b>T</b> se-tung.
<b>Ĉ ĉ</b>	(ĉo)	<b>ĉ</b> ease, <b>Ĉ</b> ina, <b>Ĉ</b> arlie <b>Ĉ</b> aplin.
<b>D d</b>	(do)	<b>d</b> uckling, <b>g</b> ood, <b>h</b> and.
<b>E e</b>	(e)	<b>p</b> en, <b>t</b> en, <b>b</b> ed, Tel- <b>A</b> viv.
<b>F f</b>	(fo)	<b>f</b> ive, <b>a</b> fter, <b>f</b> lag.
<b>G g</b>	(go)	<b>u</b> gly, <b>g</b> ood, <b>f</b> lag.
<b>Ĝ ĝ</b>	(ĝo)	<b>Ĝ</b> im, <b>j</b> ungle, <b>J</b> apan, <b>C</b> ambr <b>ig</b> e
<b>H h</b>	(ho)	<b>H</b> einrich <b>H</b> eine, <b>h</b> and, <b>h</b> elp.
<b>Ĥ ĥ</b>	(ĥo)	<b>B</b> ach, Chinggis <b>K</b> han.
<b>I i</b>	(i)	duck <b>l</b> ing, ugly, tsunami <b>i</b> , Chap <b>l</b> in.
<b>J j</b>	(jo)	<b>y</b> es, train, Bombay.
<b>Ĵ ĵ</b>	(ĵo)	pleas <b>u</b> re, meas <b>u</b> re.

<b>K k</b>	(ko)	cup, duckling, king.
<b>L l</b>	(lo)	ugly, duckling, Tel-Aviv,
<b>M m</b>	(mo)	Mao, time, Cambridge, Gim.
<b>N n</b>	(no)	brown, Chaplin.
<b>O o</b>	(o)	Mao, Tom, not.
<b>P p</b>	(po)	cup, Chaplin, pen, puzzle.
<b>R r</b>	(ro)	brown, Charlie, train.
<b>S s</b>	(so)	bus, six, seven, size.
<b>Ŝ ŝ</b>	(ŝo)	finish, sheep, shave.
<b>T t</b>	(to)	ten, after, train, Tel-Aviv.
<b>U u</b>	(u)	tsunami, book, good.
<b>Ŭ ŭ</b>	(ŭo)	wine, wake, why, water.
<b>V v</b>	(vo)	seven, Vatican, Tel-Aviv.
<b>Z z</b>	(zo)	cheese, size, puzzle.

## Esperanto-literoj

<b>A a</b>	(a)	arbo, amiko, akvo, patro.
<b>B b</b>	(bo)	birdo, bona, bruo, arbo.
<b>C c</b>	(co)	cifero, cent, Francio, facila.
<b>Ĉ ĉ</b>	(ĉo)	ĉambro, ĉesas, ĉielo, ĉinio.
<b>D d</b>	(do)	domo, demando, desegno.
<b>E e</b>	(e)	estas, estro, eraro, cifero.
<b>F f</b>	(fo)	flugas, faras, francio, infano.
<b>G g</b>	(go)	granda, gusto, gaja, flugas.
<b>Ĝ ĝ</b>	(ĝo)	ĝoja, manĝas, ĝentlemano.
<b>H h</b>	(ho)	homo, havas, hundo, helpas.

<b>Ĥ ĥ</b>	(ĥo)	ĥolero, ĥato, ĥasido, ĥoro.
<b>I i</b>	(i)	infano, instruas, insulo.
<b>J j</b>	(jo)	jes, juna, japanio, gaja.
<b>Ĵ ĵ</b>	(ĵo)	ĵetas, ĵaŭdo, ĵurnalisto.
<b>K k</b>	(ko)	knabo, kantas, konas, akvo.
<b>L l</b>	(lo)	litero, lando, lingvo, parolas.
<b>M m</b>	(mo)	montras, muĝas, mano.
<b>N n</b>	(no)	nomo, nokto, nombro.
<b>O o</b>	(o)	okazas, okulo, ordonas.
<b>P p</b>	(po)	parolas, patro, prenas.
<b>R r</b>	(ro)	rakontas, respondas, arbo.
<b>S s</b>	(so)	sidas, staras, suno, estas.
<b>Ŝ ŝ</b>	(ŝo)	ŝtupo, ŝipo, ŝtono, fiŝo.
<b>T t</b>	(to)	tago, tempo, timas, estas.
<b>U u</b>	(u)	unu, urbo, urso, flugas.
<b>Ŭ ŭ</b>	(ŭo)	ankaŭ, ĉirkaŭ, aŭdas. (ŭ=u-v)
<b>V v</b>	(vo)	varma, venas, vidas, kvazaŭ.
<b>Z z</b>	(zo)	bezonas, okazas, kvazaŭ.

## Literoj

C	G	H	J	S	U
Litero	Litero	Litero	Litero	Litero	Litero
Co	Go	Ho	Jo	So	U

Ĉ	Ĝ	Ĥ	Ĵ	Ŝ	Ŭ
Litero	Litero	Litero	Litero	Litero	Litero
Ĉo	Ĝo	Ĥo	Ĵo	Ŝo	Ŭ

**-j** = English: plural.

# 3 tri

*Tri* = 3

C C C

*Literoj Co. Tri literoj Co.*

Ĉ Ĉ Ĉ

*Literoj Ĉo. Tri literoj Ĉo.*

**tri** = English: three.



## 4 unu

*Unu = 1*

S


*Litero So. **Unu** litero So.*

Ŝ


*Litero Ŝo. **Unu** litero Ŝo.*

**unu** = English: one.

## 5 birdo



**Birdo.** *Unu birdo.*



**Birdoj.** *Tri birdoj.*

**birdo** = English: bird.


## 6 arbo



*Arbo. Unu arbo.*



*Arbo. Unu arbo.*



*Arboj. Tri arboj.*

**arbo** = English: tree.

# 7 homo



homo




homo



homo




homo




Tri homoj

homo = English: human, person.

## 8 iras




Homoj *iras*.



Birdoj *iras*.

*iri* = English: to go.


## 9 parolas




*Homoj **parolas**.*

**paroli** = English: speak, talk.


# 10 staras



*Homoj staras.*





*Birdoj staras.*





Arboj **staras**.



Litero Lo **staras**.


**stari** = English: stand.



# 11 flugas




*Birdoj flugas.*




*Homoj flugas.*

**flugi** = English: fly.

## 12 ne




Arboj **ne** parolas. Arboj **ne** iras. Arboj staras.



Birdoj staras, birdoj iras, birdoj flugas.  
Birdoj **ne** parolas.

**ne** = English: not, no.


# 13 domo



***Domoj** ne iras, **domoj** ne flugas, **domoj** ne parolas. **Domoj** staras.*


**domo** = English: house.

# 14 la




birdoj flugas

*Birdoj flugas.*  
**La** birdo ne flugas,  
**La** birdo staras.




homjoj staras

*Homjoj staras,*  
*homjoj parolas...*  
**La** homo ne parolas.  
**La** homo ne staras.  
**La** homo iras.



*Arboj ne parolas,  
arboj ne iras,  
arboj ne flugas.  
Arboj staras...  
**La** arbo flugas!*




*Domoj ne iras, domoj ne parolas, domoj  
staras.*

***La** domo ne staras!*

***la** = English: the.*


## 15 ĉu



*Birdoj flugas.*


- **Ĉu** la birdo flugas?

- *Ne, ne flugas. La birdo ne flugas. La birdo staras.*



- *Homoj parolas, homoj staras, homoj iras... Ĉu la homo iras?*


- *Ne, la homo ne iras. La homo flugas.*



- Arboj ne iras, arboj ne flugas. Arboj staras.

- **Ĉu** la arbo staras?

- Ne, la arbo ne staras. La arbo flugas.



domoj staras


Domoj ne parolas, domoj staras.

- **Ĉu** la domo staras?

- Ne, la domo ne staras.

**ĉu** = English: whether.


# 16 jes



- *Ĉu la birdo staras?*
- **Jes**, *la birdo staras.*




- *Homoj staras, homoj flugas... Ĉu la homo iras?*
- **Jes**, *la homo iras.*



- *Arboj ne flugas. Arboj staras. Ĉu la arbo flugas?*
- **Jes**, *la arbo flugas.*






- *Ĉu la domo staras?*
- **Jes**, staras. *La domo staras.*


**jes** = English: yes.

## 17 du


**Du** = 2



**Du** literoj Ĉo.



- *Ĉu la homoj staras?*
- *Ne, la homoj ne staras. La **du** homoj iras.*



– Ĉu la **du** arboj staras?

– Jes, staras. La **du** arboj staras.

**du** = English: two.


## 18 kaj



– Arboj **kaj** domo. Du arboj **kaj** unu domo.

Ĉu la domo flugas?


– Ne, ne flugas. Domoj **kaj** arboj ne flugas. La domo **kaj** la du arboj staras.



- Ĉu la homo staras?
- Ne, la homo ne staras.
- Ĉu la homo flugas?
- Jes, flugas. La homo **kaj** la du birdoj flugas.

K. Ŝ, Ŝ.  
F, F, F.

Literoj. Unu litero Ko, du literoj Ŝo, **kaj** tri literoj Fo.



- Ĉu homoj iras? - Jes, homoj iras. Homoj iras **kaj** staras, flugas kaj parolas.
- Ĉu la homo iras?
- Ne, la homo ne iras. La homo staras. La homo **kaj** la du arboj staras.

**kaj** = English: and.

## 19 estas

$$1 + 1 = 2$$

- Ĉu unu kaj unu **estas** du?
- Jes, du. Unu kaj unu **estas** du.

$$2 + 1 = 3$$

- Ĉu du kaj unu **estas** tri?
- Jes, tri. Du kaj unu **estas** tri.
  
- Ĉu unu arbo kaj unu arbo **estas** tri arboj?
- Ne, ne tri. Unu kaj unu ne **estas** tri. Unu kaj unu **estas** du.
  
- Ĉu du arboj kaj unu homo **estas** tri birdoj?
- Ne, ne estas. Birdo **estas** birdo, homo **estas** homo, kaj arbo **estas** arbo.

**esti** = English: is, to be


## 20 tio




- Ĉu **tio** estas litero?
- Jes, **tio** estas litero.
- Ĉu **tio** estas litero Ho?
- Ne, ne Ho. **Tio** ne estas Ho. **Tio** estas litero Ĥo.



- Ĉu **tio** estas esperanta litero Ŝo?
- Ne, **tio** ne estas esperanta, **tio** estas angla (angl'a, **english**) litero.



- Ĉu **tio** estas tri domoj?
- Ne, **tio** ne estas domoj. **Tio** estas arboj. **Tio** estas du arboj.



- Ĉu **tio** estas arbo?
- Ne, **tio** ne estas arbo. **Tio** estas birdo.
- Ĉu?


kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
kiam	tiam	iam	ĉiam	neniam
kie	tie	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
kio	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
kiom	tiom	iom	ĉiom	neniom
kiu	tiu	iu	ĉiu	neniu

**tio** = English: that.


## 21 kio





- **Kio** estas tio?
- Tio estas litero.
- Ĉu tio estas litero Go?
- Ne, ne Go. Tio estas litero Ĝo.



- **Kio** estas tio, ĉu domoj?
- Ne, ne domoj. Tio ne estas domoj. Tio estas arboj. Tio estas du arboj.



- Ĉu tio estas arbo? **Kio** estas tio?
- Birdo, tio estas birdo.
- Ĉu?!



- **Kio** estas tio?


- Tio estas unu homo kaj du birdoj.

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
kiam	tiam	iam	ĉiam	neniam
kie	tie	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
kiom	tiom	iom	ĉiom	neniom
kiu	tiu	iu	ĉiu	neniu

**kio** = English: what.




## 22 ankaŭ



- Tio estas domoj.


**Ankaŭ** tio estas domoj.



- Kio estas tio?

- Tio estas unu homo kaj du birdoj.

- **Ankaŭ** tio estas unu homo kaj du birdoj.



- La arbo staras. Ĉu **ankaŭ** la homo staras?

- Ne, ne staras. La homo ne staras. La homo iras.



– La birdoj flugas. Ĉu **ankaŭ** la arbo flugas?

– Jes, **ankaŭ** la arbo. Flugas kaj la arbo kaj la birdoj.

$$\begin{array}{l} 2 + 1 = 3 \\ 1 + 2 = 3 \end{array}$$

– Du kaj unu estas tri.

Unu kaj du **ankaŭ** estas tri.

**ankaŭ** = English: also, too.

## 23 kvar

**Kvar** = 4


– Tri kaj unu estas **kvar**. Ankaŭ du kaj du estas **kvar**.

– Ĉu ankaŭ tri kaj tri estas **kvar**?


– Ne, ne estas. Tri kaj tri ne estas **kvar**.

**kvar** = English: four.


## 24 urbo




Londono



Parizo



Tokio



Pekino


– Kio estas tio, ĉu arboj?

– Ne, ne arboj. **Urboj**. Tio estas **urboj**. Tio estas kvar **urboj**. Londono estas **urbo**, Parizo estas **urbo**, Tokio kaj Pekino ankaŭ estas **urboj**.




Londono

- Ĉu ankaŭ tio estas **urboj**?
- Ne, tio ne estas **urboj**. Tio estas **urbo**.
- Ĉu tio estas **urbo** Londono?
- Jes, Londono. Tio estas Londono.



Parizo

- Ĉu ankaŭ tio estas Londono?
- Ne, tio ne estas Londono. Tio estas Parizo.



Tokio

- Kio estas tio, ĉu Tokio?
- Jes, tio estas **urbo** Tokio.

**urbo** = English: town, city.

## 25 Franci'o

– Kio estas **Francio**? Ĉu **Francio** estas...  
urbo?

– Ne, **Francio** ne estas urbo.

**Francio** = English: France.

## 26 Briti'o

– Kio estas **Britio**?

– **Britio** estas...

**Britio** = English: Britain.

## 27 lando

**Britio** estas **lando**. **Francio** kaj **Britio** estas **landoj** (**land**'o'j).

**lando** = English: land.

## 28 **Angli'o**

- Ĉu ankaŭ **Anglio** estas lando?
- Jes, ankaŭ **Anglio**. **Francio**, **Britio** kaj **Anglio** estas landoj.


**Anglio** = English: England.

## 29 **Ĉinio**

**Ĉinio** estas lando.

**Ĉinio** = English: China

## 30 **sed**



- Ĉu birdoj parolas?

- Ne... **Sed** la birdo parolas! Jes, la birdo parolas.




- Homoj parolas, homoj iras, homoj flugas... Ĉu la homo flugas?

- Ne, ne flugas. La homo ne flugas **sed** iras.

- Ĉu Tokio kaj Parizo estas landoj?

- Ne, ne landoj. Tokio kaj Parizo ne estas landoj. Tokio kaj Parizo estas ne landoj **sed** urboj.



- La domo staras, ĉu ne?

- Jes, la domo staras, **sed** ne la arboj...

**sed** = English: but.

## 31 **Japani'o**


– Kio estas **Japanio**?

– **Japanio** estas lando. Britio, Ĉinio, Francio kaj **Japanio** estas landoj.

– **Japan'i'o** est'as land'o. Sed **japan'o**, ĉu ankaŭ **japan'o** est'as land'o?

– Ne, ne lando. **Japano** estas ne lando sed homo.

Brito, **japano**, ĉino kaj franco estas homoj.



Tokio


– Ĉu tio estas ĉinia (ĉin'i'a) urbo Pekino?

– Ne. Tio estas **japania** (**japan'i'a**) urbo Tokio.


**Japanio** = English: Japan.



## 32 en




- La homo estas **en** la domo, ĉu?
- Jes, la homo iras **en** la domo.




La homo ne estas **en** la domo. La homo iras **en** la domo**n** (dom'o'n).

-n = →



- Ĉu la homo estas en Parizo?
- Ne, la homo ne estas **en** Parizo. La homo iras **en** Parizo**n**. (Pariz'o; Pariz'o'n).



– Ĉu la homo iras **en** Parizon?

– Ne, la homo ne iras **en** Parizon. La homo estas **en** la urbo, ĉu? La homo iras **en** Parizo.

– Londono estas urbo. Londono estas urbo **en** Anglio. En Anglio kaj en Britio.

**En** la urbo estas homoj. Tio estas britoj.


– Ĉu ankaŭ Tokio estas urbo **en** Britio?

– Jes, ankaŭ Tokio estas urbo, sed ne **en** Britio. Tokio estas ne **en** Britio sed **en** Japanio.

Ankaŭ **en** Tokio estas homoj. Tio estas japanoj.

**en** = English: in.

## 33 loĝas



Tio estas homo kaj domo. La homo **loĝas** en la domo.

Angloj **loĝas** en Angli**o**; en Angli**o** kaj en Brit**io**.


Japanoj **loĝas** en Japan**io**. En Ĉin**io** **loĝas** ĉinoj. En Franc**io** – francoj.

Homoj **loĝas** en domoj. En domoj, en urboj, kaj en landoj.


En urbo Londono **loĝas** britoj. En urbo Pekino **loĝas** ĉinoj. En Tokio **loĝas** japanoj. En Parizo **loĝas** francoj: Parizo estas franc**ia** (franc'**i**'a) urbo.

**loĝi** = English: inhabit, live, reside.


# 34 el




La homo iras **el** Parizo.




La homo **el**iras (**el**'ir'as). La homo **el**iras **el** Parizo.



La homo iras **el** Parizo en Londono**n**.



La homo **el**iras **el** la domo.




Unu **el** la tri homoj flugas, ĉu?

Londono estas urbo en Britio. En Britio kaj en Anglio: Anglio estas unu **el** landoj de Britio.

**el** = English: out of, from.

## 35 kiu



- La homo iras el urbo. El **kiu** urbo iras la homo?

- La homo iras el Parizo.

- **Kiu** loĝas en Parizo?

- En Francio loĝas francoj.

- En **kiun** (**kiu'n**) urbon iras la homo?

- La homo iras en Londonon.

**Kiu** loĝas en Londono?

En Londono loĝas britoj.

- Ĉu estas britoj **kiuj** loĝas en Japanio?

- Jes, estas. Ankaŭ britoj loĝas en Japanio. Estas britoj **kiuj** loĝas en Japanio. Estas japanoj **kiuj** loĝas en Britio. Estas ĉinoj **kiuj** loĝas en Francio. Estas francoj **kiuj**

loĝas en Ĉinio.

Ĉinoj, **kiuj** loĝas en Pekino, parolas ĉine (ĉin'e). Ĉu estas ĉinoj **kiuj** parolas ankaŭ Esperanton? (Esperant'on)?

– Jes, estas. En Pekino kaj en Tokio, en Parizo kaj en Londono estas homoj **kiuj** parolas esperante. Tio estas esperantistoj. Esperantistoj parolas esperante.

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
kiam	tiam	iam	ĉiam	neniam
kie	tie	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
kiom	tiom	iom	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	tiu	iu	ĉiu	neniu

**kiu** = English: which.

## 36 cifero

0 1 2 3 4 5 6 7 8 9

Tio estas **ciferoj**



- Kio estas tio, ĉu tio estas litero?
- Ne, tio ne estas litero. Tio estas **cifero** (**cifer'o**).
- Kiu **cifero** estas tio?
- Tio estas **cifero** kvar.

**cifero** = English: figure, cypher, digit, numeral, numerical symbol.



## 37 nul

**Nul** = 0

2 + 0 = 2      Du kaj **nul** estas du.  
0 + 4 = 4      **Nul** kaj kvar estas kvar.  
3 + 0 = 3      Tri kaj **nul** estas tri.  
0 + 0 = 0      **Nul** kaj **nul** estas **nul**.

0,0




- Ĉu tio estas kvar literoj O?
- Ne, tio ne estas kvar literoj O. Tio estas ne literoj sed ciferoj.
- Kiu(j) (kiu'j) ciferoj estas tio?
- **Nul**. Tio estas du ciferoj **nul**. Tio estas du **nuloj** (**nul**'o'j).

**nul** = English: zero.

## 38 vorto


Arbo



- Kio estas tio, ĉu tio estas arbo?
- Ne, tio ne estas arbo. Tio estas **vorto**.
- Kiu vorto estas tio?


Tio estas **vorto** «arbo». Tio estas ne arbo sed «arbo».

unu  
du  
tri




- Ĉu tio estas ciferoj 1, 2 kaj 3?
- Ne, tio ne estas ciferoj. Tio estas ne ciferoj sed **vortoj** (**vort'o'j**).
- Kiuj **vortoj** estas tio?
- Tio estas **vorto** «unu», **vorto** «du» kaj **vorto** «tri».

004



- Ĉu tio estas **vorto** «nul»?

- Ne, tio ne estas **vorto** «nul». Tio estas ne **vorto** sed ciferoj. Tio estas du nuloj (nul'o'j) kaj unu kvaro (kvar'o).



- Kio estas tio, ĉu tio estas **vortoj** «domo»?

- Ne, tio ne estas **vortoj** «domo». Tio estas ne **vortoj** sed domoj.

**vorto** = English: word.

## 39 - 0

En Esperanto estas o-vortoj.

Vortoj: «hom'o», «hom'o'j», «brit'o», «dom'o», «urb'o», «land'o», «ĉin'o», «Ĉin'i'o», «nul'o», «liter'o», «arb'o'j», «bo», «co», «do»... estas o-vortoj.

Vorto «arbo» («arb'o») estas du-vorta vorto: Tio estas vorto «arb» kaj vorto «o»:

«arb'o» = «arb» + «o».


Vorto «arb'o'j» estas tri-vorta vorto:

«arb'o'j» = «arb+o+j».

«o» estas kaj vorto kaj litero.


-o = English: noun, substantive.

40 - e



*Kio estas tio, ĉu tio estas du ciferoj nul?  
Ne, tio ne estas du ciferoj nul:*


- *Unue*: (unu'e) tio estas ne ciferoj sed literoj («O» estas litero; «0» estas cifero).
- *Due*: (du'e) tio estas ne nuloj sed literoj O.
- *Trie*: (tri'e) tio estas ne du, sed tri literoj «o».




*La homo parolas stare. (La homo kaj staras kaj parolas.). Ĉu la homo parolas japane?*



*La homo parolas ire*. (La homo kaj iras kaj parolas.)



*Ĉu birdoj flugas home* (hom'e)?



*Ĉu homoj flugas birde* (bird'e)?

*Esperantistoj parolas esperante*.

Vortoj «unu'e», «du'e», «tri'e», «star'e», «ir'e», «hom'e», «bird'e», «flug'e»... estas e-vortoj.

*Cu estas ankaŭ «a»-vortoj, «u»-vortoj kaj «i»-vortoj?*

*Jes, estas!*

*-e = English: adverb.*

## 41 ili

*- En urbo Parizo loĝas francoj (franc'o'j). **Ili** (franc'o'j) parolas france (franc'e). En urbo Londono loĝas britoj. **Ili** parolas angle. Ĉinoj, kiuj loĝas en Ĉinio, parolas ĉine. **Ili** parolas ĉine. **Ili** parolas la ĉinan.*


*- Ĉu japanoj en Japanio parolas japane?*

*- Jes, japane. **Ili** parolas japane.*

mi vi li ŝi ĝi si  
ni vi ili oni

*ili = English: they.*

## 42 tiu



*Tio estas homo. **Tiu** homo parolas. **Tiu** homo parolas stare (star'e).*




*Ankaŭ **tiu** homo parolas, sed ne stare. La homo parolas ire (ir'e).*

*- Ĉu **tiu**j, kiuj parolas angle kaj loĝas en Japanio, estas britoj? Ĉu ili estas britoj?*

*- Jes, en Japanio estas britoj... sed ĉu ne estas ankaŭ japanoj kiuj parolas angle? Japano kiu loĝas en Japanio kaj parolas angle estas ne anglo, ne brito, sed japano.*






- Ĉu **tiu**j du homoj iras en Parizo?
- Ne, **tiu**j homoj ne iras en Parizo: ili ne estas en la urbo (la = Parizo)! **Tiu**j du homoj iras ne en Parizo, sed en Parizon**n**.

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
kiam	tiam	iam	ĉiam	neniam
kie	tie	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
kiom	tiom	iom	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**tiu** = English: that.

## 43 **sidas**



oo  
- Tio estas homoj. Ili ne staras. Ili ne iras. Ili ne flugas. Ili **sidas**. Tiuj kvar homoj **sidas** (**sid**'as).


- Ĉu tio estas britoj? Ĉu tio estas ĉinoj?

- Tio estas homoj.

oo

**sidi** = English: sit.

# 44 **instruas**



oo

Jes, tio estas homoj. Ĉu ili sidas?

Jes, sidas. Sed unu el ili staras. Tio estas **instruisto** (**instru**'ist'o).

La **instruisto** staras kaj parolas. La **instruisto** **instruas** (**instru**'as).

Ĉu la **instruisto** parolas ĉine? Ĉu france? Ne, ne france kaj ne ĉine. Esperante. La **instruisto** parolas esperante (esperant'e).

oo

– *Kio estas tiu homo, homo kiu staras?*

– *Tio estas **instruisto**.*

– *Kio estas **instruisto**?*

– ***Instruisto** estas tiu kiu **instruas**.*

– *Kion (**ki**'n) **instruas** la **instruisto**?*

– *La **instruisto** **instruas** Esperanton.*

**instruist'o** = English: teacher.

## 45 lingvo


– En Francio loĝas francoj. Francoj parolas france. Jes, franca lingvo estas tiu lingvo kiun parolas francoj. Ili parolas francan lingvon. Ili parolas la francan.

– Kaj britoj, kiun lingvon parolas britoj, ĉu britan?

– Ne, ne britan. Britoj parolas angle. Lingvo kiun parolas britoj estas angla lingvo. Ili parolas anglan lingvon. Ili parolas la anglan (la = lingvon).

– Kiujn lingvojn instruas instruistoj – ĉinoj? Kiujn lingvojn instruas ĉinaj instruistoj?

– Ĉinaj instruistoj instruas lingvojn ĉinan kaj japanan, francan kaj anglan. Kaj ankaŭ Esperanton. Jes, ili instruas ankaŭ Esperanton. Esperanton, lingvon Esperanto, instruas instruistoj ĉinaj kaj japanaj, britaj kaj francaj.




- Kiun **lingvon** parolas la birdo?

- Esperanton. La birdo elparolas (el'parol'as) vortojn «ar-r-r-bo» kaj «bir-r-r-do».

**lingvo** = English: language.

## 46 lernas



oo  
Jes, tio estas la instruisto kaj la kvar **lernantoj** (**lern'ant'o** estas tiu kiu **lern'as**, **star'ant'o** estas tiu kiu staras...).

La instruisto staras kaj parolas. Sed ne la **lernantoj**. La **lernantoj** ne staras kaj ne parolas. Ili sidas.

La instruisto instruas (instru'as). La **lernantoj lernas** (**lern'as**). La **lernantoj lernas lingvon**. Kiun lingvon lernas la lernantoj?

Esperanton! Ili **lernas Esperanton** (Esperant'o'n). Ili **lernas lingvon Esperanto**.

oo

**lernant'o** = English: pupil.

## 47 **demandas**

### Instruistoj instruas.

**Unua** (unu'a) **demando**: Kiu instruas?

**Dua** **demando**: Kiu lernas?

**Tria** **demando**: Kio estas lernanto?

**kvara** **demando**: Kion lernas la lernantoj, ĉu lingvon?

**5-a** (**kvin'a**) **demando**: Kiun lingvon lernas la lernantoj, ĉu Esperanton?

**demando** = English: question.

# 48 respondas

## Instruistoj instruas

*Unua demando: Kiu instruas?*

**Respondo:** Instruistoj. Instruistoj instruas.

*Dua demando: Kiu lernas?*

**Respondo:** Lernantoj.

*Tria demando: Kio estas lernanto?*

**Respondo:** lernanto (lern'ant'o) estas tiu kiu lernas (lern'as).

*Kvara demando: Kion lernas la lernantoj, ĉu lingvon?*

**Respondo:** Jes, lingvon. Ili lernas lingvon.

*5-a demando: Kiun lingvon lernas la lernantoj, ĉu Esperanton?*

**Respondo:** Jes, Esperanton. La lernantoj lernas Esperanton. Ili lernas lingvon Esperanto.

Lernantoj lernas. Ĉu estas lernantoj kiuj instruas?

**Respondo:** Jes, estas, sed... sed lernanto estas ne tiu kiu instruas. Lernanto estas tiu kiu lernas.

– Ĉu instruistoj demandas? Kiun ili demandas?

**Respondo:** Ili demandas lernantojn.

– Ĉu la lernantoj **respondas**?


**Respondo:** Jes, **respondas**. Ili **respondas** kaj demandas: ili lernas.

Lernanto estas tiu kiu lernas, respondanto (respond'**ant**'o) estas tiu kiu respondas.

**respondo** = English: answer.



# 49 mi



oo  
La instruisto demandas kaj respondas. La instruisto instruas.

– Kiun **mi** instruas? – demandas la instruisto, kaj respondas: – **mi** instruas lernantojn.

– Kion lernas **miaj** (**mi'a'j**) lernantoj? – demandas la instruisto, kaj respondas: – Lingvon. **Miaj** lernantoj lernas lingvon.

– Kiun lingvon lernas **miaj** lernantoj, ĉu ĉin**an** (ĉin'**a'n**), ĉu angl**an**, ĉu japan**an**? – demandas la instruisto, kaj respondas: – Ne, ne tiujn lingvojn lernas **miaj** lernantoj. Ili lernas Esperanton. **Mi** instruas ilin (**ili'n** = lern'ant'o'j'**n**) paroli esperante.


– Ĉu instruistoj lernas? – demandas la instruisto, kaj respondas: – Jes, ankaŭ instruistoj lernas. Instruistoj, kiuj ne parolas esperante, lernas la lingvon. Ili lernas ankaŭ instrui (**instru'i**) la lingvon (la = esperanton).

oo

mi vi li ŝi ĝi si  
ni vi ili oni

mi = English: I, me.

## 50 vi



oo

Tio estas la instruisto kaj la kvar lernantoj. Unu el la lernantoj staras.

– Kio **vi** estas? – demandas la instruisto la lernanton **n** kiu staras.

– Mi estas lernanto, – respondas la lernanto.

– Kio **vi** estas? – demandas la instruisto la du**an** (du'**a'n**) lernanton**n**.

– Ankaŭ mi estas lernanto, – respondas la lernanto.

- Ĉu ankaŭ **vi** estas lernanto? - demandas la instruisto la tri**an** lernanton**n**.

- Jes, - respondas la lernanto, - ankaŭ mi. Ankaŭ mi estas lernanto.

Instruisto: Mi estas homo, mi estas instruisto, mi instruas. Mi, lernantoj, estas **via** (**vi'a**) instruisto.

Jes, ankaŭ **vi**, lernantoj, estas homoj, sed **vi** ne instruas. **Vi** lernas. **Vi** estas lernantoj. **Vi** estas miaj (**mi'a**'j) lernantoj.

oo

**Vi** estas lernanto.

**Vi** estas lernantoj.

<b>mi vi</b>	li ŝi ĝi	si
ni <b>vi</b>	ili	oni

**vi** = English: you.


Vorto «**ki**o» kaj vorto «**ki**u»

**4**

- **KIO** estas tio?
- Tio estas cifero.
- **KIU** (el ciferoj) estas tio?
- Tio estas cifero kvar.

**Ŝ**

- **KIO** estas tio?
- tio estas litero.
- **KIU** (el literoj) estas tio?
- Tio estas litero ŝo.




Tokio

- KIO** estas tio?
- Tio estas urbo.
- KIU** (el urboj) estas tio?
- Tio estas urbo Tokio.

- **KIO** vi estas?
- Mi estas lernanto.
- **KIU** (el lernantoj) vi estas?
- Mi estas **Gim**.

## 51 li



- oo
- **KIU** vi estas? – demandas la instruisto.
  - La instruisto demandas. **Kiun li** (la instruisto) demandas? **Li** demandas la unu**an** (unu**a'n**) lernanton**n**, lernanton**n** kiu staras.
  - Kaj kion**n** respondas la lernanto, kion**n li** respondas?
  - Mi estas lernanto, respondas **li** (la lernanto).
  - Sed mi ne demandas vin**n** «**KIO** vi estas». Mi demandas vin**n** «**KIU**»!. Kiu vi estas?
  - Jes, «**KIU**»... Vi demandas min**n** «**KIU**»...

Mi estas Andreo, – respondas la lernanto.

– Kaj vi, **KIU** vi estas? – demandas la instruisto la du**an** lernant**on**.

– Mi estas Kim, – respondas la lernanto.

oo

– *Kion* respondas du**a** lernanto, kio estas **lia** (**li'a**) respondo?

– **Lia** respondo estas «Kim». Kiu **li** estas? Kim. **Li** estas Kim. Kio **li** estas? **Li** estas lernanto.

– *Ĉu* ankaŭ la tri**a** lernanto estas Kim?

– Ne, **li** ne estas Kim. **Li** estas Pablo.


– Kiu **li** estas?

– Pablo! La tri**a** lernanto estas Pablo.

<b>mi</b>	vi	<b>li</b>	ŝi	ĝi	si
ni	vi	<b>ili</b>			oni

**li** = English: he.

## 52 **n o m o**



oo

Instruisto: – La unua lernanto estas Andreo. Kiu li estas? Andreo. Lia **nomo** estas Andreo.

La dua lernanto estas Kim. Lia **nomo** estas Kim. Kiu li estas? Kim. Kio li estas? Lernanto.


– Kaj kiu estas la tria lernanto? Kio estas lia **nomo**:

- Tio estas Pablo.
- Kio estas lia **nomo**? (= kiu li estas?)
- Pablo! Lia **nomo** estas Pablo.


oo

**nomo** = English: name.


# 53 de



La homo iras. La homo iras **de** la arbo.



La homo ne iras en la domon, la homo ne iras en la domo. La homo ne eliras el la domo. La homo iras **de** la domo.





La homo ne iras en Parizon. La homo ne iras en Parizo. La homo ne eliras el Parizo. La homo iras **de** Parizo.

**De** kiu urbo iras la homo? De Parizo!

4


Kio estas nomo **de** la cifero?

Nomo **de** la cifero estas «kvar».

Kiu cifero estas tio? Tio estas cifero kvar.

Kio estas nomo **de** tiu lingvo kiun instruas la instruisto? Kiun lingvon instruas la instruisto.

Esperanton. Nomo **de** la lingvo estas Esperanto.



Andreo Kim Pablo

oo  
Kiu estas la tria lernanto? Pablo. Nomo **de** la tria lernanto estas Pablo. Li estas Pablo.

– Pablo, – demandas Pablom la instruisto,  
– kio estas nomo **de** tiu lando en kiu japanoj

parolas japane?

- Tio estas Japanio, - respondas Pablo, -  
nomo **de** tiu lando estas Japanio.

- Kim, - demandas la instruisto, - kio es-  
tas nomo **de** tiu lando, en kiu loĝas ĉinoj?

- Tio estas Ĉinio, - respondas Kim.

- Andreo, - demandas la instruisto, - kio  
estas nomo **de** la urbo, en kiu homoj lernas  
paroli esperante? En kiu urbo homoj lernas  
Esperanton?

- Tio estas ne urbo sed urboj. Nomoj **de**  
la urboj estas Londono kaj Tokio, Pekino kaj  
Parizo, - respondas Andreo.

oo

*Kio estas respondo **de** Andreo?*

*Lia respondo estas: «Homoj lernas Es-  
peranton en Parizo kaj en Pekino, en Tokio  
kaj en Londono». Tio estas respondo **de** ler-  
nanto Andreo. Tio estas lia respondo.*

**de** = English: of, from.

## 54 - i -

«Japanio», «Francio», «Ĉinio» kaj «Britio» estas nomoj de la landoj.

- Sed kio estas tiu «-i-»?

- «-i-» estas lando!

- Ĉu?!

- Jes. Francio (Franc'io) estas lando en kiu franc'o'j parolas franc'e. Ĉinio (Ĉin'io) estas lando en kiu loĝas ĉinoj. Japanio (Japan'io) estas lando de japanoj. Kaj Anglio estas unu el landoj de Britio.



- Ĉu ankaŭ «i» estas litero-vorto?

- Jes, en vorto «angl'io» literoj «i» kaj «o» estas kaj literoj kaj vortoj.

Angl'io estas «Angl»+«i»+«o».

**-i-** = English: country.

# 55 ino



oo

Nomoj de la unuaj (unu'a'j) tri lernantoj estas Andreo, Kim, kaj Pablo. Sed kiu estas la kvara lernanto?

Tio estas Lea.

Ĉu Lea estas lernanto? Jes, ankaŭ Lea estas lernanto. Lea estas lernantino (lern'an-t'in'o).

La unuaj tri lernantoj estas lernantoj. La kvara (la = lernanto) estas lernantino. Lea estas ino.

oo

*Estas lingvoj en kiuj urbo estas «li»: (Ruse: gorod, город). Estas lingvoj en kiuj cifero estas «ino» (Germane: Die Ziffer). Sed ne en Esperanto. Jes, lernantino estas ino.*

*Sed ciferoj, urboj... Ciferoj kaj urboj ne estas inoj (in'o'j)!*

*Ĉu estas birdoj-inoj? Jes, estas. Birdon-**inon** esperantistoj nomas (nom'as) «bird**ino**» (bird'in'o).*

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	ek	em
end	er	et	fi	ge	id	ig
iĝ	il	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**ino** = English: female, feminine.

## 56 **diras**

oo

- Mi instruas, - **diras** la instruisto, - mi instruas lernantojn**n**. Lernantojn**n** kaj lernantinojn**n**. Nomoj de miaj lernantoj, - **diras** la instruisto, - estas Andreo, Kim, Pablo kaj Lea. Jes, - **diras** la instruisto, - ankaŭ lernantino Lea estas mia lernanto.

Miaj lernantoj lernas, - **diras** la instruis-

to, – ili lernas paroli. Ĉu ili lernas paroli la ĉin**an** (la = lingv**o**n)? Ĉu la franc**an**?

Ne, ne la ĉinan kaj ne la franc**an**. Ili lernas paroli Esperant**o**n (Esperant'o'**n**). Ili lernas Esperant**o**n. Ili lernas lingv**o**n Esperanto.

oo

– Kion **diras** la instruisto?

– La instruisto **diras**: «Miaj lernantoj lernas paroli Esperant**o**n».

**diri** = English: say, speak.

## 57 nur

– En Japanio loĝas japanoj, ĉu ne? – **diras** brito.

...Jes, ankaŭ esperantistoj **diras**: «En Japanio loĝas japanoj». Sed... sed ne **nur** japanoj loĝas en Japanio. En Japanio loĝas ankaŭ japaninoj (japan'in'o'j)!

Esperantistoj **diras**: «Instruistoj instruas lernantoj**n**». Jes, ili instruas... Sed ne **nur** instruistoj estas tio. Tio estas ankaŭ instruistinoj (instru'ist'in'o'j)!.

Ankaŭ lernantoj ne estas **nur** lernantoj:  
ankaŭ lernantinoj lernas!

– Sed ĉu **nur** ili (lernantoj kaj lernantinoj) lernas?


– Ne, ne **nur** ili. Ankaŭ instruistoj lernas. Instruisto-anglo lernas instrui la francan, (la = lingvon), instruisto-franco – la anglan.

– Esperantistoj parolas esperante (esperant'e). Ĉu **nur** esperante?

– Ne, ne **nur**. Esperantistoj-francoj parolas ankaŭ la francan; esperantistoj-ĉinoj – la ĉinan. Sed estas esperantistoj kiuj parolas ne **nur** du lingvojn...

**nur** = English: only.

## 58 libro



oo

- Kio estas tio? – demandas la instruisto.
- Tio estas **libroj** (**libr'o'j**), – respondas la lernantoj.
- Kio estas nomo de la unua **libro**? (la = tiu, tiu ĉi)
- Nomo de la **libro** estas «Arboj», – respondas Andreo.
- Jes, «Arboj». Kaj kio estas nomo de la tria **libro**? ...Lea!
- Nomo de la **libro** (la = tiu, la tria), – respondas Lea, – estas «Esperanto»... Ĉu tio estas lerno**libro** (lern'o'**libr'o**)?
- Jes, Lea, tio estas lerno**libro**. Tio estas **libro** kiu instruas lingvon Esperanto. La **libro** instruas Esperanton.


oo

- Ĉu **libroj** instruas?!
- Jes, estas **libroj** kiuj instruas. Tio estas lerno**libroj**.

**libro** = English: book.



## 59 legas



Tio estas instruisto. La instruisto sidas kaj **legas** (**leg'**as). Li **legas** libron.

– Ĉu instruistoj **legas** nur librojn?  
– Ne, ne nur. Sed la instruisto **legas** libron.

– Ĉu ankaŭ lernantoj **legas**?  
– Jes, ankaŭ lernantoj **legas**. Ankaŭ lernantoj **legas** librojn. Kaj ne nur lernolibrojn (lern'o'libr'o'j'n) **legas** ili.


Homoj **legas**. Britoj kaj japanoj, ĉinoj kaj francoj. Ili sidas kaj **legas**. Ili **legas** librojn.

– Kiu estas **leganto** (**leg'**ant'o)?  
– **Leganto** estas tiu kiu **legas**.


**legi** = English: read.

## 60 faras

- Kion **faras** arboj?
- Arboj **staras**. Nur **staras**. Ili ne **iras**, ne **flugas**, kaj ne **parolas**.
- Kaj homoj, kion **faras** homoj?




- 1.** - Andreo, - demand**as** (demand'**as**) la instruisto, - kion la homo **faras** (far'**as**)?  
- La homo sid**as** (sid'**as**), - respond**as** (respond'**as**) Andreo.




**2.** – Kim, – demandas (demand'as) la instruisto, – kion la homo faras (far'as), ĉu li sidas (sid'as)?

– Ne, ne sidas (sid'as), – respondas Kim, – la homo staras (star'as).



**3.** – Pablo, – demandas (demand'as) la instruisto, – ĉu la homo staras (star'as)? Kion la homo faras (far'as)?

– La homo iras (ir'as), – respondas (respond'as) Pablo.



**4.** – Lea, – demand**as** (demand'**as**) la instruisto, – ĉu la homo ir**as** (ir'**as**)?


– Ne, – respond**as** (respond'**as**) Lea, – la homo ne ir**as** (ir'**as**). La homo sid**as** (sid'**as**). La homo sid**as** (sid'**as**) kaj leg**as** (leg'**as**).

– Jes, – dir**as** (dir'**as**) la instruisto, – homoj ne nur sid**as** (sid'**as**), ir**as** (ir'**as**) kaj star**as** (star'**as**). Homoj ankaŭ leg**as** (leg'**as**). Kion ili far**as** (far'**as**)? Leg**as** (leg'**as**)!

oo

**fari** = English: do, make.

# 61 -is 🕒



**1.** – Kion la homo far'as?, ĉu la homo sid'as? Jes, sid'as. La homo ne leg'as, ne ir'as, sed sid'as.

**2.** – Ĉu la homo sid'as? – demand'as la instruisto, kaj respond'as, – ne, la homo ne sid'as sed star'as. La homo sid'is.

**3.** – Ĉu la homo ir'as? – demand'as la instruisto.


- Jes, la homo ir'as.
- Kion la homo far'is?
- Star'is. La homo star'is kaj sid'is.

**4.** La homo sid'as kaj legas. Ĉu La homo ir'is?.

– Jes, iris. La homo sid'is, star'is kaj ir'is.

**-is** = English: past tense

## 62 - OS 🕒



**1.** La homo sid'**as**. Ĉu la homo star'**os**?  
Jes, star'**os**. La homo star'**os**.

**2.** Kion la homo far'**as**? Li star'**as**! Kion la  
homo far'**is**? Sid'**is**. Ĉu la homo ir'**os**? Jes,  
ir'**os**. La homo ir'**os**. Kion li far'**os**? Ir'**os**!

**3.** La homo ir'**as**. Kion la homo far'**is**? Li  
star'**is**. Star'**is** kaj sid'**is**. Kion la homo  
far'**os**, ĉu sid'**os**? Jes, sid'**os**. La homo sid'**os**  
kaj leg'**os**.

**4.** La homo sid'**as** kaj leg'**as**.  
– Sed ĉu mi ne dir'**is**: «La homo sid'**os** kaj  
leg'**os**»? Mi dir'**is**, mi dir'**is** tion!

**-os** = English: future tense.

## 63    **n u n**    🕒

oo

- Jes, - diras la instruisto, - **nun** la homo sid**as** kaj leg**as**. Sed vi, lernantoj, kion far**as** vi? ...Vi, Andreo.

- Mi? Ankaŭ mi star**as**, ir**as** kaj parol**as**. Sed ne **nun**. **Nun** mi lern**as**. **Nun** mi sid**as** kaj lern**as** la lingvon.

- Kaj **nun** vi, Kim. Ĉu vi leg**as** librojn?

- Jes, - respond**as** Kim, - mi leg**as**. Mi leg**as** librojn.

- Kiun libron vi leg**as** **nun**?

- **Nun** mi leg**as** libron «Kim».

- Ĉu? Sed «Kim»... «Kim» est**as** via nomo!

- Jes, - dir**as** Kim, - mia nomo est**as** Kim, sed nomo de libro kiun mi leg**as** **nun** ankaŭ est**as** «Kim».


oo

- Kaj vi, leg**anto**, ĉu ankaŭ vi leg**as** librojn? Jes, vi leg**as**. Vi sid**as** **nun** kaj leg**as** vian lernolibron, lernolibron de Esperanto.

...Sed dir**u**, leg**anto**, ĉu ankaŭ vi legis libron «Kim» de Redjard (Rudyard) Kipling?

**nun** = English: now.

## 64 - U



oo  
- Ne parol'**u**, lernantoj, ne parol'**u**! -  
dir'**as** la instruisto... Lea!

Ne, Lea, vi ne star'**u**. Sid'**u**. Sid'**u** kaj re-  
spond'**u**: ĉu ankaŭ vi leg'**as**?

- Jes, - respond'as Lea: - Andreo, Pablo  
kaj Kim leg'**as**. Kaj mi, ĉu mi ne leg'**u**?! Jes,  
ne nur ili, ankaŭ mi leg'**as** librojn. ...Kim  
dir'is: «Mi leg'**as** nun libron «Kim»», ĉu? Sed  
mi, mi ne leg'**as**, mi leg'**is** la libron!

oo  
*Estas instruistoj kiuj instruas... Sed diru:*  
*kion ili instru**as**?*

*Tiuj instruistoj dir**as**:*

- Sid**u**, star**u**, sid**u**, star**u**! Ne parol**u**! Kaj  
nun: unu, du; unu, du... Iru!

*Kion ili instru**as**?*

**-u** = English: volitive mood.



## 65 pri

La lernantoj lernas: ili demandas kaj respondas. Ili parolas. Pri kio ili parolas, ĉu pri... birdoj? Ne, ne nur pri birdoj. Ili parolas ankaŭ pri landoj kaj urboj, pri homoj kaj lingvoj.

Sed pri kio ili parolas nun? Nun ili parolas pri libroj. Pri tiuj libroj kiujn ili legis, kaj pri tiuj kiujn ili legos.

pri = English: about.

## 66 -as 🕒

Kiam esperantistoj parolas pri nuno (nun'o) ili diras «as» – «as» estas tio kion homoj (kaj ne nur homoj) faras nun:

- Homoj staras, legas kaj parolas.
- Birdoj iras kaj flugas.
- Arboj staras, nur staras.
- Lernantoj lernas. Ili lernas paroli Esperanton. Ili lernas, lernas, kaj... Kaj ili

parolos! Ili parolos (parol'os) la lingvon.

**-as** = English: present tense.

## 67 - **n**

Kion **n** diras litero «-**n**»?

### Unue:

**-n** = →.

- Homo iras en urbon. Ĉu en Londonon?
- Birdoj flugas en Ĉinion. Ĉu el Ĉinio ili flugos en Japanion?


**-n** = English: direction towards.

### Due:


- Diru vian nomon.
- Kiun libron vi legas? ...Jes, ankaŭ mi legis la libron.
- La lernantoj lernas lingvon. Kiun lingvon? Esperanton!

**-n** = English: accusative.

## 68 al



*La homo iras. Ĉu la homo iras de la domo? Ne, ne de. La homo iras **al** la domo.*




*- Ankaŭ la homo iras. La homo iras de Parizo **al** Londono.*

*Nun la homo aliras (**al**'ir'as) Londonon, sed la urbon li ne eniris.*


*Ĉu li eniros la urbon, ĉu li iros en Londono?*

**al** = English: to, towards.

# 69 rakontas



*Jes, la homo **rakontas**.*



*Tio estas lernanto kaj la instruistino.*

## Rakontas la instruistino

Miaj lernantoj sidis kaj lernis. Mi **rakontis** al ili pri lando Francio, pri francoj, pri urbo Parizo.



Eniras (en'ir'as) lernanto.

«Ĉu mi sidu?» – demandas li. – «...Jes, ankaŭ mi iris lerni», – **rakontas** la lernanto, – «sed homo, unu homo, demandis min. Li demandis kiu mi estas, kio mi estas, kaj en kiu domo mi loĝas. Mi respondis. Mi staris kaj respondis. Kaj nun...»

«Ne **rakontu** al mi viajn (vi'a'j'n) **rakontojn**», – diris mi. – «Sidu! Sidu kaj lernu».

**rakonto** = English: story (narrative).

# 70 infano



oo

Tio estas la instruisto kaj liaj (li'a'j) lernantoj. La instruisto instruas, la lernantoj lernas. Ili lernas Esperanton. Sed... ĉu ili, la lernantoj, estas **infanoj**? Ne, ne estas. Ili ne estas **infanoj**.

- Vi diris, Lea: «Ankaŭ mi legas librojn»,
- diras la instruisto, - diru al mi, kiun libron vi legas nun?
- Nun mi legas libron pri Triko kaj Kvarka.
- Ĉu? Ankaŭ mi legas librojn, - diras la instruisto, - mi legis libron pri Maugli, pri Aladino, pri Tom Sojer kaj Gek Fin, sed libron

pri Triko kaj Kvarka... ne, mi ne legis la libron. ...Kio estas Triko? Kio estas Kvarka? Rakontu, Lea, rakontu pri ili.

### Lernantino Lea rakontas

– En unu urbo, – rakontas Lea, – loĝis du homoj. Nomo de unu el ili estis Triko, nomo de la dua – Kvarka. Triko kaj Kvarka, – rakontas Lea al la instruisto kaj al la lernantoj, – estas **infanoj**... Jes, ankaŭ mi estis **infano**, sed ne nun. Nun mi ne estas **infano**. Sed... Sed mi rakontas ne pri mi, – diras Lea, – mi rakontas pri tiuj du homoj, pri tiuj du **infanoj**, nomoj de kiuj estas Triko kaj Kvarka.


oo

– Kaj vi, leganto, ĉu ankaŭ vi estas **infano**? Ĉu vi estis **infano**? Ĉu vi estos **infano**?

...Ne, ne estos. Kiu estis, tiu ne estos **infano**.

**infano** = English: child.

# 71 **knabo**



## Lernantino Lea rakontas

Triko estas homo. Triko estas **knabo**. Li estas lernanto.

Ankaŭ Kvarka lernas. Sed lernantino Kvarka ne estas **knabo**. Kvarka estas **knabino** (**knab**'in'o).

Kion ili, **knabo** Triko kaj **knabino** Kvarka lernas; kion ili lernas?

Ili lernas tion kion instruas al ili iliaj (ili'**a**'j) instruistoj!


Instruistoj rakontas al la lernantoj pri landoj kaj homoj, pri urboj en kiuj la homoj loĝas, pri lingvoj kiujn la homoj parolas.



**knabo** = English: boy.



## 72 ge



ooo

- Jes, lernantoj, - diras la instruisto al la lernantoj, - Triko estas knabo, Kvarka estas knabino... Sed kion esperantistoj diras pri knabo **kaj** knabino? Ili diras «**ge-**».

Knabo kaj knabino estas **ge**knaboj. Lernantoj kaj lernantinoj estas **ge**lernantoj. Instruistoj kaj instruistinoj estas **ge**instruistoj (**ge**'instru'ist'o'j)...

Sed vi rakontu, Lea. Rakontu pri la **ge**knaboj.



ooo

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	ek	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	ig
iĝ	il	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						


**ge-** = English: both sexes.

# 73 **deseñas**


## Lernantino Lea rakontas



Tio estas arboj. Bo desegnas la arbojn.



Tio estas birdo. Bo desegnas la birdon.



Tio estas domo. Bo staras kaj **desegnas** la domon.

oo

- Kiu rakontas rakonton pri nehomoj Ao kaj Bo?


- Lea. Tio estas rakonto el libro, el infana (infan'a) libro kiun legis Lea.

- Ĉu ankaŭ Ao kaj Bo estas infanoj?

- Ne, ili ne estas infanoj. Ili ne estas homoj. Sed kio ili estas? Ni nomu ilin «nehomoj»

**desegni** = English: design, sketch.

# 74 hundo



## Lernantino Lea rakontas

Tio estas **hundo**. Bo staras kaj desegnas la **hundo**n.

– Sed kio estas **hundo**, – demandas Bo, – ĉu **hundo** estas homo? ...Ne, ne estas: **hundoj** ne parolas. Ĉu ankaŭ **hundo** estas nehommo?

– Vi ne parolu, Bo, – diras Ao, – vi desegnu!



**hundo** = English: dog.

## 75 ĝi

oo

- Lea, - demandas Andreo, - pri Ao kaj Bo vi diris: "ili desegnas". Sed desegnas ne ili, desegnas nur unu el ili, ĉu?

- Jes, - respondas Lea, - desegnas nur unu el ili. Tio estas Bo. Bo desegnas. Sed ne Ao. Ao ne desegnas. Ĝi ne desegnas.

- Jes, lernantoj, - diras la instruisto, - ĝi ne desegnas. Ĝi.

Pri kio esperantistoj diras «ĝi»?

Ili diras «ĝi» pri litero kaj cifero, pri libro kaj domo:

- Domo staras. Ĝi staras.
- Unu domo ne estas urbo. Ĝi ne estas urbo.
- Francio estas lando. Parizo estas unu el ĝiaj (ĝi'a'j) urboj.

- Instruisto, - diras Andreo, - homoj diras pri arbo «ĝi»: jes, ĝi staras. Nur staras. Sed hundoj ne nur staras: hundoj ankaŭ iras! Kaj birdoj, birdoj flugas! Kion esperantistoj diras pri hundo? Kion ili diras pri birdo?

- Ĝi. Pri hundo, pri birdo, kaj pri arbo esperantistoj diras "ĝi": ili (hundoj, birdoj kaj arboj) ne estas homoj!

- Sed Ao kaj Bo, - diras Pablo al la instruisto, - ili ne nur staras kaj iras. Ili ankaŭ parolas!

- Jes, - respondas la instruisto, - ili parolas, sed ankaŭ ili ne estas homoj. Ankaŭ pri ili, pri unu el ili, esperantistoj diras «**ĝi**».

- Kaj infano, kion esperantistoj diras pri infano, ĉu ankaŭ infano estas "**ĝi**"? - demandas Kim.

- Jes, Kim, - diras la instruisto, - pri infano esperantistoj diras «**ĝi**».

- Ĉu? Sed infano **estas** homo!


oo

*Jes, pri infano, kiu ne iras kaj ne parolas, ni diras **ĝi**. Sed ne pri infano-lernanto! Pri knabo-lernanto esperantistoj diras li.*

<b>mi vi</b>	<b>li ŝi ĝi</b>	<b>si</b>
<b>ni vi</b>	<b>ili</b>	<b>oni</b>

**ĝi** = English: it.

## 76 ni




oo  
- Jes, - respondas la instruisto, - infano estas homo. Sed...

Estas lingvoj en kiuj arbo estas «knabo». Estas lingvoj en kiuj arbo estas «knabino». **Ni** parolis pri tio. Sed arbo ne estas knabo! Ankaŭ knabino ĝi ne estas. **Ni**, esperantistoj, diras pri arbo «ĝi». Kaj pri infano...

oo

### Du inoj parolas pri la infano



- Jes, *mia*. Tio estas *mia* infano... Kio? Ne, ĝi ne iras. Ĝi ne iras, ne staras, kaj ne parolas. Sed ĝi sidas!

- Ĉu ĝi estos instruistino?

– Instru'ist'in'o?! ...Sed tio ne estas knabino (knab'in'o)!

– Ĉu?

Se vi rigardas infanon, kaj diras pri ĝi vortojn «ĉu?» (ĉu ino? ĉu ne ino?), diru pri la infano «ĝi»!

Jes, pri infano kiu ne parolas sed parolos **ni** diras «ĝi». Sed ne pri knabo-lernanto. Pri knabo **ni** diras «li»; kaj pri knabino...

mi	vi	li	ŝi	ĝi	si
<b>ni</b>	vi	ili			oni

**ni** = English: we.

## 77 Ŝi

Kion ni diras pri knabino? Pri homo-ino ni diras "**ŝi**".

Kvarka estas knabino – **ŝi** estas knabino. Instruistino instruas – **ŝi** instruas.



<i>Infano – ĝi.</i>	<i>Infanoj – ili.</i>
<i>Knabo – li.</i>	<i>Knaboj – ili.</i>
<i>Knabino – ŝi.</i>	<i>Knabinoj – ili.</i>
	<i>Geknaboj – ili.</i>



### Lernantino Lea rakontas

Bo desegnas, – rakontas Lea. – Ĝi staras kaj desegnas, – rakontas ŝi. – Sed ne Ao. Ao parolas. Nur parolas. Kion ĝi parolas? Ĝi el-parolas (el'parol'as) u-vortojn:

– Ne desegnu (desegn'u) arbojn, – diras Ao al Bo, – vi birdon desegnu!... ne, ne birdon, domon. Desegnu domon, Bo. Jes, domon. Sed ne la domon, Bo, ne la domon!.. (la = tiu, tiu ĉi).

– Iru al hundoj, Ao, – diras Bo.

– Ĉu vi diris al mi «iru al hundoj»?!


– Jes, – respondas Bo, – al hundoj.



mi vi	li ŝi ĝi	si
ni vi	ili	oni

**ŝi** = English: she.

## 78 volas



oo

– Nemo! – diras Ao al Nemo, – Bo ne desegnas. Bo ne desegnas kion mi diras al ĝi desegni (desegn'i)!

(Sed kio estas tiu Nemo? Ĉu ankaŭ Nemo estas ne'hom'o?)

– Sed vi ne diru, – respondas Nemo, – vi ne diru al Bo «desegnu». Vi desegnu. Jes, ankaŭ vi desegnu. Desegnu birdon, Ao.

– Mi ne **volas**, – respondas Ao. – Mi ne **volas** desegni (desegn'i) birdon.

– Desegnu domon.

– Ne, ankaŭ domon mi ne **volas** desegni.

– Sed kion vi **volas** fari?

– Mi **volas** sidi.

– Sidu.

– Ne, mi ne **volas**. Nun mi ne **volas** sidi.

Mi **volas** stari kaj desegni.

– Desegnu. Desegnu hundon, Ao.

- Hundon?! Nemo, vi ne diru al mi «de-segnu hundon», kaj Bo, ĝi ne diru al mi «iru al hundoj»!

- Iru al mi, Ao, - diras Nemo.

- Ĉu mi... Ĉu vi... Jes, Nemo, jes. Mi iras. Mi iras al vi, Nemo.

oo

- *Kiu diras al la nehomoj kion ili faru? Kaj... kiu faris ilin, tiujn nehomojn? Ĉu Nemo?*

- *Jes, Nemo.*

- *Sed nehomo Ao ne **volas** desegni. Kion tiu Nemo faros pri ĝi?*

- *Mi estas infano, - diras knabo, - sed mi **volas** esti instruisto kaj instrui infanojn. Mi **volas** instrui ilin legi librojn, desegni arbojn, rakonti rakontojn. Mi instruos ilin paroli esperanton...*

- *Lernu, knabo, lernu fari tion!*

- *Ne, mi ne **volas** lerni. Mi **volas** instrui.*

**volas** = English: will.

## 79 a ŭ

oo

### Lernantino Lea rakontas

Nemo diris al Ao «iru», kaj Ao iras. Ĝi iras al Nemo.

Ĉu ankaŭ Bo iras? Jes, ankaŭ Bo. Sed ĝi iras ne al Nemo. Ĝi iras ne al Nemo, sed al geknaboj Triko kaj Kvarka.

– Ĉu vi estas knabo a ŭ knabino? – demandas Bo Trikon (Triko'n).

– Mi estas knabo, – respondas Triko. Mia nomo estas Triko.

– Ĉu ankaŭ vi, – demandas Bo Kvarkan, – estas knabo?

– Ne, mi ne estas knabo, mi estas knabino, – respondas ŝi, – mia nomo estas Kvarka. Ni estas homoj. Mi kaj Triko estas homoj. Kaj vi, ĉu ankaŭ vi estas homo?

– Ne, Kvarka, – respondas Bo, – mi ne estas homo. Mi estas nehomo. Mia nomo estas Bo. Kion vi faras, Kvarka?

– Mi? Mi sidas, – respondas ŝi, – sed ne vi, Bo. Vi staras. Ĉu vi volas sidi? Kion vi volas: stari a ŭ sidi?

– Mi volas sidi, Kvarka, kaj mi sidas. Sed ne nun. Nun mi volas stari kaj desegni.

– Kion vi volas desegni, arbon a ŭ domon?

– Vin (vi'n), Kvarka, vin. Mi volas desegni vin.

Bo staras kaj desegnas. Kiun ĝi desegnas, Trikon **aŭ** Kvarkan (Kvarka'n)? Ĝi desegnas Kvarkan.

oo

**aŭ** = English: or.

## 80   **se**

oo

### Lernantino Lea rakontas

– Ankaŭ mi desegnas, – diras Triko al Bo. **Se** mi volas desegni, ankaŭ mi desegnas. Jes, Bo, mi faras nur tion kion mi volas fari: **se** mi volas iri aŭ stari, mi iras aŭ staras. **Se** mi volas legi, mi sidas kaj legas. Jes, ankaŭ mi legas librojn. Sed ne diru al mi «legu»! Ĉu mi legu tion kion mi ne volas legi? Ne kaj ne! Mi faras nur kion mi volas fari.


oo

Ĉu ankaŭ en **via** domo, **leganto**, estas knabo kiu faras nur kion li volas **fari**? **Se** jes, diru al li: Lernu, knabo! Lernu esti **homo**. ...Ĉu? Kaj kion li respondas?

...Ne, li ne estas homo. Knabo kiu faras nur kion li volas **fari**, ne estas homo. Se oni volas **esti** homo, oni lernas, kaj ne nur kion instruas instruistoj. Se homoj diras al infano «faru!», la infano lernu **fari** tion.

**se** = English: if

## 81 ĉi



### Lernantino Lea rakontas

Nemo. Tio estas Nemo. (Sed kio li estas, tiu **ĉi** Nemo?)

- Desegnoj (desegn'o'j), - diras Nemo, - tio estas desegnoj. Mi diris al miaj nehomoj


«desegnu», kaj ili desegnis.

Kion ili desegnis? Ili desegnis kion mi diris al ili desegni!

Tio estas domo. Tio estas hundo. Tio estas birdo. **Ĉi** tio estas... Sed kio estas **ĉi** tio, ĉu arbo? Ĉu homo?... Ne, ne homo... Kion tiu Bo desegnis?!

...Ne, ne Bo. Se mi diras «ĉu» kaj «ĉu», tion desegnis ne Bo sed Ao. Jes, Ao. **Ĉi**-«arbo» desegnis Ao.

oo



– Jes, tiujn desegnojn desegnis Bo. Pri kiu el ili Nemo diras «**ĉi** tio», kaj pri kiu li diras – «tio»?

**Ĉi** tio – diras Nemo, – estas hundo, – Tio, estas domo kaj birdo..

Ni diras kaj: «**Ĉi** tio estas hundo», kaj: «tio **ĉi** estas hundo». (ĉi tio = tio ĉi).

Ni diras ankaŭ: «**ĉi**-hundo ne estas mia».

**ĉi** = English: proximity.

## 82 **havas**

oo

### Lernantino Lea rakontas

– Triko, – diras nehomo Bo al knabo Triko,  
– mi volas demandi vin.

– Demandu, Bo.

– Vi, homoj, diras: «**mi**a», «**vi**a», «**ni**a»...  
Kio estas «**mi**a»?

– Sed ankaŭ vi diras tiujn ĉi vortojn, –  
respondas Triko, – ĉu vi ne diras «**mi**a libro»  
aŭ «**mi**a arbo»?

– Ne, Triko, ni ne diras tion.

– Sed ni diras. Ni, homoj, **havas**. Jes, ni  
**havis** kaj **havas**. Ĉu tiu kiu ne **havas** estas  
homo?! Mi **havas** librojn. Unu el **mi**a j libroj  
estas libro pri birdoj. Ĉi-libro ne estas «**ni**a»  
libro. Ĝi estas **mi**a. Nur **mi**a. Se Kvarka volos  
legi ĝin, ŝi diru al mi pri tio.

Jes, mi **havas** libron pri birdoj, kaj libron  
pri arboj... sed mi ne **havas** arbojn. Ankaŭ  
birdojn mi ne **havas**.

Sed estas geknaboj (ge'knab'oj) kiuj  
**havas** ne nur libron pri birdoj. Ili **havas** bir-  
dojn. Ankaŭ arbojn ili **havas**.

oo

**havi** = English: have.



## 83 si

oo  
– Nomoj de la geknaboj, – rakontas Triko,  
– estas Kvinko kaj Seska. Ili loĝas en **sia**  
domo. Jes, ankaŭ ni, mi kaj Kvarka, ankaŭ ni  
havas domon. Ni ne loĝas en ilia domo (en  
domo de Kvinko kaj Seska)! Ni loĝas en nia  
domo... Sed arbojn ni ne havas.

Se mi volas desegni arbojn, mi iras al la  
geknaboj. Kaj ni desegnas. Mi desegnas iliajn  
(ili'a'j'n) arbojn, kaj ili desegnas la **siajn**.

(La = arbojn; **si'a**'j'n = kiujn **ili** havas.).

oo

### ili (homoj kaj ne-homoj) havas domon:

1)

*Mi loĝas en mia domo.*

*Ni loĝas en nia domo.*

2)

*Vi loĝas en via domo.*

3)


*Li loĝas en **sia** domo.*

*Ŝi loĝas en **sia** domo.*


*Ĝi (birdo) loĝas en **sia** «domo».*

*Ili loĝas en **sia** domo (aŭ: en **siaj** domoj).*

- Sed kiu loĝas en «li'a», «ŝi'a», «ĝi'a», «ili'a» domo?
- Tiu kiu ne havas la **sian** (la = domon)!



*Ili parolas pri ili**a**j nomoj.*




*Ili parolas pri **sia**j nomoj!*

mi	vi	li	ŝi	ĝi	si
ni	vi	ili			oni

**si** = English: Reflexive pronoun.  
Refers only to the 3-d person.

## 84 - a



Tio estas tri homoj. Unu'a (unu'a) el ili iras, la du'a (du'a) staras. La tri'a (tri'a) - flugas.

Vorto «ne» estas dulitera (du'liter'a) vorto. Vorto «jes» estas vorto trilitera (tri'liter'a).

Parizo estas urbo en Francio. Tio estas franci'a (franc'i'a) urbo.

Urboj Tokio, Londono kaj Pekino ne estas franci'aj urboj. Tio estas urboj japani'a, briti'a, kaj ĉini'a (ĉin'i'a).

Francoj parolas la francan (la = lingvon).


Franca aboc'o (a, bo, co, do,...) ne havas literon ŝo. Ŝo estas ne franca sed esperanta litero.

Mia arbo, via birdo, nia domo.  
Ili (Triko kaj Kvarka) loĝas ne en «ilia»,  
sed en sia domo.


Vortoj «kio» kaj «kiu» estas demandaj  
(demand'a'j) vortoj.

**-a** = English: adverb; possess.

## 85 rigardas



Bo **rigardas** la birdon. La birdo **rigardas** la hundon. La hundo **rigardas** Trikon. Ĉu ankaŭ Triko **rigardas**? Jes, ankaŭ Triko **rigardas**. Triko **rigardas** al Bo. (Aŭ: Triko **rigardas** Bo-n).




## Arbaro



### Lernantino Lea rakontas

Bo kaj Triko iras en arbaro (arb'ar'o). Ili iras kaj parolas. Ili parolas pri homoj kiuj havas, pri nehomoj kiuj ne havas. Pri libroj kiujn ili legis, kaj pri tiuj kiujn ili legos...




- **Rigardu, rigardu**, - diras Triko al Bo.
- Kion mi **rigardu**?
- Birdon, **rigardu** la birdon, Bo!
- Jes, - diras Bo, - tio estas birdo. Tio estas unu el viaj birdoj. Mi desegnis ĝin. Ĝi loĝas en tiu ĉi arbo, ĉu?
- Jes, - respondas Triko, - ĝi loĝas en la arbo.



**rigardi** = English: look.


## 86 vidas



*La homo rigardas, sed ne **vidas**.*



*Nun la homo **vidas**.*




## Arbaro

oo

– Sed ne niaj birdoj, – diras Bo, – niaj birdoj ne loĝas en viaj arboj aŭ en viaj arbaroj. Ĉu mi desegnu al vi unun (unu'n) el niaj birdoj?

– Jes, Bo, desegnu, desegnu ĝin.  
Bo desegnas.



– Rigardu, Triko, – diras ĝi, – tio estas unu el niaj birdoj.

– Sed... sed tio ne estas birdo! En mia libro, kiu rakontas pri birdoj...

– Jes, en viaj libroj vi ne **vidis** kaj ne **vidos** niajn birdojn. Sed se vi volas **vidi** ilin...

– Ĉu en via libro?

– Ne, ne en libro. Se vi kaj Kvarka volas **vidi** niajn birdojn, diru al mi. Mi diros pri tio al Nemo, kaj... Kaj vi **vidos**. Sed nur se vi volas. Nur se vi volas **vidi** tion kion **vidis** ni,

nehomoj, kaj kion **vid**is li, nia Nemo.

– Jes, Bo, jes, ni volas! Diru al via Nemo: «Triko kaj Kvarka volas. Ankaŭ ili volas **vid** tion kion **vid**is Ao kaj Bo».

oo

– Ĉu la infanoj iros en ar**bar**ojn (ar**b'ar'o'j'n**), en kiuj loĝas Nemo kaj liaj nehomoj, en ar**bar**ojn kie flugas tiuj ĉi «birdoj»?

Ĉu vi, leg**anto**, volas leg**i** pri tio?

...Jes, sed Pablo, ĉu ankaŭ Pablo volas tion?

**vid**i = English: see, sight.

## 87 **p o v a s**




Birdoj flugas. Birdoj **pov**as flug**i**. Birdo, se ĝi volas, **pov**as flug**i** el lando en landon.

Ĉu ankaŭ hundoj flugas? Ĉu ankaŭ hundoj, se ili volas, **pov**as flug**i** el lando en landon? Ne, hundoj ne **pov**as far**i** tion.

Ankaŭ ni, homoj, ne flugis. Ankaŭ ni ne **pov**is flug**i**. Sed nun ni **pov**as far**i** tion.

Jes, ni, nunaj (nun'a'j) homoj, ni **pov**as flug**i**!





Andreo Kim Pablo Lea

oo

- Instruisto, - diras Pablo, - Lea rakontas kaj rakontas... Sed pri kio ŝi rakontas? Ŝi rakontas al ni... pri infanoj! Jes, vi estas nia instruisto kaj vi instruas nin. Jes, ni estas viaj lernantoj... Sed, instruisto, ni ne estas infanoj! Kaj...

- Jes, vi ne estas infanoj - respondas la instruisto, - sed ĉu nur infanoj lernas? Ne, ne nur. Ankaŭ ni, instruistoj, jes, ankaŭ ni lernas. Ĉu mi povis instrui Esperanton? Ne, ne povis. Sed mi lernis. Nun mi povas instrui, kaj mi instruas la lingvon.

- Jes, - diras Pablo, - vi povas instrui. Jes, ni povas lerni. Sed mi volis paroli ne pri tio...

oo

- *Kion diras Pablo?*

- *Pablo diras: «Lea rakontas pri infanoj».*

- *Kaj kion diras la instruisto?*

- *«Ne nur infanoj povas lerni», - diras la instruisto.*

**povas** = English: can, be able.

## 88 - **i**

Vortoj *-is, -as, -os, -u*, kaj **-i** parolas pri faroj (far'o'j): pri tio kion homoj (kaj ne nur homoj) far'as, far'is, far'os aŭ far'u. Kaj ankaŭ pri tio kion ili povas (volas, lernas...) **fari**.

Kion diris knabo Triko al nehomino Bo?

«Se mi volas ir'**i** aŭ star'**i**, – diris li, – mi iras aŭ staras. Se mi volas leg'**i** (aŭ: flug'**i**, demand'**i**, desegn'**i**) mi legas (flugas, demandas, desegnas).»

– Vi legas, leg**anto**. Jes, vi povas leg**i**. Sed ĉu vi povas parol'**i**?

Se vi volas parol'**i**, parolu! Rakontu pri tio kion vi legis!

**-i** = English: infinitive.

## 89 ke

oo

- Instruisto, - diras Pablo, - mi parolis ne pri tio kiu povas lerni. Mi volis diri nur **ke** rakonto de Lea estas rakonto pri infanoj. Sed ni ne estas infanoj, kaj... Kaj ne nur Lea, ankaŭ mi, - diras Pablo, - jes, ankaŭ mi volas rakonti!

- Pri kio vi volas rakonti?

- Mi volas rakonti pri ciferoj.

- Pablo, - diras Kim al Pablo, - Lea rakontis al ni pri Triko kaj Kvarka. Jes, ili estas infanoj. Sed ne nur pri infanoj rakontis Lea. Ĉu Nemo estas infano?! Ne! Ankaŭ Ao kaj Bo ne estas infanoj. Mi volas **ke** Lea rakontu.

- Ankaŭ mi, - diras la instruisto, - ankaŭ mi volas **ke** ŝi rakontu. Sed ne nur ŝi!

oo

- *Kion volas Kim?*

- *Li volas **ke** Lea rakontu.*

- *Kaj instruisto, kion volas la instruisto?*

- *La instruisto volas **ke** de nun rakontu ne Lea sed Pablo.*



## Rakontas Pablo

– Ankaŭ mi estas instruisto, – diras Pablo,  
– sed ne pri Esperanto. Mi estas instruisto pri  
ciferoj. Mi parolos pri ciferoj.

Nom**o**j de unu**a**j kvin cifer**o**j estas nul,  
unu, du, tri kaj kvar...

– Ne, ne, – diras la instruisto, – ne diru  
«nom**o**j» aŭ «unu**a**j». Diru «n**o**moj» kaj  
«un**u**aj».

**A E I O U**

Rigardu ni tiujn ĉi literojn. Tio estas  
literoj A, E, I, O, U. Diru: a-a-a, e-e-e, i-i-i,  
o-o-o, u-u-u. Jes, vi povas diri tion.

Sed: ĉu vi povas diri t-t-t aŭ k-k-k? Ne, vi  
ne povas.

**Londono**

Rigardu la vorton, lernantoj, tiun ĉi vor-  
ton «L**o**ndon**o**», kaj diru, ĉu ĝi enhavas  
(en'hav'as: havas en'e de si) tiujn ĉi literojn,  
literojn **a, e, i, o, u**?

Jes, ĝi enhavas. Vorto «L**o**ndon**o**» en-  
havas tri literojn **o**.

London**O**. Tio estas unua el la tri literoj «**o**». En vorto «London**o**» ĝi estas unua. Ni nomu (nom'u) ĝin unua.

Sed ĉu ni diras London**O**?! Ne, ni ne diras tion.

L**O**ndon**o**. Tio estas tria litero **o**. Tria.

Ĉu ni diras L**O**ndon**o**? Ne, ankaŭ tion ni ne diras.

Lond**O**no. Tio estas dua litero **o**. **DUA!**

Jes, ni diras Lond**O**no.

Ni diras Brit**i**o (el literoj **a, e, i, o, u**, litero **i** estas ĉi tie la dua), la**a**ndo, pa**r**o**l**as, instru**i**sto, resp**o**ndo, cif**e**ro, **U**rbo...

Ne diru «lernant**O**» aŭ «l**e**rnanto». «Ler**n**ant**o**», diru «lern**a**nto»!

oo

**ke** = English: that (conj).

# 90 kvin

**Kvin** = 5.

oo  
- Kaj nun parolu vi, Pablo, - diras la instruisto.

## Parolas Pablo

Du kaj tri, - diras Pablo, - estas **kvin**.

oo

**kvin** = English: five.

# 91 ses

**Ses** = 6.

oo

Tri kaj tri estas **ses**.

oo

**ses** = English: six.

# 92 sep

Sep = 7.

oo

Kvar kaj tri estas **sep**.

oo

**sep** = English: seven.

# 93 ok

Ok = 8.

oo

Kvar kaj kvar estas ok.

oo

**ok** = English: eight.

# 94 naŭ

**Naŭ** = 9.

oo  
Kvin kaj kvar estas naŭ.  
oo

**naŭ** = English: nine.

## 95 dek

oo  
**Dek** = 10.  
Kvin kaj kvin estas **dek**.

10 dek	20 dudek	48 kvardek ok
11 dek unu	21 dudek unu	50 kvindek
12 dek du	22 dudek du	59 kvindek naŭ
13 dek tri	23 dudek tri	60 sesdek
14 dek kvar	24 dudek kvar	61 sesdek unu
15 dek kvin	25 dudek kvin	70 sepdek
16 dek ses	30 tridek	72 sepdek du
17 dek sep	36 tridek ses	80 okdek
18 dek ok	37 tridek sep	88 okdek ok
19 dek naŭ	40 kvardek	99 naŭdek naŭ



Ĉu 10 (**dek**) estas cifero? Ne, ne estas.  
0, 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9.  
Tio, nur tio estas ciferoj.

- Ĉu? - diras Andreo, - sed tio, kio estas  
tio?!

I	II	III	IV	V	VI	VII	VIII	IX	X	L	C	D	M
---	----	-----	----	---	----	-----	------	----	---	---	---	---	---

- ...Jes, Andreo, - respondas Pablo,  
ankaŭ tio estas ciferoj: VIII = ok, IX = naŭ, X  
= dek, L = 50 , C = 100, D = 500, M = 1000.

Sed mi parolas ne pri tiuj ĉi ciferoj, mi  
parolas pri ciferoj nunaj, pri niaj nunaj cifer-  
oj.


oo

**dek** = English: ten.


## 96 **kiom**

Ni konas demandajn vortojn «kio» kaj, «kiu».


Ankaŭ vorto «**kiom**» estas demanda vorto.


$$1 + 1 = 2$$

- **Kiom** estas unu kaj unu?
- Unu kaj unu estas du.


$$0 + 0 = 0$$

- **Kiom** estas nul kaj nul?
- Nul kaj nul estas nul.


$$27 + 68 = 95$$

- **Kiom** estas dudek sep kaj sesdek ok?
- Dudek sep kaj sesdek ok estas naŭdek kvin.

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
kiam	tiam	iam	ĉiam	neniam
kie	tie	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
<b>kiom</b>	tiom	iom	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**kiom** = English: how much.

## 97 nombro

oo

### Rakontas Pablo

Jes, 10 (dek) ne estas cifero. 10 estas **nombro**. **Nombro**n 10 faras du ciferoj. Dek estas ducifera (du'cifer'a) **nombro**. **Nombro** povas esti ankaŭ tri- dek- aŭ naŭdek-naŭ-cifera, ĉu ne?

Sed... ĉu estas **nombroj** unuciferaj? Jes, estas. **Nombro** povas esti ankaŭ unucifera:

Se ni diras «Tio estas cifero sep», ni

parolas ne pri **nombro**, sed pri cifero, pri cifero sep.

Sed se ni diras «la sep infanoj legas», ni parolas ne pri cifero, sed pri **nombro**.

oo

**nombro** = English: amount.

## 98 da

oo

Jes, se ni diras: «la sep infanoj legas», ni parolas ne pri cifero sep, sed pri infanoj. Pri nombro **da** infanoj.

Kiom **da** infanoj legas? Sep. La sepo (sep'o) **da** infanoj legas.

Tiu ĉi «7» estas nombro. Unucifera nombro. Tio estas nombro **da** infanoj.

Vorto «**da**»... Ĉu ni povas demandi «kiom la infanoj legas»? Jes, ni povas... sed pri kio la demando? Ĉu pri tio: 🕒? Ĉu pri nombro **da** infanoj? Ĉu pri nombro **da** libroj kiujn ili legas?!

oo

Ni diru **da**:

Kiom **da** infanoj legas?

Kiom **da** libroj legis ili?

Kiom **da** 🕒 ili legis?

La instruisto:

«98 **da**».

Rigardu, lern**antoj**, tiun ĉi nombron, nombron 98 (naŭdek ok). Kion ĝi diras al ni? Ĝi diras al ni ke nombro da vortoj kiujn ni lernis estas naŭdek sep, ke nun ni lernas naŭdek-okan vorton, vorton **da**.

(Naŭdek ok vortoj; naŭdek-oka vorto).

– Sed ĉu vi povas diri kiu el la vortoj estis vorto unua? – Jes, lern**antoj**, nia unua vorto estis vorto «litero».

**da** = English:quantity of.

# 99 cent

**Cent** = 100.

oo

Kiom da ciferoj faras nombron **cent**?

Tri. Nombro **cent** estas tricifera nombro.

100 **cent**.

101 **cent** unu.

196 **cent** naŭdek ses.

268 du**cent** sesdek ok.

583 kvin**cent** okdek tri.

725 sep**cent** dudek kvin.

839 ok**cent** tridek naŭ.

999 naŭ**cent** naŭdek naŭ.

oo

*999 naŭcent naŭdek naŭ.*

*999-a (naŭcent-naŭdek-naŭ**a**)*

**cent** = English: hundred.

# 100 mil

**Mil** = 1000.

oo

1 000	<b>mil.</b>
2 000	du <b>mil.</b>
2 005	du <b>mil</b> kvin.
20 050	dudek <b>mil</b> kvindek.
623 471	sescent dudek tri <b>mil</b> kvarcent sepdek unu.


oo

**mil** = *English: thousand.*

# 101 scias

oo

- Pablo rakontis al ni, - diras la instruisto, - kaj nun ni **scias**. Ni **scias** ke «dek» estas vorto. Ni **scias** ke 10 estas ne vorto, ne cifero, sed nombro, ducifera nombro. Ni **scias** ankaŭ ke 300 001 estas tricent mil unu.



Ĉu tiu ĉi homo **scipovas** vidi? Ne, li ne **scipovas**.

**Scipovas** (**sci**'pov'as): **scias** kaj povas.

**sci**i = English: know.

## 102 **komprenas**

oo

- Vi scias, lernantoj, - diras la instruisto,  
- kio mi estas. Jes, vi scias ke mi estas instruisto. Sed mi instruas lingvojn. Mi ne estas instruisto pri nombroj kaj ciferoj. Kaj nun mi volas diri al vi, lernantoj, ke mi ne **komprenas**. Jes, mi ne **komprenas**. Mi ne **komprenas** kio estas nulo (nul'o)!

Kvaro da arboj estas arboj. (Kvar arboj; kvaro da arboj.) Ĉu ankaŭ nulo da arboj estas arboj?... Ne, ne estas. Nulo da arboj ne estas arboj!



Nulo da infanoj ne estas infanoj, nulo da desegnoj ne estas desegnoj... Kaj diru al mi, ĉu ciferoj **IV**, **VIII**, **IX**... enhavas (en'hav'as = havas ene de si) ciferon nul?

Ili ne enhavas! Tiuj ĉi ciferoj enhavas ciferon kvindek (L = 50), sed ne nulon...

Jes, mi ne **komprenas** kio estas nulo. Ĉu vi, Pablo, povas rakonti al ni pri tio?

- Mi ne scias, - diras Pablo, - mi ne scias ĉu mi scipovas (sci'pov'as = scias kaj povas) fari tion, sed...

oo

**kompreni** = English: understand.

## 103 **konas**

oo

### Rakontas Pablo

- Nun, - diras Pablo, ni **konas** cent du vortojn de lingvo Esperanto, kaj priparolas (pri'parol'as, parolas pri) vorton cent-trian.

Sed diru, gelernantoj, ĉu homo kiu **konas** cent du, aŭ cent tri vortoj de la angla aŭ de la franca, ĉu li scipovas paroli pri ciferoj kaj


nombroj?! Ne, li ne scipovas. Ankaŭ mi ne scipovas.

Se ni volas paroli pri cifero «nul» ni **konu** ankaŭ vortojn «sur», «kie» kaj «loko».

oo

**koni** = English: know, be acquainted with.

## 104 **sur**




– Rigardu la homon, leganto, kaj diru: **sur** kio staras tiu ĉi homo? Li staras **sur** la domo.

Kaj hundo, ĉu vi vidas la hundon? **Sur** kio ĝi staras? Ĝi staras **sur** la arbo.

**sur** = English: on, upon.

# 105 kie




- Tio estas unu domo kaj kvin arboj. Sed **kie** ili staras? Ĉu en Francio, ĉu en Anglio? Ĉu en urbo, ĉu ne?

**Kie** staras tiu ĉi domo kaj tiuj ĉi arboj?

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
kiam	tiam	iam	ĉiam	neniam
<b>kie</b>	tie	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
<b>kiom</b>	tiom	iom	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**kie** = English: where, in which (what) place.

# 106 loko




arb**ar**o

Ĉu vi konas nomon de **loko**, kie staras ne dekoj, (dek'o'j), ne centoj (cent'o'j), sed miloj (mil'o'j) da arboj?

Jes, tio estas arb**ar**o. Nomo de tiu **loko** estas «arb'**ar**'o». (Vorto **ar** estos nia cent-dek-oka vorto).



Nun, – diras Pablo, – ni konas vortojn «sur», «kie» kaj «**loko**». Nun ni scipovas paroli pri nulo.



Jes, ankaŭ tio estas **lokoj**. Sed sur tiuj ĉi **lokoj** staras ne hundoj. Tio estas **lokoj** sur kiuj staras ciferoj.

— — — — 7

Tiu ĉi cifero, cifero sep, staras sur unua **loko**, sur loko de unuoj (unu'o'j). Kiom da unuoj? Sep. Jes, tio estas nombro sep.

— — — — 7—

Cifero kiu staras sur dua **loko** diras al ni pri nombro da dekoj (dek'o'j). Kiom da dekoj? Sep. Sepo da dekoj. Tio estas nombro sepdek.

— — — — 70

Sed de kio ni scias ke la cifero, cifero sep staras sur dua **loko**, sur **loko** de dekoj, se ni ne vidas tiujn ĉi **lokojn** ( \_ \_ \_)?

Nulo, nulo montras al ni tion!

700000

Kie staras cifero sep nun, sur kiu **loko** ĝi staras?

Ne rigardu la «lokojn» ( \_ \_ \_ ). Rigardu la kvin nulojn, kaj vi vidos ke la cifero staras sur sesa **loko**.

Kion diras al ni cifero sep, kiu staras sur sesa **loko**? Ĝi diras al ni ke nomo de la nombro estas septcent mil 700 000.

$7 \cdot 10^5$ . Kio estas nomo de tiu nombro?

Rigardu la ciferon kvin. Cifero kvin diras al ni pri kvin da **lokoj**, kaj pri tio ke cifero sep staras sur sesa **loko**. Jes, ankaŭ tio estas nombro sepcent mil. ( $7 \cdot 10^5 = 700\,000$ ).

oo

**loko** = English: place.

## 107 **raketo**

oo

– Jes, – diras la instruisto, – mi komprenas. Nun mi komprenas kio estas nulo. Sidu, Pablo. Kaj nun...

Sed mi vidas ke ankaŭ Kim volas rakonti. Pri kio vi volas rakonti?

– Mi volas rakonti, – diras Kim, – pri libro «Aelita» de A.Tolstoj (1883–1945).

Ne, tio ne estas Leo Tolstoj (1828–1910), libron de kiu «Milito kaj Paco» vi legis. Tio estas A.Tolstoj.

Nomo de la libro estas «Aelita».

«Aelita» estas ne nur nomo de la libro. Tio estas ankaŭ nomo de ino.

– Jes, Kim, rakontu, – diras la instruisto. Rakontu al ni pri «Aelita».

oo




ankaŭ la infanoj sciu tion kion scias la homo.

- **Por** afluigi malproksiman landon birdo flugas al ĝi, ĉu ne? Sed estas lokoj en kiuj birdo ne povas flugi... **Por** flugi en tiuj lokoj ni, homoj, faras raketojn.

**por** = English: for.

## 109 **Mars**o



- La raketon, - diras Alko, - mi faris por flugi al **Mars**o.

- Ĉu vi povas rakonti al mi pri **Mars**o? - demandas Skajlo.


- Jes, mi povas. Sed vi scias, Skajlo, ke ni, homoj, ne estis sur **Mars**o. Ni nur rigardis kaj rigardas ĝin.





**Marso** = English: Mars.

## 110 Tero



oo

Jes. Ni, homoj, rigardis kaj rigardas Marson. Sed de kie ni rigardas ĝin? Ni rigardas ĝin de nia **Tero**.


Kion ni povas vidi de **Tero**? Ĉu ni povas vidi marsajn birdojn, arbojn, domojn aŭ urbojn? Ne, ne povas. De **Tero** ni ne povas vidi ilin.

Sed homoj rigardas Marson, kaj ili rakontas. Ili rakontas pri tio kion ili vidas.

oo

**Tero** = English: Earth.

# 111 planedo



Ĉu vi scias, leganto, ke estas du vortoj: **tero** kaj **Tero**?

Kio estas **Tero**? **Tero** estas nia **planedo**.

Kaj kio estas **tero**? Por ni, homoj, **tero** estas tiuj lokoj sur **planedo** Tero, sur kiuj staras ni, niaj arboj, niaj urboj kaj domoj.

oo

- Jes, - diras Skajlo, - mi scias ke Marso kaj Tero estas **planedoj**... Diru al mi, Alko, ĉu estas homoj sur **planedo** Marso?

- Tion mi ne scias. Sed tiuj kiuj rigardas la planedon diras ke ili vidas... Ili ne scias kio estas tio, sed povas, povas esti ke tion, kion ili vidas, faris homoj. Marsaj homoj.

oo

**planedo** = English: planet.

## 112 oni

Homoj rakontas, ĉu ne? **Oni** rakontas pri tio kio estis, **oni** rakontas pri tio kio ne estis. **Oni** rakontas pri tio kion **oni** scias, kaj ankaŭ pri tio kion **oni** ne scias. Homoj rakontis kaj rakontas.


Kio ili estis, tiuj homoj kiuj rakontis pri Dedalo kaj Ikaro? Nun oni ne konas ilin... Kaj ĉu ili, Dedalo kaj Ikaro, ĉu ili flugis? Ankaŭ tion **oni** ne scias. **Oni** rakontas...

Sed tiu rakonto, rakonto pri Dedalo kaj Ikaro, diras al ni ke **oni** volis, **oni** volis flugi!

mi vi li ŝi ĝi si  
ni vi ili oni

**oni** = English: one, they, folks, people.


## 113 Suno



**Suno** ne estas planedo. **Suno** havas planedojn. Kiom da planedoj? Nun ni scias pri naŭ da ili.

**Suno** = English: Sun.

## 114 ek



1. La homo sidas.
2. La homo ne sidas. La homo ne staras.

La homo **ek**staras (**ek**'star'as).

3. La homo staras.
4. La homo ne iras. Li **ek**iras.
5. La homo iras.
6. La homo **ek**sidas.

Kion faris Dedalo por **ek**flugi?

Onidire (oni'dir'e = oni diras ke...) li faris tion kion birdoj ne faras sed havas. Li faris tion por si, kaj por sia knabo Ikaro. Kaj ili **ek**flugis.


- Ne flugu al suno! - diris Dedalo al Ikaro. Sed Ikaro **ek**flugis: li volis flugi al ĝi...

El la rakonto ni vidas ke tiuj kiuj rakontis ĝin, ne sciis kio estas Suno. Ili ne sciis ankaŭ ke Tero estas nur unu el planedoj de Suno.

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	ig
iĝ	il	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**ek** = English: the commencement of a continuous acting.

## 115 stelo



*Sed ni, nunaj homoj, ni scias. Ni scias ke Suno estas **stelo**. Nia stelo.*

*Alko ne flugos al steloj. Li ne estas Ikaro. Li flugos al Marso, al planedo Marso.*

*- Ĉu Aelita loĝas sur Marso?*

*- Jes, Aelita loĝas sur planedo Marso.*


**stelo** = English: star.

## 116 kiam

*- **Kiam** oni vidas stelojn? Ĉu oni povas vidi kaj stelojn kaj sunon?*

*- Ne, oni ne povas. **Kiam** oni vidas sunon, oni ne vidas stelojn. **Kiam** oni vidas stelojn oni ne vidas sunon.*

Ĉu, Ikaro, **kiam** li ekflugis (ek'flug'is), sciis, ke tio al kio li flugas estas ne suno sed Suno? Ne, li ne sciis.



Kaj ni, nunaj (nun'a'j) homoj, kion ni demandas **kiam** ni ne vidas Sunon? Ni demandas unu alian: «sed **kiam** ĝi eliros?!»

Sed Suno, stelo Suno, ĉu ĝi povas «eniri» aŭ «eliri»? Ne, ĝi ne povas. Nur suno «scipovas» tion.

Jes, ankaŭ ni, nunaj homoj, rigardas Sunon, sed nomas ĝin suno...

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	tiam	iam	ĉiam	neniam
<b>kie</b>	tie	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
<b>kiom</b>	tiom	iom	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**kiam** = English: when, at what time.

# 117 tiam

*Kiam oni vidas sunon? Sunon oni vidas **tiam** kiam oni ne vidas stelojn. Stelojn oni vidas **tiam** kiam oni ne vidas sunon.*

oo

- Sed kiam, - demandas Skajlo, - kiam homoj komprenis ke oni povas flugi al planedoj de Suno?

- En nia lando, - respondas Alko, - oni lernis tion el libroj de K.Ciolkovskij (1857-1935). Nur **tiam**, en nia lando, oni komprenis ke homoj scipovas fari tion.

Ciolkovskij, kiu estis nur infan-instruisto, parolis en siaj libroj pri raketoj, kaj pri flugo al planedoj de Suno. La librojn legis ne infanoj. La librojn legis nur tiuj kiuj volis scii kaj povis kompreni. Mi estis unu el tiuj homoj - diras Alko. - Kaj nun, Skajlo, vi vidas raketon en kiu mi flugos al Marso.


oo



kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	iam	ĉiam	neniam
<b>kie</b>	tie	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
<b>kiom</b>	tiom	iom	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu


**tiam** = English: then, at that time.

**118 ar**



arbo

arb-**ar**-o



oo

– En unu el lingvoj de nia planedo, – diras Alko, – en Esperanto, estas vorto «**ar**o».

Arbo estas arbo, ĉu ne? Jes, sed ne arb-**ar**o. Arb**ar**o (arb'**ar**'o) estas **ar**o da arboj.

Homo estas homo, sed hom**ar**o... Ni, ho-

moj kiuj loĝas sur planedo Tero, ni estas hom**aro**!

Suno estas nur unu el steloj de nia stel**aro**, sed estas ankaŭ stel**aroj** ne niaj...

oo

Ĉu nun vi povas diri, leg**anto**, kio estas vort**aro** (vort'**ar**'o)? Jes, vort**aro** estas **aro** da vortoj.

Tria rerakonto (re'arakont'o) de tiu ĉi 3-rerakonta lernolibro (lern'o'libr'o), enhavas vort**aron**. Enrigardu (en'rigard'u) ĝin! En la vort**aro** vi vidos vortojn kiujn ni lernis, lernas kaj lernos.

**Sed:** en esperanto-vortaroj vi ne vidos vorton... «arb'**ar**'o». Niaj Esperanto-vort'**ar**'o'j enhavas (en'hav'as) vorton «arb», vorton «**ar**», vorton «o», sed ne vorton «arb'**ar**'o»: «arb'**ar**'o» estas ne unu, sed tri vortoj!

aĉ	ad	aĵ	an	<b>ar</b>	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	ig
iĝ	il	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**ar** = English: collection, group, set.

## 119 alia

oo

- Tero. - diras Alko. - planedo Tero. Ni, homoj, loĝas sur ĝi, ni konas ĝin, ni parolas pri ĝi. Sed ne nur pri ĝi. Ni parolas ankaŭ pri aliaj planedoj de nia planedaro, unu el kiuj estas planedo Marso.

Mi ne scias ĉu estas homoj sur aliaj planedoj, mi ne scias ankaŭ ĉu estas homoj sur planedo Marso. Sed mi scios. Mi scios tion kion aliaj homoj ne scias!

Povas esti, Skajlo, ke ni vidos unu la alian. Kaj tiam mi rakontos. Sed ne pri tio kion oni diras, ne pri tio kion rakontas aliaj homoj. Tiam mi rakontos pri tio kion vidis mi. Pri tio kion mi vidis sur planedo Marso.

oo

**alia** = English: other.

# 120 kun

oo  
- Kiom da homoj flugos **kun** vi? - demandas Skajlo.

- **Kun** mi flugos nur unu homo, - respondas Alko. Ni flugos **kune**. Mi kaj li. Lia nomo estas Ansero.

oo  
***Kun** kiu parolas Alko? **Kun** Skajlo. Alko parolas **kun** Skajlo.*

*Ĉu **kune kun** Alko flugos aliaj homoj? Jes, sed ne homoj. **Kune kun** Alko flugos nur unu homo.*

oo  
Oni vidas homojn. Ili staras **kune** (**kun**'e). Ili staras kaj rigardas la raketon.

Du homoj eniras ĝin. Tio estas Alko kaj Ansero.

Ili eksidas, ekrigardas unu la alian.


- Ĉu ni ekflugu? - demandas Ansero.

- Jes, - respondas Alko, - ni ekflugu.

Homoj, kiuj staris por rigardi la ekflugon, deiris (de'ir'is). Kaj... Flugo!

Ili ekflugis. Homoj. Nur du homoj. Alko kaj Ansero flugas al Marso.

- Rigardu, - diras Alko, - ĉu vi vidas?



- Jes, - respondas Ansero, - mi vidas: tio estas nia Tero, tio estas steloj, kaj tio estas Suno...

- Ne rigardu Sunon, Ansero, - diras Alko, - ĉu oni ne diris al vi ke oni ne rigardu ĝin?

Sed Teron ili rigardas. Kiam ili vidas ĝin? Kaj... ĉu ili ĝin vidas?

Ili flugas, ili rigardas. Kaj ili vidas. Ili vidas tion kion aliaj homoj ne vidis, kaj ne povis vidi.




- *Kien flugas Alko kaj Ansero?*

- *Ili flugas al Marso.*


- *Ĉu sur tiu planedo loĝas homoj?*

**kun** = English: *ŝith, along.*

# 121 granda



La arbo estas **granda**.



La arbo ne estas **granda**.

Ne nur pri arbo, ankaŭ pri homo oni povas diri ke li estas **granda**.



«Kiam mi estos **granda**», – diras infano, – «ankaŭ mi flugos de nia Tero. Mi flugos tiam de planedo al planedo!»

Povas esti ke li flugos... Tiam oni diros pri li: «Tio estas **granda** homo!».

Sed Ciolkovskij, homo kiu komprenis ke homaro povas fari tion, ĉu li ne estis **granda**? Estis. Li estis unu el tiuj kiujn ni nomas «**granda** homo».

**granda** = English: great; big, large, vast.

## 122 pli




*Kiu el la du arboj estas **pli** granda, ĉu arbo unua? Jes la unua. Unua arbo estas **pli** granda.*

oo  
- Vi scias, Alko, - diras Ansero, - ke mi ne lernis. Jes, ankaŭ mi rigardis sunon, sed mi ne sciis ke tio estas Suno. Sed nun mi vidas. Mi vidas Sunon, mi vidas Teron, kaj mi vidas nun kiu el ili estas **pli** granda: tio estas Suno.

oo


**pli** = English: more.

# 123 ol



- Jes,- diras Alko, - Suno estas pli granda ol Tero. Suno estas pli granda ol cent niaj Teroj.

- Ĉu?! Kaj Marso, ĉu ankaŭ Marso estas pli granda ol Tero?



- Ne, ne estas. Marso ne estas pli granda ol Tero. Tero estas pli granda ol Marso.


Oni povas ankaŭ diri ke Tero estas pli «granda» ol naŭ Marsoj.




**ol** = English: than.




# 124 mal



La arbo estas granda.



La arbo estas malgranda.



– Sed ankaŭ Marso, – diras Alko, – ne estas planedo malgranda (**mal**'grand'a).

Se ni rigardas Teron, Marson kaj Merkuron, ni vidas ke:

- Tero estas pli granda ol Marso. Marso estas pli granda ol Merkuro.

Kaj:

- Merkuro estas malpli granda ol Marso, kaj Marso estas malpli granda ol Tero. (Aŭ:

Marso estas pli **mal**granda ol Tero).




- *Ĉu Ĉinio estas granda lando?*
- *Jes, ĝi estas granda.*
- *Ĉu ankaŭ Japanio estas granda?*
- *Ne, ĝi ne estas granda. Japanio estas **malpli** (**mal**'pli) granda ol Ĉinio.*


aĉ	ad	aĵ	an	<b>ar</b>	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	ig
iĝ	il	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
<b>mal</b>	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**mal** = English: exact opposite.

# 125 proksima



Homo «unu» estas **proksima** al la arbo.  
Homo «du» estas mal**proksima** de ĝi.



– Ĉu Marso estas **proksima** al Suno?  
– Ne, ĝi ne estas **proksima** al ĝi. Marso estas pli mal**proksima** de Suno ol Tero: Tero estas tria planedo de Suno, sed Marso – la kvara.

**Proksima** al...

Mal**proksima** de...

**proksima** = English: near, close.

## 126 **venas**

*Se oni volas vidi homon kiun oni konas, oni iras al li, ĉu? Oni iras, iras... kaj oni **venas**. Oni **venas** al domo kie loĝas la homo, oni **venas** en la domon.*

*Ankaŭ al vi **venas** homoj kiujn vi konas, ĉu? Kion vi faras kiam ili **venas**? Vi sidas kun ili. Vi sidas kaj parolas. Pri tio kion vi vidis, pri tio kion vi legis, pri tiuj homoj kiujn ankaŭ ili konas.*

*Se la homoj loĝas proksime, ili **venas** al vi ire (ir'e). Se ili loĝas malproksime, ili **venas** al vi fluge.*

oo


*Alko kaj Ansero flugas. Ili flugas, kaj Marso estas pli kaj pli proksima al ili. Nun ĝi estas pli proksima al ili ol Tero.*

*Ili rigardas Marson, kaj vidas ke ĝi estas pli kaj pli granda: ili **venas** al ĝi.*


oo

**veni** = English: come.


# 127 tre



*La arbo ne estas malgranda. La arbo estas granda. La arbo estas **tre** granda.*



*La birdo estas **tre** malgranda.*



*La birdo estas **tre** granda.*

- *Ĉu Suno estas granda?*
- *Jes, Suno estas **tre** granda.*
- *Ĉu Tero estas planedo malgranda?*
- *Ne, ĝi ne estas **tre** malgranda. Sed*

*ankaŭ granda ĝi ne estas.*

oo  
Ili alflugas (al'flug'as) Marson (Mars'o'n).  
Nun ili vidas ĝin granda, **tre** granda. **Tre**.  
Kaj... Bum!!! Ili venis. Ili venis sur Marson.  
– Ni venis, – diras Alko, – ni povas eliri.  
oo

*Libro "Aelita" de A.Tolstoj venis al la legantoj en 1922. Tiamaj (tiam'a'j) homoj ne deflugis (de'flug'is) de Tero. Tiamaj homoj ne flugis al aliaj planedoj.*

*Ĉu oni povis tiam flugi de lando en lando? Jes, oni povis fari tion. Ankaŭ tiam estis homoj kiuj flugis **tre** malproksimen.*

*Sed... sed kiom da tiamaj homoj faris tion, ĉu dekoj, ĉu centoj?*


*Ĉu iu el knaboj, kiuj loĝis tiam en urbo Londono, povis flugi en Parizon nur por rigardi la urbon, nur por paroli kun francaj geknaboj? Ne, ne povis. Sed nunaj geknaboj, nunaj homoj povas flugi kien ili volas.*

*Nun flugas ne dekoj, ne centoj, sed miloj da homoj... Ĉu miloj? Ne, pli ol miloj!*

*A.Tolstoj sciis ke homoj flugos de Tero. Li sciis ke ili venos ankaŭ al tiu **tre** malproksima de ni Marso. ...Ĉu ankaŭ li legis librojn de Ciolkovskij?*

**tre** = English: very.

# 128 tie



- **Tie** estas arboj – Ankaŭ ĉi **tie** estas arboj.

Se oni staras sur Tero kaj rigardas Marson, oni diras: «**Tie**, sur planedo Marso...»

Se oni staras sur Marso, kaj rigardas Teron, oni diras:

«**Tie**, sur planedo Tero...»

oo  
Ili eliris el la raketo. Suno. Staras suno. Ĉu tio estas marsa Suno? Ne, ne nur marsa. Sed ĉi **tie** ĝi estas malgranda. Ĝi estas malpli granda ol oni vidas ĝin **tie**, de sur Tero: Marso estas pli malproksima de Suno ol Tero.

oo

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	iam	ĉiam	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
<b>kiom</b>	<b>tiom</b>	iom	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**tie** = English: there, in that place.

## 129 **iom**

*Knabino Kvarka venis al geknaboj Kvinko kaj Seska por desegni. Kvarka desegnis tri desegnojn. Ŝi desegnis domon, arbon kaj birdon. Ankaŭ Seska desegnis **iom** da desegnoj.*

*Kiom da desegnoj havas nun tiuj ĉi du knabinoj?*

*Respondo: Oni ne povas diri kiom da desegnoj ili havas nun: vorto "**iom**" ne estas nombro!*



oo  
Jes, marsa suno estas **iom** malpli granda ol oni vidas ĝin de sur Tero...

La homoj staras sur la tero, sur marsa tero. Ili staras, ili rigardas. Kaj ili vidas. De loko, kie ili staras, ili vidas **iom** da arboj.

Ne, tio ne estas arbaro: unu arbo staras tie, alia – tie, sed tio estas arboj!


Aliaj arboj, malgrandaj arboj, sed arboj!

oo

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	iam	ĉiam	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	io	ĉio	nenio
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**iom** = English: a certain amount, a little of.


## 130 alta




Arbo Unu estas granda. Ĝi estas granda kaj **alta**. Sed ankaŭ arbo Du estas **alta**. Arbo Du estas pli **alta** ol arbo Unu.

**alta** = English: high, tall.

## 131 io



Tie estas **io**. **Ion** mi vidas. Sed kion? Kio estas tio?



- *Ĉu nun vi vidas?*

- *Jes nun mi vidas. Tio estas birdo.*

oo

- Ĉu ni iru? – demandas Ansero.

- Jes, ni iru. Por kio ni venis ĉi tien? Por rigardi!

Ili ekiris al la arboj. Jes, la arboj estas malaltaj. Sed... kio estas tio?!

Tre malproksime (mal'proksim'e) ili ekvidis **ion**. **Io**n grandan. Ĉu tio estas domoj? Ili venis iom pli proksime... jes, tio estas domoj. Iom da domoj staras tie. Ne altaj domoj, sed domoj! Ĉu oni loĝas en ili? Ne, ne loĝas. Loĝis. Nun oni ne loĝas en ili.

oo

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	iam	ĉiam	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	ĉio	nenio
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**io** = English: something, anything.


## 132 re

– Rigardu, – diras homo al sia kuniranto (kun'ir'**ant**'o), – ĉu vi vidas tiun homon, ĉu vi konas lin?

– Ne, mi ne konas lin.

– Sed tio estas instruisto! Kiam ni estis infanoj li instruis nin legi.

– Jes, jes... nun mi **re**konas (**re**'kon'as) lin.



*La homo ekiris al arboj. Al tiuj tri arboj kiuj staras tie, ne tre malproksime. Ĉu la homo venis al ili?*

*Ne, li ne venis al tiuj tri arboj. Li ne alvenis ilin. La homo **reiris** (**re**'ir'is). La homo **revenis** (**re**'ven'is) al tiuj du arboj de kiuj li ekiris.*

oo  
 - Oni ne vidas homojn tie, - diras Ansero.  
 Ĉu ni **revenu** (**re**'ven'u) al nia raketo?

- Jes, - respondas Alko, - ni **revenu**.

Ili ekiris **reen** (**re**'e'n). Nun, se ili **revenos** al Tero, ili povos rakonti ion. Ili povos rakonti ke tie, sur Marso, ili vidis iom da arboj, kaj domojn...


Ĉu sur la planedo ankaŭ nun loĝas homoj?

oo

aĉ	ad	aĵ	an	<b>ar</b>	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	ig
iĝ	il	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	ul
um						

**re** = English: again, anew, a second time, once more.

## 133 il



Homoj faras **ilojn** (**il**'o'j'n). Por kio?  
Oni faras **ilojn** por ekhavi (ek'hav'i) domojn.

Oni faras **ilojn** por ke ekestu libroj.

Oni faras **ilojn** por ke ni povu (pov'u) flugi, por ke ni flugu de urbo al urbo, por ke ni flugu en aliajn landojn.

Oni faras **ilojn** por rigardi malproksimajn stelojn.

Oni faras **ilojn** por... por fari aliajn **ilojn**.

Ankaŭ birdoj faras. Ĉu vi vidis sur arboj birdajn «domojn»? Jes, ili faras... Sed ne **ilojn**! **Ilojn** birdo ne faras.


Sed ni, homoj, ni faras. Por ekhavi ion ni faras tion. Se ni ne havas por tio **ilojn**, ni faras ankaŭ ilin.

**Iloj** faris el homaro (hom'ar'o) tion kio ĝi estas nun. Sed... sed ne flugu al Suno, homoj, ne flugu!

aĉ	ad	aĵ	an	<b>ar</b>	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	ig
iĝ	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	ul
um						

**ilo** = English: tool, instrument, appliance.

## 134 pafas



**Pafiloj** (*paf'il'o'j*).

Jes, kion fari, homoj **pafas**...

Ĉu vi scias kiam oni ne **pafis**? Oni ne **pafis** kiam oni ne havis **pafilojn** (*paf'il'o'j'n*). Sed homoj ekhavis ilin, kaj de tiam oni **pafas**.

Oni **pafas** birdojn, oni **pafas** hundojn, oni **pafas**... unu la alian.

**pafi** = English: fire, shoot.

## 135 krias

Kion oni faras kiam homo, al kiu oni volas diri ion, estas malproksima?

Tiam oni **krias**. Kiam la homo estas malproksima, oni ne diras al li, sed **krias**. Se oni volas paroli kun homo malproksima, oni paro-



las **kri'e**.

oo

Io ekflugis. Ne tre alte. Ĉu tio estas birdo? Povas esti, sed Ansero ne pafis. Li volis pafi, sed ne faris tion: la birdo estis malproksima.

Sed kiam ili ekestis (ek'est'is) proksimaj (proksim'a'j) al sia raketo, Ansero diris:

- Tie, rigardu, ĝi sidas tie!
- Kio sidas tie?
- Ĉu vi ne vidas?!

Tiam ankaŭ Alko ekvidis. Ion li ekvidis. Sed kion?!

- Hej, kion vi faras tie! - **kriis** Ansero.

Tiu, al kiu li **kriis**, venis al io, kio staris proksime al la raketo, kaj... kaj ekflugis.

Sed tio estas «birdo» kiun ili vidis, «birdo» kiu elflugis de tieaj (tie'a'j) arboj!

- Ne pafu, ne pafu (paf'u), - **kriis** Alko, - tio estas homo!

oo

- *Kion ili vidis, ĉu birdon, ĉu homon?*

- *Ili vidis homon, marsan homon. Jes, ne nur ni, ankaŭ ili scipovas flugi.*

**krii** = English: shout.

# 136   **an**

*Brito, kiu loĝas en Britio, estas britiano (brit'i'ano). Li estas ano de Britio.*

*Ĉiniano (ĉini'ano) estas ano de lando Ĉinio. Sed kio estas ĉino kiu ne estas ano de Ĉinio?*

*Povas esti ke tiu ĉino estas britiano – ano de Britio. Tiu ĉino estos britiano ankaŭ se li venos en Francion, por pririgardi (pri'rigard'i) la landon.*

oo

Jes, tio estis homo. Tio estis marsano. Li sidis sur io, kio havis grandajn flugilojn (flug'il'o'j'n), kaj flugis. Li flugis malalte (mal'alt'e), kaj rigardis la teranojn.

Kaj li kriis ion al ili... Sed kion? Tion la teranoj ne povis kompreni: ili ne konis lingvon de marsanoj.

oo

aĉ	ad	aĵ	<b>an</b>	<b>ar</b>	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	ig
iĝ	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	ul
um						

**an** = English: member, unit.

## 137 i ĝ

Infano, se ĝi estas malgranda, ne iras lerni: oni diras ke ĝi estas malgranda por tio. Sed infanoj grand*iĝ*as: ili *iĝ*as pli kaj pli grandaj. Infano grand*iĝ*as (grand'*iĝ*'as), kaj *iĝ*as lernanto.

Kion faras lernanto kiu volas *iĝ*i instruisto? Li eliras el sia domo, ĉu ne? Li iras tien kie oni instruas instrui. Tie li lernas, lernas, kaj... kaj *iĝ*as instruisto: li instru*ist**iĝ*as (instru'*ist*'*iĝ*'as).

– Kie loki*iĝ*as urbo Parizo?

– En Francio.

– Ĉu parizano (pariz'an'o) povas reloki*iĝ*i (re'lok'*iĝ*'i) en Londonon, kaj ekesti londonano (london'an'o)?

– Jes, li povas fari tion.

aĉ	ad	aĵ	<b>an</b>	<b>ar</b>	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	ig
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	ul
um						

**iĝ** = become, come to be.

## 138 for

*Pri kio ni parolis?... jes ni parolis pri tiu lernanto kiu volas instruistiĝi.*

*Se li ne povas fari tion en sia urbo, li **for**iras (**for**'ir'as) aŭ **for**flugas. Li iras **for** de sia domo kaj de sia urbo, por veni en alian, povas esti, **for**an (= mal'proksim'a'n) urbon.*

*Kion diras japano pri Francio?*

*- Francio, - diras la japano, - ne estas lando proksima. Tio estas lando tre malproksima de ni. Por ni, japanoj, tio estas **for**alando.*

**for** = English: away.

## 139 tempo

Kio estas **tempo**?

Oni povas vidi **tempo** sur tio,  ĉu? Tiu ĉi **tempo** estas **tempo** nuna (nun'a).

Homo diras: «Venis **tempo** foriri» (aŭ forflugi). Kaj li foriras (aŭ forflugas).

Sed... Sed kio estas **tempo**?! Ni, homoj, ne scias tion. Ni nur parolas pri ĝi.

Sed: kion diras al ni -is, -as, kaj -os vortoj? Kion diras al ni vorto «nun»?

Ili parolas pri **tempo**! Pri **tempo** kiu estis, estas kaj estos.

Pri kio parolas vortoj «kiam» kaj «tiam»? Ankaŭ ili parolas pri **tempo**.

Kio estas **tempo** oni ne scias, sed oni diras pri ĝi ke ĝi «iras» aŭ «flugas»... Aliaj diras ke ĝi «staras»...

Estis **tempo** kiam homoj ne havis pafilojn. Venis **tempo** de pafiloj grandaj, tre grandaj... Ĉu venos **tempo** kiam homaro aliĝos (ali'iĝ'os), kaj estos iom pli homa ol ĝi estas nun?

**tempo** = English: time.

# 140 iam



*Vi legas, homo, ĉu ne? Jes, vi sidas nun kaj legas vian Esperanto-lernolibron (lern'o'libr'o'n).*

*Sed estis tempo kiam ni ne legis esperante. Jes, iam ni ne legis. Iam ni ne komprenis la lingvon. Iam, en iama tempo, ankaŭ vorton «Esperanto» ni ne konis! Tio estis iam. Kiam? Oni ne povas diri kiam: iam.*

*Sed ne nun! Nun ni legas, komprenas, kaj pligrandigas (pli'grand'ig'as') nombbron da vortoj kiujn ni konas.*

*Nun ni scias pli ol ni sciis iam. Kaj venos tempo kiam ni scios multe. Iam ni scios tre multe: kiu legas tiu scias!*



Sed ni revenu al Alko kaj Ansero.

La marsano flugis for. Iom da tempo la teranoj staris kaj rigardis lin. Li iĝis (iĝ'is) pli kaj pli malgranda... Kaj forflugis.

Tiam la teranoj venis al sia raketo. Ili sidis kaj parolis. Pri Tero kaj pri Marso, pri homoj kaj marsanoj, pri tiu tempo kiam ili loĝis sur Tero, kaj ne sciis ke iam ili flugos al tiu ĉi tre fora loko.



kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	ĉiam	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	ĉio	nenio
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**iam** = English: some time, once.

## 141 **nokto**

**Nokto** estas tempo kiam oni vidas ne sunon sed stelojn.

oo

Venis **nokto**. Ansero foriris. Li eniris la raketon. Sed ne Alko. Alko staras kaj rigardas stelojn. Ankaŭ tie, sur Tero, li rigardis stelojn. **Nokte** li rigardis stelojn.

Estas homoj kiuj rigardas tion kion ili nomas «steloj», sed ne konas ilin. Ili ne scias ke tio estas ne nur steloj sed ankaŭ planedoj.

Sed ne Alko. Alko sciis. Li konis stelojn kaj planedojn. Tiam, sur Tero, li rigardis Marson. Nun li staras sur Marso kaj rigardas Teron.

Kio li estis tie, sur Tero? Ankaŭ li estis iam lernanto. Ankaŭ li foriris el sia domo por lerni. Sed ne por iĝi instruisto. Li volis ion alian: li volis fari raketojn. **Nokte** li rigardis stelojn kaj planedojn.

oo

**nokto** = English: night.

## 142 multe

Alko staras kaj rigardas alten (alt'e'n). Steloj. Ili estas **multaj**, tre **multaj**. Nokte oni povas vidi... Ĉu centojn da ili? Ne, ne centojn. Ĉu milojn da ili? Ne, ankaŭ ne milojn. **Multe**, tre **multe** da steloj oni povas vidi, se oni staras nokte kaj rigardas ilin de Marso... aŭ de Tero.


Sed de ĉi tie, de Marso, oni vidas ilin iom alie (ali'e), ĉu ne?

oo

**multe** = English: many, much, a lot.



# 143 viro




viro virino

oo

Iam, kiam Alko iĝis (iĝ'is) **viro**, li ekkonis (ek'kon'is) **virinon** (**vir**'in'o'n). Ŝia nomo estis Katja. Ili loĝis kune, li kaj ŝi. Ili estis tre proksimaj unu al la alia.

Sed... sed ŝi foriris. Ŝi foriris ne nur el ilia (ili'a) domo.



Ŝi foriris tien, de kie oni ne revenas.  
Kiam ŝi foriris Alko ekvolis, tre ekvolis forflugi de tiu ĉi Tero.

Li faris tion. Kaj nun li staras ĉi tie, sur Marso, kaj rigardas de ĝi tiun planedon, sur kiu loĝis lia Katja.


oo

– Se **viro** kaj **virino** loĝas kune, ili, povas esti, havos infanojn, ĉu? Sed infanoj grandiĝas: knaboj **vir'iĝ'as** (iĝas **viroj**), knabinoj **viriniĝas** (**vir'in'iĝ'as**).

**viro** = English: man (opp women).

**virin'o** = English: women, female.

## 144 ŝip o



oo


La nokto foriris (for'ir'is). Venis tempo de suneliro (sun'el'ir'o). Kaj tiam venis **ŝipo**. Jes, ankaŭ sur nia planedo, sur Tero, oni povas vidi **ŝipojn**. Estas **ŝipoj** malgrandaj, estas ankaŭ **ŝipoj** grandaj, tre grandaj.

Sed tio ne estas tera **ŝipo**. Tio estas flug**ŝipo**. Ĝranda marsana (mars'an'a) flug**ŝipo**. La **ŝipo** surteriĝas (sur'ter'iĝ'as = venas sur teron).

oo

**ŝipo** = English: ship, boat.

## 145 **soldato**



**Soldatoj**

oo

Sur la ŝipo staras homoj. Multe da homoj. Homoj kun pafiloj. Tio estas **soldatoj**. Ili deiras de la ŝipo.

La teranoj staras kaj rigardas la marsanojn. Ne, marsanoj ne estas altaj. Ili estas malpli altaj ol ni, teranoj.

La **soldatoj** deŝipiĝis (de'ŝip'iĝ'is = de'ir'is de sur la ŝipo), kaj ekstaris.

oo


**soldato** = English: soldier, trooper.

## 146 **sen**

Ĉu estas sur nia Tero landoj **sen**soldataj, landoj kiuj ne havas soldatojn? Povas esti ke jes, sed mi ne konas ilin. Landoj havas soldatojn, soldatoj havas pafilojn.

Ĉu oni povas pafi **sen** pafilo? Ne, oni ne povas. Se oni ne havas pafilon, oni ne pafas. **Sen**pafila soldato ne povas pafi.


Iam, por veni en tiun aŭ alian malproksiman landon, oni prenis lokon sur ŝipo. Sen ŝipo oni ne povis veni tien.



Sed estis ankaŭ aliaj lokoj, lokoj kien (kie'n) oni ne povis veni **sen**... **sen** hundoj.

**sen** = English: without.

# 147 post



*La homo staras **post** la arbo (loko).*

*Vorto «**post**» povas paroli ne nur pli loko, sed ankaŭ pri tempo:*

*Kiam oni prenis lokon sur iama (iam'a) ŝipo, por veni en malproksiman landon, oni sciis ke la ŝipo venos tien (tie'n) nur **post** multe da tempo.*

***Poste**, kiam venis tempo de flugoj, nia planedo ekestis pli malgranda. Ĉu?*

oo

*Iom **poste**, kiam la soldatoj deiris kaj ekstaris, venis marsano senpafila. Tio ne estis soldato.*

*La marsano iris al la homoj. Li proksimiĝis al ili, kaj ekrigardis Anseron. **Poste** li rigardis Alkon, nur Alkon: li komprenis kiu el la homoj*


scias tre multe, kaj kiu el ili ne lernis.

- **Talcetlo**, - diris la marsano marslingve.

oo

**post** = English: (time) after;  
(place) behind.

## 148 **montras**



oo


La marsano **montris** la sunon, kaj diris: **soacero**. Poste li **montris** la teron kaj diris: **tumo**.

Li **montris** sin (si'n), poste unun (unu'n) el la soldatoj, kaj diris - **ŝoĥo**.

oo

**montri** = English: display, show.

# 149 antaŭ



La marsano staras **antaŭ** la raketo.  
Nun li staras **antaŭ** la soldatoj.

Litero **ko** en vorto «**ra**keto» staras **antaŭ**  
litero «e», post litero «a».



Poste (post'e) la marsano venis al la rake-  
to. Li staris **antaŭ** ĝi kaj rigardis. Kaj li kom-  
prenis, oni vidis ke li komprenis! Li kompre-  
nis ke jes, tiu ĉi raketo venigis (ven'ig'is) la  
homojn de planedo Tero, kiun ili, marsanoj,  
nomas **Talcetlo**.

Kaj li sciis. Li sciis tion kion homoj ne sci-  
is: li sciis ke tiuj ĉi homoj ne estas unuaj ter-  
anoj (ter'an'o'j) sur Marso.

Li sciis ke iam, **antaŭ** tre multe da tem-  
po, iom da teranoj jam estis ĉi tie.

Li venis al la soldatoj, ekstaris **antaŭ** ili, montris la raketon, kaj diris ion.


- **Aiu!** - elkriis la soldatoj.

- **Aiu,** - diris la marsano al Alko, - **aiu utaro ŝoĥo, dacia Tumo pa geo Talcetlo.**

oo


**antaŭ** = English: before, in front of; previously.

## 150 apud



Tio estas domo, arbo, kaj du (du'o) da homoj. Unu el la homoj staras **apud** la arbo. La arbo staras **apud** la domo. Ankaŭ la alia homo staras **apud** la domo.





oo

La marsano desegnas (desegn'as). Li desegnis raketon. **Apud** la raketo li desegnis homojn kun pafiloj. Soldatojn.

oo

**apud** = *English: at, beside, close to, near.*

# 151 **ĉiam**

*Homoj soldatiĝis (soldat'ig'is) kaj soldatiĝas. **Ĉiam** estis homoj kiuj iĝis soldatoj. Oni soldatiĝis kiam pafiloj estis aliaj ol pafiloj nunaj. Oni soldatiĝis ankaŭ tiam kiam soldatoj estis senpafilaj. Tiam soldatoj ne pafis. Ili ne pafis, sed...*

*Sed ni ne parolu pri tio: estas landoj en kiuj oni ne **ĉiam** povas paroli pri tio kion faras aŭ faris la soldatoj...*

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	ĉio	nenio
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**ĉiam** = English: ever, always.

# 152 ig

*Jes, soldatoj estis ĉiam. Kaj ne nur viroj. Estas landoj en kiuj ankaŭ virino povas iĝi soldato.*

*Sed ne ĉiam tiu kiu iĝas soldato volis soldatiĝi (soldat'iĝ'i). Estas landoj en kiuj oni soldatiĝas homojn: oni **igas** ilin soldatiĝi.*

oo

La marsano desegnis raketon. Apud la raketo li desegnis soldatojn.

- Li volas star**igi** apud la raketo soldatojn, - diris Ansero.

- Jes, - respondis Alko.

La marsano ekrigardis la homojn, montris al ili la ŝipon, kaj diris ion. La soldatoj ekproksimiĝis (ek'proksim'iĝ'is).

- Ĉu ni enŝipiĝu (en'ŝip'iĝ'u)?


- Jes, kion fari, oni **igas** nin fari tion...

oo

aĉ	ad	aĵ	<b>an</b>	<b>ar</b>	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	ist
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	ul
um						

**ig** = English: make, cause to be, render.


# 153 **supre**



*Homo Co staras **supr'e**, sur la domo.  
Homo Do staras mal'**supr'e**.*

*Homo Co staras alte (alt'e), kaj rigardas de tie mal**supren** (mal'supr'e'n). De **supre** li rigardas homon Do.*

*Ankaŭ homo Do rigardas. Li staras mal-**supre** kaj rigardas **supren**, homon Co. De mal**supre** li rigardas **supren**.*



oo

La ŝipo **supreniĝis** (**supr**'e'n'iĝ'is, ekiris **supren**), kaj ekflugis. De **supre** la teranoj ekvidis sian raketon, kaj dekon (dek'o'n) da soldatoj apud ĝi.


Ansero iras mal**supren**, al loko kie sidas soldatoj.

- Ansero, - diras li al la soldatoj, - mia nomo estas Ansero. Povas esti ke vi ne scias, sed sur Tero loĝas birdo, ne tre granda birdo. Ankaŭ ĝia nomo estas ansero.

oo


**supro** = English: top

# 154 nenio



- Kion vi vidas?

- **Nenio**'n. Mi vidas **nenion**. Mi ne vidas la arbaron, mi ne vidas la domon, ankaŭ la infanojn mi ne vidas: mi vidas **nenion**.



- Kaj nun, ĉu nun vi vidas?

- Jes, nun mi vidas ilin!

oo

La soldatoj rigardas Anseron. Ili komprenas **nenion** (**nenio**'n), sed li parolas.

- Ĉu vi scias, - diras Ansero, - ankaŭ mi estis soldato. Ĉu oni pafis min (mi'n), ĉu oni ne pafis, mi ĉiam iris antaŭen (antaŭ'e'n). **Nenio** igis (ig'is) min stari sur loko. Se antaŭ mi estis milo da soldatoj, kiuj pafis min, ankaŭ tiam mi iris antaŭen.

oo

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
kiel	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	ĉio	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**nenio** = English: nothing, not any thing.

# 155    **ĉe** **s** **a** **s**

oo


Alko kaj la marsano sidas supre. Staras suno. Alflugis negranda birdo. Ĝi flugas kune kun la ŝipo, kaj rigardas ĝin desupre. (de'-supr'e) Post iom da tempo ĝi **ĉesis** (**ĉes**'is) fari tion, kaj forflugis.

Alko sen**ĉese** demandis la marsanon. Li demandis nomojn de tio kion ili vidas. La marsano respondis al li, kaj ankaŭ li demandis: li volis scii ĉi-nomojn terlingve (ter'lingv'e): esperante.

oo

**ĉesi** = English: cease, leave, stop.

## 156 **monto**



Antaŭ ili ekstaris **montoj**. Grandaj **montoj**, altaj **montoj**. Oni suprenigis (supren'ig'is) la ŝipon, kaj ekflugis pli alte. Nun oni povas rigardi la **montojn** de supre. Sur suproj de la **montoj** estas nenio: oni ne vidas tie domojn, oni ne vidas tie arbojn. Oni vidas nenion, sed Alko ne ĉesas rigardi.

La ŝipo flugas antaŭen, ĉiam antaŭen, kaj la **montoj** iĝas malpli kaj malpli altaj.

Ankaŭ la ŝipo iom malsupreniĝis (mal'supr'e'n'iĝ'is).

**monto** = English: mountain.



# 157 aparato

oo

Kiam oni ĉesis vidi la montojn, la marsano montris ion malproksiman.

– **Soacero**, – diris li.

Alko ekrigardis tien kaj ekvidis malproksime urbon, tre grandan urbon. Tio estis urbo **Soacero**.

Birdoj, multe da birdoj flugis al ili de tie. Kiam ili alproksimiĝis, oni ekvidis ke tio estas ne birdoj sed flugilaj flug**aparatoj**. Ili flugas supre kaj malsupre, ili forflugas kaj revenas. Tio estas **aparatoj** malgrandaj, porunuhomaj (por'unu'hom'a'j). Sed estas ankaŭ **aparatoj** pli grandaj, en kiuj sidas kvar aŭ kvin homoj. La homoj krias. Ili rigardas la teranojn, kaj krias ion.

– Rigardu, rigardu! – diras Ansero, kiu venis supren.

oo

**aparato** = English: apparatus, device, machine.

## 158 funkcias

Kiu igas **funkcii** (funkci'i) flugilojn de birdo? Tio estas birdo! Ĝi, nur ĝi **funkciigas** (funkci'ig'as) siajn flugilojn.

Kaj kio igas **funkcii** flugilojn de marsanaj flugaparatoj?


Pri tio Alko sciis nenion. Li komprenis nur ke ene (en'e) de marsanaj flugaparatoj estas **funkciigilo** (**funkci'ig'il'o**), kiu **funkciigas** la flugilojn.

**funkcii** = English: function, act, operate, work.

## 159 kiel

Oni demandas malgrandan knabon:

- **Kiel** iras soldatoj?
- Unu, du; unu, du, - respondas la knabo.



- Kaj **kiel** iras hundo?
- ...Unu, du, tri, kvar! Unu, du, tri, kvar!
- Kaj **kiel** via hundo diras al vi ke venas homo kiun ĝi ne konas?
- Ĝi, la hundo, diras «haŭ, haŭ!».

Marsanaj flugaparatoj, komprenis Alko, funkciigas siajn flugilojn. Jes, ili funkciigas la flugilojn, kaj flugas **kiel** birdoj.

Se ni, homoj, scios **kiel** marsanoj faras tion, ankaŭ ni povos flugi **kiel** birdoj, sed ne **kiel** hundoj, ene de niaj nunaj (nun'a'j) grandaj flugaparatoj...

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	ĉio	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	ĉiu	neniu

**kiel** = English: like, in what way.

## 160 **floro**



**floro**

**floro** = English: flower.

## 161 **ĵetas**



oo  
La marsanoj flugas kaj **ĵetas** florojn. Ili rigardas la teranojn, krias, kaj senĉese (sen'ĉes'e) **ĵetas** florojn al ili. Multe da floroj.  
oo

**ĵeti** = *English: throw.*

## 162 **estro**

**Estro** estas homo kiu diras al aliaj homoj kion tiuj faru. Kaj la homoj faras. Homoj ĉiam faras kion iliaj **estroj** diras al ili: **estroj** igas ilin fari tion!

**Estro** povas esti pli aŭ malpli «granda». Urb**estro** estas malpli «granda» ol land**estro** .

Napoleono estis **estro** de lando Francio.  
Viktoria (ŝi estis ino) **estris** Brition.  
Vaŝingtono estis **estro** de lando kiu, iom  
poste, ekestis lando tre granda.

Ĉu Marso estas planedo unu-landa? Kiu  
**estras** ĝin?

oo

La ŝipo venis en la urbon. Ĝi alteriĝis  
apud tre granda domo. Poste Alko eksciis ke  
tio estas domo en kiu sidas **estro** de la  
planedo kaj anoj de la **Estraro** (**estr**'ar'o =  
aro da estroj). Tio estis Domo de **Estraro**.

Flugilaj flugaparatoj, kiuj venis kune kun  
la ŝipo, ankaŭ malsupreniĝis. Ili surteriĝis  
kiel birdoj.

Al la loko venis urbanoj, multaj urbanoj.  
Ankaŭ ili kriis kaj ĵetis florojn. El la Domo  
eliris anoj de la **Estraro**. Unu el ili ekrigardis  
la urbanojn, kaj iom post iom ili ĉesis kii.  
Tiam li ekrigardis la teranojn. Li staris kaj  
rigardis ilin. Poste li montris la ŝipon, ĵetis  
malmultajn (mal'mult'a'j'n) vortojn, kaj  
foriris.

oo

**estro** = English: head, cheaf.

## 163 kuras



*La homo kuras.*

oo  
Unu el la marsanoj ek**kuris** al la ŝipo. Li diris ion al la ŝipestro (ŝip'estr'o), kaj la ŝipo eksupreniĝis (ek'is supr'e'n'iĝ'i). Nun ĝi flugas for de la urbo.

Malsupre oni vidas malpli kaj malpli altajn domojn de la urbo, kaj ŝipojn, multajn ŝipojn. Ne, ne flugŝipojn, sed tiujn ŝipojn kiujn oni povas vidi ankaŭ sur nia Tero.

Kiam la flugŝipo venis al malgranda arbaro, ĝi alteriĝis (al'ter'iĝ'is).

oo  
*- La flugŝipo, sur kiu flugis la teranoj, venis en la urbon. Ĉu urbanoj volis vidi la teranojn?*

*- Jes, volis: ili ĵetis florojn al ili.*

*- Ĉu ankaŭ estro de la planedo volis ke la teranoj loĝu en la urbo?*

*- Ne, li ne volis tion. Li diris ke oni forflugigu (for'flug'ig'u) la teranojn.*

**kuri** = English: run.

## 164 anto

**ant'o** = tiu kiu **-as**:

Leg'**ant'o** estas tiu kiu leg'**as**, lern'**ant'o** estas tiu kiu lern'**as**, instru'**ant'o** estas tiu kiu instru'**as**.

Sed instru**anto** ne estas instru**isto** (**-ist** estos vorto 197): instru**isto** lernis esti instru**isto**, li lernis instrui. Sed instru**anto**... Jes, povas esti ke ankaŭ instru**anto** lernis, sed... Sed pri ino kiu instruas sian infanon stari, iri kaj paroli, oni ne diru ke ŝi estas instru**istino** (instru'**ist**'in'o). Se vi volas nomi (nom'i) ŝin, diru «instru**antino**». Tio estas: «tiu kiu instru**as**».

oo

La teranoj kaj ilia kunflug**anto** (kun'flug'**ant'o**) elŝipiĝis (el'ŝip'iĝ'is), kaj ekiris al la arbaro. Suno staris alte. Flugis malgrandaj birdoj. Kaj floroj, multe da floroj estis tie.


oo



**ant** int ont at **it** ot

**ant** = English: present activ participe.

## 165 **inter**



*La homo staras **inter** la arboj.*

oo

**Inter** malmultaj (mal'mult'a'j) arboj de la arbaro staras domo. Tio estas granda domo, sed tio ne estas domo urba (urb'a).

Oni vidas ke la domo staras ĉi tie... ne, ne ĉiam, sed tre multe da tempo.

oo

**inter** = English: between.

# 166 **juna**

*Geknaboj estas homoj. Geknaboj estas **juna**j homoj.*

*Infanoj, kiel ni scias, grandiĝas: ili iĝas pli kaj pli grandaj. Geknaboj (ge'knab'o'j) iĝas geviroj. Ili iĝas **juna**j geviroj.*

*Sed homo ne ĉiam estas **juna**, kaj kiam venas tempo de mal**juni**ĝo (mal'**jun**'iĝ'o)...*

*Jes, tempo ne nur virigas aŭ virinigas (vir'in'ig'as) infanojn, tempo ankaŭ mal**juni**gas...*

*Kion fari, ni estas nur homoj!*

oo

Inter la domo kaj la proksimaj arboj staris **juna** virino.

- Aelita, - diris la marsano, montrante ŝin.

La marsano kriis ion, kaj el la domo elkuris mal**juna** viro. Tio estis domestro (dom'estr'o). Ne, li ne estis estro por Aelita. Sed por aliaj anoj de la domo li estis estro.


La domestro montris al la homoj ke ili postiru (post'ir'u) lin, kaj kune kun ili li eniris la domon.

oo

- Nun, leganto, vi scias kie loĝas Aelita, ĉu?

**juna** = English: young.


## 167 **ĉambro**



oo  
La domestro montris al la teranoj iliajn ĉambrojn. Alko eniris la sian (la = **ĉam-br'o'n**). Multe da loko estis en ĝi, sed oni povas diri ke ene de la **ĉambro** estas nenio. Nur arbo, malalta floranta arbo staris tie.

oo  
**ĉambro** = English: room.


## 168 kuŝas



La arbo ne staras. La arbo **kuŝas**.

**kuŝi** = English: lie.

## 169 dormas



La arbo ne staras sed **kuŝas**.

Ankaŭ homoj **kuŝas**, ĉu ne? Jes, iam ili **kuŝas**. Por kio ili faras tion? Por **dormi**.

Ni, homoj, **dormas**. Ni ne povas vivi sen **dormo**. Kiam venas nokto, ni iras **dormi**.

Ankaŭ birdoj **dormas**. Estas birdoj kiuj **dormas** sidante (sid'ant'e) sur arboj. Ili **dormas** side (sid'e). Sed ne homoj. Homoj **dormas** ne side sed kuŝe (kuŝ'e).

Oni rakontas pri homo kiu ne **dormis** dek


tagnoktojn (tag'nokt'o'j'n = tagojn + noktojn)! Sed plimulto (pli'mult'o) da homoj **dormas** ĉiunokte (ĉiu'nokt'e), ĉu?

ooo  
Sed en la ĉambro estis io kion Alko volis, tre volis vidi. Pli ol ion alian. Tio estis loko sur kiu oni povas kuŝi. Kuŝi kaj **dormi**: de kiam ili forflugis de Tero Alko ne dormis.  
ooo

*El tio oni povas kompreni ke raketo de Alko flugis multe pli rapide ol niaj nunaj raketoj.*

**dormi** = English: sleep.

**170** **per**



*Tio estas iloj **per** kiuj, antaŭe (antaŭ'e), oni desegnis.*

*Birdoj flugas. Birdoj scipovas flugi. Birdoj flugas **per** siaj flugiloj. Flugiloj estas tiuj iloj*

**per** kiuj birdoj flugas.

Ankaŭ marsanoj (en nia rerakonto) flugas. Ankaŭ ili flugas **per** flugiloj. Ili flugas **per** flugilaj flugaparatoj.


Antaŭe ni parolis pri tio ke Ansero volis pafi, sed ne pafis. **Per** kio li volis pafi? **Per** pafilo. Pafilo estas ilo **per** kiu oni pafas.

Kio estas nomo de tiu ĉi lernilo (lern'il'o), de tiu lernilo kiun vi legas nun? Ĝia nomo estas: «Esperanto **per** kvincent unu (501) vortoj». Ĉu vi komprenis la nomon? Ĉu vi komprenas ĝin nun?

**Per** kiom da vortoj tiu ĉi lernilo rakontas pri Aelita? **Per** 210 vortoj. **Per** kiom da vortoj ni legas la libron nun? **Per** 170 vortoj. Jes, vorto «**per**» estas nia cent-sepdeka nuna (nun'a) vorto.

**per** = English: with (tool, organ, member).

# 171 okulo



okulo

*Ni, homoj, vidas. Kaj ne nur ni. Ankaŭ hundoj kaj birdoj vidas.*

*Per kio oni vidas? Oni vidas per **okuloj**.*

*Per **okuloj** oni povas vidi nur tion kio estas antaŭ ni, ĉu? Tion kio estas post iu granda domo aŭ arbo oni ne povas vidi.*

*Kiom da **okuloj** ni havas? Plimulto (pli'-mult'o) el ni havas du **okulojn**.*

*Ĉu oni povas diri kiu el homoj estas pli proksima al ni? Jes, oni povas diri tion, se oni rigardas per du **okuloj**.*

*Ĉu ankaŭ per unu **okulo** oni povas vidi tion? Jes, ankaŭ per unu **okulo**: homon, kiu estas pli proksima al ni, ni vidas iom pli «granda»...*


*Sed ni ne rigardu per unu, ni rigardu per du **okuloj**!*

*Plimulto da homoj, kiam ili dormas, vidas urbojn kaj arbarojn, homojn kaj flugaparatojn... Ĉu oni vidas tion per la **okuloj**? Ne...*

Sed per kio?!

**okulo** = English: eye.

## 172 **ĉiu**



*Tio estas homoj. Ili staras kaj demandas.  
Kiu el ili demandas? Ili **ĉiu** demandas.  
Ĉu estas inter ili kiuj ne demandas? Ne,  
ne estas. **Ĉiu**, **ĉiu** el ili demandas.*

*Infano grandiĝas: ĝi iĝas viro aŭ virino.  
Ĉu **ĉiu** homo estas infano? Ne, ne **ĉiu**,  
sed **ĉiu** homo, ankaŭ homo tre maljuna  
(mal'jun'a), estis iam infano.*

*Ĉu **ĉiu** homo iĝas maljuna?  
Ne, ne **ĉiu**: soldatoj estas en ĉiu lando. Ili  
pafas, kaj... Ne, ne **ĉiu** homo sur nia planedo  
venas al maljuniĝo (mal'jun'iĝ'o).*




**Ĉiu** (*ĉiu*'j) ni legas librojn. Iam tio estas libroj kiujn havas ni, iam tio estas libroj kiujn havas aliaj homoj, sed **ĉiu** el ni legas: tiu kiu volas esti multvorta (mult'vort'a) esperantisto legas multe, tre multe da esperanto-libroj. Tio, nur tio pligrandigas (pli'grand'ig'as) nombron da vortoj kiujn ni konas.

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	ĉio	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	<b>ĉiu</b>	neniu

**ĉiu** = English: everyone (body).

## 173   **ĉio**



– Kaj nun, kion vi vidas nun?

– **Ĉion** (**ĉio**'n): mi vidas la arbaron, kaj domon en ĝi. Mi vidas la infanojn. Ĉiujn infanojn. Jes, nun mi vidas **ĉion**!

Estas homoj kiuj havas multe. Ili havas domojn kaj arbarojn, ili havas vid- kaj flug-aparatojn. Ili havas **ĉion**.

Sed estas homoj kiuj ne havas, kaj ne volas havi **ĉion**. **Ĉio** kion ili volas havi estas scioj. Scioj kaj libroj.

...Kaj vi, leganto, ĉu vi havas **ĉion** kion vi volas havi? Ĉu vi scias **ĉion** kion vi volas scii?

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	iu	<b>ĉiu</b>	neniu

**Ĉio** kion vi vidas ĉi tie, estas vortoj. Tio estas vortoj:


*kia    tia    ia    ĉia    nenia*  
*kial    tial    ial    ĉial    nenial...*

*Jes, ni konas ne ĉiujn (ĉiu'j'n) ilin. Sed vortojn:*

**kio    tio    io    ĉio    nenio**  
*ni konas. Ĉiujn (ĉiu'j'n)!*

**ĉio** = English: everything.


## 174 **fermas**



*Tio estas ĉambro.*

*Ĉu oni povas eniri ĝin?*

*Ne, oni ne povas ĝin eniri: oni **fermis** la ĉambron.*



*Nun oni povas eniri la ĉambron: oni mal**fermis** ĝin.*

*Kiam oni ekas (ek'as) dormi, oni **fermas** la okulojn. Por kio? ...Ĉu por vidi tion kion oni vidas dormante (dorm'ant'e)?*

Ĉu ankaŭ hundoj **fermas** la okulojn kiam ili dormas? Jes. Kaj ne nur ili. Ankaŭ birdoj faras tion. Sed, onidire (oni'dir'e), birdoj (ĉu ĉiuj?) scipovas dormi **fermante** (ferm'ant'e), por iom da tempo, nur unu okulon, kaj poste la alian (la = okulon): ili kaj dormas kaj rigardas.

**fermi** = English: close.

## 175 **pensas**

Ni, homoj, scipovas (sci'pov'as: scias kaj povas) **pensi**.

Ĉu ankaŭ hundoj scipovas tion? Pri kio **pensas** hundo rigardanta... literojn?! Pri nenio: hundoj ne scipovas legi. Sed ili komprenas parolajn vortojn. Ne ĉiu hundo, ne ĉiujn vortojn, sed iom da vortoj ili komprenas. Vortojn hundo komprenas, sed ne literojn.

Kaj homoj, kion **pensas** homoj pri literoj? Oni **pensas** pri tio ke literoj estis ne ĉiam. Oni **pensas** ke tiu, kiu **elpensis** literojn, faris por homaro (hom'ar'o) multe, tre multe. Oni **pensas** ankaŭ pri tio, kiam, kaj kie oni **elpensis** literojn.

Oni povas **pensi** ankaŭ pri homoj kiuj ne **pensas**. Tiuj homoj rigardas. Ili sidas kaj **senpense** rigardas siajn vidaparatojn. (vid'aparato'oj'n)...

Sed ni, esperantistoj, ni **pensas**. Ni **pensas** ankaŭ pri homo kiu **elpensis** nian lingvon, nian Esperanton. Jes, ni multe **pensas** pri li. Nomo de la homo estas Zamenhof, Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917).

oo

Alko ekkuŝis, fermis la okulojn, kaj ekdormis. Nokte Alko ekstaris. Li elrigardis el la ĉambro. Grandaj steloj rigardas lin desupre (de'supr'e). Alko ne rekonis ilin.


«Jes, tio ne estas Tero», – **pensis** Alko, – «tio estas Marso. Kion mi faris, por kio mi venis ĉi tien?!»

Alko ĉesis rigardi stelojn, rekuŝis (re'kuŝ'is) kaj redormis.

oo

**pensi** = English: think.

## 176 **kantas**



*La birdo **kantas***


oo  
Alko malfermas la okulojn. «Pri kio mi pensis nokte?».

Staras suno. De sur proksimaj arboj **kan-  
tas** birdoj. Alko ne vidas ilin, sed li kompre-  
nas ke ili sidas tie, sur arboj. La birdoj rigar-  
das la sunon, kaj **kantas**.

oo

**kanti** = *English: sing.*

## 177 **iu**



- *Tio estas homoj, du homoj. **Iu** el ili es-*

tas franco, **iu** el ili – brito. **Iu** el ili scipovas flugigi (flug'ig'i) flugaparatojn (flug'aparato'j'n). **Iu** el ili parolas tre multajn lingvojn. Kiu el ili? **Iu!**

Birdoj kantas. Birdoj povas kanti. Ĉu ĉiuj birdoj? Ne, ne ĉiuj, sed **iu** el ili kantas.

Ankaŭ ni, homoj, kantas. Ĉu ĉiu homo? Ne, ankaŭ ne ĉiu: **iu** el ni povas kanti, sed ne volas. **Iu** el ni volas, sed ne povas. Kaj **iu**, tre malmultaj, ne nur volas kaj povas kanti, sed ankaŭ faras tion.

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	<b>iu</b>	<b>ĉiu</b>	neniu

**iu** = English: someone.



## 178 okazas

Knabo enkuras sian domon.

– Kio **okazis**? – oni demandas lin.

– Ĉu vi scias, – rakontas la knabo, – mi iris en nia arbaro, kaj ekvidis homon. La homo kuŝis surtere. Ne, li ne dormis.


– «Kio **okazis** pri vi?», – demandis mi lin.

– «Mi flugis per mia flugaparato, sed jes, io **okazis**. Ĝi ekflugis al tero, kaj nun mi kuŝas ĉi tie, kaj ne povas iri...»

– Kie **okazis** tio?!

**okazi** = English: happen, occur.

## 179 donas



Homo 1            Homo 2  
Homo 2 **don**as la florojn.

oo

Iu ekstaris apud la ĉambro.

- Eniru! (en'ir'u) - kriis Alko esperante, sed tio ne estis Ansero.


Eniris maljuna domestro (dom'estr'o). Li **don**is al Alko florojn, kaj diris ion.

«Tio estas floroj de Aelita», - komprenis Alko.

oo

**doni** = English: give.

## 180 **pren**as



Homo 1    Homo 2  
Homo 1 **prenas** la florojn.

oo

Alko **prenas** la florojn. Ili estas grandaj.

«Ankaŭ mi», – pensas Alko, – «iam ankaŭ mi donis florojn. Tie, sur Tero, mi donis florojn al mia Katja... Ŝi **prenis** ilin, ŝi rigardis ilin, kaj diris al mi ke ŝi... Ne, mi ne pensu pri tio. Tio estis sur iu alia, tre malproksima planedo...»

Venis Ansero.

– Ĉu vi komprenas kio okazas?! – diras li, – ĉi-marsanoj ne donis al ni eniri la urbon! La viro, tiu estro, kiu staris apud la granda domo, kion li diris? Mi pensas ke li diris ke oni for**prenu** nin de tie, de ilia (ili'a) urbo, por ke ni sidu malproksime de ĝi...

oo

– Ansero komprenis ke oni ne volas vidi la teranojn en la urbo, ĉu?

– Jes, Ansero komprenis tion.

**preni** = English: take.

# 181 **bona**

*Ĉu vi volas scii? **Bone**. Sed ne ĉiuj homoj volas tion. **Malbone**. Tre **malbone**.*

***Bonaj** homoj legas. Ili legas kaj scias. Ili ne ĉesas legi. Ili legas ĉiam. Kaj ne nur pri tio kio okazas nun. **Bonaj** homoj legas librojn. Ili legas multe da libroj.*

*Sed... ĉu ĉiuj libroj estas **bonaj**? Ne, ne ĉiuj. El **bona** libro oni povas ekscii multe, tre multe. El **malbona** libro...*

*Sed kiu legas **malbonajn** librojn, ĉu iu legas ilin?! Ne, oni ilin ne legas. Oni legas **bonajn**, nur **bonajn** librojn.*

oo

Alko rigardas la florojn. «**Bonaj** floroj» – pensas li.

– Ĉu vi scias, – respondas li al Ansero, – mi pensas ke okazas nenio **malbona**. Nun ni loĝas ĉi tie. Ili rigardas nin. Ili konos (kon'os) nin. Ili komprenos ke ni estas homoj **bonaj**, ke ni faros nenion **malbonan** al ili. Tiam ni povos iri kien (kie'n) ni volas. Ankaŭ en la urbon.

– Mi ne scias por kio venis ĉi tien vi, – diras Ansero, – sed mi venis al Marso ne por rigardi florojn. Tion (tio'n) mi povis fari sur

Tero.

– Sed kion (kio'n) vi volas fari?

– Mi volas reveni al Tero, en landon el kiu ni forflugis (for'flug'is), kaj diri al ĉiuj teranoj: Marso, kaj ĉio kio estas sur ĝi, estas nia, nur nia. Jes, mi volas doni tiun ĉi planedon, kun ĉiuj ĉi marsanoj, al nia lando. Mi scias ke ne ĉiuj marsanoj volos tion, sed... Ĉu vi scias, Alko, mi estis soldato, kaj mi tre **bone** vidas ke ne ĉio iras **bone** ĉi tie. Sed, kiam ni prenos la planedon, estos multe pli **bone** ne nur por ni, sed ankaŭ por ili, por tiuj ĉi marsanoj.

Alko rigardas Anseron, kaj ne komprenas lin. Ĉu Ansero diras tion kion pensas? Rigardante (rigard'ant'e) la florojn Alko respondas:



– Mi ne pensis por kio mi flugas al Marso. Mi flugis por flugi, por nenio alia. Sed ĉu vi scias, Ansero, ke iam, antaŭ multe da tempo, jes, ankaŭ tiam estis sur Tero homoj kiuj suriris (sur'ir'is) siajn (si'a'j'n) ŝipojn. Ili faris tion por veni al iu malproksima lando, pri kiu aliaj homoj sciis nenion.

oo

*– Kion volas Ansero, ĉu li volas preni tiun ĉi planedon?!*

**bona** = English: good.

## 182 aperas



*Tero, mi vidas teron! – krias la homo, –  
**aperis** tero!!!*

oo

Kaj iam okazis ke antaŭ ili **aperis** unu el tiuj landoj kiujn aliaj homoj ne konas. Tiam la ŝipestro (ŝip'estr'o) pafis el grandaj pafiloj (paf'il'o'j), kaj nomis (nom'is) la teron per nomo de sia ŝipo, aŭ per nomo de sia landestro. Poste li parolis pri tiu ĉi sia landestro (land'estr'o) ke de nun li, kaj nur li estros (estr'os) tiun ĉi teron.

Poste la alvenintoj (al'ven'int'o'j) deiris (de'ir'is) de sia ŝipo, pafis lokajn homojn, kaj prenis ĉion kion ili volis preni.

Ne, Ansero, mi ne volas tion. Sed, ĉu vi scias, ankaŭ mi volas preni ion de Marso. Jes, ankaŭ mi. Tio estas scioj. Mi volas scii kiel funkcias ilia aparataro (aparat'ar'o). Mi volas scii ĉion kion scias marsanoj.

oo

- Kion volas Alko?
- Alko volas scii ĉion kion scias marsanoj... Sed ĉu scipovas homo, nur unu homo, fari tion?

En ĉambro de Alko **aperis** la homestro.  
Por kio li venis al Alko?

Por doni la florojn!

Steloj **aperas** nokte, ĉu?

**aperi** = English: appear.

## 183 petas

(**Unu** estas nombro «1», sed ne nur. Unu knabo ne estas "iu" knabo. Tio estas knabo kiun oni konas).

- Diru al mi, **petas unu** knabo knabon alian, - kiam aperis steloj?
- Ĉu vi ne scias? En mia libro pri steloj mi legis ke steloj aperas nokte.
- Sed mi ne demandas vin kiam aperas

*steloj. Mi demandas kiam ili aperis: ĉu steloj estis ĉiam, ĉu estis iam tempo senstela (sen'stel'a)? Kiel ili aperis? Ĉu antaŭ ilia apero estis nenio? Tio estas miaj demandoj!*

*- En mia libro pri steloj...*


*- Ĉu vi povas doni al mi tiun ĉi vian libron? Ankaŭ mi volas legi pri steloj!*

*- Se vi **petas** min pri tio... Bone, prenu. Prenu kaj legu.*

oo

Aperis maljuna domestro. Li **petas** la teranojn postiri (post'ir'i) lin.

Ili ekiris. Ili iras supren kaj malsupren, al ĉambro kiu estas malproksima (mal'proksim'a) de ĉambroj iliaj.



Ili venis. Tio estas lernoĉambro (lern'o'ĉambr'o). En la ĉambro staras malalta juna virino. Aelita.


- **Elia utara geo**, - diras ŝi, kaj petas sisi. La homoj eksidas (ek'sid'as).

oo



**peti** = English: ask (as a favour).

## 184 **longa**



oo  
Ankaŭ Aelita eksidas. Ŝi sidas antaŭ la teranoj (ter'an'o'j) kaj **longe** 🕒 rigardas ilin.

- Bona virino, - diras Ansero, - tre bona virino.

- **Ozeo**, - petas Aelita marslingve (mars'lingv'e), - kaj Alko komprenas: «pensu». Li ekpensis.

Aelita funkciigas (funkci'ig'as) iun aparaton, kaj sur la aparato aperas tio pri kio pensas Alko.

Alko ekpensis pri urbo, kaj oni ekvidis ĝin. Peterburgo. **Longaj** kaj altaj domoj staras unu apud alia. Granda sensuna (sen'-sun'a) urbo.

Aperis juna virino. Katja. Ŝi sidas apud arbo, rigardante (rigard'ant'e) ion mal-

proksiman.

Katja malaperis, kaj oni ekvidis ne ŝin, sed desegnojn (desegn'o'j'n), librojn, nombrojn. Oni ekvidis ilojn (il'o'j'n), per kiuj oni faras raketon...

oo

**longa** = English: long.

## 185 **vivo**

Homoj **vivas**.

*Kiam malgranda infano aperas, kiam ĝi venas al ni, ĝi scipovas (scias kaj povas) nenion: ĝi ne sidas, ne iras, kaj ne parolas. Sed ĝi **vivas**! Kaj homoj faras ĉion por siaj infanoj, por ke ili **vivu**, por ke ilia **vivo** estu bona **vivo**.*

*Iom post iom infanoj grandiĝas. Poste ankaŭ ili havos infanojn, maljuniĝos...*

*Sed homaro, homaro **vivos**. **Vivu** la homaro!*

oo

Longe rigardis Aelita tiun ĉi malproksiman de ŝi **vivon**. **Vivon** de homoj sur planedo

Tero. **Viv**on de Alko.

Sed... kio estas tio? Sur la aparato aperis io alia. Tio estas soldatoj. Multe da ili. Ili iras kaj pafas. Ili pafas aliajn homojn, homojn kiuj kuras de ili.


oo

- *Kaj vi, leganto, ĉu vi volas ke oni vidu viajn pensojn?*

- *Ne... sed sur la aparato oni ekvidis soldatojn. De kie ili aperis?*

**vivo** = English: life.

## 186 **f**al**a**s



La homo **f**al**a**s.

oo

La homoj kuras kaj krias. Ili krias kaj **f**al**a**s. Multe da ili ekkuŝis (ek'kuŝ'is) senvivaj

(sen'viv'a'j)...

Ĉu tio estas pensoj de Ansero? Jes.

Aelita ekrigardis lin, sed diris nenion. Ŝi ekstaris. Nun ŝi prenas alian aparaton, kaj funkciigas ĝin. Oni vidas sur ĝi arbojn kaj birdojn, homojn kaj florojn.

Ĉio sur la aparato vivas: homoj iras kaj parolas, birdoj flugas kaj kantas.

Aelita instruas la lingvon. Ŝi parolas pri tio kion la lernantoj vidas, kaj homoj komprenas ŝin. Ili komprenas ĉion kion ŝi diras al ili.

oo

- Sed tiun aparaton konas ĉiu infano...

- Jes, sed la libro aperis en 1922!

**fali** = English: fall.

## 187 tago 🕒

**Tago** estas tiu tempo kiam oni vidas ne stelojn sed sunon.

oo


Ses longaj **tagoj** lernis la teranoj lingvon de marsanoj. Ili faris nenion alian.

Al la lernoĉambro ili venis post suneliro (sun'el'ir'o). Aelita parolis tiel, ke ŝiaj vortoj eniris la lernantojn. La homoj pli kaj pli bone komprenis la lingvon, lingvon de marsanoj.



**tago** = English: day.

## 188 **nenu**



*La homoj demandas. Kiu el ili demandas?  
Ili ĉiuj demandas. Sed kiu respondas al ili?*

**Nenu.** **Nenu** respondas al ili. Oni al ili ne respondas.



La sepan tagon **nenu** venis por preni la lernantojn en la lernoĉambro, kaj Alko malfermis la okulojn nur antaŭnokte (antaŭ'nokt'e). Li ekstaris, kaj ekiris al la lernoĉambro (lern'o'ĉambr'o). Tie estis nenu.



kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	neniam
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	<b>iu</b>	<b>ĉiu</b>	<b>neniu</b>

Rigardu, lernanto, la malsuprajn (mal'-supr'a'j'n) vortojn, vortojn **kiu, tiu, iu, ĉiu, neniu**.

Jes, nun ni konas ankaŭ ilin (ili'n). Ĉiujn ilin.

**neniu** = English: nobody.

## 189 ĉielo

oo

Alko eliras el la domo. Suno malsupreniĝis (mal'supren'iĝ'is). Sur la **ĉielo** aperis unuaj steloj.

Nun Alko rigardas ĉion ĉi ne kiel antaŭe.

Nun li rigardas per okuloj de homo kiu konas la lingvon, kiu marsane vidas tion pri kio oni parolas.


Apud unu el la arboj li ekvidis sidantan (sid'ant'a'n) tie Aelitan.

– Ĉu mi povas sidi apud vi, Aelita?

oo

**ĉielo** = English: sky.

## 190 aŭdas



*Ĉu la homo aŭdas?*

oo

Li ek**aŭd**is sian parolon... «Ĉu tiu ĉi parolanto (parol'ant'o) estas mi?!» – pensis Alko.

Aelita alrigardis (al'rigard'is) lin, kaj li ek**aŭd**is ŝian respondon: «Jes».

– Ĉu via vivo tie, sur Tero, estis bona? –

demandis Aelita.

– Jes, – respondis li, – mia vivo tie estis tre bona.

oo

**aŭdi** = English: hear.

## 191 **amo**

*Kion volas aŭdi juna virino de juna viro? Ŝi volas aŭdi vortojn «mi **amas** vin!». Por kio? Por ke poste ili havu infanojn kaj **amu** ankaŭ ilin.*

oo

– Kiun vivon vi nomas «bona vivo»? – aŭdis li demandon de Aelita.

– Vivo estas bona se venas volo (vol'as; vol'o) vivi por iu alia, se oni volas fari por tiu ĉi alia homo ĉion kion oni povas fari. Vivo estas tre bona apud tiu al kiu oni volas doni ĉion kion oni havas.

Aelita ekrigardis (ek'rigard'is) tiun ĉi tre altan homon.

– Tiu bona vivo, – aldonis (al'don'is) Alko, – venas kune kun **amo**. Kun **amo** al virino.

oo



- Pri kio parolas Alko?  
- Li parolas pri **amo**... ĉu pri sia **amo** al Katja?

**amo** = English: love.

## 192 **mortas**

**Morto** = *malvivo (mal'viv'o).*

oo

- Sed vi forflugis de via Tero, - diras Aelita.

- Ŝi **mortis**, - respondis Alko. Mi ne povis vivi sen ŝi. Mi forkuris.

- Mi sciis, - respondas Aelita, - mi sciis ke en mia vivo okazos tio. Kiam mi estis knabino, mi vidis nokte tre grandajn, ne niajn arbarojn, mi vidis ĉielon (ĉiel'o'n), alian ĉielon, ĉielon kun tre granda suno, kaj mi vidis homojn, grandajn homojn, homojn kiel vi. Mia instruisto dirisi ke mi **mortos**. «Amo **mortigos** vin», - diris li.

- Aelita, - petas Alko, - rakontu al mi pri viaj scioj (sci'o'j).



**morti** = English: die.

## 193 **filo**

*Viro kaj virino, kiuj amas unu la alian, povas ekhavi infanojn, ĉu? Se la infano estas knabo, oni diras ke ili havas **filon**. Se la geviroj havas knabinon, oni diras ke ili havas **filinon** (**fil'in'o'n**).*

*Ne nur infanon oni nomas **filo** aŭ **filino**. Ankaŭ pri ne-infano oni povas diri ke li estas **filo** de...*

*Ĉu vi scias ke **filinoj** de Zamenhof ankaŭ estis esperantistinoj (esperant'ist'in'o'j)?*

*Ĉu ankaŭ vi instruos Esperanton al viaj gefiloj?*



*Ansero sidas apud juna virino. Ŝi estas **filino** de la domestro. Iĥa, ŝia nomo estas Iĥa. Ili sidas unu apud la alia.*

*- Ĉu vi scias, - diras Iĥa, - kiam mi estis*

lernantino, oni instruis nin ke homoj, loĝantaj (loĝ'ant'a'j) sur planedo Tero, estas malbonaj homoj. Sed vi ne estas malbona. En vivo ne ĉiam okazas tio pri kio oni legas en libroj kaj aŭdas de instruistoj! Oni ankaŭ diris pri vi, ke vi, **Filoj** de Ĉielo, – diras Iĥa, – povas mortigi (mort'ig'i) per... per via rigardo (rigard'o). Sed mi vidas ne tion.

– Sed kion?

– Mi vidas ke vi, **Filoj** de Ĉielo, ne estas homoj malbonaj .

– Jes, – diras Ansero, – ni estas bonaj.

Li rigardas ŝin, ŝi rigardas lin. Estas bone al ili sidi kune.

oo

**filo** = English: son.

## 194 **patro**

*Viro kaj virino, kiuj havas filojn, filinojn aŭ gefilojn, estas iliaj (ili'a'j) gepatroj.*

*Li estas patro, ŝi estas patrino. Ili estas gepatroj por siaj infanoj. Nur por siaj. Aliaj infanoj havas aliajn gepatrojn.*

*Ankaŭ Dedalo, pri kiu ni parolis antaŭe,*

*estis patro. Ikaro, knabo Ikaro, kiu poste ekflugis al suno, estis filo de Dedalo.*

oo

– Ĉu vi scias, Iĥa, – diras Ansero, mi venis al via Marso ne por rigardi florojn, sed por fari ion grandan. Sed mi loĝas ĉi tie nelonge (ne'long'e), kaj multon mi ne konas. Diru al mi, Iĥa: kiu havas ĉi-domon, domon en kiu ni loĝas; kiu estas ĝia havanto (hav'ant'o)?

– Nomo de la homo estas Tuskubo. Li estas estro de marsa Estraro. Li estas estro de la planedo. Li estas **patro** de Aelita.

– Ĉu?!


– Jes, – respondas Iĥa.

– Bone. Kaj nun: en unu el la ĉambroj mi vidis vidaparatojn (vid'aparato'j'n). Ĉu ni iru tien? Mi volas scii kiel oni funkciigas (funkci'ig'as) ilin.

oo

**patro** = English: father.

# 195 laboras



*La homoj laboras.*

oo  
Ili eniras negrandan ĉambron, en kiu staras multaj sidlokoj (sid'lok'o'j). Ansero ek-  
sidas proksime al la vidaparato.

- Kion Filo de Ĉielo volas vidi?
- Montru al mi la urbon, - diras Ansero.
- Nun ne estas tago. Nun estas antaŭnokto (antaŭ'nokt'o). Homoj ne laboras. Oni fermis laborlokojn (labor'lok'o'j'n).

oo  
**laboro** = English: labour, work.

# 196 devas

oo  
- Bone. Rakontu al mi pri laboro. Kiu laboras?  
- Labori devas ĉiuj. Ĉiuj viroj. Ĉiu el ili

**dev**as fari laboron kiun li lernis fari. Alian laboron li fari ne povas. Se homo lernis instrui, li **dev**as esti instru**isto**. Ĉu li volas, ĉu li ne volas, li **dev**as instrui.

oo

**devo** = English: duty, obligation.

## 197 **isto**

oo

Sed ne ĉiu estas instru**isto** (instru'**ist**'o). Estas ankaŭ desegn**istoj**, lingv**istoj**, kant**istoj**, kaj. ankaŭ labor**istoj**. Tio estas arbar**istoj**, flor**istoj**, raket**istoj**, kaj multaj multaj aliaj **istoj**.

Labor**istoj** ne havas laborilojn (labor'il'o'j'n). Ili laboras per tiuj iloj kiujn oni donas al ili en la laborloko.

Inter labor**istoj** estas kiuj laboras en tre grandaj labordomoj. Tie ili tago post tago staras antaŭ siaj laboriloj (labor'il'o'j). Ili staras unu apud alia. Jes ili estas multnombraj (mult'nomb'r'a'j).

Sed vivo de laboristoj ne ĉiam estas bona vivo. Laboristoj laboras multe, sed ricevas

malpli ol **ist**oj pli altaj. Iliaj domoj kaj flugaparatoj (flug'aparato'oj) estas malpli (mal'pli) bonaj. Sed nun, kiel mi diris, laboras neniu. Nun ne estas tago. Ĉu Filo de Ĉielo volas vidi kion homoj faras post siaj laboroj?


- Bone, montru al mi tion.

oo

aĉ	ad	aĵ	<b>an</b>	<b>ar</b>	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	<b>ist</b>
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	ul
um						

**ist** = English: profession, interest.

# 198 sub



La homoj staras **sub** la domo.

**sub** = English: under.

## 199 **ejo**

**Ejo** estas loko.

- Soldate**ejo** estas loko kie loĝas soldatoj.
- Lerne**ejo** estas tiu domo aŭ ĉambro kie lernas lerne**ej**anoj (lern'ej'an'o'j).
- Libre**ejo** estas loko kie oni povas preni kaj legi librojn.
- Loĝe**ejo** estas loko kie oni loĝas.
- Subtere**ejo** (sub'ter'ej'o) estas **ejo** sub-tera.

Onidire (oni'dir'e) iamaj homoj loĝis ne en domoj, sed en **ejoj** subteraj (sub'ter'a'j). En iuj el ili ankaŭ nun oni povas vidi desegnojn, kiujn faris tiuj iamaj homoj, kaj iliajn ŝtonajn ilojn.



aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	ek	em
end	er	et	fi	ge	id	ig
iĝ	il	in	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**ejo** = English: place (building, establishment, room).

## 200 lumo

*Homoj havas okulojn. Homoj vidas. Sed homoj kiuj vivis antaŭ ni, vidis nur tage, nur kiam sur ĉielo staris suno.*

*...Ne, ni ne diru ke nokte ili vidis nenion. Stelojn oni povas vidi ankaŭ nokte... Sed se ne estas **lumo** ni, homoj, vidas ne ĉion. Ĉu oni povas legi en sen**luma** ejo? Ne, oni ne povas.*

*Sed niajn nunajn loĝejojn **lumigas** (**lum**'ig'as) ne nur suno. Homaro ekhavis (ek'hav'is) **lumigilojn** (**lum**'ig'il'o'j'n), kiuj **lumigas** niajn loĝejojn. Nun ni povas legi ankaŭ nokte.*

oo  
Iĥa prenas la funkciigilon (funkci'ig'il'o'n), kaj eksidas apud Ansero. Per la funkciigilo ŝi funkciigas la vidaparaton. La vidaparato ek-**lumi**ĝis.

Antaŭ Ansero aperis tre granda ĉambro. Ĉu tio estas ĉambro? Ne, tio estas tre granda unuĉambra domo.

Miloj da homoj staras tie. Tre multaj **lum**igiloj (**lum**'ig'il'o'j) **lum**igas tiun aŭ alian aron (ar'o'n) da homoj.

oo

**lumo** = English: light.

# 201 **bru**as

*Oni demandas infanon:*

*- Diru al ni, knabo, kiel flugas tiu flugaparato, per kiu vi kaj via patrino revenis antaŭ du tagoj al via patro?*

*- R-r-r-r-r, - respondas la knabo.*

*Sed kio estas tiu ĉi "r-r-r-r-r"? Tio estas **bruo**.*

*Jes, kion fari, niaj teraj flugaparatoj*

**bruas!** Iam okazas ke tiun ĉi **bruon** aŭdas ne nur kiuj flugas. Aŭdas ĝin ankaŭ tiuj kiuj sidas en siaj loĝejoj, kaj legas siajn bonajn esperantajn librojn.

oo

Supre, en tiu ĉi tre granda ĉambro, oni povas vidi homojn flugantajn per negrandaj flugaparatoj. Ansero aŭdas **bruon**. **Bruon** de miloj da parolantaj (parol'ant'a'j) homoj.

- Kion ili faras?! - krias Ansero.

- Ili diras nombrojn. Ĉiu el ili povas diri unun (unu'n), nur unun nombron. Se okazas ke la nombro estas bona nombro, oni donas al la homo grandan domon, kaj tre bonan flugaparaton. Tiu ĉi homo ne devos labori. Li ricevos ĉion por vivi ne laborante. Sed... sed nur al unu, nur al unu el cent-miloj da homoj povas okazi tio.

oo

**bruo** = English: noise.

## 202 timas

*Estas homoj kiuj **timas**. Iu **timas** ke oni prenos de li la loĝejon, iu **timas** ke venos tago kiam li ne havos laboron, iuj **timas**...*

*Ne **timu**, homoj, ne **timu**! Homo ne devas **timi**.*

oo

– Montru al mi ion alian, – petas Ansero.

– Bone, – respondas Iĥa.

Ŝi faras ion per sia funkciigilo (funkci'ig'il'o), sed ŝi rigardas ne ĝin, ŝi rigardas Anseron.

Ansero ekvidis ĉambron. En la ĉambro sidas iom da homoj. Inter ili estas ankaŭ tiuj kiujn la teranoj vidis kiam ili enflugis la urbon. Unu el la homoj staras. Li parolas.

Ansero rekonis (re'kon'is) la parolanton: Tio estas Tuskubo, patro de Aelita. Lia parolo estas **timiga** (**tim**'ig'a). Ansero komprenis vortojn «Tero» kaj «Marso»...

– Ne ili, sed vi! – kriis al Tuskubo unu el la estraranoj (estr'ar'an'o'j).

– Pri kio ili parolas? – demandis Ansero.

Iĥa ekrigardis la vidaparaton, kaj ek-**timis**.

– Sed mi ne volis fari tion! – kriis ŝi.

– Kion vi ne volis fari?

- Neniu marsano povas rigardi kunsidon (kun'sid'o'n) de la Estraro. Oni mortigas kiujn faras tion... Sed mi ne volis!

- Ne **timu**, Iĥa, ne **timu**. Oni faros al vi nenion malbonan. Mi rakontos al neniu pri tio.

Ansero prenis Iĥan, kaj proksimigis (proksim'ig'is) ŝin al si.

Nun Iĥa ne **timas**. Ŝi ĉesis kriegi. Per siaj grandaj okuloj ŝi rigardas Anseron.

oo

**timi** = English: fear.

## 203 **vero**

- *Mi estis en unu el malproksimaj landoj,*  
- *rakontas homo, - kaj vidis tie arbon grandan kiel... kiel nia planedo.*

*Ĉu tio estas **vero**? Ĉu la homo diras **veron**? Ne, tio ne estas **vero**.*

oo

Nokte Ansero eniras ĉambron de Alko.

- Ĉu vi scias, - diras li, - mi funkciigis unun (unu'n) knabinon por enrigardi vida-paraton. Mi vidis kunsidon (kun'sid'o'n) de la

Estraro. Mi komprenis ne ĉion, sed ion mi komprenis. Malbone. Tre malbone. Oni devas fari ion. Iutage ili mortigos (mort'ig'os) nin. Jes, mi diras **veron**: ili faros tion!

Sed Alko ne aŭdas Anseron. Li pensas pri io alia.

- Ĉu vi scias, - diras li, - Aelita rakontis al mi pri tio kio okazis iam sur Marso. «Iam, en tempo tre malproksima», - rakontis ŝi, - «estis teranoj kiuj venis al Marso». Ni ne estas unuaj, Ansero! Aelita, ĉu vi komprenas, rakontis ankaŭ ke...

- Jes, mi komprenas, - diras Ansero, - mi tre bone komprenas.

Li foriris.

Aelita ne dormas. Ŝi eldormiĝis (el'dorm'iĝ'is). Supre, sur ĉielo, staras suno. Nokto foriris. Venis tago.

Aelita ekstaris kaj ekfunkciigis (ek'-funkci'ig'is) la vidaparaton. Ŝi ekvidis laborĉambron (labor'ĉambr'o'n) de sia patro. Ili interparolis (inter'parol'is) ĉiutage.

En la ĉambron eniras Tuskubo.

- Bonan tagon, Aelita, - diras li, - ĉu vi dormis bone, ĉu ĉio iras bone en la domo?

- Jes, patro, - respondas Aelita.

- Ĉu vi instruas la lingvon al Filoj de Ĉielo?

- Ne, patro. Unu el ili parolas bone.

Ankaŭ alia komprenas ion.

- Ĉu ili volas foriri el mia domo?

- Ne, patro, ne! - kriis ŝi.

- Mi ne komprenas vin, Aelita, - ekrigardis ŝin Tuskubo.

- Kion vi ne komprenas? Patro, vi ne ĉion diras al mi. Kion vi volas fari pri ili?! Mi petas vin, patro...

Tuskubo malaperis. La aparato mallumiĝis (mal'lum'iĝ'is). Aelita longe rigardas ĝin.

- Malbone, - diras ŝi, - tre malbone.

Ŝi refunkciigas (re'funkci'ig'is) la aparaton. Aperas dormanta (dorm'ant'a) viro. Tre maljuna viro.

La viro malfermis la okulojn, kaj ekrigardis Aelitan.

- Kion vi volas, infano mia?

- Instruisto, mi timas.

- Ĉu Filo de Ĉielo timigas vin?

- Jes. Estas en li io kion mi ne povas kompreni. Nun mi parolis kun la patro. Mi pensas ke Kunsido (kun'sid'o) de Estraro volas fari ion malbonan.

- Sed vi diris ke Filo de Ĉielo timigas (tim'ig'as) vin. Ĉu ne estos pli bone por vi se li malaperos (mal'aper'os)?

- Ne, ne! - kriis Aelita.

- Mi ne komprenas iron de viaj pensoj, Aelita.

- Ankaŭ mi ne komprenas ilin.

- Bone, mi parolos kun via patro. Sed timu, Aelita, timu aperon de ino ene de vi.

oo

**vero** = English: truth.

## 204 **fin**o

*Kiam ni prenas libron por legi ĝin, ni scias ke ni legos ĝin ne ĉiam. Venos tempo kiam ni **fin**os legi la libron, fermos ĝin, kaj pensos: ĉu ĝi estis bona?*

*Ĉiu laboro, kiun oni faras, havas sian **fi**-**n**on. Kiam vi **fin**os legi libron kiun vi legas nun, vi prenos alian esperanto-libron, ĉu? Vi prenos libron kiu enhavas pli da vortoj ol tiu ĉi nuna libro.*

*Estas nenio pli bona ol, post **fin**o de siaj laboroj, sidi kaj legi bonan libron...*

*Kion vi diras? Vidaparato... Fermu ĝin: legante bonan libron oni vidas multe pli ol rigardante tiun ĉi vian vidaparaton.*



oo

- Li diris al mi, instruisto, ke tie, sur Tero, oni scias ion pri viroj - virinoj. «Sciantaj (sci'ant'a'j) tion», - diris li, - «vivas senfine».

- Bone, - respondis la instruisto, - prenu de li tiun ĉi scion.

La instruisto malaperis. Aelita ekstaras kaj iras al librejo (libr'ej'o). Alko sidas tie kaj legas. Li ekvidis Aelitan, ekstaris, kaj ekiris al ŝi.

- Ankaŭ ĉi tage, - diras Aelita, - mi rakontos al vi pri tio kio okazis iam sur nia Marso.

oo

*Tio estas vort-**fin**aj vortoj:*

-o, -j, -a, -is, -as, -os, -i, -u, -e, -n, (-us)

- o: **Fino.**
- j: **Finaj** literoj.
- a: **Fina** litero staras **fine** de la vorto.
- i: Vi povas **fini** vian laboron.
- n: **Finan** literon oni vidas **fine**.
- u: **Finu** vian laboron!
- e: **Fina** litero staras **fine** de la vorto.
- is, -as, -os: **Finis, finas, finos.**
- (-us: Se mi pov**us**, - diras infano, ankaŭ

mi flugus al Marso.)

oo


Ansero volas forkuri (for'kur'i) el domo de Tuskubo. Li komprenas ke **finfine** (**fin'fin'e**) oni mortigos ilin. Li komprenas ankaŭ ke ĉi tie, en la domo, li povos fari nenion.

Iĥa faris ĉion kion Ansero petis de ŝi. Ŝi montris al li kiel oni malfermas ejon en kiu staras la flugaparatoj.

oo

**fini** = English: finish.

## 205 eksplodas



**Eksplodo.**

Onidire unuajn **eksplodilojn** (**ek-**

*splod'il'o'j'n) oni elpensis (el'pens'is) en Ĉinio. Tio, onidire, estis raketoj, kiuj eksplodis en nokta ĉielo, por ke homoj vidu la lumojn kaj aŭdu la eksplodojn.*

oo

Kiam venis nokto Ansero prenis lumigilon, kaj eniris la flugaparatejon (flug'aparat'e-j'o'n). Inter aliaj tie staris aparato negranda, duflugila.

Ansero longe sidis apud ĝi, kaj li komprenis. Li komprenis kiel funkcias la aparato. La aparaton funkciigis tre malgrandaj **eksplodoj** ene de ĝia funkciigilo (funkci'ig'il'o). Jes, li komprenis: tie, sur Tero, li estis ankaŭ soldato-flugisto (flug'ist'o).

Poste li eniris la domon, kaj eksidis antaŭ la vidaparato por rigardi urban vivon.

Iĥa instruis lin kiel funkciigi la aparaton por ke li vidu ĉion, sed lin vidu neniu. Per aparatoj kiuj staris en domo de Tuskubo oni povis fari tion.

Li rigardis loĝejojn de laboristoj, kiuj ne volis, sed devis labori ĉiutage. Li rigardis iliajn laborlokojn, kie ili multe da tempo staras antaŭ siaj laboriloj. Li rigardis ankaŭ bone lumigitajn domojn, en kiuj loĝas istoj (ist'o'j) pli altaj. Tie estis multe da virinoj, infanoj, arboj kaj floroj. En taga ĉielo oni povis vidi tie tre bonajn flugaparatojn.

Ĉion ĉi Ansero vidis ankaŭ sur Tero. Se diri veron, soldato Ansero, sur Tero, pafis tiujn ĉi homojn, homojn kiuj havis iom pli ol homoj aliaj. Li pensis tiam ke tio donos tre bonan vivon al laboristaro (labor'ist'ar'o). Jes, li faris tion: li ne sciis kio okazos poste...

Iĥa rakontis al Ansero ĉion, sed montri al li Kunsidon de la Estraro ŝi ne volis:

– Pli bone vi mortigu min, Filo de Ĉielo!

Estis dek-kvara tago de ilia almarsiĝo (al'mars'iĝ'o) kiam Ansero ekvidis per la vidaparato tion kion antaŭe li ne vidis: el supra urbo malaperis virinoj kaj floroj, sed aperis aroj da soldatoj. En unu el grandaj laborejoj li ekvidis laboristojn kiuj ne laboris. Ili staris kaj brue parolis pri io.

Ankaŭ en malsupra urbo oni parolis. Oni parolis pri tio ke povas okazi io. Sed kio? Iĥa ne sciis tion. Ŝi nur rigardis. Ŝi rigardis Anseron per okuloj de amanta (am'ant'a) virino.

En lokoj kie loĝis laboristoj oni sciis iom pli: oni sciis ke okazos interparolo (inter'parol'o) inter Tuskubo kaj ĉefo de laboristoj, nomo de kiu estas Goro. Multaj homoj venis al Domo de Estraro, kie devis okazi tio. Inter la domo kaj la homoj staris soldatoj.

En granda ĉambro de Domo de Estraro staras Tuskubo. Li staras antaŭ multaj sidantaj tie estraranoj (estr'ar'an'o'j), kaj parolas.

– Mi scias, – diras Tuskubo, – ke inter vi estas homoj kiuj rakontos ĉion kion mi diros al vi ĉi tie. Sed mi ne timas.

Mi volas diri al vi tion kion vi scias. Aperis inter ni homoj kiuj volas aliigi nian vivon (ali'ig'i = fari ke ĝi ekestu alia). Ili volas labori malpli, sed havi multe pli ol ili havas nun. Kaj estas aliaj homoj, homoj kiuj loĝas en bonaj domoj, kaj flugas per tre bonajflugaparatoj.

La unuaj rigardas la duajn de malsupre, kaj ankaŭ ili volas havi. Malbone. Tre malbone.

Sed de kie venas tiu ĉi malbono? Ĉio malbona venas el urbo.

Ni devas neniigi (neni'ig'i) la urbon. Ni devas **eksplodi** ĝin. Proksimiĝas tago kiam homoj, sed nur bonaj homoj, loĝos en lokoj neurbaj, sur tero. Ankaŭ tie oni devos labori. Oni devos multe labori por ke vivo ekestu bona. Sed oni devas scii ke ankaŭ tio ne forigos de ni formorton (for'mort'o = mortos ĉiuj). Sed tio estos formorto nenuna, tio estos bona, iama formorto.

– Kion li diras?! – kriis la homoj, – ni ne

volas morti!

- Tuskubon for! - kriis aliaj.

Tuskubo ekrigardis ilin, kaj la homoj ĉesis brui.


- Venas fino al vivo sur nia planedo, kaj neniu povas fari ion por ke la fino ne venu. Ĉiuj vi scias ke nombro da marsanoj, kiuj mortas, estas multe pli granda ol nombro da infanoj. Jes, proksimiĝas fino.

Sed por ke finaj tagoj estu tagoj bonaj, ni devas **eksplodi** la urbon.

oo

**eksplodi** = English: blow up.

## 206 saltas



*Ili saltas.*

oo

De sia loko ek**saltis** Goro. Tio estis tiu

juna ĉefo de laboristoj, kiun Ansero vidis antaŭe per la vidaparato.

– Tuskubo diras malveron! – kriis Goro, – li volas neniigi la urbon nur por esti kio li estas nun, por esti estro. Sed ni ne volas morti! Jes, niaj virinoj donas al ni malpli da infanoj, sed estas eliro (el'ir'o): en domo de Tuskubo loĝas du teranoj...

Tuskubo ekrigardis Goron. Sub lia rigardo Goro ekis (ek'is) aliiĝi (ali'iĝ'i).

– Jes, – elkriis li, – mi scias pri via rigardo, sed mi... mi ne timas vin. Vi faros... vi faros nenion al...

Goro falis. Sed, post tre nelonge, (ne'long'e) li eksaltis, kaj alsaltis Tuskubon. Li ĵetis lin malsupren, kaj kriis:

– Morto?! Bone! Sed ne por ni!

Multaj ekkuris al kuŝanta Tuskubo. Goro ĵetis sin al la elirejo (el'ir'ej'o), forigis de tie soldaton, kaj elsaltis al homoj, starantaj (star'ant'a'j) antaŭ la Domo.

oo

**salti** = English: jump, leap.

## 207 sana

*Sana* homo iras kaj kuras. *Malsana* homo kuŝas kaj ne ĉiam scias ĉu li vivos aŭ ne. Junaj homoj estas pli **sana**j ol homoj maljunaj, sed ankaŭ juna homo povas malsaniĝi (mal'**san**'iĝ'i).

oo

Ansero enkuras la librejon (libr'ej'o'n).

– Alko, – krias li, – bone, tre bone! Ĉu vi scias kio okazas? Laboristoj ekstaris! Ek! En la flugaparaton mi enigis ĉion, ankaŭ marsanajn pafilojn. Forĵetu vi viajn librojn, ĉesu legi, ni forflugas!

Alko sidas, rigardas Anseron, sed ne vidas lin. «Kie estas Aelita?», – pensas li.

– Ĉu vi estas **sana**?! – krias Ansero, – ni flugu, mi volas ke ankaŭ vi estu unu el estroj de Marso!

– Kio okazas en la urbo? – demandas Alko.

– Se diri veron, mi ne scias. Mi scias nur ke en la urbo aroj da homoj kuras tien kaj reen (re'e'n).

– Bone, – diras Alko, – vi flugu. Eksciu kio okazas tie, kaj revenu. Nokte vi revenu. Faru kion vi volas. Ankaŭ mi faros kion vi volas, sed ne nun. Ĉu bone? Ĉi-tage mi volas esti ĉi tie.




- Bone, - diras Ansero, - nokte mi revenos.

«Inoj», - diras li al si, - «ankaŭ ĉi tie inoj inigas nin, virojn (in'ig'as = faras ke viroj estu kiel inoj)!

oo

**sana** = English: healthy.

## 208 **ŝtupo**



oo

Ansero foriris. Alko reprenis la libron, kaj eksidis sur **ŝtupo** de libreja (libr'ej'a) **ŝtuparo** (**ŝtup**'ar'o).

«Kio okazos?» - pensas li, - «jes, se paroli pri **ŝtuparo** de vivo, marsanoj staras sur **ŝtupo** multe pli alta ol ni, homoj. Nun, post lego de ĉi-libroj, post rakontoj de Aelita,

mi scias pri ili multe pli ol mi sciis antaŭe. Sed nun mi scias ankaŭ, ke post tiu ĉi scio staras alia, pli granda nescio! Jes, Aelita diris veron al mi: mi eksciis pli ol mi povas scii... «Donu al birdo, kantanta sub suna ĉielo, kompreni ion el scioj de homaro, kaj la birdo falos morta...» Ne, mi ne devis preni ĉi-sciojn...

oo

**ŝtupo** = English: stair, step.

## 209 sendas

- **Sendi:** «Irigi (ir'ig'i) iun en iun lokon, por ke tiu tie faru ion». (El vortaro PIV).
- Kiam la teranoj venis al Marso, ili ekvidis, matene, grandan flugantan ŝipon. Kiu **sendis** ĝin, ĉu Tuskubo?

oo

Alko ekaŭdis bruon de forfluganta (for'flug'ant'a) aparato. Venas Iĥa. Ĉu Aelita **sendis** ŝin?

– Filo de Ĉielo, – diras ŝi, – mi petas vin

eniri Grandan Ĉambron.

Alko eniras. En la ĉambro li ĉiutage sidis kune kun Aelita.

– Aelita ne venos, – diras Iĥa, kaj kuŝigas (kuŝ'ig'as) florojn sur ŝian lokon.

Desupre aŭdiĝas duhoma kanto. Oni kantas pri vivo, oni kantas pri morto...


– Ĉu mi povas vidi Aelitan?

– Ne, Filo de Ĉielo, vi ne povas vidi ŝin.


oo

**sendi** = English: send.

## 210 varm o



Estas **varme**



Estas mal**varme**

**varmo** = English: warm, hot.

*Ĉion kion vi, leganto, legos de nun, ene de tiu ĉi rerakonto pri Aelita, vi legos per tiuj ĉi ducent dek vortoj.*

*Vortaron 501-vortan, se vi volos vidi ĝin, (antaŭe ni parolis pri tio) vidu post tria rerakonto de tiu ĉi lernilo.*

*Bonan legadon al vi!*

oo

«Ŝi ne volas vidi min», – diras Alko al si.  
– «Bone. Mi ne sidos pensante pri ŝi. **Varme**. Estas tre **varme** ĉi tie. Mi iru. Mi iru al la montoj.»

Li iras. Li eliras el la domo, li eliras el lokoj kie staras apuddomaj (apud'dom'a'j) arboj kaj floroj. La montoj ne estas malproksimaj. Li iras supren. De supre li vidas aron (ar'o'n) da marsanoj. Iuj el ili havas pafilojn. Ili krias, ili kantas. Ili iras al la urbo. La marsanoj foriris.

Ekaŭdiĝis (ek'aŭd'iĝ'is) bruo. Mal-supreniĝis (mal'supren'iĝ'is) flugaparato. En la aparato sidas Aelita.

– Mi venis por preni vin, – diras ŝi, – mi estis en la urbo... Ni devas forkuri (for'kur'i), Alko. Mi mortos sen vi.

Alko eksidis apud Aelita. Knabo-flugisto ekflugigis (ek'flug'ig'is) la aparaton.

– Mi parolis kun la patro, – rakontas Aeli-

ta, – «Prenu tion ĉi», – diris la patro, – «por ke ilia morto estu bona morto».

– Ne forĵetu, – diras Alko. – Donu tion al mi. De nun vi estos por mi kaj vivo kaj morto.

Ili venis al domo de Tuskubo.

– Prenu kvarflugilan (kvar'flug'il'a'n) aparaton, – diras Aelita al la knabo. Post iom da tempo ni forflugos.

Ŝi ne vidas demandantajn (demand'ant'a'j'n) okulojn de Iĥa, ankaŭ ne la timantan (tim'ant'a'n) domestron. Ŝi iras antaŭ Alko al sia ĉambro. Antaŭe Alko neniam estis tie.

– Sidu, – diras ŝi. – Mi diris al Iĥa: «Kiam li estos sen mi, kuŝigu (kuŝ'ig'u) florojn. Kaj kanto. Aŭdigu (aŭd'ig'u) al li la kanton». Ĉu vi komprenis ĝin? Ĉu vi pensis pri mi? Mi ne scipovas (sci'pov'as) ami, Alko, mi neniam faris tion, sed ne igu (ig'u) min foriri. Mi povas rakonti. Mi rakontos al vi multon el tio kion vi volas scii. Kiam vi venis, mi pensis: «Tio estas tiu granda homo kiun mi vidis kiam estis knabino. Li prenos min de ĉi tie. Ĉi tie estas malbone. Suno ne varmigas la planedon, foriras arbaroj...» Prenu min sur vian Teron! Mi volas vidi vian sunon, viajn senfinajn (sen'fin'a'j'n) arbarojn. Prenu min. Vivo foriras de Marso. Mi ne volas morti!

Ŝi rigardas lin de malsupre kiel malgranda knabino, sed... en la malluma (mal'lum'a)

ĉambro eklumiĝas la vidaparato.

Aperas okuloj de Tuskubo.

– Ĉu vi estas ĉi tie? – demandas li.

Aelita ĵetis sin al la vidaparato.

– Mi estas ĉi tie, patro, – diras ŝi, starante proksime al la vidaparato por ke Tuskubo ne vidu Alkon.

– Ĉu Filoj de Ĉielo estas vivaj?

– Ne, patro, – mi faris kion vi petis de mi.

– Malvero (mal'ver'o)! – krias Tuskubo, – Filo de Ĉielo eniris la urbon. Li igas laboristojn pafmortigi (paf'mort'ig'i) miajn soldatojn!

Tuskubo malaperis.

Aelita, Alko, Iĥa kaj la knabo-flugisto flugas al malproksimaj montoj. Aelita sidas kaj rigardas sian malgrandan vidaparaton. Ŝi vidas kaj aŭdas ĉion kio okazas sur la planedo. Ŝi aŭdas vortojn de Tuskubo, sed ankaŭ kriojn de Ansero.

– Via Filo de Ĉielo, – diras ŝi al Iĥa, – estas vera Filo de Ĉielo. Li estas homo sentima.

Ili venis al malgranda loko inter la montoj, kaj malsupreniĝis (mal'supr'e'n'iĝ'is).

Alko kaj la knabo prenis el la aparato ĉion kion ili venigis kun si por loĝi ĉi tie, kaj ekiris post la virinoj. Aelita kaj Alko eniris unun (unu'n) el la negrandaj enmontaj ĉambroj. Poste ili eksidis apud ĝi, kaj ekrigardis la sunsubiron (sun'sub'ir'o'n).

– Iam, – diris Aelita, – ĉi tie staris multaj arbaroj. Povas esti ke ni ĉiuj foriros, kaj Marso ekestos senarbara kaj senhoma.

Venis nokto, kaj Aelita faris tion kion faris iamaj (iam'aj) virinoj apud siaj iamaj loĝejoj. Ekestis lume kaj varme. Aelita ekrigardis la lumon kaj ekkantis.

– Post tiu ĉi kanto, – diris ŝi al Alko, – viro kaj virino iĝas (iĝ'as) interproksimaj (inter'proksim'a'j) por ĉiam.

Alko ekflugis (ek'flug'is) al domo de Tuskubo. Estas nokto. Li eliris el la flugaparato. Apud la domo li ekvidis ion grandan. «Kio estas tio?» – pensis Alko.

– Ne iru tien, – time diris la knabo-flugisto.

Alko prenis la pafilon. La domo estis senluma. Li pensis pri vortoj de Aelita: «Revenu (re'ven'u)», – diris ŝi, – «revenu al mi, Filo de Ĉielo».

Li kuras al la domo. Apud la domo staras granda flugŝipo. Li ekvidiis ke oni eksplodis (eksplod'is) ĝin. Sed kiu? Apude kuŝas senviva homo.

«Ĉu Ansero?» – pensas Alko, – «ne, tio estas marsano. Povas esti ke oni mortigis lin pafante el la domo».

Alko eniris la domon. Li funkciigis lumigilojn. La domo eklumiĝis. «Ĉu mi faras

bone?»

- Ansero! - krias li.

Li eniras la vidaparatan ĉambron.

«Ĉu li venos ĉi tien? Ĉu mi flugu al li... sed kien?... La morta homo ne estas soldato. Ĉu tio estas laboristo?»

Li funkciigis la vidaparaton. Bruo. Loko antaŭ Domo de Estraro. Krioj de mortantaj (mort'ant'a'j) homoj... Alko malfunkciigas la aparaton.

Li ekaŭdis bruon, prenis la pafilon, kaj ĵetis sin al la enirejo. Tie li ekvidis kuŝantan (kuŝ'ant'a'n) marsanon. Alko prenis kaj enigis (en'ig'is) lin en la ĉambron.

- Filo de Ĉielo, - diris la marsano, - prenu ĉi tion.

Alko prenis kion donis al li la mortanta homo.

«Mi sendas la ŝipon kaj sepon da laboristoj por preni vin. Vi vidos min en Domo de Estraro. Alteriĝu (al'ter'iĝ'u) tie. Ansero.»

Alko volis demandi la marsanon kio okazis ĉi tie, sed la marsano ne respondis. Li estis morta.

Alko elkuris el la domo. Oni pafis. Oni pafis el sub la ŝipo. Alko alsaltis la ŝipon, kaj faligis ĝin. La ŝipo falis, mortigante kiujn kuŝis sub ĝi.

Du soldatoj ekkuris for. Alko elpafis. Unu el la kurantoj falis, la alia eksidis.



- Ĉu Tuskubo sendis vin?  
- Jes, Filo de Ĉielo.  
- Mi mortigos vin.  
- Jes, filo de Ĉielo.  
- Per kio vi alflugis, kie estas via flugaparato?

La marsano montris negrandan aparaton.

- Ĉu vi vidis en la urbo Filon de Ĉielo?  
- Jes, Filo de Ĉielo.  
- Flugigu min tien.

Kiam Ansero ekflugis el domo de Tuskubo li havis ne nur pafilojn, sed ankaŭ sepon da eksplodiloj (eksplod'il'o'j), kiujn li prenis kun si de Tero.

Li alflugis la urbon. Apud Domo de la Estraro staris flugŝipoj. Unu el la ŝipoj supreniĝis. Sur ĝi staris soldatoj.

Ekaŭdiĝis pafoj. Ansero malsuprenigis sian aparaton, kaj ĵetis eksplodilon sur la ŝipon. La ŝipo eksplodis kaj falis sur urbajn domojn.

Ansero flugas kaj rigardas malsupren. Li konis la urbon.

Apud granda laborejo staras multmila (mult'mil'a) aro da marsanoj. Ansero alteriĝis. Oni rekonis lin. Homoj time alproksimiĝis (al'proksim'iĝ'is). Tio estis laboristoj.

Ansero eliris el la aparato. Ekestis sen-

brue (sen'bru'e).

- Ĉu vi kunvenis (kun'ven'is) por paroli aŭ por pafi? Se nur por paroli, mi forflugos.

- Ne forflugu, Filo de Ĉielo!

- Se mi komprenis vin, vi volas pafi. Bone. Antaŭ nelonge min alflugis ŝipo de Tuskubo. Mi neniigis (neni'ig'is) ĝin. Laboristoj, prenu pafilojn, iru post mi!

Alsaltis Goro. Ansero rekonis lin.

- Kion vi diras, al kio vi igas (ig'as) nin? Ni ne havas pafilojn...

- Vi havos ilin. Kie estas via pafilejo (paf'il'ej'o)? Kiu ne timas morti, iru post mi!

- Aj-aj, - ekkriis la marsanoj.

Jes, aperis estro. Ankaŭ Goro komprenis tion. Li eldiris dek du bruajn parolojn kiujn, per vidaparatoj, aŭdis ĉiuj laboristoj. Multe da homoj venis al ili.

Kvardek mil marsanoj proksimiĝis al la pafilejo.

Ansero timis ke Tuskubo sendos siajn flugŝipojn. Por ke tuskubanoj (tuskub'an'o'j) ne komprenu kio okazas, Ansero sendis kvin mil laboristojn al Domo de Estraro.

- Iru kaj sciu, - diris li, - neniu el vi revenos viva.

La marsanoj elkriis "aj-aj", kaj ekiris morti.

Al la pafilejo Ansero alkuris unua. Aliaj

postkuris lin. Malmultaj soldatoj, kiuj estis tie, povis fari nenion.

Kvardek mil marsanoj ekhavis pafilojn. Tie staris ankaŭ flugŝipoj. Multaj flugŝipoj.

Ansero alparolis per la vidaparato Domo de Estraro. Li petis fordoni (for'don'i) Tuskubon. Responde la Estraro sendis flugŝipojn. Ansero alflugis ilin per siaj ŝipoj, kaj faligis (fal'ig'is) ĉiujn ŝipojn de Tuskubo.

Nokte Ansero venigis (ven'ig'is) siajn homojn al Domo de Estraro.

– Mi instruos vin, – kriis li al la laboristoj, – mi instruos vin fari soldatan laboron!

Li ĵetis unu post la alia tri eksplodilojn, kaj ekkuris al la Domo.

Oni pafis. Antaŭ la Domo ekkuŝis multaj mortantoj, sed Ansero kaj liaj homoj prenis la Domon. En la Domo estis neniuj. Tuskubo kaj ĉiuj liaj estraranoj (estr'ar'an'o'j) malaperis.

Homoj de Ansero prenis ĉiujn lokojn kiujn oni devis preni. La urbo ekestis malbrua (mal'bru'a). El domoj elrigardis timantaj loĝantoj. Multaj el ili foriris ĉi-nokte el la urbo.

– Ne timu, knaboj, ne timu, – diris Ansero al la laboristoj, – post fino de ĉi-mortigoj ni ekvivos tre bone.

Nokte Ansero revenis en Domon de Estraro.

- Mi ne komprenas, - diris li al Goro, - kie estas soldataro de Tuskubo? Li havis ne malpli ol dek kvin mil soldatojn. Jes, tricento da ili kuŝas mortaj, sed kie estas aliaj?

- Ili foriris suben (sub'e'n), en la subteran (sub'ter'a'n) urbon. Sidu. Ni povas fari nenion, - respondas Goro. - Ĉu vi scias, iam ni ne loĝis en grandaj domoj. Ni ne scipovis varmigi ilin. Kiam estis malvarme, ni iris mal-supren. Jes, tiam ni loĝis subtere. Varmo de la planedo varmigis nin. El la subtera urbo oni povas iri subtere al aliaj urboj.

Ni ne povas scii kie estas Tuskubo. Nur li konas ĉiujn subterajn urbojn, en kiuj delonge loĝas neniuj. Vi, teranoj, - diras Goro, - vi estas tre junaj, sed ne ni. Nia tempo foriris.

- Bone, - diras Ansero, - sed nun, kion ni faru nun?

- Tage ni interparolos kun Tuskubo pri tio kion li donu al ni, kaj kion ni donu al li.

- Bone. Kaj nun aŭdu kion diros mi. Kun miaj homoj mi iros al loko el kiu oni funkciigas ĉiujn vidaparatojn. De tie mi alparolos Teron. Vi alparoligu (al'parol'ig'u) Tuskubon kaj diru al li ke...

Sed Ansero ne finis la parolon. Eksplodo. Ekaŭdiĝis tre granda eksplodo.

Eniris Alko.

– Proksimiĝas soldatoj de Tuskubo, – diras li. En ĉielo lumas lia ŝiparo (ŝip'ar'o).

Alko kaj Goro eliris el la Domo, kaj tiam oni ekaŭdis duan eksplodon. Marsanoj apud la Domo diris nenion. Neniigis (neni'ig'is) iliaj domoj, iliaj inoj, iliaj infanoj.

Ansero, post interparolo kun Alko kaj Goro, alparolis pafilejon, kie staris iliaj ŝipoj. De tie oni respondis ke oni finas surŝipigon (sur'ŝip'ig'on) de la homoj. Poste oni diris ke la ŝipoj deteriĝas (de'ter'ig'as). Kaj vere, en ĉielo oni ekvidis la flugantan ŝiparon.

Sed tria eksplodo neniigis la ŝipojn. Oni vidis kiel ili falas surteren.

Venis Goro.

– Malbone, tre malbone estos al tiuj kiuj postvivos (post'viv'os) tiun ĉi tagon.

Ansero ne respondis. Li alkuris homojn kiuj staris antaŭ la Domo, kaj diris ion al ili. La homoj ekiris. Ansero flugis supre.

– Antaŭen (antaŭ'e'n), antaŭen! – kriis li.

De loko antaŭ la Domo foriris ĉiuj. Tiam venis ŝipoj de Tuskubo.

– Kuru, Filoj de Ĉielo, – diris Goro al Alko, – vi havas tempon por forkuri.

La ŝipoj alteriĝis. La soldatoj elŝipiĝis, kaj ekpostkuris (ek'post'kur'is) la laboristojn.

Alko ekvidis ke sur la antaŭdoma loko

aperis Ansero. Kvin aŭ ses ŝipoj alflugis lin. Alko ekkuris tien. Soldatoj volis preni Anseron viva. Li ĵetis ilin for, sed soldatoj estis multnombraj (mult'nombr'a'j). Ansero falis. Alko alkuris la lokon, forĵetante (for'ĵet'ant'e) la soldatojn. Li prenis Anseron kaj enigis (en'ig'is) lin en la Domon. Post iom da tempo Ansero ekstaris.

– Alko, – diris li, – oni mortigis ĉiujn!

Li ekkuris al la eliro. Alko ne donis al li elkuri.

– Komprenu, – diris li, – tio estas fino. Ni iru. Ni iru kaj faru ĉion por ke ili ne prenu Aelitan.

– Ne parolu al mi pri viaj inoj! – kriis Ansero.

– Ni iru. Povas esti ke ni povos reveni sur Teron.

– Bone. Ni iru.

En apuda ĉambro ili ekvidis ŝtuparon.

Alko kaj Ansero iras malsupren. Sube ili ekvidis homon irantan al ili.

– Kuru, kuru, – kriis li, – ili eniras!

Tio estis Goro.

– Iru subtere. Se vi revenos al via planedo, rakontu tie pri ni.

De supre ekaŭdiĝis bruo. Ansero ekkuris malsupren.

– Iru kun ni, – diris Alko al Goro.

– Vi iru. Mi volas morti.

Alko ekpostkuris (ek'post'kur'is) Anseron. Rigardante reen (re'e'n) li ekvidis soldatojn kiuj mortigas Goron.

Mallumo. Ili iras en mallumo. Ili iras iom supren, iom malsupren, per ŝtuparoj kiujn ili ne vidas. Tio estas tre longa subtera iro. Sed...

– Staru!

– Kio okazis?

Alko ĵetas ion malsupren. Ili longe ne aŭdas bruon de falo (fal'o).

– Ĉu tio estas fino?

– Povas esti ke jes.

– Ĉu vi scias, – diras Ansero, – mi multe pensis pri morto. Kio estas homo? Oni pafas lin kaj – fino. Ne estas homo. Sed mi, mi volas vivi!

Ansero ekiris. Iom da tempo li diris nenion. Sed poste Alko ekaŭdis:

– Lumigilo (lum'ig'il'o)... ĉu vi scias, lumigilo!

Kaj vere, aperis lumo. Nun ili vidas kien iri. Ili iras longe.

– Ne, – diras Alko, – mi ne povas.

Li ekkuŝis. Ansero iras antaŭen.

– Eliro, eliro!

Ili ekvidis ĉielon. Kaj monton. Sed tio estas monto proksima al domo de Tuskubo! Alko

rekonis ĝin. Jes, ili eliris proksime al la domo.

– Filoj de Ĉielo, Filoj de Ĉielo, – ekaŭdis ili.

Tio estis la knabo-flugisto. Li rakontis ke nokte li aŭdis eksplodojn el la urbo, kaj vidis lumojn. Li pensis ke Filoj de Ĉielo mortis, kaj ekflugis al Aelita. Ankaŭ ŝi aŭdis kaj vidis la eksplodojn.

«Revenu al la domo», – diris ŝi al la knabo. – «Se soldatoj de Tuskubo prenos vin, mortu senparole (sen'parol'e).»

Ili ekflugis. Ili flugis al Aelita. Ansero kaj la knabo enigis la flugaparaton en unun el la enmontaj (en'mont'a'j) ejoj.

De supre alkuris Iĥa. Ŝi kuris al Ansero. Amo, granda amo lumigis ŝiajn okulojn.

Alko eniris ĉambron de Aelita. Aelita dormis. Alko sidis kaj rigardis ŝin. Aelita malfermis la okulojn.

– Filo de Ĉielo, – diris ŝi, – amo mia.

Apud la ĉambro ekaŭdiĝis (ek'aŭd'iĝ'is) bruo. Alko kaj Aelita aŭdis nenion. Aperis granda flugŝipo.

– Prenu ilin, – diris Tuskubo al siaj soldatoj.

La ŝipo forflugis. Nur tiam Ansero kaj Iĥa



povis malsupreniĝi. Ili ekvidis Alkon. Li kuŝis apud la eniro.

Ansero prenis lin. Ĉu li estas viva? Sed Aelita... Ĉu vivan, ĉu mortan, la soldatoj forprenis ŝin.

Ansero enigis Alkon en la flugaparaton, kaj diris:

– Vivan ili ne prenos min. Sed se mi venos al Tero, ni revenos. Vi iru, – diris li al Iĥa, kaj al la knabo, – iru kien vi volas. Mi ne povas preni vin, Iĥa: mi flugas al morto.

Li forflugis.

Ansero ekrigardis Alkon. «Ne, li ne mortis», – pensas li, – «li estas varma...».

Granda flugŝipo aperis antaŭ li. Ansero ĵetis sian aparaton supren, supren... la ŝipo malaperis.

Noktiĝas (nokt'iĝ'as). Malsupre oni vidas nenion. Nokto. Ansero alteriĝis. «Jes, Alko ne estas morta. Sed kien mi flugu?»

Li ekrigardis ĉielon. Steloj. Noktaj steloj. Sed marsaj steloj diras nenion al li.

Li eniris la flugaparaton por refunkciigi (re'funkci'ig'i) ĝin, sed la aparato ne funkcias. Ĝi ĉesis funkcii.

– Bone, – diris Ansero.

Li eliris el la aparato, prenis Alkon, kaj ekiris. Post longa iro li kuŝigis Alkon, kaj falis

surteren. Li ne sciis ĉu longe li kuŝis, ĉu ne-longe, sed ekestis malvarme. Li ekstaris, ekrigardis ĉielon.

Granda stelo staras tie. Sed... sed tio estas Tero! Nun li scias kie estas ilia raketo. Li ekkuris.

Proksimiĝis suneliro (sun'el'ir'o) kiam Ansero ekaŭdis bruon.

«Marsanoj», – komprenis li, – «ili volas neniigi la raketon!» Sed li vidis ke ili eklaboris nur antaŭ nelonge.

Ansero kuŝigis Alkon.

– A-a-a, – ekkriis li, kaj ekkuris al la marsana flugŝipo.

La soldatoj forkuris: Filo de Ĉielo, granda kaj senmorta Filo de Ĉielo!

Ansero malfermis la fermilon (ferm'il'o'n), kaj la du Filoj de Ĉielo malaperis en la raketo. Marsanoj, kuŝantaj malproksime, vidis ke la granda raketo eksplodis, eksaltis, kaj forflugis, revenigante (re'ven'ig'ant'e) la du teranojn al ilia planedo.

– Ĉu nun estas pli bone?

Alko malfermis la okulojn. Io bruas.

– Ĉu ni longe flugas?

– Longe.

– Sed kien?

– Tion mi ne scias. Mallumo kaj steloj. Ni

flugas al steloj.

Alko fermis la okulojn.

Ansero ekrigardis Marson. Ĝi malgrandiĝas. Sed kie estas Tero? Li ekdormis apud Alko.

Raketo bruas kaj flugas. Flugas kaj bruas...

Ekaŭdiĝis (ek'aŭd'iĝ'is) krio:

– Sed ŝi estas viva! Ŝi estas viva, donu al mi eliri. Ŝi vivas!

«Ĉu ni forflugas de nia planedaro? Jes. Mi devas, mi devas ekstari», – pensas Alko.

– Saturno, tio estas Saturno!

Jes, ili revenas. Oni vidas ankaŭ malgrandan Teron, sed ĝi grandiĝas.

– Tero, Tero!

Ansero malfermis la fermilon antaŭ ol la raketo falis surteren.

Kantas birdo. Ĝi kantas pri lumo de suno, pri ĉielo, pri amo.

Alko kuŝas kaj aŭdas la kanton. Iam li aŭdis ĝin. Sed kie, kiam? Jes, Aelita. Ŝi kantis al li la kanton pri amo. Ankaŭ ŝi volis vidi ĉi-sunon kaj ĉi-ĉielon.

En la ejo por malsanaj homoj aperis Skajlo. Li eksidis apud Alko.

– Antaŭ nelonge mi vidis Anseron, – diras li, – Ansero ne estas ne tre sana, sed li iras! Ankaŭ vi iros, Alko.

Skajlo parolas, kaj liaj okuloj, okuloj de homo kiu volas scii ĉion, rigardas Alkon.

– Estas tre bone ke vi venis, Skajlo, – diras Alko.

Peterburgo. Estas malvarme. Tre malvarme. Alko iras de la laborejo al sia unuhoma loĝejo. Apud ĝi li ekvidis Anseron.

– Ni iru, – krias Ansero, – ni iru!

Irante (ir'ant'e) li rakontas ke oni aŭdas ion de malproksimo. Ĉu de Marso?

Ili eniras negrandan varman ĉambron. Multaj aparatoj staras tie. Bruo. Kaj...

– Kie vi estas, Filo de Ĉielo, kie?...

Aelita!

oo



# Rerakonto dua

## Batalo por fajro

*En antaŭa rerakonto de «Esperanto per 501 vortoj» ni legis pri instruisto, kaj pri kvaro da liaj lernantoj. La lernantoj rakontis. Lernantino Lea rakontis pri geknaboj Triko kaj Kvarka, lernanto Pablo rakontis pri nombroj kaj pri lokoj de ciferoj ene de ili. Kim rerakontis (re'rakont'is) libron «Aelita» de A.Tolstoj. Kaj Andreo... kion rakontos Andreo?*

*– Mi rerakontos libron, nomo de kiu estas «Batalo por fajro» (J.H. Rosh-Aîné).*


## 211 fajro



oo

Tio estas libro pri homoj kiuj nomis sin (si'n) «ulamroj». Ili loĝis sur nia Tero antaŭ tre multe da tempo. Povas esti ke nun ili nomas sin «francoj» aŭ «japanoj». Povas esti ke nun ili havas iun alian nomon...

Tiamaj (tiam'a'j) homoj ne havis ilojn kiujn havas ni, nunaj homoj. Sed **fajron** ili konis.



En tiu malproksima tempo homoj havis fajron ne kiam ili volis ekhavi ĝin, sed nur kiam proksime al ili falis ĉielfajro (ĉiel'fajr'o). Sed, kiel vi komprenas, tio okazis ne ĉiutage.

oo

**fajro** = English: bonfire, fire.

## 212 amiko

**Amiko** estas homo. Tio estas homo kiun ni amas... Ne, ĉi tie oni parolas ne pri amo inter viro kaj virino.

**Amiko** estas homo kune kun kiu oni povas sidi, kaj rakonti al li ĉion kion oni pensas. **Amiko** estas homo kune kun kiu oni povas fari tion, kion sen bonaj **amikoj** oni fari ne povas.

Bona **amiko** estas homo, kune kun kiu oni povas timi nenion mal**amikon**.

oo  
La nokto estis malvarma, senstela. En la mallumo oni vidis malbone. Sed ulamroj kuris. La kuro estis longa, tre longa. Kuri povis ne ĉiuj...

De kiu ili kuris? Ili kuris de siaj (si'a'j) mal**amiko**j, de homoj kiuj postkuris (post'kur'is) ilin por mortigi virojn kaj knabojn, por preni virinojn kaj knabinojn.

oo  
**amiko** = English: friend.

## 213 **besto**

El antaŭa libro de «Esperanto per...» ni konas nomojn de du **bestoj**. Tio estas hundo kaj birdo. Sed nomaro (nom'ar'o) da **bestoj** estas multe pli longa.

Ĉu homoj konas ĉiujn surterajn (sur'ter'a'j'n) **bestojn**? Ne, ne ĉiujn. Oni rakontas ke en arbaroj de foraj kaj varmaj landoj ankaŭ nun loĝas **bestoj** pri kiuj ni scias tre malmulte... aŭ nenion.

Estas **bestoj** kiuj mortigas aliajn **bestojn**. Por kio ili faras tion?

**besto** = English: animal, beast.

## 214 **manĝas**

Bestoj mortigas unu alian por **manĝi**. Ili mortigas, kaj **manĝas** kiun ili mortigis.

Ĉu ĉiuj bestoj faras tion? Ne, ne ĉiuj.

Estas bestoj kiuj **manĝas** ion alian: ili **manĝas** tion kion donas al ili tero.

Ankaŭ inter homoj estas kiuj ne **manĝas**




*bestojn... sed ili, tiuj homoj, ne estas multaj.*

**manĝi** = English: eat.

**manĝo** = English: meal.


## 215 portas



La homoj **portas**

**porti** = English: carry.

## 216 **forta**



*La homo estas **forta**.*

**forta** = English: strong.

**forto** = English: force, strength.

## 217 **pro**

oo

**Pro** timo, kaj **pro** tiu ĉi longa kuro, la forkurantoj (for'kur'ant'o'j) ne povis pensi, sed ili pensis: fajro, ilia fajro, ĝi ekestis morta!

La fajro loĝis en tri fajroportiloj (fajr'o'-port'il'o'j). Tage kaj nokte kvar virinoj kaj du fortaj viroj pririgardis (pri'rigard'is = faris

ĉion por...) la fajrojn por ke ili ĉiam estu vivaj.

Fajro estis forto. Fajro estis sano. Fajro estis vivo. Bestoj, ankaŭ tre fortaj bestoj, timis ĝian lumon. **Pro** tiu ĉi timo ili kuris for. Manĝaĵoj (manĝ'aĵ'o'j), kiujn oni prilaboris (pri'labor'is) en fajro, iĝis varmaj, kaj multe pli bonaj. Jes, fajro estis bona kaj vivodona (viv'o'don'a) al tiuj kiuj havis ĝin. Ĝi fortigis homojn. Fajro estis patro, fajro estis amiko.

Jes, sed... sed iam, kiam ĝi forkuris el sia loĝejo, kaj enkuris arbarojn, ĝi fariĝis pli timiga ol ĉiuj malbonaj bestoj kune (kun'e). Ĝi saltis tiam de arbo al arbo, mortigante ĉiujn kiuj ne scipovis forkuri de ĝi...


Sed nun fajroj de ulamroj ekestis mortaj. Unuan kaj duan el ili mortigis la malamikoj. La tria fajro, kune kun kiu ili kuris, kiun ili portis kun si, iĝis pli kaj pli malforta, kiel malsana besto, kaj... kaj ankaŭ ĝi mortis.

Kiel senpatraj infanoj kuris ulamroj en la malvarman nokton. Oni ne vidis stelojn. Nur krioj de estroj, kiuj kuris antaŭe, montris al viroj, inoj kaj al la infanoj kien ili kuru.

oo

**pro** = English: because of.

## 218 **mano**



### *Manoj*

oo

Kiam ekestis iom pli lume ili alkuris lokojn kiujn ili konis tre bone. Nun ili komprenis ke la malamikoj ne venos ĉi tien. Homoj ne ekkuŝis. Ili, tre malfortaj, falis sur la malvarman teron. Nur tiam virinoj, infanoj de kiuj elfalis el iliaj manoj ene de la forkuro, ekkriis kiel arbaraj hundinoj.

Kiam aperis taga lumo, Faumo, estro de ulamroj, nombris (nombr'is) siajn homojn. Estis kvaro da du-**manoj** (= 40) da viroj, pli ol ses du-**manoj** da virinoj, tri- du-**manoj** da infanoj, kaj iom da homoj maljunaj.

oo

**mano** = English: hand.

## 219 **ulo**

*ulo* estas homo, sed ne nur:

- *Malsanulo* estas homo malsana.
- *Konatulo* estas **ulo** kiun oni konas.
- *Timulo* estas tiu kiu timas.
- *Timigulo* estas tiu kiu timigas.
- *Junulino* estas ino juna.
- Ankaŭ pri besto aŭ arbo oni povas diri ke ĝi estas fort**ulo**, tim**ulo** aŭ grand**ulo**.

oo

Maljun**ulo** (mal'jun'**ul**'o) Guno diris ke de la malamikoj forkuris nur unu viro el kvin, unu virino el tri, kaj unu infano el ĉiu deko da ili. Nun ĉiuj, ankaŭ sentima (sen'tim'a) Fau-mo, komprenis ke okazis io tre malbona.

\*oo

aĉ	ad	aĵ	<b>an</b>	<b>ar</b>	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	<b>ej</b>	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	<b>ist</b>
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	<b>ul</b>
um						

**ulo** = English: person, animal, object.

## 220 vundo

*Homoj kaj bestoj ne ĉiam mortigas unu alian. Iam ili nur **vundas** sian malamikon. Povas okazi ke li mortos; povas okazi ke ne.*

*Kion faras tiu kiun oni **vundis**? Se li povas forkuri, li forkuras. Se la **vundo** estas granda, la homo falas kie oni **vundis** lin. En tempo pri kiu ni rakontas, oni mortigis **vunditojn** de malamiko (**it**: vidu vorton **221**).*

oo

Faumo pririgardis (pri'rigard'is) siajn **vundojn**. Ne, ili ne estas grandaj. Nun li volis kompreni kio okazis.

Ulamroj ĵetis sin (si'n) sur la malamikoj. Ili mortigos malamikajn virojn kaj fajron de la malamikoj. Ili prenos iliajn inojn. Tiuj el la malamikoj kiuj scipovos forkuri, forkuros por ĉiam...

oo

**vundo** = English: wound.

## 221 ita

*it'a (it'o) estas tiu (tio) kiun (kion) oni -  
is:*

- Lumig**ita** (lum'ig'**it'a**) loko estas loko kiun oni lumig**is** (lum'ig'**is**).
- Demand**ito** estas tiu kiun oni demand**is**.
- Falig**ita** estas tiu (tio) kiun (kion) oni falig**is**.
- Vund**ita** estas tiu kiun oni vund**is**.

oo

Sed kio okazis?! Ekkriis mortvund**itaj** (mort'vund'**it'a**'j) ulamroj, ekforkuris kiuj povis forkuri... Kaj fajro, la malamikoj mortigis la fajron!

Eliris suno. Ekestis iom pli varme. Ekflugis kaj ekkantis birdoj. Faumo rigardis siajn homojn. Kriis vund**itoj**. Plimulto el ili estos sanaj: mortvund**itoj** ne forkuris...


Sed vund**itaj** estis ne ĉiuj. Inter tiuj kiuj dormis post tiu ĉi longa nokta forkuro estis ankaŭ homoj junaj, fortaj kaj sanaj.

oo

**ant** int ont at **it** ot

**it** = English: past passive participle.

## 222 batalas



La homoj **batalas**.

oo

Faumo suprenigis la manojn al ĉielo, kaj elkriis:

– Kiel vivos ulamroj sen fajro, kio lumigos iliajn noktojn kaj varmigos ilin, kio plifortigos (pli'fort'ig'os) iliajn **batal**ilojn (**batal**'il'o'j'n)= ilojn per kiuj oni **batalas**), kio fortimigos noktajn bestojn?!

Tiu kiu redonos al ulamroj fajron ekestos proksimulo (proksim'ul'o) de Faumo. Mi, Faumo, donos al li mian filinon, mian Gamlan. Kaj, post mia morto, tiu homo estos estro de ulamroj!

Tiam ekstaris Nao, Filo de Arbo, kaj diris:

– Donu al mi du junajn **batal**ulojn (**batal**'ul'o'j'n). Mi iros al**batali** (al'**batal**'i) fajron.


Faumo ekrigardis lin malamike.

oo

**batalo** = *English: battle, combat, fight.*



## 223 plej



- Arbo "1" estas alta, ĉu ne?

- Jes, ĝi estas alta, sed arbo "2" estas pli alta ol arbo "1".

- Jes, arbo "2" estas pli alta... Sed **plej** alta el la arboj estas arbo "3", ĉu ne? Ĝi estas ankaŭ **plej** granda el ili.

oo

Nao estis viro alta. Ne estis inter ulamroj viro pli alta ol Nao. Nao estis **plej** alta el ili. Li estis ankaŭ bona, **plej** bona kuranto (kur'ant'o). Ĉu Nao estis forta? Li batalis kun Muo, kaj faligis lin. Sed Muo estis forta kiel Faumo!

oo

**plej** = English: most.

## 224 US

*Ni konas vortojn kiuj staras fine de vortoj parolantaj (parol'ant'a'j) pri faro. Tio estas vortoj:*

**as, is, os, u, i**

*(star'as, star'is, star'os, star'u! star'i)*

*Ankaŭ -us (starus) estas unu el tiuj vortoj.*

*Ni diras us kiam ni parolas pri tio kio ne estis, ne estas kaj, povas esti, ne estos:*

*- Kion mi, Faumo, farus, se mi estus homo plej forta sur Tero?!*

oo

Jes, Faumo rigardis Naon malamike. Faumo timis Naon. Li donis al tiu ĉi juna batalulo plej malbonajn laborojn, laborojn kiujn volus fari neniu alia. Li sendis lin en tiujn malproksimajn (mal'proksim'a'j'n) lokojn, el kiuj nur malmultaj revenas vivaj.

Ankaŭ Nao ne amis Faumon, sed li amis lian filinon.

Gamla estis plej bona el la junulinoj. Ŝi ne estis plej alta el ili, sed ŝi estis alta. Kiam Nao rigardis Gamlan, el post iu arbo, li pensis ke, se li povus, li ĵetus ŝin surteren (sur'ter'e'n), kion oni faras al virinoj de

malamikoj.

Sed iam li pensis ke est**us** tre bone sidi apud ŝi, kaj rigardi en ŝiajn okulojn...

Ne, se oni don**us** Gamlan al Nao, li far**us** al ŝi nenion malbonan: li ne estas homo kiu volas vidi timon en okuloj de siaj proksimuloj (proksim'ul'o'j).

En alia tempo Faumo respond**us** ion malbonan al vortoj de Nao, sed nun ĉio aliiĝis (= iĝis alia)... «Ĉu ne povas proksimigo de Nao alporti iun bonon?... Se ne, mi elpensos kiel elvivigi (el'viv'ig'i) lin...»

Faumo diris:

– Se vi revenos kun fajro, mi donos Gamlan al vi. Vi ekestos mia filo.

Poste li montris al Gamla ke ŝi proksimiĝu. Gamla proksimiĝis. Ŝi sciis ke Nao rigardas ŝin. Iam, kiam li aperis antaŭ ŝi en nokta mallumo, ŝi timis lin. Iam ŝi volis ke hommanĝuloj (= homoj kiuj manĝas homojn) mortigu lin; sed ŝi volis ankaŭ ke Nao revenu viva, kaj alportu fajron.

– Ĉu estas junulino pli bona ol Gamla?! – kriis Faumo, – ŝi estas forta, ŝi povas iri tagojn kaj noktojn, portante beston kiun mortigis ŝia viro.

oo

**us** = English: verb, conditional.

## 225 **naskas**

*Kiam vi, leganto, estis infano, ĉu viaj gepatroj rakontis al vi pri tiu granda birdo kiu, antaŭ iom da tempo, alportis vin al ili? Se jes, sciu: tio ne estas vero! Oni ne alportis vin. Oni vin **naskis**.*

*Kiu **naskis** vin? Via patrino. Jes, vi **naskiĝis**, leganto, via patrino **naskis** vin. Vi estas **naskita** (*nask'it'a*) per via patrino.*

oo

*– Al viro kiu ekhavas ŝin, – diris Faumo, – Gamla **naskos** fortajn kaj sanajn infanojn. Se Nao alportos fajron, li prenos ŝin, donante al mi nenion.*

oo

**naski** = English: give birth to.

## 226 **frato**

*Se gepatroj havas pli ol unu infanon, la infanoj nomas unu la alian **frato** aŭ **fratino**. Knaboj estas **fratoj** inter si, knabinoj – **frati-***

noj. Ili ĉiuj estas gefratoj.

Knabino Kvarka, pri kiu iam rakontis Lea, diris:

«Mi kaj Triko estas infanoj. Ni estas gefratoj: Triko estas mia frato, mi estas lia fratino».

oo


Tiam ekstaris Ago, Filo de Hundo.

– Ago volas albatoli (al'atal'i) fajron! Li iros malproksimen kune kun siaj fratoj. Ago aŭ falos pro batoj de malamikoj, aŭ alportos fajron, sen kiu ulamroj estas malfortaj kiel infanoj.

oo


**frato** = English: brother.

## 227 kapo



**kapo** = *English: head.*

## 228 kontraŭ



*La du homoj batalas. Ĉu oni povas diri ke homo A batalas kun homo Bo?*

*Jes, oni povas, sed vorto **kontraŭ** estas pli bona ĉi tie: homo A batalas **kontraŭ** homo B. Ili estas **kontraŭ**'ul'o'j.*

*Ĉu estis bataloj en kiuj francoj kaj britoj batalis kune? Estis. Kune ili batalis **kontraŭ***

*siaj tiamaj malamikoj.*

oo  
Ago ne estis alta, sed li estis forta, tre forta. Lian forton konis neniu. Li ne batalis **kontraŭ** Faumo, li ne batalis kontraŭ Muo, ankaŭ **kontraŭ** Nao li ne batalis. Sed tiuj **kontraŭ** kiuj li batalis rakontis nenion pri lia forto: ili mortis. Iliajn kapojn oni povis vidi en loko kie loĝis Ago.

oo  
**kontraŭ** = English: against, opposit, contrary to.

## 229 **s a m a**

- *Iam oni rigardas iun el du fratinoj, kaj pensas: «Kiun el ili mi vidas?!» Tiuj fratinoj (iam tio estas fratoj aŭ gefratoj) havas **samajn** okulojn, **samajn** manojn, **samajn** kapojn. Ili estas **same** altaj aŭ **same** malaltaj... Mals**amaj** estas nur iliaj pensoj.*
- **Sam**landanoj estas homoj kiuj loĝas en **sama** lando.
- *Esperantistoj, ĉiuj esperantistoj, estas*

**sam**lingvanoj (*sam'lingv'an'o'j*).

• *Homoj, ĉiuj homoj, ankaŭ tiuj el ili kiuj ne konas nian lingvon, estas niaj **sam**-planedanoj.*

oo

Ago ne estis proksima al aliaj ulamroj. Li loĝis iom malproksime de ili, kune kun du siaj fratoj, **sam**e tre fortaj homoj, kaj kune kun iom da virinoj, vivo de kiuj ne estis bona.

Faumo malamis Agon **sam**e kiel Naon... Ne, li malamis lin pli ol Naon, multe pli: kiu iris batali kontraŭ unu el la fratoj devis aŭ morti aŭ mortigi ilin ĉiujn.

Faumo respondis:

- Se Ago alportos fajron, li havos Gamlan, kaj estos dua homo inter ulamroj.

- Filinon de Birdo havos Ago, - elkriis Ago, rigardante Gamlan, - mortos ĉiu kiu volos preni ŝin!

- Gamlan prenos kiu alportos fajron! - respondis Nao.

- Fajron alportos Ago!

oo

**sama** = English: same.



## 230 **neniam** 🕒

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	<b>neniam</b>
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	tiel	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	<b>iu</b>	<b>ĉiu</b>	<b>neniu</b>

***Neniam** antaŭe ni parolis pri vorto **neniam**, sed ni povas kompreni ĝin, ĉu?:*

rigardu:

<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	<b>iu</b>	<b>ĉiu</b>	<b>neniu</b>
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	<b>neniam</b>

oo

Ili rigardis unu la alian. **Neniam** antaŭe ili staris unu kontraŭ la alia. Ili ne estis amikoj, ili ne estis malamikoj. Sed la parolo de Faumo malamikigis (mal'amik'ig'is) ilin.

Ago, kiu **nenim** antaŭe rigardis Gamlan, ekpensis, post la vortoj de Faumo, ke li ĉiam volis havi ŝin. De nun neniu staru kontraŭ lia volo!

Nao komprenis tion. Li prenis en la manojn siajn batalilojn (batal'il'o'j'n).

Aperis du fratoj de Ago. Ili estis samaj al Ago: fortaj, bonkuraj (= ili kuris bone), kaj tre timigaj. Ili venis mortigi.

oo

**neniam** = English: never.

## 231 nova

*Lingvo Esperanto naskiĝis en 1887. Nun ĝi ne estas lingvo nova, sed ĝi estas multe pli nova ol lingvoj japana, ĉina, franca aŭ angla.*

*Por kio Ludoviko Zamenhof elpensis tiun ĉi novan lingvon?*

*Li faris tion por ke japanoj, ĉinoj, francoj, britoj, kaj ĉiuj aliaj homoj, loĝantaj sur nia Tero, komprenu unu alian.*

oo

Sed aliaj ulamroj, ankaŭ tiuj kiuj ne tre amis Naon, ne volis tiun ĉi novan batalon: post tio, kio okazis ĉi-nokte, ĉiu ulamro devas vivi.

Ili sciis ke Nao ne nur estas bona, tre bona batalulo, sed ke li scipovas revivigi (re'-

viv'ig'i) plej malfortan fajron. «Nao», – pensis multaj el ili, – «tio estas homo kiu povas alporti fajron al ni».

Jes, ankaŭ Ago havas ĉion por fari tion, sed ĉu ne estos pli bone por ulamroj, se iru kaj tiu kaj la aliaj? Multaj bataluloj ekkriis, kaj ekstaris apud Nao.

Ago estis homo sentima, sed li komprenis ke estos pli bone mortigi Naon ne nun, sed iom poste.

oo

**nova** = *English: new.*

## 232 **memoras**

• *Homoj pensas, homoj komprenas, homoj **memoras**... Ankaŭ vi, leganto, **memoras**. Vi **memoras** vian naskiĝtagon (= tagon kiam vi naskiĝis). Vi **memoras** naskiĝtagon de via patrino. En tiu tago vi donas florojn al ŝi, ĉu?*

• *Homoj scipovas **memori**, sed **memorfor**to de homoj ne estas sama. Estas homoj kiuj **memoras** nombrojn. Estas homoj kiuj **memoras** kantojn. Ĉu estas homoj kiuj*

## *memoras* ĉion?


oo

Pensojn de ĉiuj eldiris maljunulo Guno:  
- Ĉu ulamroj volas malaperi de tero? Ĉu ili ne **memoras** ke el ĉiu kvino da ulamroj vivas nun nur unu?! Ĉiu kiu povas porti batalilojn devas vivi. Nao kaj Ago estas plej fortaj niaj bataluloj. Se unu el ili mortos, ulamroj ekestos multe pli malfortaj ol ili estas nun.

**memori** = *English: remember.*

**memoro** = *English: memory.*

## 233 tiel



*Oni demandas malgrandan knabon:  
- Diru al ni, kiel iras homo?*

- Homo iras **tiel**: unu, du; unu, du!
- Kaj kiel iras... hundo?
- Hundo iras **tiel**: unu, du, tri, kvar; unu, du, tri, kvar.

oo

- Filinon de Birdo, - diris Guno, - prenos tiu kiu alportos fajron! Tio estas volo de ĉiuj ulamroj.

- Estu **tiel**! - kriis bataluloj.
- Gamlan havos kiu alportos fajron! - kriis virinoj.

Ago malamis la kriantojn, sed li ne volis kontraŭdiri. Li sciis ke en batalo por fajro li estos unua. Kaj Nao... Naon li mortigos.

oo

kia	tia	ia	ĉia	nenia
kial	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	<b>neniam</b>
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	<b>tiel</b>	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	<b>tiom</b>	<b>iom</b>	<b>ĉiom</b>	<b>neniom</b>
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	<b>iu</b>	<b>ĉiu</b>	<b>neniu</b>

**tiel** = English: so, in that way.

## 234 **jam** 🕒

Ni konas **jam** multajn vortojn el tiuj kiuj parolas pri tempo, ĉu ne? Rigardu: kiam, tiam, iam, ĉiam, neniam; nun; -is, -as, -os;

Vorto **jam** estas unu el ili:

– Mi **jam** ne estas infano! – diras junulo al siaj gepatroj.

Jes, infanoj grandiĝas... Sed estas bestoj, novnaskitoj (nov'nask'it'o'j) de kiuj kuras **jam** en tago de sia naskiĝo, la saman tagon!

oo

Venis nova tago. Kiel fajro eklumis granda suno. Malforte kriis vunditoj. Unu el ili kuŝis morta. Iu nokta besto **jam** estis ĉi tie.

Guno sidis apude kaj diris iujn vortojn.

– Forĵetu ĝin, – diris Faumo.

oo

**jam** = English: already, by now, by then.

## 235 rapida

- Kiu kuras pli **rapide**, junuloj aŭ maljunuloj?

- Junuloj! Juna viro estas pli **rapida** ol maljunulo aŭ infano.

- Kiu flugas pli **rapide**, birdo aŭ flugaparato?

- Nunaj flugaparatoj flugas multe pli **rapide** ol plej **rapida** birdo.

oo

Poste ĉiuj alrigardis (al'rigard'is) la forirantojn (for'ir'ant'o'j'n).

Apud Nao staris du junuloj. Li prenis ne kiujn (kiu'j'n) estis fortaj, sed tiujn, kiujn estis plej **rapid**kuraj.

Ĉiuj ili jam kunprenis (= prenis kun si) siajn batalilojn.

Faumo diris al Ago:

- Filo de Hundo naskiĝis antaŭ ol Filo de Arbo, tial Ago diru kien li iros. Se Ago iros al subiranta (sub'ir'ant'a) suno, Nao iros al suno eliranta...

- Ago ne scias kien li iros. Ĉu kiu postkuras beston scias kie li mortigos ĝin?

- Ago iru kien li volas, sed Ago ne povas iri samtempe al suno eliranta, kaj al suno subiranta, - diris maljuna Guno.

Ago ne volis ke Nao komprenu liajn pensojn.

– Ago iros al subiranta suno! – diris li.


Post tio li, kune kun siaj fratoj, ekiris for.

Nao ne **rapidis**. Li volis rigardi Gamlan por pli bone memori ŝin.

oo

**rapida** = *English: quick, rapid, fast.*

## 236 **haro**



oo

Gamla staris apud arbo, post la estro, post Guno kaj aliaj maljunuloj. En siajn **harojn** ŝi enigis floron. Ŝi ne rigardis Naon, ŝi rigardis iun malproksimon (mal'proksim'o'n). Nao pensis ke de ŝi iras lumo.

– Filino de Birdo, – diris Nao, – povas esti ke Nao ne revenos: li malaperos en tero, aŭ estos formanĝita per iu besto. Sed, se li



revenos, li alportos al ulamroj fajron. Al Gamla li alportos tion kion ĉiu junulino de ulamroj tre volus havi.

Gamla alrigardis la junulon. Nun ŝi volis ke li revenu. Sed Faumo ne donis al ŝi paroli:

– Rapidu, – diris li al Nao, – Filoj de Hundo jam delonge malaperis post arboj.

Nao ekiris al eliranta suno.

oo

**haroj** = *English: hair.*

## 237 **kreskas**

**Kreskas:** *iĝas pli granda, pli longa, pli alta.*

**Kreskas** arboj. **Kreskas** floroj. **Kreskas** infanoj.

Ankaŭ haroj **kreskas**. Ili **kreskas** sur kapoj, ili **kreskas** sur viraj manoj.

oo

Nao kaj liaj junaj kunuloj, nomoj de kiuj estis Kamo kaj Gavo, iris en lando de floroj. Arboj tie ne **kreskis**. Floroj, multaj floroj **kreskis** tie. Grandaj floroj, malgrandaj floroj,

ili staris unu apud alia sub varma lumo de jam alte staranta suno.

oo

**kreski** = English: grow, increase.

## 238 aĵo

aĉ	ad	<b>aĵ</b>	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	<b>ej</b>	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	<b>ist</b>
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	<b>ul</b>
um						

- *Dir**aĵo** estas tio kion oni diris, diras, aŭ diros.*
- *Eksplod**aĵo** estas **aĵo** kiu povas aŭ devas eksplodi.*
- *Hav**aĵo** estas tio kion oni havas.*
- *Leg**aĵo** estas tio kion oni legas aŭ povas legi.*
- *Kresk**aĵo** estas aĵo kiu kreskas.*

**aĵo** = English: thing (object, matter, stuff).

## 239 **herbo**

*Estas bestoj kiuj manĝas kion kreskas sur arboj. Unu el la bestoj, kiun konas ĉiu infano, estas tiel alta, ke scipovas manĝi arbaĵojn (arb'aĵ'o'j'n), starante surtere. Sed plimulto da kreskaĵmanĝuloj (kresk'aĵ'manĝ'ul'o'j) manĝas **herbojn**.*

***Herbo** kreskas sur tero. Ĝi ne estas alta. Lokon sur kiu kreskas **herboj** oni nomas **herbejo** (herb'ej'o). Estas **herboj** sur kiuj tempo de tempo aperas floroj. Kiam la **herbejo** floras, ili, floroj, povas esti multaj, tre multaj.*

oo

Tie kaj tie oni vidis nealtajn altaĵojn (alt'aĵ'o'j'n). Ankaŭ sur ili kreskis **herboj**.

Multaj, tre multaj bestoj loĝis ĉi tie. En ĉielo flugis grandaj birdoj. Ili rigardis malsupren por ekvidi beston negrandan. Ekvidante, ili rapide falis por preni, forporti kaj formanĝi ĝin.

**Herb**manĝuloj (**herb**'manĝ'ul'o'j) estis tre multnombraj (mult'nombr'a'j). Iam oni povis vidi ne dekojn, ne centojn, sed milojn da grandaj herbmanĝuloj. Ili iris kune. Tiu kunigo (kun'iĝ'o) donis al ili pli bonan staron kontraŭ bestoj kiuj volus forpreni iun el ili: bestmanĝuloj scipovis mortigi nur kiujn iris

malkune: tio estas bestojn malsanajn aŭ maljunajn.

Proksimiĝis fino de la unua tago. Por noktejo (nokt'ej'o) Nao prenis lokon apud unu el altaĵoj (alt'aĵ'o'j). Suno iris suben (sub'e'n). Rigardante ĝin Nao pensis pri fajro kiun li devas albatali. Ĉu ne estus bone se oni povus supreniri la altaĵon, kaj preni de suno iom da ĝia fajro?

Sed oni ne povas fari tion, kaj Nao, kiu antaŭe dormis apud fajroj, kiuj staris inter li kaj noktaj bestoj, pensis pri tio ke nun li ekestas malforta. Tre malforta.

oo

**herbo** = *English: grass; herb, plant.*

## 240 danĝero

oo

Dormi senfajre estis **danĝere**: povis veni iu el grandaj bestmanĝuloj. Ankaŭ herbmanĝuloj povis esti **danĝeraj**: kiam ili, timigitaj (tim'ig'it'a'j), kuras komprenante (kompren'ant'e) nenion, ili povas kurmortigi (kur'mort'ig'i) dormantojn.

Ankaŭ negrandaj bestmanĝuloj povas esti

**danĝer**aj, se ili estas multnombraj, kaj ne manĝis delonge. Tiam ili iĝas sentimaj.

oo

**danĝero** = *English: danger, peril.*

## 241 **gusto**

Ĉiu manĝaĵo (manĝ'aĵ'o) havas sian **guston**. **Gusto** de unu manĝaĵo diras al ni: «Ne manĝu, estas danĝere manĝi tion!» **Gusto** de alia manĝaĵo diras al ni: «Bone, tre bone!»

Sed homoj ne estas samaj (sam'a'j). Kio estas bong**usta** por anoj de unu lando, povas esti tre malbong**usta** por alilandanoj (ali'-land'an'o'j).

Sed plej bonan **guston** havas tiu manĝaĵo kiun oni manĝas post longa foresto de manĝaĵoj. Ĉu?

oo

La ulamroj ekmanĝis. Ili manĝis bestaĵon (best'aĵ'o'n = mortigitan beston). Tio estis malbong**usta** manĝaĵo: ĝi ne estis prifajrita (pri'fajr'it'a). Sed fajron ili ne havis...

oo

**gusto** = English: taste.

## 242 **gardas**

oo

Kamo kaj Gavo ekdormis. Nao ekstaris por esti unua nokt**gard**anto, por **gardi** la dormantojn kontraŭ noktaj danĝeroj.

Li rigardis (rigard'is) en la nokton, kaj vidis lumantajn okulojn de bestmanĝuloj.

De malproksime li aŭdis bruon de kreskaĵoj, kaj flugon de noktaj birdoj.

Jes, tiama vivo estis tre danĝera. Vivi povis nur kiu estis forta, kiu batalis por sia vivo, kiu scipovis (sciis kaj povis) **gardi** ĝin.

Plimulto (pli'mult'o) da noktaj bestoj komprenis ke homo estas pli forta ol ili. Ili rigardis homon de malproksime, kaj iris for.

Venis hundoj. Ili longe bruis apud la altaĵo. Iam unu aŭ du el ili proksimiĝis **sin-garde** (si'n'gard'e = ili gardis sin, siajn vivojn) al la dormejo, sed ili timis ekbatali.

oo

**gardi** = English: guard.

## 243 ordonas

*Ordono estas tiuj vortoj kiujn estro diras al siaj subuloj (sub'ul'o'j). Tiama (tiam'a) estro estis homo (aŭ besto) plej forta. Kiu ne volis subiĝi (sub'iĝ'i) al ordonoj de la estro, povis esti mortigita (mort'ig'it'a).*

oo

Nao memoris rakontojn pri hundoj, kiuj loĝis iam apud ulamroj. Ili, multnombraj, manĝis forĵetaĵojn (for'ĵet'aĵ'o'j'n), kaj kune kun la homoj iris al manĝoserĉoj (manĝ'o'serĉ'o'j).

Maljuna Guno amikiĝis kun du el ili: li donis al la hundoj bongustaĵojn (bon'gust'aĵ'o'j'n). Sed la hundoj mortis en batalo kontraŭ unu granda kaj danĝera besto. Amikiĝi kun aliaj hundoj li ne povis: Faumo, kiam li ekestis estro, ordonis mortigi ilin ĉiujn.


Sed Nao pensis ke tiu amikiĝo donus multe al homoj. Hundo, pensis li, povas esti bona gardanto.

Sed ĉi tie, en lando de herboj, hundoj estis danĝeraj: ili estis multnombraj (mult'nombr'a'j).

oo

**ordoni** = *English: order (command).*

## 244 ŝtono



**Ŝtono.**

oo

Hundoj proksimiĝis (proksim'iĝ'is). Nao prenis **ŝtonon**, ĵetis ĝin en plej danĝeran el ili, kaj kriis:

- Iru for, ni havas batalilojn, ni povas mortigi bestojn multe pli fortajn ol vi!

oo

**ŝtono** = *English: stone.*

## 245 ĉar

**Ĉar** = *pro tio ke:*

- *Faumo kaj liaj ulamroj forkuris de siaj malamikoj. Sed por kio ulamroj ekiris al la*



*batalo?*


*Ili ekbatalis **ĉar** Faumo volis mortigi malamikajn virojn, kaj preni iliajn inojn.*

• *Nao ekiris albatali fajron, ĉu?*

*Jes. Li faris tion **ĉar** li amis Gamlan, kaj **ĉar** li volis redoni fajron al sia ulamraro (ulamr'ar'o).*

**ĉar** = English: because.

## 246 **batas**



*Iam oni **batis** malamikojn per **bat**'il'o'j.*

– *Ĉu oni povas **bati** infanojn?*

– *Nunaj homoj pensas ke ne, ĉar **batoj** ne faras infanon pli bona; ili malbonigas ĝin.*

*Ankaŭ hundojn oni ne **batu**. Bonaj hundistoj instruas junajn hundojn sen **bati** ilin.*

oo

*Nao ĵetis ŝtonon en unun el la hundoj. La*

timigita hundo ekkriis, kaj malaperis en la mallumo, ĉar la **bato** estis forta.

Ĉiuj aliaj hundoj kuniĝis. Nao pensis ke ili interparolas (inter'parol'as). Li denove ĵetis ŝtonon.


– Iru for, – kriis Nao, – vi estas malfortaj! Postkuru iun alian!

Pro la krioj eksaltis Kamo kaj Gavo. Aperoj de novaj malamikoj igis la hundojn forkuri.

oo

**bati** = *English: beat, strike.*

## 247 ĝis



• *Kiom da tempo prenas flugo de Londono ĝis Parizo?*

• *Se oni iras al iu urbo, oni, povas esti, eniros ĝin. Sed povas esti ke ne: iam oni ve-*

nas **ĝis** la urbo, sed ne povas ĝin eniri.

• Antaŭ ol iri al siaj loĝejoj, amikoj diras unu al la alia: «**Ĝis** revido (re'vid'o)!». Tion oni diras se oni ne scias kiam, kie, kaj ĉu vere tiu ĉi revido okazos. Se oni scias ke la revido okazos, oni diras: «**Ĝis la** revido».

oo

Venis sepa tago en lando de herboj. **Ĝis** nun danĝeroj estis malmultaj. Sed ili pligrandiĝis (pli'grand'iĝ'is), ĉar la ulamroj proksimiĝis (proksim'iĝ'is) al arbaro. Jes, **ĝis** la arbaro estis iom da tagoj da iro, sed jam nun oni povis vidi arbojn, kaj grandajn best-manĝulojn.

Noktoj iĝis (iĝ'is) pli kaj pli danĝeraj. Nun la ulamroj ne iris **ĝis** veno de nokto. Ili pririgardis lokon por noktejo delonge (de'long'e) antaŭ sunsubiro (sun'sub'ir'o), por dormi iom pli sendanĝere (sen'danĝer'e). Tio estis lokoj inter grandaj ŝtonoj, inter nealtaj arboj, lokoj en kiujn ne scipovas eniri danĝeraj bestoj.

oo

**ĝis** = English: till, until.

## 248 trinkas



La homo **trinkas**.

oo  
Kiam venis oka kaj naŭa tagoj da iro, herboj ekestis malaltaj. La ulamroj volis **trinki**, sed en tiuj ĉi lokoj trinkaĵo (trink'aj'o) forestis.

oo

***trinki** = English: drink.*

## 249 akvo

*En tempo, pri kiu ni rakontas, oni trinkis jur **akvon**. Aliaj trinkaĵoj aperis poste, kiam homoj ellernis (el'lern'is) manĝigi apudhomajn bestojn, kaj kreskigi apuddomajn kreskaĵojn.*

oo  
Kiam venis la naŭa tago, la ulamroj ek-  
vidis aron da grandaj herbmanĝuloj, kiuj iris  
al taga suno.

- Ili iras al **akvo**, - diris Nao. Ankaŭ ni  
trinkos antaŭ sunsubiro.

Kamo kaj Gavo estis bonaj junuloj, sed ili  
estis junaj. Ene de danĝeroj ili ne ĉiam faris  
kion oni devas fari. Ne, ili ne estis timuloj, ili  
nur sciis ne ĉion el tio kion devas scii bona  
batalulo.

oo

**akvo** = *English: water.*

## 250 **sent**as

*Homo havas **sentojn**. Ni jam parolis pri  
vid**sento**, pri aŭdo**sento**; ankaŭ pri gus-  
to**sento** ni jam parolis.*

*Iom poste ni parolos pri tiu **sento** kiun  
havas hundoj, sed ne nunaj homoj... Jes,  
ankaŭ homoj havas tiun senton **senton**, sed  
ĝi ne estas sama al tiu de hundoj.*

oo

Sed la junuloj faris ĉion kion Nao, ilia estro, ordonis al ili fari. Apud Nao ili **sentis** sin pli sendanĝeraj.

Nao iris antaŭ la junuloj. Li **sentis** ke ilia forto estas lia forto, ke iliaj manoj estas liaj manoj. La junuloj estis rapidaj, iliaj okuloj vidis aĵojn tre malproksimajn, ilia aŭdo**sentis** estis tiel bona, ke ili aŭdis plej malfortan bruon. Post la naŭtaga kuna iro ili iĝis proksimaj al Nao. Nao **sentis** tion pli ol komprenis, kaj tiu ĉi **sentis** plifortigis (pli'fort'ig'is) lin.

Ankaŭ aliaj bestoj iris al akvo. Antaŭsubira (antaŭ'sub'ir'a) suno, tre granda, bone prilumis ilin. Nun ankaŭ la homoj **sentis** ke akvo estas proksima.

– Ni iru pli rapide, – diris Nao.


Li timis ke, se la akvejo ne estas granda, bestoj prenos apud ĝi ĉiujn lokojn. La homoj ekrapidis.

oo

**sent***i* = English: feel.

**sent***o* = English: feeling.

## 251 **bovo**



oo

Sed la **bovo** ne rapidis. Maljunaj bestoj estis singardaj (si'n'gard'a'j), junaj **bovo** kaj **bov**inoj jam ne havis forton.

La ulamroj iris supren. Kamo kaj Gavo pli kaj pli volis trinki. Sed ili iris rapide: kiam la homoj venis jam al supro de la altaĵo, la **bovaro** (bov'ar'o) proksimiĝis nur al ĝia malsupro. Desupre la ulamroj ekvidis akvon.

Akvo estis patrino. Ĝi estis pli bona ol fajro, malpli danĝera ol ĝi.

La akvejo kuŝis sub altaj ŝtonoj. Lokoj, ene de kiuj oni povis veni al la akvo, estis malmultaj.

Ekvidante akvon la homoj ekkriis.

oo

**bovo** = English: ox.

## 252 **eg**

**-eg-** = *tre-tre*:

- *Malgranda, granda, tre granda, grande-**ga**.*
- *Malforta, forta, tre forta, forte**ga**.*
- *Faj**rego**: fajro **ege** granda.*

oo  
Apud la akvo jam staris multaj negrandaj (ne'grand'a'j) kreskaĵmanĝuloj. Nur unu el ili, nealta, sed **ege** forta, trinkis malrapide, sentime. Aliaj trinkis rapide por forkuri, se venos danĝero.

«Malfortuloj devas vivi timante ĉiam» – tion dirus pensulo (pens'ul'o), se li vivus tiam.

oo

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	<b>eg</b>	<b>ej</b>	<b>ek</b>	em
end	er	et	fi	<b>ge</b>	id	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	<b>ist</b>
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	<b>ul</b>
um						

**eg** = English: augmentative: to a high degree strengthens (increases, intensifies) the root idea.



## 253 lup o

*Se vi ne konas **lupon**, rigardu hundon. **Lupo** estas besto pli granda, pli danĝera ol hundo.*

*Se vi legis rakonton pri knabo Maugli, vi scias ke Maugli loĝis kune kun arbaraj **lupoj**. Li estis ano de tiea (tie'a) **luparo**.*

oo  
Ĉiuj trinkuloj ekrigardis novalvenantojn (nov'al'ven'ant'o'j'n): al la akvejo proksimiĝis tri **lupoj**. Malgrandaj bestoj ekis (ek'is) forkuri.

oo

**lupo** = *English: wolf.*

## 254 mu ĝ as

***Muĝo** estas krio de forta besto.*

*Ankaŭ pri brueganta (bru'eg'ant'a) akvo-falo (akvo'fal'o) oni povas diri ke ĝi **muĝas**.*

oo

La malalta fortegulo ne forkuris. Ĝi ekri-  
gardis la lupojn per siaj tre malgrandaj oku-  
loj, kaj ek**muĝ**is. La lupoj estis grandaj, sed  
ili ne ekbatalis. Ili ekrigardis la beston, kom-  
prenis ke ĝi estas danĝera, kaj ekpostkuris  
malgrandulojn.

La ulamroj trinkis longe. Suno mal-  
supreniĝis post la ŝtonegojn. Sed kie ili dor-  
mos?

- Proksimiĝas bovoj, - diris Nao.


Ĉiuj tri ekkuŝis surteren por aŭdi pli bone.

- Tio ne estas bovoj, - time diris Gavo.

oo

**muĝi** = English: roar.

## 255 mamuto



mamuto

*Jes, tio ne estas besto kiun vi konas tre bone. Tio estas besto iom pli granda. Ĝia nomo estas **mamuto**. **Mamutoj** jam malaperis de sur nia planedo. Kio okazis pri ili, scias neniu.*

***Mamutoj** surhavis harojn, multajn harojn.*

oo

– Jes, tio estas **mamutoj**, – diris Nao.

La ulamroj rapide ekiris supren. Pli kaj pli supren. Malsupre muĝis akvo, enfalanta la akvejon. Malmultaj sed ege grandaj arboj altiĝis al ĉielo por ekvidi sunon.

oo

**mamuto** = English: mammoth.

## 256 **kaverno**

**Kaverno** estas subterejo (sub'ter'ej'o). Sed ne tiu subterejo kiun oni faras por homoj loĝantaj en grandegaj (grand'eg'a'j) urboj. Ankaŭ ne tiu subterejo kiun laboristoj faras sub montoj.

**Kaverno** estas ejo kiun faris ne homoj sed akvo.

oo  
Kamo unua ekvidis **kavernon**. Ĝi estis malalta, kaj ne tre granda. La ulamroj ne rapidis eniri. Ili longe pririgardis la **kavernon**. Poste Nao, malsuprenigis (mal'supr'e'n'ig'is) la kapon, kaj eniris la **kavernon**. Li ekvidis tie nefinmanĝitan (ne'fin'manĝ'it'a'n) bestaĵon. Jes, ĉi tie loĝas besto granda, kaj ege danĝera. Sentoj de Nao diris al li kiu el bestoj loĝas en la **kaverno**.

oo  
**kaverno** = English: cavern.

## 257 **dum**

Ankaŭ vorto **dum** parolas pri tempo.

**Dum** = en tiu tempo kiam... :

**Dum** aro da mamutoj proksimiĝis al la akvejo, Nao kaj liaj kunuloj pririgardis jam la kavernon.

La tri ulamroj ne povis dormi samtempe. Unu el ili, **dum** la aliaj dormis, devis gardi la dormantojn.

oo  
– Mi konas la beston, – diris Nao, – ĝi estas ege forta. Sed jam trideko da tagoj ĝi ne loĝas ĉi tie.

Kamo kaj Gavo ne konis ĝin. Ĝi ne aperis en loĝlokoj de ulamroj. Sed Nao, **dum** siaj malproksimaj iroj, bone konis forton de la besto, kaj ĝian sentimon.

Nao pensis. Povas esti ke la besto foriris por ĉiam, povas esti ke nur por ne tre longa tempo. Povas esti ankaŭ ke ĝi jam ne estas viva... Ne, ĝi ne venos ĉi-nokte. Oni povas dormi ĉi tie.

**Dum** la ulamroj pririgardis la kavernon, ekaŭdiĝis forta muĝo: al la akvejo (akv'ej'o)

venis la bovaro. Bovoj estis altaj, rapidaj kaj fortegaj. Ili konis sian forton, kaj timis neniun. Ankaŭ grandajn bestmanĝulojn ili ne timis. Posteuloj (post'e'ul'o'j) de tiuj bovoj jam ne estas tiaj...

La ulamroj eliris el la kaverno. Kaj tiam ili ekaŭdis muĝon ne malpli fortan. Ĝi diris pri tio ke proksimiĝas aliaj bestoj, bestoj plej grandaj kaj fortaj el kiuj loĝis tiam sur Tero: mamutoj.

oo

**dum** = English: during.

## 258 saĝa

*Saĝa homo estas homo kiu rapide komprenas tion, kion malsaĝulo kompreni ne povas.*

*Multaj konas nomojn de vere grandaj saĝuloj. Tio estas Voltero (1694-1778), Ejnŝtejno (1879-1955), Konfuceo (-551 - -479).*

oo

En tiu tempa mamuto estis besto plej forta. Ege fortaj bestmanĝuloj kuris for de ĝi. Jes, okazis iam ke tiu aŭ alia malsaĝa besto, pro sia malsaĝo, albatis mamutojn, sed tiuj malsaĝuloj ne estis multaj.


Mamuto estis pli forta, pli rapida, kaj pli granda ol plej granda bovo. Ĝi scipovis iri ankaŭ en lokoj montaraj, kion plimulto da aliaj bestoj fari ne povis. Ĝia memorforto (memor'fort'o) estis bonega (bon'eg'a). Mamuto estis saĝa, tre saĝa.

oo

*saĝa = English: wise.*

*saĝo = English: wisdom.*

## 259 **hakas**



**hakilo**

*Iama **hakilo** estis ankaŭ batalilo. Ankaŭ ulamroj, pri kiuj ni rakontas, havis **hakilojn**. Sed tio ne estis nunaj **hakiloj**. Tio estis **hak-***

iloj ŝtonaj.

Per **hakilo** oni **hakas**. Ankaŭ nun estas homoj kiuj de**hakas** arbojn por fari al si domon, aŭ por varmigi siajn manĝaĵojn (manĝ'aĵ'o'j'n).

**haki** = English: chop, hew.

## 260 fojo

Estis tempo kiam arbaristoj de**hakis** (de'hak'is) arbojn per hakiloj. Ĉu oni povas de**haki** arbon per unu hakilbato (hak'il'bat'o)? Ne, oni ne povas fari tion. Per unu**foja** bato oni ne de**hakos** grandan arbon.

Por de**haki** ĝin oni **hakas** ankaŭ duan **fojon**, trian **fojon**, centan **fojon**... kaj la arbo falas: mult**fojaj** hako**j** de**hakis** la arbon.

oo

Estroj de la bovoj kaj de la mamutoj venis al la akvo samtempe. La mamutoj, kiuj konis sian forton, volis trinki unuaj. Sed, ĉi-**foje**, la bovoj ekkontraŭis (ek'kontraŭ'is). Ilia mal-saĝa estro ne tre bone konis mamutojn, kaj tre volis trinki.



Vidante ke la mamutoj ne donas al ĝi veni al la akvo, la bovestro ekmuĝis.

oo

**fojo** = English: time, occasion.

**foje** = English: once.

## 261 **vojo**

• *Kolumbo (1451-1506), per siaj tri ŝipoj, faris tre longan kaj danĝeran **vojon** por veni... ne al tiu lando al kiu li volis veni.*

• ***Vojo** estas ankaŭ tio kion faras homoj-**voj**laboristoj. Kiu ne konas rapidegan **vojon** Parizo – Londono?*

oo

Kvino da maljunaj virmamutoj (vir'mamut'o'j) fermis al la bovoj (bov'o'j) **vojon** al la akvo. La mamutoj staris kiel ŝtonaj altaĵoj.

La mamutoj rigardis la muĝantajn bovojn desupre.

oo

**vojo** = English: way, route, road.

## 262 pikas



oo

**Pikiloj** (pik'il'o'j) de mamutoj povis faligi arbon. Iliaj kapoj estis grandaj kiel ŝtonegoj.


Oko da bovoj, kun **pikiloj** sur la kapoj, sentis forton de la malamikoj, sed muĝo de la bovaro igis ilin ekbatali.

Plej forta el la bovoj, estro de iliaj estroj, ĵetis sin al unu el la virmamutoj (vir'mamut'o'j), kaj enigis ĝin siajn **pikilojn**. La vundita mamuto falis.

oo

**piki** = English: pick, lance.

## 263 **ro**stro



oo

Fojo post fojo enigis la bovo siajn pikilojn en la kuŝantan surtere mamuton. La faligita mamuto povis respondi nur pere (per'e) de sia **ro**stro. Ĝi sciis ke la pikilbatoj ne mortigos ĝin, se ĝi ne donos al la bovo enigi ilin en lokojn vere danĝerajn.


Ĉio okazis tiel rapide, ke kvaro da aliaj mamutoj, kaj sepo da bovoj staris dume (dum'e = dum tio) farante nenion. Ili bone komprenis ke ankaŭ ili povas esti ekdanĝeritaj (ek'danĝer'it'aj).

La mamutoj ekis unuaj: al la batalantoj proksimiĝis plej granda el ili.

oo

**ro**stro = English: trunk, snout.

## 264 piedo



oo

Tiam la kuŝanto forte ekbatis **piedo**jn de la bovo per sia rostro. La bovo ne falis, sed la mamuto ekhavis iom da tempo por ekstari.

Nun la granda kaj la grandega bestoj staris unu kontraŭ la alia. La mamuto ekmuĝis, suprenigis la rostron, ĵetis sin al la bovo, kaj ekbatis ĝin per siaj grandegaj pikiloj. La bato estis tiel forta, ke la bovo falis malproksime. La mamuto alkuris, kaj finmortigis la vunditon per siaj **piedegoj** (pied'eg'o'j). Mortkrio de la mortanta bovo kuniĝis kun bruo de la batalo. Ekbatalis bov-kaj mamutestroj.

Sep bovoj kaj kvar mamutoj ĵetis sin unu sur la alian. Kapoj, pikiloj, rostroj kaj **piedoj** kuniĝis en la batalo. Dum unua tempo la bovoj, pro sia nombro, estis pli fortaj. Iun el la mamutoj faligis tri bovoj, dua mamuto ekestis mortigita, sed du aliaj mamutoj alkuris la faligiton, kaj mortigis ĝian kontraŭulon (kontraŭ'ul'o = ulo kiu batalas kon-

traŭ). Ankaŭ aliaj mamutoj ĵetis sin en la batalon.

Ses el sepo da bovestroj falis mortaj. La sepa ekforkuris. Ekforkuris ankaŭ aliaj bovoj.

Tio estis tre malbona forkuro. Fortaj forigis de sia vojo malfortajn. Oni faligis samulojn (sam'ul'o'j'n) kurmortigante (kur'-mort'ig'ant'e) ilin.

Mamutoj ne pensis pri postkuro. Ili nur volis montri kiu el bestoj de Tero estas vere forta. La longharaj grandeguloj ekiris al la akvo, kaj ektrinkis. Aliaj bestoj rigardis ilin de malproksimo.

Ankaŭ la ulamroj rigardis. Nao rigardis malsupren, kaj pensis pri forto de mamutoj.

oo

**pie**do = *English: foot.*

## 265 **et**a

**et**'a = *mal'grand'a:*

Vund**eto** – *malgranda, nedanĝera vundo.*

Dom**eto** – *malgranda domo.*

Best**eto** – **eta** besto.

En Esperantaj vortaroj (vort'ar'o'j) forestas (for'est'as = ne estas), kiel ni jam scias, vorto... «**et**ulino» (**et**'ul'in'o). Tie enestas (en'est'as) vorto "**et**", vorto «ul» vorto «in» kaj vorto "o", sed ne «etulino»!

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	ek	em
end	er	<b>et</b>	fi	<b>ge</b>	id	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	<b>ist</b>
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	<b>ul</b>
um						

Tiujn ĉi **et**ajn envortarajn vortojn ni nomu *dume* (dum'e) "vort**et**oj". Vorto «**et**ulino» (et'ul'in'o) enhavas tri tiujn «vort**et**ojn»: vort**et**ojn «et» «ul» kaj «in». (Rigardu ilin!).

En unu el siaj libroj, nomo de kiu estas «Fundamenta krestomatio», L. Zamenhof montras kiom da vortoj oni povas fari kunigante (kun'ig'ant'e) tiujn ĉi vort**et**ojn. (Li kunigis ilin kun vorto «**san'**»):

**San'**ul'o, **san'**ig'i, **san'**ig'ist'o,  
**san'**ig'il'o, **re'**san'ig'i, **re'**san'iĝ'i,  
**mal'**san'ul'ej'o... (pli ol 50 vortoj).

Jes, leganto, en niaj vortaroj forestas vortkunigaĵoj (vort'kun'ig'aĵ'o'j). Vortkunigaĵojn faras ni. Ni, esperantistoj. Kunigante (kun'ig'ant'e) vortojn, prenitajn el nia vor-

*taro, ni povas diri multe, tre multe; pli multe ol tiuj kiuj parolas iun alian lingvon.*

*Ankaŭ vi faru tion. Sed memoru: oni devas kompreni vin, oni devas kompreni viajn vort'kun'ig'aj'o'j'n!*

oo


«Kiel malforta estas homo! Kio estas ĝiaj pied**etoj** apud piedegoj de mamuto?!» – pensis Nao.

Li pensis ankaŭ pri tiuj egaj bestmanĝuloj, en piedoj de kiuj homo estas malforta kiel bird**eto**.

oo

**et** = English: diminutive: a high degree weakens (deminishes) the idea in the root.


## 266 **trafas**



La pikilo **trafis** la beston.

**trafi** = English: hit.

## 267 preter



*La pikilo maltrafis (mal'traf'is). Ĝi flugis preter la besto. Ĝi preterflugis ĝin.*

oo

Sur la ĉielo staris nokta lumigilo. La mamutoj foriris. Ekestis senbrue. Nur iam **preter**flugis iu nokta birdeto. Apud eniro en la kavernon sidis Gavo: estis lia tempo gardi la dormantojn. Pro longa taga iro Gavo estis iom malforta. Li sidis kaj dormetis (dorm'et'is). Sed sento de singardo (sin'gard'o) ene de li ne dormis.

**Preter**kuris iu herbmanĝulo. Tio igis Gavon malfermi la okulojn: kio timigis ĝin?


oo

**preter** = English: go past, pass by; miss,



beside the mark.


## 268 **luno**



**Luno** estas tiu ĉiela lumigilo kiu lumas nokte.

**luno** = English: moon.

## 269 **urso**



**urso**

*Urso estas besto. En rakonto pri Maugli, se vi legis ĝin, urso estas instruisto. Ĝi instruis ne nur lupajn etulojn (et'ul'o'j'n), sed ankaŭ la knabeton.*

oo

Lumis granda luno. Gavo suprenigis la kapon, kaj ekrigardis. Malproksime li ekvidis beston. Se oni ne konus ĝin, oni povus pensi ke iras homo; sed tio estis **urso**.

Gavo konis kavernan **urson**. Tio estis grandegulo kiu senbatale loĝis en sia kaverno, manĝis kreskaĵojn, kaj nur longa foresto de manĝaĵoj (manĝ'aĵ'o'j) igis ĝin pensi pri mortigoj.

Sed la proksimiĝanta (proksim'iĝ'ant'a) **urso** estis alia. Tio estis **urso** ne malpli danĝera ol grandaj bestmanĝuloj. Gavo aŭdis rakontojn pri ĝi de tiuj kiuj longtempe ir'ad'is

en montaroj. Tiu **urso** scipovas mortigi fortegan bovon, kaj porti ĝin malproksimen. Homon ĝi mortigas per unu bato de sia piedo. Ĝi ne timas ankaŭ plej fortajn bestmanĝulojn. Maljuna Guno diris ke nur mamuto estas pli forta ol tiu ĉi **urso**.

Sed Gavo ne timis, ĉar li pensis pri **urso** kiun li konis tre bone. Sed... sed li eniris la kavernon.

oo

**urso** = *English: bear.*

## 270 **tuŝas**

- Ne **tuŝu** ŝtonojn kiuj varmiĝis en fajro,
- diras patrino al sia malsaĝa etulo (et'ul'o),
- la varmegaj ŝtonoj vundos vin!

oo

Gavo alvenis Naon. Li nur **tuŝis** lian manon, kaj Nao jam eksaltis en mallumo de la kaverno.

- Kion volas Gavo? - demandis li.

Gavo montris al li proksimiĝantan beston.

Nao bonege konis ĝin. Li pririgardis la

kavernon. Ĉi tie kuŝis iom da grandaj ŝtonoj per kiuj oni povas fermi la eniron. Ĉu forkuri? Sed oni povas kuri nur al la akvejo, dum la urso postkuros ilin. Ĉu supreniĝi sur arbon? Sed proksimaj arboj ne estis grandaj, kaj la urso, kiu ne povos preni ilin de tie, scipovas sidi sub la arbo tre longe.

oo

**tuŝi** = English: touch.

## 271 odoro

*Ni jam parolis pri sento kiun havas hundoj sed ne nunaj homoj. Tio estas odorsento.*

*Hundo bonege sentas odorojn, kaj memoras ilin. Ĝi scias kiu iris ĉi tie antaŭ iom da tagoj.*

oo

Ĉu la besto proksimiĝas ĉar ĝi ekvidis Gavon, aŭ ĝi revenas al sia kaverno post longa foresto? Dum Nao pensis pri tio la urso ekstaris kaj suprenigis sian kapon por eksenti odorojn. Post tio ĝi ekkuris.

La bataluloj pensis jam ke ĝi kuras for,

sed ne, la besto aperis sur vojo al la kaverno.

oo

**odori** = English: smell.

**odoro** = English: odour.

## 272 ebla

• Aŭde**ebla** bruo estas bruo kiun oni scipovas aŭdi.

• Eksplodaĵo estas aĵo eksplode**ebla**: **eblas** ke ĝi eksplodos.

• Manĝ**ebla** estas manĝaĵo kiu ne danĝerigas vivon aŭ sanon de la manĝanto.

oo

Forkuro estis ne**ebla** (= oni ne povis forkuri).

Nao eldormigis Kamon, kaj ĉiuj tri eklaboris por fermi la eniron per la ŝtonegoj.

Dum la besto proksimiĝis, oni pli kaj pli bone vidis ĝian fortegon.

Gavo kaj Kamo ektimis: ili volis vivi...

oo

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	<b>ebi</b>	eg	ej	ek	em
end	er	et	fi	ge	id	ig
iĝ	il	in	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**ebi** = English: possibility; -able, -ible.

## 273 **trankvila**

- *Patrino de eta infano ne ĉiam dormas **trankvile**. Se la etulo krias, la patrino kuras por preni kaj **trankviligi** ĝin.*

- ***Trankvila** estas kiu ne scias pri proksimiĝanta danĝero. **Trankvila** estas ankaŭ tiu kiu scias pri la danĝero, sed sen-time faras ĉion por kontraŭstar'i ĝin.*

oo

Ankaŭ Nao mal**trankvili**ĝis (mal'-**trankvil**'iĝ'is). Li konis forton de la malamiko, kaj komprenis ke la bestego povas mortigi la tri homojn dum ege mallonga tempo, ĉar per pikilo aŭ hakilo eblas nur vundeti (vund'et'i) ĝin.

Antaŭ la eniro rapide elkreskis alta ŝtonegaro (ŝton'eg'ar'o).

oo

**trankvila** = *English: calm, tranquil.*

## 274 **kial**

- **Kial** L.L. Zamenhof eklaboris por eldoni libron (el'don'i = fari multe da libroj por ke oni legu ilin) pri sia lingvo, pri sia Esperanto?

- Li faris tion por ke ĉiuj homoj de nia planedo komprenu unu alian.

- **Kial** esperantistoj pensas ke Esperanto estas lingvo plej bona?

- Ili pensas tiel ĉar tempo, dum kiu oni ellernas Esperanton, estas multfoje malpli longa ol tiu por ellerni la anglan, francan, ĉinan aŭ japanan lingvojn: ĉar ni ne lernas vortojn kiel: **san'o**, **san'a**, **san'ig'ist'o**, **san'ig'il'o**, mal**san'**ul'ej'o... sed ni faras kaj komprenas ilin.

-**Kial** oni instruas Esperanton ne en ĉiuj lernejoj?

– Jes, **kial**... Oni povas respondi per demando: **kial metrojn** kaj **kilogramojn** oni ĝis nun rekonas (re'kon'as = prenas kiel ordonon) ne en ĉiuj landoj?

oo

Kiam la urso proksimiĝis al sia kaverno, ĝi suprenigis la kapon kaj ekrigardis la eniron. La besto jam delonge sentis odoron de homoj, kaj aŭdis bruon de ilia laboro, sed ĝi ne komprenis: **kial** ĝi ne povas eniri la kavernon kie ĝi loĝis tiel longe?!

Ĝi komprenis nur ke ene de ĝia kaverno sidas iuj bongustaj malfortuloj, kiujn oni povas formanĝi.

La ursego ekstaris sur la malantaŭajn piedojn, kiel homo, ekmuĝis, kaj ekiris al la eniro.

Kamo kaj Gavo en mallumo de la kaverno prenis en manojn siajn batalilojn.

oo



kia	tia	ia	ĉia	nenia
<b>kial</b>	tial	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	<b>neniam</b>
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	<b>tiel</b>	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	<b>iu</b>	<b>ĉiu</b>	<b>neniu</b>

**kial** = English: why.

**kialo** = English: reason, motive.

## 275 **atendas**

*Estas porĉiuhomaj (por'ĉiu'hom'a'j) manĝejoj (manĝ'ej'o'j) en kiujn oni eniras, prenas manĝojn, kaj manĝas.*

*Sed estas ankaŭ aliaj manĝejoj. Tie oni sidas kaj **atendas**. Kion oni **atendas**? Oni **atendas** kiam venos homo kiu laboras tie, por demandi kion oni volas manĝi. Poste oni **atendas** kiam, finfine, oni alportos la manĝaĵojn.*

oo

Nao suprenigis la batilon. La ulamroj **atendis** ke la besto enigis inter la ŝtonoj sian piedon. Tiam oni povos vundi ĝin.


Sed aperis kapo, grandega multhara kapo. Kamo kaj Gavo batis ĝin per la hakiloj. Ankaŭ Nao volis bati, sed ne povis, ĉar la kaverno estis malalta.

La ursego deiris. Ĝia fortega kapo ne estis vundita, sed ion ĝi ellernis. Por forigi ŝtonojn ĝi ekbatis ilin per la piedoj kaj per sia kapo. En unu el la lokoj la ŝtonaro malfortiĝis.


oo

**atendi** = *English: wait; await; expect.*

## 276 **tenas**




*La homo portas la batilon.*



Nun li **tenas** ĝin en la manoj.



La homo iras. En la mano li **tenas** florojn.



La homo **tenas** sian portaĵon sur la kapo.

oo

Por ke la ŝtonoj ne falu, Kamo kaj Gavo sub**ten**is (sub'**ten**'is) ilin. Nao staris apud loko interŝtona. Li **ten**is sian pikilon. Li ĵetis ĝin en okulon de la bestego, sed maltrafis. La besto ekmuĝis, kaj ekbatis la ŝtonojn pli forte ol antaŭe. La ŝtonaro falis.

Nao kaj Gavo forsaltis de la eniro. Kamo okazis en piedegoj (pied'eg'o'j) de la besto. Li kuŝis atendente (atend'ant'e) morton. Sed Nao, kiun la danĝero nur trankviligis, forĵetis la hakilon, kaj ek**ten**is sian batilon per la du manoj.

oo

**teni** = English: hold.

## 277 ankoraŭ

Vorto **ankoraŭ** diras ke al tio kio jam estas, oni aldonas (al'don'as) la samon:

- Virino naskis filon, **ankoraŭ** unu filon... (de nun ŝi havas du filojn).
- Tri lupoj ĵetis sin sur forkurantan beston. Kiam samon faris **ankoraŭ** du lupoj, la besto falis.

• *Se la ulamroj sidus supre, sur arbo, kaj atendus kiam, finfine, la urso foriros, ili atendus du tagoj, ankoraŭ du tagoj, sed ne pli: ĉu oni povas sidi sur arbo pli ol kvar tagoj?!*

• *Vorton "finfine" (fin'fin'e) ni faris aldante al vorto "fin" ankoraŭ unu vorton "fin".*

oo

Ekvidante Naon la urso forĵetis la malfortulon, kaj ĵetiĝis (ĵet'iĝ'is) sur la kontraŭulon (kontraŭ'ul'o'n) pli danĝeran.

Nao ekbatis tiun lokon de la urso kapo per kiu la urso sentas odorojn. La bestego ekmuĝis kaj eksidis. Sed sidis ĝi nelonge. **Ankoraŭ**foje ĝi ĵetis sin sur Naon. Sed Nao desaltis kaj ekstaris post ŝtonego. La besto fortege batiĝis kontraŭ ĝi. Tiam Nao elsaltis kaj, kriante, **ankoraŭ**foje batis kapon, grandegan kapon de la besto.

La urso, kiun jam malfortigis antaŭaj batoj, falis. Nun ĉiuj tri homoj ekbatis ĝin. Iom post iom la grandega besto ekestis morta.

La batalantoj rigardis unu la alian. De nun Nao ekestis plej forta, plej sentima el ulamroj, ĉar tion kion li faris nun, neniam faris Faumo; tion ne faris ankaŭ tiuj iamaj bataluloj, pri kiuj rakontis maljuna Guno. Ĝis nun neniu el ili mortigis iun el la ursegoj per sia batilo. La junuloj memoros tion ĉiam. Ankaŭ

iliaj posteuloj (post'e'ul'o'j) rakontos pri tio...  
se Nao, Kamo kaj Gavo ne falos en batalo por  
fajro.

oo

**ankoraŭ** = English: still; yet.

## 278 renkontas

*Se oni iras, kaj **renkontas** konatulon,  
kion oni diras al li?*

*Se oni **renkontas** lin tage, oni diras:  
«Bonan tagon!».*

*Dum nokta **renkonto** oni diras: «Bonan  
nokton!»*

*Kaj post ĉiu **renkonto** oni diras: «Ĝis rev-  
ido (re'vid'o)!», aŭ «ĝis **la** revido», se oni  
priparolis jam tiun ĉi revidon.*

oo

Trideko da tagoj iris Nao kaj liaj kunuloj  
al eliranta suno. Jam delonge ili foriris el lan-  
do de herboj. Nun ili iris en arbarego. Ĝi estis  
senfina. Nur iam **renkontiĝis** (**renkont**'iĝ'is)  
etaj senarbejoj (sen'arb'ej'o'j), akvejoj,  
ŝtonegoj. Iam la arbaro supreniris altaĵojn.

Tiam la kreskaĵoj kaj la bestaro aliiĝis. Iam la arbarego malsupreniĝis, naskiĝante pli multajn kreskaĵojn.

Tie oni povis **renkonti** lupon, hundon, urson, arbaran homon, kiu ne konas fajron, kaj multajn aliajn danĝerajn aŭ bongustajn bestojn.

Oni povis **renkonti** tie ankaŭ mamutojn, faligantojn de arboj.

oo

**renkonti** = English: meet; encounter.

## 279 **perdas**

- *Kie estas libro kiun mi legis nokte?*

- *Ĉu vi ne memoras ke vi kunprenis (kun'pren'i's) ĝin, forirante (for'ir'ant'e)?*

- *...Jes, mi memoras, sed la libro malaperis: mi **perdis** ĝin... Ĉu ĝi kuŝas kie mi tagmanĝis (tag'manĝ'is)? Kie mi **perdis** mian libron?!*

**perdi** = English: lose (no longer have; fail to keep in sight).

## 280 **trovas**

*Estas homoj kiuj perdas siajn aĵojn. Estas homoj kiuj **trovas** ilin.*

*Kion faras homo kiu **trovis** perdaĵon (= aĵon perditan), se li estas bona homo?*

*Li faras ĉion por **trovi** perdanton: la homon kiu perdis. Ĝi faras ĉion por redoni al li sian **trovaĵon** (trov'aĵ'o'n).*

oo

En tiu ĉi timiga loko la ulamroj **trovis** multe da manĝaĵoj, sed ili sciis ke ankaŭ ili povas perdi ĉi tie siajn vivojn, ĉar ankaŭ ili estas bongustaĵo (bon'gust'aĵ'o) por multaj danĝeraj bestoj.

oo

**trovi** = English: find.

## 281 **tial**

*– La bovoj albatis la mamutojn. Kial?*

*– La bovestroj estis malsaĝaj. **Tial**, nur **tial** ili ĵetis sin en la batalon.*



– Kial la urso forĵetis Kamon?

– La urso eksentis ke Kamo estas malforta, ke ĝi devas ekbatali kontraŭulon pli danĝeran. **Tial** ĝi forĵetis la junulon.

oo

Jes, en la arbarego iranto povas ekesti bongusta manĝaĵo. **Tial** la ulamroj iris singarde (si'n'gard'e), ne proksime unu al la alia. Iliaj bonegaj sentoj gardis ilin kontraŭ danĝeraj renkontoj. Iliaj okuloj vidis pli bone ol okuloj de bestmanĝuloj... sed ne nokte. Ankaŭ odorsento ilia estis malpli forta ol tiu de lupoj. Sed en la arbaro, kie estis multe da ne tre grandaj bestoj, lupoj postkuris ne ilin, sed ne pli fortajn ol ili homojn.

Tagoj ĉi tie estis maltrankvilaj, noktoj – danĝeraj.

oo

kia	tia	ia	ĉia	nenia
<b>kial</b>	<b>tial</b>	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	<b>neniam</b>
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	<b>tiel</b>	iel	ĉiel	neniel
kies	ties	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	<b>tiom</b>	<b>iom</b>	<b>ĉiom</b>	<b>neniom</b>
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	<b>iu</b>	<b>ĉiu</b>	<b>neniu</b>

**tial** = English: therefore, for that reason.

## 282 serĉas

• *Se oni perdis iun aĵon, kaj volas trovi ĝin, oni iras **serĉi** la perdaĵon (perd'aĵ'on), ĉu?*

• *Okazas ke infano eniras iun lokon por ke oni **serĉu** ĝin. «Kie mi estas?» – krias la etulo, kaj ĝia patrino, kiu bonege scias kie la infano troviĝas (trov'iĝ'as), iras **serĉi**: «Ĉu ĝi estas ĉi tie? Ne. Ĉu tie?»*

oo

Ĉi tie, en la arbarego, la ulamroj devis serĉi lokon por sia noktejo delonge antaŭ sunsubiro (sun'sub'ir'o). Iam ili dormis en kavernoj, iam inter kuŝantaj arboj, fermante sin per ĉio kio povis gardi ilin de danĝeroj.

Sed plej malbona estis foresto de fajro. Dum mallumaj noktoj ili pensis: ĉu ne povas okazi ke la mallumo ĉiamos (ĉiam'os)? Ili enrigardis la arbaron, sed vidis ne fajron. Ili vidis malproksimajn stelojn aŭ okulojn de bestoj.

Eblas (ebl'as) ke ene de sia ulamraro ili ne tiel multe pensus pri foresto de fajro, sed ĉi tie, en la arbarego, ili sentis sin malfortaj kaj perditaj (perd'it'a'j).

oo

**serĉi** = English: look for, seek.

## 283 rivero



ooo  
Sed venis tago kiam la arbaro finiĝis. Antaŭ ili aperis herbejo kun malmultaj arboj sur ĝi. Kreskaĵmanĝuloj, kiuj manĝis junajn arbojn, gardis la herbejon de arbaralveno (arbar'al'ven'o).

Ankaŭ **rivero** troviĝis ĉi tie. Apud la **rivero** oni vidis altajn herbojn, kaj iom da arboj.

ooo

**rivero** = English: river.

## 284 restas

Ĉu ankaŭ ĝis nun **restis** homoj kiuj nomas sin ulamroj? Eblas ke ne. **Restis** (se **restis**) iliaj posteuloj: uloj kiuj vivas post ili.

Homoj loĝigas (loĝ'ig'as) jam teron dum milionoj da **jaroj** (jaro = 365 tagoj). Sed malmulte, tre malmulte **restis** de tiuj antaŭaj homoj, kaj de iliaj laboriloj. **Restis** nur ŝtonaj aĵoj, per kiuj ili batalis kaj laboris.

Kaj post ni, kio **restos** post ni? Kion pensos pri ni niaj posteuloj, se ili trovos **restaĵojn** (rest'aĵ'o'j'n) de ni kaj de niaj bataliloj?

oo

Proksime al la rivero staris grandegaj ŝtonoj, kiuj restis ĉi tie de iama treege (tre'eg'e) malvarma tempo.

La ulamroj pririgardis la lokon, kaj trovis ke ĝi estas danĝera: post sunsubiro ĉi tien venas multaj bestmanĝuloj. Tial la homoj ekrapidis trinki.

Poste ili ekserĉis dormejon pli-malpli sendanĝeran.

oo

**rest**i = English: remain, stay.

## 285 **dis**

• *Homoj povas iri kune, sed ili povas ankaŭ **dis**iri: iuj el ili ekiras tien, aliaj – alien (ali'e'n)...*

• *Kio okazas pri domo kiun oni eksplodas? Ĝi **dis**falas.*

• *Timigitaj birdoj **dis**flugas.*

• *«Estas tempo kunigi ŝtonojn, estas tempo **dis**ĵeti ilin».*

oo

**Dise** (= ne proksime unu al alia) starantaj ŝtonoj ne povis esti bona gardejo: oni devus longe kunigi ilin.

La junaj bataluloj volis jam reveni en la arbaron, sed Nao ekvidis (ek'vid'is) grandegajn ŝtonojn, kiuj staris unu apud la alia, iom kunigante siajn suprojn. Inter la ŝtonegoj estis nur du lokoj, kiujn povis eniri homo aŭ negranda besto.

Tio estis noktejo plej bona el kiuj ili renkontis ĝis nun, ĉar ene de ĝi estis loko por deko da homoj, kaj ĉar la ŝtonoj staris tiel forte, ke ne nur urso, ankaŭ mamuto ne povus forigi ilin. Unuan fojon dum sia longa iro la ulamroj povos dormi trankvile. La bataluloj ekmanĝis. Ili havis bestaĵon, kaj

iom da tiuj bongustaj manĝaĵoj kiujn ili trovis en la arbaro.

Preteriris du negrandaj herbmanĝuloj. Ili iris al la rivero. Alte en la ĉielo nerapide flugis grandega birdo. Suno iris suben (sub'e'n). Sur la arboj bruis birdetoj. Proksimiĝis tempo kiam danĝeraj bestoj eliras serĉi la manĝon. Sed ili ankoraŭ ne videblis.

El la arbaro eliris bovo. Kien ĝi iras? Kial ĝi iras **dis**e de sia bovaro? Ĉu ĝi revenas al ĝi? Sed la ulamroj pensis ne pri tio. Por ili la besto estis manĝaĵo: ulamroj neniam albatallis arojn da bovoj.

Nao ekstaris. Pri ulamro kiu mortigis bovon oni diras ke li estas bona batalanto. Sed li denove eksidis (ek'sid'is), kaj mal-suprenigis la ĵetpikilon, ĉar li ekmemoris ke ili havas bestaĵon.

La bovo preteriris la ŝtonaron. Ĝi iris al la rivero.

oo

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
<b>dis</b>	ec	<b>ebl</b>	<b>eg</b>	<b>ej</b>	<b>ek</b>	<b>em</b>
end	er	<b>et</b>	fi	<b>ge</b>	id	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	ind	ing	ism	<b>ist</b>
<b>mal</b>	mis	nj	op	<b>re</b>	uj	<b>ul</b>
um						

**dis** = English: separation, dispersal.

## 286 laŭ

• Oni ne povas iri sur rivero, sed oni povas iri **laŭ** rivero: apude, proksime al ĝi.

• **Laŭ** rakontoj de maljuna Guno ie, apud Granda rivero, loĝas homoj-hommanĝuloj. Ili nomas sin kzamoj.

oo


La bataluloj suprenigis la kapojn: ili ek-sentis danĝeron.

Kamo kaj Gavo, **laŭ** ordono de Nao, enkuris la ŝtonejon (ŝton'ej'o'n). Nao eniris post ili.

oo

**laŭ** = English: along, according to.

## 287 tigro



**Tigro**  
367

oo

Aperis granda kureganta herbmanĝulo kun altegaj pikiloj, kiuj staris sur ĝia kapo kiel etaj arboj. Post ĝi el la arbaro elsaltis tigo.

La fortega **tigro** postkuris la beston tiel rapide, ke oni povus pensi ke ĝi ne saltas sed flugas.

Estis videble ke la forkuranta besto havas jam ne multe da forto: ĝi kuris de malproksime, sed la **tigro** nur antaŭnelonge (antaŭ'ne'long'e) ekiris al sia manĝoserĉo (manĝ'o'serĉ'o).

oo

**tigro** = *English: tiger.*

## 288 **kaptas**

**Kaptas:** *prenas ege (eg'e) rapide.*

oo

– La tigo **kaptos** la beston! – diris Kamo.  
– La besto havas ankoraŭ multe da forto,  
– respondis Nao.

Ekvidante la riveron, la grandpikilulo (grand'pik'il'ul'o) ekstaris, kunprenis ĉiujn siajn fortojn, kaj ekkuregis al ĝi.



La du bestoj kuris nun samrapide, sed iom post iom saltoj de la tigro ekestis malpli longaj. Se la rivero ne estus proksima, ĝi revenus. Sed nun ĝi ekpensis ke en la akvo ĝi **kaptos** la beston.

La herbmanĝulo kaj la tigro ĵetis sin en la akvon.

oo

**kapti** = *English: snatch, catch.*

## 289 **b o r d o**

• **Bordo** estas tero kiu troviĝas apud akvo de akvejo. Riveroj kaj riveretoj havas du **bordojn**.

• Ĉiuj ni konas akvejojn tiel grandajn, ke rapida ŝipo multe da tagoj iras de unu **bordo** al **bordo** alia.

oo

Antaŭ la forkuranta besto aperis alia **bordo**. La besto komprenis ke dum ĝi suprenkuros ĝin, la tigro ekestos ege proksima. Sed... sed la tigro falis. Kiam ĝi ekstaris, la herbmanĝulo estis jam nekaptebla (ne'kap-


t'eb'l'a).

La tigro ekmemoris bovon, kiun ĝi preterkuris (preter'kur'is) antaŭe. Tial la tigro revenis al **bordo** de kiu ĝi ensaltis la akvon. La bovo estis ankoraŭ videbla.

oo

**bordo** = English: bank, shore.

## 290 ĉirkaŭ



La homo iras **ĉirkaŭ** la arbo

**ĉirkaŭ** = English: (a)round, round.

## 291 flanko

• *Oni povas ĉirkaŭiri (ĉirkaŭ'ir'i) domon: domo havas kvar **flankojn**.*

• *Ankaŭ rivero havas **flankojn**. Tio estas la bordoj. Ĉu oni povas ĉirkaŭiri riveron? Povas esti ke ne: riveroj estas longaj. **Flanko** de rivero nomiĝas (nom'iĝ'as) bordo.*

• *Ankaŭ mano, homa mano, havas du **flankojn**.*

• *Se oni troviĝas sur riversĥipo, oni ne ĉiam povas vidi ĉirkaŭaĵojn (ĉirkaŭ'aĵ'o'j'n): sidantoj apud unu **flanko** de la ŝipo vidas ne ĉion el tio kion vidas sidantoj apud **flanko** alia.*

oo

Dum la tigro postkuris la grandpikilulon, la bovo ektimis, kaj ekkuris al la arbaro. Sed tie li eksentis iun novan, ege danĝeran odoron.

La bovo ekkuris reen, sed de la rivera **flanko** proksimiĝis la tigro.

oo

**flanko** = English: side, flank.

## 292   **pre**ta

- *Patrino demandas sian filon-lernanton:*
  - *Ĉu vi estas jam **pre**ta iri en la lernejon, ĉu vi kunprenis ĉion?*
- *Patro de la infano demandas la patri-non:*
  - *Ĉu mia manĝo estas **pre**ta? Ankaŭ mi devas jam foriri!*
  - *Jes, ĝi estas **pre**ta, – respondas ŝi, – sidu kaj manĝu.*

oo

La tigro sciis ke la bovo jam ne scipovas forkuri de ĝi. Ankaŭ la bovo sciis tion. Tial ĝi ĉesis timi kaj, preta batali, malaltigis sian kapon kun duo da pikiloj sur ĝi. Ĝi estis bona batalanto.

La virtigro (vir'tigr'o) ne rapidis. **Li**<sup>1</sup> serĉis kiun flankon de la besto li sursaltu. La bovo montris al li siajn pikilojn.

Sed... sed la tigro ne eksaltis. Liaj okuloj ekrigardis tien de kie proksimiĝis iu grandega besto kiu eliris el la arbaro... Ne, tio ne estis tigro. Tio estis tigrego. La tigrego proksimiĝis rigardante la tigron. Sed oni vidis ke la

---

1. Jes, ankaŭ pri bestoj kaj pri aĵoj oni iam diras ne «ĝi», sed «li» aŭ «ŝi»

virbestego (vir'best'eg'o) troviĝas en nova, nekonata (ne'kon'at'a) al li loko.

Sed ne la tigro. Li loĝis ĉi tie pli ol deko da **jaroj** (jaro = 365 tagoj). Ĉi tie li povis, se li volis, forpreni manĝon de ĉiu el la best-manĝuloj: li estis plej forta el ili. La proksim-iĝantan (proksim'iĝ'ant'a'n) beston li vidis neniam antaŭe, tial li ne sciis kion fari. La alvenanto (al'ven'ant'o) estis unu el bestoj kiuj jam tiutempe ekestis tre malmultaj. La tigro sentis sin pli malforta ol la novveninto (nov'ven'int'o), sed li ne forkuris.

La tigrego, kiam li ekestis proksima, ekmuĝis kaj alsaltis. La tigro desaltis. Ankaŭ post dua alsalto li desaltis, sed nun li ekestis **preta** batali: al li kuris lia tigrino; granda, forta, ŝi kuris por kunbatali kontraŭ la alveninto.

Nun la tigrego ekpensis ke plej bone estus foriri. Kaj li, eble (ebl'e), forirus, sed la tigro albatis lin.

oo

**preta** = English: ready.

## 293 sango

*Sango estas tio kio eliras el vundoj de homo aŭ besto.*

oo

En la mortbatalo kuniĝis kapoj kaj piedoj. Tigro estis malpli alta, tial li volis trafi la malamikon desube (de'sub'e). Sed la tigrego batis lin per sia piedego. Muĝo de la vundito ekestis aŭdebla tre malproksime. Kiam la tigrino alkuris, ŝi ekvidis la tigron kuŝantan jam en sia **sango**. Ŝi ekmuĝetis. La mortanta tigo ankoraŭfoje ekstaris, por ĵeti sin sur la malamikon, sed falis, ĉar li jam ne povis fari tion.

La tigrino komprenis kiom malmulte da vivo restis en ŝia kunulo, kune kun kiu ŝi gardis la etulojn, portis manĝon al ili, kiu estis tiel bona al ŝi... Sed, komprenante ke antaŭ ŝi staras besto pli forta ol ŝia virtigro (vir'tigr'o), ŝi ekmuĝis, kaj forkuris en la arbaron.

La virtigrego (vir'tigr'eg'o) ne postkuris ŝin. Li staris trankvile, kaj sentis ĉirkaŭe odorojn de **sango**, de forto, de manĝo, de amo. La mortanta tigo ne maltrankviligis (mal'trankvil'ig'is) lin.

Li ne rapidis finmortigi, ĉar nun, post kio

okazis, li ne volis esti vundita.

oo

**sango** = *English: blood.*

## 294 **vespero**

**Vespero** estas tempo posttaga, antaŭnokta.

oo

Venis **vespero**.

Subiranta (sub'ir'ant'a) suno lumigis la herbejon. Tagaj bestoj iom post iom ĉesis siajn farojn. Ekmuĝis lupoj, hundoj, kaj aliaj bestmanĝuloj. Suno mortis. Aperis grandega luno. La bovo forkuris dum la batalo; La tigrigo restis sur la loko.

oo

**vespero** = *English: evening.*

## 295 **sata**

***Sata** estas kiu antaŭnelonge (antaŭ'ne'-long'e) manĝis, kaj tial manĝi ne volas. Sed, kion fari, post iom da tempo oni denove sentas malsaton (mal'sat'o'n), oni denove volas manĝi.*

oo

Sennombraj (sen'nombr'a'j = multegaj) bestoj loĝis en la arbaregoj kaj la herbejoj, sed la tigrego estis ĉiam mals**ata**: lian ege fortan odoron oni sentis de malproksime. Laodoro fortimigis bestojn multe pli ol bruo de lia iro. Diskuris ĉiuj; oni povus pensi ke nur la tigrego troviĝas tie.

Venis nokto; la tigrego eksentis fortan mals**aton**. El lokoj kie li loĝis antaŭe lin forigis altiĝanta (alt'iĝ'ant'a) akvo de tieaj (tie'a'j) riveroj. Longe li iris en nekonataj lokoj, sed nun, post mortigo de la tigro, li ekestis ĉi tie besto plej forta.

oo

**sata** = English: full, satiated.



## 296 **facila**

• *Estas laboroj kiujn oni faras sen multe da forto, sen multe da scioj. Tio estas **facilaj** laboroj.*

• *Se vi legas mal**facilan** libron, kaj ne povas kompreni la legaĵon (= tion kion vi legas), relegu la libron. Sed iam estas bone preni alian prisaman (= pri samo) libron: povas okazi ke ĝi estos pli **facila** por la kompreno.*

oo

Tio, kion la tigrego sentis nun, estis nurodoro de iuj etaj birdoj; sed kapti ilin estus mal**facile**, ankaŭ se li suprenirus la arbon kie ili sidas. La malsato igis lin aliri tiun varman odoron kiu iris de la faligita tigro; la grandegulo venis al ĝi... Ne, tio ne manĝeblas. La tigrego ĵetis sin sur la kuŝanton, finmortigis lin, kaj deiris.

Li ekrigardis ŝtonaron, ene de kiu troviĝis la ulamroj. Nur proksimiĝinte al ĝi la bestego eksentis odoron de manĝaĵo, de bonega manĝaĵo.

La ulamroj jam delonge rigardis la fortengan beston. Ili vidis ĉion kio okazis post forkuro de la grandpikila herbmanĝulo.

Nun tiu ĉi timiga bestego ĉirkaŭiris ilian

gardejon; li serĉis kaj trovis tiun interŝtonejon kiun eniris la homoj. La tigregoj enigis en ĝin sian kapon.

Li faris tion per tia forto, ke homoj, sidantaj ene, eksentis sin ege malbone. Sed, kiam la bestego ekis forĵeti la teron por pligrandigi la eniron, Nao kaptis sian pikilon, kaj batis per ĝi lian kapon. La bestego ekmuĝis kaj deiris. Liaj okuloj bonegis en la mallumo; li vidis la homojn. Ili estis tre proksimaj, kio ege maltrankviligis (mal'trankvil'is) la malsantan fortegulon.

Li ankoraŭfoje ĉirkaŭiris la ŝtonojn, revenis al la eniro, kaj denove ekis forĵeti la teron. Dua pikilbato denove igis lin deiri. La besto komprenis ke la gardejo ne estas enirebla, sed li komprenis ankaŭ ke la ensidantoj (en'sid'ant'o'j) ne scipovas forkuri de li. Ankoraŭfoje, ĉirkaŭrigardante (ĉirkaŭ'rigard'ant'e) la lokon, la tigregoj ekiris al la arbaro.

La ulamroj eksentis sin bonege, ĉar la gardejo montris sin neenirebla (ne'en'ir'abl'a). Ili rigardis unu la alian. Jes, ili sciis ke la bestego revenos, sed tiamaj homoj vivis nun; tion kion ni nomas «tempo» ili sentis iom alie.

Nao, kiel ĉiam, ekgardis unua. Li ne dormetis. La antaŭnelonga (antaŭ'ne'long'a) batalo donis ion novan al lia vivkompreno

(viv'kompren'o). Ulamroj sciis jam multon. Ili sciis ke post nokto venas tago, ke post malvarmaj tagoj venas tagoj pli varmaj. Ili sciis ke homo naskiĝas, maljuniĝas kaj mortas. Ili sciis multon pri bestoj kaj kreskaĵoj, kiuj ĉirkaŭis (ĉirkaŭ'is) ilin.

Ili scipovis jam fari batilojn, ŝtonajn hakilojn, pikilegojn, ĵetpikilojn. Ili scipovis batali per ili. Ili konis akvon kiu falas de ĉielo, kaj ili konis fajron, aĵon plej bonan kaj plej timigan. Fajron, kiu povas neniigi arbaregojn kaj herbarlandojn (herb'ar'land'o'j'n) kun ĉiuj mamutoj, bovoj kaj tigroj kiuj loĝas tie.

oo

**facila** = English: easy, simple, light.

## 297 **seka**

- **Seka** estas tiu aĵo kiu ne enhavas (aŭ ne surhavas) akvon.
- Iam morta arbo ne falas, sed **sekiĝas** starante.
- Dum tre varmaj tagoj akvo de negranda akvejo povas malaperi. Tiam oni diras ke la akvejo ekestis **seka**, ke ĝi **sekiĝis**.

oo  
Naŝo multe pensis pri vivo de fajro. Fajro,  
kiel homo, devas manĝi por resti viva. Ĝi  
manĝas herbojn, arbaĵojn, kaj... kaj sekiĝin-  
tajn (sek'ig'int'a'j'n) forĵetaĵojn de herb-  
manĝuloj.  
oo

*seka = English: dry.*

# 298 **brulas**



**brul'aj'o**

La **brulaĵo** **brulas**.

*Marko Polo (1254-1324) rakontis en sia libro, en libro pri sia vivo en Ĉinio, pri ŝtonoj kiuj **brulas** kaj donas varmon. Sed ĉiuj liaj samlandanoj (sam'land'an'o'j) bonege sciis ke tio ne povas esti vero: ŝtonoj ne **brulas**!*

oo

Fajro povas kreski, doni vivon al aliaj fajroj. Ĝi povas grandiĝi senfine. Sed, kiam ĝi restas senbrulaĵa, ĝi malgrandiĝas, kaj povas morti.

Fajro estas besto. Ne, ĝi ne havas piedojn, sed ĝi kuras pli rapide ol bovo. Ĝi ne havasflugilojn, sed ĝi flugas en ĉielo. Kiam ĝi manĝegas sekan **brulaĵon**, ĝi muĝas kiel tigro.

oo

**bruli** = English: burn, be on fire.

## 299 **flamo**



oo

Nao amis fajron, malamis kaj timis ĝin.

Kiam li estis infano, li multfoje brulvundiĝis (brul'vund'iĝ'is) per ĝia **flamo**. Li sciis ke fajro amas neniun, ke ĝi povas formanĝi ankaŭ tiun kiu manĝigas ĝin. Sed ĝi estas bonega: ĝi varmigas dum malvarmaj noktoj, ĝi redonas forton al kiuj perdis ĝin.

En la nokta mallumo, sidante inter la grandegaj ŝtonoj, Nao ekvidis fajron, **flamo** de kiu lumigas Gamlan...

Ankaŭ luno memorigis al li fajron. De kie ĝi aperas, kial ĝi, kiel suno, brulas ĉiam? ...Ne, ne ĉiam. Iam ĝi malgrandiĝas, kaj iĝas et-eta. Sed poste ĝi reviviĝas (re'viv'iĝ'as): iuj nevideblaj (ne'vid'abl'a'j) homoj donis brulaĵon al ĝi...

Ĉi-nokte luno estas ege granda kaj luma. Eblas ke tiuj nevideblaj homoj donis al ĝi multe da sekaj arbaĵoj.

Dum Filo de Arbo pensis, noktaj bestoj jam eliris serĉi manĝon.

Iras alta herbmanĝulo. Nao vidas ĝiajn longajn piedojn. Poste aperas rapidkuraj lupoj. Ili sentas la beston, sed ankaŭ la besto jam sentas ilin. Ĝi plirapidigas (pli'rapid'ig'as) la kuron. La lupoj postkuras ĝin ĝis la arbaro. Tie la besto malaperas; lupoj revenas. Iuj el ili muĝas pro la malsato.

Ilia odorsento diras al ili ke ĉi tie troviĝas homoj, kaj morta tigro. Sed homoj estas kontraŭuloj (kontraŭ'ul'o'j) danĝeraj, kaj tigraĵo

estas ege malbongusta (mal'bon'gust'a) por ili. Preterirante (preter'ir'ant'e) la homojn la luparo venas al la tigraĵo.

La lupoj, iom timante, ĉirkaŭiras ĝin. Poste plej malsataj el ili ektrinkis sangon de ĝiaj vundoj. Sed neniu el ili manĝis la tigraĵon.

oo

**flamo** = *English: blaze, flame.*

## 300 **subite** 🕒

**Subite:** *kiam oni ne atendas ke tio okazos.*

• *Ĉielfajro, pro sia **subita** eklumiĝo kaj bruego, estas aĵo tre timiga.*

oo

**Subite** venas bestoj por kiuj malnova bestaĵo estas manĝaĵo bongustega (bon'gust'eg'a). Ilia apero maltrankviligas la lupojn. Ege malbonodoraj (mal'bon'odor'a'j), la alvenantoj ĵetas sin sur la tigraĵon.

La lupoj ne ekas (ek'as) batali. Malsataj, ili nur rigardas la manĝegulojn. Poste ili

revenas al ŝtonoj post kiuj sidas la homoj.

Unu el la lupoj enigas la kapon en la interŝtonejon, sed Nao pikas la beston. La lupo forsaltas sur la tri piedoj, kriante. La luparo respondas per muĝo. Jes, ili delonge ne manĝis, sed ankaŭ la homoj ne estas manĝaĵo.

La lupoj sidas kaj bruas. Ili ĉiuj rigardas maljunan grandan virlupon (vir'lup'o'n). Nao pensas ke lupoj havas sian lingvon, ke ili priparolas kapton de iu herbmanĝulo, disdonon de la kaptaĵo. Nao volas kompreni pri kio ili parolas.

La lupoj diskuras. Iuj el ili venas al alia bordo de la rivero. Aliaj disiras sur la herbejo. Bone aŭdeblas tigraĵmanĝuloj (tigr'aĵ'manĝ'ul'o'j).

Pro forta luna lumo steloj iom ekmallumiĝis. Neaŭdeble flugas iu nokta birdo.

La lupaj krioj renoviĝas (re'nov'iĝ'as). Oni aŭdas ilin samtempe de la rivero, kaj de la herbejo. Nao komprenas ke la lupoj ĉirkaŭigas (ĉirkaŭ'ig'as) iun beston.

Venas negranda herbmanĝulo. Ĝin postkuras tri lupoj. Ili kuras ne rapide, interkriante kun la kunuloj kiuj sidas kaj atendas. Aperas la luparo. La beston oni ĉirkaŭas de tri flankoj; de kvara flanko videblas nur unu, malproksima lupo. La besto ĵetas sin tien. Oni povas pensi ke la malproksima lupo



ne rigardas la kuranton, sed, kiam la besto volas jam preterkuri la lupon, **subite** aperas aliaj tri lupoj.

La herbmanĝulo ekstaras muĝante pro la timo: ĉirkaŭe atendas morto. La lupoj respondas per malamikaj krioj. Timante fortajn piedojn de la besto la lupoj saltas antaŭ ĝi.

La besto alkuras plej proksiman lupon, forĵetas ĝin, kaj ankaŭ duan lupon. Aperas jam vojo por forkuro... Sed grandega virlupo ĵetas sin sur la herbmanĝulon; ankaŭ aliaj lupoj faras samon.

Aperas sango. La herbmanĝulo falas sub la lupoj, kiuj manĝegas ĝin, ankoraŭ vivan.

Luno supreniĝis. Nao iris dormi. Ekgardis Gavo. La nokto estas trankvila. Demalproksime (de'mal'proksim'e) muĝas la akvo-falo. Sed **subite** ĉiuj maltrankviliĝas.

Ekaŭdiĝis muĝo, antaŭmorta krio. La lupoj time suprenigas siajn ĉirkaŭsangitajn (ĉirkaŭ'sang'it'a'j'n) kapojn. El la arbaro eliras la tigrego. Li portas beston. Apud li iras la tigrino. Ili alvenis la homan noktejon. Timigita Gavo eldormigas Naon. La ulamroj longe rigardas la getigrojn.

La tigrego manĝegas, sed ne la tigrino. Ŝi ne tuŝas la manĝaĵon (manĝ'aĵ'o'n). Starante proksime ŝi rigardas mortiganton de sia kunulo.

Nao eksentis fortegan timon.

oo

**subite** = English: sudden, abrupt, unexpected.

## 301 **mateno**

*Post ĉiu nokto venas **mateno**. **Mateno** estas tempo postnokta, antaŭtaga.*

oo

Ankaŭ **matene** la tigregoj kaj la tigrino restis sur sama loko. Ili, lumigitaj per **matena** suno, dormetis apud restaĵoj de la nokta mortaĵo. La tri homoj povis rigardi nenion alian ol la timigajn apudulojn (apud'ul'o'j'n).

La **mateno** estis bonega. Iu longpieda birdo iris kune kun siaj etuloj (et'ul'o'j) al la rivero. Ĉirkaŭflugis birdetoj. Iom da bestaĵmanĝaj birdoj longe kriis, sidante sur restaĵoj de la tigro, kaj de tiu besto kiun formanĝis lupoj. Sed, komprenante ke restis nenio manĝebla, ili ekflugis al tio kion ne finmanĝis la getigroj. Tie ili longe ĉirkaŭflugis, timante proksimiĝi. Poste ili kaptis iom da bestaĵo,

kaj forflugis. Videblis neniŭ herbmanĝulo: odoro de la tigregoj tenis ilin malproksime. Nao pensis ke la tigregoj revenis nur pro la pikilbato. Li pensis ke la getigroj bone komprenas unu la alian, ke de nun ili, unu post la alia, gardos la ŝtonejon. Tempo de tempo Nao eksaltis, kaptis la batilon aŭ hakilon, sed de-nove trankviliĝis.

Li sciis ke li, kiu mortigis urseĝon, ne povas batali kontraŭ la getigroj.

oo

**mateno** = *English: morning.*

## 302   **o p o**

Vorto **op** parolas pri nombro da kunuloj (aŭ kunaĵoj):

- Nao, Kamo kaj Gavo iris tri**ope**.
- Dek**opo** da lupoj estas deko da ili.
- Fajron de ulamroj, kiam ili havis fajron, gardis du**opo** da bataluloj, kaj kvar**opo** da virinoj.
- Ĉu ulamraro estis granda? Ne: tio estis nur kvardek viroj, sesdek virinoj, dudek infanoj, kaj nur tri maljunuloj.

*Kiom'opa estis la Ulamraro? Ĝi estis cent-dudek-tri-opa.*

oo

Sed Nao antaŭvidis nenion alian ol batalon. Ili aŭ mortos en sia gardejo pro malsato, aŭ atentos ĝis la tigrino ekestos unuopa. Tiam li ekbatalos. Sed la kunuloj, ĉu ili scipovos tion?

Nao vidis okulojn de la junuloj. Li sentis ke li devas diri ion por plifortigi ilin.

- La tigrego ne mortigis Kamon kaj Gavon; ili foriros ankaŭ de la getigroj.

La junuloj ekrigardis la bestojn. Nao komprenis iliajn pensojn, kaj diris:

- La tigrego kaj la tigrino ne ĉiam estos kune. Foresto de manĝo disigos ilin. Kiam la tigrego foriros en la arbaron, ni ekbatalos la tigrinon. Kamo kaj Gavo devas fari ĉion laŭ miaj ordonoj.

La vortoj de la estro plifortigis la junajn batalulojn; morto estos ne tiel timiga se ili batalos apud Nao.

- Kamo faros ĉion kion Nao ordonos al li!

- Gavo timas nenion apud Nao!

La batalantoj eksentis novajn fortojn, kaj ekkriis. Pro la krioj la getigroj eldormiĝis, kaj respondis per muĝo. Denove venis senbruo.

Suno supreniĝis. Dum la getigroj dormis,

etaj bestoj, timante, iris al la rivero. La grandaj birdoj jam sentime kaptis apudtigran bestaĵon. Floroj rigardis sunon. Herbaro vivis. La triopo atendis.

Tempo de tempo Kamo kaj Gavo dormetis. Nao pensis pri forkuro. Ili ankoraŭ havas iom da manĝaĵo, sed ne akvon. Jes, ili volas trinki, sed iom da tagoj oni povas elteni tion.

Vespere la tigregoj eldormiĝis kaj ekstaris. Li ekrigardis la ŝtonegojn, kaj ekvidis ke la manĝaĵo ne forkuris. Ankoraŭfoje li ĉirkaŭiris la gardejon. Sed, memorante pri la pikiloj, li revenis al sia bestaĵo. La tigrino jam estis tie. Ili finmanĝis la restaĵojn. Post la manĝo la tigregoj aliris la tigrinon. Ŝi forsaltis kaj alsaltis lin. La getigroj eniris la arbaron.

– Ili foriris, ni povas forkuri, – diris Kamo.

– Ĉu Kamo perdis siajn sentojn? Ĉu li saltas pli rapide ol la tigregoj?

Kamo malsuprenigis la kapon. El la arbaro aŭdiĝis muĝetoj. La junulo komprenis ke la danĝero estas proksima kiel antaŭe. Sed la getigroj, kuniĝinte, volos havi loĝejon. Bestmanĝuloj ne dormas sub ĉielo dum tempo de akvofaloj.

Kiam suno malaperis, la homoj eksentis kion sentas vespere ĉiuj herbmanĝuloj.

La bestegoj revenis. En la mallumo ekaŭdiĝis ilia muĝego. Ili ĉirkaŭiris la ŝtone-

jon, montrante al la homoj siajn kapojn. La tigregoj eksidis apud la ŝtonoj, lia kunulino ekiris al la rivero por kapti iun trinkanton.

Aperis grandegaj steloj. Gavo kaj Kamo neniam rigardis ilin. Sed Nao rigardis stelojn. Iam li pensis ke tio estas disĵetaĵoj (dis-  
'ĵet'aĵ'o'j) de iu ĉiela fajro...

Granda luno eklumigis la herbejon, tigrino kiu kuŝis sur ĝi, tigrino kiu iris serĉi kaptajn. La tigrino jam estas malproksima. Nun oni povas ekbatali la tigregon. Sed Nao ne scias ĉu la kunuloj scipovas batali sentime.

Pro foresto de akvo Kamo ne povas dormi. Li kuŝas kun malfermaj okuloj.

Nao ekdormetis. Li malfermis la okulojn nur kiam revenis la tigrino. Ŝi revenis kun nenio, kaj ekkuŝis. La tigregoj longe rigardis ŝin, kaj ekstaris. Li ekiris laŭ la rivero al la arbaro. Nao atendis. Ekvidante ke la tigregoj estas malproksima, li tuŝis la junulojn. Kiam ili eksaltis li demandis neaŭdeble:

- Ĉu Kamo kaj Gavo pretas batali?
- Gavo postiros Naon.
- Kamo batalos per la ĵetpikilo kaj la bati-  
lo.

La ulamroj pririgardis la tigrinon. Ŝi kuŝis proksime, sed ne dormis.

Nao senbrue deigis la ŝtonojn kiuj fermis la eniron. Unu aŭ du homoj, eble, eliros antaŭ ol la tigrino komprenos kio okazas.

Nao ankoraŭfoje pririgardis la batalilojn, prenis ilin en la manojn, kaj tre singarde eliris. Krioj de lupoj, kaj tiuj de iu nokta birdo ne donis al la tigrino aŭdi lian iron. Sed Gavo, elirante, ekbruetis.

La tigrino ekrigardis la ulamrojn, sed ne ekbatalis. Nao havis tempon ekstari. Nur tiam la tigrino kun neforta muĝo ekproksimiĝis al la homoj.

Ŝi ne rapidis, ŝi sciis ke ili ne scipovas forkuri.

La junuloj kaptis la pikilojn. Ili volis vundi ŝiajn piedojn. Pikilo de Kamo trafis la beston. Sed oni povus pensi ke la tigrino ne sentas la vundon: ŝi nur ekmuĝis. Pikilo de Gavo maltrafis. Nao atendis kiam la tigrino proksimiĝos, kaj faris la samon. Lia pikilo trafis, sed... Sed ŝi ĵetis sin sur la homojn kiel montara (mont'ar'a) ŝtonfalo. Gavo falis, vundita. Batilo de Nao trafis.

La tigrino denove ekmuĝis: unu el ŝiaj piedoj ĉesis funkcii. Tiam Kamo ekbatis ŝin per sia pikilego. La tigrino forsaltis, ĵetis Kamon surteren kaj, starante sur malantaŭaj piedoj, ekestis preta alsalti Naon. Li jam sentis ŝian proksimon.

Ankoraŭfoje lia batilo trafis la beston. Ŝi iom perdis la komprenon. Tiam Nao malfunkciigis ŝian duan piedon. La batoj trafis unu post la alia, ĝis la tigrino falis.

Nun Nao povus finmortigi ŝin, sed lin maltrankviligis vundoj de liaj kunuloj. Gavo jam ekstaris, sango iris el tri longaj liaj vundoj. Kamo ne perdis sangon, sed, pro la forta piedbato, li kuŝis surtere.

– Ĉu Gavo ĝisiros la riveron? – demandis Nao.

– Gavo iros al la rivero, – respondis malfacile la juna batalulo.

Nao ekuŝis surteren por aŭdi iron de la tigrego. Nenio diris pri lia proksimo. Post la batalo foresto de akvo ekestis neeltenebla (ne'el'ten'eb'l'a).

Nao prenis Kamon en siajn manojn, kaj portis lin al la riverbordo. Gavo iris apude.

Nao trinkis longe. Poste li trinkigis Kamon, kaj revenis al la ŝtonegoj, portante lin kaj tenante manon de Gavo, kiu iris malfacile.

Ulamroj ne scipovis resanigi unu alian; ili nur fermis vundojn per bone odorantaj kreskaĵoj. Nao trovis unun (unu'n) el ili, kaj aligis ĝin al vundoj de Gavo. Sango jam ĉesis eliri. Eblas ke la vundoj ne estas danĝeraj...

Kamo ĝis nun ne povis stari sur la piedoj, sed sentis sin iom pli bone.

Nao volis plifortigi la junulojn; li diris:

– Kamo kaj Gavo batalis bonege (bon'eg'e). Filoj de ulamroj rakontos pri ilia sentimo.





aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	ek	em
end	er	et	fi	ge	id	ig
iĝ	il	in	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**op** = English: collective numeral: together, in group(s).

## 303 venkas

**Venkas** tiu kiu mortigas, vundas aŭ forkurigas (for'kur'ig'as) siajn kontraŭulojn (kontraŭ'ul'o'j'n).



La junuloj ekrigardis lin: ankoraŭfoje ilia estro **venkis**!

- Nao **venkis** la tigrinon, - diris Kamo, - Nao **venkis** la urson.

- Ne estas batalulo pli forta ol Nao, - malfacile diris Gavo.

- Ni revenos kun fajro! - kriis Nao, kaj

aldonis (al'don'is): – la tigrego estas malproksima. Nao iros serĉi iun manĝaĵon.

Preterirante la tigrinon Nao ekrigardis ŝin. Ŝi ankoraŭ estis viva. Ŝiaj okuloj malamike rigardis Naon. Ŝiaj piedoj estis forte malfunkciigitaj (mal'funkci'ig'it'a'j), sed la vundoj ne estis vivdanĝeraj.

Nao staris apud ŝi kaj, pensante ke la tigrino komprenas lin, elkriis:

– La tigrino estas nun malforta kiel lupoj!

La besto ekmuĝis time. Nao suprenigis la batilon.

– Nao povas mortigi la tigrinon. La tigrino estas malforta!

Ekaŭdiĝis iu bruo; la batalulo ekkuŝis por aŭdi pli bone. Tio estis bruo de negrandaj herbmanĝuloj, kiujn postkuris hundoj. La hundoj ne estis videblaj, oni aŭdis nur iliajn muĝetojn. La herbmanĝuloj ĵetis sin en la akvon kaj, samtempe, unu el ili falis vundita per la ĵetpikilo. Nao kaptis kaj finmortigis la beston. Poste li prenis la kaptitaĵon, kaj ekportis ĝin al la enŝtonejo. Nun li rapidis, ĉar ek-sentis danĝeron. La tigrego aperis kiam Nao eniris jam la gardejon.

Post ses tagoj vundoj de Gavo iom resaniĝis, sed pro la sangoperdo (sang'o'perd'o) li estis ankoraŭ tre malforta. Ankaŭ Kamo ankoraŭ ne estis sana: unu el

liaj piedoj funkciis malbone. Nao estis maltrankvila.

Foriroj de la tigregoj estis pli kaj pli longaj: de nun li devis manĝigi ne nur sin, sed ankaŭ la tigrinon. Tial la duopo ne ĉiam estis sata. Nun ili vivis malpli bone ol lupoj.

La tigrino iom resaniĝis; ŝi jam povis iri, sed tiel malrapide, ke Nao ne forkuris de ŝi. Li ne mortigis la tigrinon, ĉar por manĝigi ŝin la tigregoj foriris pli kaj pli malproksimen. Nun la ulamroj kaj la tigrino konis unu la alian. La tigrino komprenis jam ke homo estas malamiko danĝera; de nun ŝi vidis en ĝi ne nur manĝaĵon. Nao pensis ke li faris tre bone ke ne mortigis ŝin, ĉar tio faris lian **venkon** pli granda.

Post iom da tagoj Nao iris jam al la rivero kune kun Kamo. Sattrinkinte (sat'trink'int'e), ili portis akvon al Gavo en akvotenaĵo kiun faris Nao. Post kvino da tagoj ankaŭ la tigrino venis al la akvo, sed, pro sia malforto, kaj pro ioma alto de la bordo, ŝi ne scipovis trinki.

– Nun ankaŭ lupoj povas mortigi la tigrinon, – diris Nao.

Li prenis iom da akvo, kaj donis ĝin al la tigrino. La tigrino ektrinkis.

La homoj eksentis sin pli fortaj ol la tigrino.

Venis la oka tago. Kamo kaj Gavo sentis

ke nun ili jam povas iri malproksiman vojon. Nao diris ke la forkuro okazos ĉi-nokte.

La nokto estis malvarma, falis ĉielakvo, aŭdiĝis krioj de malsataj bestoj. Ĉi-tage la tigregio eldormiĝis pro malvarmo. Li ekserĉis iun kavernon, ne trovis ĝin, kaj ekloĝis kune kun la tigrino en iu malaltaĵo.

Post veno de nokta mallumo la tigregio ekiris serĉi manĝon. Antaŭe li ĉirkaŭrigardis lokojn proksimajn. Komprenante ke ĉi tie li kaptos nenion, la bestego eniris la arbaron.


Tiam Nao montris al la kunuloj ke venis jam tempo forkuri. Li eliris unua. Kamo kaj Gavo postiris lin duflanke. Irante tiel ili povis pli bone senti danĝerojn.

oo

**venki** = English: defeat, win

**venko** = English: victory

## 304 tra



- Oni povas **tra**legi libron: preni, eklegi, kaj fermi ĝin post la **tra**lego.
- Serĉante fajron Nao, kun siaj kunuloj, **tra**iris multajn arbarojn, herbejojn kaj senkreskaĵejojn.
- Ĉu vi konas aparategon **tra** kiu (aŭ per kiu) oni rigardas stelojn?

oo

Dum siaj antaŭaj ĉirkaŭiroj Nao trovis lokon kie akvo ne estas alta, kie oni povas **tra**iri la riveron.

oo

**tra** = English: through.

## 305 spuro

• *Kiam vi iras, viaj piedoj iom eniĝas la teron, ĉu? Poste oni povas vidi ke ĉi tie iris homo. Jes, post iro de homo sur tero restas ĝiaj **spuroj**.*

• *Estas homoj kiuj, rigardante **spurojn** de besto, povas diri ne nur kiu, sed ankaŭ kiam la besto iris ĉi tie.*

• *Sed bestoj, multaj bestoj, ne nur vidas **spurojn**, ili ankaŭ sentas **spur**-odoron. Tial ili povas postkuri la iranton.*

oo

Antaŭ ol eniri la riveron la bataluloj faris ĉion por malfaciligi al la tigregoj postiron laŭ iliaj **spuroj**.

Ili iris ĉirkaŭe, tien kaj reen, multfoje revenis al samaj lokoj. Sur alia bordo ili denove faris siajn **spurojn** nelegeblaj (ne'leg'e-bl'a'j).

Nur post tio ili ekiris. Senparole. De malproksime ili aŭdis trifojan muĝon.

– Tio estas la tigregoj! – diris Kamo.

– Iru ni pli rapide, – respondis Nao.

Denove ekaŭdiĝis muĝoj, ĉi foje pli proksimaj. La ulamoj komprenis ke la besto kuras laŭ iliaj **spuroj**.

Antaŭ homoj aperis herbejo. Ili prenis

herbojn, ĵetis ilin antaŭ si, iris sur ili, kaj poste deprenis la herbojn. Tiujn **spurojn** scipovas kompreni neniuj bestoj.

Fortega muĝo traigis la nokton.

- La tigro eniris la riveron, - time diris Gavo.

- Iru antaŭen, - ordonis la estro.

Li ekkuŝis, aligis (al'ig'is) sian kapon al la tero. Starante li diris:

- La besto troviĝas sur alia bordo.

La muĝoj ĉesiĝis. La bestego ĉesis la postkuron, kaj reiris. Nun la vojo ekestis malpli danĝera.

Ili iris longe. Ĉielakvo jam ĉesis fali, sed estis mallume. Kamo kaj Gavo sentis siajn vundojn. Oni devis trovi iun gardejon.

Ekestis pli malvarme: sentiĝis proksimo de iu granda akvejo. Ĉio estis trankvila. Nao prenis lokon apud iu arbego. Tio estis malbona noktejo, sed kiel, en tiu mallumo, oni trovu noktejon pli bonan?

oo

**spuro** = English: footprint, track.

## 306 lasas

- *La tigrino ne lasis lokon, kie ŝi tiel longe vivis kun sia, nun morta, virtigro.*
- *La tigrego ne lasis la vunditan tigrinon, sed ekmanĝigis (ek'manĝ'ig'is) ŝin.*
- *Oni povas postkuri beston laŭ spuroj kiujn lasas ĝiaj piedoj.*

oo

La tero estis malseka, sed tio ne timigis la ulamrojn. Kamo kaj Gavo ekkuŝis kaj ekdormis. Nao sidis kaj gardis. Por ke la junuloj estu pli fortaj li gardos ilin ĝis la mateno.

Kiam eklumiĝis, Nao, sidanta apud la arbo, ekvidis akvejon. De kiu flanko preteriri ĝin?

Estis malbrue. Luno ankoraŭ videblis, sed ĝi donis jam malmulte da lumo. Nao ekstaris, lasis la noktejon, kaj ekiris laŭ bordo de la akvejo. Spuroj diris ke al la loko venas multaj bestoj.

Subite Nao ekstaris. Antaŭ liaj okuloj aperis noktejo de ulamraro, varma manĝaĵo, Gamla...: **Li ekvidis restaĵojn de fajro!**

Nao eksidis por pli bone pririgardi la trovaĵon. Eblas (ebl'as) ke ĉi tie noktis unu el tiuj opoj da homoj kiuj iras malproksimen dum siaj manĝoserĉoj (manĝ'o'serĉ'o'j).



Ĉirkaŭ la fajro sidis ne malpli ol deko da homoj. Pri tio parolis forĵetaĵoj (for'ĵet'aĵ'oj) kiujn ili **lasis** surloke.

De kie ili venis? Ĉu tio estas kzamoj, hommanĝuloj, kiuj, laŭ rakontoj de maljuna Guno, loĝas apud Granda rivero? Eblas ke kzamaro ne estas multnombra, ĉar Uago, plej sentima malproksimiranto (mal'proksim'ir'ant'o), renkontis dum siaj iroj nur tri loĝlokojn de hommanĝuloj. Aliaj aroj da homoj ne manĝis homaĵon.

La spuroj estis bone videblaj, ĉar la kzamoj sentis sin sendanĝeraj. Ili iris al eliranta suno, al bordoj de Granda rivero.

Oni povis postiri tiun ĉi opon ĝis ĝia reveno en sian kzamaron. Oni povis veni al ilia loĝloko antaŭ ol tien revenos plej bonaj ĝiaj bataluloj.

Sed, por ne perdi la vojon, pli bone estis postiri la opon. Nun Nao sentis sin tre forta. Nun li pensis nur pri tio kiel li al batalos fajron.

Tri tagoj iris la ulamroj laŭ spuroj de la kzamoj. Ili iris laŭ bordo de la akvejo, trairis arbaretojn kaj herbejojn.

oo

**lasi** = English: leave.

## 307 eraro

- Tridek kaj dudek unu estas sesdek du ( $30 + 21 = 62$ ), ĉu?

- **Eraro!** Tridek kaj dudek unu estas ne sesdek du, sed kvindek unu ( $30 + 21 = 51$ ).

- ...Jes, mi **eraris**. Sed ne nur mi. Ĉiu homo povas **erari**: «Tiu ne **eraras** kiu nenion faras».

oo

Jes, spuroj de la kzamoj estis bone videblaj. Ili faris nenion por forigi ilin. Sidante apud sia nokta fajro ili varmiĝis (varm'iĝ'is), kaj prifajris la manĝaĵojn. Sed la ulamroj faris ĉion eblan por **erarigi** kiujn volus postiri ilin: ili iris tiel ke iliaj piedoj ne lasu spurojn. Ili suriris herbojn kiuj restaris (re'star'is) post ilia foriro, ili trairis riverojn, kaj faris ĉirkaŭirojn. Sed ili iris rapide kaj, fine de la tria tago, ĝis noktejo de la hommanĝuloj restis malpli ol tagiro.

- Kamo kaj Gavo, - diris Nao, - pretigu viajn batalilojn kaj vian sentimon: vespere vi vidos fajron. Sed antaŭe ni dormu. Al la hommanĝuloj ni venos post kiam ili endormiĝos. Se ni povos, ni **erarig'os** la gardantojn.

Kamo kaj Gavo komprenis ke nun ilin

atendas danĝero plej granda. Okazis iam ke ulamroj albatis kzamojn, kaj neniigis etajn opojn da ili. Sed pli multfoje ulamroj falis sub batoj de iliaj hakiloj kaj batiloj.

Maljuna Guno diris ke kzamoj estas posteuloj (post'e'ul'o'j) de urso. De ĝi ili ricevis tre longajn manojn, kaj tre multajn harojn, samajn al tiuj de Ago kaj liaj fratoj. Sed plej timiga estis tio ke kzamoj manĝis restaĵojn de siaj malamikoj.

Kamo kaj Gavo ekkuŝis kaj dormis ĝis la nokto. La ulamroj ekstaris antaŭ ol negranda luno ekis prilumigi la ĉielon. Ili iris laŭ la nelumigitaj spuroj. Kiam luno iom altiĝis ili ekvidis ke ili iras **erare**, sed ili rapide retrovis la vojon.

oo

**erari** = English: be incorrect, make mistake.

## 308 marĉo

*Prenu, leganto, iom da tero el proksima arbaro, kaj aldonu al ĝi akvon. Kunigu bone la teron kaj la akvon... Ne, tio ankoraŭ ne es-*

tas **marĉo**.

**Marĉo** estas loko kie tiuj ĉi tero kaj akvo estas multaj kaj danĝeraj.

oo

Ili preteriris apud**marĉajn** kreskaĵejojn (kresk'aĵ'ej'o'j'n), kaj trairis rivereton. Finfine, de altaĵo, ili ekvidis fajron. Post multaj malvarmaj kaj mallumaj noktoj, post foresto de akvo, post malsatoj, post bataloj kontraŭ urso kaj tigrino, fajra lumo estis por ili aĵo ĉiele bona.

La fajro brulis sur herbejo, apud granda akvejo, sur bordo de kiu kreskis iom da arboj.

La malforta flamo disĵetis etajn lumojn, lumigantajn ĉirkaŭaĵojn (ĉirkaŭ'aĵ'o'j'n).

oo

**marĉo** = English: marsh.

## 309 **felo**

**Felo** gardas beston de malvarmo kaj akvo. Sur **felo** de urso kreskas multegaj haroj. Ankaŭ homoj portis (kaj ankaŭ nun

*portas) felojn de mortigitaj bestoj.*

oo

La kzamoj dormis sub bovaj kaj lupaj **fel**oj. Apud ili, sur la tero, kuŝis iliaj hakiloj, ĵetpikiloj kaj batiloj.

Duopo da kzamoj ne dormis. Unu el ili sidis sur sekaj arbaĵoj, kiuj kuŝis apud la fajro. Li surhavis **fel**on de negranda herbmanĝulo. Sur lia kapo, kaj ne nur tie, kreskis multegaj haroj. La manoj estis tre longaj, sed la piedoj mallongis (mal'long'is). Alia gardanto ĉirkaŭiris la fajron. Tempo de tempo li staris por pli bone aŭdi bruojn, kaj senti odorojn.

Li estis alta kiel Nao, sed lia kapo estis multe pli granda. Videblis ke li estas homo fortega. Sed la mallongaj piedoj montris ke li estas kuranto malpli rapida ol la ulamroj.

La ĉirkaŭiranto ekstaris, kaj ekrigardis altaĵon kie kuŝis la ulamroj. Eblas ke li eksentis nekonatan odoron. Alia gardanto, odorsento de kiu estis malpli bona, dormetis kiel antaŭe.

- Ni devas malproksimiĝi, - diris Gavo.

- Jes, - respondis Nao, ĉar ankaŭ lin maltrankviligis odorsento de la malamikoj.

La iranto diris ion al la sidanto, sed tiu respondis nee (ne'e). La iranto ankaŭ volis jam eksidi, sed ne faris tion. Li ekiris al la al-

taĵo. La ulamroj iom deiris, kaj ekkuŝis post bonodoraj (bon'odor'a'j) arbetoj. La gardanto revenis al la fajro.

La ulamroj longe kuŝis sur la loko. Nao, rigardante la malfortiĝantan (mal'fort'iĝ'ant'a'n) fajron, pensis kiel proksimiĝi al ĝi, sed elpensis nenion: homo ne povas forigi sian odoron. Laodoro antaŭiras iranton, ĝi restas sur ĝiaj spuroj... Krio de hundo eligis lin el la enpenŝo (en'pens'iĝ'o).

– Sed ĉi tie estas multaj hundoj! – diris li,  
– Kamo kaj Gavo iru kaj mortigu iom da ili.

La junuloj ekrigardis Naon.

– Nao restos ĉi tie. Hundo, same al lupo, ne donas al homo proksimiĝi. Sed ĝi ĉiam malsatas. Kamo kaj Gavo ĵetu bestaĵon, kaj atendu. Hundoj venos, foriros, ĉirkaŭiros. Se vi staros trankvile, ili kaptos la bestaĵon, kaj ekos forkuri. Viaj ĵetpikiloj devas trafi forkuranton.

Kamo kaj Gavo ekiris. Trovi hundojn estis facile. Kvaro da ili manĝis iujn restaĵojn. La junuloj faris laŭ vortoj de la estro.

Unue la hundoj timis proksimiĝi. Finfine kvaropo da ili ĵetis sin al la bestaĵo. Du hundoj falis, trapikitaj. La ŝtonaj hakiloj finmortigis ilin.

Kiam la junuloj alportis la mortaĵon, Nao diris:

– Nun ni povas erarigi la hommanĝulojn:

odoro de hunda **felo** estas pli forta ol tiu de homo.

La fajro, manĝigita per aldona brulaĵo, pligrandiĝis. Nun oni povis pli bone pririgardi la dormantojn, iliajn batalilojn, iliajn manĝaĵojn.

La gardantoj aliiĝis. Novgarduloj sidis, ne pensante pri danĝero.

– Ĉi tiuj, – diris Nao, – estas pli alireblaj (al'ir'eb'l'a'j) ol la antaŭaj. Kamo kaj Gavo revenis de sia bestmortigo. Nun iros Nao.

Li kunprenis unun el la hundofeloj, mal-supreniĝis, kaj malaperis ene de altaj herboj. Al la fajro li proksimiĝis de alia flanko.

La gardantoj sidis trankvile. Unu el ili ek-sentis odoron de hundo, sed tio ne mal-trankviligis lin. Nao povis bone pririgardi kzamojn. Ili estis fortaj, longmanaj kaj mal-longpiedaj. Neniu el ili kuros pli rapide ol li. Poste li pririgardis ĉirkaŭaĵojn.

Nao pensis nelonge. Iom post iom li proksimiĝis. Pro lumo de la fajro, kaj tiu de luno, oni devis iri senbrue. Gardantoj dormetis, nur iam suprenigante la kapojn.

Kiam Nao ekestis apud la fajro, li ĵetis sin al ĝi, kaj kaptis brulantan arbaĵon. Li jam kuris for, kiam ekaŭdiĝis krioj; unu el la gardantoj ekpostkuris lin, dua ĵetis la pikilon. Samtempe eksaltis deko da dormantoj. Sed, antaŭ ol ili fermis la vojon, Nao elkriis krion

de ulamroj, kaj ekkuris al altaĵo kie atendis lin Kamo kaj Gavo.

La kzamoj, muĝante, postkuris lin. Ili kuris rapide, sed ne tiel rapide por kapti la ulamron, kiu ne kuris sed kuregis. Kiam Kamo kaj Gavo ekvidis lin, ili eksaltis.

– Kuru antaŭen! – kriis Nao.

Ili ekkuris ne malpli rapide. Bone ke li prenis tiujn ĉi rapidpiedajn junulojn, sed ne batalulojn pli fortajn, sed malpli rapidajn. Nao facile postkuris ilin, starante nur por serĉi brulaĵon. Lin maltrankviligis la postkurantoj, sed, samtempe, li timis perdi la lumantan kaptaĵon (kapt'aj'o'n).

La flamo jam malaperis, restis nur malforta flameto, kiu malfacile tenis sin sur la malseka arbaĵo. Sed Nao pensis ke kiam la malamikoj estos malproksimaj, li manĝigos kaj revivigos la flamon.

Proksimiĝis jam noktofino kiam la ulamroj alkuris la marĉojn. Ĉi tie ili trafis konatan vojon: tio estis vojo laŭ kiu ili antaŭe postiris la kzamojn. La vojeto estis sendanĝera, ĉar oni povis kuri sur ĝi nur unuope.

La flameto malgrandiĝis, kaj Nao eksentis ke nun li povas ĉesi la kuron: la malamikoj jam ne estas proksimaj.

La bataluloj ekserĉis herbojn kaj arbaĵojn. Ĉi tie ili estis multaj, sed ili ne estis sekaj.



Oni donis al la flameto brulaĵojn tre malgrandajn. Tio iom vivigis ĝin. Iuj herbetoj ekbrulis, sed, pro la malsekeco, ĉesis bruli. Tiam Nao elmemoris pri la hunda **felo**. Li eligis el ĝi iom da haroj. La flamo aperis, malaperis, kaj... kaj mortis.

Malbone, ege malbone eksentis sin la ulamroj: fajro, kiun ili jam albatis, ĝi mortis. Denove ili devos batali kontraŭ bestoj, kontraŭ akvoj, kaj kontraŭ malamikoj plej danĝeraj: kontraŭ homoj.

Ok tagoj postiris la kzamoj la ulamrojn. Eblas ke ili timis ke post tiuj ĉi unuopuloj venos granda malamikaro por kapti ilian landon. Eblas ke ili faris tion pro malamo al ĉiu kiu ne estas kzamo. Sed la ulamroj estis fortaj kaj rapidpiedaj. Ili delonge forkurus de la postkurantoj, sed ili volis ne tion.

Nao senĉese pensis pri tio kiel ankoraŭfoje kapti fajron. Ĉiunokte li ĉirkaŭiris noktejon de la kzamoj. Dormis li malmulte sed bone.


Post ok tagoj, de supro de altaĵo, Nao ekvidis Grandan riveron. Ĝi portis sian akvon inter montoj kaj herbejoj, prenante ĝin de riveroj kaj riveretoj. Ĝi muĝis kie, pro montoj, ĝiaj bordoj interproksimiĝis (inter'proksim'ig'is), kaj ankaŭ tie, kie akvo falis malsupren. Sed kie la bordoj malproksimiĝis,

la rivero iĝis malrapida, lasis grandajn akve-  
jojn kaj marĉojn.

oo

**felo** = English: skin (of animal).

## 310 **fiŝo**



Ankaŭ **fiŝo** estas besto. **Fiŝo** estas besto  
kiu vivas en akvo.

**fiŝo** = English: fish.

*De nun, leganto, ni legos tiun ĉi  
duan rerakonton de la lernilo per la  
tricent-deko da vortoj.*

oo

La rivero estis viva, kaj ĝi naskis ĉirkaŭ si senĉesan vivon. Tre multnombraj bestoj kaj kreskaĵoj loĝis apud ĝi.

Ankaŭ ene de la rivero estis vivo, multe da vivo. **Fiŝoj**, sennombraj **fiŝoj** vivis tie. Ulamraro, kiu loĝis apud marĉoj kaj akvejoj, jam delonge scipovis preni ion el tio kion akvo povis doni al ĝi.

Nao, kiam li havis tempon, longe rigardis senĉesan akvokuron. Li pensis ke akvo, kiel fajro, estas estulo, viva estulo. Akvo altiĝas kaj malaltiĝas, aperas el nenio, manĝas homojn kaj bestojn, falas de ĉielo. Sen ĝi ne povas vivi kreskaĵoj, ankaŭ bestoj ne povas vivi sen ĝi. Ĝi estas pli forta ol mamutoj, pli granda ol arbaroj. Ĝi kuras en riveroj, kaj dormas en akvejoj. Tiel pensis Nao, rigardante Grandan riveron.

Oni devis trovi noktejon. Ejo ĉirkaŭigita per akvo povus esti bona gardoloko kontraŭ bestoj, sed ne tre bona kontraŭ homoj; ĝi ankaŭ malfaciligus la fajropostkuron (fajr'o'-post'kur'o'n). Tial Nao prenis supron de apudborda altaĵo.

La kzamoj estis ne tre malproksimaj, sed iom da tempo oni povis dormi trankvile.

Ekestis pli malvarme. Manĝante vespermanĝon la ulamroj rigardis ĉirkaŭaĵojn. En

proksimiĝanta mallumo aŭdiĝis muĝo de tigro.

– Tigro, – diris Gavo.

– Sur la bordo, – respondis Nao al la maltrankvila junulo, – estas multaj bestoj. Tigro estas saĝa. Ĝi iros kapti beston, sed ne pli fortan ol ĝi homon.

La muĝo malaperis malproksime.

La ulamroj, unu post la alia, dormis ĝis la mateno. Poste ili ekiris laŭ bordo de Granda rivero. Tie ili renkontis mamutojn.

La mamutoj estis tre multnombraj. La ulamroj rigardis ilin, fortajn, trankvilajn. La mamutoj manĝis, eligante manĝeblaĵojn (manĝ'eb'l'aĵ'o'j'n) el tero. Iam ili kuris unu post la alia, kaj amike interbatalis per siaj rostroj (rostr'o'j), kiuj estis ĉirkaŭkreskitaj (ĉirkaŭ'kresk'it'a'j) per multegaj haroj.

Mamutoj estis fortegaj. Se tigrego trafus sub iliajn piedojn, de ĝi rapide restus (rest'us) nura malsekaĵo. Per siaj pikilegoj ili scipovis faligi arbon. Rigardante iliajn rostrojn Nao diris:

– Mamutoj estas plej fortaj el ĉiuj vivuloj.

Li ne timis ilin: li sciis ke mamutoj faras nenion malbonan al kiuj ne maltrankviligas ilin.

– Aumo, Filo de Lupo, amikiĝis kun mamutoj, – diris Nao.

– Kial ni ne faru samon? – demandis

Gavo.

- Aumo komprenis mamutojn, - kontraŭdiris Nao. Sed la penson li trovis bona. - Mamutoj ne elparolas vortojn, kiel homoj. Sed ili komprenas unu alian. Ili rekonas ankaŭ kriojn de siaj estroj. Maljuna Guno diris ke ili interparolas antaŭ ol ekiri... Se ni komprenus ilian lingvon, ankaŭ ni povus amikiĝi kun ili.

Kiam la homoj preteriris la mamutojn, unu el la bestoj ekrigardis ilin. Tio estis mamuto unuopa kaj grandega. Ĝi iris flanke de siaj samuloj (sam'ul'o'j). Neniam antaŭe Nao vidis mamuton tiel grandan. Videblis ke la besto rigardas la triopon da homoj iom scivole (sci'vol'e: ĝi volas ekscii ion novan).

- Ĉiuj mamutoj estas grandaj, - kriis Nao, - sed la granda mamuto estas pli forta ol deko da tigroj. Nao, Kamo kaj Gavo estas amikoj de la granda mamuto!

La mamuto (la = tiu ĉi) respondis per malforta muĝo.

- Ĝi komprenas! - diris Nao. Kaj li elkriis: - Se Nao, Kamo kaj Gavo al batalos al si fajron, ili donos al la granda mamuto bongustajn prifajritajn kreskaĵojn!

Dum tiu parolo Nao ekvidis marĉeton (marĉ'et'o'n) en kiu kreskis akvofloroj kiujn, laŭ lia scio, mamutoj trovas ege bongustaj.

Li ordonis al la junuloj kaj, post nelonge,

antaŭ la mamuto aperis multe da bongustaĵoj. Alvenante, ne tre proksimen, la mamutestron, Nao diris:

– Prenu! Ni alportis la kreskaĵojn al vi por ke vi manĝu ilin, kaj sciu ke ulamroj estas amikoj de la granda mamuto.

Li lasis la kreskaĵojn, kaj deiris. La egulo (eg'ul'o) alvenis la akvoflorojn. Ĝi bonege konis ilin. Manĝante la bongustaĵojn ĝi rigardis la homojn. Iam ĝi amike suprenigis la rostron.

Tiam Nao venis proksimen. Li ekstaris apud piedegoj de la besto, sub ĝia rostro, per kiu la besto scipovas faligi arbon, inter ĝiaj pikilegoj, grandaj kiel bovo. Apud tiu ĉi bestego li estis eta, sed li ne timis. La mamuto tuŝis Naon per sia grandega rostro. Nao tuŝis multharan rostron de la grandegulo. Poste li elterigis ankoraŭ iom da kreskaĵoj, kaj donis ilin al la bestego.

Kamo kaj Gavo kun timo rigardis sian estron. Kiam la grandega rostro tuŝis Naon ili diris:

– La mamuto suriros (sur'ir'o's) Naon. Kamo kaj Gavo restos senestraj (sen'estr'a'j). Kiu gardos ilin de hommanĝuloj, de bestoj, de danĝera akvo?!

Sed kiam ili ekvidis ke Nao tuŝas rostron de la bestego, ili eksentis sin tre bone:

– Nao fariĝis amiko de la mamuto! – diris

Kamo, – Nao estas plej forta el homoj!

Nao, Filo de Arbo, kriis:

– Kamo kaj Gavo venu ĉi tien, same kiel Nao. Ili prenu herbojn, junajn arbaĵojn, kaj donu ilin al la mamuto.

Laŭ ordono de sia estro Kamo kaj Gavo ekiris al la mamuto, eligante dum la iro kreskaĵojn. Ili venis, kaj donis la manĝaĵon al la grandegulo. Ĉar tio estis kunuloj de Nao, la bestego prenis ankaŭ tion. La homoj kaj la mamuto ekestis amikoj.

Venis tempo de granda luno. Nun ĝi estis ege luma. En unu el la noktoj noktejoj de la ulamroj kaj la kzamoj ekestis proksimaj inter si. Kaj tiu kaj la alia troviĝis sur bordo de Granda rivero. La kzamoj noktis apud sia varmiga fajro, manĝis multe da bestaĵo, ĉar bestoj tie estis multnombraj; dum la ulamroj sidis en malluma malvarmo, manĝante kreskaĵojn kaj iun negrandan birdon. La mamutoj dormis ne proksime. Tage ili donis al la homoj troviĝi inter si. Sed ne nokte.

Antaŭ mallumo la ulamroj devis lasi siajn gardantojn, kaj iri al tiu loko, el kiu iliaodoro ne venu al la bestegoj.

Ĉi-vespere Nao demandis siajn kunulojn:

– Ĉu Kamo kaj Gavo sentas sin bone, ĉu ili estas fortaj?

- Kamo dormis tage. Li estas preta batali,  
- respondis Kamo.

- Gavo facile alkuros kzamojn, - re-  
spondis Gavo.

- Bone, - Nao kaj la junaj bataluloj iru  
nun al la kzamoj, por albatali fajron.

Kamo kaj Gavo lasis la lokon, kaj postiris  
sian estron.

Ĉi-foje oni ne povis proksimiĝi en senlu-  
mo. Lumanta luno supreniĝis de alia bordo de  
Granda rivero. La ulamroj rapide iris tra altaj  
herboj. Kiam ili venis pli proksimen al noktejo  
de la kzamoj, ili ekmalrapidis. Nun ili iris  
malproksime unu de la alia, por pli bone vidi  
ĉirkaŭaĵojn.

Ekvideblis la fajro. Luna lumo iom malfor-  
tigis la fajran (la = lumon). La kzamoj  
dormis. Triopo da ili manĝigis la fajron, kaj  
gardis la dormantojn.

La ulamroj, kuŝantaj inter kreskaĵoj,  
rigardis la fajron. Se ili povus forpreni de ĝi  
plej etan flamon! Nun ili kunhavis sekajn ar-  
baĵojn. La fajro ne mortos nun en iliaj manoj;  
ĝi vivos ĝis ili enigis ĝin en fajroportilon, ki-  
ujn Nao scipovis fari el arbaĵoj kaj ŝtonetoj.

Sed kiel veni al la fajro? Post kiam Nao  
subite aperis en ilia noktejo, la kzamoj gardis  
ĝin tre bone.

Nao diris:

- Nao sidos apud bordo de la rivero;



Kamo kaj Gavo ĉirkaŭiru noktejon de la hommanĝuloj, aperante kaj malaperante. Kiam la malamikoj ekpostkuros ilin, ili forkuru: oni devas forigi malamikojn de la fajro. Kamo kaj Gavo estas sentimaj bataluloj, ili ne kuros rapide. Poste ili kuru al tiu granda ŝtono. Se Nao ne estos tie, ili kuru preter la mamutoj al bordo de Granda rivero. Nao trovos iliajn spurojn.

Kamo kaj Gavo iom maltrankviliĝis: ili timis resti duopaj, sen Nao, kontraŭ la danĝeraj malamikoj. Sed, kion fari, ordono estas ordono.

Ili malaperis ene de la altaj herboj. Nao ekiris al bordo de la rivero. Tempo iris malrapide. Kamo, laŭordone (laŭ'ordon'e), aperis el la herboj, kaj malaperis en ili. Samon faris ankaŭ Gavo.

La gardantoj ekkriis. La kzamoj eksaltis, kaj ekstaris ĉirkaŭ sia estro. Tio estis homo ne alta, sed forta kiel kaverna urso. Li dufoje suprenigis sian batilon, kaj elkriis ion. Tri aroj da kzamoj diskuris de la fajro. Nao rigardis ilin kun ununura (unu'nur'a = nur unu) penso: ĉi foje li devas albatoli fajron!

Apud la fajro restis kvaropo da tre fortaj bataluloj. Unu el ili, iom pli alta ol la estro, estis plej danĝera. Lia grandega batilo montris lian forton. Lumo de la fajro prilumigis lian kapon, liajn mallongajn fortajn piedojn.

Aliaj estis ne tiel altaj, sed ankaŭ ili havis longajn kaj fortajn manojn.

Loko kie troviĝis Nao estis bona: liaodoro ne ĝisiris la gardantojn. Ĉirkaŭe multis (mult'is = estis multaj) malbonodoraj hundoj. Nao kunhavis la hundan felon, tial li denove povis proksimiĝi al la fajro. Ĉi tie li troviĝis atendente plej bonan tempon por albatalo. Luno malaperis post arboj. Tiam Nao eksaltis kaj elkriis.

Pro tiu ĉi subita apero la kzamoj ektimis. Sed, post tre nelonga tempo ili, kriante, kaptis la batalilojn (la = siajn).

Nao diris:

- Filo de Arbo trairis arbarojn, montojn kaj riverojn, ĉar ulamraro restis senfajra. Se la kzamoj donos al li preni iom da brulantaĵoj, li foriros sen batalo.

Sed liaj vortoj estis por la kzamoj nekompreneblaj kiel krioj de lupoj. Ekvidante ke Nao estas unuopa, ili ĵetis sin sur lin. Nao desaltis, pensante ke ili, eble, albatalos unu post alia, forirante de la fajro; sed ne, la kzamoj ekbatalis kvarope.

Plej alta el ili ĵetis la pikilon. Li faris tion kun granda forto, kaj la ĵetpikilo tuŝetis manon de Nao antaŭ fali surteren. La ulamro, kiu volis gardi siajn batalilojn, kaptis ĵetpikilon de la malamiko, kaj reĵetis ĝin. La ĵetpikilo brue trapikis apudkapon de unu el la

hommanĝuloj. Tiu falis. Liaj kunuloj, kriante, ĵetis siajn pikilojn. Nao falis surteren por ke ili preterflugu lin.

Pensante ke li estas faligita, la kzamoj alkuris por finmortigi lin. Sed Nao denove eksaltis, preta batali. Unu el la kzamoj, vundita, ĉesis la batalon. Sed ne duopo da aliaj. Ankaŭ sur piedo de Nao aperis sango.

Sentante ke la vundo ne estas danĝera, Nao kuris apud la malamikoj, proksimiĝante kaj malproksimiĝante. Tiel li ekestis inter ili kaj la fajro.

– Nao estas pli rapida ol kzamoj! – kriis li, – li prenos la fajron! Kzamoj perdis jam du batalantojn!

Li alsaltis la fajron por kapti iun el la brulaĵoj, sed kun timego ekvidis ke la fajro ĉesis bruli! Nao ĉirkaŭkuris la fajron por trovi iun brulantaĵon, sed ĝi forestis.

La kzamoj proksimiĝis. Nao ekkuris, sed falis. La malamikoj fermis la vojon, proksimiĝante lin al la fajro. Nun al Nao restis nur trasalti (tra'salt'i) la fajron, kaj malaperi en kreskaĵoj, sed penso ke li revenos al ulamroj venkita, senfajra, ne donis al li fari tion. Li kaptis samtempe kaj la hakilon kaj la batilon, kaj ekestis preta al nova batalo.

Duopo da kzamoj proksimiĝis. Plej forta el ili ĵetis pikilon; nun de proksimo. Nao forbatis ĝin per sia hakilo; la pikilo falis en la fajron.

Triopo da batiloj supreniĝis samtempe. Batilo de Nao forbatis tiun de unu el la kontraŭuloj.

La kzamo ne falis, sed... Sed forta bato de Nao trafis lian kapon.

Sed ankaŭ Nao ekestis vundita. Li desaltis kaj ekstaris atendente, suprenigante la batalilon. Restis nur unu kontraŭulo, sed Nao okazis en danĝero, ĉar unu lia mano ĉesis funkcii, dum la kzamo estis forta, kaj havis hakilon kaj batilon. Alta, kun longaj manoj, li estis forta kiel bovo.

Antaŭ ol ekbatali, la kzamo ekrigardis Naon, kaj lasis la hakilon por kapti la batilon per la du manoj. Post tio li ĵetis sin sur Naon.

La du batilegoj kunbatiĝis. Bato de la kzamo estis pli forta ol tiu de Nao, sed kiam la kzamo ekbatis alifoje, lia batilo trafis... nenion. Nao desaltis.

Trian baton faris Nao. Li volis trafi kapon de la malamiko, sed tiu deiris, kaj denove la batiloj kuniĝis. La kzamo resaltis, kaj respondis per fortega bato, kiu povus forigi batilon de Nao. Antaŭ ol Nao pli bone ekkaptis ĝin, la kzamo ankoraŭfoje ekbatis. La bato trafis kapon de Nao.

Nao falis, ĉio ekĉirkaŭis (ek'ĉirkaŭ'is) en liaj okuloj. Sed ankaŭ nun, ene de la vivdanĝero (viv'danĝer'o), li ne perdis la komprenon. Iu forto aperis en li kaj, antaŭ ol la

kontraŭulo komprenis kio okazas, Nao ek-saltis, kaj ĵetis sur lin sian batilon. La kzamo falis morta.

Nao staris apud la fajro en kiu ankoraŭ videblis flametoj. Al li estis malfacile eksenti sian venkon ĉi tie, kie bruas la rivero kaj muĝas de alia ĝia bordo malproksima tigro. Li kriis:

– Nao ekhavis fajron!

Nao malrapide ĉirkaŭiris la fajron, proksimigante al ĝi siajn manojn. Poste li ankoraŭfoje elkriis:

– Nao ekhavis fajron!

Sed kzamoj povis reveni. Oni devis rapide forporti la kaptajon. Nao ĉirkaŭrigardis la lokon, kaj ekvidis fajroportilon de kzamoj. En ĝi ankoraŭ brulis negranda flamo. La aĵo estis farita tiel bone, ke ankaŭ Nao, kiun ulamroj konis kiel plej bonan faranton de ĉi-aĵoj, ne povus fari la saman. Fajroportilojn oni devis gardi de ĉielakvo, ĉiam rigardi ke la flamo ne ekestu fortega aŭ malforta. Nao bone scipovis fari tion. Li ĉirkaŭrigardis la fajroportilon, iom malsekigis ĝian malsupron, kaj aldonis brulaĵon.

Antaŭ ol forkuri Nao kunprenis hakilojn kaj ĵetpikilojn de la malamikoj. Poste li pririgardis la batallokon. Duo da kzamoj kuŝis mortaj, vunditoj kuŝis kun fermitaj okuloj. Oni devis finmortigi ilin. Nao venis proksi-

men, suprenigis la pikilon... Ne, li ne pikis.

Sed fajron de la malamikoj li mortigis. Li disĵetis brulaĵojn, kaj kriis:

– Kzamoj ne volis doni brulantan arbaĵon al Nao; tial ili perdis sian fajron. Ili iros nun en mallumo kaj malvarmo ĝis revenos al sia kzamaro! Nun la ulamroj estas pli fortaj ol la kzamoj!

Sur loko, kie Nao devis renkonti la junulojn, li trovis neniun: la junaj batalantoj ĉirkaŭkuris por forkurigi (for'kur'ig'i) la malamikojn.

Li fermis la vundojn per kreskaĵoj, kaj ek-sidis apud la fajro.

Iris tempo, iris akvo ene de Granda rivero. Kiam luno venis al supro de ĉielo, Nao suprenigis la kapon. El miloj da bruoj li ekaŭdis iron de homo. Ĝi estas tute alia ol iro de kvarpiedulo. Li eksentis ankaŭ odoron de la iranto.

La ulamro diris al si: «Tio iras Kamo. Li erarigis la malamikojn; la malamikoj perdis liajn spurojn».

Post nelonge la junulo ekestis surloke.

– Ĉu kzamoj perdis spurojn de Kamo?

– Jes, Kamo forkurigis la kzamojn tre malproksimen. Kiam Kamo ĉesis kuri, odoro de kzamoj jam ne venis al li.

– Tre bone. Kamo estas batalulo sentima

kaj rapida. Kie estas Gavo?

- Gavon postkuris aliaj kzamoj. Kamo ne renkontis liajn spurojn.

- Ni atendu Gavon ĉi tie. Kamo rigardu.

Post la altaĵeto (altaĵ'et'o), sur tero, Kamo ekvidis negrandan, luman, vivan varmeton.

Li forte elkriis, liaj okuloj pligrandiĝis. Li falis surteren, antaŭ Nao, kun krio:

- Nao estas plej saĝa el homoj! Li estos estro de ulamroj, neniuj kontraŭstaros lin!

La bataluloj sidis apud la fajreto. Ili jam sentis sin en sia naskiĝloko, sub tieaj malvarmaj steloj apud Granda marĉo. Penso pri longa rea vojo ne timigis ilin: kiam ili lasos terojn de Granda rivero, kzamoj ĉesos postkuri ilin. Poste la ulamroj iros tra lokoj senhomaj. Tiel ili pensis, kaj tio kion ili antaŭvidis, estis bonega.

Sed, kiam luno ekis malaltiĝi, ili maltrankviliĝis.

- Kie estas Gavo? - demandis la estro. Ĉu li ne forigis kzamojn de siaj spuroj? Ĉu iu marĉo ne donis al li forkuri? Sed respondo ne venis. La nokto estis senbrua; oni aŭdis nur muĝon de la rivero. Ĉu oni atendu lin ĝis la mateno, ĉu oni serĉu lin?

Nao ege ne volis lasi sian fajron. Sed, aliflanke, lin maltrankviligis foresto de la juna batalulo kiun, eble, postkuras hommanĝuloj.

Jes, por redoni (re'don'i) al ulamroj fajron Nao povis lasi Gavon... ne, ne povis, li devis fari tion! Sed Nao sciis ke li ne foriros sen la junulo post tiuj danĝeroj kaj malfacilaĵoj kiujn ili travivis kune. Li ne povas lasi lin.

- Nao iros serĉi Gavon, - finfine diris li. Kamo pririgardu la fajron; li devas malsekigi la fajroportilon kiam ĝi varmiĝos. Kamo ne deiru de la fajro.

- Kamo gardos la fajron kiel sian vivon, - diris Kamo, - kaj aldonis, - Kamo scipovas gardi fajron. Lia patrino instruis tion al li kiam li estis nura (nur'a) lupeto (= lupa et'ul'o).

- Bone. Kiam suno supreniĝos ĝis alto de la arboj, sed Nao ne revenos, Kamo iru al la mamutoj. Se Nao ne revenos ĝis vespero, Kamo unuopa iru en landon de ulamroj.

Nao foriris. Li iris kaj rerigardis sian lastitan fajreton.

Por trovi spurojn de Gavo oni devis reveni noktejon de la kzamoj. Nao iris malrapide. Li sentis sian vundon sub kreskaĵoj, per kiuj li fermis ĝin. Li sentis bruon en la kapo, kiun trafis batilo de la malamiko. Kaj nuna foresto de Gavo... Ĉu ankaŭ post albatalo de fajro oni devas elteni malfacilaĵojn?!... Tio estis malbonaj sentoj.

Post nelonge li venis al loko de kiu li, kun



siaj junuloj, ekvidis noktejon de la kzamoj. Tiam lumo de la fajro kuniĝis kun tiu de luno; sed nun tie estis mallume. Oni aŭdis nur krietojn de vunditoj.

Kiam Nao ekvidis ke postkurantoj ankoraŭ ne revenis, li sentime eniris la kzamejon. La krietoj ĉesiĝs. Oni povus pensi ke nur mortajoj kuŝas ĉi tie.

Nao preteriris la lokon kaj, post nelonga serĉo, trovis spurojn de Gavo.

Iri laŭ la spuroj estis facile: spuroj de la kzamoj postiris ilin. Poste la spuroj eniris arbitaron, kaj malaperis en marĉo. Nao trovis ilin aliborde. Ili ankoraŭ estis malsekaj.

Poste la kzamoj disiris. Nao ekis postiri spurojn de unu el la kzamopoj, sed, post iom da tempo, li ĉesis la serĉon: luno malaperis, ekestis mallume.

Proksimiĝis mateno. Nao eksidis sub arbo. Estis malbrue. Nao sidis ĝis kiam lumiĝis suproj de la arboj. Tiam li ekstaris, formanĝis iom da bestaĵo; poste (post'e) li denove ekiris, rigardante la teron.

Li vidis ke Gavo eliris el la arbareto, trairis senkreskaĵejon, preteriris marĉon, kaj ekstaris sur bordo de rivereto por poste trairi ĝin.

Ankaŭ Nao faris tion kaj, post longa iro, li trovis ke spuroj de la kzamoj ekis interproksimiĝi (inter'proksim'ig'i). Oni, eble,

ĉirkaŭigis Gavon.

Nao pensis ke pli saĝe estus lasi Gavon al tio kio atendas lin, por ne perdi sian vivon, vivon de Kamo, kaj tiun de la fajro. Sed li ne faris tion. Li volis scii kio okazis.

Nun li devis gardi sin ne nur de tiuj du opoj da kzamoj, vojon de kiuj Nao jam konis, sed ankaŭ de la tria opo. Sed, ĉar liaj piedoj estis rapidaj, Nao ekiris laŭ la spuroj.

Li venis al alta ŝtonego, supreniris ĝin, kaj elkriis: li ekvidis Gavon. Post li, iom malproksime, kuris opo da kzamoj. De alia flanko proksimiĝis alia opo. Gavo kuris ne rapide; videblis ke li gardas siajn fortojn, ke li kuregas nur kiam oni devas foriri de kaptejo. Sed videblis ankaŭ ke li perdis la vojon: li ne scias kie troviĝas la renkontloko (renkont'lok'o; la = ilia).

Nao staris kaj rigardis. Se li alkuros Gavon, ili povos kune veni al Granda rivero. Li jam vidis plej bonan vojon al ĝi.

Nao jam volis malsupreniĝi, sed subite li ekvidis tion, kion Gavo vidi ne povis: tio estis tria opo da kzamoj.

Ankoraŭfoje Nao ekpensis pri si, pri la fajro, kaj... kaj ekkuris al Gavo. Sed antaŭe li pririgardis ĉirkaŭaĵojn, por bone enmemori ilin.

Li kuris, nevidebla pro arbetoj kaj altaj herboj, kaj venis al loko apudarbara. Ĉi tie li

trifoje kriis bestkrion de ulamroj. Se oni ne postkurus lin, Gavo, eble, aŭdus la krion, sed nun la krio ne alvenis lin.

Tiam Nao elkuris el la kreskaĵoj kaj, kun batala krio, aperis sur la herbejo. Forta muĝo de ĉiuj opoj da kzamoj estis la respondo.

Gavo ekstaris, ekvidis Naon, kaj ekkuris al li. Nao kuris al loko kiun oni devis kuri, sed tria opo da kzamoj komprenis tion, kaj ekkuris fermi la vojon.

Okazis ke la ulamroj ekestis fermitaj de tri flankoj. La kvaran flankon fermis alta, malfacile suprenirebla ŝtonego. Sed Nao ekkuris al ĝi. La kzamoj, kiuj jam pensis sin venkantaj, proksimiĝis kriante. Iuj el ili jam suprenigis la ĵetpikilojn, pretaj ĵeti ilin, sed Nao, kaj postkuranta lin Gavo, malaperis en interŝtonejo, kiun Nao vidis desupre.

La kzamoj ekmuĝis. Iuj el ili enkuris la trairon, aliaj ekkuris ĉirkaŭe.

Nao kaj Gavo kuris en la trairejo, sed ili ne povis forkuri malproksimen de la postkurantoj, ĉar la vojo estis malfacila. Tial, kiam ili elkuris, ili ekvidis ke triopo da kzamoj-ĉirkaŭkurantoj jam fermis la vojon. Ĉiu senfaro ekestis mortdanĝera.

Nao ĵetis sin al la proksimiĝantaj kzamoj, tenante en la manoj la batilon kaj la hakilon; Gavo kaptis sian pikilon. La kzamoj ekĉirkaŭis ilin. Nao albatis junan kzamon kiu tenis

batilon. Li forbatis la batilon, kaj faligis la malamikon. Duopo da aliaj hommanĝuloj al-batalis Gavon. Ili volis rapide mortigi lin por poste kune albatali Naon.

Gavo ĵetis la pikilon, vundis iun el la malamikoj, sed ekestis pikvundita. Se li ne forsaltus, dua pikilbato estus mortiga. La kzamoj ekpostkuris lin, sed Nao per brua kaj forta bato faligis ankoraŭ unun el ili. Alia ekstaris atendente proksimiĝantajn samulojn. La vojo ekestis malferma, kaj la ulamroj ekkuris sur ĝi. Kiam suno supreniĝis, ili estis jam malproksimaj. Sed la kzamoj ne ĉesis la postkuron.

Gavo malfortiĝis. El lia vundo iris sango. Kiam ili alkuris arbojn, Nao fermis la vundon, sed sango ne ĉesis eliri. La kuro malrapidiĝis, la kzamoj denove ekestis proksimaj. Nao pensis ke, se Gavo ne rehavos forton, oni kaptos ilin antaŭ ol ili alkuros la mamutojn. Gavo kuris pli kaj pli malrapide.

– Se Gavo ne kuros, hommanĝuloj kaptos nin antaŭ ol ni venos al la rivero, – diris Nao.

– Okuloj de Gavo jam ne vidas, lia kapo bruas, – respondis la junulo, – Nao kuru unuope. Lasu min, mi mortos por fajro.

– Gavo ne mortos!

Nao prenis la junulon, kaj ekkuris portante lin. Se li ne havus vundon, se ne bruo

en la kapo, li, ankaŭ kun Gavo en la manoj, kurus pli rapide ol kzamoj, sed nun okazis ke ankaŭ li perdis la fortojn. Neniu besto povus elteni tiujn malfacilaĵojn.

Nao jam aŭdis kuron de la kzamoj. Li kuŝigis la junulon, kaj diris:

– Gavo, Nao ne povas forporti vin de la hommanĝuloj.

– Nao devas lasi Gavon, kaj veni al ulamroj kun fajro, – respondis Gavo.

La kzamoj denove suprenigis la ĵetpikilojn. Nao ekstaris por renkonti la malamikojn. Plimulto da ĵetpikiloj ne alflugis la ulamrojn; nur unu el ili trafis piedon de Gavo. Sed tio estis nur vundeto. Responde Nao mortfaligis unuan alkuranton, kaj trapikis alian. La kzamoj ekstaris.

Nun ankaŭ Gavo kaptis sian ĵetpikilon. Nao ekvidis tion, kaj diris:

– Ĉu Gavo ekhavis novan forton? Li kuru. Nao haltetos la postkurantojn!

Gavo ne sciis ĉu fari tion, ĉu ne, sed la estro kriis:

– Kuru!

Gavo ekkuris; lia kuro ekestis pli kaj pli rapida. Nao foriris malrapide. Ekflugis ĵetpikiloj, la kzamoj ĵetis sin sur Naon. Li vundis ankoraŭ du malamikojn, aliaj deiris. Nao ekkuris.

La postkuro renoviĝis. Gavo kuris mal-

rapide, staris, kaj kuris denove. Nao prenis lian manon. La kzamoj, sciante sian forton, jam ne rapidis.

– Pli bone Gavo mortu, – senĉese diris la junulo, – Nao diru al ulamroj ke Gavo batalis sentime.

Nao ne respondis. Li aŭdis kuron de la malamikoj. La vojo iris supren. Al la supro li venis jam senforta. Li ĵetis rigardon antaŭen kaj...

– Granda rivero, – kriis Nao, – mamutoj!

Jes, post la altaĵo videblis la riverbordo kun la mamutoj sur ĝi.

La kzamoj postkuris la ulamrojn, sciante ke mamutoj ne allasos la kurantojn, kaj forigos ilin de si.

Nao elkriis; el proksima arbareto eliris homo, poste aperis mamuto. La grandega besto suprenigis la rostron. Forte kriante ĝi, kune kun du aliaj mamutoj, ekkuris al Nao.

Al la kzamoj restis nur stari kaj atendi kiam la mamutoj fortimigos la ulamrojn. Tiam kzamoj neniigos ilin. Sed ili eraris. Okazis io kion ili vidis neniam antaŭe: plej granda mamuto venis al Nao, kaj tuŝis lin per sia rostro.

– Nao ekhavis fajron, – kriis Nao, – li mortigis kvaropon da kzamoj sur la noktejo, kaj alian kvaropon dum la forkuro.

La kzamoj respondis per malamika kriego. Sed la mamutoj iris al ili, kaj la kzamoj

forkuris: oni ne povas kontraŭbatali mamutojn.

Kamo bone gardis la fajron. Ĝi estis sata, kaj amike lumis en sia fajroportilo kiam Nao denove ekvidis ĝin.

Jes, li ne havis forton. Jes, li sentis batojn de sia vundo, kaj bruegon en la kapo. Sed li pensis ne pri tio. Li jam vidis antaŭ si sian naskiĝlokon: bordojn de la marĉo, la altajn arbojn. Li aŭdis kriojn de tieaj birdoj, kaj falon de la ĉielakvo. Kaj Gamlan. Li jam vidis Gamlan.

Poste Nao deiris de la fajro, kaj prenis iom da bongustaj ter- kaj arbo-kreskaĵoj por doni ilin al la mamutestro. Li sciis ke tion oni devas fari ĉiutage, se oni volas resti amikoj. Poste li prenis lokon ene de la mamutaro, kaj kuŝis dormi, ordonante al Kamo ke tiu gardu.

- Se la mamutoj ekos foriri de ĉi tie, - diris Kamo, - mi eldormigos vin.

- La kreskaĵejo estas grandega kaj multherba, - respondis Nao, - la mamutoj restos ĉi tie ĝis la (la = plej proksima) vespero.

Kaj li ekdormis dormon fortan kiel morto.

Kiam Nao eldormiĝis, suno staris jam malalte. Li eksentis siajn vundojn, sed bruo en la kapo malpliiĝis. Li ekstaris, ekrigardis, antaŭ ĉio, la fajron, kaj demandis la gardan-

ton:

– Ĉu la kzamoj revenis?

– Ili ne foriris. Ili atendas sur la riverbordo, apud tiuj arboj.

– Bone, – respondis Nao, – sen fajro, dum longaj malsekaj noktoj ili, post nelonge, ĉesos atendi, kaj lasos nin por reveni al sia kzamaro. Kamo povas dormi.

Dume (dum'e = dum tio) Nao pririgardis Gavon. La juna batalulo estis malforta, varmega, li komprenis nenion, sed sango ĉesis eliri... ne, li ne mortos.

Nao sidis apud la fajreto. Li ege volis fari grandan vesperan fajron, sed li komprenis ke la mamutoj povas preni tion malamike. Li faru tion dum aliaj, pli bonaj tagoj.

Nun, antaŭ ĉio, oni devis fari ion por ke la mamutestro donu al la homoj dormi ene de la mamutaro, sub ĝia gardo.

Per la okuloj Nao trovis la grandegulon, kiu, kiel ĉiam, estis unuopa, por pli bone pririgardi kaj la ĉirkaŭaĵojn, kaj sian mamutaron. Ĝi iris tien kaj reen inter nealtaj arboj.

Nao eligis (el'ig'is) iom da enteraj kaj enmarĉaj bongustaĵoj, kaj ekiris al la mamutestro. La grandegulo ĉesis manĝi arbeton, suprenigis sian ĉirkaŭkreskitan rostron, kaj ekiris renkonten.

Nao donis al ĝi la bongustaĵojn, kaj diris:

– Estro de mamutoj, la kzamoj atendas la



ulamrojn sur la riverbordo. Ulamroj estas pli fortaj ol kzamoj, sed ni estas nur triopaj kontraŭ multnombraj malamikoj. Kzamoj mortigos nin, se ni eliros el la mamutaro.

La mamuto, sata jam post la bona taga manĝo, malrapide finmanĝis la donitaĵojn (don'it'aĵ'o'j'n), ekrigardis sunon, kaj ekkuŝis, ĉirkaŭante Naon per sia rostro. Nao ekpensis ke nun ili povas troviĝi inter la mamutoj ĝis la resaniĝo. Ĉu ne povas okazi ke la grandegulo iam donos al ili fari fajron, manĝi prifajritan bestaĵon kaj dearbaĵojn (de'arb'aĵ'o'j'n)?

Suno malsupreniĝis. Tio estis bona vespero. Sur la ĉielo oni vidis akvejojn, kavernojn, arbojn. La juna batalulo demandis sin: kiu lumigas tiujn ĉi ejojn, kiu loĝas post la ĉielaj montoj?

Jam tri tagoj loĝis la ulamroj sub gardo de la mamutoj. La kzamoj ne foriris. Oni vidis ilin irantajn tien kaj reen laŭ bordo de Granda rivero. Ili atendis tempon kiam oni povos kapti kaj formanĝi la venintojn, kiuj forprenis ilian fajron.

Sed Nao ne timis ilin. La mamutoj kaj la ulamroj estas nun bonaj amikoj. Lia forto kreskas de tago al tago. La vundo resaniĝas, la bruo en la kapo jam malaperis. Ankaŭ Gavo ekestis pli sana.

De supro de altaĵo la ulamroj kriis al la kzamoj:

- Kial vi ĉirkaŭiras la mamutojn kaj la ulamrojn? Antaŭ mamutoj vi estas malfortaj kiel hundoj antaŭ urso. Viaj batiloj kaj hakiloj ne povas kontraŭstari batalilojn de Nao. Se vi ne foriros, ni kaptos vin unu post alia, kaj mortigos!

La kzamoj ne respondis.

La ulamroj estis sentimaj, sed ĉeesto de kzamoj fermis al ili rean vojon (re'vojo'n). Jam proksimiĝis tempo kiam oni devos foriri de la mamutoj, por iri al sia lando.

Nao pensis kiel forigi la malamikojn. Trifoje tage li serĉis por la mamutestro bongustajn manĝaĵojn, kaj multe da tempo troviĝis apud sia amiko. Li volis kompreni ĝian lingvon, kaj instrui al ĝi la sian. Iam en okuloj de la mamuto aperis iu lumeto. Tiam Nao pensis: «La granda mamuto komprenas Naon, sed Nao ne komprenas ĝin.»

Iom post iom la mamuto ellernis iujn vortojn. Kiam la ulamro (la = Nao) kriis «manĝo!» la mamuto rapide venis, ĉar li sciis ke post tiu ĉi vorto ĝi havos bongustaĵojn. Iam ili interkriis: la mamuto muĝetis, Nao respondis per unu-du vortoj.

Kaj tiu kaj la alia trovis tiun interproksimon bona. Iam la homo sidis sur tero, kaj la mamuto ĉirkaŭiris lin; iam ĝi singarde

suprenigis lin per sia rostro.

Nao ordonis al siaj kunuloj ke ankaŭ ili donu bongustaĵojn al du aliaj mamutoj. Nao instruis ilin kiel ili parolu kun la grandeguloj kaj, post kvin tagoj, la mamutoj venis al Kamo kaj Gavo ĉiufoje kiam ili aŭdis la alkriojn (la = tiujn ĉi).

Tio estis bonaj tagoj. Foje, vespere, Nao kunigis brulaĵojn, kaj kuraĝis bruligi ilin. Aperis alta lumanta flamo. Mamutoj de ĉiuj flankoj alkuris ĝin. Ili estis maltrankvilaj. Iuj el ili muĝis: ili bonege konis fajron. Ili vidis ĝin, kurantan en herbejoj kaj arbaroj. Tiam ĝi brue postkuris kaj brulvundis ilin. La maljunuloj (la = mamut-mal'jun'ul'o'j) memoris siajn kunulojn, kaptitajn per tiu ĉi timiga aĵo. Malame (mal'am'e) rigardis mamutoj la flamon, ĉirkaŭ kiu sidis tiuj ĉi etuloj, tiuj ĉi homoj.

Nao, kiu komprenis iliajn sentojn, aliris la estron, kaj diris al ĝi:

- Flamo de la ulamroj ne scipovas elkuri (el'kur'i). Ĝi troviĝos (trov'iĝ'os) tie kie la ulamroj donas al ĝi manĝon.

La grandegulo venis al la fajro, kaj longe rigardis ĝin. Ĝi vidis ke la ege malfortaj amikoj restas trankvilaj, tial ankaŭ ĝi trankviliĝis. Post tio trankviliĝis ĉiuj, ĉar dum tre longa tempo trankvilo aŭ maltrankvilo de la estro venis ankaŭ al ili. La fajro staris sur-

loke, ne saltis kiel kiu iam postkuris ilin. De nun Nao povis bruligi fajron, kaj forigi mal-lumon. Tiuvespere ilia manĝo estis varma kaj bongusta.

Ankaŭ post seso da tagoj la kzamoj ne foriris. Nun, kiam la forto revenis al Nao, la senfaro ekestis neeltenebla: li volis iri. Foje li elkriis:

- Kzamoj ne manĝos la ulamrojn!

Li ordonis al siaj kunuloj:

- Alkriu mamutojn kun kiuj vi amikiĝis; min postiros la mamutestro. Ni venkos la hommanĝulojn!

La ulamroj enigis la fajron en sendanĝeran lokon, kaj ekiris. Forirante ili elterigis manĝaĵojn por la mamutoj, kaj parolis kun ili. Sed, post ioma foriro, la mamutoj ekstaris, rerigardante sian mamutaron. Nao venis al la estro, ĉirkaŭprenis ĝian rostron, kaj diris:

- La kzamoj sidas en tiu arbetejo (arb'et'ej'o). Se mamutoj postiros nin, ni venkos la malamikojn.

Sed la estro restis senfara. Ĝi staris kaj rigardis malantaŭen, sian mamutaron.

Nao sciis ke la kzamoj estas tre proksimaj. Li ne povis reveni. Kune kun siaj kunuloj li ĵetis sin en altajn herbojn, kaj malaperis en ili. Ekflugis ĵetpikiloj. La kzamoj ekstaris, por pli bone ĵeti ilin.

Nao elkriis vortojn konatajn al la estro; nun la mamutestro komprenis. Kun du aliaj mamutoj ĝi ekkuris al hommanĝuloj. Tiam Nao kun la batilo, Kamo kaj Gavo kun la hakiloj kaj pikiloj ĵetis sin sur la kzamojn.

Timigitaj kzamoj ekis forkuri. La mamutoj ekpostkuris la forkurantojn. De bordo de Granda rivero kuris ankaŭ aliaj mamutoj. Ne nur kzamoj, ankaŭ bestoj ekforkuris de la kurantaj grandeguloj.

La mamutestro unua alkuris iun el la kzamoj. Tiu ĵetis sin sur la teron kriante pro la timego, sed la fortega rostro jam kaptis lin, ĵetis lin supren kaj, kiam li falis, suriris lin.

Mamutoj mortigis kzamojn per piedoj kaj rostroj. Ĉiuj kzamoj inter la riverbordo kaj supro de la altaĵo, ekestis neniigitaj. Nur tiam mamutoj iom post iom trankviliĝis.

Ne multaj kzamoj forkuris por rakonti pri tiu ĉi batalo de la venintoj kaj mamutoj kontraŭ la kzamoj.

Dek tagoj iris la mamutaro laŭ bordo de Granda rivero. «Vivo de mamutoj estas bonega kaj sata.» – pensis Nao. – «Multo da manĝaĵoj plifortigas (pli'fort'ig'is) ilin; bongustaĵoj atendas ilin sur ĉiu loko de la bordo: en herbejoj, en marĉoj, en arbaroj. Neniu besto maltrankviligas ilin sur ilia vojo.

Ili estas nevenkeblaj. Scio pri sia forto faras ilin nebatalemaj. Ĉiu el ili konas sian lokon en la mamutaro, ĉiu el ili bone konas sian estron. Tial ili scipovas trovi plej bonajn manĝejojn. Iliaj vid-, odor- kaj aŭdo-sentoj estas bonegaj. Grandegaj kaj saĝaj, fortegaj kaj rapidaj, ili sentas sin same bone kiel surtere tiel enakve. Tero kaj tempo estas iliaj. Nenio povas malpliigi ilian multiĝon». Tiel pensis Nao, postirante la grandegulojn. Li aŭdis bruon de ilia iro. Ĉiuj bestoj diskuris aŭdante ĝin; birdoj supreniĝis por rigardi ilin desupre.

Por la ulamroj tiuj tagoj estis tagoj plej bonaj, plej sendanĝeraj. Se ne pensoj pri Gamla, Nao volus ke tiuj tagoj ĉiamu (ĉiam'u). Nun, kiam li pli bone ekkonis mamutojn, li trovis ke ili estas pli bonaj ol homoj. Ilia estro ne estas tiel malamika al siaj subuloj kiel Faumo: ĝi estras sen malveroj kaj timigoj. Kaj neniu el ili estas tiel danĝera al siaj samuloj kiel Ago kun siaj fratoj.

Matene, kun apero de unua lumo, mamutoj eldormiĝis. Suprenigante siajn rostrojn ili renkontis naskon de nova tago per fortegaj muĝoj. Poste ili nerapide iris manĝi. Ĝissate manĝinte ili kune malsupreniris al rivero por trinki.

Venis vespero, proksimiĝis sanga, por

multaj herbmanĝuloj, nokto. La fajro iĝis pli luma. La ulamroj donis al ĝi multe da sekaj brulaĵoj. Grandiĝante (grand'iĝ'ant'e) ĝi iĝis pli brua, pli luma. Ĝi varmigis la teron, kaj forigis la mallumon. Pro bonodoro de prifajritaj manĝaĵoj ankaŭ la mamutestro proksimiĝis al tiu ĉi varmo. Longe staris ĝi, rigardante la fajron. La mamuto rigardis kiel oni manĝigas ĝin. Eble ĝi pensis ke, se mamutoj havus fajron, ili estus multe pli fortaj.

En iu el la vesperoj la mamutestro venis pli proksimen al la fajro ol antaŭe. Ĝi prenis per sia rostro iun ne tre grandan sed sekan arbaĵon, kaj ĵetis ĝin en la fajron. La arbaĵo ekbrulis. La bestego venis al Nao, kaj ĉirkaŭigis lin per sia rostro. «Se mamutoj scipovas subteni (sub'ten'i) fajron, kial ili noktas en mallumo kaj malvarmo?» – demandis sin Nao.

De tiu ĉi vespero la mamutestro ekestis pli proksima al la homoj ol antaŭe. Kune kun ili ĝi serĉis bonajn brulaĵojn, kaj manĝigis la fajron ne malpli bone ol la homoj. Ĝi komprenis jam multajn vortojn, kaj instruis la homojn kompreni sin.

Venis tago kiam vojoj de la mamutoj kaj de la ulamroj disiĝis (= iĝ'is dis'a'j). Nao sentis maltrankvilon: estis tiel sendanĝere loĝi inter amikoj tiel grandaj kaj tiel bonvolaj

(bon'vol'a'j = kiuj volas bonon)! Post tiuj ĉi tagoj la foriro estis timiga: tie, sub malvarmaj ĉielakvoj, sur grandaj marĉaj herbejoj, en arbaroj kie multegas bestmanĝuloj, ilin atendis sennombraj danĝeroj.

Unumatene (unu'maten'e) Nao venis al la mamutestro, kaj diris al ĝi:

– Nao kaj la mamutoj amikiĝis. Nao volus longe iri kune kun la mamutoj, sed li devas reveni al bordo de Granda marĉo, kaj revidi Gamlan. Li devas iri tien. Estus bone se ankaŭ la mamutoj deirus de la rivero...

La mamutestro trankvile aŭskultis lian parolon. Poste li kapneis (kap'ne'is = montris «ne» per sia kapo), kaj ekiris antaŭ sia mamutaro.

– Jes, diris Nao al si, – la mamutoj ne povas foriri de akvo.

Kiam la mamutaro ekestis nevidebla, Nao supreniris altaĵon, kaj longe rigardis la forirantan mamutestron, kiu tiel longe gardis ilin kontraŭ kzamoj. Li sentis timon: homo estas tiel eta, tiel malforta!

Falis malvarma ĉielakvo. La ulamroj iris tra kreskaĵejoj, tra altaĵoj, dormis sub arboj, en interŝtonejoj, sur malseka tero. Kiam ne estis bestaĵo ili manĝis kion oni povas trovi surtere.

La fajro estis kaj bono kaj malbono: jes,



ili povis prifajrigi manĝaĵojn, sed nun ili devis ĉiam gardi la fajron de ĉielakvo, trovi aŭ fari por ĝi sendanĝeran lokon, manĝigi ĝin per sekaj brulaĵoj.

Ne malmulte da tempo prenis ankaŭ ĉirkaŭiro de ĉiuj vojmalfacilaĵoj (voj'mal-facil'aĵ'o'j). Por veni al sia lando ili iris laŭ siaj sentoj, laŭ suno aŭ steloj; sed iliaj scioj pri ĉielaĵoj (ĉiel'aĵ'o'j) ne estis bonaj. Ili reiris ne per tiu vojo per kiu ili venis.

Subite antaŭ ili aperis lando senkreskaĵa. Videblis nur ŝtonoj, grandaj kaj etaj, disĵetitaj sur ĝi. Tie kaj tie oni vidis iom da pikaj herboj, kaj iun malproksime kurantan besteton. Faloj de ĉielakvo malfortiĝis, ekvideblis aroj da birdoj, flugantaj al pli varmaj landoj. La tago proksimiĝis al vespero, lumo estis malforta... Nao staris kaj pensis: ĉu eniri tiun ĉi senvivan kaj senmanĝan landon? Sed la ulamroj havis multe da bestaĵo, en iliaj fajroportiloj lume brulis iliaj fajroj; tial, por mallongigi la vojjon, ili eniris la malvivejon.

Ankaŭ post kvino da tagoj fino de la senkreskaĵejo ankoraŭ ne estis videbla. La manĝo ekestis formanĝita, bestoj kuris for de iliaj kaptiloj, la akvo eltrinkiĝis. Ĉielakvo malaperis en tero. Venis danĝero ke ankaŭ la fajro ne havos brulaĵon.

Post sesa tago da iro herboj ekestis iom

pli altaj, pli bonaj, aperis arboj kaj etaj akvejoj. Ĉielo malsupreniĝis. La ulamroj dormis apud la fajro, malseka brulaĵo de kiu eligis fortajn odorojn.

Nao gardis unua, poste ekgardis Kamo. La junulo iris apud la fajro, kaj sekigis arbaĵojn antaŭ ol ĵeti ilin en la fajron. Kamo eksidis por iom varmigi la manojn. Tiam li eksentis danĝeron: ĉirkaŭ la noktejo iu iris. Li tuŝetis la estron. Nao eksaltis. Jes, Kamo ne eraris. Per forta bato Nao revivigis la fajron, kaj ekvidis ene de la kreskaĵoj iom da homaj kapoj. Nao eldormigis Gavon.

– Ĉi tie estas homoj, – diris li malbrue.

La ulamroj longe enrigardis lokon kie antaŭe videblis homoj, sed aperis neniu. Oni aŭdis nur falon de ĉielakvo. Ĉu tio estas granda aro da homoj, aŭ nur malmultaj bataluloj? Ĉu forkuri aŭ ekbatali?

– Gardu la fajron, – diris Nao.

La ulamroj longe rigardis la estron malaperantan (mal'aper'ant'a'n) en la nokto.

Nao iris al kreskaĵoj en kiuj li vidis homojn. Li longe staris surloke kun la batilo kaj la hakilo en la manoj. Li iris tiel senbrue, ke ankaŭ lupoj ne aŭdus lian iron. Li ĉirkaŭiris la lokon, sed trovis neniun spuron. Poste li supreniris altaĵon kiun li vidis vespere. De supro de la altaĵo li ekvidis malproksiman lumon. Tio estis fajro de homoj.

Danĝero estis granda: la nekonatoj eksciis pri la ulamroj antaŭ ol la ulamroj eksciis pri ili.

Nao revenis al siaj kunuloj.

– Tie estas homoj, – diris li, – oni devas plivivigi fajrojn en la fajroportiloj.

Dum Kamo kaj Gavo faris tion, Nao ĵetis multe da brulaĵoj ĉirkaŭ la fajro, por ke la ulamroj ekestu nevideblaj. Kiam ĉio ekestis preta ili ekiris. La ulamroj jam estos malproksimaj kiam la malamikoj, pensante ke ili sidas apud la fajro, ĉirkaŭigos ĝin por mortigi la sidantojn.

Mateniĝis. Cielakvo ĉesis fali. La ulamroj iris supren. Videblis neniu.

– Ili perdis niajn spurojn, – diris Kamo.

– Ili postiras nin, – respondis Nao.

Kaj vere, malproksime ili ekvidis du homojn. Ilin postiris ankoraŭ trideko da malamikoj.

Nao vidis ke ili ne estas altaj, sed iliajn batalilojn li ne povis vidi. La postirantoj ne vidis la ulamrojn.

Nombro da malamikoj grandiĝis, sed Nao komprenis ke ili estas ne tiel rapidaj kaj fortaj kiel ulamroj. Por forkuri oni devus denove eniri senvivejon, per kiu ili venis ĉi tien. Sed pli bone estis iri antaŭen, kaj atendi kiam la postirantoj perdos siajn fortojn.

Kiam la ulamroj malsupreniĝis kaj reri-

gardis, ili ekvidis la malamikojn starantajn sur la supro.

La vojo ekestis malfacila. Aperis pikaj kreskaĵoj kaj negrandaj marĉoj, kiujn oni devis ĉirkaŭiri. La irantoj perdis multe da tempo. Sed poste aperis iom da malfortaj arboj, starantaj ene de marĉo. Finfine la ulamroj venis al herbejo.

La iro ekestis pli facila, sed tie ili denove ekvidis homojn. Ĉu tio estas samaj homoj kiujn ili vidis matene? Ĉu ne eblas ke ili bone konas la lokojn, kaj venis ĉi tien per vojo malpli longa? Ĉu tio estas alia opo de sama aro?

Nun la postirantoj estis proksimaj kaj bone videblaj. Malaltaj, ege malaltaj estuloj. Sed ili tenis batalilojn. Filo de Arbo pensus ke tio estas infanoj, sed videblis ke iuj el ili estas maljunaj.

Ne, ne eblas ke ili batalos! Kaj vere, kiam la ulamroj suprenigis siajn batilojn kaj pikilojn, kiam ili ekkriis, la malaltuloj forkuris. Sed ne malproksimen. Tie ili staris kaj ankaŭ kriis.

Nao komprenis ke ili volas ĉirkaŭigi la ulamrojn, kaj ordonis forkuron. Sed, post nelonge, li ekstaris.

Tri aŭ kvar malaltuloj iris antaŭ aliaj. Nao kaptis iom da ŝtonoj, kaj ekkuris renkonten. Unu el ili, eblas ke tio estis estro, eligis kri-

on, kaj la malaltuloj ekstaris.

Tiam Nao elkriis:

– Nao, Filo de Arbo, ne volas malbonon al la homoj. Se ili ĉesos la postiron, neniu tuŝos ilin!

La malaltuloj staris kaj rigardis. Ekvidante ke Nao ne iras al ili, ili proksimiĝis.

Tiam Nao, ĵetante ŝtonon, denove elkriis:

– Filo de Arbo disbatos (dis'bat'os) la malaltulojn!

Preterflugis kvar aŭ kvin ĵetpikiloj. Falis batalanto kiun trafis la ŝtono. Nao ĵetis duan ŝtonon. Ĝi trafis neniun, sed tria ŝtono faligis ankoraŭ iun el la malaltuloj. Nao foriris; la malaltuloj postiris lin, sed de malproksime. La ulamroj kuris pli ol duontago. Kiam ili ekstaris, la malaltuloj jam ne estis videblaj.

La tero estis malseka, aperis apudakvaj bestetoj. La bataluloj manĝis rapide, kaj ekiris, ĉar ili volis foriri el tiuj ĉi danĝeraj lokoj.

Iom da tempo ili pensis ke la tero jam ne estas tiel malseka kiel antaŭe, sed denove aperis marĉetoj. Proksimiĝis nokto. Suno malsupreniĝis. La ulamroj iris ĝis kiam la vojo ĉesis esti videbla. Tiam ili ekstaris.

Ili kunigis iom da ŝtonoj kaj arbaĵoj. La gardejo estis bona, sed fajron ili ne bruligis. Ili atendis iujn okazaĵojn.

La nokto foriris. La malaltuloj ne videblis.

Antaŭ si la ulamroj ekvidis grandegan marĉon. Se la ulamroj deiros de ĝia bordo, ili denove renkontos la malaltulojn. Por trovi eliron oni devas iri inter la herbejo kaj la marĉo. Ili ekiris tiun ĉi malpli danĝeran vojon.

Ĝi ne estis malbona. Aperis arbetoj kaj arboj. Nao ne sciis, kaj ne povis scii ke la malaltuloj pririgardas ilin. Li pensis ke, se ili postiras la ulamrojn, ili estas malproksimaj.

La bestaĵo estis formanĝita. La ulamroj proksimiĝis al bordo kie marĉaj bestoj estas multaj.

Iun grandan birdon ili preterrigardis (preter'rigard'is): ĝi forflugis de ili. En riverto Gavo kaptis etan **fiŝon**, Nao trapikis negrandan birdon. Ili faris fajron el sekaj brulaĵoj. Aperisodoro de bongusta manĝo. Subite ilin preterkuris du bestoj; Nao komprenis ke ili forkuras de iu danĝero. Li ekstaris, kaj ekvidis proksimiĝantojn.

– La malaltuloj venis, – diris Nao.

Inter la malaltuloj kaj la marĉo estis tero tre bona por forkuro. La ulamroj rapide kunprenis siajn havaĵojn. Nao pensis ke, se ne okazos io malbona, ili ankaŭ nun forkuros facile. Sed malfacilaĵoj jam atendis ilin. La vojo eniris la marĉon. Oni devis aŭ reveni (re'ven'i) aŭ atendi... Sed kion?! Ekestis danĝere. Se la malaltuloj fermis la eniron,

forkuro estos neebla. Ĉu oni faris bone lasinte la mamutojn?

Sed la timo estis nelonga. Oni devis rapide eliri el la kaptejo. Ene de la marĉo, ne tre proksime, videblis tero ĉirkaŭita per akvo. Gavo kaj Nao eniris la marĉon, sed trairo okazis neebla. Restis nur vojo revena. La ulamroj ekkuris reen, sed ekstaris antaŭ kreskaĵejo. Kamo, kiu kuris antaŭe kriis:

– Tie estas malaltuloj!

Nao prenis ŝtonojn, kaj ĵetis ilin en lokon kiun montris Kamo. Malforta bruo diris al li ke vere, tie troviĝas malamikoj. Forkuro ekestis neebla. Oni devis pretiĝi al batalo aŭ, pli bone, fari gardejon sur tiu fermita loko el kiu ili volis forkuri. Netrairebla marĉo kaj lumo de fajro gardos ilin de neatendaĵoj (ne'atend'aĵ'o'j). La ulamroj elkriis batalan krion:

– Ni estas fortaj kiel ursoj, kaj tre rapidaj! Se la malaltuloj batalos, ili perdos multe da batalantoj! Ĉiu el ni povas mortigi dekon da malaltuloj! – kriis Nao. – Ĉu malaltuloj volas perdi tridekon da batalantoj por mortigi nur tri ulamrojn?!

De ĉiuj flankoj ili ekaŭdis batalajn kriojn. La malaltuloj volis batali.

Jes, ankaŭ ulamroj farus samon. Ankaŭ ili mortigis kiujn proksimiĝis al iliaj teroj. Maljuna Guno diris: «Estas pli bone lasi vivon al lupo aŭ urso ol al homo. Homo, kiun vi ne

mortigis, venos kun aliaj homoj por mortigi vin».

Nao ekiris al la kreskaĵoj. De tie ekflugis ĵetpikiloj, sed neniu el ili trafis Naon.

– Manoj de malaltuloj estas malfortaj! Tio estas manoj de infanoj! Nao povas mortigi ĉiun el ili per unu bato!

Aperis kapo. Nao, por montri sian forton, ĵetis ŝtonon. Ekaŭdiĝis mortokrio. Post tio Nao revenis al la loko kiu estis bona por tri homoj. Ĝi estis bona, ĉar la malaltuloj, se ili ekbatalos, ne povos batali kune, aŭ ĉirkaŭigi ilin.

La ulamroj kunigis sekajn brulaĵojn por la vespera fajro. Al ili restis atendi. Nur atendi.

El ĉiuj atendoj tio estis plej malfacila. Kiam ili sidis inter la ŝtonoj, ili sciis ke la tigregoj foriros. Ĝi volos manĝi, kaj foriros. Sed ĉi tie ilin ĉirkaŭis malaltularo saĝa kaj multnombra. Ne eblas neniigi ĝin. Tago post tago ili staros ĉe la marĉo. Kaj, se ili ekkuraĝos batali, kiel kontraŭstaros ilin tri, nur tri homoj? Jes, la uloj estas malfortaj: neniu el ili scipovas mortigi lupon per siaj manoj, neniu el ili povas trapiki tigron... sed trapiki homon ili scipovas.

Suno proksimiĝis al la marĉa akvo. Nao pensis pri la malaltuloj, pri batalo, pri forkuro. Iam li saltis kaj kaptis la batalilojn,



sed pensoj, sen kiuj homo ne povas resti viva pli ol unu tago, diris al li ke ne estas saĝe kuri al morto. Oni devas mortigi la malaltulojn unu post alia. Nao ne volis morti, li volis vidi Gamlan. Jes, li ne scias kiel li disbatos la malamikojn, sed li faros tion!

La malaltuloj aperis nur fine de alia tago. Venis nokto. Videblis fajroj de malaltuloj. Aperis kaj malaperis bataluloj; sed ili tenis sin malproksime.

Posta tago estis senfina. Malaltuloj aperis unuope aŭ multope; ili sciis ke ili devas nenigi la alvenintojn: se ili ne farus tion, ilin de longe malaperigus (mal'aper'ig'us) tiuj kiuj estas pli fortaj ol ili.

Ankaŭ dum tria nokto la malamikoj ne ekbatalis; ili estis malbruaj kaj nevideblaj. Ankaŭ iliaj fajroj ekestis nevideblaj. La malaltuloj aŭ ne bruligis ilin, aŭ forigis ilin malproksimen.

Antaŭ mateno ekaŭdiĝis iu bruo. Ĉu kreskaĵoj ekproksimiĝis al la ulamroj?! Kiam aperis lumo, Nao ekvidis ke la elirvojo estas fermita per multaj kunigitaj arbaĵetoj. Post la fermaĵo (ferm'aĵ'o) kriis kaj saltis la malamikoj. De tie ili povis ĵeti pikilojn, estante nevideblaj. De tie ili povis ekbatali subite kaj multnombre.

Ekestis pli danĝere. La ulamroj havis

malmulte da manĝo. Ili kaptis iom da fiŝoj, kaj da etaj marĉaj estaĵoj, sed la junaj homoj jam sentis malsaton. Kamo kaj Gavo, ankoraŭ ne tre sanaj pro siaj vundoj, malfortiĝis.

La kvara tago alportis nenion novan. Nao enpenŝiĝis. Jes, la malamikoj ne povas nun veni al ili, sed post iom da senmanĝaj tagoj la ulamroj estos malfortaj. Tial iliaj batoj estos malpli mortigaj.

Plej bone estus forkuri dum mallumo, sed por tio oni devas elpensi ion por preterkuri la malamikojn... ne, tio ne eblas.

Li rigardis ĉirkaŭaĵojn. Lumis luno. Flugis noktaj bestetoj kaj birdoj. Tio estis unu el tiuj vesperoj kiujn la ulamroj konis tre bone. Multajn noktojn sidis ili apud sia marĉo sub luna ĉielo. Nao ekmemoris iun (iu'n) el la noktoj:

Ulamraro sidas apud la fajro; maljuna Guno rakontas pri antaŭa tempo. Oni sentas odoron de prifajrita bestaĵo. Proksime, lumigita per luno, videblas la marĉo. Subite aperas tri junulinoj; ili preteriras Naon. Haroj de unu el ili tuŝas la junan ulamron. Tio estas haroj de Gamla... Ĉio malaperis.

Nao denove ekpensis kion fari. Li ekstaris, aldonis brulaĵon al la fajro, kaj ekiris al la fermaĵo. Dum la vespero ĝi denove proksimiĝis; eblas ke matene la malamikoj

ekbatalos...

Subite ekaŭdiĝis krio. El la akvo aperis... Sed kio estas tio, ĉu homo?! Jes, tio estis homo. El ĝia piedo iris sango.

La malaltuloj, kiuj ankaŭ ekvidis lin, ekkriis. Ekflugis ĵetpikiloj. Nao ne pensis pri tio ke ankaŭ la homo, eble, estas malamiko. Sentante nur malamon al la malaltuloj li kuris al la vundito, kiel li kurus al Kamo aŭ Gavo. Pikilo de malamikoj tuŝis lian manon. Nao kaptis la vunditon, kaj deiris. Ŝtono trafis lian kapon, sed Nao jam estis en loko sendanĝera.

Ankaŭ ĉi-vespere la malaltuloj ne kuraĝis albatoli.

Filo de Arbo kuŝigis la homon sur sekajn herbojn, kaj pririgardis lin. Jes, tio estis homo. Alia homo, tre alia homo, sed... sed homo. Tio ne estis ulamro, tio ne estis kzamo, tio ne estis malaltulo.

La homo kuŝis. Iam li malfermis la okulojn, kaj rigardis la ulamrojn. Iam li krietis. Kamo kaj Gavo rigardis lin malamike. Se ili povus, ili ĵetus lin en la akvon. Nao, pli scivola (sci'vol'a) ol liaj kunuloj, demandis sin de kie li venis, kiel li okazis en la marĉo, kiel ekestis vundita.

Li montris al la homo ke oni ne mortigos lin. Li montris la fermaĵon, por diri ke morto

venos de tie. La homo ekrigardis la estron, kaj eligis krion. Nao pensis ke la nekonato komprenis lin. La vundito iom ekstaris, kaj aligis herbojn por fermi la vundon.

Iom poste oni ekaŭdis laboron de malaltuloj. Ili ne dormis. Iuj el ili portis arbaĵojn, aliaj enigis ilin en la fermaĵon. Dufoje Nao ekstaris por ekbatali. Sed li sciis ke la malamikoj estas multnombraj kaj saĝaj, ke ili ĉiam rigardas lin. Tial li pensis ke pli bone estos atendi iun alian okazon.

Mateniĝis. La malaltuloj ĵetis iom da pikiloj kiuj falis apud la ulamroj. Proksimiĝis fina tago. Eblas ke nokte la malamikoj ankoraŭ proksimigos sian fermaĵon, kaj ekbatalos; sed la ulamroj, kiuj ne havas kion manĝi, estos malfortaj...

Kiam venis lumo oni pli bone ol antaŭe ekvidis ke la vundito estas ege malsama ol iu alia konata al ili homo. Subite li kaptis pikilon, kaj enigis ĝin en la akvon. Sur la pikilo aperis grandega fiŝo. Kamo kaj Gavo elkriis. Nun ili pensis ke la estro faris tre bone ke prenis la homon. La vundito kaptis pli kaj pli da fiŝoj. Jes, li estis bonega fiŝkaptisto.

Nun la junuloj ne pensis pri morto. Ili pensis nun ke ĉio iros bone: la estro trovos iun eliron. Nao ne pensis tiel.

Kiam suno ekiris malsupren, la ulamroj

ekvidis arojn da birdoj, kiuj flugis kriante. Jes, tie, malproksime, okazis io malbona. Ĉu arbarbrulo? Vespere aperis bestoj. Kuris herbermanĝuloj, lupoj, tigroj kaj hundoj. Iuj el ili ektrinkis. Tiam renoviĝis ĉiama vivbatalo. Nao atendis ke la kuranta bestaro forigos la malaltulojn, sed tio ne okazis: la bestoj preterkuris ilin.

Venis nokto. Ekvideblis lumoj de malamikaj fajroj. Subite, en la marĉa akvo, Nao ekvidis iujn bestojn. Ili proksimiĝis al la negranda teraĵo (ter'aj'o), troviĝanta ene de la marĉo. Kiam ili supreniĝis, Nao ekaŭdis iliajn kriojn, kaj komprenis ke tio estas malaltuloj. Jes, dum la ulamroj rigardis la bestojn, la malaltuloj venis ankaŭ ĉi tien. Sed kiel?

Nao ekvidis ke la vundito montras subakvan vojeton. Nun la ulamroj devis atendi ŝtonojn kaj pikilojn ankaŭ de tie.

Denove ekestis malbrue. Nao ne dormis. La malamikoj malrapide proksimigis la fermaĵon. Antaŭ mateno ili ekbatalos. La batalo estos malfacila.

En la fajron falis ŝtono. Ankoraŭ unu ŝtono. Sed la ŝtonoj estas malsekaj! La malamikoj ĉirkaŭigis ilin per iuj herboj... Kion fari? La fajro ekestis malpli kaj malpli forta. Ĉu ekbatali? Ŝtonoj falis kaj falis; la fermaĵo proksimiĝis. La ulamroj kaj la vundito ek-  
timis.

– Ĉu Kamo kaj Gavo estas pretaj? – demandis Nao.

Ne atendente respondon li eligis la batalan krion, sed...

– Sed fermaĵo de la malaltuloj sekiĝas sub suno jam kvar tagoj! – kriis Nao.

Li kaptis brulantan arbaĵon, kaj ĵetis ĝin en la fermaĵon. Kamo, Gavo kaj la vundito ekfaris samon. Flamo kaptis la fermaĵon. Duan fojon eligis Nao sian batalan krion. Nun ĝi estis pli forta ol la antaŭa.

– La ulamroj venkis hommanĝulojn, – kriis Nao, – ili venkos ankaŭ la malaltulojn!

Kiam la malaltuloj komprenis kio okazas, flamo manĝegis jam ilian fermaĵon. Flamo estis alta, ĝi lumigis ĉirkaŭaĵojn. Ekflugis birdoj, ekbruis lupoj kaj hundoj.

Subite la vundito, starante, montris ion. Ĉiuj ekvidis sur malproksima altaĵo lumon de fajro.

Matene la malaltuloj pli kaj pli videbligis sin. Ili kriegis, kaj montris de malproksime kiel ili trapikos la malamikojn, kiel ili disbatos iliajn kapojn. Ĉi-foje ili ne nur kunigis arbaĵojn, ne nur proksimigis ilin al la ulamroj, sed ankaŭ malsekigis la fermaĵon.

Suno staris jam alte, kiam la nekonatofiŝisto eksaltis kaj elkriis. Ekaŭdiĝis responda

krio. Malproksime, sur bordo de la marĉo, la ulamroj ekvidis lian samulon. Li staris tenante en la manoj iun nekonatan batalilon. Ankaŭ la malaltuloj ekvidis la homon. Opo da ili ĵetis sin postkuri la nekonaton. Sed la homo jam malaperis.

Nao pririgardis ĉirkaŭaĵojn. Iom da tempo li ankoraŭ povis vidi kiel la malaltuloj, kurentaj laŭ la bordo, malaperas en la kreskaĵoj. Duopo da ili revenis; poste ili denove malaperis kun dudekopo da aliaj bataluloj.

Nao komprenis ke io aliiĝis. Videblis ke la vundito-fiŝisto pensas same. Li rigardis kurentajn opojn da malaltuloj kaj, tempo de tempo, kriis ion. Ankoraŭ kvar opoj da malamikoj eliris, kaj malaperis en apudmarĉaj kreskaĵoj. Finfine inter la arboj ekvideblis trideko da ge'viroj (ge'vir'o'j) samaj al la fiŝisto. Poste Nao eksciis ke tio estas homoj kiuj nomas sin vaĥoj. La malaltuloj ĉirkaŭis ilin de tri flankoj. Estiĝis (est'iĝ'is) batalo. Vaĥoj ĵetis la pikilojn ne per la manoj, sed per iu ilo, kiun la ulamroj neniam vidis antaŭe. Pikilo ĵetita per tiu ĉi ilo flugis multe pli malproksimen ol ĵetita permane.

Falis multaj malaltuloj, sed al la batalloko venis kaj venis malaltuloj aliaj. Kelkaj el tiuj kiuj staris kontraŭ la ulamroj ankaŭ ekkuris tien.

La malaltuloj batalis sentime, ne kiel ili

kontraŭstaris (kontraŭ'star'is) la ulamrojn. Kial? Eblas ke ili bone konis vaĥojn, eblas ke la kialo (kial'o) troviĝis en la delonga malamo.

Nao komprenis ke venko de la malaltuloj venigos morton al la ulamroj, ke ankaŭ li devas batali. Sed kion fari pri la fajro? Ĉu lasi ĝin? Oni ne povas kunpreni la fajroportilojn en batalejon. Sed, de alia flanko, kune kun venko venos fajro, kune kun malvenko venos morto.

La ulamroj elkuris el sia gardejo. Ekflugis ĵetpikiloj, sed la batalantoj rapide alkuris la fermaĵon. Tie ili trovis dek-duon (dek du; dek-du'o'n) da malamikoj.

Nao ĵetis en ilin ĵetpikilojn, pikis per la pikilego, batis per la batilo. Tri malaltuloj mortis antaŭ ol ekbatalis Kamo kaj Gavo.

Pikilbatoj de malaltuloj estis ege rapidaj, tial ankaŭ la ulamroj ekestis vunditaj, sed ne danĝere, ĉar la batoj estis malfortaj, kaj venis de malproksime. Triopo da batiloj disdonis morton.

Kiam la malaltuloj ekvidis ke iliaj kunbatalantoj falas kaj falas, ke al la ulamroj kuras ankaŭ ilia vaĥo, ili ekforkuris. Nao mortigis ankoraŭ duopon da malaltuloj; aliaj malaperis en kreskaĵoj. Nao ne havis tempon postkuri ilin: li rapidis aliĝi (al'iĝ'i) al la



vaĥoj.

Dume tie komenciĝis batalo homo-kontraŭ-homa. Ne multaj vaĥoj scipovis forkuri el ĝi. Kiuj faris tion, ĵetis siajn pikilojn de malproksime. Sed kiuj ne forkuris, ekestis en granda danĝero: la malaltuloj estis multnombraj, kaj videblis ke ili venkos.

La ulamroj bonege komprenis tion; ili kuris al la vaĥoj tiel rapide kiel ili povis. Antaŭ ol Nao venis al la batalloko, dekduo da malaltuloj, kaj deko da geviraj vaĥoj jam kuŝis mortaj.

Batalkrio de Nao estis forta kiel tiu de tigro. Lia grandega batilo disbatis kapojn de la malamikoj. Ankaŭ antaŭe la malaltuloj timis lin, sed ili ne pensis ke Nao estas tiel forta. Antaŭ ol ili komprenis kio okazas, Kamo kaj Gavo ankaŭ ekbatalis ilin.

Vaĥoj, kiuj ne atendis alkuron de la ulamroj, denove ekĵetis (ek'ĵet'is) siajn malproksimen flugantajn pikilojn. La malaltuloj ne eltenis tion. Iuj el ili forkuris, sed aliaj, laŭ ordono de sia estro, ĉirkaŭigis lin, tenante en la manoj pikilojn.

Denove ekflugis ĵetpikiloj. Ankaŭ Nao prenis kuŝantajn sur la tero pikilojn kaj ŝtonojn por ĵeti ilin sur la malamikojn.

La malaltuloj komprenis ke, se ili ne ekbatalos permane, oni mortigos ilin. Tial ili

ekkuris al la vaĥoj, kaj tiuj ekforkuris. Se ili kurus kiel ulamroj, la malaltuloj ne kaptus ilin, sed vaĥoj estis malfortaj, ili kuris tre malrapide. La malaltuloj mortigis ilin unu post alia, kaj ankoraŭfoje venko ekestis sur flanko de la malaltuloj.

Nao, staranta flanke, pririgardis iron de la batalo. Estro de la malaltuloj estis homo pli forta ol aliaj; Nao ekvolis neniigi lin.

Dekkvino da batalantoj ĉirkaŭstaris la estron. Sentimo pli forta ol mortotimo ĵetis la ulamron en la batalon. Ĉio disfalis sub lia batilo. Ankaŭ pikilegojn de la malamikoj, kiuj iom vundis lin, li forigis per siaj batoj. Alkuris aliaj malaltuloj. Tiam Nao alkriis siajn kunulojn, per ĉiu sia forto disigis la gardantojn, kaj disbatis kapon de la estro. Alkuris Kamo kaj Gavo.

Senestraj malaltuloj ekforkuris. Ili kuris ne rigardante malantaŭen. Ili kuris al siaj teroj, al siaj marĉoj kaj riveroj.

Trideko da vaĥaj (vaĥ'a'j) viroj kaj virinoj kuŝis sur la tero. Tre multe da sango, disbatitaj kapoj, manoj kaj piedoj videblis ĉirkaŭe. Iuj el la vunditoj mortos ĝis la vespero, aliaj povos vivi ankoraŭ iom da tagoj; plimulto da ili estis resanigeblaj. Sed ankaŭ Nao komprenis ke malamikojn tiel danĝerajn oni devas neniigi. Liaj junuloj kaj la vaĥoj jam faris

tion. Tio ne prenis multe da tempo.

La vaĥoj ekis resanigi siajn vunditojn. Nao vidis ke ili faras tion multe pli bone ol ulamroj. Sed en ĉio alia ili estis malpli bonaj.

Ili estis tre malrapidaj. Por suprenigi unun vunditon ili kunigis fortojn de du aŭ tri homoj. Iam ili subite ekis stari, farante nenion.

Virinoj estis iom pli rapidaj kaj saĝaj. Loĝante inter vaĥoj Nao ekvidis ke ilia estro estas virino. Sed ankaŭ virinoj estis malrapidaj. Sur iliaj kapoj videblis senharaĵoj. Nao ekmemoris harojn de ulamraj inoj, harojn de Gamla...

Iom da virinoj kaj du viroj pririgardis vundojn de la ulamroj. Ili faris tion trankvile. Sangon ili forigis per bone odorantaj kreskaĵoj. Tio montris ke vaĥoj kaj la ulamroj estas de nun amikoj.

Post ioma kunvivo kun vaĥoj Nao trovis ke ilia volo batali estas malpli alta ol tiu de ulamroj, de malaltuloj aŭ de hommanĝuloj.

Antaŭuloj de vaĥoj scipovis prilabori ŝtonojn kiam aliaj homoj ankoraŭ ne scipovis tion. Tiam vaĥaro estis aro plej forta. Ĝi havis multajn herbejojn kaj arbarojn. Ankaŭ lingvo ilia estis pli multvorta kaj multpensa ol tiu de aliaj homoj. Ili multiĝis rapide. Sed io okazis. Kialon (kial'o'n) ili ne konas.

Ili ekestis malpli fortaj, malpli rapidaj. Ilia lingvo ekestis samvorta al lingvoj aliaj kaj, post iom da tempo, ĝi ekestis malpli-vorta. Ankaŭ bataliloj iliaj ekestis ne tiel bonaj. Sed plej malbone estis tio ke la homoj ekestis malpli saĝaj.

Ili manĝis malmulte, dormis tre longe. Iam, dum malvarmaj tagoj, ili trovis sin en ursdormo (urs'o'dorm'o).

Virinoj malfacile naskis unu aŭ du infanojn. Kreskigi ilin estis tre malfacile. Plimulto da virinoj restis seninfanaj. Sed ili faris batalilojn, fiŝkaptis, batalis same kiel viroj.

Iom post iom pli fortaj malamikoj forigis ilin de iliaj iamaj teroj. Multaj vaĥoj estis neniigitaj per malaltuloj kaj kzamoj. Vaĥoj vivis, dormetante, kun restaĵoj da sia iama saĝo kaj forto.

Ili loĝis apud marĉoj kaj akvejoj; kaj iam en grandaj kavernoj, kiujn faras subtera akvo. Malfortaj kaj malrapidaj, ili ne iris batali. Sed ili scipovis vivi estante nevideblaj al la malamikoj. Neniu besto povis forigi siajn spurojn tiel bone kiel vaĥoj. Iliaj loĝejoj estis netroveblaj ne nur por homoj. Ankaŭ hundoj kaj lupoj ne scipovis trovi ilin.

Ili, timuloj kaj malfortuloj, fariĝis sentimaj nur kiam vivo de iu el ili okazis en danĝero. Iam tio faris ilin nevenkeblaj. Ankaŭ nun ili eliris el siaj subteraj loĝejoj nur por ke

ilia kunulo, kiun prenis Nao, ne estu mortigata per la malaltuloj.

Nao, post kiam oni prilaboris liajn vundojn, revenis al loko kie li lasis siajn fajrojn. Ili ankoraŭ estis vivaj. Ne, li ne timis perdi fajron, ĉar fajroj de malaltuloj ankoraŭ brulis. Sed li travivis tiel multe por tiuj ĉi flametoj!

Li alportis la fajroportilojn en la vaĥejon. Vaĥoj rigardis ilin, kaj ne komprenis. Nao permane rakontis al la estrino pri tio kiel liaj samuloj perdis fajron, kiel li, Nao, denove albatis ĝin, sed ankaŭ ŝi komprenis nenion.

«Ĉu ne estas tio», – pensis Nao, – «homoj kiuj ne konas fajron, kiuj ne povas varmigi sin dum malvarmaj tagoj, forigi malumon, fari bonajn manĝaĵojn?». Maljuna Guno diris ke tiuj homoj vivas pli malbone ol lupoj, ĉar ili ne havas lupajn sentojn.

Por instrui vaĥojn Nao montris al ili kiel per eta fajro el fajroportilo oni faras grandan vesperan fajron... Sed subite li ekvidis virinon kiu batas per unu ŝtono ŝtonon alian. Kaj... kaj tio ekflamigis etajn brulaĵojn! La virino aldonis al la flameto brulaĵojn pli grandajn, kaj antaŭ ŝi aperis fajro.

«Vaĥoj tenas fajron en ŝtonoj!» – pensis Nao.

Li proksimiĝis al la virino por pli bone pririgardi kion ŝi faras. La virino ektimis, sed ŝi ekmemoris ke tiu ĉi homo forigis de ili for-

morton. Ŝi donis al li la ŝtonojn. Ili estis malvarmaj. Nao redonis la ŝtonojn kun sento de timo kaj maltrankvilo: kial flamo kiu troviĝas en la ŝtonoj ne varmigas ilin?!

Vaĥoj kaj la ulamroj iris tra lando de akvoj. Akvo staris en marĉoj, kie kreskis marĉaj kreskaĵoj, en akvejoj grandaj kaj etaj, ĝi kuris en riveroj kaj riveretoj. Ĝi aperis el sub tero, eniris ĝin, falis de altaĵoj.

Vaĥoj sciis ke Nao iras al vespera suno. Ili iris kune kun li, ĝis fino de sia lando, por montri al tiuj ĉi tre amikaj homoj vojon plej sendanĝeran. Lokojn ili konis bonege. Iam ili iris sur vojetoj kiujn trovus neniu aliulo. Iam ili faligis arbojn por veni sur alian bordon. Iam ili kunigis bordojn de rivero per longaj kreskaĵoj. En akvo ili sentis sin kiel fiŝoj, se tie ne troviĝis akvokreskaĵoj kiujn ili tre timis. Sed ĉion, kion ili faris, ili faris same al homo kiu tre volas dormi.

En ĉi-lokoj estis multe da manĝo, ĉar vaĥoj bone konis manĝeblajn kreskaĵojn. Sed plej bone ili scipovis fiŝkapti. Ili trapikis fiŝojn, kaptis ilin permane, alvenigis per noktaj fajroj.

Vespere, sidante ĉirkaŭ sia fajro, tre proksime unu al la alia, ili kantis longajn kantojn pri siaj iamaj forteguloj-sentimuloj. Nao ne komprenis tiun ĉi proksimiĝon, kaj

malamis la kantadojn. Sed li ĉiam rigardis ilian fiŝkaptadon, serĉon de manĝeblaĵoj, kaj la fajroeligon.

Nao konatiĝis ankaŭ kun iliaj bataliloj. Vaĥoj montris al li ĉion kion li volis vidi. Foje, kiam unu el ili perdis sian pikilĵetan ilon, oni faris alian antaŭ okuloj de Nao. Estrino donis al li unun el la faritaj iloj, kaj Nao ellernis ĵeti per ĝi pikilojn ne malpli bone ol vaĥoj, sed multe pli malproksimen.

Sed la fajroŝtonojn li ne povis kompreni. Li timis ilin. Fajroeligon li rigardis nur de malproksime. Sed iom post iom la timo malaperis. Nao ellernis dekon da vortoj, kaj komprenis ke vaĥoj ne enigis fajron en la ŝtonojn, ke fajro loĝas ene de ili. Fajro, kiu aperas dum la batoj, jam scipovas manĝi brulaĵojn, sed ĝi estas ankoraŭ tre malforta. Li eksciis ankaŭ ke ĉi tiujn ŝtonojn oni povas trovi surtere.

Kiam li komprenis ke ne vaĥoj sed la ŝtonoj donas fajron, li trankviliĝis. Ankaŭ li batis ilin, sed fajro ne eliris.

Foje vaĥoj noktis sur bordo de granda akvejo. Vespero estis seka. Vaĥoj sidis apud la fajro. Nao kunigis tre sekajn kreskaĵojn. Li forte interbatis la ŝtonojn, tiel forte, ke unu el ili disfalis, kaj... sur unu el la kreskaĵetoj aperis flamo! Ekbrulis ankaŭ aliaj kreskaĵetoj, kaj antaŭ Nao aperis fajro. Nao kompre-

nis ke li ekhavis forton kiun havas neniu ulamro. De nun neniu mortigos fajron de liaj samuloj.

Vaĥoj trairis varmajn malaltaĵojn, kaj eniris arbaregon. Kiam arbarkreskaĵoj ne donis al ili iri, vaĥoj trahakis vojon per siaj ŝtonaj hakiloj. La estrino komprenigis al Nao ke post la arbarego ili disiros. Lokojn postarbarajn vaĥoj ne konis. Ili sciis nur ke tie troviĝas lando malaltkreskaĵa (mal'alt'kresk'aĵ'a), ke post ĝi staras montoj disigitaj per intermontejo. Tie homoj ne loĝas. Sed ĉi tie, en la arbarego, oni povas renkonti grandegajn multharajn homojn, kiuj ne konas fajron, ne parolas, kaj ne albatalas. Sed ili estas ege danĝeraj, se oni albatalas ilin, aŭ se oni fermas al ili vojon.

Iumatene (iu'maten'e) la arbarego ekestis iom pli luma. Ekvideblis bestvojetoj. Birdoj ekestis pli multnombraj. Multegaj bestoj kaj bestetoj vivis ĉi tie. Foje estrino montris al Nao iun arbon, apud kiu li ekvidis homon. Li ekmemoris malaltulojn, kaj ekmaltrankviliĝis (ek'mal'trankvil'iĝ'is). La homo malaperis. Ekestis malbrue. Vaĥoj ekstaris kaj kuniĝis; tiam ekparolis plej maljuna el ili. Li rakontis pri forto de multharaj grandeguloj. Oni ne devas iri samvoje kun ili, aŭ trairi ilian noktejon: ili malamas tiun ĉi iron kaj bruon.



- Patroj de niaj patroj loĝis senbatale apud ili. En la arbarego ili donis vojon al multharuloj (mult'har'ul'o'j); multharuloj lasis vojon al vaĥoj, se ili renkontiĝis sur marĉoj.

La estrino suprenigis sian pikilegon, kaj la vaĥoj ekiris laŭ alia vojo.

Iom poste ili venis al loko forbruligita per ĉielfajro. Tie Nao denove ekvidis multharulon. Oni ne povis diri ĉu ĝi iras sur du aŭ sur kvar piedoj. La kapo estis grandega. Multegaj haroj ĉirkaŭkreskis ĝin. Rigardante la homojn la multharulo ekmuĝis. Aperis aliaj samestuloj. Tio estis tri viroj, deko da inoj, kaj iom da etuloj.

Unu el la viraj multharuloj estis tiel granda, ke li povus per siaj manoj kapti kaj mortigi tigron. Li ne havis batalilojn. La virgrandegulo alvenis la vaĥojn kaj la ulamrojn; li staris kaj batis sin per sia mano; aliaj samuloj staris flanke, kaj muĝis.

Laŭ montro de la estrino la vaĥoj malrapide kaj senbrue reiris. Nao faris samon. Sed ne Kamo kaj Gavo, kiuj troviĝis iom antaŭe. Ankaŭ ili volis reiri, sed fam ne povis.

Gavo ĵetis sin for el la senarbejo, Kamo ekkuris sur ĝi. Li kuris tiel rapide, ke ankaŭ li forkurus, sed unu el la inoj fermis la vojon. Kamo forsaltis flanken. Tiam lin ekpostkuris du viregoj. Kamo falis. Grandegaj manoj kap-

tis kaj suprenigis lin.

Ĉio okazis tiel rapide, ke Kamo ne havis tempon por ekbatali. Nun, en manegoj de la multharulo, li sentis sin kiel eta herbmanĝulo en piedegoj de tigro.

Li sciis ke Nao estas malproksima, kaj ne havos tempon veni al li; tial, farante nenion, li atendis morton. Nao ne povis trankvile rigardi la okazaĵon. Li kaptis la batilon kaj la pikilon por ĵeti sin al la multharulo, sed estri-no ne donis al li fari tion:

– Staru, – diris ŝi.

Ŝi donis al li kompreni ke post unua lia bato Kamo ekestos morta.

La multharulo tenis junulon alte. Li jam disbatus lian kapon kontraŭ iu arbo, sed... sed li ekrigardis la junulon, kaj malrapide kuŝigis lin sur la teron. Se la junulo ekfarus ion, la manegoj denove kaptus lin. Venis ĉiuj multharuloj: viroj, inoj, etuloj. Ili komprenis ke Kamo estas per io sama al ili. Al malaltuloj aŭ kzamoj tio dirus ke oni devas mortigi la homojn surloke, sed pensoj de multharuloj estis malfortaj; ili ne iris al bataloj aŭ bestkaptadoj, ili ne manĝis bestaĵon, kaj ne havis malamikojn. Jes, ili malamis bestmanĝulojn kiuj iam manĝegas iliajn malsanulojn aŭ infanojn; jes, tempo de tempo okazis kontraŭstaro inter la viroj, sed ili neniam mortigis unu la alian, aŭ iun herbmanĝulon.

Multharuloj staris, rigardante kuŝantan Kamon, kaj... trankviliĝis. Trankviligis ilin tio ke ilia estro ne ekbatis la junulon. Se Kamo volus, li povus nun vivi inter la multharuloj. Li komprenis ke la danĝero malaperis, eksidis kaj atendis.

Iom da tempo homoj-multharuloj pririgardis lin. Poste unu el la inoj ekvidis bongustan kreskaĵon, kaj ekmanĝis ĝin; viro eligis ion el la tero. Iom post iom multharularo ekmanĝis, jam ne pensante pri Kamo. Ĉar ili manĝis ne ĉiujn kreskaĵojn, serĉo de manĝo prenis multe da tempo. Kamo ekstaris, kaj ekiris al Nao.

Post tiu ĉi danĝera okazaĵo Kamo, se li povus, mortigus la multharulojn. Sed ne Nao. Nao pensis nur ke, se la multharuloj volus, ili facile venkus malaltulojn, vaĥojn, kzamojn kaj ulamrojn...

Delonge jam foriris Nao kaj liaj kunuloj de vaĥoj, de arbaraj multharuloj, kaj de la arbarego. Tra la intermontejo ili supreniris surmontajn herbejojn. Tie estis malvarme. La malvarmo mortigis sennombrajn bestetojn, loĝantajn en tero, inter ŝtonoj, sur herboj. Dum senstelaj noktoj senĉese muĝis lupoj, bruis hundoj, aŭdiĝis antaŭmortaj krioj de herbmanĝuloj. Foje la ulamroj vidis en malumo okulojn de tigro, ĉirkaŭiranta ilian fa-

iron. Vivo iĝis timiga.

Kun veno de malvarma tempo malpliĝis kreskaĵoj. Herbmanĝuloj serĉis manĝon disigante teron aŭ prenante manĝeblaĵojn de arboj. Malfacile estis al ĉiuj kiuj ne antaŭkunigis (antaŭ'kun'ig'is) manĝon en siaj subteraj loĝejojn, aŭ ne ekdormis.

La ulamroj havis kion manĝi. La longa muldanĝera vojo plifortigis ilin, pligrandigis iliajn sciojn kaj ilian antaŭvidon. Nun ili scipovis per unu rigardo trovi plej bonan vojon por forkuro, sendanĝeran noktejon, lokon por eki batalon. Nun ili, same al malproksimen flugantaj birdoj, bonege sciis kien iri. Irante tra akvejoj, marĉoj, arbaretoj kaj montoj, ili ĉiutage proksimiĝis al lando de ulamroj. Ili jam pensis ke venos tien ĝis tempo grandluna.

Kaj jen ili venis al loko tre alta kaj eniris interŝtonegejon (inter'ŝton'eg'ej'o'n). Nao rekonis ĝin: iam, kiam li estis juna kiel Gavo, li iris ĉi tie kun aro da bestkaptuloj. Tiu ĉi interŝtonegejo finiĝis per multŝtona malsupreniro.

Dum posta tago la ulamroj trairis la interŝtonegejon, kaj eksidis por tagmanĝi. Ĉi tie oni aŭdis bruon de negranda rivero: akvo falis malsupren. Videblis du mallumaĵoj: tio estis eniroj en longajn kavernojn.

Post la manĝo Nao ekiris al unu el ili, kaj

longe pririgardis ĝin. Li ekmemoris ke ĉi tie Faumo montris al siaj bataluloj ne tre longan vojon malsupren. Pro multaj ŝtonoj ĝi estis ne tre bone trairebla, sed tri homoj povas trairi facile. Nao ekiris. Li eniris la malluman kavernon, kaj iris ĝis ekvidis lumon. Post tio li revenis.

– Urso, granda urso!... – diris Kamo.

Pro forta muĝo li ne finis la parolon. Inter la ŝtonoj Nao ekvidis Gavon, sidantan kiel sidas ulamraj bataluloj atendantaj malamikon.

Aperis duopo da grandegaj bestoj. Tre multharaj feloj bone gardis ilin de malvarmo, de pikaj ŝtonoj kaj kreskaĵoj. La kapoj estis grandegaj. Ili iom memorigis multharajn arbarajn homojn.

– Jes, – diris Nao, – tio estas ursoj-grandeguloj.

La bestoj estis ege fortaj, sed ne tre danĝeraj. Danĝeraj ili estis nur kiam ili ne havis manĝon, aŭ kiam ili estis vunditaj.

La ursoj ekmuĝis. La virbesto suprenigis la kapon.

– Ĝi estas vundita, – diris Kamo.

Sur hararo de la besto videblis sango. La ulamroj ektimis: ĉu ne estas la vundo farita per manoj de homo? Se jes, la besto batalos. Se ĝi ekas batali, ĝi batalas ĝis venko. Ĝia fortega felo bonege gardas ĝin kontraŭ homaj

bataliloj.

– De kie ili venis? – demandis Nao.

– Ili trairis ĉi tie, – diris Gavo, montrante arbetojn. La virurso malsupreniĝis de unu flanko, la ursino – de flanko alia.

La bestoj jam fermis reiran vojon. Ili proksimiĝis por batali. Tion oni sentis laŭ ilia muĝo. La ursoj longe odorsentis ĉirkaŭaĵojn por pli bone ekkoni la malamikojn, sidantajn post la ŝtonoj.

Kiam la ursoj venis al la loko, la ulamroj troviĝis (trov'iĝ'is) jam en la kaverno. Kamo kaj Gavo iris antaŭe; la homoj rapidis, sed la vojo ne estis irebla facile. La ursoj, enirantaj post ili, iris singarde. Iam ili staris. Ili ne timis beston aŭ homon; ili timis nekonatajn aĵojn. Ili bonege (bon'eg'e) memoris ŝtonojn, falantajn de montoj, kaj lokojn, de kiuj oni povas fali suben. Mamutoj, tigroj aŭ aliaj bestoj neniam albatis ilin, sed fortoj de ĉirkaŭaĵo multfoje danĝerigis iliajn vivojn. Ili memoris kaj subitan aperon de rapidega akvo, kiu iam kaptis ilin, kaj ŝtonojn, kune kun kiuj ili falis malsupren.

Ĉi-matene (ni diras «ĉi tie»; sed «ĉi-matene») ilin unuafoje albatis homoj. Danĝero venis de supro de tiu alta ŝtonego, kiun bestoj ne scipovas suriri. Tri dupieduloj staris tie. Ekvidante la ursojn ili ekkriis, kaj ĵetis pikilojn. Unu el ili vundis la virbeston. Ĝi

ĵetis sin al la ŝtonego, sed kiam ĝi komprenis ke tio donas nenion, ĝi ekserĉis ĉirkaŭvojon. Laŭvoje ĝi eligis el si la pikilon; tiam ĝi eksentis odoron de homoj. Ankaŭ antaŭe la urso renkontis ilin, sed ĝi ne pririgardis homojn, same kiel ĝi ne pririgardis lupojn aŭ hundojn. Homoj ĉiam donis vojon al ĝi; ĝi sciis nenion pri iliaj forto kaj saĝo. Sed de nun homoj ekestis por ĝi io alia. Kiam la urso jam ĉesis pensi pri la okazaĵo, kaj ekserĉis manĝon, denovaodoro de homoj memorigis al ĝi ĉion. Ĝi ekmuĝis por ke la ino venu al ĝi; kune ili ekpostiris la ulamrojn.

En mallumo de la kaverno estis malfacile vidi ion, sed Nao bone aŭdis iron de la bestegoj. La iro estis facila al ili, sed ne al la homoj. La ulamroj ne povis iri rapide, ĉar ili portis batalilojn, manĝaĵojn kaj la fajroporcelojn, de kiuj Nao ne volis disiĝi. La homoj falis, batiĝis kontraŭ ŝtonoj.

La flamo estis malforta, ĝi malbone lumigis la vojon, sed bonege lumigis la forkurantojn.

– Rapidu, rapidu! – kriis la estro.

Sed ankaŭ sen tio Kamo kaj Gavo kuris tiel rapide kiel ili povis. La bestegoj proksimiĝis. Ilia muĝo forte aŭdiĝis en la kaverno. Post iom da tempo la bestegoj okazis tre proksimaj.

Nao ekstaris, kaj montris al la urso la

flameton. Ankaŭ la besto ekstaris, sed, post nelonge, ĝi ĵetis sin sur la homon. Nao de-saltis, kaj ekbatis per la fajroportilo okulojn de la bestego. La flamo vundis unu okulon; kiam la urso komprenis kio okazis, Nao estis jam pli malproksima.

Aperis malforta elirlumo. Nun la ulamroj vidis teron sub siaj piedoj, kaj kuris pli rapide. Sed ankaŭ la ursoj ekrapidis.

Filo de Arbo pensis pri tio ke post la kaverno la danĝero ekestos ne malpli, sed pli granda. La virbesto pensis nur pri kapto de la homoj.

Nao volis jam ekbatali, sed Kamo, kiu kuris antaŭe, alkriis lin. Ankaŭ la estro ekvidis grandan ŝtonon, kiu iom fermis la eliron. La homoj povis eliri, sed ne la ursoj.

La virurso batiĝis kontraŭ la ŝtono, sed trairi povis nur ĝia kapo. La bestego ekmuĝis, sed de nun Nao jam ne timis ĝin. La ŝtono, pli forta ol cento da mamutoj, staranta ĉi tie pli longe ol miloj da homvivoj, fermis al la urso eliron. Nun Nao sentis sin pli forta ol la urso-grandegulo. Li havas batalilojn. Li povas vundi la beston; la besto povas fari nenion al li. Nao ekbatis, sed la urso forigis la kapon. Nun ĝi komprenis ke homo estas malamiko danĝera, kaj ke por neniigi ĝin oni devas havi ne nur forton.

La ursino, kiu ne estis vundita, ne povis



kompreni ke la malfortuloj vere povas esti danĝeraj. Homoj ankoraŭ ne faris al ŝi iun malbonon, tial ŝi muĝegis malantaŭe. Nao atendis kun la pikilo en la mano. Nun li tre volis batali. Sed la virurso ekestis nevidebla, la ursino foriris, kaj la estro trankviliĝis. Li pensis pri tio ke la tago finiĝas, ke ĝis la mallumiĝo oni devas malsupreniĝi.

Li eliris el la kaverno. La ulamroj ekvidis taglumon, ĉielon, vojon malsupren, kaj grandegan herbejon, kiu videblis sub iliaj piedoj. Jes, tio estas lokoj kiujn ili konis de sia infan tempo. Jam tiam ili trairis ĉi tiujn arbarojn, marĉojn, kreskaĵejojn kaj riverojn. Du tagoj da iro, kaj ili venos al bordo de Granda marĉo, kien ulamroj revenis ĉiam post siaj manĝoserĉaj aŭ porbatalaj foriroj.

– Post iom da tagoj ni vidos ulamraron! – diris Nao.

La triopo jam sentis tion. Ĉirkaŭaĵo (ĉirkaŭ'aĵ'o) ĉi tie estis alia ol kiu restis malantaŭ ili.

Nun la ulamroj memoris bonajn, nur bonajn tagojn kiujn ili travivis ene de sia ulamraro. Kamo kaj Gavo, kiujn antaŭe multfoje batis ulamroj pli fortaj ol ili, kaj ankaŭ ilia estro Faumo, nun sentis sin tre sendanĝeraj. Ili rigardis flametojn kiujn ili portas al ulamroj, kaj pensis pri tio kion ili travivis por ekhavi ilin.

Nao pensis pri tiu sia fajroportilo, kiun li ĵetis sur kapon de la urso. Sed ĉu li ne havas tiujn ŝtonojn, kiuj enhavas fajron, ĉu li ne scipovas eligi fajron el ili?! Jes... sed estus tiel bone se li gardus **tiun** flamon, tiun etan lumantan vivon, kiun li tiel malfacile forbatalis de kzamoj.

La malsupreniro ne estis facila. La ulamroj iris pere de siaj hakiloj kaj pikilegoj. Kaj, finfine, ili venis al la herbejo. La fina malfacilaĵo estas jam malantaŭ ili. Antaŭe kuŝas konata vojo. Nun ili povas ne pensi pri danĝeroj.

Proksimiĝis vespero. Nao iris al bone konata al li noktejo apud ne malpli bone konata rivero. Tago finiĝis. Aŭdiĝis lupaj kaj hundaj krioj. Grandaj aroj de la bestoj iris tien kaj reen apud proksima arbaro. Eblas ke ili venis ĉi tien postirante multnombrajn herbmanĝulojn. Sed eblas ke ili jam neniigis ilin, kaj ne havas nun kion manĝi.

La irantoj rapidis: la multnombraj lupoj kaj hundoj povis esti danĝeraj. La bestoj iris per du grandegaj opoj: laŭ unu flanko de la homoj iris lupoj, laŭ la alia – hundoj. Kaj tiuj kaj la aliaj postiris saman kaptajon, tial ili tempo de tempo staris unu kontraŭ la alia. Lupoj estis pli grandaj, kaj pli fortaj ol hundoj, sed la hundoj estis pli multnombraj. En proksimiĝanta mallumo bestaj okuloj iĝis pli

kaj pli lumaj.

Al muĝoj de la bestoj la ulamroj respondis per fortaj krioj, kiuj tenis bestojn iom malproksime. Sed lumo malfortiĝis, kaj la bestoj pli kaj pli proksimiĝis.

Antaŭe iris hundoj. Iuj el ili jam fermetis la vojon, sed nur por rapide desalti.

La lupoj, maltrankviligitaj per tio ke la hundoj povas depreni ilian kaptajon, ekiris al la hundoj. Proksimiĝis batalo.

Ankaŭ hundoj, sciantaj ke ili estas pli multnombraj, kuniĝis. En foriranta lumo la bestaroj ĵetis sin unu kontraŭ la alia.

Sed ne ĉiuj bestoj ekbatalis. Du ne etaj aroj postiris, kiel antaŭe, la ulamrojn. Finfine tiu postiro ekis maltrankviligi la homojn. En malluma vespero, ene de la malamikoj, ili ne sentis sin sendanĝeraj.

Antaŭe iranta hundo, granda kiel lupo, alsaltis Gavon. La juna batalanto ĵetis en ĝin pikilon; la hundo kun longa krio falis surteren. La ulamro finmortigis ĝin per la batilo. Pro krio de la hundo alkuris aliaj hundoj: ilia ar-sento estis pli forta ol tiu de lupoj. Kiam unu el ili okazas en danĝero, hundaro povas ĵeti sin ankaŭ sur fortan bestmanĝulon. Nao timis ke tio povas okazi nun. Li alkriis Kamon kaj Gavon: triope ili estis forto pli timiga. Sed muĝantaj hundoj ĉirkaŭigis ilin... Se unu el la hundoj ĵetos sin

sur la homojn, samon faros ankaŭ la aliaj, kaj tre rapide homaj restaĵoj ekkuŝos sur la herbejo...

Nao ĵetis la pikilon; ankoraŭ unu hundo falis trapikita. Nao kaptis ĝin, kaj ĵetis en la luparon. Sentante odoron de sango lupoj ĵetis sin sur la neatenditan kaptaĵon. Tiam hundoj ĵetis sin sur la lupojn.

La ulamroj ekforkuris; Nao jam vidis la riveron. Li montris ŝtonegon, starantan sur la bordo, kaj kriis:

- Nao, Kamo kaj Gavo ne timas nun hundojn kaj lupojn!

Tio, al kio ili venis, estis ŝtonego alta kiel kvin homoj. Supreniĝi oni povis nur de unu flanko. Nao, kiu bonege konis la lokon, supreniĝis rapide. Kamo kaj Gavo postiris lin. Ili okazis sur suprejo (supr'ej'o) kie kreskis iom da arboj. Tie estis loko por trideko da homoj.

Malsupre lupoj kaj hundoj neniigis unu la alian. Muĝoj kaj mortokrioj estis bone aŭdeblaj, sed la ulamroj sentis sin bone kaj sendanĝere. Ili ekbruligis fajron; la forta flamo lumigis ankaŭ la riveron. Malsupre, proksime al la ŝtonego, kreskis herboj kaj malaltaj arboj. Arboj videblis nur post kvin flugoj de ĵetpikilo.

La granda flamo maltrankviligis ĉiujn bestojn. Ekkriis kaj ekflugis birdoj, elsaltis el la

akvo longaj fiŝoj. Preterkuris, timante, altpikila besto.

La homoj konis sian forton. Ili nerapide manĝis prifajritan bestaĵon. Ulamraro estas proksima! Post du vesperoj ili vidos akvon de Granda marĉo. Kamo kaj Gavo ekestos grandaj batalantoj. Ulamroj scios pri iliaj forto kaj sentimo. Oni timos ilin. Nao havos Gamlan, kaj estos dua post Faumo estro.

Jes, pensoj de la junuloj estis iom mallongaj, sed ne iliaj sentoj. Ĉu estas vero ke iam iliaj vivoj finiĝos?! Morto estas ne pli ol iu timiga rakonto. Oni pensas pri ĝi nur dum danĝeroj; poste ĝi malaperas. Jes, iam, dum batalo, dum malvarmo, malsano, oni timas ĝin, sed, kiam tio malaperas, vivo denove iras bone kiel revero.

Forta muĝego ekaŭdiĝis el mallumo. Ekdiskuris bestetoj. Apud la arbaro aperis tigrigo. Oni de malproksime sentis ĝian forton. Ankoraŭfoje Nao ekvidis tigron-grandegulon. La bestego sciis ke ĉirkaŭaj vivuloj de malproksime sentas ĝian fortan odoron, kaj rapide forkuras. Plimulto da ĝiaj samuloj jam formortis pro malsato. Ankaŭ ĝi bonege konis tiun ĉi senton.

Nao staris alte, lia loko estis sendanĝera, sed li ektimis. Li kaptis la batilon kaj la ĵetpikilon. Kamo kaj Gavo ankaŭ estis pretaj al

batalo. Ili estis nevideblaj al la tigro.

Ĝi staris, rigardante tiun ĉi lumon, kiu ne estis lumo de tago. Iam tiuj ĉi lumoj kaj varmo postkuris ĝin en seka kreskaĵejo. Ankaŭ nun la besto sentis odoron de fajro, sed ne odoron de la homoj. La lumoj memorigis al ĝi nenion manĝeblan; la grandegulo denove ekmuĝis, kaj foriris.

– Neniu besto estas danĝera al ni! – kriis Nao.

Kamo ekrigardis duan bordon de la rivero, ĝis kiu venis la lumo, kaj diris:

– Filo de Arbo, tie estas homoj.

Malbonaj sentoj trafis la estron. Ĉiuj tri eksentis la samon. Sed sur la bordo videblis jam neniu. Oni aŭdis nur bruon de akvo, kaj tiun de kreskaĵoj.

– Ĉu vi vere vidis homojn?

– Jes, inter la arboj mi vidis du homojn, – respondis la juna batalulo.

– Ni estas en lando de ulamroj, – diris Nao, – vi vidis aŭ bestkaptulojn aŭ pririgardantojn (pri'rigard'ant'o'j'n), kiujn sendis Faumo.

Li ekstaris. Ĉu amikoj, ĉu malamikoj, homoj bonege scias kio estas fajro. Tra nokto ekaŭdiĝis lia krio:

– Mi estas Nao, Filo de Arbo! Mi albatalis fajron por ulamroj! Aperu senditoj

(send'it'o'j) de Faumo!

Sed ĉio restis senbrua.

– Aperu senditoj de Faumo, – denove kriis Nao, – ili rigardu kaj rekonu Naon, Kamon kaj Gavon. Ili sidu kune kun ni apud la fajro!

Ĉiuj tri ekstaris, lumigitaj per la fajro, kaj elkriis krion de ulamroj. Sed nokto respondis per malbruo. La malbruo antaŭdiris danĝeron.

– Tio estas malamikoj, – diris Nao.

Kamo kaj Gavo jam komprenis tion. La nova danĝero estis ege maltrankviliga, ĉar Granda marĉo estis proksima. Ĉi tie ili povis renkonti neniun alian ol samulojn.

Ĉu ulamrojn neniigis (neni'ig'is) homoj kiuj iam venkis Faumon? Ĉu ne povas esti ke vivas jam neniuj ulamroj? Antaŭ okuloj de Nao aperis Gamla, venkita aŭ mortigita... Nao sidis apud la fajro pensante kaj atendente.

Aperis luno. Ĝia lumo estis malforta, sed ion oni povis vidi. Forkuro, pri kiu pensis Nao, estis neebla, ĉar, povas esti, homoj kiuj troviĝas sur la alia bordo, estas multnombraj.

Nao ekaŭdis brueton. Rigardante mal-supren li ekvidis homon. Jes, tio estis ulamro, sed estus multe pli bone ekvidi hommanĝulon aŭ malaltulojn. Li rekonis multharan Ago-n.

Nao memoris ke Ago kaj liaj fratoj kontraŭstaris Faumon, kaj diris ke fajron alportos

ili. Ĉiuj timas ilin. Ĉiu el ili estas same forta kiel Faumo. Ago kaj liaj ursemanaj (urs'e'-man'a'j) fratoj estas same fortaj, same rapidaj kiel deko da bataluloj. Nao bone memoris tiujn kiujn ili mortigis aŭ vundigis porĉiame.

Kiel venki ilin? Li, Filo de Arbo, sciis pri sia forto ke ĝi estas same granda kiel tiu de Ago. Post tre multaj venkoj li ne povis pensi alie. Sed Kamo kaj Gavo... kontraŭ fratoj de Ago ili estas malfortaj.

Sed oni devas fari ion. Nun.

- Kamo malsupreniru unua, - ordonis Nao, - poste iru Gavo. Ili kunprenu la pikilojn; aliajn batalilojn mi alĵetos kiam ili estos malsupre. Fajroportilojn kunprenos mi.

Kamo kaj Gavo komprenis ke oni devas veni al ulamraro antaŭ ol tien venos Ago. Ili rapide kunprenis la pikilojn. Kamo ekis malsupreniri, Gavo ekiris post li. La malsupreniro estis pli malfacila ol la supreniro. Kiam Kamo estis jam malsupre, oni ekaŭdis krion de birdo kaj ursokrion. Rigardante malsupren Nao ekvidis alkurantan Agon. La multharulo estis rapida kiel ĉielfajro. Aperis ankaŭ du liaj fratoj.

Nao ne sciis kion fari, ĉu ĵeti al Kamo la batilon, ĉu ordoni al li supreniĝon. La junulo estas pli rapida ol la malamikoj, sed li devos kuri tre proksime al ili...

Nao kriis:



– Mi ne ĵetos batilon al Kamo. Kamo kuru al ulamroj por diri ke ni atendas ilin ĉi tie kun fajro!

Kamo faris kion oni ordonis al li, sed falis. Kiam li ekstaris, Nao, vidante ke la malamikoj estas proksimaj, ordonis al la junulo reveni.

Dum Kamo supreniĝis, unu el la fratoj ĵetis la pikilon, kaj trafis lian manon. Alia, kriante, alkuris por mortigi lin. Sed Nao estis preta. Kun granda forto li ĵetis ŝtonon.

La ŝtono disbatis piedon de tiu frato. La vundito malaperis en kreskaĵoj antaŭ ol Nao prenis de la tero duan ŝtonon. Kiam Ago forkuris pririgardi la vunditon, Nao donis manon al Kamo por suprenigi lin.

Nao staris, lumigita per luno kaj per la fajro, tenante grandan ŝtonon en la manoj. Li ekparolis unua:

– Ĉu Ago kaj liaj fratoj estas anoj de iu alia anaro? Kial ili albatis nin?!

Multhara Ago eliris el la mallumo, elkriis batalan krion, kaj respondis:

– Vi ĉiuj estos amikoj de Ago se vi fordonos al li la fajron. Se ne, li mortigos vin kiel hundojn!

– Nao forbatis fajron de hommanĝuloj! – kriis Nao, – ankaŭ vi havos fajron kiam Nao revenos al ulamraro!

– Mi volas havi fajron nun. Ago prenos Gamlan, Nao havos multon el tio kion venigas

bestkaptuloj (best'kapt'ul'o'j).

– Kial Ago prenos Gamlan? Ĉu li albatis fajron?!

– Ago estas pli forta ol Nao. Ago trapikos lin, kaj disbatos lian kapon per la batilo.

– Nao venkis ursegon kaj tigrinon, li mortigis dekon da hommanĝuloj, kaj dudekon da malaltuloj. Nao mortigos Agon!

– Nao malsupreniĝu!

– Se Ago venus unuopa, Nao kontraŭbatalus li!

– Neniu el vi vidos Grandan marĉon! – kriis Ago.

Venis malbruo. Nao rigardis siajn junulojn. Ne, ili ne estas tiel fortaj. Sed ĉu li ne vundis jam unun el la fratoj? Jes, Kamo estas vundita, sed unu el la fratoj jam ne scipovas postkuri la triopon.

Sango iris el vundo de Kamo. Nao fermis la vundon per fajrorestaĵoj kaj kreskaĵoj. Li rigardis la malamikojn, kaj pensis.

«Ago kaj liaj fratoj havas bonegajn aŭdkaj vidsentojn, sed kuras ili malpli bone ol Kamo kaj Gavo», – pensis Nao, – «nur mi estas samforta al Ago».

Nun li sciis kiel li batalos kaj forkuros. Antaŭ ĉio oni devas mortigi la fajron, por ke la fratoj, se ili venkos, ne ekhavu ĝin kaj Gamlan. Plej grandajn brulantaĵojn Nao forĵetis en la riveron; restaĵon li neniigis per

ŝtonoj kaj tero. Restis nur fajreto en unu el la fajroportiloj. Post tio la ulamroj ekis malsupreniri. Ĉi-foje unua malsupreniris Gavo. Li devis preni lokon sur tiu ŝtupo kiu troviĝas sur alto duhoma. De tie oni povas ĵeti pikilojn. La junulo faris tion, kaj malforte alkrietis la estron.

La fratoj pretigis sin al la batalo. Ago kun sia ĵetpikilo en la mano staris kontraŭ la ŝtonego; vundito, apud arbeto, tenis sian batilon; tria frato, nomo de kiu estis Ruko, troviĝanta plej proksime, iris tien kaj reen. Nao ĵetis sian pikilon, sed ĝi ne alflugis la homon. La ŝtono, ĵetita post tio, ankaŭ maltrafis.

– Filo de Arbo estas malsaĝa kaj senokula, – kriis Ruko.

Tiam Nao kaptis ĵetilon kiun donis al li vaĥoj. La frato, kiu pensis ke ankaŭ tio estas nur timigilo, ekrigardis alian flankon, por montri ke li ne timas. Tial li ne vidis la flugantan pikilon. Lia mano trapikiĝis, la batilo elfalis el ĝi. Multharaj fratoj ne povis kompreni kiel Nao faris tion.

Sentante timon antaŭ tiu ĉi batalilo, ili deiris. Ruko povis nun teni la batilon nur per unu mano. Nao kaj Kamo ekhavis tempon malsupreniĝi.

Ĉiuj ses homoj staris nun unu kontraŭ la alia. Nao ekiris tien kie estis loko inter la

fratoj. Ago fermis la vojon. Liaj okuloj senĉese rigardis Naon. Li scipovis bonege for-salti de ĵetpikiloj; tial li sentime proksimiĝis al Nao, sciante ke tiu maltrafos. Sed Nao ĵetis sin al la piedvundito. Ago kaj Ruko ankaŭ ekkuris tien, malfermante vojon por la forkuro.

– La fratoj ne havos fajron, – kriis Nao, – Gamlan prenos Nao!

La triopo ekkuris sur la herbejo. Vojo al ulamrejo ekestis malfermita. Sed Nao bone komprenis ke oni ne povas forkuri de la bata-lo. Du el la multharuloj estas vunditaj. Se li forkuros, tio donos al ili tempon resaniĝi. Tiam estos pli malfacile venki ilin.

Kuro de vundita Kamo estis samrapida al tiu de liaj kunuloj. Kiam la triopo forkuris jam malproksimen de la multharaj fratoj, Nao ekstaris, kaj donis la fajrujon al Gavro. Li diris:

– Vi kuru senstare ĝis kiam mi alkuros vin!

La junuloj ekkuris kiel antaŭe, la estro ekis malrapidigi la kuron. Li atendis la duopon da postkurantaj fratoj, tenante en la manoj nun konatan al ili pikilĵetilon. Poste li ekkuris reen, al la rivero, kaj preterkuris ilin.

Ago komprenis kio okazas. Li ekmuĝis kiel tigro, kaj ĵetis sin kune kun Ruko por ne perdi la piedvunditon. Nun li kuris tiel rapide kiel neniam antaŭe. Sed li ne estis alta. Filo de

Arbo, bonega kuranto, rapide alkuris la piedvunditon.

Tiu ĵetis pikilon, sed ne trafis. Nao alkuris lin, tiel fortan, ke li povus ankaŭ nun neniigi Kamon kaj Gavon. Por trafi Naon, kiu estis iom pli alta ol li, la frato fortege ekbatis... nenion. Batilo de Nao faligis lin; dua bato ekestis mortiga.

Ago proksimiĝis; Ruko, iom malforta pro la vundita mano, kuris malantaŭe. Ili ne pensis pri danĝero.

Kun piedo sur la venkito Nao atendis kiun kuris antaŭe. Ago ĵetis sin sur la malamikon, sed Nao desaltis, rekuris, kaj albatis Rukon. Li forbatis el lia mano la batilon, kaj per fortega kapobato faligis ankaŭ la duan fraton.

– Kie estas viaj fratoj, Ago?! – kriis Nao, – mi venkis ilin same kiel mi venkis urson, tigrinon kaj hommanĝulojn! Nun mi povas kuri kien mi volas. Miaj piedoj estas pli rapidaj ol la viaj!

Iom forkurante li diris:

– Nao ne volas forkuri. Ĉi-nokte li prenos vivon de Ago aŭ fordonos la sian.

Nao ĵetis pikilon, sed ĝi preterflugis Agon.

– Nao mortos! – muĝis Ago.

Li ne rapidis. Li sciis ke la malamiko batalos nur se li volos tion. Li proksimiĝis malrapide, kiel besto. Liaj pikilego kaj batilo portis morton. Li ne timis sian rapidan kaj fortan

malamikon. Li estis plej forta el la fratoj, kaj ne konis malvenkojn.

Ago ĵetis la pikilegon. Li faris tion ĉar oni devis tion fari; li sciis ke Nao desaltos. Ankaŭ li facile farus tion. Nun ili havis nur batilojn. Sur batilo de Ago videblis tri eligoj.

Ago batis unua, sed ne per ĉiu sia forto, ĉar li volis venki per io alia. Nao facile forigis la baton, kaj ankaŭ batis. La batiloj brue renkontiĝis.

Tiam Ago forsaltis, batis tre forte, sed ne trafis, ĉar Nao desaltis. Responda bato estis tiel forta, ke ankaŭ Faumo falus, sed Ago restis samloke.

La malamikoj staris unu kontraŭ la alia. Neniu el ili estis vundita. Nun ĉiu el ili konis forton de sia kontraŭulo.

Ankaŭ nun ekbatalis Ago. Per ĉiu sia forto li ekbatis desupre. Nao desaltis, sed unu el eligoj de sur la batilo faris longan vundon sur supro de lia mano. Ago, pensante sin venkanto, ekbatis pli forte.

Desaltante Nao respondis. Pro lia bato kapo de Ago ekbruis. Dua bato faligis lin surteren.

– Ago ne havos Gamlan! – kriis Nao, – Ago ne vidos ulamraron, ne vidos Grandan marĉon, kaj neniam varmigis sin apud la fajro!

Sed Ago ekstaris. Lia forta kapo estis

sangita (sang'it'a), unu lia mano ne funkciis, la piedoj malfortiĝis. Sed vivovolo lumigis liajn okulojn. Li suprenigis la batilon per sia sana mano, sed antaŭ ĝia malsupreniĝo Nao bate forigis ĝin. La batilo falis malproksimen.

Ago atendis morton. Li sciis ke li estas jam morta. Li ekmemoris kiujn li mortigis dum sia vivo.

– Ago ne redonis vivon al siaj malamikoj – diris li, – vivas neniu el kiuj ne volis rekoni lian forton. Ĉiuj ulamroj timis Agon!

Li ne petis vivon, kaj ne kriis kiam la mortobato falis sur lian kapon. Post tio Nao finmortigis ankaŭ du liajn fratojn. Li eksentis ke ilia forto eniras lin.

Ĉiutage ulamroj kun timo atendis sunsubiron. Dum noktoj ili sentis sin ege malfortaj.

Kuniĝante (kun'iĝ'ant'e) en mallumo de kaverno, aŭ sub eliĝanta ŝtonego, ili pensis en la malvarmo pri fajro, kiu varmigus ilin, kaj forigis de ili danĝerajn bestojn.

Gardantoj ĉiam tenis batalilojn en siaj manoj; senĉesa timo malfortigis ulamrojn. Ili sciis ke morto povas veni antaŭ ol ili ekbatalos.

Antaŭnelonge (antaŭ'ne'long'e) urso mortigis batalulon kaj tri virinojn. Lupoj forkaptis du infanojn. Multaj viroj estis vunditaj en tiuj ĉi noktaj bataloj.

Venis tempo de malvarmoj. En unu el la noktoj Faumo, la estro, batalante kontraŭ tigro perdis sian manon. Pro lia malforto ene de ulamraro ekflamis kontraŭstaroj.

Gumo ne volis aŭdi ordonojn de Faumo. Muo diris ke de nun li estas estro. Ĉiu el ili havis siajn kunulojn; nur malmultaj restis kunaj al Faumo. Sed sangaj bataloj ne okazis, ĉar homoj ne havis fortojn.

Dum noktoj oni pensis pri la forestantaj bataluloj. Foriris jam multaj lunoj; ĉu oni vidos iam Naon, Kamon kaj Gavon? Ĉu revenos iam Ago kun siaj fratoj? Oni multfoje sendis la pririgardantojn, sed tiuj revenis sen trovi iun spuron. Timo vundis ulamrojn: la ses batalantoj mortis sub piedegoj de best-manĝuloj, sub hakiloj de malamikoj, aŭ pro malsato... Ulamroj neniam vidos fajron.

Nur virinoj pensis ke venos tempo pli luma. Gamla estis unu el plej sentimaj. Malvarmo kaj malsato ne malpliigis ŝiajn junajn fortojn. Ŝiaj haroj ekestis pli longaj ol antaŭe. Ŝi bone konis kreskaĵojn, kaj scipovis rapide trovi manĝeblajn el ili. Se ne ŝi, granda Faumo mortus senmanĝe kiam li, malforta pro perdo de la sango, kuŝis ene de kaverna mallumo.

Venis vespero. Suno ankoraŭ estis videbla. Ulamroj kuniĝis maltrankvile atendante la nokton. Kiam venos noktoj, ene de kiuj



flamo brue manĝos arbaĵojn, disdonante varmon? Kiam odoron de prifajrita bestaĵo oni sentos de malproksime? Kiam ursoj, lupoj kaj tigroj ekkuros for de timiga por ili flamo?!

Ekestis mallume. Eldormiĝis noktaj bestoj. Guno, kiu pro la malbonoj maljuniĝis pli ol antaŭe, diris malforte:

– Guno vidis siajn filojn kaj filojn de siaj filoj. Fajro ĉiam estis apud ulamroj, sed ne nun! Guno mortos ne vidante ĝin!

La interŝtonejo, kie sidis ulamraro, estis bona loko dum varmaj tagoj, sed nuna malvarmo forte batis la maljunulon.

– Lupoj kaj hundoj ĉiutage iĝas pli kaj pli sentimaj.

Li montris la bestojn, nombro da kiuj pligrandiĝis kun veno de la mallumo. Iliaj muĝoj iĝis pli longaj kaj pli danĝeraj.

Gardantoj iris tien kaj reen sub malvarmaj steloj. Unu el ili ekstaris kaj ekrigardis. Ankaŭ la dua faris samon:

– Tie estas homoj!

Ĉiuj maltrankviliĝis. Iuj ektimis, iuj ekpensis pri la senditoj. Faumo ekmemoris ke li ankoraŭ estas estro, kaj eliris el la interŝtonejo.

– Ĉiuj viroj prenu la batalilojn, – ordonis li.

Nun neniu kontraŭis.

– Gumo prenu tri batalulojn, kaj iru priri-

gardi.

Gumo ne sciis ĉu preni ĉu ne preni ordonon de la malfortulo, sed maljuna Guno aldonis:

– Gumo havas okulojn de tigro, aŭdon de lupo, kaj odorsenton de hundo. Li rapide ekscios kiu venas, amikoj aŭ malamikoj.

Tiam Gumo kun tri junaj bataluloj ekiris. Hundoj ekkuris laŭ iliaj spuroj. La bataluloj malaperis. Ĉiuj maltrankvile atendis. Finfine ekaŭdiĝis bone konata krio:

– Tio estas ulamroj!

– Kiu iras, Ago kun la fratoj, aŭ Nao, Kamo kaj Gavo? – demandis Guno.

Kaj denove sub steloj ekaŭdiĝis krioj.

– Iras Filo de Arbo, – diris al si Faumo.

Ene de si la estro timis mortigulan Agon. Sed plimulto da ulamroj pensis nur pri fajro. Se Nao portas fajron ili pretas fali antaŭ li sur teron; se ne, malamo atendas la malfortulon.

Al la ulamrejo denove proksimiĝis lupoj. Tago jam delonge foriris, nokto estis senluma, sur malvarmega ĉielo staris malvarmaj steloj.

Finfine aperis Nao.

– Fajro, Nao portas fajron! – kriis Faumo.

Ulamraro ekmaltrankviliĝis. Iuj restis sur lokoj kie la krio trafis ilin, iuj eksaltis kunkriante:

– Fajro, fajro!

Filo de Arbo tenis ĝin en sia fajroportilo. Tio estis nur fajreto, kiun povus neniigi ĉiu etulo, sed ulamroj sciis grandegan forton kiun ĝi enhavas. Senvortaj, timantaj pri ĝia malapero, ili rigardis la fajron. Sed, post nelonge, ulamraro ekbruis tiel forte, ke lupoj kaj hundoj ektimis. Ĉiuj ĉirkaŭis Naon.

– Estu singardaj, ne mortigu la fajron, – kriis maljuna Guno.

Ĉiuj deiris. Nao, Faumo, Gamla, Kamo kaj Gavo ekiris al la ŝtonego. Ulamroj diskuris serĉi sekajn brulaĵojn. Kiam brulaĵo ekestis preta, Nao proksimigis al ĝi la fajreton. Ĝi ekmanĝis etajn kreskaĵojn kaj, kun forta bruo, ekkaptis la arbaĵojn.

Ekvidante la fajron lupoj kaj hundoj forkuris.

Tiam Nao diris al Faumo:

– Filo de Arbo faris laŭ siaj vortoj. Ĉu estro de ulamroj ankaŭ faros samon?

Li montris Gamlan. La longhara junulino rigardis lin: tio estas alportanto de fajro!

– Gamla estos via, – respondis Faumo.

– Kaj Nao estos estro de ulamroj, – sentime aldonis maljuna Guno.

Li diris tion ne por fari malbonon al Faumo, sed por ke neniuj ekinterbatalu, kio, li pensis, povus esti tre danĝera. Sed neniuj kontraŭis. Ĉiuj elkriis ke estu tiel.

Sed Nao vidis nur Gamlan: ŝiajn longajn

harojn, ŝiajn lumajn okulojn. Ankaŭ li ne volis malbonon al Faumo, kiu donis al li sian filinon; sed li komprenis ke malforta homo ne povas esti estro. Tial li diris:

– Nao kaj Faumo kune estros ulamrojn!

Ĉiuj ĉesis brui. Neniu povis trovi vortojn. Unue en sia vivo Faumo eksentis bonan senton al homo kiu ne estas lia proksimulo. Sed maljuna Guno rapidis ekscii pri travivaĵoj de la triopo.

Lingvo de tiamaj homoj estis malmultvorta sed elmontra (el'montr'a). Nao rakontis pri granda urso, pri hommanĝuloj, pri vaĥoj kaj mamutoj, pri malaltuloj kaj arbaraj grandeguloj. Ĉiuj sidis kaj aŭdis lian rakonton, kaj bruon de la fajro. Nur pri la fajroŝtonoj Nao rakontis nenion.

Maljuna Guno elkriis:

– Neniam batalulon saman al Nao vidis niaj patroj, neniam vidis lin niaj infanoj, kaj infanoj de niaj infanoj!

Fine Nao diris nomon de Ago. Ĉiuj ektimis aŭdante ĝin.

– Kiam Nao vidis Agon kaj liajn fratojn, – demandis Faumo, time rigardante en la mallumon.

– Antaŭ du noktoj, – respondis Nao, – ili trairis la riveron. Ili aperis apud la ŝtonego kie troviĝis Nao, Kamo kaj Gavo. Nao batalis kontraŭ ili.

Venis longa malbruo. Oni povis aŭdi nur la fajron kaj krion de iu malproksima besto.

– ...Kaj Nao venkis ilin, – finis Nao.

Geviroj ekrigardis unu la alian: ĉu tio estas vero? Muo diris kion sentis ĉiuj aliaj:

– Ĉu Nao mortigis la triopon?!

Filo de Arbo ne respondis. Li enigis la manon en ursofelon, kiun li surhavis (sur'hav'is), prenis de tie, kaj ĵetis surteren tri sangajn kaj multharajn manojn.

– Tio estas manoj de Ago kaj liaj fratoj.

Guno, Muo kaj Faumo pririgardis manegojn kiujn ili konis bonege. Ĉiuj memoris timon kiun sentis ulamroj antaŭ ili. Malaperis kontraŭstaro inter fortuloj. Malfortuloj por ĉiam kunigis siajn vivojn kun Nao. Virinoj eksentis ke ulamraro ne mortos. Maljuna Guno diris:

– Nun ulamroj ne timas malamikojn!

Faumo kaptis harojn de Gamla, ĵetis ŝin antaŭ la venkinto, kaj diris:

– De nun ŝi estas ne mia sed via. Ŝi portos beston, kiun vi mortigos dum bestkaptaĵoj. Se ŝi faros ion kontraŭ via volo vi povas mortigi ŝin.

Nao prenis ŝian manon, kaj suprenigis ŝin. Senfino aperis antaŭ ili.

oo

# Rerakonto tria

## Trezorinsulo

*Du antaŭaj rerakontoj de «Esperanto per 501 vortoj» rakontis pri «Aelita» de Aleksej Tolstoj, kaj pri «Batalo por fajro» de J.H.Rosny-Aîné.*

*Ĉi tie ni rerakontos (per 311 – 501 vortoj) libron «Trezorinsulo» (trezor'insul'o) de Robert Louis STEVENSON (1850-1894).*

*Pri vortoj «trezoro» kaj «insulo» ni parolos iom pli poste.*

## 311 sinjoro

*Ĉu estas ie lernejo en kiu lernantoj krias al sia instruisto: «Hej, instruisto, mi jam finis mian laboron!»?*

*Eblas ke jes... Sed en plimulto (pli'mult'o) da lernejoj oni nomas unu alian «**sinjoro**»:*

*«**Sinjoro** lernanto, bonvolu (bon'vol'u)*

*diri al ni: kio estas insulo»?*

**sinjoro** = English: gentleman, Mr.

## **312 insulo**

**Insulo** estas tero kiun de ĉiuj flankoj ĉirkaŭas (ĉirkaŭ'as) akvo.

**insulo** = English: island.

## **313 trezoro**

*Ĉu vi aŭdis pri ŝtono, kontraŭ kiu oni povas doni grandan... insulon? Jes, insulon, kun arbaroj, kun montoj kaj riveroj. Se la ŝtono estas malpli granda, oni povas doni kontraŭ ĝi... tre grandan domon.*

*La ŝtonojn, kaj aliajn samajn aĵojn, oni tenas en loko kiun oni gardas tage kaj nokte. Tio estas **trezoroj**. La gardolokon (gard'o'lok'o'n) oni nomas **trezorejo**.*

Ne nur landestroj havis (kaj havas) **trezorojn**. Havis ilin ankaŭ tiuj ege malbonaj homoj kiuj kaptis ŝipojn, mortigis la ŝipanojn, kaj prenis al si ĉion.

oo  
Sinjoro Treloni, sinjoro Livsi, kaj ankaŭ aliaj sinjoroj petis min rakonti ĉi tie ĉion kion mi scias pri **Trezorinsulo** (= insulo de **trezoroj**).

Jes, ĉion, sed ne lokon kie la insulo troviĝas.

Nuntempe (nun'temp'e) oni ne povas montri la lokon, ĉar sur la insulo ĝis nun troviĝas **trezoroj** kiujn ni ankoraŭ ne prenis de tie.

oo  
**trezoro** = English: treasure.

## 314 **jar**o 🕒

**Jaro**: 365 tagoj.

**jar**o = English: year.



## 315 **gasto**

**Gasto** estas homo kiun vi konas, kiu venas al vi ĉar li scias ke vi volas lin vidi.

Se vi troviĝas en iu malproksima urbo, kaj ne havas amikojn tie, vi povas eniri lokan **gastejon** (**gast'**ej'o'n). **Gastejo** estas laborloko por ĝia havanto. Ankaŭ tie oni povas manĝi kaj dormi, sed... sed oni devas doni ion kontraŭ tio.

**gasto** = English: guest.

## 316 **maro**

Akvo. Multe da akvo. Ege multe da netrinkebla (ne'trink'eb'l'a) akvo. Tio estas **maro**.

Sur **maroj** oni povas vidi ŝipojn. Sur ili laboras **maristoj** (**mar'**ist'o'j). Ŝipoj venigas de loko al loko aĵojn kaj homojn. Iam la vojo prenas multe da tempo.

Estas **maroj** kiujn ĉirkaŭigas tero. (Kaspia **maro**, Morta **maro**). Kaj estas kiujn ĉirkaŭi-

gas nur... akvo (Sargasa **maro**).

oo  
Kaj nun, ene de jaro 1752, mi pense revenas al tempo kiam mia patro havis gastejon «Admiralo Benboŭ», kaj kiam ekloĝis en ĝi maljuna **maristo** kun ne nova, sed bone videbla surkapa hakvundo (hak'vund'o).  
oo

**maro** = English: sea.

## 317 **ujo**

**Ujo** estas aĵo en kiu oni tenas ion.

- Alportitan (al'port'it'a'n) akvon oni tenas en akvu**jo**.
- Enĉambran kantbirdon oni tenas en birdu**jo**.
- Desegnojn oni tenas en desegnu**jo**.
- Se vi elterigos malnovan **ujon**, enrigardu ĝin: eblas ke tio estas trezoru**jo**. Sed estu preta ankaŭ al tio ke la **ujo** enhavas ion alian...

oo

Mi bone memoras kiel li, malfacile irante, venis al ni. Lian maristan havaĵujon (hav'aĵ'uj'o'n) oni venigis post li.

Tio estis viro alta kaj forta. Mi memoras kiel li ĉirkaŭrigardis apudgastejan (apud'-gast'ej'a'n) marbordon, kaj ekkantis subite ege malnovan maristan kanton, kiun ni aŭdis poste tiel multfoje:

***Dek-trio da maristoj**  
**En ujo por mortinto**  
**Jo-ho-ho, kaj botel' kun rum'***

oo

*Vortoj «botel'» kaj «rum'» aperos iom poste. El kantoj oni povas forlasi (for'las'i) vorton "o": botel'o = botel'; rum'o = rum'.*

*Jes, vorton. Ĉu vi memoras? Vort'fin'a litero "o" estas kaj litero, kaj vorto. Vi povas trovi ĝin en ĉiu Esperanto-vortar'o (vort'ar'o). Ankaŭ en 501-vorta vortareto, fine de tiu ĉi lernilo.*

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebi	eg	ej	ek	em
end	er	et	fi	ge	id	ig
iĝ	il	in	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

ujo = English: container.

## 318 drinkas

Homoj ne nur trinkas. Ili ankaŭ **drinkas**. Kion faras homo kiu **drinkis** multe da **drinkaĵoj**? Iam li kantas, iam dormas, iam serĉas kiun li batu.

**drinki** = English: booze, swill, tipple.

## 319 rumo

**Rumo** estas unu el tre fortaj drinkaĵoj.

oo

Kiam mia patro eliris al li, la viro ordonis **rumon**. Oni alportis al li la drinkaĵon. Li drinkis ne rapide, rigardante la apudbordajn ŝtonojn.

– Bonega loko por gastejo, – diris li, – ĉu multas gastoj, amiko?

La patro respondis ke ne. Gastoj estis tre malmultaj.

- Nu, - diris la maristo, - la loko bonas por mi. Mi restas.

oo

**rumo** = English: rum .

## 320 **helpas**

• - «**Helpu, helpu**», - krias homo kiu trafis akvon, kaj ne povas eliri el ĝi.

Jes, homoj devas **helpi** unu al alia. Iam, al homoj malsanaj, oni **helpas** iri kaj stari, manĝi kaj trinki.

• Se havanto de gastejo ne povas fari ĉiujn laboron, liaj gefiloj **helpas** al li.

oo


- Hej, frateto (frat'et'o)! - alkriis la alveninto la homon kiu venigis post li la havaĵojon (hav'aĵ'uj'o'n), - **helpu** al mi suprenigi (supre'n'ig'i) ĝin... - Iom da tempo mi loĝos ĉi tie, - diris li al mia patro. - Mi volas ne multon: rumon, iom da manĝo, kaj

ankaŭ tiujn ŝtonegojn, de sur kiuj oni povas rigardi preterirantajn (preter'ir'ant'a'j'n) ŝipojn... Kiel nomi min? Nomu min Ŝipestro.

oo

**helpi** = English: help.


## 321 **mon**o



Kion oni donas al laboranto kontraŭ lia laboro? Ĉu manĝon? Ĉu beston? ...Jes, sed ne nun. Nun oni donas **mon**on, ĉar kontraŭ **mon**o oni povas ekhavi... ne, ne ĉion, sed multon.

**mon**o = English: money.

## 322 ero



moneroj

- Ankaŭ *monero* estas *mono*.
- Se oni forte batas ŝtonon per ŝtono oni, eble, vidos *fajrerojn*: *erojn* de fajro. Sed povas okazi ankaŭ ke la ŝtonoj disfalos, kaj de ili restos nur ŝtoneroj.

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	ek	em
end	er	et	fi	ge	id	ig
iĝ	il	in	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

ero = *English: item, part.*

## 323 Oro

• Nuntempe (nun'temp'e) nur en malmultaj landoj oni donas kaj prenas **orajn** monerojn. Sed en antaŭa tempo oni, rigardante novan **oran** moneron, povis rekoni la nunan landestron.

• Multaj virinoj portas (port'as) sur si aĵojn faritajn el **oro**. Estas **oraĵoj** kiuj iras de patrino al filino.

• Aĵoj faritaj el **oro** restas kiel novaj post miloj da jaroj, ankaŭ se ili troviĝas ene de mara akvo.

oo

– Hej, mi komprenas kion vi volas. Prenu!  
– Kaj la maristo ĵetis sur ŝtuparon de la gastejo tri aŭ kvar **orajn** monerojn. – Kiam tiuj ĉi finiĝos, vi povas veni kaj diri al mi pri tio, – diris li, kaj ekrigardis la patron kiel estro.

Kaj vere, oni vidis ke li ne estas maristo kiel ĉiuj. Oni povus pensi ke li estas unu el tiuj ŝipaj estroj kiuj volas ke ĉio iru laŭ iliaj ordonoj, kaj kiuj disdonas batojn al siaj subuloj.

oo

oro = English: gold.



## 324   **a t a**

Ni jam konas vorton **it**. Ĉu vi memoras?:

ĵet'**it**'a: kion (kiun) oni ĵet'**is**.

Brul'ig'**it**'a: kion (kiun) oni brul'ig'**is**.

Nun ni priparolu vorton **at**:

ĵet'**at**a: kion (kiun) oni ĵet'**as**.

Brulig'**at**a: kion (kiun) oni brul'ig'**as**.

Am'**at**o (am'**at**'o): kiun oni am'**as**.

- «Sed kie estas vi, ho mia am'**at**ino!»
- La trezoroj estis gard'**at**aj tage kaj nokte.
- La bovino malaperis, kaj estis serĉ'**at**a dum du tagoj.

**ant**   int   ont   **at**   **it**   ot

**at** = English: present passive participle.

## 325 **ĉe**

- *La gastejo troviĝas ĉe maro (= tre proksime al ĝi).*
- *La arbo staras ĉe la vojo.*
- *Loĝi ĉe iu (en lia, ŝia, ilia) domo).*
- *La ĉeestantoj (ĉe'est'ant'o'j) manĝis, drinkis kaj kantis.*
- *Ĉu vi, leganto, estas unua infano ĉe via patrino?*

oo

Vespere li sidis en la ĉambrego, ĉe la fajro, kaj drinkis rumon, aldonante al ĝi iom da akvo. Se oni alparolis (al'parol'is) lin, li ne respondis, sed ĵetis al la alparolanto malaman, timigan rigardon. Post nelonge ni, kaj niaj gastoj, ellernis lasi lin trankvila.

Ĉiutage, revenante de siaj ĉebordaj iroj, li demandis ĉu ne preteriris ĉi tie iu maristo.

oo

**ĉe** = English: at, by, on.

## 326 **deziras**

• «Ne **deziru** kunulinon (kun'ul'in'o'n) de via proksimulo (proksim'ul'o).»

• – Kion vi **deziras**: akvon aŭ rumon?

• Oni diras «Bon'a'n tag'o'n, sinjoro» aŭ «Bon'a'n nokt'o'n, sinjorino»... sed por kio oni aldonas tiun ĉi vort-finaĵoj -n?

Oni aldonas -n, ĉar oni subkomprenas (sub'kompren'as) vortojn: «mi **deziras** al vi bonan nokton (bon'a'n nokt'o'n), sinjorino».

oo

Iom da tempo ni pensis ke li volus havi maristojn-kundrinkulojn (kun'drink'ul'o'j'n); sed poste ni komprenis ke li **deziras** esti kiom eble malproksima de ili. Se iu maristo, irante al urbo Bristol, restis por nokti en «Admiralo Benboŭ», Ŝipestro antaŭe pririgardis lin de malproksime, kaj nur post tio eniris la ĉambregon. Dum ĉeesto de tiuj homoj li ĉiam sidis senbrue. Kaj mi sciis kialon (kial'o'n), ĉar Ŝipestro rakontis al mi pri sia maltrankvilo:

Iufoje li prenis min flanken, kaj diris ke li donos al mi du neorajn (ne'or'a'j'n) monerojn post ĉiu tridektagaĵo (tridek'tag'aĵ'o), por ke mi rigardu per la du okuloj «ĉu ne aperis ĉi

tie unupieda (unu'pied'a) maristo».

Ĉiufoje kiam venis tiu trideka tago mi alparolis lin, kaj li ĉiam respondis al mi nur per timiga rigardo.

oo

**deziri** = English: desire, want, wish.

## 327 eĉ

- Homo, **eĉ** tre forta homo, ne povas fari kion faras deko da homoj.
- Li havis **eĉ** ne unu moneron (= li ne havis monon).
- Iam **eĉ** mono ne helpas.

oo

Sed, post **eĉ** ne pli ol septagaĵo, li donis al mi la monon, kaj denove ordonis elrigardi unupiedan mariston.

Kiom da timoj havis mi pro tiu ĉi unupiedulo! Multfoje, dormante, dum nokta maltrankvila maro bruege ĵetis sin sur la apudbordajn ŝtonegojn, mi vidis lin postkurantan mortigi min.

Jes, pro tiuj ĉi noktaj timegoj tiu ĉi laboro

ne estis facila por mi. Sed **eĉ** post tio mi timis Ŝipestron malpli ol ĉiuj aliaj.

Iam okazis vesperoj dum kiuj li drinkis tiel multe da rumo kun akvo, ke **eĉ** perdis la komprenon.

Tiam li longe sidis en la ĉambrego, kaj kantis siajn malnovegajn (mal'nov'eg'a'j'n) timigajn maristajn kantojn, rigardante neniun el la ĉeestantoj.

oo

**eĉ** = English: even.

## 328 **tablo**

• **Tablo** ne estas besto, sed plimulto da **tabloj** havas kvar piedojn.

• En multaj landoj, sed ne en ĉiuj, oni sidas ĉe **tabloj** por manĝi, interparoli (inter'parol'i), trinki aŭ drinki. Tio estas manĝo**tabloj** (manĝ'o'tabl'o'j).

• En urba librejo oni povas vidi multajn **tablojn**, kaj homojn, legantajn ĉe ili.

**tablo** = English: table.

## 329 aŭskultas

Vidas kiu rigardas. Aŭdas kiu **aŭskultas**.

oo  
Sed okazis ankaŭ ke li petis ĉiujn  
ĉeestantojn (ĉe'est'ant'o'j'n) veni al sia tablo,  
ordonis rumon por ĉiuj, kaj igis la kundrinku-  
lojn **aŭskulti** liajn timigajn maristajn rakon-  
tojn, aŭ kanti kune kun li.

oo  
**aŭskulti** = English: listen.

## 330 konversacio

Vortoj "**rakontas**", "**parolas**", kaj "**kon-  
versacias**" estas vortoj proksimaj inter si.

1. Homo kiu estis en tre malproksima  
lando povas longe **rakonti** pri kion li vidis tie.

Kaj kion faras la aŭskultanto(j)? Aŭskul-  
tas!

2. Estas landoj en kiuj homo, sama al ĉiuj  
aliaj homoj, povas ekstari iom pli alte en loko  
multhoma, (por ekesti videbla), kaj **paroli** pri


tio kion faras la landestroj, kaj kion ili devas fari.

Sed aŭskultanto(j), kion faras la aŭskultanto(j)? Aŭskultas!

3. **Konversacias** ne unu, sed du aŭ pli da homoj. Unua parolas, dua aŭskultas. Dua parolas, unua aŭskultas. Tio, nur tio estas bona amika **konversacio**.

**konversacio** = English: conversation, chat, talk.

## 331 botelo



**botelo**



Kaj ĉiuj kantis:

«*Jo-ho-ho, kaj **botel'** kun rum'*».

Ili timis Ŝipestron, ĉar tiutempe li estis tre danĝera: iam li batis per sia mano la tablon, por ke ĉiuj ĉesu konversacii. Iam li alkriegis kiujn demandis lin pri io, sed iam ankaŭ kiujn ne demandis, ĉar tio, laŭ li, montris ke oni aŭskultas ne tiel kiel oni devas

aŭskulti.

Al neniu li donis lasi la drinkejon, kaj la kunuloj (kun'ul'o'j) povis disiri nur kiam li malfacile, pro eldrinkita rumo, supreniĝis al sia ĉambro.

Sed plej timigaj estis liaj rakontoj. Li rakontis pri homoj, al kiuj oni fermis la okulojn por ke ili iru kaj falu de la ŝipo en la maron, kaj pri aliaj mortigoj; pri maraj maltrankvilegoj, pri malproksimaj insuloj Draj Tortugas, kaj pri ŝipaj bataloj en Hispana maro.

Plimulton de sia vivo li, laŭ siaj rakontoj, troviĝis inter tiel malbonegaj homoj, kiujn neniam antaŭe vidis maroj.

oo

**botelo** = *English: bottle.*

## 332 **vilaĝo**

**Vilaĝo** estas loĝloko malpli granda ol urbo.

oo

Kaj tiuj multnombraj malbonegaj vortoj, kiujn li eligis, timigis niajn gastojn-**vilaĝ**ulojn



ne malpli ol mortigoj pri kiuj li rakontis.

Mia patro ĉiam diris ke pro li ni devos fermi la gastejon, ĉar Ŝipestro fortimigos de ni ĉiujn niajn gastojn: kiu deziras elteni ĉeeston (ĉe'est'o'n) de tiel malbona homo, kaj timegi, revenante en sian loĝejon?

Sed mi pensas ke Ŝipestro venigis bonon al ni. Jes, estas vero ke niaj gastoj timis lin, sed, post tago aŭ du, ili denove venis al li. En nian trankvilan vivon li venigis ion novan, kion oni neniam vidis ĉi tie. Iuj junuloj diris eĉ ke li estas vera mara lupo, ke nur pro homoj kiel li Britio ekestis kio ĝi estas nun.

Sed, de alia flanko, Ŝipestro vere venigis perdojn al ni.

Tridektagaĵoj iris unu post alia, kaj mono, kiun li donis al ni dum sia alveno, jam de longe finiĝis.

oo

**vilaĝo** = *English: village.*

## **333 kuraĝa**

**Kuraĝo**: *maltimo.*

- «**Kuraĝulo** mortas nur unufoje. Timulo

*mortas ĉiutage.»*

oo

Sed mia patro ne havis **kuraĝ**on peti la monon. Kiam li ekis (ek'is) paroli pri tio, Ŝipestro muĝis kiel bovo, kaj rigardis lin tiel timige, ke la patro elsaltis el la ĉambro. Mi pensas ke tiuj ĉi timigoj ege proksimigis la antaŭtempan (antaŭ'temp'a'n) morton de mia patro.

Ŝipestro alparolis neniun, nur apudsidantojn, kaj nur post multo da drinkaĵoj; kaj neniun el ni vidis lin malfermi sian havaĵujon.

Nur unufoje oni ek**kuraĝ**is kontraŭdiri lin. Tio okazis dum tagoj kiam mia patro estis jam tre malsana.

oo

**kuraĝa** = *English: courage.*

## 334 **kuracas**

**Kuracas** = *resanigas.*

Sed **kuracisto** estas pli ol iu alia saniganto. **Kuracisto** estas isto kiu lernis longe, tre longe, en unu el **kuracistaj** altlernejoj (al-

t'lern'ej'o'j).

oo

Iuvespere al ni venis **kuracisto** Livsi. Li pririgardis (pri'rigard'is) la malsanulon, rapide formanĝis kion donis al li mia patrino, kaj malsupreniĝis en la ĉambregon.

oo

**kuraci** = English: cure, treat, care for.

## 335 **ĉevalo**

- **Ĉevalo** estas unu el bestoj kiuj venigis (kaj venigas) homojn kaj aĵojn de loko al loko.

- Oni povas sidi sur **ĉevalo**. Oni povas sidi ankaŭ ene de ilo kiun kurigas (kur'ig'as) aŭ irigas unu aŭ pli da **ĉevaloj**.

- Nuntempe oni vidas malpli da **ĉevaloj** ol antaŭe. Plimulto da homoj ne sursidas bestojn, kiujn oni naskas, sed ensidas ilojn, kiujn oni faras.

Sed iam... Miloj da homoj mortigis unu alian de sur siaj batal**ĉevaloj**. Ankaŭ **ĉevaloj**, multe da **ĉevaloj** mortis tiam... Sed kiu pen-

*sis pri ili!*

oo

Ĉi tie la kuracisto atendis kiam oni venig-  
gos al li la **ĉevalo**n: ĝi restis en la vilaĝeto,  
ĉar en malnova «Benboŭ» forestis **ĉevalejo**.

Tio estis mi, kiu kune kun li venis en la  
ĉambregon, kaj mi bone vidis ĝis kiom tiu ĉi  
kuracisto, homo multscia (mult'sci'a), estas  
malsama al niaj gastoj-vilaĝuloj.

Eĉ pli li malsamis (mal'sam'is) tiun ĉi nian  
Ŝipestron, kiu satdrinkaĉis (sat'drink'aĉ'is)  
rumon, kaj sidis kun la manoj sur la tablo.

oo

**ĉevalo** = English: horse.

## 336 into

- *Demand**into**: tiu kiu demandis (Deman-  
dit**o**: tiu kiun oni demandis)*
- *Kapt**into**: tiu kiu kaptis. (Kapt**ito**: kiun  
oni kaptis.)*
- *«Vid**intoj**: tiuj kiu vidis (vid**itoj**: tiuj  
kiujn oni vidis)*
- *Venk**intoj** eniris la urbon. Venk**itoj***



doj.

- *La instruisto rakontis pri la lando, pri ĝiaj urboj kaj pri **ties** loĝantoj (= urbanoj).*

oo

Dum unuaj tagoj mi pensis ke «ujo por mortinto» estas tiu marista havaĵujo kiu staras supre, en ĉambro de Ŝipestro. Sed iom post iom mi ĉesis pensi pri la kanto, tial ĝi ekestis nova ĉi-vespere nur por kuracisto Livsi, kiu, kiel mi komprenis, ne trovis ĝin bona. Li ne tre amike ekrigardis Ŝipestron, sed ne ĉesis konversacii kun maljuna Tejloro pri kuracilo kontraŭ **ties** malsano.

oo

kia	tia	ia	ĉia	nenia
<b>kial</b>	<b>tial</b>	ial	ĉial	nenial
<b>kiam</b>	<b>tiam</b>	<b>iam</b>	<b>ĉiam</b>	<b>neniam</b>
<b>kie</b>	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
<b>kiel</b>	<b>tiel</b>	iel	ĉiel	neniel
kies	<b>ties</b>	ies	ĉies	nenies
<b>kio</b>	<b>tio</b>	<b>io</b>	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
<b>kiom</b>	tiom	<b>iom</b>	ĉiom	neniom
<b>kiu</b>	<b>tiu</b>	<b>iu</b>	<b>ĉiu</b>	<b>neniu</b>

**ties** = English: of that (those), that one's, his, etc.

## 338 **frapas**

- Patrino **frapas** (per malfermita mano) postajon (post'aĵ'o'n) de sia negranda filo: «Alifoje (ali'foj'e) ne diru "mi ne volas"»!
- Iam oni **frapas** per la mano (ne batas) sian kapon: «Nun mi memoras kie mi perdis la libron!»
- Antaŭe ni legis ke Sipestro batis la tablon. Sed vorto **frapis** estas pli bona ĉi tie.

oo

Intertempe Ŝipestro, varmigita per sia kanto, **frapis** la tablon per la mano. Per tio li ordonis malbruon. Ĉiuj ĉesis paroli. Nur kuracisto Livsi trankvile kaj amike parolis pri iu kuraca herbo.

Ŝipestro pike ekrigardis lin, denove **frapis** la tablon, kaj kriis subite:

- Hej, tie, ĉesu!
- Ĉu vi parolas al mi, sinjoro? – demandis la kuracisto.

oo

**frapi** = English: knock.

# 339    aĉa

**Aĉa**: tre malbona.

- *Insulaĉo* = **aĉa** insulo.
- *Ĉevalaĉo* = **aĉa** ĉevalo.

oo

La maljuna **aĉulo** diris «jes, al vi», kaj aldonis iom da ne tre bonaj vortoj.

– Ĉi-okaze, sinjoro, mi diros al vi nur tion, – respondis la kuracisto, – se vi ne ĉesos drinki, post ne tre longa tempo sur la tero estos iom malpli da drinkula**aĉoj** (drink'ul'**aĉ**'o'j).

oo

<b>aĉ</b>	ad	<b>aĵ</b>	<b>an</b>	<b>ar</b>	bo	ĉj
<b>dis</b>	ec	<b>ebl</b>	<b>eg</b>	<b>ej</b>	<b>ek</b>	em
end	er	<b>et</b>	fi	<b>ge</b>	id	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	il	<b>in</b>	ind	ing	ism	<b>ist</b>
<b>mal</b>	mis	nj	<b>op</b>	<b>re</b>	<b>uj</b>	<b>ul</b>
um						

**aĉ** = *English: abominable, awful.*



## 340 tranĉas



tranĉilo

- Apud vi, sur la manĝotablo, troviĝas **tranĉilo**. Per ĝi vi povas **distranĉi** vian manĝaĵon.
- Kuracistoj, per siaj kuracistaj **tranĉiletoj** (**tranĉ**'il'et'o'j), **tranĉas** vunditojn kaj malsanulojn por resanigi ilin.

oo  
Ŝipestro eksplodis. Li eksaltis, malfermis sian maristan **tranĉilon** kaj, tenante ĝin en la mano, diris ke li **tranĉos** la kuraciston. Sed la kuracisto restis sidi sur la sama loko, kaj konversaciis kun Ŝipestro same kiel antaŭe li konversaciis kun Tejloro. Eblas ke nur iom pli aŭdeble.

oo  
**tranĉi** = English: cut, cleave.

## 341 **pendas**

• *Estas lokoj kie oni **pendigas** kaptitajn fiŝojn por ke ili ekestu sekaj, kaj restu manĝeblaj eĉ post longa tempo.*

• *En plimulto da ĉambroj lumigiloj **pendas** desupre (de'supr'e).*

• *Por kio oni **pendigis** homojn? (pli bone: "pend'**um**'is". Vidu 484-an vorton **um**) Por mortigi ilin!*

oo

Tre trankvile la kuracisto diris:

– Se vi ne forigos tiun ĉi vian tranĉilon, vi ek**penda**ĉos (ek'**pend**'aĉ'os) post plej proksima kunsido de nia estraro.

Ili rigardis unu la alian tre malamike. Sed Ŝipestro, post nelonge, faris kion oni diris al li: li fermis la tranĉilon, kaj eksidis kiel batita hundo.

– Kaj nun, sinjoro, – diris la kuracisto, – post kiam mi scias kiu troviĝas en mia ĉirkaŭaĵo, mi pririgardos vin, ĉar mi estas ne nur kuracisto. Kaj, se venos al mi iu eĉ plej eta malbona sciigo pri vi, mi ordonos ke oni forĵetu vin de ĉi tie. Tio estas ĉio kion mi volis diri al vi.

oo

**pendi** = English: hang.

## 342 rajdas

*Rajdas: venas de loko al loko sur ĉevalo aŭ sur iu alia rajdbesto.*

oo

Poste oni venigis la ĉevalon, kaj la kuracisto for**rajdis**. Sed nia Ŝipestro estis ege trankvila, singarda, kaj ĉi-vespere, kaj ankaŭ dum iom da aliaj vesperoj. Post nelonge venis unu el tiuj okazaĵoj, post kiuj ni restis finfine sen Ŝipestro.


Venis jartempo malvarma, kaj ekvideblis ke mia patro, eble, ne ĝisvivos la varmajn tagojn. Ĉiutage li sentis sin pli kaj pli malbone, tial labori en la gastejo devis nun mi, kaj mia patrino. Ni havis multe da laboro, tial ni malmulte pensis pri nia ne tre bona loĝanto.

Estis malvarma mateno. Suno ankoraŭ ne supreniĝis, ĝi nur tuŝis per sia lumo suprojn de la altaĵoj, kaj la maran malproksimon. Ŝipestro, kiel ĉiam, eliris el sia ĉambro, kaj foriris al la maro.

oo

**rajdi** = English: ride.

## 343 **sabro**



**sabro**: longa batal-hakilo

oo


Kiel ĉiam li portis kun si sian **sabron**. Mi aŭdis la aĉajn vortojn, kiujn li diris malaperante post alta ŝtonego. Eblas ke li elmemoris kuraciston Livsi.

La patrino troviĝis supre, ĉe la patro, kaj mi surtabligis matenmanĝon por Ŝipestro.

oo

**sabro** = English: sabre.

## 344 pordo



**Pordo** fermas eniron en domon aŭ en ĉambron.

oo  
Subite la **pordo** malfermiĝis, kaj en la ĉambregon eniris homo kiun mi antaŭe vidis neniam.

Nenio danĝera estis en li krom tio ke li portis tranĉilegon.

oo  
**pordo** = English: door.

## 345 similas

**Simila**: sama, sed ne tre sama.

- – *Via filo, sinjoro, tre **similas** vin. Sed via filino pli **similas** la patrinon.*

oo

Li ne tre **similis** mariston, sed miaj sentoj diris al mi ke tio estas maristo. Mi demandis kion li deziras, kaj li ordonis rumon.

Mi ĵetis min el la ĉambrego por alporti la ordonaĵon (ordon'aĵ'o'n), sed li, sidante ĉe la tablo, alkriis min.

– Venu al mi, fileto (fil'et'o), – diris li.

Mi alproksimiĝis.

– Ĉu la manĝon vi surtabligis por mia amiketo Bili? – demandis li.

Mi respondis ke mi konas nenium Bili, kaj ke la manĝon mi surtabligis por nia loĝanto kiun ni nomas Ŝipestro.

oo

**simil**a = *English: similar.*

## 346 **Ŝajnas**

- – ***Ŝajnas** al mi, – diris la kuracisto, – ke la vundo ne estas danĝera... Sed poste ni vi-*

dos.

- Ne ĉio kio **ŝajnas** esti trezoro vere trezoras.

- De malproksime **ŝajnis** ke en la domo loĝas neniu, sed iam oni vidis lumon en ĝi.

oo

- Nu, - diris li, - mia amiko Bili, **ŝajne**, nomas sin Ŝipestro. Li havas bone videblan iaman vundon sur la kapo, kaj ege bonas post kiam drinkaĉis multe, ĉu? Jes, tio estas li. Bone! Ĉu mia amiko Bili troviĝas nun en la domo?

Mi respondis ke Ŝipestro foriris.

- Sed kien, fileto, kien li foriris?

Mi montris al li la ŝtonegon, kaj diris ke Ŝipestro devas veni de tie.

- Sed kiam?

Post ankoraŭ iom da demandoj li diris fine:

oo

**ŝajni** = English: seem.

# 347 **ĝojas**

Kiu **ĝojas**?

- **Ĝojas** viro, kiam oni sciigas lin ke la kunulino jam naskis filon al li.
- **Ĝojas** junulo, kiun oni finfine prenis en altlernejon.
- **Ĝojas** junulino, kiam ŝia amato diras ke li amas ŝin.

oo

- Jes, mia amiko Bili **ĝojos** al mi kiel al drinkaĵo.

Mi havis ĉiujn kialojn (kial'o'j'n) pensi ke Ŝipestro estos ne tre **ĝoja** renkonti lin. Sed kion mi povis fari? La nekonato staris apud pordo de la gastejo kiel atendanta tigro. Mi ekiris al la ĉemara vojo, sed li alkriis min.

oo

**ĝoji** = English: joy.



## 348 **obeas**

**Obeas**: faras kion oni ordonas fari.

• «Sidu!» – diras homo. Lia hundo eksidas: ĝi **obeas** la homon.

• Bona maristo **obeas** siajn estrojn.

oo

Kiam li ekvidis ke mi ne **obeas**, li eksplodis pro malamo, kaj elkriis tiel aĉajn vortojn, ke mi eksaltis surloke. Sed, kiam mi revenis, li denove konversaciis kun mi amike, diris ke mi estas bona knabo, kaj ke li vere ekamis min.

– Ankaŭ mi havas filon, – diris li, – vi similas lin kiel du eroj da akvo. Sed kion devas fari gefiloj (ge'fil'o'j)? Ili devas **obei**. Jes, fileto. Se vi troviĝus (trov'iĝ'us) sur ŝipo de Bili, oni ne ordonus al vi dufoje. Bili neni-am faris tion, kaj ankaŭ aliaj liaj kunuloj... Sed tio estas li, mia amiko Bili! Nun ni denove eniru la ĉambregon, kaj staru post la pordo, fileto, por ĝojigi lin.

Kun tiuj ĉi vortoj li enigis min en la ĉambregon tiel, ke ni ekstaris apud la fermita pordo. Mi timis, ĉar mi vidis ke ankaŭ la nekonato timas: li tenis la manon sur tenilo (ten'il'o) de sia tranĉilego. Finfine en la ĉambregon eniris Ŝipestro.

Li fermis la pordon kaj, ne rigardante flanken, ekiris al sia tablo, kie atendis lin la matenmanĝo.

oo

**obei** = *English: obey.*

## 349 **penas**

**Penas:** faras ĉion eblan.

- La herbmanĝulo **penis** forkuri de la lupoj.
- Mi **penis** kompreni pri kio ili konversacias, sed ili konversaciis alilingve (*ali'lingv'e*).

oo

– Bili, – diris la nekonato, kiu **penis** paroli sentime.

Ŝipestro ekrigardis kaj ekvidis nin. Li aliigis (*ali'ig'is*). Oni povus pensi (*pens'i*) ke li renkontis mortiton (*mort'it'o'n*) aŭ iun alian neteran estaĵon.

– Ĉu vi ne rekonas min, Bili, ĉu vi ne rekonas vian iaman samŝipanon (*sam'ŝip'an'o'n*)? – diris la nekonato.

oo

**peni** = English: try, endeavour.

## **350 nigra**

- *Nokta ĉielo estas **nigra**. Sur **nigra** ĉielo oni vidas lumantajn stelojn.*
- *Ĉu ĉiuj homoj estas **nigraj**? Ne, ne ĉiuj. Sed en Afriko loĝas multe da **nigruloj**.*
- *Post la arbar-brulego la arboj restis **ni-graj** kaj mortaj.*

oo

Ŝipestro longe respondis nenion.

– **Nigra** Hundo! – diris li finfine.

– Jes, – diris la nekonato, iom kuraĝinte.

– **Nigra** Hundo venis al sia malnova samŝipano, al sia Bili, kiu loĝas en «Admiralo Benboŭ».

– Bone, – diris Ŝipestro. Vi trovis mian spuron, kaj nun mi estas antaŭ vi. Diru, por kio vi venis?

– Mi rekonas vin, Bili, – respondis **Nigra** Hundo. – Tiu ĉi bonega knabo, kiun mi tiel ekamis, alportos al mi iom da rumo. Ni sidos kune kaj, se vi ne kontraŭas, konversacios kiel malnovaj samŝipanoj.

Kiam mi revenis kun la rumo, ili jam sidis ĉe tablo de Ŝipestro unu kontraŭ la alia. Per unu okulo **Nigra** Hundo rigardis sian malnovan amikon, kaj per la alia – la pordon: vojon por forkuro. Li ordonis al mi foriri, kaj lasi la pordon malfermata (mal'ferm'at'a).

– Por ke vi, fileto, ne subaŭskultu (sub'aŭskult'u), – diris li.

Mi lasis la duopon, kaj foriris. Longan tempon mi penis aŭskulti, sed tio kion mi aŭdis estis nur io nekomprenebla (ne'kompren'abl'a).

oo

**nigra** = *English: black.*

## 351 **laŭta**

*Se oni parolas **laŭte**, la parolon oni aŭdas de malproksime.*

*Kiam oni volas diri ion al unu, nur al unu homo, por ke aliaj ne aŭdu, oni parolas mal-**laŭte**.*

oo

Sed iom post iom la konversacio ekestis

pli kaj pli **laŭta** kaj, finfine, mi komprenis iom da vortoj. Plimulto da ili estis aĉaĵoj. Foje Ŝipestro elkriis:

– Ne, ne kaj ne! Kaj ne parolu al mi pri tio! Ĉu vi aŭdas?

Kaj poste denove:

– Se venos ĝis pendigilo (pend'ig'il'o), pendu sur ĝi ĉiuj!

Poste mi ekaŭdis eksplodon da kriaĉoj, bruon de falanta tablo, kaj krion de vundito.

oo

**laŭte** = *English: loud.*

## 352 **momento**

**Momento:** *iu tre mallonga tempo.*

– *Kiu frapas la pordon?*

– *Tio estas mi, patro.*

– *Unu **momento**, mi jam malfermas.*

oo

Post **momento** mi ekvidis Nigran Hundon, rapide kurantan al la pordo.

Ŝipestro postkuris lin. En la mano li tenis sian sabron. El vundo de Nigra Hundo iris

sango. Apud la pordo Ŝipestro suprenigis la sabron por fina, plej forta bato, kaj li dishakus kapon de la forkuranto, se ne supro de la pordo. Ankaŭ nun oni povas vidi sur ĝi spuron de tiu ĉi bato.

Per tio la batalo finiĝis. Nigra Hundo, vundita, kuris laŭ la vojo tiel rapide, ke post nelonge li ĉesis esti videbla.

Ŝipestro restis stari, senkomprene rigardante la pordon.

oo

**momento** = *English: moment, instant.*

## 353 **kelk**

**Kelk'**: *iom da.*

• *En la ĉambrego sidis kelkdeko da homoj. Kelkaj el ili kantis.*

oo

Poste li **kelk**foje fermis la okulojn per la mano, kaj revenis en la domon.

– Ĝim, – ordonis li, – rumon!

Li ne tre bone staris sur la piedoj.

– Ĉu vi estas vundita? – kriis mi.

– Rumon, – ordonis li denove. – Mi devas malaperi de ĉi tie. Rumon! Rumon!

Mi elkuris por alporti la rumon, sed, pro la timo, tio prenis iom da tempo.

Subite mi ekaŭdis ke ene de la ĉambrego io brue falis. Mi enkuris, kaj ekvidis kuŝantan Ŝipestron.

La patrino, maltrankviligita (mal'-trankvil'ig'it'a) pro la krioj kaj la batalbruo, alkuris malsupren por helpi al mi. Ni suprenigis kapon de Ŝipestro.

Liaj okuloj estis fermataj (ferm'at'a'j).

– Ĉielo, – kriis la patrino, – en nia gastejo! Kaj ĝuste kiam via patro kuŝas malsana!

oo

**kelkaj** = *English: some, few.*

## 354 **certe**

• – *Ĉu vi volas manĝi? – oni demandis min. – **Certe!** – respondis mi, ĉar mi estis ege malsata.*

oo

Ni ne sciis kiel helpi al Ŝipestro, kaj estis **certaj** ke li estas morte vundita dum la bata-

lo.

Mi penis doni al li iom da rumo, sed tio ne eblis.

Okazis tiel ke la pordo malfermiĝis, kaj eniris kuracisto Livsi, kiu venis por pririgardi mian malsanan patron.

– Sinjoro kuracisto, helpu! – kriis ni. – Kion ni faru? Kien li estas vundita?

– Vundita? – diris la kuracisto. Ne! Li estas same vundita kiel vi aŭ mi. Tio estas malsano. Kion fari! Mi antaŭdiris tion al li... Vi, sinjorino Hokins, revenu supren, al la malsanulo kaj, se eblas, diru al li nenion. Kaj mi penas revivigi tiun ĉi aĉulon... Ĝim, mi petas vin, alportu iun ujon por akvo.

Kiam mi revenis kun akvujo, la kuracisto forigis ĉion de granda kaj forta mano de Ŝipestro.

oo

**certe** = *English: certain, sure.*

## 355 **skribas**

• *En lernejoj oni instruas infanojn ne nur legi, sed ankaŭ **skribi**. Dum unua lernojaro*



oni lernas **skribi** literojn kaj vortojn. Nur poste oni ekas **reskribi** mallongajn rakontojn.

- Ĉu vi **skribas** legeble (leg'abl'e)?
- Ĉu ne povas okazi ke homoj, pro nunaj aparatoj, ne nur perdos scipovon **skribi** per la mano, sed eĉ legi man**skriba**ĵojn?

oo

Sur lia mano videblis iom da sur**skriboj**. Unu el ili diris: «Ĉion bonan al vi, Bili Bons». Iom pli supre estis desegnita pendigilo kun pendanta homo. Tiun ĉi desegnon, kiel ŝajnis al mi, oni faris kun bona kono de ĉi okazaĵoj.

– Antaŭdira desegnito, – diris la kuracisto, tuŝante ĝin. – Kaj nun, sinjoro Bili Bons, se tio vere estas via nomo, ni pririgardu vian sangon... Ĝim, – diris li al mi, – ĉu vi timas sangon?

– Ne, sinjoro.

– Bonege, – respondis la kuracisto. – Tial tenu la ujon.

Li prenis kuracistan tranĉileton, kaj malfermis vojon al sang-eliro. Multe da sango perdis Ŝipestro antaŭ ol li malfermis la okulojn, kaj ekrigardis nin.

Li rekonis la kuraciston, kaj maltrankviligis. Poste li ekvidis min kaj, ŝajne, ekestis iom pli trankvila. Poste li subite penis ekstari, kaj kriis:

– Kie estas Nigra Hundo?

– Ĉi tie estas neniu hundo, nur la malsano kiu kaptis vin, – diris la kuracisto.

oo

**skribi** = English: write.

## 356 **tro**

• Ne manĝu **tro** multe aŭ **tro** malmulte: tio venigas malsanojn.

• La ĉambro estis **tro** malgranda por tiel multaj homoj.

• Ili kantas **tro** laŭte (laŭt'e).

oo

– Vi drinkis **tro** multe da rumo. Tial, kiel mi antaŭdiris al vi, vin frapis la malsano. Ĉielo vidas ke mi faris tion sendezire, sed mi forigis morton de vi. Kaj nun, sinjoro Bons...

– Mi ne estas Bons, – diris Ŝipestro.

oo

**tro** = English: too.

## 357 pirato

*Pirato* estas unu el tiuj aĉuloj kiuj kaptas ŝipojn, mortigas la ŝipanojn, kaj prenas al si ĉion kio troviĝas sur la ŝipo.

oo  
- Bone, - diris la kuracisto, - mi konas piraton, nomo de kiu estas Bons, tial mi nomis vin tiel. Memoru kion mi diros al vi: iom da rumo certe ne mortigos vin, sed, se vi drinkos ĝin, vi volos drinkaĉi pli kaj pli.

pirato = *English: pirate, bucaner.*

## 358 ado

*ad*: tio kion oni faras dum iom da tempo.

- Legado donas multe, tre multe.
- Ĉiumatena irado plifortigos vin.
- Ekaŭdiĝis malproksima pafado.

oo  
Tial, se vi ne lasos la drinkadon, post ne

tre longa tempo vi mortos. Ĉu vi komprenas? Penu preni vin en la manojn! Kaj nun, estu tiel, mi helpos al vi supreniĝi en vian ĉambron.

Kun grandaj penoj suprenigis ni Ŝipestron, kaj kuŝigis lin sur lian dormolokon.

- Memoru, - diris la kuracisto, - vorto «rumo» kaj vorto «morto» estas samaj (sam'a'j) por vi.

Prenante mian manon li ekiris al mia malsana patro.

- Ĉu vi scias, - diris li, kiam ni fermis la pordon, - mi eligis el li multe da sango; tial li longe estos trankvila. Sepon da tagoj li kuŝu. Tio estos bone kaj por li kaj por vi. Sed duan frapon li ne eltenos.

Post iom da tempo mi venis al Ŝipestro kun trinkaĵo kaj la kuraciloj. Li kuŝis kiel ni lasis lin. Li ŝajnis al mi malforta kaj, samtempe, tre maltrankvila.

- Ĝim, - diris li, - nur vi estas viro ĉi tie. Vi scias ke mi ĉiam estis bona al vi: post ĉiu tridektagaĵo mi donis al vi monon. Jes, amiko, estas malbone al mi; mi estas lasita per ĉiuj. Do, Ĝim, vi alportos al mi iom da rumo, ĉu?

oo

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	ek	em
end	er	et	fi	ge	id	ig
iĝ	il	in	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**ad** = English: adds the idea of continuous or frequent action.

# 359 **komencas**

- Ĉiu laboro havas sian **komenc**on kaj sian finon.
- Per kiuj vortoj **komencis** ni tiun ĉi rerakonton pri «Trezorinsulo»? Ni **komencis** ĝin per vortoj «sinjoro», «insulo» kaj «trezoro».
- **Komenc**a litero de vorto «sinjoro» estas litero so.

oo


- La kuracisto... - diris mi.  
 Sed li, tre malforta, **komencis** diri malbonaĵojn:  
 - Ĉiuj kuracistoj scias nenion, - diris li. -

Ankaŭ li, tiu ĉi via vilaĝa kuracistaĉo (kurac'ist'aĉ'o), kion li komprenas pri maristoj? Mi estis en tiuj landoj, Ĝim, kie varmegas kiel apud fajro; kie homojn, ege fortajn homojn, faligas tieaj (tie'a'j) malsanoj.

oo

**komenco** = English: commence.

## 360 tremas



- La homo **tremas**. Ĉu pro timo? Ĉu pro malsano?
- Diru, leganto, ĉu vi travivis (tra'viv'is) tertremon? Ne? Tre bone! Iam pro tertremoj disfalas ne nur domoj, sed eĉ grandaj urboj...

oo

Mi estis en tiuj lokoj, Ĝim, kie montoj, pro la tertremoj, saltas kiel ŝipoj sur maltrankvila maro. Kion povas li, via kuracis-

taĉo, scii pri tiuj landoj? Rumo estis por mi ĉio: kaj manĝaĵo kaj trinkaĵo, kaj amiko, kaj kunulino. Kaj nun, se mi ne drinkos rumon, mi estos kiel malnova ŝipo, ĵetita surborden (sur'bord'e'n). Kaj mia sango falos sur vin, Ĝim, kaj sur tiun ĉi vian kuracistaĉon.

Kaj li denove komencis elkrii aĉaĵojn.

– Rigardu, Ĝim, kiel **tremas** miaj manoj. Mi povas fari nenion por ke ili ne **tremu**. Ĉu vi scias, ĉi-tage mi drinkis nenion. Tiu ĉi via kuracisto estas nura malsaĝulo, mi certigas (cert'ig'as) vin. Se mi ne drinkos, Ĝim, mi vidos timigaĵojn. Ion mi vidis jam, vere. Mi vidis maljunan Flint-on. Li staris tie, post vi. Mi vidis lin kiel vivan. Sed sciu: kiam mi vidas timigaĵojn (tim'ig'aĵ'o'j'n), mi bestiĝas.

oo

**tremi** = English: tremble, quake, shake, shiver.

## 361   **mem**

*Etaj infanoj ne ĉiam volas ke oni manĝigu ilin. – Mi **mem**, – krias la etulo, mi **mem** farution!*

oo

Via kuracisto **mem** diris ke iom da rumo ne mortigos min. Mi donos al vi oran moneron, Ĝim, kontraŭ iom da rumo!

Li petegis pli kaj pli laŭte, kaj mi timis ke mia patro ekaŭdos lin. Ĉi-tage li sentis sin tre malbone. Kuraĝigis min ankaŭ vortoj de la kuracisto ke iom da rumo ne danĝerigos Ŝipestron.

– Mi ne prenos vian monon, – diris mi, – ĉar mi sentis ion aĉan en tiuj ĉi vortoj de Ŝipestro, – pli bone vi fordonu (for'don'u) al mia patro tion kion vi devas doni al li. Mi alportos al vi la drinkaĵon, sed nur unufoje.

Mi alportis iom da rumo. Li kaptis kaj eldrinkis ĝin.

oo

**mem** = English: self.



## 362 tuj

**Tuj:** *post tre mallonga tempo.*

oo

- Bonege! - diris li. - Mi **tuj** eksentis min pli bone. Aŭskultu, amiko, ĉu la kuracisto diris kiom da tempo mi kuŝu ĉi tie?

- Ne malpli ol sepo da tagoj, - diris mi.

- Sepo da tagoj! - kriis Ŝipestro. - Se mi kuŝos ĉi tie sepon da tagoj, ili havos tempon por sendi la nigran skribaĵon. Ĉi-homoj jam elodoris (el'odor'is) kie mi troviĝas. Aĉuloj, ili ne scipovas gardi sian monon, kaj serĉas nun monon de aliuloj. Ĉu veraj maristoj faras tion? Se paroli pri mi, mi neniam disĵetas monon, kaj ne volas perdi mian havaĵon. Mi foriru de tiu ĉi elakva (el'akv'a) ŝtonego, kaj lasu (las'u) al ili nenion.

Dum tiuj ĉi vortoj li komencis malrapide supreniĝi, kaptante mian manon kun tiu forto ke mi volis krei. Tre malfacile li malsuprenigis siajn piedojn.

oo

**tuj** = English: immediately.

## 363 VOĈO

• Multaj homoj kantas, sed malmultaj el ni havas bonan **voĉon**. Bon**voĉ**ajn kantistojn aŭskultas miloj da homoj.

• Vi ĉiam rekonas **voĉon** de viaj proksimuloj, ĉu?

• Iam, pro malsano, homoj perdas sian **voĉon**, kaj ekestas neaŭdeblaj (ne'aŭd'e-bl'a'j).

• Homo, al kiu plimulto da loĝantoj donos siajn **voĉojn**, estos estro de la urbo.

oo

Sed liaj vortoj estis io alia ol lia malbone aŭdebla **voĉo**. Post kiam li eksidis, li longe povis diri eĉ ne vorton; sed fine li diris:

– Finigis min tiu ĉi kuracisto... Io bruas en la kapo. Helpu al mi kuŝiĝi (kuŝ'iĝ'i).

Sed antaŭ ol mi donis al li la manon, li denove falis sur la dormolokon, kaj iom da tempo kuŝis senparole.

– Ĝim, – diris li fine, – ĉu vi vidis ĉitage tiun mariston?

– Ĉu Nigran Hundon? – demandis mi.

– Ne. Nigra Hundo estas tre malbona homo, sed kiuj sendis lin estas multe pli

malbonaj.

Aŭskultu: se mi ne povos malaperi de ĉi tie, kaj se ili sendos al mi la nigran skribaĵon, sciu ke ili volas kapti mian havaĵujon.

Tiam vi prenu ĉevalon, kaj rajdu...

oo

**voĉo** = English: voice.

## 364 **g r a v a**

• – Lernu, knabo mia, – diras patro al sia filo, – tio **gravas**, tre **gravas**.

• La vundo estis tiel **grava**, ke la kuracisto ne estis certa pri vivo de la vundito.

• Plej **grava** vorto de vortkuniĝo (vort'kun'ig'o) staru fine de tiu ĉi kuniĝo:

*Birdkanto* (bird'kant'o) estas **kanto**, birda kanto.

*Kantbirdo* (kant'bird'o) estas **birdo**, birdo kiu scipovas kanti.

oo

Nun jam nenio gravas al mi... Rajdu vi eĉ al tiu ĉi via aĉa kuracisto, kaj diru al li ke

oni sendu soldataron (soldat'ar'o'n) por kapti miajn gastojn ene de «Admiralo Benboŭ»: ĉiujn iamajn ŝipanojn de maljuna Flint, kiom el ili restis vivaj. Mi estis helpanto (help'ant'o) de maljuna Flint, kaj nur mi scias kie troviĝas la loko. Li mem donis al mi ĉion en Savano, kiam li kuŝis antaŭmorte, same kiel mi nun. Sed vi faru nenion ĝis kiam ili sendos al mi la nigran skribaĵon, aŭ ĝis kiam vi denove ekvidos Nigran Hundon aŭ unupiedan mariston. Gardu vin, Ĝim, de tiu ĉi unupiedulo pli ol de iu alia.

– Sed kio estas tiu nigra skribaĵo, Ŝipestro? – demandis mi.

– Tio estas sciigo, amiko. Kiam ili venigos ĝin, mi diros al vi. Sed vi ne preterrigardu (preter'rigard'u) ilin, Ĝim, kaj mi donos al vi multe, tre multe.

Li komencis paroli nekomprene, pli kaj pli mallaŭte. Mi donis la kuracilon, kaj li prenis ĝin kiel infano:

– Ankoraŭ neniu maristo deziris resaniĝi kiel mi nun.

oo

**grava** = English: important, serious.

## 365 sola

*Sola: unuopa, sen iu alia.*

- *Ĉu vi scipovus vivi **sola** sur neloĝata insulo?*
- *Ne, mi ne iros tien **sola**.*

oo

Post nelonge li enfalis en maltrankvilan dormon, kaj mi lasis lin esti **sola**.

Mi ne scias kion mi farus se ĉio irus bone. Verŝajne (ver'ŝajn'e = ŝajnas esti vero) mi rakontus pri ĉio ĉi al la kuracisto, ĉar mi ĝismorte (ĝis'mort'e) timis ke Ŝipestro elmemoros siajn vortojn, kaj finigos min. Sed ĉio aliiĝis. Vespere subite mortis mia patro, kaj ni jam pensis pri nenio alia. Mi estis tiel kaptita per niaj sentoj, per veno de la konatuloj, per la enterigo, kaj pri laboro en la gastejo, ke mi ne havis tempon por pensi pri Ŝipestro aŭ timi lin.

Matene li malsupreniĝis, kaj oni povus pensi ke okazis nenio. Li manĝis, sendezire, dum sama tempo. Sed, ŝajne, li drinkis iom pli ol antaŭe, ĉar drinkaĵojn li prenis mem. Dum tio li estis tiel timiga, ke neniu kuraĝis kontraŭstari lin.

oo

**sol**a = *English: alone.*

## 366 **ebria**

**Ebria** estas kiu drinkis tro da drinkaĵoj.  
**Ebria** homo malbone staras sur siaj piedoj,  
malbone parolas, kaj komprenas ne ĉion.

oo

Vespere, antaŭ la enterigo, li, kiel ĉiam,  
estis jam **ebria**. Estis ege malfacile aŭskulti  
liajn bestaĉajn kantojn en domo kie kuŝas  
la mortinto.

Eĉ tre malfortan, ni ĝismorte timis lin,  
ankaŭ pro tio ke la kuracisto estis mal-  
proksima.

oo

**ebria** = *English: drunk, inebriated.*

## 367 mejlo

*Mejlo: (angla) 1609m.*

oo

Li troviĝis ĉe iu kelk**mejle** loĝanta mal-sanulo, kaj post morto de la patro li eĉ ne unufoje aperis apud nia domo.

Mi jam diris ke Ŝipestro estis malforta. Kaj vere, li ne nur ne resaniĝis, sed, ŝajne, pli kaj pli perdis sian forton. Malfacile malsupreniĝis li laŭ la ŝtuparo; malfacile iris al loko kie troviĝis drinkaĵoj. Iam li staris ĉe la malfermita pordo, sed dum tio li kaptis ion por ne fali.

Min li ne alparolis kaj, ŝajne, jam ne memoris siajn vortojn.

oo

**mejlo** = *English: mile.*

## 368 ema

- *Labore**ema**: kiu ĉiam volas labori.*
- *Ebri**ema**: kiu ĉiam volas esti ebria.*

- *Ĝoj**em**a*: kiu serĉas kaj trovas eblecon esti ĝoja.

oo

Sed li ekestis eĉ pli eksplod**em**a ol antaŭe. Kiam li ebriiĝis, li eligis sian sabron, kaj surtabligis ĝin. Dum tio li, ŝajne, vidis neniun ĉirkaŭ si, eniĝinte en siajn pensojn. Foje li eĉ kantis iun vilaĝan am-kanteton kiun, verŝajne, li kantis dum siaj junaj jaroj, antaŭ ol ekesti maristo.

Duan tagon post la enterigo mi eliris el la gastejo, kaj staris apud la pordo. Mi staris kaj pensis pri mia mortinta patro. Subite mi ekvidis homon kiu malrapide iras sur la vojo.

oo

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	ek	<b>em</b>
end	er	et	fi	ge	id	ig
iĝ	il	in	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**em** = English: inclination, disposition.



## 369 bastono

*Kiu iras kun **bastono**? Tio estas:*

- *Homo kiu ne vidas.*
- *Homo, piedo de kiu forestas aŭ funkcias malbone.*
- *Homo kiu timas hundojn.*

**bastono** = English: stick.

## 370 blinda

***Blinda**: kiu pro vundo aŭ malsano ne povas vidi.*

oo

Certe la homo estis **blinda**, ĉar per sia bastono li tuŝetis teron antaŭ si. Ĉu pro maljunaj jaroj, ĉu pro malsano, lia kapo estis malsuprenigita (mal'supr'e'n'ig'it'a). Mi ne povas diri kial, sed neniam en mia vivo vidis mi homon tiel timigan. Li ekstaris proksime al la gastejo, kaj per laŭta, aĉe kantanta voĉo diris:

- Ĉu povas iu bonfarulo diri al la **blinda** homo, kiu perdis siajn trezorajn okulojn en kuraĝa batalo kontraŭ malamikoj de nia patrolando Britio, en kiu loko li troviĝas nun?

- Vi troviĝas apud gastejo «Admiralo Benboŝ», bona homo, - diris mi.

- Mi aŭdas voĉon, - diris la **blindulo**, - kaj tio estas juna voĉo. Donu manon al mi, bona juna homo, kaj helpu al mi eniri la domon!

Mi donis la manon, kaj tiu ĉi aĉa senokula estaĵo kaptis ĝin ege forte. Mi tiel ektimis ke volis forkuri, sed la **blindulo** tenis min.

- Kaj nun, knabaĉo, - diris li, - venigu min al Ŝipestro.

- Sinjoro, - diris mi, - mi timas...

oo

**blinda** = *English: blind, sightless.*

## 371 **rompas**

• *Plimulto da ujoj, ene de kiuj oni surtabligas (sur'tabl'ig'as) manĝon, estas rompeblaj (romp'abl'a'j): ili rompiĝas, se oni faligas ilin.*

- *Se oni forte frapos ŝtonon per blindula bastono, iu el la du aĵoj **rompiĝos**, ĉu?*
- *Multaj maristoj perdis siajn vivojn dum ŝi**rompi**ĝoj (ŝip'romp'iĝ'o'j).*

oo  
 – Ĉu vi timas?! – Venigu min tuj; se ne, mi **rompos** vian manon!  
 ooo

**rompi** = *English: break.*

## 372 **turnas**

- *Rigardu antaŭ vi. Nun ekrigardu malantaŭen. Kion vi faris por tio? Vi **turnis** vian kapon, aŭ **turniĝis** mem.*
- *Floroj, tage, **turnas** siajn «kapojn» por «rigardi» sunon.*

oo  
 Kaj li tiel **turnis** mian manon, ke mi ekkriis.  
 – Sinjoro, – diris mi, – mi timas ne pri mi sed pri vi. Ŝipestro estas jam alia. Li sidas kun sabro antaŭ si. Unu sinjoro jam venis al

li, kaj...

- Antaŭen! - interrompis (inter'romp'is) li min (= ĉesigis mian parolon).

Neniam antaŭe aŭdis mi tiel malvarman kaj aĉan voĉon. Tiu voĉo eĉ pli timigis min.

Mi komprenis ke oni devas obei, kaj ekiris kun li al la ĉambrego kie sidis nia malsana kaj ebria pirato.

oo

**turni** = English: turn.

## 373 jen

• *Kuraĝo kaj obeemo, **jen** kion devas havi ĉiu bona maristo.*

• - **Jen** la drinkaĵo. Ni drinku pri via sano!

oo

- Envenigu min kaj, kiam li ekvidos min krii: «**Jen** estas via amiko, Bili!». Se vi ne krios, mi jen kion faros al vi! - kaj li tiel turnis mian manon, ke mi perdis la komprenon. Mi tiel timis la blindulon, ke jam ne pensis pri mia timo antaŭ Ŝipestro. Kaj, malferminte pordon de la ĉambrego mi, per

tremanta (trem'ant'a) voĉo, elkriis vortojn kiujn la blindulo ordonis al mi elkrii.

Ŝipestro suprenigis la okulojn, kaj tuj elebriiĝis (el'ebri'iĝ'is). Li penis ekstari, sed ĉe li, verŝajne, forestis forto fari tion.

– Ne gravas, Bili, sidu kie vi sidas, – diris la blindulo. – Jes, mi ne vidas, sed aŭdas mi bonege. Donu al mi vian manon... Prenu lian manon, knabo, kaj proksimigu ĝin al la mia.

Ni obeis lin. Mi vidis ke la blindulo enigis ion en manon de Ŝipestro.

oo

**jen** = English: behold! here is, are.

## 374 **eco**

- *Estas malsanoj kiuj venigas blinde**con**.*
- *Angle parolas multe pli da homoj ol Esperante. Ĉu tio okazis pro iuj bonaj **ecoj** de la angla? Ne. Tio okazis pro kuraĝ**eco** de britaj soldatoj kaj maristoj.*
- *Sed, se paroli pri **ecoj** de la angla, jen kelkaj demandoj:*

*Kial anglan literon "A" oni nomas «Ej»?*

*Kial anglan literon "E" oni nomas «I-i-i»?*

*Kial anglan literon "I" oni nomas «Aj»?!...*

*Jes, ankaŭ vi, leganto, estas jam esperantisto, kaj ankaŭ vi scias nun ke **ecoj** de nia Esperanto estas multe pli altaj ol **ecoj** de iu ajn alia lingvo.*

oo

Post tio li lasis min, kaj per granda rapideco (rapid'ec'o) elsaltis el la ĉambrego al la ĉemara vojo. Mi longe staris, aŭskultante malproksimiĝantajn (mal'proksim'iĝ'an-t'a'j'n) frapetojn de ties bastono.

Post iom da tempo Ŝipestro ekrigardis kion kuŝas en la mano.

oo

<b>aĉ</b>	<b>ad</b>	<b>aĵ</b>	<b>an</b>	<b>ar</b>	<b>bo</b>	<b>ĉj</b>
<b>dis</b>	<b>ec</b>	<b>ebl</b>	<b>eg</b>	<b>ej</b>	<b>ek</b>	<b>em</b>
<b>end</b>	<b>er</b>	<b>et</b>	<b>fi</b>	<b>ge</b>	<b>id</b>	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	<b>ind</b>	<b>ing</b>	<b>ism</b>	<b>ist</b>
<b>mal</b>	<b>mis</b>	<b>nj</b>	<b>op</b>	<b>re</b>	<b>uj</b>	<b>ul</b>
<b>um</b>						

**eco** = English: quality, state.



morto el kiuj okazis antaŭ miaj okuloj...

Mi, certe, tuj rakontis al la patrino ĉion kion mi sciis. Eblas ke mi devis rakonti tion antaŭe. Sed nun ĉio, subite, okazis mal-facila kaj danĝera.

oo

**voki** = English: call to, cry out.

## 377 **parto**

• *Kio estas postaĵo? Postaĵo (post'aĵ'o) estas tiu **parto** de homo, kiu troviĝas post li; tio estas **parto** sur kiu oni sidas.*

• *Anglio estas **parto** de Britio.*

• *Flugilo estas **parto** de flugaparato aŭ de birdo.*

• *Vorto «**part/o**» estas **parto** de Esperanta vortaro.*

oo

**Parto** de mono, restinta post Ŝipestro, se li havis monon, certe devis ekesti nia. Sed estis malverŝajne (mal'ver'ŝajn'e) ke liaj samuloj, kiel Nigra Hundo aŭ la blindu-



lo, donos al ni tiun ĉi nian parton. Ekrajdi, laŭ ordono de Ŝipestro, al kuracisto Livsi mi ne povis: ne eblis lasi la patrinon sola, sen-garda. Pri tio ne eblis eĉ pensi.

Sed resti en la domo ni ankaŭ ne ku-raĝis. Nin tremigis eĉ tik-tako de nia hor-loĝo. Ŝajnis al ni ke ni aŭdas proksimiĝan-tan iron de iu...

Penso pri tio ke en la ĉambrego kuŝas la mortinto, kaj ke ie proksime troviĝas la aĉa blindulo, kiu ĉiumomente povas reveni, suprenigis miajn harojn pro la timego.

Ni ne povis perdi la tempon.

oo

**parto** = English: part.

## 378 **decido**

• Okazas ke estro de laborejo **decidas** kunvoki siajn laborantojn por ke ili subtenu (aŭ malsubtenu) liajn gravajn **decidojn**.

oo

Ni **decidis** iri kune en la proksiman vi-

laĝeton por peti helpon. Dirite – farite (far'it'e). Ni ĵetis nin kuri.

Jam vesperiĝis. La vilaĝeto ne estis videbla el nia domo, sed ĝi estis proksima. Ankaŭ ĝi troviĝis sur la marbordo. Min tre kuraĝigis penso pri tio ke la blindulo aperis de alia flanko de la vojo kaj, ŝajne, ankaŭ revenis tien.

Ni iris nelonge, tempo de tempo starante kaj aŭskultante. Sed en ĉirkaŭaj bruetoj estis nenio danĝera.

En la vilaĝeto jam videblis lumoj, kaj mi ĉiam memoros kiel tiuj ĉi lumetoj trankviligis nin. Sed tio estis nura (nur'a) helpo kiu atendis nin tie.

oo

**decidi** = English: decide, determine.

## 379 **konsentas**

• – *Mi decidis, – diras estro al siaj laborantoj, – ke nia labortago estu iom pli longa. Kiu **konsentas** pri tio? Kiu **malkonsentas**?*

oo


Neniu el loĝantoj de la vilaĝeto **konsen-**

**t**is iri kun ni en la gastejon. Ĉiuj paroloj pri nia maltrankvilo eĉ pli timigis ilin. Nomo de ŝipestro Flint, ĝis tiam nekonata al mi, estis bone konata al ili, kaj elvokis (el'vok'is) timegon. Iuj ekmemoris ke, laborante sur herbejo apud «Admiralo Benboŭ», ili vidis sur la vojo nekonatajn homojn. La nekona-  
toj ŝajnis danĝeraj, tial la vilaĝanoj ekrapidis al siaj domoj por pli bone fermi la pordojn.



**konsenti** = *English: consent, agree.*

## 380 golfo



**Golfo** estas tiu parto de maro kiu eniras teron. Maro ene de **golfo** estas pli trankvila kaj malpli danĝera por ŝipoj kaj ŝipetoj.



oo

La patrino diris ke ŝi ne intencas perdi monon kiu estas havaĵo de ŝia senpatra jam filo.


- Vi timu kiom vi volas, sed mi kaj Ĝim, ni ne estas timuloj. Ni revenos kaj malfermos la havaĵujon, eĉ se tio venigos morton al ni. Vi faros al mi grandan bonon, sinjorino Krosli, se donos al mi tiun vian ujon. Mi enigu en ĝin nian parton de la mono.

Mi, certe, diris ke mi iros kune kun la patrino kaj, certe, ĉiuj kriaĉis ke tio estas pensmalsanaĵo (pens'mal'san'aj'o). Sed ne-niu **intencis** iri kun ni.

oo

**intenco** = English: intention.

**382 pistolo**



**Pistolo** estas pafilo negranda. Oni povas elpafi per unu mano.

oo

Ili helpis nur per tio ke donis al mi **pis-**  
**tol**on, kaj diris ke ĉevaloj, por ke ni povu  
forkuri, estos pretaj. Unu junulo ekrajdis al  
la kuracisto por peti helpon.

Mi ege timis kiam ni iris nian danĝeran  
rean vojon. Vespero estis malvarma.  
Komencis supreniĝi granda luno. Ni kom-  
prenis ke, post nelonge, ni estos bonege  
videblaj. Tial ni penis iri neaŭdeble kaj  
rapide. Renkontinte sur la vojo nenion timi-  
gan, ni venis fine al «Admiralo Benboŭ».

oo

**pistolo** = *English: pistol.*

## 383 ŝlosas



ŝlosilo

*Pardon oni povas fermi, ĉu? Jes. Sed kion  
oni faru por ke iu aliulo-malbonulo ne  
malfermu ĝin?*

*Por ke la pordo ekestu ne malfermebla  
(mal'ferm'abl'a) oni ŝlosas ĝin.*

oo


Enirinte la domon mi tuj **ŝlosis** la pordon. Ni staris en la mallumo, solaj en la domo kie kuŝas la mortinto. La patrino alportis lumigilon kaj, intertenante la manojn, ni eniris la ĉambregon.

Ŝipestro kuŝis kie ni lasis lin, kun malfermitaj okuloj, flanken ĵetinte unun manon.

oo

**ŝlosi** = *English: lock.*

**384 fenestro**



• **Fenestro** estas parto de domo tra kiu venas taga lumo.

oo  
- Fermu la **fenestron**, Ĝim, - mallaŭte diris la patrino, - eblas ke ili rigardas nin... Kaj nun, - diris ŝi, kiam mi faris tion, - oni devas preni de la mortinto ŝlosilon de ties havaĵujo... Sed volus mi scii: kiu kuraĝos tuŝi lin...

Mi malsupreniĝis al la mortinto.

oo

**fenestro** = English: window.

## 385 **papero**

• *Sur kio oni skribas? Nuntempe oni skribas sur **papero**. **Papero** aperis en Ĉinio, en jaro -105. En landojn kiel Francio aŭ Britio ĝi venis nur en 14-a jarcento.*

• *Ankaŭ **papera** mono, mono kiun oni faras ne el oro, sed el **papero**, aperis en Ĉinio. Nur komence de 18-a jarcento ĝi venis en Francion.*

oo

Apud mano de Ŝipestro kuŝis **papereto**.



Unu ĝia flanko estis nigra. Certe tio estis la nigra skribaĵo.

Mi kaptis ĝin, kaj ekvidis ke sur alia flanko de ĝi estas skribite: «Ni donas al vi tempon ĝis la deka vespere».

oo

**papero** = English: (piece of) paper.

## 386 **sono**

*Lumon oni vidas. **Sonon** oni aŭdas.*

- **Sonoj** de patrina kanto trankviligas kaj dormigas ties infanon.
- **Sonoj** de preterflugantaj flugaparatoj malhelpas al homoj dormi aŭ legi.

oo

Sammomente (sam'moment'e) nia malnova horloĝo komencis eligi **sonojn**. Tiuj ĉi subitaj **sonoj** igis nin ekstremitaj. Sed ili ankaŭ ĝojigis nin, ĉar sonis nur la sesa.

– Nu, Ĝim, – diris la patrino, – serĉu la ŝlosilon.

oo

sono = *English: sound.*

## 387 **vesto**

*Vesto estas tio kion oni portas por gardi sin kontraŭ malvarmo aŭ ĉielakvo. Pied**vesto** gardas niajn piedojn de survojaj ŝtonetoj. Kap**vesto** gardas niajn kapojn de varmiga suno.*

oo

Mi priserĉis vestojn de Ŝipestro. Tie mi trovis nur iom da malgrandaj moneroj, tranĉilon, kaj brulig-ŝtonojn. Mi jam ne sciis kion fari.

– Ĉu sub la kapo? – diris la patrino.

Kaj vere, sub la kapo pendis ŝlosilo, kiun mi tuj detranĉis per tranĉilo de Ŝipestro.

Nun ni rapidis supren, en ĉambron kie tiel longe loĝis Ŝipestro, kaj kie, de tago de lia alveno (al'ven'o), staris la havaĵujo. Tio estis marista havaĵujo sama al miloj da aliaj. Sur ĝia fermaĵo estis brulskribita (brul'skrib'it'a) litero Bo.

La havaĵujo ne estis nova. Bone videblis

ke ĝia vivo estis longa kaj tre malfacila.  
– Donu al mi la ŝlosilon, – diris la patri-  
no.

oo

**vesto** = *English: article of clothing.*

## **388 sukcesas**

- *La junulino estis lernantino tre bona, tial ŝi **sukcesis** eniri la altlernejon.*
- *«Pena laboro estas vojo al **sukceso**.»*

oo

Komence ŝi ne povis malŝlosi la havaĵojon, sed, fine, ŝi **sukcesis**, kaj unumomente deĵetis la fermaĵon.

Antaŭ ĉio ni ekvidis vestaĵon tre bonan kaj, laŭ vortoj de la patrino, eĉ ne unufoje vestitan (vest'it'a'n). Sub la vestaĵo kuŝis multaj aliaj aĵoj; inter ili duo da pistoloj, kaj kelkaj alilandaj horloĝoj. Sed ni serĉis ne tion.

Sube ni ekvidis ion similan al aro da paperoj, bone gardataj de malsekeco, kaj ujon kun oraj moneroj.

oo

**sukceso** = English: success.

## **389 rabas**

**Rabas:** *perforte (per'fort'e) prenas de aliuo ties havaĵon.*

oo

– Mi montros al tiuj ĉi **rab**istoj ke mi estas malsama al ili, – diris la patrino. – Mi prenos nur kion la mortinto devis doni al ni, kaj eĉ ne unu moneron pli. Tenu ujon de sinjorino Krosli!

Ŝi komencis elpreni monerojn, kaj ĵeti ilin en la ujon kiun mi tenis. Tio estis malfacila laboro kiu prenis multe da tempo. Ĉi tie troviĝis moneroj de multaj landoj kaj tempoj. Britaj moneroj estis plej malmultaj, sed la patrino konis nur ilin.

oo

**rabi** = English: rob, take by force.

## 390 **o n o**

***Ono** (on'o) estas parto de...*

*Du**ono** = 1/2; tri**ono** = 1/3; kvar**ono** = 1/4; dek**ono** = 0.1;*

oo

Kiam ŝi elprenis jam du**o**n on (du'**on**'o'n), mi subite kaptis ŝian manon (man'o'n). En la nokta trankvilo aperis sono (son'o) kiu ekmalvarmigis (ek'mal'var-m'ig'is) mian sangon (sang'o'n): frapetoj de blindula bastono (baston'o) sur la vojo, ŝtoniĝinta (ŝton'iĝ'int'a) pro la malvarmo.

oo

***ono** = English: fraction.*

## 391 **m o v a s**

• *Homo **moviĝas** (**mov**'iĝ'as) ĉiam, eĉ kiam li dormas.*

• *Por iri oni **movas** siajn piedojn. Por preni ion oni **movas** sian manon. Por ekvidi*

oni **movas** la okulojn.

oo  
La frapetoj proksimiĝis. Ni aŭskultis ilin  
ĉesinte **movi**ĝi. Poste eksonis laŭta frapo ĉe  
pordo de nia gastejo. Post tio la pordo ek-  
**movi**ĝis kaj ekbruetis: la blindulo penis  
eniri.

oo  
**movo** = English: move.

## 392 **silento**

- *Ĉu homoj parolas ĉiam? Ne, ne ĉiam. Iam ili **silentas**.*
- – **Silentu!** Al neniu rakontu kion vi eksciis. **Silentu** eĉ se oni batos vin.

oo  
Venis **silento**, kaj poste denove ekaŭdiĝis  
frapetoj de la bastono. Al nia nepriskribebla  
(ne'pri'skrib'abl'a) ĝojo ili nun malproksimiĝis  
kaj, post nelonge, ek**silent**is.  
– Patrino, – diris mi, – prenu ĉion, kaj ni  
forkuru.

Mi estis certa ke la ŝlosita pordo ŝajnis nekomprenebla al la blindulo (ne'kompren'e-bl'a). Mi timis ke li venigos ĉi tien sian kunularon (kun'ul'ar'o'n). Kiel bonas ke mi elpensis ŝlosi la pordon! Tion povis kompreni nur kiu jam konas tiun ĉi timigan blindulon.

Sed la patrino, senrigarde al sia timo, konsentis preni eĉ ne unu moneron pli ol ŝi devis preni kaj, samtempe, ŝi ne volis preni malpli. Ŝi diris ke ankoraŭ ne estas la sepa horo, kaj ke ni havas ankoraŭ multe da tempo.

oo

**silenti** = *English: silent.*

## 393 **fajfas**

• *Por voki sian hundon homo eligas sonon kiu nomiĝas **fajfo**.*

• *Estas homoj kiuj ne kantas sed **fajfas**. Tiun **fajfadon**, eĉ se ĝi estas bona, konsentas aŭskulti ne ĉiu homo.*

oo

Tiel ni konversaciis ĝis ekaŭdiĝis longa

kaj nelaŭta **fajfo**, kiu sonis de iu malproksima altaĵeto. Ni ĉesis konversacii.

– Mi prenos kion mi sukcesis elpreni, – diris la patrino, eksaltante.

– Tial mi prenos ankaŭ tion, – diris mi, prenante la paperojn.

Post momento ni jam malsupreniĝis (mal'supr'e'n'iĝ'is) tra la mallumo. Mi malfermis la pordon, kaj ni venis al la vojo. Oni povis perdi eĉ ne momenton. Luno jam blindige lumigis la altaĵetojn.

oo

**fajfi** = *English: whistle, pipe.*

## 394 **kvazaŭ**

• *Iam infano prenas desegnojn, kaj desegnas, **kvazaŭ** ĝi estas vera desegnisto. Sed ĝi ne estas desegnisto.*

• *Alifoje ĝi «kuracas» iun infanon, **kvazaŭ** kuracisto.*

oo

Nur apud pordo de la gastejo restis ankoraŭ iom da mallumo, **kvazaŭ** por malvidebligi



(mal'vid'ebli'gi'i) nian eliron. Sed tio ne estis ĉio: ne tro malproksime ekaŭdiĝis rapida iro.

Ni ekrigardis tien, kaj ekvidis saltantan kaj proksimiĝantan lumeton: iu portis lumigilon.

– Fileto, – diris la patrino subite, – prenu la monon kaj kuru. Mi sentas ke mi falas...

«Jen la fino», – ekpensis mi.

Vi certe komprenas kion mi pensis tiam pri mia patrino: pri ŝia antaŭnelonga (antaŭ'ne'long'a) senpripensa (sen'pri'pens'a) kuraĝo, kaj pri ŝia nuna malforteco.

oo

**kvazaŭ** = English: as it were.

## 395 **trans**

**Trans** = aliflanke (ali'flank'e) de...

• Onidire **trans** la maro loĝas homoj triokulaj.

• Por veni al la **trans**monta vilaĝo iru supren, supren, poste malsupreniru.

• Kiel oni venas **trans** riveron, (sur alian ĝian bordon)? Ĉu per ŝipeto? Ĉu per iu **trans**riveraĵo (**trans**'river'aĵ'o)?



tis pli forta ol mia timo. Mi, tre singarde el**tiri**ĝis el sub la transriveraĵo, kaj ekkuŝis post la kreskaĵoj. De ĉi tie mi bone vidis vojon antaŭ la gasteja pordo.

Aperis malamikoj. Sep- aŭ ok-opaj, ili rapide proksimiĝis, laŭte frapante per siaj piedvestoj. Homo kun la lumigilo kuris antaŭ ĉiuj. Lin postkuris triopo intertenanta la manojn. Mi ekpensis ke unu el la triopo estas la blindulo. Poste mi ekaŭdis ties voĉon, kaj komprenis ke mi ne eraris.

– Rompu la pordon! – kriis li.

– Jes, sinjoro! – respondis duo aŭ trio.

Ili ĵetis sin al pordo de «Admiralo Benboŭ». Homo kun la lumigilo kuris malantaŭe. Ĉe la pordo mem ili ekstaris kaj komencis mallaŭtan konversacion.

oo

**tiri** = *English: draw, pull.*

## 397 **miras**

Oni **miras** kiam vidas tion kion oni ne atendis vidi.

- *Certe ankaŭ vi estos ege mirigita, se iu*

*hundeto diros al vi: «Bonan tagon, sinjoro (sinjorino)!»*

oo

Verŝajne ilin **mirigis** la neŝlosita (ne'ŝlos'it'a) pordo.

Poste denove ekaŭdiĝis ordonoj de la blindulo. Lia voĉo iĝis pli kaj pli laŭta.

– En la domon, en la domon! – kriis li.

Kvaro aŭ kvino eniris la domon; duopo restis sur la vojo kune kun la timiga blindulo. Post mallonga silento ekaŭdiĝis krio de **mir**ego (**mir**'eg'o): unu el la voĉoj kriegis:

– Bili estas morta!

Sed la blindulo denove alkriaĉis ilin pro ilia malrapidemo (mal'rapid'em'o).

– Traserĉu lin, vi, nenifaruloj! Aliaj supren, al la havaĵujo! – ordonis li.

oo

**miri** = English: wonder, marvel at.

## 398 **tuta**

**Tuta**: enhavanta ĉion:

- Ili drinkis kaj kantis la **tutan** vesperon.

• Ĉu patrino de Ĝim prenis **tutan** monon de Ŝipestro?

• **Tutajn** tagojn iris li tien kaj reen laŭ la mara bordo.

• Ĉu Esperanto volas esti lingvo **tuthomara** (**tut**'hom'ar'a) aŭ nur interhoma?

Esperanto **tute** ne volas esti lingvo **tuthomara**. Ĝi volas esti dua lingvo de ĉiu homo.

• Kiam la hundo eliris el la rivero, ĝi estis **tute** malseka.

oo

Ili ekkuris sur nia malnova ŝtuparo; ŝajne la **tuta** domo tremis pro iliaj piedfrapoj. Poste denove ekaŭdiĝis mirigitaj voĉoj. Fenestro en ĉambro de Ŝipestro frape malfermiĝis, kaj malsupren falis la rompaĵoj ('romp'aĵ'o'j). El la fenestro eliĝis homo. Lia kapo estis bone videbla ĉe lumo de luno. Li kriis al la blindulo, staranta malsupre, sur la vojo:

– Hej, Pju, iu estis ĉi tie antaŭ ni!... Oni jam priserĉis la havaĵojn de supro ĝis la subo!

– Ĉu **tio** estas surloke? – elmuĝis Pju.

– Mono estas ĉi tie.

– Al hundoj la monon, mi parolas pri paperoj de Flint!

– Paperoj ne videblas, – respondis la homo.

– Hej vi, malsupre, rigardu ĉu ili troviĝas ĉe la mortinto! – kriis la blindulo.

Alia rabisto, verŝajne el kiuj restis sube, aperis ĉe pordo de la gastejo.

– Oni traserĉis lin antaŭ ni, – diris li, – al ni oni lasis nenion.

– Tio estas havantoj de la gastejo kaj ilia filaĉo! – kriis Pju, – kial mi ne eligis liajn okulojn! Ili estis ĉi tie antaŭnelonge. Kiam mi volis eniri, la pordo estis ŝlosita. Serĉu ilin, knaboj!

– Jes, ili estis ĉi tie: ili lasis brulantan lumigilon, – diris homo en la fenestro.

– Serĉu! Serĉu! Traserĉu la **tutan** domon! – kriis Pju, frapante per sia bastono.

Post tio en nia malnova gastejo komenciĝis vera disrompiĝo (dis'romp'iĝ'o). Piedfrapoj sonis en ĉiuj partoj de la domo. Aŭdiĝis bruego de falantaj aĵoj; pordoj supre kaj malsupre frapis tiel ke eĉ ĉirkaŭaj ŝtonegoj resonis tiun ĉi bruon. Sed, post iom da tempo, la homoj, unu post la alia, eliris sur la vojon, kaj diris ke trovis neniun kaj nenion.

Ĉi-momente de malproksimo denove ekaŭdiĝis la sama fajfo, kiu tiel timigis mian patrinon kaj min kiam ni prenadis (pren'ad'is) monon de la mortinto.

Ĉi-foje ĝi sonis dufoje. Ĝis tiam mi pensis ke per tiu ĉi fajfo la blindulo sendas siajn kunulojn antaŭen.



**tuta** = *English: whole, entire.*

## 399 rimarkas

- *Li penis (pen'is) teni sin trankvila, sed mi **rimarkis** ke li timas.*
- *Preterflugis ŝtono. Oni **rimarkis** de kie ĝi estis ĵetata.*



Sed nun mi **rimarkis** ke la fajfo venis de tiu parto de la altaĵo kiu rigardas la vilaĝeton, kaj ekpensis ke tio estas sciigo pri danĝero.

– Tio estas Derk, – diris unu el la rabistoj, – ĉu vi aŭdas? Li fajfas dufoje... Oni devas forkuri, knaboj.

– Ĉu?! – kriis Pju, – sed Derk ĉiam estis malsaĝulo kaj timulo. Oni ne devas obei Derkon. Ili estas ĉi tie. Ili ne povis forkuri malproksimen. Vi devas trovi ilin. Serĉu, hundoj, serĉu! – kriis li. – Ho, se mi havus la okulojn!..

Tiu ĉi krio iom kuraĝigis la rabistojn.

Duopo da ili komencis ĉirkaŭrigardi la apud-  
doman aron da brulaĵoj, sed moviĝis ili ege  
malrapide. Ŝajnis al mi ke ili pli pensis pri  
forkuro ol pri la serĉo.

oo

**rimarki** = *English: notice*

## 400 **agas**

*Homoj **agas** per siaj manaj, piedaj kaj  
pensaj fortoj.*

- *Landestroj, onidire, **agas** por bono de  
siaj landoj.*
- *Esperantistoj **agas** por ke homoj kom-  
prenu unu alian.*
- *«Estas homoj kiuj **agas** por vivi, estas  
homoj kiuj vivas por **agi**.»*

oo

*Aliaj staris sur la vojo, ne sciante kion  
fari.*

*– En niaj manoj troviĝas miloj, sed vi  
agas kiel senkapuloj! Se vi trovos la paperojn  
vi estos pli riĉaj ol landestro de Britio mem!*



La paperoj estas ĉi tie, proksime al vi; vi mem scias tion; sed vi deflankiĝas (de'flank'iĝ'as), kaj penas forkuri!

Inter vi troviĝas neniu kuraĝulo kiu konsentis veni al Bili kaj doni al li la nigran skribaĵon. Tion faris mi, blindulo! Kaj pro vi mi perdas nun mian monon!

oo

**agi** = *English: act, behave.*

## 401 **veturas**

*Ĉu ankaŭ nun homoj iras piede de urbo al urbo?*

*Jes, sed... Sed plimulto da homoj ne iras; ili **veturas**. Per kio oni **veturas**? Antaŭe oni **veturis** sur bestoj aŭ en **veturiloj** tirataj (tir'at'a'j) per bestoj. Oni **veturis** ankaŭ per ŝipoj. Nur poste aperis tiuj surteraj, subteraj kaj flug-**veturiloj**, per kiuj **veturas** nun tre multaj homoj.*

oo

Mi vivas senmone, kaj elpetas monereton por iom da rumo, kiam mi povus **veturadi** kiel

landestro! Se ne via hunda timemo (tim'em'o), vi jam kaptus tiujn ĉi homaĉojn (hom'aĉ'o'j'n)!

– Sed la moneroj estas ĉe ni, – diris unu el ili.

– Kaj la paperojn ili, verŝajne, enigis ien, – aldonis alia. – Prenu la monon, Pju, kaj ĉesu kriaĉi.

Kaj vere, Pju agis kiel pensmalsanulo (pens'mal'san'ul'o). La vortoj de la rabistoj eĉ pli eksplodigis lin. Li suprenigis sian bastonon kaj, blinde ĵetante sin sur siajn kunulojn, komencis disdoni batojn.

Tiuj, de sia flanko, respondis al la aĉulo per ne malpli aĉaj vortoj, kaj penis elkapti bastonon el manoj de la blindulo.

oo

**veturi** = English: travel.

## 402 **S a V a s**

*Sur bordo de rivero aŭ de maro, kien dum varmaj tagoj venas multe da homoj, oni povas vidi **sav**istojn. Ilia laboro estas **savi** vivojn de tiuj kiuj eniras la akvon, sed ne scipovas mem-stare (mem'star'e) reveni el ĝi.*

oo

Tiu ĉi okazaĵo estis **savo** por ni. Dume, de la altaĵeto, de flanko de la vilaĝo, ekaŭdiĝis sonoj de kurantaj ĉevaloj. Samtempe ie malproksime oni ekpafis.

Tio estis tria sciigo pri proksima danĝero. La piratoj ekkuris. Iuj el ili kuris al la maro, aliaj – supren, sur la monteton.

Post nelonge sur la vojo restis nur Pju. Ili lasis lin sola. Eblas ke ili pensis nur pri si mem, eblas ke ili faris tion intence, pro liaj batoj kaj kriaĉoj.

Restinte sola li ekfrapis per sia bastono la vojon kaj, kun manoj antaŭen, iris kaj vokis siajn kunulojn. Fine li tute perdis la vojon, kaj ekkuris al la vilaĝeto.

Li preterkuris min parolante:

– Ĝoni, Nigra Hundo, Derk... – Li diris ankaŭ aliajn nomojn.

oo

**sav**i = *English: save.*

## 403 ja

«**Ja**» estas vorto kiu plifortigas diraĵon.

• – **Ja** mi diris al vi, knabaĉo (knab'aĉ'o):  
ne iru, ne iru tien!

oo

– Vi **ja** ne ĵetos maljunan Pju, amikoj miaj, vi **ja** ne lasos maljunan Pju!

Sonoj de la kurantaj ĉevaloj aŭdiĝis jam de supro de la monteto. Aperis kvin aŭ ses rajdantoj, lumigitaj per luno. Ili kuregis malsupren. Nur nun la blindulo komprenis ke li kuras ne tien. Kriante li returnis, alkuris ĉevojan (ĉe'voj'a'n) ĉielakvaĵon (ĉiel'akv'aĵ'o'n), kaj falis en ĝin; sed tuj elsaltis kaj, tute perdiĝinte, ĵetis sin sur la vojon, sub piedojn de ĉevalo kiu kuris antaŭ ĉiuj. La rajdanto penis savi lin, sed jam ne scipovis. Antaŭmorta krio de la blindulo ŝajne distranĉis la nokton. Kvar ĉevalaj piedoj forĵetis lin for. Li falis flanken, malrapide turniĝis, kaj ĉesis moviĝi.

Mi eksaltis sur la piedojn, kaj vokis la rajdantojn. Mi tuj rekonis ilin. Rajdanta post ĉiuj estis sama junulo el la vilaĝeto, kiu konsentis rajdi al kuracisto Livsi.

Aliaj estis soldatoj, gardantaj la maran bordon, kiujn la junulo renkontis survoje.

oo

**ja** = English: indeed! certainly, rather.

## 404 **sufiĉas**

- – *Ĉu la manĝo **sufiĉas** por vi?*
- *Jes, **sufiĉas**: ja mi ne manĝas tro multe.*
- – ***Sufiĉas!** Mi jam ne volas aŭskulti vin!*

oo

Li havis **sufiĉe** da saĝo por voki ilian helpon.

Onidiroj (oni'dir'o'j) pri iu ŝipo en Fiŝista Ŝtono jam venis al bordgardista (bord'-gard'ist'a) estro, sinjoro Dans, kaj vojo al la golfo preteriris nian gastejon. Dans tuj ekrajdis tien kun siaj homoj. Tiel saviĝis mi kaj mia patrino.

Pju estis morta. Mian patrinon ni alportis en la vilaĝeton. Tie oni rekomprenigis (re'kompren'ig'is) ŝin per malvarma akvo. Kaj ŝi tuj denove komencis paroli pri mono kiun ŝi

ne sukcesis elpreni.

Dume la bordgardista estro ekrajdis kun sia soldataro al Fiŝista Ŝtono. La soldatoj, atendente kontraŭpafojn (kontraŭ'paf'o'j'n), deĉevaliĝis (de'ĉeval'iĝ'is), kaj iris singarde. Tial, kiam ili venis finfine al la golfo, la ŝipo jam sukcesis debordiĝi, troviĝante (trov'iĝ'ant'e) ankoraŭ **sufiĉe** proksime.

Dans alvokis ĝin. Responde sonis voĉo, kiu sciigis lin (li'n) ke estas ne tro saĝe stari sur loko lumigita tiel bone.

oo

**sufiĉi** = *English: sufficient.*

## 405 kuglo

*Kuglo estas aĵo kiun oni elpafas el pistolo aŭ el alia ne tro granda pafilo.*

oo

Kaj tuj ties kapon preterfajfis **kuglo**. Post nelonge la ŝipo malaperis.

Sinjoro Dans, laŭ siaj vortoj, «staraĉis sur la bordo kiel elakvita fiŝo». Li tuj sendis homon por voki bordgardistan ŝipon.

– Sed tio ne helpas, – diris li, – ili forku-  
raĉis, kaj oni ne kaptos ilin. Sed mi ĝojas ke  
ni suriretis (sur'ir'et'is) piedon de sinjoro Pju.  
(Mi jam rakontis al li pri la blindulo).

Kune kun ili mi revenis al «Admiralo Ben-  
boŭ». Malfacilas priskribi kiun disrompon tro-  
vis ni tie. La rabistoj, serĉantaj nin, deĵetis  
eĉ la horloĝon.

oo

**kuglo** = English: bullet, shot.

## 406 **krom**

• *Mi trinkas nenion **krom** akvo. Li drinkas  
nenion **krom** rumo.*

• *En la domo estis neniu **krom** Ĝim, ties  
patrino, kaj la mortinto.*

• *Kion, **krom** mono, povis serĉi la rabis-  
toj?*

oo

Jes, ili forprenis kun si nenion **krom** oraj  
moneroj de Ŝipestro, kaj **krom** nia mono, sed  
mi tuj komprenis ke de nun la gastejo ne es-  
tas jam funkciebla (funkci'abl'a).



**krom** = *English: apart from, except.*

## 407 **bezonas**

• *Kion oni **bezonas** por resti viva sur neloĝata (ne'loĝ'at'a) insulo? Oni **bezonas** akvon, manĝon, vestojn kaj... kaj multe da scioj.*



Sinjoro Dans longe povis kompreni ne-nion.

- Vi diras, ke ili prenis la monon. Diru al mi, Hokins, kion ili **bezonis**? Ĉu ili ankoraŭ iun monon serĉis?

- Ne, sinjoro, ne monon, - respondis mi, - tio kion ili serĉis troviĝas ĉi tie, en mia vestaĵo. Kaj, se diri veron, mi volus enigi tion en iun alian, pli sendanĝeran lokon.

- Bone, knabo, - diris li, - donu tion al mi, se vi volas.

- Mi volus doni tion al kuracisto Livsi... - komencis mi.





**bezoni** = English: (have) need (of).

## 408 **gentlemano**

• Vorto **gentlemano** venis el Britio. **Gentlemano** estas homo kiu scias kiel vivi inter homoj gravaj kaj multhavaj. Li scias kiam oni suprenigas la kapveston, kiam oni donas manon al virino... sed ne nur. **Gentlemano** diras veron, kaj ĉiam agas laŭ vorto kiun li antaŭe konsentis doni.

oo

- Bone, tre bone, - interrompis (inter'romp'is) li min. - Kuracisto Livsi estas homo bona kaj grava. Li estas **gentlemano**. Ŝajnas ke ankaŭ mi devas veni kaj sciigi lin aŭ sinjoron Treloni pri la okazaĵoj, ĉar okazis tiel ke Pju mortis. Mi havas tute nenion kontraŭ tio, sed povas troviĝi homoj kiuj diros ke mi faris ne ĉion por savi ties vivon... Ĉu vi scias, Hokins, rajdu kun ni. Mi kunprenos vin, se vi volas.

Mi tuj konsentis, kaj ni ekiris en la vilaĝeton kie troviĝis la ĉevaloj. Dum mi ĝisrevidis (ĝis're'vid'is = diris «ĝis revido») la patrinon, ĉiuj soldatoj jam surĉevaliĝis.

– Doger, – diris sinjoro Dans, – via ĉevalo estas bona. Prenu tiun ĉi kuraĝulon.

Tuj kiam mi eksidis post Doger, eksonis ordono, kaj ni ekrajdis al domo de kuracisto Livsi.

oo

**ĝentlemano** = *English: gentleman.*

## 409 **haltas**

*Kion oni diras pri veturilo kiu veturis, veturis, kaj... ĉesis veturi? Oni diras ke ĝi **haltis**.*

oo

Ni rajdis rapide kaj, fine, **haltis** ĉe domo de la kuracisto. Fenestroj de la domo estis mallumaj. Sinjoro Dans ordonis al mi desalti la ĉevalon, kaj frapi la pordon. Doger helpis al mi deĉevaliĝi.

oo

**halto** = *English: halt, stop.*

## 410 **servas**

• *Ĉu soldatoj... laboras? Ne, soldatoj ne laboras. Ili **sevas**.*

• *Gravaj kaj multhavaj homoj faras nenion ene de siaj domoj por ke aĵoj troviĝu sur siaj lokoj, kaj por ke tagmanĝo venu bon-tempe. Ĉiujn laborojn faras iliaj **geservistoj** (serv'ist'o'j).*

• *Aĵoj kiuj **servas** al ni dum la manĝo nomiĝas manĝilaro (manĝ'il'ar'o = aro da iloj por manĝi).*

oo

Al la pordofrapoj eliris la **servistino**.

– Ĉu ni povas vidi kuraciston Livsi? – demandis mi.

– Ne, – respondis ŝi, – li estis ĉi tie tage, sed nun li troviĝas ĉe sinjoro Treloni.

– Ĉi-okaze ni veturu tien, – diris sinjoro Dans.

Loĝloko de sinjoro Treloni ne estis malproksima. Mi eĉ ne surĉevaliĝis, sed kuris apud ĉevalo de Doger.

oo

**servi** = English: serve.

## 411 **blanka**

*Nokta ĉielo ne estas **blanka**. Ĝi estas nigra. Sed kio estas **blanka**?*

- **Blanka** estas tiu aĵo kiu falas de ĉielo dum tre malvarma parto de jaro. Tiu aĵo **blankigas** tiam tutan teron.

- Suproj de ege altaj montoj estas **blankaj** ĉiam.

- Ĉu «**blanka**» estas «malnigra»?

oo

Preterkuris pordego de granda ĉirkaŭdoma (ĉirkaŭdom'a) ejo. Longa, lumigita per luno aro da apudvojaj (apud'voj'a'j) arboj kuris preter **blankaj** dometoj de la servistaro (serv'ist'ar'o) al domo de sinjoro Treloni.

Sinjoro Dans deĉevaliĝis. Oni tuj lasis nin eniri. Servisto venigis nin en la libroĉambron. Sinjoro Treloni kaj kuracisto Livsi sidis tie ĉe varma fajro. Neniam antaŭe vidis mi sinjoron Treloni tiel proksime.

oo

**blanka** = English: white.

## 412 futo

*Futo: (angla) 0,304m.*

oo  
Tio estis viro pli ol ses futoj alta, ne maljuna, kun bone videblaj spuroj de longaj kaj danĝeraj estadoj (est'ad'o'j) ene de malproksimaj landoj.

- Eniru, sinjoro Dans, - diris li.
- Bonan vesperon, Dans, - diris la kuracisto.

oo

**futo** = English: foot.

## 413 vento

**Vento** estas tiu forto kiu movigis (kaj eĉ nun movigas) ŝipojn kaj ŝipetojn.

Ŝajnas ke ankaŭ nun forto de **vento** povas doni multon al homaro, ĉar nuna bruligado da ege multaj brulaĵoj venigas al Tero, onidire, varmigajn malbonojn. Unu el la malbonoj, onidire, estas tiuj **ventegoj** kiuj faligas

*arbojn, domojn, kaj ĵetas ŝipojn sur marajn  
bordojn.*

oo

– Ho, tio estas vi, amiko Ĝim, – diris li,  
– kiu bona **vento** alportis vin ĉi tien?

Estro de la bordgardistoj ekstaris sol-  
date, manojn malsupren, kaj rakontis, kiel  
lernanto en lernejo, ĉion kio okazis al ni.

Vidus vi kiel interrigardis la ĝentlemanoj  
dum ties rakonto! Ili aŭskultis ĉiun lian vor-  
ton kaj, kiam ili ekaŭdis ke mia patrino  
ekiris reen en nian domon, kuracisto Livsi  
frapis sian piedon, kaj sinjoro Treloni kriis  
«bonege!».

Li jam delonge lasis sian sidlokon, kaj  
iradis tien kaj reen tra la ĉambro; kaj la ku-  
racisto, kvazaŭ por aŭdi pli bone, deprenis  
de la kapo sian hararaĵon (har'ar'aĵ'o'n)

oo

*vento = English: wind.*

## 414 **ku**tim**o**

- Homoj, **kutime**, dormas nokte, kaj laboras tage.
- Kiam oni renkontas konatulon oni, **kutime**, diras «Bonan tagon, sinjor(in)o!»
- Dum 17-a jarcento viroj, laŭ **kutimo** de kelkaj landoj, portis sur la kapo blankajn, ne siajn harojn.
- Ĉu vi konas **kutimon** diri «Estu sana!» antaŭ ol ekdrinki? Ĉu vere **kutimo** drinki alportas sanon?

oo

Estis ne**kutime** vidi liajn mallongajn nigrajn harojn.

– Sinjoro Dans, – diris Treloni, – vi agis kiel oni devas agi. Mortigo de unu el plej sangaj aĉuloj estas ago kuraĝa. Nur tiel oni devas neniigi ilin!... Hokins, vi, kiel mi vidas, ankaŭ ne estas timulo.

– Se mi komprenis bone, Ĝim, – diris la kuracisto, – aĵo, kiun serĉis la rabistoj, troviĝas ĉi tie, ĉe vi. Ĉu?

– Jen ĝi estas, sinjoro, – diris mi, donante al li la paperojn, bone gardatajn kontraŭ malsekeco.

La kuracisto ĉirkaŭrigardis la aĵon de ĉiuj

flankoj. Ŝajne li dezirus kiom eble rapide trarigardi la paperojn. Sed li venkis sin, kaj trankvile enigis la aĵon en sian veston.

– Sinjoro Treloni, – diris li, – post kiam Dans drinkos iom da malforta drinkaĵo, li certe devos reveni al siaj devoj. Ĝim Hokins noktos ĉe mi. Se vi ne kontraŭas, mi petos ke oni donu al li vespermanĝon.

– Certe, faru bonon al mi, Livsi, – respondis sinjoro Treloni, – Hokins montris sin de plej bona flanko.

Antaŭ mi oni surtabligis multe da bongustaĵoj. Dume Dans foriris, aŭskultinte sufiĉe multe da bonaj vortoj.

– Nu, Treloni...

– Nu, Livsi... – samtempe diris la kuracisto kaj sinjoro Treloni.

oo

**kutimo** = *English: custom.*

## 415 **ord**o

• *Bona ŝipestro subtenas **ordon** sur sia ŝipo: ĉiu ŝipano obeu sian estron, ĉiu aĵo troviĝu sur sia loko.*





Foje, apud Trinidado, mi mem, per miaj okuloj vidis de malproksimo liajn velojn. Sed nia ŝipestro ektimis, kaj ni tuj revenis en Port-of-Spejn.

- Mi aŭdis pri li ĉi tie, en Anglio, - diris la kuracisto. Sed jen estas demando: ĉu li havis monon?

- Monon! - kriis sinjoro Treloni, - ĉu vi ne aŭdis kion rakontis Dans? Kion povis serĉi tiuj ĉi aĉuloj se ne monon? Por kio, krom mono, ili danĝerigus (danĝer'ig'us) siajn vivojn?

- Post nelonge ni scios por kio, - respondis la kuracisto, - sed vi tiel krias ke ne donas al mi diri eĉ vorton. Jen kion mi volus kompreni: se ĉi tie, ene de mia vesto, troviĝas ŝlosilo, helpe de kiu oni povas ekscii kie troviĝas trezoroj de Flint... Ĉu ili estas grandaj?

- Ĉu ili estas grandaj! - kriis Treloni, - aŭskultu:

oo

**velo** = *English: sail.*

## 417 vojaĝo

*Veturo ne estas vojaĝo. Veturo estas nur parto de vojaĝo. Homoj vojaĝas al malproksimaj landoj, kaj ene de ili, por konatiĝi kun vivo de lokuloj (lok'ul'o'j), kun iliaj kutimoj, por priskribi lokajn bestojn, aŭ... por rigardi tion kion oni povas vidi nur tie.*

oo

Se estas vero ke en niaj manoj troviĝas ŝlosilo, pri kiu vi parolas, mi tuj, en ŝiphaltejo (ŝip'halt'ej'o) de Bristol, prenos ŝipon, kaj kune kun vi kaj Hokins ekvojaĝos kapti tiujn ĉi trezorojn, eĉ se ni devos serĉi ilin tutan jaron!

– Bonege, – diris la kuracisto. – Ĉi-okaze, se Ĝim konsentas, ni trarigardu la paperojn.

Kun tiuj ĉi vortoj li prenis el sia kuracista ujo tranĉileton, kaj elprenis la paperojn.

– Antaŭ ĉio, se vi konsentas, ni trarigardu tion ĉi, – diris la kuracisto.

Li vokis min, kaj mi lasis tablon ĉe kiu mi vespermanĝis, por preni parton en la pririgardo. Sinjoro Treloni kaj mi scivole rigardis, starante post la kuracisto.

Sur unua papero, el kunigaĵo (kun'ig'aĵ'o) da ili, videblis nur iuj skribaĉoj. Ŝajnis ke oni skribis ilin pro nenifarado (neni'far'ad'o).

Inter aliaj estis ĉi tie vortoj kiujn ni vidis sur mano de Ŝipestro: «Ĉion bonan al vi, Bili Bons».

Estis ankaŭ aliaj surskriboj: «Rumo sufiĉas».

oo

**vojaĝo** = *English: journey.*

## 418 ricevas

**Ricevas:** *prenas kion oni donas.*

• – *Sinjoroj, mi ricevis ordonon iri per nia ŝipo al neloĝata insulo. Post la vojaĝo ĉiu el vi ricevos dudekon da oraj moneroj.*

oo

Kaj: «Ĉe Palm-Ki li ricevis kion li devis ricevi». Estis ankaŭ aliaj surskriboj, tute ne kompreneblaj, plejparte unuvortaj. Kontraŭ mia volo mi pensis kiu li estis, kiu ricevis «kion li devis ricevi» kaj kion li devis ricevi. Ĉu, eble, tranĉilon de malantaŭe?

– Nu, el tiu ĉi papero ni ne multon ekscios, – diris sinjoro Livsi.

En deko aŭ dek-duo da postaj paperoj

troviĝis nekomprenaj por mi enskriboj.

Sur unu flanko de ĉiu el ili staris tago, sur la alia – nombro: same kiel kutimas ĉe librotenistoj (libr'o'ten'ist'o = isto kiu priskribas havaĵojn).

oo

**ricevi** = *English: receive.*

## 419 klare

**Klara:** travidebla; bone videbla; komprenebla.

• La riverakvo estis tiel **klara**, ke bone videblis la oraj fiŝetoj.

• Ĉe luna lumo mi **klare** (= bone) vidis blankajn velojn de grandega ŝipo.

• Estis tute **klare**: tio estas ŝipo de piratoj.

oo

Sed sur lokoj kie devus esti **klarigoj**, staris nur iom da krucetoj (kruc'et'o: +).

Kontraŭ unu el tagoj de jaro 1745, estis enskribo pri sepdeko da oraj moneroj. Sed kie devus esti plena **klarigo** de kiu aŭ kon-

traŭ kio oni ricevis ilin, staris nur seso da krucetoj. (kruceto: +) Iam la **klar**igo enhavis nur sur-Teran lokon: «62° 17'20'', 19° 2'40''».

La surskribojn oni faris pli-malpli dum dudek jaroj. La enskribita nombro iĝis pli kaj pli granda. En fino mem staris tutaĵo, kaj sube: «Parto de Bons».

– Mi povas kompreni nenion, – diris kuraĉisto Livsi.

– Ĉio estas **klare**ga! – kriis sinjoro Treloni, – antaŭ ni troviĝas paperoj en kiujn tiu ĉi hundaĉo enskribis la ricevitan monon.

oo

**klara** = *English: clear.*

## 420 **dronas**

Ĉu vi memoras kio okazis pri grandega ŝipo «Titanik»? Jes, ĝi **dronis** (= subakviĝis). Kune kun ĝi **dronis** (= mortis ene de akvo) centoj da veturantoj kaj maristoj.

oo

Ĉiu kruceto (+) estas ŝipo, kiun **dronigis** la piratoj; aŭ iu prirabita urbo. La nombroj

montras parton de tiu ĉi mortigisto ene de la tuta kaptajo. Kie li timis malklarecon li enigis mallongajn klarigojn.

oo

**droni** = *English: drown, sink.*

## 421 **feliĉa**

• *Li amas ŝin, ŝi amas lin. Nun ili havas infanojn, kaj estas **feliĉaj**.*

• *La rabistoj povis trovi kaj mortigi Ĝimon kaj ties patrinon. **Feliĉe** por ili tien venis surĉevalaj bordgardistoj.*

oo

Tiun oni ne erarigos. Vortoj «Kontraŭ Karakaso» montras lokon kie estis prirabita kaj dronigita iu mal**feliĉa** ŝipo. Ties maristoj jam delonge dronis kaj kuŝas sub akvo.

– Vere, – diris la kuracisto, – oni tuj vidas multjaran vojaĝanton! Jes, lia parto kreskis kune kun altiĝo de lia loko ene de la ŝipanaro (ŝip'an'ar'o).

Nenio alia estis en tiu ĉi paperkunigaĵo, (paper'kun'ig'aj'o) krom klarigo pri tio kiom

da oraj britaj moneroj oni donas kontraŭ moneroj hispanaj aŭ francaj.

- Gardema homo, - diris la kuracisto, -

- Kaj nun, - diris sinjoro Treloni, - ni rigardu kio troviĝas ĉi tie.

oo


**feliĉa** = *English: happy.*

## 422 **mapo**

• Sur **mapo** de lando oni vidas ties riverojn kaj montojn, urbojn kaj vilaĝojn.

• **Mapo** de vojoj montras kiel oni veturu al tiu aŭ alia loko.

oo

La kuracisto singarde malfermis  la koverton, troviĝantan inter la paperoj, kaj sur la tablon elfalis **mapo** de iu insulo, kun sciigo pri ĝia loko sur Tero, kun nomoj de montetoj, riveroj, golfoj. Ĉi tie estis ĉio kion oni bezonas por sendanĝere proksimiĝi al la insulo, kaj halti apud ĝi.

La insulo estis naŭ mejloj longa. Videblis du ŝiphaltejoj, bone gardataj de maraj mal-



trankviloj, kaj monteto nomata «Velo».

Sur la **mapo** troviĝis ankaŭ enskriboj, faritaj iam poste.



**mapo** = *English: map.*

423 **nord**o

424 **sud**o

425 **orient**o

426 **okcident**o



Bone videblis tri krucetoj (+++), desegnitaj sur la mapo: du en **norda** parto de la insulo, kaj unu – en **sud-okcidenta**. Apud tiu ĉi lasta kruceto (+) estis skribite per etlitera kaj klara skribo, tute ne simila al skribaĉoj de

Bili Bons: «Plej grava parto de la trezoroj troviĝas ĉi tie».

Sur alia flanko de la mapo videblis klarigoj, skribitaj per la sama mano. Jen ili estas:

«Alta arbo sur flanko de Velo; rigardu al **sudo** de **sudo-sudo-okcidento**. Homrestaĵa (hom'rest'aĵ'a) insulo, **okcidento-sudo-okcidento** kaj al **okcidento**. Dek futoj.

Neoraj trezoroj – en **norda** kaverneto. Trovu ĝin sur **Okcidenta** altaĵeto, deko da futoj suden de nigra ŝtonego.»

oo

**nordo** = *english: north.*

**sudo** = *English: south.*

**oriento** = *English: east.*

**okcidento** = *English: west.*

## 427 **armil'o**

**Armilo** estas batalilo (batal'il'o).

• La landestro bone **armis** siajn soldatojn. La soldatoj ricevis ne nur pafilojn, sed eĉ pafilegon.

• Ĉu povas sen**armila** homo kontraŭstari

## homojn **arm**itajn?

oo

«**Arm**ilojn (**arm**'il'o'j'n) trovu en monteto sur suda parto de Norda elstaraĵo. Tenu vin al okcidento, kvarone al sudo. Ĝon F.»

Tio estis ĉio. La priskriboj ŝajnis al mi tute neklaraj. Sed ili ege ĝojigis sinjoron Treloni kaj kuraciston Livsi.

– Livsi, – diris sinjoro Treloni, – vi devas tuj lasi vian ĉi-tiean (tie'a'n) kuracistan laboron. Matene mi veturos al Bristolo. Post dudek tagoj... ne, post dek kvin... Ne, post dek tagoj ni havos plej bonan ŝipon kaj plej bonan ŝipanaron en tuta Britio. Hokins estos ŝiplernanto... Vi estos bonega ŝiplernanto, Hokins... Vi, Livsi, estos ŝipkuracisto. Ni prenu kun ni Redruton, Ĝojson kaj Hanteron. Bona vento rapide alflugigos nin al la insulo.

Trovi tie la trezorojn estos tre facile, kaj la mono estos nia: faru pri ĝi kion vi volas.

oo

**armi** = English: to arm, equip with weapons.

## 428 **fidas**

• *Fido estas sento. Jes, estas homoj kiujn oni **fidas**. Oni **fidas** al ili monon, oni **fidas** al ili havaĵojn. Iam eĉ sian vivon oni **fidas** al ili.*

• *Ĉu vi **fidas** vian kuraciston?*

oo

- Treloni, - diris la kuracisto, - mi veturos kun vi. Mi estas certa ke ankaŭ Ĝim veturos, kaj ke viaj pensoj pri li restos samaj. Sed estas unu homo kiun mi timas **fidi**.

- Kiu li estas, - kriis Treloni, - nomu al mi tiun ĉi hundaĉon, sinjoro.

- Vi, - respondis la kuracisto, - ĉar vi tute ne scipovas silenti. Ne nur ni scias pri tiuj ĉi paperoj. Rabistoj, kiuj ĉi-vespere disrompis la gastejon, estas, kiel vi vidas, homoj ege kuraĝaj. Ili, kaj tiuj kiuj restis sur ilia ŝipeto, certe faros ĉion eblan por kapti la trezorojn. Ni devas neniam aperi unuope ĝis la debordiĝo (de'bord'iĝ'o). Mi restos ĉi tie, kune kun Ĝim, ĝis nia forveturo. Vi prenu Ĝojson kaj Hanteron, kaj veturu kun ili en Bristolon. Kaj, plej grave, diru eĉ ne vorton pri nia trovaĵo.

- Livsi, - respondis Treloni, - mi tute konsentas kun vi, kaj silentos kiel fiŝo.

Sed antaŭveturaj laboroj prenis pli da tempo. Ankaŭ kuracisto Livsi ne povis resti kun mi. Li devis veturi Londonon por trovi kuraciston kiu laboros ĉi tie dum lia foresto.

Sinjoro Treloni havis multe da laboro en Bristol, kaj mi loĝis en lia domo, sub pririgardo de maljuna servanto Redrut, pensante pri nekonataj insuloj kaj transmaraj vojaĝoj. Multajn horojn sidis mi ĉe la mapo, kaj bonege ellernis ĝin.

Sidante apud fajro en ĉambro de la domhavanto (dom'hav'ant'o), mi, ene de miaj pensoj, multfoje venis al la insulo; iam de nordo, iam de sudo.

oo

**fid**i = *English: trust.*

## 429 **i n d a**

- *La libro estas leg**inda**: se vi legos ĝin, vi ricevos multe da scioj, novaj por vi.*
- *Mi pensas ke li estas homo fid**inda**.*
- *Rimarku la lokon, ĝi estas rimark**inda**: estas multaj rakontoj kaj eĉ kantoj pri ĝi.*

oo

Mi bone konatiĝis kun la insulo; milfoje suriris mi altan monteton, nomatan Velo, kaj rigardis de tie mir**ind**ajn, ĉiam aliiĝantajn (ali'iĝ'ant'a'j'n) vidaĵojn. Iam sur la insulo loĝis aĉuloj, kaj ni devis batali kontraŭ ili. Iam ĝin loĝigis rabobestoj (rab'o'best'o'j = bestaĵ-manĝuloj), kaj estis bezonate forkuri de ili. Sed ĉiuj miaj elpenaĵoj okazis tute nenio kontraŭ tio kio vere atendis nin tie.

Unu septagaĵo postiris la alian. Fine, en iu bona tago, ni ricevis sendaĵon. Oni sendis ĝin al kuracisto Livsi, sed estis sur ĝi alskribo: «Se kuracisto Livsi ankoraŭ forestas, la sendaĵon malfermu Tom Redrut aŭ juna Hokins».

Ni malfermis kaj tralegis la sendaĵon (verdire legis mi, ĉar la servanto ne komprenis literojn skribitajn per mano):

oo

<b>aĉ</b>	<b>ad</b>	<b>aĵ</b>	<b>an</b>	<b>ar</b>	<b>bo</b>	<b>ĉj</b>
<b>dis</b>	<b>ec</b>	<b>ebl</b>	<b>eg</b>	<b>ej</b>	<b>ek</b>	<b>em</b>
<b>end</b>	<b>er</b>	<b>et</b>	<b>fi</b>	<b>ge</b>	<b>id</b>	<b>ig</b>
<b>iĝ</b>	<b>il</b>	<b>in</b>	<b>ind</b>	<b>ing</b>	<b>ism</b>	<b>ist</b>
<b>mal</b>	<b>mis</b>	<b>nj</b>	<b>op</b>	<b>re</b>	<b>uj</b>	<b>ul</b>
<b>um</b>						

**ind** = English: worth, deserving of.

## 430 ankro

*Ankro estas grava parto de ŝipo. Oni ĵetas ĝin en maran aŭ riveran akvon por ke la ŝipo restu sur sama loko, kaj moviĝu nenien.*

oo

«Gastejo "Malnova **Ankro**", Bristol, la 1-an ... de 17.. jaro.

Mia amiko Livsi!

Mi ne scias kie vi troviĝas, ĉu en mia domo, aŭ ĝis nun en Londono. Mi skribas samtempe kaj tien kaj tien. Ŝipon ni jam havas. Ĝi staras sur**ankre**, preta debordiĝi. Ŝipon pli bonan ol nia oni ne scipovas eĉ elpensi.»

oo

**ankro** = English: anchor.

## 431 navigas

• **Navigi:** venig'ad'i ŝipon (aŭ flugaparaton) al loko kiun oni devas veni.





oo

- Redrut, - diris mi, interrompante la legadon, - al kuracisto Livsi tio tute ne **plaĉos**: sinjoro Treloni diskonigis jam ĉion!

- Sed kiu estas pli grava, sinjoro Treloni aŭ la kuracisto? - respondis la servanto, - ĉu vere sinjoro Treloni devas silenti nur por fari bonon al iu kuracisto?

Mi decidis alifoje ne enigi miajn rimarkojn (rimark'o'j'n).

«Blendli mem trovis "Hispanolo"-n, kaj pro ecoj de tiu ĉi homo mi ricevis la ŝipon, oni povus diri, senmone.

Sed estas vero ke en Bristolo ne ĉiuj parolas bone pri Blendli. Iuj eĉ kuraĝas diri kvazaŭ tiu ĉi ege fidinda homo pensas nur pri sia mono, ke havanto de «Hispanolo» estis li mem kaj, kvazaŭ, li prenis de mi tro multe. Tio certe estas malvero. Sed neniu, neniu kuraĝas nei (ne'i) ke «Hispanolo» estas bonega ŝipo.

Kiel mi jam diris, la ŝipon mi trovis sen malfacilaĵoj. Jes, estas vero ke laboristoj, kiuj ordigas ĝin, faras tion iom malrapide, sed, post iom da tempo, ĉio estos preta.

Multe pli da penoj venigis al mi serĉo de la ŝipanaro.»

oo

**plaĉi** = English: please, be pleasing.

## 433 **dungas**

*Dungi: doni al iu laborlokon.*

ooo  
«Mi intencis **dungi** dudek, dudek du homojn, pro eblaj renkontoj kun insulanoj, piratoj aŭ francoj. Mi jam perdis la fortojn, sed trovis nur sesopon. Poste Ĉielo helpis al mi, kaj mi renkontis homon kiu tuj ordigis al mi ĉion. Mi renkontis lin ĉe la ŝiphaltejo. Okazis ke li estas multjara maristo. Li loĝas surborde, kaj tenas drinkejon. Li konas ĉiujn maristojn en Bristolo.»

ooo  
**dungi** = *English: employ, hire, engage.*

## 434 **kuiras**


- *Estas manĝaĵoj (manĝ'aĵ'o'j) kiujn oni manĝas sen prilaboro. Sed plimulto da homoj manĝas **kuiritajn** manĝojn.*
- **Kuiras:** prilaboras manĝaĵojn ene de varmega akvo.

«Surborda vivo malbonigis lian sanon, tial li volas denove iri en maron, kaj serĉas lokon de ŝipa **kuir**isto.

Tiumatene li, laŭ ties vortoj, eniris la ŝiphaltejon nur por rigardi la maron.»

**kuir***i* = English: cook.

## 435 **koro**



«Tiu ĉi amo al maro ŝajnis al mi **kortu**ŝa (**kor**'tuŝ'a), kaj certe ĝi tuŝus ankaŭ viajn sentojn. Mi tuj, sur la loko demandis lin ĉu li konsentas esti kuiristo sur nia ŝipo.

Lia nomo estas Longa Ĝon Silver. Ĉe li forestas unu piedo. Sed mi pensas ke tio montras lin de plej bona flanko, ĉar li perdis ĝin batalante por la patrolando (patr'o'land'o)

sub estro de senmorta Hok. Li ne ricevas monhelpon de niaj landestroj, Livsi. Ĉu vi vidas en kiu tempo ni vivas!

Jes, sinjoro, mi pensis ke trovis kuiriston, sed okazis ke mi trovis tutan ŝipanaron. Kun helpo de Silver mi dum kelkaj tagoj sukcesis dungi ŝipanaron el veraj, tre bonaj maristoj. Rigardante ilin oni tuj vidas ke ili ĉiuj estas homoj ege kuraĝaj. Kun tiu ŝipanaro ni povos kontraŭstari (kontraŭ'star'i) eĉ batalŝipon.

Post konversacio kun Longa Ĝon mi eĉ maldungis tiujn ses maristojn kiujn mi dungis antaŭe: li tuj montris al mi ke ili estas riveruloj kiuj scipovas nenion, kiujn oni ne prenu en danĝeran vojaĝon.

Mi bonege sentas min, manĝas kiel bovo, dormas trankvilege.»

oo

**koro** = *English: heart.*

## 436 **matroso**

*Maristo estas ĉiu kiu laboras surmare. Ankaŭ ŝipestro, navigisto kaj ŝipkuracisto estas maristoj.*

*Sed kiel oni nomas maristojn kiuj ordonas al neniu, kiuj nur faras sian malfacilan maristan laboron? **Matrosoj**. Tio estas **matrosoj**.*

«Sed mi ne estos feliĉa ĝis kiam miaj **matrosoj** komencos suprenigi la ankron. En malferman maron! For pensojn pri trezoroj! Maro, sed ne trezoroj, turnigas mian kapon.»

**matroso** = English: seaman, sailor.

## 437 **ŝatas**

*Oni amas siajn gepatrojn, oni amas siajn infanojn. Junulo kaj junulino povas ami unu la alian. Sed aliajn homojn, pensojn, manĝojn, trinkaĵojn, oni ne amas sed **ŝatas**.*

«Tial alveturu, Livsi, ne perdu eĉ horon, se vi **ŝatas** min. Donu al juna Hokins diri «ĝis revido» al ties patrino.

Redrut povas iri tien kune kun li. Poste, ne perdante tempon, ili rapidu en Bristolon.

Ĝon Treloni.

Postskribo: Mi devas sciigi ke Blendli, kiu sendos al ni alian ŝipon, se ni ne revenos post duonjaro, trovis por ni bonegan ŝipestron. Tiu ĉi ŝipestro bonas ankaŭ kiel homo, sed tre malfacilas aliigi kelkajn el liaj pensoj.

Longa Ĝon Silver trovis por ni ankaŭ navigiston. Lia nomo estas Eroŭ.

Kaj mi, Livsi, trovis matroson kiu scipovas elfajfi bonegajn ordonajn sonojn per sia fajfilo (fajf'il'o). Kiel vi vidas, sur nia bona «Hispanolo» ĉio estos kiel sur vera batalŝipo.

Kaj ankoraŭ: laŭ mia scio Silver havas monon. Multe da mono. La drinkejon li transdonas, por tempo de la vojaĝo, al sia kunulino. Ŝi ne estas blankulino. Tial senkunulinaj viroj kiel mi kaj vi povas kuraĝe pensi ke tio estas ŝi, sed ne nur lia malbona sano, kio igas lin forkuri en maron.

Post-postskribo: Hokins povas tranokti ĉe sia patrino.

Ĝon.T.»

oo

**ŝati** = English: appreciate, think highly of.

## 438 gaja

*Viro kaj virino, kiuj amas unu la alian, kaj vivas kune, estas **feliĉaj**.*

*Homo kiu trovis bonan laboron estas **ĝoja**. Trovo de bona laborloko **ĝojigis** lin.*

***Gajo** estas sento simila al la antaŭaj. **Gaja** homo **gajas** ne pro ekhavo da io. Li estas **gaja** ĉiam. Ĉio plaĉas al li.*

*Sed mal**gaja** homo... Nenio **gajigas** lin. Ĉio por li estas malbona kaj malplaĉa.*

oo

Estas facile kompreni kiel ĝojigis min tiu ĉi sendaĵo. Mi estis feliĉa. Sed ne Tom Redrut. Per tuta mia koro malŝatis mi maljunan Tomon kiu neniam estis **gaja**. Jes, ĉiu el la servantoj, sur lia loko, estus preta veturi, kaj neniu el ili, krom maljuna Redrut, kuraĝus kontraŭdiri eĉ unu vorton. Sed sinjoro Treloni volis ke veturu Tom, kaj deziro de la sinjoro estas ordono por liaj servantoj.

Postan tagon ni iris jam piede al «Admiralo Benboŭ». Mian patrinon mi trovis sana. Ĉe ŝi ĉio estis en ordo. Post morto de Ŝipestro malaperis ĉiuj ŝiaj malfacilaĵoj. Sinjoro Treloni per sia mono renovigis la domon. Laŭ lia ordono oni reordigis ĉion. Por helpi al ŝi li

dungis knabon. Tiu ĉi knabo faros laborojn kiujn antaŭe faris mi.

Nur ekvidinte tiun ĉi knabon mi klare komprenis ke mi vere por longa tempo lasas mian naskiĝdomon. Ĝis nun mi pensis nur pri mirindaĵoj (mir'ind'aĵ'o'j) kiuj atendas min, sed ne pri la domo kiun mi lasas.

oo

**gaja** = *English: gay, merry.*

## 439 **turmentas**

- *Maljunan soldaton **turmentas** ties iamaj vundoj, kaj nunaj malsanoj.*

- *Ankaŭ nuntempe oni aŭdas pri homoj kiuj **turmentas** aliulon por ekscii tion kion tiu ne volas diri.*

oo

Mi timas ke «instruante» mi **turmentis** tiun ĉi knabon. Li ankoraŭ ne sukcesis kutimiĝi al sia nova laborloko, kaj mi, per ne tre bonaj vortoj, montris al li eĉ plej etajn liajn erarojn.

Post nur unu nokto mi kaj Redrut denove



suriris la vojon.

oo

**turmenti** = English: torment, cause severe suffering.

## 440 kvankam

• Ĉiuj infanoj desegnas. Sed iam okazas ke desegnaĵojn de unu el ili oni montras al homo instruita kiu diras: «Jes, **kvankam** la infano estas ankoraŭ malgranda, oni bone vidas ke li estos elstara (el'star'a) desegnisto.»

oo

Mi ĝisrevidis la patrinon, golfon apud kiu mi loĝis de mia naskiĝtago, malnovan «Admiralo Benboŭ»-n, **kvankam**, reordigita (re'ord'ig'it'a), ĝi iĝis jam ne tiel ŝatinda (ŝat'ind'a). Ekmemoris mi ankaŭ Ŝipestron, kiu ĉiutage iradis laŭ tiu ĉi bordo, liajn kapveston, kaj malnovan sabran vundon sur la kapo. Ni venis al la vojturniĝo, kaj la domo malaperis.

Jam vesperiĝis kiam apud «Gastejo de Landestro Ĝorĝ» ni prenis lokon en multĉe-

vala rapidveturilo. Oni sidigis min inter Redrut kaj iu maljuna ĝentlemano.

La veturo estis rapida, la nokto – malvarma, sed mi, ŝajne, tuj endormiĝis. Ni kuregis iam supren, iam malsupren, sed mi dormis kiel hundeto, kaj preterdormis ĉiujn haltejojn. Eldormigis min flankfrapo. Mi malfermis la okulojn. Ni staris apud grandega urba domo. Jam delonge mateniĝis.

– Kie ni estas? – demandis mi.

– En Bristolo, – respondis Tom. – Eliru.


Sinjoro Treloni loĝis en gastejo troviĝanta (trov'iĝ'ant'a) apud ŝiphaltejo, por pririgardi iron de la laboroj.

Al mia grandega ĝojo ni devis iri tien laŭ la bordo, preter multegaj ŝipoj kiuj venis el multaj landoj. Sur unu el ili oni laboris kaj kantis.

oo

**kvankam** = English: although.

# 441 ŝnuro



*Ĉu vi memoras kie Ĝim trovis ŝlosilon de la havaĵujo? Jes, li trovis ĝin sub kapo de pirato Bili Bons, kiu nomis sin Ŝipestro. La ŝlosilo pendis tie sur ŝnureto.*

*Sur mano de Bili videblis pendigilo (vidu vorton «pend'um'il'o») kun pendigito (= pend'um'it'o).*

*Sur kio pendis la pendigito? Sur ŝnuro.*



Sur alia ŝipo matrosoj, tre alte, pendis sur ŝnuregoj, kiuj de malproksimo ŝajnis ne pli dikaj ol araneaĵo (arane'aĵ'o).



Kvankam mi tutan vivon loĝis sur marbordo, ĉi tie ĝi mirigis min kvazaŭ mi ekvidis ĝin unuafoje. Ankaŭ odoroj kiujn mi trovis ĉi tie estis tute novaj por mi.

Mi rigardis matrosojn kiuj iradas laŭborde tiel kiel scipovas iri nur malnovaj maristoj. Se oni montrus al mi iun landestron, tio ĝojigus

min malpli. Ankaŭ mi iros en maron! Mi iros per ŝipo kun matrosoj kiuj kantas maristajn kantojn; haroj de kiuj estas kunigitaj malantaŭe (mal'antaŭ'e) kiel ĉe virinoj. Mi iros en maron al nekonata insulo, por serĉi troviĝantajn tie trezorojn!

Ĝis kiam ni venis fine al la granda gastejo mi pensis nur pri tio. Nin renkontis sinjoro Treloni. Sur li estis vesto kiun portas kutime maristaj estruloj.

- Jen vi estas! - kriis li. - Ankaŭ la kucacisto venis jam el Londono. Bonege! Nun la tuta ŝipanaro estas jam kunigita.

- Ho, sinjoro, - kriis mi, - kiam ni debordiĝos?

- Debordiĝos? - redemandis li, - ĉi-nokte.

Post la matenmanĝo sinjoro Treloni donis al mi skribaĵeton al Longa Silver. Li klarigis kiel trovi lin: mi iru laŭ la bordo ĝis ekvidu drinkejon kun elpendaĵo (el'pend'aĵ'o) «Velo». Mi ĝojis al ebleco ankoraŭfoje vidi ŝipojn kaj matrosojn, kaj tuj ekiris.

Matenaj horoj ene de ŝiphaltejoj estas plej mult-laboraj. Malfacile traირante multegon da homoj kaj veturiloj mi trovis finfine la drinkejon. Ĝi estis negranda, sufiĉe bonorda, kaj havis du pordojn, kiuj eliris al du multhomaj interdomejoj. Ĉiuj ĝiaj pordoj es-

tis malfermataj, tial en la ĉambrego estis sufiĉe lume. Ĉe tabloj sidis matrosoj. Ili tiel laŭte konversaciis, ke mi haltis ĉe la pordo, kaj ne decidis eniri.

El flanka ĉambro eliris homo. Mi tuj komprenis ke tio estas Longa Ĝon. Ĉe li forestis unu piedo. Submane li tenis bastonon, kaj pere de ĝi li iris nekutime rapide, saltante kiel birdo.

oo

**ŝnuro** = *English: cord, line, rope.*

## 442 vizaĝo

**Vizaĝo** estas antaŭa parto de homa kapo. Sur **vizaĝo** troviĝas du okuloj, tio per kio oni sentas odorojn, kaj tio per kio oni manĝas kaj parolas.

oo

Tio estis tre alta kaj forta viro kun saĝa **vizaĝo**. Ŝajnis ke li estas tre gaja. Fajfante kuradis li inter la tabloj, alparolante iujn el siaj ŝatataj gastoj. Mi devas diri veron: legante pri Longa Ĝon, en sendaĵo de sinjoro

Treloni, mi kun timego pensis: ĉu ne estas tio sama unupieda maristo kiun mi tiel longe atendis en malnova «Benboŭ»?

Sed ĉiuj miaj malbonaj pensoj malaperis tuj post kiam mi ekrigardis tiun ĉi homon. Mi vidis Ŝipestron, Nigran Hundon, blindulon Pju, tial mi pensis ke mi scias kiu estas kaj kiu ne estas pirato.

oo

**vizaĝo** = *English: face, visage.*

## 443 pura

- – *Ne manĝu se viaj manoj estas malpuraj!*
- *Ĉu hundo estas besto purema? Ne, ne estas! Hundoj ne purigas sin.*

oo

Ne, tiu ĉi pura kaj gaja havanto de la drinkejo ne estis simila al rabisto. Mi tuj kuragiĝis, eniris la ĉambregon, kaj aliris Silveron, kiu stare konversaciis kun iu el la gastoj.

– Ĉu vi estas sinjoro Silver? – demandis

mi, donante al li la skribaĵeton.

- Jes, knabo mia, - diris li, - mia nomo estas Silver. Kaj vi, kio vi estas?

Ekvidinte skribaĵeton de sinjoro Treloni li, kiel ŝajnis al mi, eĉ ekstremitis.

- Ha-a, mi komprenas! - kriis li tre laŭte, donante al mi la manon, - mi komprenas! Vi estas nia nova ŝiplernanto. Mi ĝojas vidi vin.

Li kaptis mian manon en sian fortan manegon. Ĉi-momente iu homo, sidanta en malproksima parto de la ĉambro, subite eksaltis de sia loko, kaj ĵetis sin al la pordo. La pordo troviĝis apud li, tial li tuj malaperis. Sed lia subita ago altiris mian rigardon, kaj mi tuj rekonis lin: tio estis homo kiu antaŭnelonge estis ĉe ni, en nia gastejo.

- Hej, - kriis mi, - kaptu lin! Tio estas Nigra Hundo!

- Al mi tute ne gravas lia nomo, - kriis Silver, - sed li forkuris, kaj ne lasis monon por la drinkaĵoj. Gari, kuru kaj kaptu lin!

Unu el sidantoj apud la pordo eksaltis kaj ekpostkuris.

- Estu li eĉ ŝiparestro (ŝip'ar'estr'o) Hok, ankaŭ lin mi igus doni la monon! - kriis Silver.

Poste, subite lasante mian manon, li demandis:

- Kio estas lia nomo? Vi diris Nigra... kio?

- Hundo, sinjoro! - diris mi. - Ĉu sinjoro

Treloni rakontis al vi pri la rabistoj? Nigra Hundo estas unu el ili.

– Kio? – muĝis Silver, – en mia domo!...  
Ben, kuru kaj helpu al Gari kapti lin...

oo

**pura** = *English: clean, pure.*

## 444 do

– Tiu ĉi homo prenis parton en kapto de ŝipoj, kaj mortigo de la ŝipanoj. **Do** li estas pirato, kaj devas esti pendigata (pli bone: «**pendumata**»).

oo

Li estas **do** unu el tiuj ĉi aĉuloj... – Hej, Morgan, vi, ŝajne, sidis kune kun li ĉe sama tablo, ĉu?

Homo, kiun li nomis Morgan, maljuna, blankhara matroso, alvenis.

– Nu, Morgan, – demandis Longa Ĝon, – vi ja tiun ĉi... kiu li estas... Nigran Hundon vidis neniam antaŭe, ĉu?

– Neniam, sinjoro, – respondis Morgan, mariste suprenigante manon al la kapo.



- Kaj eĉ lian nomon vi neniam aŭdis?

- Ne aŭdis, sinjoro.

- Tio estas via feliĉo, Tom Morgan, - diris la drinkejhavanto, - se vi kunigaĉus (kun'ig'aĉ'us) kun aĉuloj, viaj piedoj neniam aperus en mia drinkejo! Pri kio li konversaciis kun vi?

- Mi ne bone memoras, sinjoro, - respondis Morgan.

- Kio estas en via kapo? - kriis Longa Ĝon. - Li ne memoras bone! Eble vi tute ne sciis kun kiu vi konversacias? Nu, diru, pri kio li parolaĉis? Ĉu pri ŝipoj, ĉu pri ŝipestroj? Nu, rapide!

- Ni konversaciis pri tio kiel oni matrosojn sub ŝipo subtiras, - respondis Morgan.

- Sub ŝipo! Tre bona konversacio por vi. Nu, iru vi al sia loko, Tom.

Kiam Morgan residis ĉe sia tablo, Silver amike malsupreniĝis al mi, kaj diris nelaŭte (ne'laŭ'te): - Tre fidinda homo estas tiu ĉi Tom Morgan, sed ege malsaĝa.

oo

**do** = English: hence, then, therefore.

## 445 daŭras

• Ĉu estas lokoj kie tago **daŭras** nur... unu horon? Jes, estas. Sed, dum alia parto de jaro, saman tempon **daŭras** tie nokto. Tio estas tre malvarmaj lokoj.

• Li jam ne havis forton, sed **daŭrigis** la iradon.

oo

- Kaj nun, - **daŭrigis** Silver laŭte, - ni penu elmemori. Nigra Hundo? Ne, neniam mi aŭdis pri tiu. Sed ŝajne mi vidis lin. Jes, jes... kelkfoje li eniris ĉi tien kun iu blindulo.

- Jes, jes, kun blindulo! - kriis mi, - ankaŭ tiun ĉi blindulon mi konas. Lia nomo estis Pju.

- Vere! - kriis Silver, - Pju! Jes, tiel oni nomis lin. Laŭrigarde li estis ega aĉulo. Sed kiam tiu ĉi Nigra Hundo trafos niajn manojn, sinjoro Treloni estos tre ĝoja. Ben havas bonegajn piedojn. Malmultaj maristoj kuras pli rapide ol Ben. Ne, de Ben oni ne foriros. Ben kaptos lin... Li parolis pri subtiro de matrosoj, ĉu? Bone, ni subtiros lin mem...

oo

**daŭri** = English: continue, endure, go on.

## 446 kredas

- *Ĉu vi **kredu**, ĉu ne, sed tiu ĉi monero savis mian vivon.*

- ***Kredu** al ĉiu lia vorto: li estas fidinda homo.*

oo

Silver saltis per sia bastono, frapis per la mano tablon, kaj parolis tiel ke ĉiu sur mia loko **kredus** al li. Renkonto kun Nigra Hundo ene de «Velo» renovigis ĉiujn miajn malbonajn sentojn, kaj mi per la du okuloj rigardis la kuiriston. Sed li estis tro saĝa kaj eltrovema (el'trov'em'a).

Finfine revenis tiu duopo, kaj rakontis ke Nigra Hundo sukcesis malaperi de ili ene de aro da homoj. La drinkejhavanto komencis kriegi al ili tiel ke mi tuj komprenis ke li estas homo **kredinda**.

– Aŭskultu, Hokins, – diris li, – por mi tiu ĉi okazaĵo povas finiĝi malbone. Kion pensos pri mi ŝiphavanto Treloni? Tiu ĉi malamika filo sidis en mia domo kaj drinkis mian drinkaĵon. Poste venas vi, kaj diras ke li estas unu el tiuj rabistoj!

oo

**kredi** = English: believe, think.

## 447 malgraŭ

- **Malgraŭ** sia unupiedeco Silver moviĝis ege rapide. (= Silver, kvankam unupieda, moviĝis ege rapide.)

- Ŝipestro, **malgraŭ** antaŭdiro de kuracisto Livsi, drinkis, kaj drinkis multe. (= Ŝipestro drinkis multe, kvankam la kuracisto antaŭdiris ke tio danĝerigas lian vivon.)

oo

Sed, **malgraŭ** tio, mi donis al li forkuri. Nu Hokins, subtenu (sub'ten'u) min antaŭ sinjoro Treloni! Vi estas juna, sed ne malsaĝa. Vin oni ne erarigos. Mi tuj rimarkis tion. Klarigu ja al la sinjoro ke pere de mia bastono mi tute ne povis kapti tiun ĉi hundacon. Se mi estus sama maristo kiel en antaŭa tempo, li ne forkurus de mi. Mi ĵetus lin en kuiran ujon ege rapide, sed nun...

Subite li eksilentis, kvazaŭ ekmemoris ion.

– Kaj mono? – diris li, – pro tri kvaronboteloj! Jen, hundaĉo, li ne lasis la monon!

oo

**malgraŭ** = English: in spite of.

## 448 **ridas**

*Iam homoj eligas sonojn kiel: «**h**a-**h**a-**h**a» aŭ «**h**i-**h**i-**h**i». Tio estas **rido**. Homoj **ridas**. Bonaj homoj **ridas** kiam ili estas **ĝojaj**, kiam estas bone al ili.*

*Malbonaj homoj **ridas** kiam iu falas, kiam estas malbone al iu.*

oo

Falinte sin sur sidlokon li ek**rid**egis. Li **rid**is tiel ke ankaŭ mi ne eltenis kaj ek**rid**is kune kun li, ĝis kiam la tuta drinkejo ekstremis pro **rid**ego.

– Jes, bona bovo mi estas! – diris li fine.  
– Mi vidas, Hokins, ke mi kaj vi estos bonega duopo. Ja mi okazis ne pli bona ol ŝiplernanto... Sed oni devas iri, knaboj. Mi prenos mian malnovan kapveston, kaj iros kune kun vi, Hokins, al ŝiphavanto Treloni rakonti al li pri la okazaĵo. Kaj ĝi, tiu ĉi okazaĵo, tute ne estas facila, juna Hokins!

Poste li denove ek**rid**egis, kaj tiel, ke mi, kvankam vidis ĉi tie nenion **rid**indan, denove

nevole aliĝis (al'iĝ'is) al li.

Ni iris laŭ la bordo. Silver okazis nekutime bona rakontanto. Pri ĉiu ŝipo kiun ni preteriris, li donis al mi multajn sciigojn: kiun ŝnuraron ĝi havas, kiom da aĵoj ĝi povas porti, el kiu lando ĝi venis. Li klarigis al mi kio okazas en la ŝiphaltejo:

oo

**ridi** = *English: laugh.*

## 449 ŝarĝas

- **Ŝarĝo** estas tiuj aĵoj kiujn ŝipo (kaj ne nur ŝipo) transportas (trans'port'as) de loko al loko. Oni veturigas **ŝarĝojn** ankaŭ per ĉevalaj, kaj aliaj **ŝarĝ**veturiloj.

- Iam tiuj kiuj iras al supro de alta monto dungas homojn-**ŝarĝ**portistojn.

oo

Iun el la ŝipoj oni **ŝarĝ**as, alian mal**ŝarĝ**as, kaj tiu, tria, estas jam preta eliri en malferman maron. Li rakontis al mi gajajn rakontojn pri ŝipoj kaj maristoj. Multfoje li elparolis iun maristan vorton, kaj

rediris ĝin kelkfoje por ke mi pli bone memoru ĝin. Iom post iom mi komprenis ke ene de transmara vojaĝo oni ne povas trovi kunulon pli bonan ol Silver.

Fine ni venis en la gastejon. Sinjoro Treloni kaj kuracisto Livsi estis pretaj veni sur la ŝipon por rigardi kiel oni ordigas ĝin.

Longa Ĝon rakontis al ili pri ĉio kio okazis en la drinkejo, de komenco ĝis fino, tre varme kaj tute vere.

oo

**ŝargi** = *English: load, burden.*

## 450 minuto

*Unu horo enhavas sesdek minutojn.*

oo

– Ja estis tiel, ĉu, Hokins? – demandis li min ĉu**minute**. Kaj mi ĉiufoje subtenis liajn vortojn.

Sinjoro Treloni kaj la doktoro tre malĝojis ke Nigra Hundo sukcesis forkuri. Sed kion oni povis fari? Longa Ĝon aŭskultis ĉiu-

jn iliajn bonajn vortojn, prenis la bastonon, kaj ekiris al la eliro.

– La ŝipanaro estu sur la ŝipo ĝis la kvara tage! – kriis sinjoro Treloni al la foriranto.

– Jes, sinjoro! – respondis la kuiristo.

oo

**minuto** = English: minute.

## 451 opinias

**Opinias:** *pensas ke...*

• *Estas homoj kiuj **opinias** ke mono venigas malbonon al homaro. Sed estas aliaj, kiuj **opinias** ke bonon kaj malbonon venigas ne mono sed homoj mem. Ĉu ankaŭ vi pensis pri tio? Kio estas via **opinio**?*

oo

– Nu, Treloni, – diris kuracisto Livsi, – se diri veron, mi kutime ne tro kredas al viaj **opinioj** pri homoj, sed Ĝon Silver plaĉas al mi.

– Bonega homo, – respondis sinjoro Treloni.



– Ĝim iros al la ŝipo kune kun ni, ĉu? –  
aldonis la kuracisto.

– Certe, certe, – diris sinjoro Treloni. –,  
prenu vian kapveston, Hokins, ni iru rigardi  
nian ŝipon.

oo

**opinio** = English: opinion.

## 452 **boat**o

**Boato** estas ŝipeto. Ĝin movigas homa  
forto. Tio estas forto de unu aŭ pli da homoj.

oo

«Hispanolo» staris sufiĉe malproksime de  
la bordo. Por veni al ĝi ni devis preni **boat**on,  
kaj iri inter multaj aliaj ŝipoj. Antaŭ ni aperis  
jen la antaŭo, jen malantaŭo, aŭdiĝis sonoj  
de distirataj (dis'tir'at'a'j) ŝnuregoj.

Sur la ŝipo nin renkontis navigisto, sinjoro  
Eroŭ, malnova maristo, iom nigreta pro suno.  
Li kaj sinjoro Treloni estis ŝajne tre proksi-  
maj, amikaj unu al la alia. Sed bone videblis  
ke sinjoro Treloni ne tre ŝatas la ŝipestron.

La ŝipestro tute ne estis homo gajema.

Ĉio sur la ŝipo ŝajnis malbona al li. Li tuj diris al ni kialojn de tiu ĉi sia malplaĉo.

oo

**boato** = *English: boat, craft.*

## 453 kajuto

***Kajuto:** ĉambro sur ŝipo. Antaŭe en **kajutoj** loĝis nur veturantoj kaj ŝipaj estroj, sed ne matrosoj.*

oo

Tuj kiam ni malsupreniĝis en la **kajuton**, aperis matroso, kaj diris:

– Ŝipestro Smolet, sinjoro, volas konversacii kun vi.

– Mi ĉiam pretas vidi la ŝipestron. Petu lin veni ĉi tien, – respondis sinjoro Treloni.

La ŝipestro, kiel okazis, iris post sia sendito. Li tuj eniris la **kajuton**, kaj fermis post si la pordon.

– Nu, kion vi diros, ŝipestro Smolet? Mi esperas ke ĉio estas en ordo, ĉu? Ĉu la ŝipo estas preta al la foriro?

– Sinjoro, – diris la ŝipestro, – al mi ne

plaĉas tiu ĉi vojaĝo. Al mi ne plaĉas niaj matrosoj. Al mi ne plaĉas mia helpanto. Jen estas ĉio. Mallonge kaj klare.

– Ĉu, sinjoro, al vi ne plaĉas ankaŭ la ŝipo? – demandis sinjoro Treloni.

– Mi nenion povas diri pri ĝi, sinjoro, ĝis vidos ĝin ene de la velado, – respondis la ŝipestro, – ŝajne ĝi estas farita ne malbone. Sed ankoraŭ ne venis tempo paroli pri tio.

– Ĉu eblas, sinjoro, ke al vi ne plaĉas la ŝiphavanto? – demandis sinjoro Treloni.

Sed tiam ekparolis kuracisto Livsi:

– Atendu, – diris li, – atendu. Tiel okazos nenio krom interkontraŭoj (inter'kontraŭ'o'j). La ŝipestro diris al ni kaj tro multe kaj tro malmulte; tial mi volus peti klarigojn de li... Vi diris, ŝipestro, ke al vi ne plaĉas nia vojaĝo. Kial?

– Oni dungis min, sinjoro, por ke mi navigu la ŝipon kien oni diros al mi, demandante pri nenio. Tio estas, kien ordonos tiu ĉi sinjoro, – diris la ŝipestro. – Bonege (bon'eg'e). Mi demandis nenion.

oo

**kajuto** = English: cabin, saloon.



## 455 papago



**Papago:** *birdo kiu scipovas, post lernado, diri vortojn, aŭ fajfi kantojn.*

oo

Sed pri la afero, sinjoro Treloni, scias ĉiuj, eĉ **papago**.

– Ĉu vi parolas pri **papago** de Silver? – demandis sinjoro Treloni.

– Ne, mi volis diri nur ke pri la trezoroj scias jam ĉiuj. Al mi ŝajnas ke vi ne sufiĉe komprenas malfacilojn de la vojaĝo, tial mi diros al vi kion mi pensas pri tio: mi antaŭvidas mortbatalon.

– Jes, mi konsentas kun vi, – respondis la kuracisto, – sed vi eraras opiniante ke ni ne komprenas antaŭstarantajn danĝerojn. Vi diris ke al vi ne plaĉas nia ŝipanaro. Ĉu vi opinias ke ni dungis matrosojn-novulojn?

– Ili ne plaĉas al mi, – respondis la ŝipestro. – Kaj, se diri veron, estus pli bone se la ŝipanaron dungus mi.

– Mi ne kontraŭas, – respondis la kuracisto, – mia amiko, eble, devis dungi la ŝipa-

naron kune kun vi. Tio estas eraro. Krom tio, ŝajne, al vi ne plaĉas sinjoro Eroŭ, ĉu?

– Ne plaĉas, sinjoro. Mi kredas ke li estas bona maristo. Sed li tenas sin tro proksime al la ŝipanaro. Bona navigisto devas deflankiĝi (de'flank'iĝ'i) de la matrosoj. Li ne povas drinkaĉi kun ili.

– Ĉu vi volas diri ke li estas drinkulo? – demandis sinjoro Treloni.

– Ne, sinjoro, – respondis la ŝipestro. – Mi nur volas diri ke li tenas sin tro amike al siaj subuloj.

oo

**papago** = *English: parrot.*

## 456 **rekta**

• *Vojo inter du urboj ne ĉiam estas **rekta**: iam ĝi ĉirkaŭiras montojn, akvejojn, vilaĝojn.*

• *Ĉu flugaparatoj povas flugi **rekte**?*

oo

– Kaj nun, – petis la kuracisto, – diru al ni **rekte**, ŝipestro: kion vi volas de ni?

– Ĉu via decido vojaĝi estas forta, sin-

joroj?

- Jes, - respondis sinjoro Treloni.

- Bonege, - diris la ŝipestro, - se vi ĝis nun aŭskultis min, kvankam mi diris kion povis ŝajni malplaĉa (mal'plaĉ'a), aŭskultu ankaŭ tion:

oo

**rekta** = English: direct, straight.

## 457 pulvo

*En tempo pri kiu ni parolas estis konata nur unu el eksplodaĵoj: pulvo.*

oo

**Pulvon** kaj armilojn oni enigis en antaŭan parton de la ŝipo. Sed, interalie, estas bonega ejo sub via kajuto. Kial ne enigi ilin tien? Tio estas unue.

Vi prenis kun vi triopon da servantoj. Iujn el ili, kiel oni diris al mi, oni volas lokigi ankaŭ en la antaŭan parton. Kial oni ne ordigu al ili lokojn apud via kajuto? Tio estas due.

- Ĉu estas trie? - demandis sinjoro

Treloni.

- Estas, - diris la ŝipestro, - oni tro multe parolaĉas.

- Jes, tro multe, - konsentis la kuracisto.

- Mi transdonos nur kion aŭdis mi mem, - daŭrigis ŝipestro Smolet, - oni diras ke ĉe vi estas mapo de iu insulo. Ke sur la mapo per krucetoj (kruc'et'o: +) estas montrataj lokoj kie troviĝas enterigitaj trezoroj. Ke la insulo troviĝas... - Kaj ĉi tie li senerare nomis veran lokiĝon de nia insulo.

- Sed mi diris al neni! - kriis Treloni.

- Malgraŭ tio ĉiu matroso scias tion, sinjoro, - respondis la ŝipestro.

- Tion vi, Livsi, diskonigis - kriis sinjoro Treloni, - aŭ vi, Hokins...

- Nun tute ne gravas kiu faris tion, - diris la kuracisto.

Mi rimarkis ke neni el ili kredas al sinjoro Treloni, malgraŭ ĉiuj liaj neaj vortoj. Ankaŭ mi tiam ne kredis, ĉar li vere estas homo tro parolema. Sed nun mi opinias ke li diris veron: ke la ŝipanaro ankaŭ sen ni sciis kie troviĝas la insulo.

- Mi, sinjoroj, ne scias kiu el vi tenas la mapon, - daŭrigis la ŝipestro, - sed mi volas ke pri ĝia gardoloko sciu nenion kaj mi, kaj sinjoro Eroŭ. Aliokaze mi petos maldungi min.

- Mi komprenas, - diris la kuracisto, - unue vi volas ke oni ĉesu senbezonaĵajn parolo-



jn.

oo

**pulvo** = English: (gun) powder.

## 458 **fortika**

• *Aĵo ne estas homo aŭ besto. Pri tablo, se ĝi ne disfalas, oni diras ke ĝi estas **fortika**, sed ne «forta».*

• ***Fortikejo** estas loko, ene de kiu oni povas kontraŭstari malamikojn.*

oo

Due, vi volas ordigi **fortikejo**n en posta parto de la ŝipo, kunigi tie servantojn de mia amiko, kaj transdoni al ili ĉiujn armilojn kaj pulvon kiuj troviĝas sur la ŝipo.

oo

**fortika** = English: firm, hefty, resistant, sturdy.

## 459 ribelo

*Ribelo: perarmila staro de subuloj kontraŭ ties estroj.*

oo

Per aliaj vortoj vi antaŭvidas **ribelon**.

– Sinjoro, – diris ŝipestro Smolet, – mi ne volas ke oni opiniu kvazaŭ mi diris vortojn kiujn mi tute ne diris. Oni ne povus kompreni ŝipestron kiu decidus debordiĝi, antaŭvidante **ribelon**. Mi opinias ke sinjoro Eroŭ estas homo fidinda. Plimulto da matrosoj ankaŭ estas fidindaj. Eblas ke ili ĉiuj estas fidindaj. Sed mia devo estas pensi pri sendanĝero de la ŝipo, kaj pri vivo de ĉiu ĝia ŝipano. Sed mi vidas ke ne ĉio estas en ordo. Mi petas vin fari ĉion bezonatan aŭ maldungi min. Jen estas ĉio.

– Ŝipestro Smolet, – diris la kuracisto ridetante, – kiam vi venis ĉi tien mi pensis ke vi petos multe pli.

oo

**ribelo** = English: rebel, mutiny, revolt.

## 460 **espero**

*Esperas: opinias ke estos pli bone.*

• *Homon kiu iras oni nomas iranto (ir'ant'o). Homon kiu **esperas** oni nomas **esperanto** (**esper'**ant'o). ...Sed tio estas ja nomo de nia lingvo! Kial?*

– *Sur Unua Libro forestas vortoj «Lazaro Zamenhof». Tie staras nomo «D-ro Esperanto (**Esperant'**o, ne **esper'**ant'o!)»:*

*Doktoro Zamenhof, kiu de siaj infanaj jaroj pripensadis (pri'pens'ad'i's) la interhoman lingvon, nomis sin ne per sia vera nomo, ĉar li timis perdi laboron de okulisto.*

*Tial ni skribas:*

***esperanto** (**esper'**ant'o) = tiu kiu **esperas**;*

*Esperanto (**Esperant'**o) = lingvo inter'hom'a.*

oo

*Jes, sinjoro, – respondis la ŝipestro, – irante ĉi tien mi volis peti maldungon, ĉar ĉe mi estis neniu **espero** ke sinjoro Treloni konsentos aŭskulti eĉ unu mian vorton.*

– *Kaj ne aŭskultus! – kriis sinjoro Treloni. – Se ne Livsi, mi tuj sendus vin for. Sed malgraŭ ĉio mi aŭskultis vin, kaj mi faros ĉion pri*

kio vi parolis. Sed mia opinio pri vi estas de nun eĉ pli malbona.

- Laŭ via deziro, sinjoro, - diris la ŝipestro, - poste vi komprenos ke mi agis laŭ mia devo.

Kaj li foriris.

- Treloni, - diris la kuracisto, - kontraŭ miaj atendoj mi vidas ke vi prenis sur la ŝipon du fidindajn homojn: ŝipestron Smolet kaj tiun Ĝon Silver.


- Pri Silver mi konsentas kun vi, - diris sinjoro Treloni, - sed mi opinias ke kion faras tiu ĉi malverulo, ne indas (ind'as) viron, ne indas mariston kaj, ĉiuokaze (ĉiu'okaz'e), ne indas briton!

- Bone, - diris la kuracisto, - ni vidos.

oo

**espero** = English: hope, expect.

## 461 ferdeko



**Ferdeko:** supra, malferma parto de ŝipo, sur kiu oni faras plimulton da navigaj laboroj.

oo

Kiam ni supreniris la **ferdekon**, matrosoj jam komencis translokigi armilojn kaj pulvon. «Jo-ho-ho!» – kantis ili dum la laboro. La ŝipestro kaj sinjoro Eroŭ disdonis ordonojn.

Al mi tre plaĉis mia nova loko. Oni reordigis la tutan ŝipon. En malantaŭa ĝia parto staris ses kajutoj. Antaŭe oni opiniis loĝigi en ili la ŝipestron, navigiston Eroŭ, Hanteron, Ĝojson, kuraciston kaj sinjoron Treloni. Sed nun unun (unu'n) el la kajutoj oni donis al Redrut, kaj unun al mi. Sinjoro Eroŭ kaj la ŝipestro prenis lokojn en kajuto sur la **ferdeko**.

Eĉ al la navigisto, ŝajne, plaĉis ties lokiĝo. Verŝajne ankaŭ li ne tre fidis la ŝiparon. Sed tio estas nura (nur'a) opinio,

ĉar, kiel vi vidos, li nelonge troviĝis sur la ŝipo.

Ni pene laboris, translokigante pulvon kaj ordigante niajn kajutojn, kiam, finfine, de la bordo venis en boato lastaj matrosoj, kaj kune kun ili – Longa Ĝon.


La kuiristo supreniĝis sur la ŝipon kaj, kiam li rimarkis la laborojn, li elkriis:

– Hej, amikoj, kion vi faras?

oo

**ferdeko** = English: deck.

## 462.    **barelo**



**barelo**

oo

– Ni translokigas (trans'lok'ig'as) **barelo**-jn kun pulvo, Ĝon, – respondis unu el la matrosoj.

– Sed tiel ni preterlasos la matenan marsupreniĝon (mar'supr'e'n'iĝ'o'n)! kriis Longa.

- Ili laboras laŭ mia ordono! - interromp-  
is lin (inter'romp'is = ĉesigis la parolon) la  
ŝipestro, - kaj vi, ŝatinda (ŝat'ind'a), iru en  
la kuirejon, por ke la matrosoj vespermanĝu  
bontempe.

- Jes, sinjoro, - respondis la kuiristo, kaj  
malaperis en la kuirejo.

- Li estas bonega homo, ŝipestro, - diris  
la kuracisto.


- Eblas, sinjoro, - respondis ŝipestro  
Smolet. - Singarde, knaboj, singarde!

Kaj li ekkuris al matrosoj kiuj relokgis  
**barelojn** kun pulvo.

oo

**barelo** = *English: barrel.*

## 463. **kanono**



oo

Subite li rimarkis ke mi staras kaj rigar-  
das **kanonon**, kiu estis starigata (star'ig'at'a)

sur la ferdekon.

- Hej, ŝiplernanto, - kriis li, - for de ĉi tie! Iru al la kuiristo, li donos al vi laboron.

Forkurante en la kuirejon mi aŭdis ke li laŭte diris al la kuracisto:

- Mi ne konsentas ke sur mia ŝipo estu ŝatulaĉoj (ŝat'ul'aĉ'o'j)!

Kredu al mi, mi tute konsentis tiam kun sinjoro Treloni ke la ŝipestro estas homo malbona.

Tiu pena laboro daŭriĝis tutan nokton. Ni translokigis aĵojn de loko al loko. Boato venigadis de la bordo amikojn de sinjoro Treloni, kiel sinjoron Blendli, kiuj venis deziri feliĉan vojaĝon kaj bonordan revenon. Neniam antaŭe, en «Admiralo Benboŭ», okazis al mi labori tiel multe.

oo

**kanono** = *English: cannon.*

## 464 **laca**

*Laca estas kiu ne havas jam fortojn.*

oo



Mi estis jam **laca** kiel hundo kiam, antaŭ la mateniĝo, oni ekfajfis fajfilon, kaj la ŝipanaro komencis suprenigi la ankron. Sed se mi estus eĉ pli **laca**, ankaŭ tiam mi ne forirus de la ferdeko. Ĉio estis nova por mi: kaj la ordonaj krioj, kaj tranĉa sono de la fajfilo, kaj homoj, rapide kaj pene laborantaj ĉe malforta lumo de ŝipaj lumigiloj.

- Hej, piedulo, ekkantu! - kriis unu el la matrosoj.

- Malnovan! - kriis iu alia.

- Bone, knaboj, - respondis Longa Ĝon, staranta tie, sur la ferdeko, kun bastono sub la mano. Kaj li ekkantis kanton tiel bone konatan al mi:

### ***Dek-trio da maristoj En ujo por mortinto***

Kaj la tuta ŝipanaro alkantis:

### ***Jo-ho-ho, kaj botel' kun rum'!***

Kvankam mi estis kaptita per ĉiuj okazaĵoj, mi tuj ekmemoris nian malnovan «Admiralo Benboŭ». Kaj ŝajnis al mi ke voĉo de mortinta Bili Bons aliĝas (al'iĝ'as) al tiu ĉi matrosa kantado.

Post nelonge la ankro ekestis suprenigita.

oo

**laca** = English: tired, worn-out.

## 465 plena

*Estas drinkuloj kiuj scipovas preni **plenan** botelon da rumo, kaj eldrinki ĝin ĝisfine. Kion ili, la drinkuloj, faras pri jam mal**plena** botelo? Ili forĵetas ĝin!*

oo

Vento **plenigis** la velaron. La tero fortiriĝis (for'tir'iĝ'is). Ŝipoj, ĉirkaŭantaj nin, komencis malproksimiĝi. Kaj, antaŭ ol mi ekkuŝis, por dormeti eĉ horeton, «Hispanolo» komencis sian vojaĝon al Trezorinsulo.

Mi ne priskribos nian vojaĝon. Ĝi estis tre sukcesa. La ŝipo okazis bonega, la ŝipanaro estis malnovaj maristoj, kaj la ŝipestro bonege konis sian devon (dev'o'n).

Sed, antaŭ ol ni venis al Trezorinsulo, estis du-tri okazaĵoj pri kiuj mi devas rakonti.

Antaŭ ĉio okazis ke sinjoro Eroŭ estas multe pli malbona ol la ŝipestro pensis pri li.

En okuloj de la ŝipanaro li ne estis homo kiu disdonu ordonojn. Tial obeis lin neniu. Sed ne tio estis plej malbona.



**plena** = *English: full.*

## 466 ruĝa

*Suproj de altaj montoj ĉiam estas blankaj.*

*Kaj sango, ĉu ankaŭ sango estas blanka? Ne, ne blanka. Sango estas ruĝa.*



Post tago aŭ du de la debordiĝo, la navigisto komencis aperi sur la ferdeko kun malklaraj okuloj kaj ruĝa vizaĝo. Sur la piedoj li staris ne tre bone. Ili malobeis lin. Videblis ke li estas ebria. Multfoje estis bezonate, antaŭ ĉiuj okuloj, sendi lin en ties kajuton. Kelkfoje li falis kaj vundiĝis. Okazis ke li tutajn tagojn kuŝis ĉe si, ne elirante. Okazis, certe, ke tago aŭ du li estis nur iomete ebria; tiam li funkciis pli-malpli bone.

Ne eblis kompreni de kie li prenas drinkaĵojn. Tuta ŝipo penis trovi la respon- don. Oni postrigardis lin, sed trovis nenion. Kiam oni demandis lin rekte, li, se estis ebria,

nur ridegis, aŭ, se ne estis ebria, li certigis ke dum tuta sia vivo trinkis nenion krom akvo.

Kiel navigisto li estis nenio; estis klare ke li finos malbone. Do neniŭ miris aŭ malĝojis kiam dum unu el mallumaj kaj ventaj noktoj li malaperis de la ŝipo.

oo

*ruĝa = English: red.*

## 467 **libero**

- – *Ĉu birdo estas estaĵo **libera**?*  
– *Jes, **libera**: ĝi flugas kien ĝi volas... Sed, homoj, ne mal**liberigu** birdojn!*

oo

– Li falis en la maron, – decidis la ŝipestro, – tial, sinjoroj, ni ne devos mal**liberigi** lin.

Tiel ni restis sen navigisto. Oni devis preni por tio iun el nia ŝipanaro. Decido falis maljunan matrosan Ĝob Enderson. Kiel antaŭe oni nomis lin matroso, sed de nun li faris laboron de navigisto. Sinjoro Treloni ankaŭ

trovis por si iun surferdekan laboron.

Alia maljuna matroso, Iser Hends, estis maristo laborema kaj multscia. Li, inter alie, estis amiko de Ĝon Silver. Kaj, se mi jam memorigis ĉi-nomon, mi devas rakonti pri Silver iom pli.

Matrosoj nomis lin Piedulo. Iam li pendigis sian bastonon per ŝnureto sub la kapon, por ke manoj liaj estu **liberaj**.

oo

**libera** = *English: free.*

## 468 paŝo

- **Paŝas**: iras.
- Oni diras ke eĉ plej longa vojo komen-  
ciĝas per unua **paŝo**.
- Unu homo faras, irante, longajn **paŝojn**.  
Alia, samtempe, – multe da **paŝoj** mallongaj.  
Kiu el ili iras pli rapide?

oo

Mi mem vidis kiel li, pere de sia bastono, **paŝis** sur la moviĝanta ŝipo kiel sur tero. Dum fortaj ventobatoj li kuris sur la ferdeko

tre rapide, kaptante ŝnurojn, pendigitajn por li en multaj lokoj. Irante li tenis sin per tiuj ĉi ŝnuroj, helpis al si per la bastono, aŭ tiris ĝin post si per tiu ĉi subkapa ŝnureto.

Sed, malgraŭ tio, matrosoj, kiuj vojaĝis kun li antaŭe, diris ke li estas jam ne tio kio li estis.

– Nia Piedulo ne estas homo kiel ĉiuj aliaj, – diris al mi la maljuna matroso, – dum sia juneco li lernis en lernejo, tial, se li volas, li povas paroli same kiel en libroj. Kaj kiel kuraĝa li estas! Tigro estas nenio antaŭ nia Longa Ĝon.

oo

**paŝo** = *English: step, pace, stride.*

## 469 **atak**o

• *Se oni volas kapti fortikejon en kiu sidas malamikoj, oni **atakas** ĝin.*

oo

Mi vidis mem – diris la matroso, – kiel lin, senarmitan (sen'arm'it'a'n), **atakis** kvaropo. Li kaptis ilin, kaj batis per la kapoj tiel.

En okuloj de la ŝipanaro li estis kvazaŭ estro, oni eĉ agis laŭ liaj ordonoj. Kun ĉiu li povis konversacii, por ĉiu li scipovis trovi bonan vorton. Kun mi li estis eĉ pli bona. Ĉiufoje li ĝojis kiam mi eniris la kuirejon, kiun li tenis en mirinda ordo. Manĝilaro ĉe li ĉiam estis dispendigita, kaj ege pura. Estis tie ankaŭ birdujo, en kiu troviĝis la papago.

– Hokins, – diris Silver al mi, – eniru, konversaciu kun Ĝon. Al neniu mi estas tiel ĝoja kiel al vi, knabeto mia. Sidu kaj aŭskultu.

Tio estas Ŝipestro Flint... mi nomis la papagon laŭ nomo de bone konata pirato... Jen, Ŝipestro Flint antaŭdiras ke nia vojaĝo finiĝos bonege... Ĉu vere, Ŝipestro?

Responde la papago komencis kun neverŝajna (ne'ver'ŝajn'a) rapideco elkrii:

– Moneroj! Moneroj! Moneroj!

Kaj kriis ĝi ĝis laciĝo, aŭ ĝis kiam Ĝon mallumigis ĝian ujon per io netravidebla.

– Tiu ĉi birdo, – diris li, – estas verŝajne ducent-jara, Hokins. Papagoj vivas senfine. Sed tre malmultaj vidis dum sia vivo tiel multe da malbono kiel mia papago. Ĝi vojaĝis kun Ingland, kun tre konata pirata ŝipestro Ingland. Ĝi estis en Madagaskaro, sur Malabaro, en Surinamo, en Providenso, en Porto-Belo. Ĝi vidis kiel oni elakvigas aĵojn de dronita ŝipo. Jen kiam ĝi ellernis krii «mon-

eroj». Kaj estas nenio mirinda: tiam oni elakvigis tricent-kvindek-milon da oraj moneroj, Hokins!

Tiu ĉi papago partoprenis (part'o'pren'is) **atak**on sur estron de Hindio, proksime al Goao. Se oni rigardas ĝin, oni povas pensi ke ĝi naskiĝis antaŭ nelonge... Sed vi konas odoron de pulvo, ĉu, Ŝipestro?

- Suprenigu la ankron! - kriis la papago.

- Jes, ĝi estas bonega maristo, - diris la kuiristo, donante al la papago bongustaĵon.

oo

**atako** = *English: attack.*

## 470 **insultas**

• - *Denove viaj vestoj estas malpuraj! Kie vi estis, knabaĉo?! - **insultas** patrino sian filon.*

oo

La papago elkriis aĉajn **insulto**jn.

- Se oni loĝas apud malbono, oni nevole malpuriĝas, - klarigis al mi Ĝon, - sed tiu ĉi tre maljuna birdo ne komprenas kion ĝi diras.



Samajn **insultojn** ĝi krius eĉ antaŭ Estro de Ĉielo mem.

Ĉe tiuj ĉi vortoj Ĝon suprenigis la manojn tiel, ke mi opiniis lin plej bona homo sur Tero.

Sinjoro Treloni kaj la ŝipestro ne ŝatis, kiel antaŭe, unu la alian. Sinjoro Treloni diris pri la ŝipestro nur malbonaĵojn.

La ŝipestro, de sia flanko, neniam alparolis lin kaj, kiam sinjoro Treloni demandis lin pri io, la ŝipestro respondis mallonge kaj seke (sek'e). Pro la okazaĵoj li devis rekoni ke li verŝajne eraris, malbone opiniante pri la ŝipanaro. Multaj matrosoj laboris sindone (sin'-don'e), tuta ŝipanaro tenis sin bonege. Kaj la ŝipon li vere ekamis.

– Ĝi obeas kiel bona kunulino, sinjoroj. Sed, – aldonis li, – ni ankoraŭ ne revenis, kaj nia vojaĝo, kiel antaŭe, ege ne plaĉas al mi.

Post tiuj vortoj sinjoro Treloni turniĝis kaj iris for de la ŝipestro, suprenigante (supr'e'n'ig'ant'e) la kapon.

– Ankoraŭ iom, – diris li, – kaj tiu ĉi homo ĝisfine rompos mian eltenemon (el'ten'em'o'n).

Ni travivis marmaltrankvilegon (mar'mal'-trankvil'eg'o'n), kiu nur plifortigis nian opinion pri bonaj ecoj de «Hispanolo».


La ŝipanaro ŝajnis esti bonorda kaj gaja. Kaj ne mirinde. Laŭ mi, sur neniu ŝipo oni estis tiel bonvolaj al la ŝipanaro. Oni kaptis ĉiun

eblecon por doni al matrosoj iom pli da nefor-  
ta drinkaĵo. Se sinjoro Treloni aŭdis pri nask-  
iĝtago de iu el la matrosoj, oni samtage donis  
bongustaĵojn al ili ĉiuj.

oo

**insulti** = English: attack with insulting  
words.

## 471 p o m o



pomo

oo

Sur la ferdeko ĉiam staris barelo kun **po-  
moj**, por ke ĉiu deziranto povu manĝi ilin  
kiam li volas.

– Nenio bona venos de tio ĉi, – diris la  
ŝipestro al kuracisto Livsi, – kredu al mi: kiu  
disdonas al la matrosaro bonaĵojn, tiu ricevas  
malŝaton.

oo

**pomo** = English: apple.

## 472 **fidela**

*Fido (fid'o) estas sento, fido estas kredo.*

*Fideleco (fidel'ec'o) estas unu el bonaj ecoj de homo.*

- *Sinjoro Treloni kaj la kuracisto fidis pri Ĝon Silver. Sed ĉu Ĝon Silver vere estis **fidela** al siaj estroj?*

- *Tom Redrut estis multjara kaj **fidela** servanto. Kune kun sinjoro Treloni li travivis multajn malfacilaĵojn.*

oo

Sed, malgraŭ tio, la barelo, kiel vi vidis, faris al ni gravan servon. Nur pro tiu ĉi barelo ni eksciis pri la danĝero, kaj ne estis mortigitaj per manoj de mal**fidel**uloj (mal'**fi-del**'ul'o'j). Jen kiel okazis tio.

Ni navigis komence kontraŭ lokaj ĉiamaj ventoj, por poste veni al la insulo laŭvente, – diri pli klare mi ne povas, – kaj nun ni iris laŭvente.

Tage kaj nokte oni rigardis antaŭen, aten-

dante vidi la teron. Laŭ navigaj pripensoj ĝis la insulo restis ne pli ol tagnokto da iro. Ĉu ĉi-nokte, ĉu matene aŭ tage ni ekvidos Trezorinsulon.

oo

**fidela** = *English: faithful.*

## 473 direkt



Tiu ĉi aparato montras **direkton** al nordo.

• Ĉu «Hispanolo», kiam ĝi lasis Bristolon, prenis **direkton** al Trezorinsulo? Ne. Oni **direktis** la ŝipon al loko de kiu ventoj **direktiĝas** al la insulo.

• Kiam proksimiĝas tempo malvarma, birdoj forflugas al pli varmaj landoj. Sed kio montras **direkton** al ili?

oo

Ni **direktis** al sudo-sudo-okcidento. Nia **direkta** vento plenigis la velojn. Maro es-

tis trankvila. «Hispanolo» rapidegis antaŭen. Ĉio iris bonege. Ĉiuj estis sanaj, ĉiuj ĝojis pro finiĝo de unua duono de nia vojaĝo.

Kiam suno ekis malsupreniĝi, kaj mia laboro estis jam finita, mi, **direkt**ante al mia kajuto, subite ekpensis ke estus bone manĝi pomon. Mi venis sur la ferdekon.

Du matrosoj rigardis antaŭen, laŭ **direkto** de nia iro, esperante (esper'ant'e) ekvidi la insulon. La **direkt**isto mallaŭte fajfis, pririgardante la velojn.

oo

**direkto** = *English: direct.*

## 474 rando

• **Rando** de arbaro estas tiuj lokoj ĉirkaŭ la arbaro, kie la arbaro finiĝas.

• **Rando** de ŝipo estas flankaj partoj de ĝi.

oo

Ĉio estis trankvila, nur akvo bruetis trans la ŝip**rand**o.

oo

**rando** = English: border, edge.

## 475 **grimpas**

**Grimpas:** *pene moviĝas, iam eĉ man-piede.*

*Multaj mont**grimp**antoj volus sur**grimpi** monton Everest.*

oo

Okazis ke en la barelo troviĝas nur unu pomo. Por preni ĝin mi devis en**grimpi** la barelon. Sidante tie, en mallumo, ĉe brueto de la transranda akvo, mi endormiĝis.

Subite iu eksidis sur la ferdekon apud la barelo. La barelo ekmoviĝetis. Mi jam estis preta elsalti, sed subite la homo ekparolis. Mi rekonis voĉon de Silver kaj, post kiam li sukcesis diri nur kelkajn vortojn, mi decidis ke estas nenio sur Tero kontraŭ kio mi el**grimpu** el la barelo.

oo

**grimpi** = English: climb.

## 476 **fund**o

**Fundo:** Malsupra parto de ujo, de boato, de maro.

• Ĉu vi scipovas eldrinki ĝis**fund**e botelon da rumo?

• Ŝipoj, kiujn dronigis piratoj, ĝis nun kuŝas sur mara **fund**o.

oo

Mi kuŝis sur la barela **fund**o, tremante kaj aŭskultante, kun sento de timo kaj scivolo (sci'vol'o). De unuaj vortoj mi komprenis ke vivo de ĉiuj fidelaj homoj sur la ŝipo troviĝas en miaj manoj.

– Ne, ne mi, – diris Silver, – Flint estis la ŝipestro. Mi estis lia helpanto, ĉar tiam mi jam ne havis piedon. Mi perdis ĝin en sama afero en kiu maljuna Pju perdis siajn okulojn. Fortranĉis ĝin kuracisto kiu lernis en alternejo, kaj konis sian devon bonege. Sed, malgraŭ tio, oni pendigis lin en Korso-Kasle kiel fiŝon: sekiĝi sub suno apud ĉiuj aliaj. Jes!

Tio estis homoj de Roberts. Oni kaptis ilin ĉar ili alinomigis (ali'nom'ig'is) sian ŝipon. Ĉitage la ŝipo nomiĝis «Landestra feliĉo», alitage gi havis iun alian nomon. Sed, laŭ mi, kiel oni nomis la ŝipon, tiel ĝi ĉiam devas

nomiĝi.

Ni ne aliigis nomon de «Kasandro», kaj ĝi bonorde revenigis nin de Malabaro, post kiam Inglend kaptis estron de Hindio.

oo

**fundo** = *English: bottom.*

## 477 preskaŭ

- Li alkuris **preskaŭ** unua (sed ne unua).
- Ekmalsanis **preskaŭ** ĉiuj (sed ne ĉiuj).
- Mi **preskaŭ** kaptis la birdon, sed ĝi forflugis.

oo

Ne aliigis sian nomon ankaŭ «Foko», malnova ŝipo de Flint. Ĝi estis tute malseka pro sango, kaj da oro sur ĝi estis tiom multe ke ĝi **preskaŭ** dronis.

– Ho!, – ekaŭdis mi voĉon de plej juna nia matroso, – Flint estis vera kuraĝulo!

– Davis, onidire, estis ne malpli bona, – diris Silver, – sed mi neniam veladis (vel'ad'is) kun li. Mi veladis komence kun Inglend, poste kun Flint. Kaj nun mi mem eniris



maron. Mi ricevis naŭcenton da oraj moneroj ĉe Inĝland kaj du milojn ĉe Flint.

Por matroso tio estas ne tiel malbone. La mono estas enigita en bonan lokon, kaj donas sufiĉan aldonon. Gravas ne scipovo ricevi, sed scipovo gardi... Kie estas nun homoj de Inĝland? Mi ne scias... Kie estas homoj de Flint? Plimulto el ili estas ĉi tie, sur la ŝipo, kaj ĝojas kiam ricevas iun bongustaĵon. Multaj el ili, surborde, mortaĉis pro malsato. Maljuna Pju, kiam perdis la okulojn, komencis disĵeti mil ducent monerojn ĉiujare, kvazaŭ iu landestro. Kie li estas nun? Mortis, kaj kuŝas en tero. Sed jam antaŭ du jaroj li ne havis kion manĝi. Li elpetaĉis, li rabis, li fortranĉis kapojn, sed, malgraŭ tio, li ne scipovis trovi manĝon por si.

– Jen estas vojo de pirato, – diris la juna matroso.

– Nur ne estu malsaĝulo! – kriis Silver. – Sed ne pri vi la parolo: vi, kvankam juna, tute ne estas malsaĝa. Mi tuj rimarkis tion kiam ekvidis vin. Tial mi konversacias kun vi kiel kun viro.

Vi povas kompreni kion mi sentis, aŭdante kiel tiu ĉi maljuna aĉulo diras al alia homo vortojn kiujn li diris al mi! Se mi nur povus, mi mortigus lin...

Kaj dume Silver daŭrigis la parolon, ne sciante ke oni subaŭskultas (sub'aŭskult'as)

lin:

- Tio ĉiam okazas al ĝentlemanoj de bonokazo (bon'okaz'o). Ilia vivo estas malfacila, ili povas trafi pendigilon, sed manĝas kaj drinkas ili bonege. Ili eniras maron kun deko da moneretoj, kaj revenas kun centoj da oraĵoj. La havaĵo disdrinkiĝas, la mono disĵetiĝas, kaj - denove en maron, en nuraj vestaĉoj. Sed mi agas ne tiel. Mi enigis ĉiun mian monon en multajn lokojn; sed neniam mi enigis tro multe, por ke oni ne ekpensu ion malbonan. Mi estas kvindekjarulo, rimarku. Revenos mi el tiu ĉi velado, kaj vivos kiel plej vera ĝentlemano... Venis tempo, vi diras? Nu, kio, ankaŭ ĝis nun mi vivis ne malbone. Neniam mi malhavis ion. Trankvile dormis, bonguste manĝis. Nur en maro estis iam malfacile. Kiel mi komencis? De matroso, kiel vi.

- Sed via antaŭa mono jam perdiĝis, - diris la juna matroso, - kiel vi aperos en Bristolo post tiu ĉi vojaĝo?

- Sed kie, laŭ vi, estas nun mia mono? - demandis Silver ridetante.

- En Bristolo, kaj en aliaj lokoj, - respondis la matroso.

- Jes, ĝi estis tie, - diris la kuiristo, - ĝi estis tie kiam ni suprenigis la ankron. Sed nun mia maljunulino jam prenis ĝin de tie. «Velo» kune kun tero, sur kiu ĝi staras, kun

sia gastaro kaj ĉiuj kunaĵoj, havas jam alian havanton; la maljunulino forveturis, kaj atendas min en iu alia loko. Mi dirus al vi kie troviĝas la loko, ĉar mi tute fidas vin, sed mi timas ke al ĉiuj aliaj tio ne plaĉos, ĉar al ili mi diris nenion.

– Ĉu vi fidas vian kunulinon? – demandis la matroso.

– Ĝentlemanoj de bonokazo (bon'okaz'o) kutime ne fidas unu alian. Kaj agas bone. Sed mi... Kiu penos lasi ŝnuron, por ke maljuna Ĝon falaĉu, tiu nelonge vivos sur tiu ĉi Tero. Estas kiujn timigis Pju, aliaj timis Flinton. Sed min timis eĉ Flint mem. Li timis min, kaj ĝojis pri mi... Malmultaj konsentus veladi kun ŝipanaro kiu estis ĉe li. Vi ja konas min, mi ne ŝatas malveron, mi estas homo bonkora kaj gaja, sed, kiam mi estis lia helpanto, multon vidintaj piratoj de Flint obeis min kiel hundetoj. Sur ŝipo de maljuna Ĝon obeemo estis ege fortika.

oo

**preskaŭ** = English: almost.

## 478 afero

• *Dum sia vivo homo faras multajn **aferojn**, kaj laboro estas nur unu el ili. Li lernas, amas, kreskigas infanojn, vojaĝas en aliajn landojn.*

• *Ĉu vi scipovas fari tri **aferojn** samtempe: legi, aŭskulti kaj kanteti?*

• *Sinjoro Blendli, kiu helpis al Treloni trovi la ŝipon, estis tre bona **aferulo** (= ordiganto de **aferoj**).*

oo

– Mi diru veron al vi, – diris la juna matroso, – ĝis tiu ĉi konversacio, Ĝon, via **afero** estis tute ne laŭ mia gusto. Sed nun... jen mia mano, mi konsentas.

– Vi estas kuraĝa knabo, kaj tute ne mal-saĝa, – respondis Silver, kaj tiel varme kaptis manon de la junulo, ke mia barelo ekmoviĝis, – el vi kreskos tiel bonega ĝentlemano de bonokazo, kiun mi ankoraŭ vidis neniam!

Iom post iom mi komencis kompreni lingvon kiun ili parolis. Per «ĝentlemano de bonokazo» ili nomis piratojn. Mi estis ĉeestanto de lasta parto el rakonto pri ago de aĉuloj, kiuj el bona matroso faras anon de pirata rabistaro. Eblas ke tio estis lasta fidela matroso sur tuta nia ŝipo.

Interalie mi tuj komprenis ke tiu ĉi matroso ne estas sola. Silver mallaŭte fajfis, kaj al la barelo alsidis ankoraŭ iu.

– Dik estas jam nia, – diris Silver.

– Mi sciis ke li estos nia, – aŭdis mi voĉon de maljuna Iser Hends, – li ne estas malsaĝulo, tiu ĉi Dik.

Iom da tempo li sidis silente. Poste li daŭrigis:

– Diru, Piedulo, kiel longe ni iros tien kaj reen kiel iu malnova boataĉo (boat'aĉ'o)? Al mi ĝismorte malplaĉas la ŝipestro. Mi jam tute ne scipovas aŭskulti liajn ordonojn!

oo

**afero** = *English: affair, matter.*

## 479 vino



*Vino estas drinkaĵo malpli forta ol rumo. Sur la desegneto (desegn'et'o) vi vidas el kio*

oni faras **vinon**.

oo

Mi volas loĝi en ŝipestra kajuto, mi volas manĝi liajn bongustaĵojn, kaj drinki liajn **vi-**  
**nojn**.

- Iser, - diris Silver, - en via kapaĉo (kap'aĉ'o) neniam loĝis saĝo. Sed aŭskulti vi scipovas. Do aŭskultu: vi dormos, kiel antaŭe, en matrosa ejo, vi manĝos matrosan manĝon, vi estos obeema, vi estos servema, kaj vi drinkos eĉ ne eron da forta drinkaĵo ĝis mi diros al vi la vorton. Pri ĉio fidu min, fileto.

- Ĉu mi kontraŭas? - respondis la maljuna matroso. - Mi nur demandas: ĝis kiam?

- Ĝis kiam? - kriis Silver, - bone, mi diros al vi ĝis kiam. Ĝis kiom eble pli poste, jen ĝis kiam! Ŝipestro Smolet estas bonega maristo, li navigas la ŝipon por nia bono. Treloni kaj la kuracisto havas la mapon, sed ĉu vi scias kie ili tenas ĝin? Ankaŭ mi ne scias. Tial Treloni kaj la kuracisto trovu la trezorojn, kaj helpu al ni surŝipigi ilin. Tiam ni vidu.

oo

**vin**o = *English: wine.*

## 480 **tia**

- *Silver estis homo saĝa kaj gaja. Ĉu ĉiuj piratoj estis **tiaj**?*
- *Rumo estas drinkaĵo tre forta. Sed ne vino. Vino ne estas **tia**.*
- *Piratoj disdrinkaĉis (dis'drink'aĉ'is) la prirabitan monon, kaj revenadis (reven'ad'is) sur siajn ŝipojn havante nur vestaĉojn. **Tia** estis ilia vivo...*

oo

Mi jam parolis pri drinkulaĉoj, – diris Silver. – Se mi estus certa ke vi ne estas **tiaj**, mi donus al ŝipestro Smolet navigi la ŝipon ankaŭ revenan duonvojon (du'on'voj'o'n).

– Sed ankaŭ ni estas nemalbonaj maristoj! – kontraŭdiris Dik.

– Nemalbonaj matrosoj, vi volas diri, – respondis al li Silver, – jes, ni scipovas turni direktilon. Sed kiu trovos la direkton? Tion neniu el vi scipovas, ĝentlemanoj. Se ĉio irus laŭ mia deziro, mi donus al ŝipestro Smolet venigi nin dum rea vojo ĝis loko de niadirektaj ventoj. Tiam ni scius ke ni iras bone, ke ne estos bezonate disdoni ĉiutage kelkajn erojn da akvo. Sed mi scias **kiaj** vi estas. Do ni devas finigi ilin sur la insulo, tuj post kiam ili translokigos la trezorojn ĉi tien, sur la

ŝipon. Kion fari! Vi ja pensas nur pri drinkaĵoj. Se diri veron, mian koron vundas penso pri tio ke mi devos reveni kun **tiaj** homoj.

– Ne tiel forte, Longa! – diris Iser, – ja neniŭ kontraŭas vin.

– Ĉu malmulte mi vidis grandajn ŝipojn kiuj dronis pro nenio? Ĉu malmulte mi vidis kuraĝulojn kiujn oni pendigis malsekiĝi sub suno? – kriis Silver, – sed kial? Nur ĉar ili rapidis, rapidis, rapidis... Aŭskultu min: mi multe veladis, kaj ion mi vidis en mia vivo.

oo

kia	<b>tia</b>	ia	ĉia	nenia
kial	<b>tial</b>	ial	ĉial	nenial
kiam	<b>tiam</b>	iam	<b>ĉiam</b>	<b>neniam</b>
kie	<b>tie</b>	ie	ĉie	nenie
kiel	<b>tiel</b>	iel	ĉiel	neniel
kies	<b>ties</b>	ies	ĉies	nenies
kio	<b>tio</b>	io	<b>ĉio</b>	<b>nenio</b>
kiom	<b>tiom</b>	iom	ĉiom	neniom
kiu	<b>tiu</b>	iu	<b>ĉiu</b>	<b>neniu</b>

*Rigardu tiujn ĉi vortojn, sinjoro leganto. Ĉu ni parolis pri ĉiuj el ili? Ne, ne pri ĉiuj. Sed nun ni povas kompreni ilin ĉiujn. Jes, post kiam ni konatiĝis (kon'at'iĝ'is) kun vortoj de «**kiam**» ĝis «**neniam**», de «**kio**» ĝis «**nenio**», de «**kiu**» ĝis «**neniu**», ni povas kompreni ankaŭ tiujn el la vortoj pri kiuj ni*



parolis neniam. **Tiaj** ili estas!

**Kia**'j? **Tia**'j!

**tia** = English: that kind of.

## 481 **ĝusta**

• – *Kiom estas kvar kaj kvar? Kion vi diras?... Jes, kvar kaj kvar estas ok. **Ĝusta** respondo.*

• *Tio okazis ĉi tie. Jes, **ĝuste** ĉi tie: ili sidis ĉe tiu arbo.*

• *Li estas **ĝusta** homo sur **ĝusta** loko.*

• *Mi memoras bone: li prenis de mi **ĝuste** tiun ĉi oran moneron.*

oo

Se vi scipovus preni **ĝustan** direkton, kaj teni ĝin, vi ĉiuj delonge veturadus (vetur'ad'us) en viaj multĉevalaj veturiloj. Sed vi ne scipovas! Mi bonege konas vin. Vi sat-drinkaĉos (sat'drink'aĉ'os) rumon kaj, – al pendigilo.

– Ĉiuj scias, Ĝon, ke vi scipovas paroli kiel ĉiel-servanto, – kontraŭdiris Iser. – Sed

estis ankaŭ aliaj scipovuloj (sci'pov'ul'o'j), ne malpli bonaj ol vi. Ili ŝatis vivi gaje. Ili ne faris el si grandajn estrojn. Ili mem gajis, kaj al aliaj ne malhelpis.

- Jes, - diris Silver, - sed kie ili estas nun? Tia estis Pju, kiu mortis malsata. Flint estis tia, kaj mortis pro rumo en Savano. Jes, tio estis homoj bonaj, gajaj... Sed kie ili estas nun, jen estas demando!

- Kion ni faros pri ili, - demandis Dik, - kiam ili trafos niajn manojn?

- Bonega demando. Jen homo kiu estas laŭ mia gusto! - kriis la kuiristo, - ne pri malgravaĵoj li parolas, sed pri afero. Kion, laŭ vi, oni faru pri ili?

oo

**ĝuste** = English: right, correct, exact.

## 482 **ajn**

Vorto **ajn** plifortigas vortojn *io, kio, ĉio; iu, kiu, ĉiu; iam, kiam, ĉiam...*

- *Kio **ajn**: ne gravas kio.*
- *Kiel **ajn**: ne gravas kiel.*
- *Kiom **ajn**: ne gravas kiom...*



**ajn** = English: -ever, -soever.

## 483 **teruro**

*Teruro* estas sento simila al timo, sed pli forta.

oo

Vi povas kompreni mian **teruron**! Mi elsaltus kaj ĵetus min kuri, se sufiĉus ĉe mi forto, sed koro mia, miaj piedoj kaj manoj ĉesis obei min.

Dik jam preskaŭ ekstaris, sed subite lin haltis voĉo de Hends:

– Por kio vi manĝaĉu tiun ĉi aĉaĵon, Ĝon? Donu al ni rumon!

– Dik, – diris Silver, – mi fidas vin. Mi fidas, sed sciu ke sur la bareleto estas surskriboj. Jen la ŝlosilo. Plenigu duonbotelon, kaj alportu ĝin.

Malgraŭ ĉiu mia timo ĉi-momente mi ekpensis: «Jen kie sinjoro Eroŭ prenis rumon kiu mortigis lin!»

Tuj kiam Dik deiris, Iser komencis mallaŭte diri ion al la kuiristo. Mi komprenis nur du-tri vortojn, sed ankaŭ tio sufiĉis.

– Neniu el aliaj konsentas, – diris Iser.

Do, sur la ŝipo restis ankoraŭ fidelaj homoj!

Kiam Dik revenis, ĉiuj tri unu post la alia prenis la botelon, kaj eldrinkis; unu «Por la sukceso», dua «Por maljuna Flint», kaj Silver eĉ ekkantis:

*Por vento de bonokazo,  
Por vento de sukceso!  
Por ke vivu ni gaje kaj multmone.*

En la barelo ekestis iom pli lume. Rigardante la ĉielon mi ekvidis ke supreniĝas luno, lumigante la velojn. Samtempe ekaŭdiĝis krio:

– Tero!

La ferdeko ekbruegis pro piedfrapoj. Mi aŭdis kiel homoj elkuras el matrosa ĉambro kaj el kajutoj.

Elsaltinte el la barelo mi, kune kun Hanter kaj kuracisto Livsi, alkuris la subventan (sub-'vent'a'n) ŝiprandon. Ĉi tie kuniĝis jam tuta ŝipanaro.

Malproksime, sud-okcidente, ni ekvidis du nealtajn montetojn, kaj post ili trian, pli altan.

Mi rigardis ilin, sed pensis pri io tute alia: mi ne sukcesis ankoraŭ trankviliĝi de la travivaĵo.

Poste mi ekaŭdis voĉon de ŝipestro Smolet, disdonanta ordonojn; kaj «Hispanolo» haltis flanke al la vento.

oo

**teruro** = English: terror, fright, intense fear.

## 484 **u m a s**

Vortoj kiuj enhavas vorton **um** estas malmultaj. Ni priparolu duopon (du'op'o'n) da ili: "pend**umi**" kaj "plen**umi**".

### **1. Pendumi:**

Piratoj estis homoj ne tro instruitaj (instru'it'a'j) do ili diris: "oni pendigis lin sekiĝi kiel fiŝon". Sed ni ne estas piratoj.

...Jes, fiŝojn, ŝlosilojn, desegnojn, horloĝojn oni pendigas, sed ne homojn. Piratojn kaj aliajn aĉulojn (aĉ'ul'o'j'n) oni ne pendigas sed pend**umis**. Sur pend**umiloj** (pend'**um**'il'o'j).

Vortojn kun "**um**" oni jes trovas en E-vortaroj. Vorton "pend'**um**" oni serĉu tie kie estas klarigata vorto "pend".

2. *Plenumi* (plen'um'i): plene, ĝisfine farition kion oni dev-as (is, os) fari.

• Se oni konstruis domon, kaj la domo ekestis konstruita (konstru'it'a), oni diras pri la konstruantoj (konstru'ant'o'j) ke ili plenumis sian laboron.

Vortkunigaĵon "plen'um" oni trovas en tiu loko de vortaro kie estas preparolata vorto «plen».

oo

- Knaboj, - diris la ŝipestro, kiam ĉiuj liaj ordonoj estis plenumitaj, - ĉu iu el vi vidis antaŭe tiun ĉi teron?

- Mi vidis, sinjoro, - diris Silver, - ni prenis ĉi tie trinkakvon kiam mi servis kiel kuiristo sur unu el ŝipoj.

- Ŝajnas ke surankriĝi (sur'ankr'iĝ'i) estas pli bone de sudo, post tiu ĉi insuleto? - demandis la ŝipestro.


- Jes, sinjoro, tiu ĉi insuleto nomiĝas Homrestaĵa (hom'rest'aĵ'a). Antaŭe ĉi tie haltis piratoj; unu el matrosoj de nia ŝipo konis ĉiujn nomojn kiujn piratoj donis al la lokoj.

oo

aĉ	ad	aĵ	an	ar	bo	ĉj
dis	ec	ebl	eg	ej	ek	em
end	er	et	fi	ge	id	ig
iĝ	il	in	ind	ing	ism	ist
mal	mis	nj	op	re	uj	ul
um						

**um** = English: word of no defined meaning.)

## 485 masto



**Masto(j)**, sur vela ŝipo, estas tiu(j) alta(j) ligna(j) staraĵo(j) kiu(j) servas por teni velo(j)n.



oo

Jen tiu altaĵo, norde, nomiĝas Antaŭa **Masto**. De nordo al sudo estas tie tri altaĵoj: Antaŭa **Masto**, Granda **Masto**, kaj Posta **Masto**. Sed Grandan **Maston** – tiun altan monton, oni ankaŭ nomas «Velo», ĉar piratoj tenis tie gardejon, kiam ili staris sur ankro por purigi fundojn de siaj ŝipoj de marestaĵoj (mar'est'aĵ'o'j). Ili kutime faris tion ĉi tie, sinjoro.

– Mi havas mapon, – diris ŝipestro Smolet, – rigardu, ĉu tio estas sama insulo?


Okuloj de Longa Ĝon ekflamis kiam la mapo trafis liajn manojn. Sed... sed tio estis ne tiu mapo kiun ni trovis en havaĵujo de Bili Bons; tio estis redeseĝno (re'deseĝn'o): kun ĉiuj nomoj, sed sen triopo da ruĝaj krucetoj (+++). Sed, malgraŭ tio, Silver detenis sin.

– Jes, sinjoro, – diris li, – tiu sama. La mapon oni desegnis tre bone. Piratoj estas homoj ne instruitaj, ili ne scipovas tion... Jen haltejo de Ŝipestro Kid; tiel nomis ĝin mia samŝipano.

oo

**masto** = English: mast.

## 486 fluas



*Kio fluas el la botelo? Ĉu akvo? Ĉu vino?*

oo

Tie estas forta mara fluo al sudo. Poste, ĉe okcidenta bordo, ĝi turniĝas al nordo. Vi bone faris, sinjoro, – daŭrigis li, – ke haltis la ŝipon tiel. Se vi intencas eniri la golfon, pli bonan lokon por ĵeti la ankron vi ne trovos.

– Bone, – diris ŝipestro Smolet, – kiam mi bezonos helpon, mi denove turnos al vi. Vi povas iri.

Mi estis mirigita pri tiu malvarm-sangeco, per kiu Ĝon montris sian konatecon pri la insulo. Mi devas diri ke mi timis kiam li alvenis min. Certe li ne sciis ke mi sidis en la barelo, kaj aŭdis ĉion. Sed, malgraŭ tio, mi sentis tian teruron pro liaj mortigemo kaj malveremo, pro tiu ega forto kiun li havas super la ŝipanaro, ke mi preskaŭ ekstremis kiam ek-sentis lian manon sur mia kapo.

– Nermalbona loko estas tiu ĉi insulo, – diris li, – nermalbona loko por knabo. Vi

eniros la maran akvon, vi grimpos sur la arbojn, vi postkuros ĉi-tieajn herbmanĝulojn. Same al la bestoj vi saltos laŭ la montflankoj. Vere, rigardante la insulon ankaŭ mi fariĝas juna, kaj ĉesas pensi pri mia forestanta piedo. Bonas esti dupieda knabo. Se vi volos konatiĝi kun la insulo, diru al maljuna Ĝon, kaj li ordigos al vi manĝon por la vojo. Kaj, amike frapinte (frap'int'e) min, li ekiris for.

Ŝipestro Smolet, sinjoro Treloni kaj kuracisto Livsi staris kaj konversaciis pri io. Mi volus tuj transdoni al ili kion mi sukcesis ekscii. Sed mi timis rompi ilian konversacion antaŭ ĉiuj okuloj. Mi iradis ĉirkaŭe, serĉante eblecon ekparoli, sed subite kuracisto Livsi vokis min al si: li lasis ion sube, kaj volis sendi min por alporti tion. Veninte proksimen al li mi, por ke neniu aŭskultu, diris tre mal-laŭte:

- Sinjoro Livsi, mi devas konversacii kun vi. La ŝipestro kaj sinjoro Treloni mal-supreniru en la kajuton, kaj poste vi voku min. Mi havas terurajn novaĵojn.

Vizaĝo de la kuracisto iom aliiĝis, sed li tuj retenis sin.

- Bone, Ĝim, tio estas ĉio, kion mi volis scii, - diris li laŭte, por ke oni pensu ke li demandis min pri io.

Poste li turniĝis al sinjoro Treloni kaj al la ŝipestro. Ili daŭrigis sian konversacion tute

trankvile, ne altigante la voĉojn. Neniu el ili eĉ ekfajfis, sed mi komprenis ke kuracisto Livsi transdonis al ili mian peton. Poste la ŝipestro ordonis al Ĝob Enderson alfajfi la ŝipanaron sur la ferdekon.

- Knaboj, - diris ŝipestro Smolet, vi vidas antaŭ vi teron. Tio estas insulo al kiu ni iris. Ĉiuj ni scias kiel bonkora estas sinjoro Treloni. Li demandis min ĉu la ŝipanaro laboris bone dum la vojo. Kaj mi respondis ke ĉiuj vi bone plenumis vian devon, kaj ke mi neniam devis voli ke vi laboru pli bone. Sinjoro Treloni, mi, kaj la kuracisto, ni iras en la kajuton drinki pri via sano kaj via sukceso; kaj al vi, tie ĉi, oni donos drinkaĵon por ke ankaŭ vi drinku por nia sano kaj nia sukceso. Se vi volas scii mian opinion, mi diros ke sinjoro Treloni, disdonante la drinkaĵon, agas vere bonkore. Mi opinias ke estus bone krii al li «hura».

Estis nenio mirinda en tio ke ĉiuj kriis «hura». Sed sonis ĝi tiel kortuŝe kaj gaje, ke mi, en tiu minuto preskaŭ ne povis kredi ke tiuj ĉi homoj intencas mortigi nin ĉiujn.

- Hura al ŝipestro Smolet! - elkriaĉis Longa Ĝon, kiam unua «hura» eksilentis.

Ankaŭ ĉi-foje «hura» estis subtenata de ĉiuj.

Ĉe senĉesaj bonkrioj la tri ĝentlemanoj malsupreniris la kajuton. Iom poste ili vokis

la ŝiplernanton.



Kiam mi eniris, ili sidis ĉirkaŭ la tablo. Antaŭ ili staris botelo da hispana vino, kaj ujo kun seka bongustaĵo.

La kuracisto tenis sian hararaĵon (har'ar'aĵ'o'n) en la manoj, kaj tio, kiel mi sciis, montris ke li tre maltrankvilas. Malantaŭa fenestreto estis malfermita, ĉar nokto estis varma. Maro relumis lunan lumon.

– Nu, Hokins, – diris sinjoro Treloni, – vi volis sciigi ion al ni. Parolu.

Mi mallonge transdonis (trans'don'is) al ili ĉion kion mi aŭdis sidante en la barelo. Ili ne interrompis min ĝis kiam mi finis; ili ne moviĝis, ili nur senĉese rigardis min.

– Ĝim, – diris kuracisto Livsi, – sidu.

Ili sidigis min ĉe la tablo, donis al mi iom da vino, enigis en mian manon iom da bongustaĵo, kaj ĉiuj tri, unu post la alia, drinkis por mia sano, por mia feliĉo, kaj por mia kuraĝo.

– Jes, ŝipestro, – diris sinjoro Treloni, – vi bonege antaŭvidis ĉion, sed mi eraris. Mi rekonas min malsaĝulo, kaj atendas viajn ordonojn.

– Mi estas sama malsaĝulo, sinjoro, – kontraŭdiris la ŝipestro. – Kiam ŝipanaro intencas ribeli, ĉiam okazas io laŭ kio oni povas antaŭvidi tion, se oni ne estas blinda. Vidi kaj

agi. Sed pri tiu ĉi ŝipanaro mi ne sukcesis.

- Ŝipestro, - diris la kuracisto, - tio okazis pro Ĝon Silver. Li estas mirinda homo.

- Mirinde bone estus vidi lin pendumita (pend'um'it'a), - respondis la ŝipestro, - sed ĉiuj ĉi paroloj jam tute ne gravas. El ĉio dirita mi ion komprenis kaj, se sinjoro Treloni ne kontraŭas, mi volus ion diri al vi.

- Vi estas ĉi tie ŝipestro, sinjoro, ordonu!  
- diris sinjoro Treloni.

- Unue, - diris ŝipestro Smolet, - ni devas daŭrigi ĉion kion ni komencis, ĉar retir-iĝo (re'tir'iĝ'o) estas fortranĉita. Se mi ekparolos pri reveno ili ribelos surloke. Due, ni ankoraŭ havas tempon. Ne multe, nur ĝis ni trovos la trezorojn. Trie, inter la ŝipanaro restis ankoraŭ fidelaj homoj. Ĉu nun, ĉu iom poste, sed ni bezonos batali kontraŭ tiu ĉi rabistaro. Mi opinias ke ni, kiel oni diras, kaptu pikilojn de bovo, kaj ataku ilin unuaj, subite, kiam ili tute ne atendas tion. Ŝajnas ke ni povas fidi viajn servantojn, sinjoro Treloni, ĉu?

- Kiel min mem.

- Ili estas triopo, - diris la ŝipestro, - ankaŭ ni estas triopo, kaj Hokins, - do ni estas sepopaj. Kaj kiun oni povas fidi el la ŝipanaro?

- Verŝajne kiujn Treloni dungis mem, sen helpo de Silver, - diris la kuracisto.

- Ne, - respondis Treloni. - Ja mi memdungis Hends-on.

- Ankaŭ al mi ŝajnis ke lin oni povas fidi, - diris la ŝipestro.

- Kaj pripensu, ili ĉiuj estas britoj! - diris Treloni. - Vere, sinjoroj, mi dezirus eksplodi la tutan ŝipon!

- Do, ĝentlemanoj, - daŭrigis la ŝipestro, - niaj eblecoj estas malmultaj. Ni devas esti singardaj, atendante bonan okazon. Mi konsentas ke tio estas tre malfacile. Pli bone estus ataki ilin tuj. Sed ni povas komenci nenion ĝis ekscios kiun el la ŝipanaro ni povas fidi. Singardemo kaj atendo: jen estas ĉio kion ni povas fari.

- Tio estas Ĝim, kiu povas fari por ni pli multe ol iu alia, - diris la kuracisto, - matrosoj havas nenion kontraŭ li, kaj Ĝim estas rimarkema knabo.

- Hokins, mi plene fidas vin, - aldonis sinjoro Treloni.

Mi devas diri ke mi tre timis ke ne estos inda (ind'a) al ilia fido. Sed okazis tiel ke mi vere savis iliajn vivojn.

Jes, el dudek ses homoj ni povis fidi nur pri sepopo. Kaj unu el la sepopo estis nur knabo.


Se preni plenkreskulojn (plen'kresk'ul'o'j'n), ni estis sesopaj kontraŭ dek-naŭopaj piratoj.

Kiam matene mi venis sur la ferdekon, la insulo ŝajnis al mi tute alia ol vespere. Kvankam la vento trankviliĝis, ni, malgraŭ tio, iom proksimiĝis dum la nokto, kaj staris nun ene de trankvila maro, duonmeje de la malalta bordo.



**flu**o = *English: flow, current, flux.*

## 487 sablo



*Sufiĉe multaj loĝantoj de nordaj landoj veturas ĉiujare al sudaj marbordoj. Tie ili eniras maran akvon kaj, post tio, kuŝas sur... ĉu sur ŝtonoj?*

*Ne! Ne ĉiu marbordo estas ŝtona. Norduloj venas suden por kuŝi sur varma ĉeborda **sablo**.*






Sur plimulto de la insulo kreskis nigretaj arbaroj. La bordo estis parte ŝtona, parte **sabla**. Tie kaj alie el la arbaro altiĝis, unuope aŭ kelkope, arboj tre altaj. Sed, malgraŭ ĉio, la insulo sentigis (sent'ig'is) senhomecon kaj malgajon. Sur supro de ĉiu altaĵo videblis pikaj senkreskaĵaj (sen'kresk'aĵ'a'j) ŝtonegoj.

Velo estis per tri- aŭ kvarcent futoj pli alta ol aliaj montetoj, kaj ŝajnis plej nekutima pro sia detranĉita supraĵo.

oo

**sablo** = *English: sand, grit.*

## 488 **ondo**



**ondoj**

oo

Apudbordaj **ondoj** tiel forte suprenigis kaj malsuprenigis «Hispanolo»-n, ke tuta ŝipo saltis kaj bruis kiel nia malnova gastejo. Mi kaptis ion per la manoj, kaj eksentis min iom malbone. Ĉio turniĝis antaŭ miaj okuloj.

Mi jam sukcesis kutimiĝi al maro kiam la ŝipo distranĉis **ondojn**, sed kiam ĝi staris sur la ankro, kaj samtempe turniĝis en la akvo kiel botelo, mi sentis kapturniĝon (kap'-turn'iĝ'o'n).

Mi ne scias pro kio, ĉu pro la **ondiĝo** kaj tiuj nigretaj malgajaj arbaroj, ĉu pro tiuj senkreskaĵaj ŝtonegoj, aŭ pro la ĉeborda **ondofrapado** (**ond'o'frap'ad'o**), sed, kvankam la mateno estis varma, kvankam maraj birdoj fluge turniĝis ĉirkaŭe, kaj kun krioj kaptis el maro fiŝojn; kvankam ĉiu homo sur mia loko estus ĝoja, vidante teron post tiel longa troviĝo ene de maro, sed mi eksentis iun timon.

Jam post unua rigardo ekmalamis mi tiun ĉi Trezorinsulon.

oo

**ondo** = *English: wave.*


## 489 **remas**

*Ankaŭ nun estas boatoj kiujn movas homa forto. Homoj-remistoj **remas**: fojo post fojo ili enigis siajn **remilojn** en la akvon por moviĝi pli-malpli rapide.*





## 491 **baras**



*Barilo (bar'il'o) baras vojon al homoj aŭ bestoj.*

oo

De sur la ŝipo oni ne vidis la fortikejon (fortik'ej'o = ejo fortik'it'a), kaj ĉirkaŭigantan (ĉirkaŭ'ig'ant'a'n) ĝin **bar**ilon. Arboj fermis la fortikejon tute kaj, se ne la mapo, oni povus opinii ke ni estas unuaj homoj venintaj (ven'int'aj) al la insulo de tempo kiam ĝi supreniĝis el la maro.

Vento forestis. Nur unu sono rompis la silenton: malproksima muĝo de ondofrapado, kiu disbatiĝis duonmejle de ni kontraŭ ĉebordaj ŝtonegoj. Nekutima, malplaĉa odoro staris ĉirkaŭ la ŝipo: odoro de mortintaj kreskaĵoj.

Mi rimarkis ke ankaŭ al la kuracisto ne plaĉas tiu ĉi odoro. Lia vizaĝo estis tia kvazaŭ li ricevis manĝi ion tute nemanĝeblan.

- Mi ne scias ĉu estas ĉi tie trezoroj, - diris li, - sed malsanoj ĉi tie certe troviĝas.

Kontraŭestraj (kontraŭ'estr'a'j) paroloj de la ŝipanaro, kiuj maltrankviligis min sur la

boato, fariĝis vere danĝeraj kiam ni revenis sur la ŝipon. Matrosoj kuŝaĉis sur la ferdeko, kaj mallaŭte konversaciis. Ordonojn, eĉ plej malgravajn, ili aŭskultis malkontente, kaj plenumis ilin sufiĉe nevole. Ankaŭ fidindajn matrosojn kaptis malsano de kontraŭdiroj, kaj estis neniu por obeigi (obe'ig'i) ilin.

oo

**bari** = *English: bar, block.*

## 492 super

- *Maraj birdoj flugas **super** maro, kaj rigardas malsupren por rimarki kaj kapti fiŝojn.*

- *Ĉu ankaŭ fiŝoj flugas? Jes, estas maraj fiŝoj kiuj tempo de tempo elsaltas el akvo, kaj «flugetas» **super** ĝi.*

oo

Proksimiĝis ribelo, kaj tiu ĉi danĝero jam pendis **super** niaj kapoj.

Sed ne nur ni, loĝantoj de kajutoj, rimarkis la danĝeron. Longa Ĝon el ĉiuj siaj fortoj penis subteni ordon, irante de areto al

areto, ĉu petante, ĉu montrante sian laboremon. Li faris ĉion penante esti servema kaj bonkora. Li ridetis al ĉiuj. Se oni ordonis ion, Ĝon tuj kaptis sian bastonon, kaj unua ĵetis sin plenumi la ordonon, ĝoje kriante: «Jes, jes, sinjoro!» Kiam estis nenio por fari li kantis kantojn, unu post alia, por ke ne tiel rimarkindaj estu malbonaj sentoj de ĉiuj aliaj.

El ĉio kio okazis en tiu ĉi antaŭribela tago, plej malbonmontra ŝajnis al ni tiuj ĉi agoj de Longa Ĝon. Ni venis en la kajuton por kunsido.

– Sinjoroj, – diris la ŝipestro, – se mi donos eĉ unu ordonon, ĉiuj matrosoj ĵetiĝos sur nin. Vi ja mem vidas kio okazas. Se mi ne respondos al la malbonaj agoj, Silver rimarkos ke io ĉi tie estas malorda, kaj ni perdos ĉion. Nun ni povas fidi nur pri unu homo.

– Pri kiu? – demandis sinjoro Treloni.

– Pri Silver, – respondis la ŝipestro, – li ne malpli ol ni volas trankviligi ilin. Li agas laŭ sia vojo kaj, se doni al li eblecon, li petegos ilin ne ribeli antaŭtempe... Mi opinias ke estus bone doni al li tiun ĉi eblecon. Ni donu al matrosoj veni sur la bordon. Se ili foriros ĉiuj, ni kaptos la ŝipon. Se neniu el ili lasos la ŝipon, ni ŝlosos nin en la kajuto, kontraŭstaros de tie, kaj Ĉielo helpu al ni. Se sur la ŝipo restos nur malmultaj matrosoj, tiam, kredis al mi, Silver revenigos la forirantojn tre

obeemaj.

Ni faris tiel.

oo

**super** = English: above.

## 493 **ŝ**argas

*Por ke pafilo estu preta elpafi oni devas **ŝargi** ĝin: enigi iom da pulvo (por malnovaj pafiloj), kaj kuglon.*

oo

Al fidindaj homoj ni disdonis **ŝargitajn** pistolojn. Al Hanter, Ĝojs kaj Redrut ni rakontis pri la okazaĵoj. Eksciante ĉion ili ne tro ekmiris, kaj restis pli trankvilaj ol ni atendis. Post tio la ŝipestro venis sur la ferdekon, kaj alparolis la ŝipanaron:

- Knaboj, - diris li, - ĉi-tago estis vere pena labortago, kaj ni ĉiuj ege laciĝis. Surborda irado estos bona por ĉiuj. Boatoj troviĝas surakve. Kiu volas, iru per ili al la bordo. Duonhore antaŭ sunsubiro (sun'sub'ir'o) mi pafos el la kanono.

Verŝajne tiuj malsaĝuloj opiniis ke trovos



la trezorojn tuj post la surbordiĝo. Ĉiu ilia malamo tuj malaperis. Ili tiel laŭte kriis «hura», ke timigitaj birdoj denove ekflugis super la haltejo.

La ŝipestro agis tre saĝe: li tuj foriris, donante al Silver ordigi ĉion. Kaj kiel alie povus li agi? Ja restu li sur la ferdeko, li ne povus ŝajnigi sin nenion komprenanta. Ĉio estis tute klara: Silver ekestis ŝipestro, kaj en liaj manoj estis aro da aĉuloj. Kaj fidelaj matrosoj, postnelonge montriĝis ke estis sur la ŝipo ankaŭ tiaj, okazis tute malsaĝaj. Jes, verŝajnas ke ankaŭ ili estis pli aŭ malpli kontraŭaj al ni, sed certe ili ne volis veni tro malproksimen: unu afero estas malobeemo, nenifarado, kaj tute alia – kupto de ŝipo, kaj mortigo de homoj kiuj faris nenion malbonan.

Post longaj interparoloj la ŝipanaro decidis ke sesopo restu sur la ŝipo, kaj aliaj dek tri, inter ili ankaŭ Silver, eniru la boatojn.

Ĝuste tiam mi decidis, subite, fari unuan el kuraĝaj, sed ne tro pripensitaj agoj, kiuj poste savis nin de morto. Mi pensis tiel: ni ne povas kapti la ŝipon, ĉar Silver lasis sur ĝi seson da siaj piratoj. De alia flanko, ĉar ili restis nur sesopaj, mi ne estas nun bezonata sur la ŝipo.

Mi decidis veni sur la bordon. Tuj mi transgrimpis la ŝiprandon, kaj eksidis sur antaŭo de plej proksima boato, kiu tiutempe

deiris. Neniu alrigardis min, nur la antaŭa remisto diris:

– Ĉu tio estas vi, Ĝim? Tenu la kapon pli malalte.

Sed Silver, sidanta en alia boato, vokis min, por certiĝi, ke tio vere estas mi. Tiam mi ekpensis ke tio kion mi faras estas ago mal-saĝa.

La boatoj ekrapidegis. Sed boato, en kiu sidis mi, komencis unua, ankaŭ remantoj en ĝi okazis pli bonaj. Do ni venis unuaj. Tuj post kiam nia boato tuŝis la bordon, mi el-saltis, kaj ĵetiĝis en la densejon. Silver kun siaj kunuloj restis tricento da futoj malantaŭe.

– Ĝim, Ĝim! – kriis li.

Sed, kompreneble, mi tute ne reagis (re'ag'is) liajn kriojn. Sen rerigardi, saltante, rompante kreskaĵojn, traigante herbojn, mi kuris antaŭen kaj antaŭen, ĝis kiam laciĝis.

Ĝoja, ke forkuris de Longa Ĝon, mi gaje kaj scivole (sci'vol'e) pririgardis nekonatajn lokojn. Komence mi trafis marĉon, superkreskitan (super'kresk'it'a'n) per arboj kaj altegaj herboj. Poste mi venis malferman sablan lokon, pli-malpli mejlo longan, kie kreskis iuj malrektaj arboj, similaj al kiuj kreskas ankaŭ en Anglio. Malproksime videblis Dukapa monto, duo da ĝiaj senkreskaĵaj supraĵoj relumis sunon. Unuafoje travivadis

(tra'viv'ad'is) mi ĝojon de vojaĝanto kiu konatiĝas kun malproksima lando.

La insulo estis neloĝata. Homoj de mia boato restis malproksime, malantaŭe, do mi povis renkonti neniun krom lokaj bestoj. Mi singarde iris inter arboj. Multloke mi trafis iujn nekonatajn kreskaĵojn kaj birdojn. Tie kaj alie mi renkontis senpiedajn bestojn. Unu el ili suprenigis la kapon, kaj ekbruetis. Mi eĉ ne sciis ke tio estas bone konata senpieda besto, frapo de kiu estas mortiga.

Finfine mi eniris densejon de arboj, nomon de kiuj mi eksciis nur poste. Ili, tre malaltaj, kreskis sur sablo, kaj iris malsupren al superkreskita marĉo, tra kiu fluis unu el du riveretoj kiuj enfluis nian ŝiphaltejon.

Subite ekbruis altega marĉa herbo. Kun krioj elflugis granda birdo, alia; kaj, post ne-longe, super la marĉo ekpendis centoj da birdoj, kiuj kriis ĉirkaŭflugante.

Mi tuj komprenis ke iu el niaj maristoj iras laŭ la marĉa bordo, kaj ne eraris... Post ne-longe mi ekaŭdis malproksimajn voĉojn kiuj, proksimiĝante, iĝis pli kaj pli laŭtaj.

oo

**ŝargi** = English: burden, load.

## 494 kaŝas

***Kaŝas:** faras ion tiel ke oni ne sciu pri tio.*

• *Kie Flint, estro de piratoj, **kaŝis** siajn trezorojn?*

• *Iam unu el infanoj **kaŝas** sin. Aliaj iras lin serĉi. Post la malkaŝo **kaŝiĝas** iu alia el la infanoj.*

• *Malkaŝu al mi: kiun vi amas?*

oo

Mi tre ektimis, ĵetiĝis en plej proksiman densejon, kaj **kaŝiĝis** tie. Alia voĉo respondis. Poste denove ekparolis la unua, kaj mi rekonis ĝin: tio estis voĉo de Silver.

Li parolis pri io senĉese tiel, ke al lia kuniranto estis malfacile enigi vorton. Ili konversaciis preskaŭ malamike, sed mi ne povis kompreni la vortojn. Fine ili eksilentis kaj, verŝajne, eksidis, ĉar birdoj iom post iom trankviliĝis kaj almarĉiĝis (al'marĉ'iĝ'is).

Mi eksentis ke mi deflankiĝas (de'flank'iĝas) de miaj devoj. Se mi estas tiel malsaĝa ke surbordiĝis kune kun la piratoj, do mi devas **kaŝaŭskulti** (**kaŝ**'aŭskult'i) pri kio ili konversacias. Mia devo ordonas al mi veni al ili kiel eble plej proksimen, kaj **kaŝiĝi** en la densaj kreskaĵoj.

Mi sciis ĝuste kie sidas tiuj ĉi maristoj, kiel laŭ iliaj voĉoj, tiel laŭ maltrankvilo de kelkaj birdoj, ankoraŭ ĉirkaŭflugantaj super iliaj kapoj.

Malrapide kaj singarde moviĝis mi antaŭen. Fine, suprenigante la kapon, kaj rigardante el inter la kreskaĵoj, mi ekvidis sur herbejo, apud la marĉo, Ĝon Silver-on, kaj ankoraŭ unun matroson. Ili staris unu kontraŭ alia, kaj konversaciis. Ilin bruligis la suno. Silver deĵetis sian kapveston sur la teron, kaj lia granda blanketa vizaĝo estis turniĝanta al la kunkonversacianto (kun'konversaci'ant'o) preskaŭ kun alĉiela peto.

- Amiko, - diris li, - vi estas por mi pura oro. Ĉu vere mi tiel parolus kun vi se ne amus vin per tuta mia koro? Ĉio jam estas farita, vi nenion povas aliigi. Mi volas savi vian felon, jen kial mi konversacias kun vi. Se niaj matrosoj sciis pri kio ni konversacias... Pripensu, Tom, kion ili farus al mi!

- Silver - respondis la matroso, kaj mi rimarkis, ke lia vizaĝo ruĝiĝis, kaj la voĉo sonas kiel distirata (dis'tir'at'a) ŝnurego, - Silver, vi jam ne estas juna homo kaj, ŝajne, havas vivkomprenon, ĉar neniu opinias vin malsaĝulo. Vi havas monon... ĉu multaj malfeliĉuloj-matrosoj havas ĝin? Krom tio vi ne estas timulo. Tial bonvolu (bon'vol'u) klarigi al mi, kial vi kunas (kun'as) kun tiuj ĉi

bestaĉoj? Ne, vi ne povas esti sama al ili. Kaj mi, mi pli bone donu dehaki mian manon ol rompu mian devon.

Finfine mi trovis fidelan matroson!

Subita sono ĉesigis ilian konversacion. Tiam mi eksciis pri alia fidelulo: malproksime, post la marĉo, ekaŭdiĝis tranĉa krio, alia, kaj poste – terura antaŭmorta kriego. La marĉa birdaro denove supreniĝis. Longe tiu ĉi krio sonis en mia koro, kvankam al ĉirkaŭaĵo denove jam venis silento, rompata nur per flugilbatoj de malsupreniĝanta birdaro, kaj de malproksima bruoj de ondofrapoj.

Tom ekstremis kiel frapita ĉevalo. Sed Silver eĉ ne fermetis la okulojn. Li staris, helpe de sia bastono, kaj rigardis la konversacianton (konversaci'ant'o'n) kiel senpieda besto, preta mortpiki.

– Ĝon! – diris la matroso, donante al li la manon.

– Manojn for! – elkriaĉis Silver, desaltante unu paŝon kun nekutima rapideco.

– Bone, Ĝon Silver, mi forigos mian manon, – diris la matroso, – sed, vere, nur malpuraj pensoj igas vin timi min. Mi petegas vin, klarigu, kio okazis tie?

– Kio okazis? – redemandis Silver. Li ekridetis, sed ne kiel kutime, kaj okuloj sur lia grandega vizaĝo malgrandiĝis, – kio okazis? Mi opinias ke tio estis Alan.

Malfeliĉa Tom ricevis la sciigon kun ege kuraĝa sinteno (sin'ten'o).

– Alan! – diris li. – Li mortis kiel vera maristo. Kaj vi, Ĝon Silver... Mi longe estis via amiko, sed de nun tio jam ne okazos! Mi mortu kiel hundo, sed restos fidela. Ja tio estas vi kiuj mortigis Alanon, ĉu? Mortigu ankaŭ min, se vi scipovas!

Kun tiuj ĉi vortoj la kuraĝa matroso turniĝis, kaj ekiris al la bordo.

Sed li ne sukcesis foriri malproksimen: Ĝon ekkriis, kaptis arbon, kaj per alia mano ĵetis sian bastonon, kiel pikilegon, sur la foriranton. La bastono, ĵetita per nekredebla forto, trafis Tomon per sia pika finaĵo. Malfeliĉa Tom disĵetis la manojn, kaj falis. Mi ne scias ĉu forte li estis vundita, sed Silver ne donis al li ekstari. Sen la bastono, sur unu piedo alsaltis li la kontraŭulon, kaj enigis en lin sian tranĉilon ĝis la tenilo.

Neniam antaŭe mi perdis komprenon, kaj eĉ ne sciis kio estas tio. Sed ĉi tie ĉio, kaj Silver, kaj la birdoj, kaj supro de Velo, ĉio ekturniĝis ĉirkaŭ mi. Kapon mian plenigis iuj sonoj kaj malproksimaj voĉoj. Kiam kompreno revenis al mi, la bastono estis jam en submano de la aĉulo, kaj la kapvesto – sur lia kapo. Antaŭ li senmove kuŝis Tom. Sed la mortiganto eĉ ne rigardis lin. Li purigis sian sangitan tranĉilon per herboj.

Ĉirkaŭe ĉio estis sama. Suno terure bruligis la marĉon, kaj supron de la monto. Kaj ne kredeblis ke antaŭ miaj okuloj okazis mortigo.

Ĝon prenis fajfilon, kaj kelkfoje elfajfis. Mi certe ne sciis por kio li faras tion, sed ĉiuj miaj timoj tuj reaperis. Ĉi tien venos homoj. Oni rimarkos min. Ili jam mortigis duopon da fidelaj matrosoj, do kial ankaŭ mi, post Tom kaj Alan, ne ekestu ilia mortaĵo?

Penante ne brui, mi, kiel eble rapide, revenis manpiede en la arbaron. Forkurante mi aŭdis kiel la maljuna pirato krie konversacias kun siaj kunuloj. Pro iliaj voĉoj ĉe mi kvazaŭ elkreskisflugiloj.

La densejo restis malantaŭe. Neniam mi kuris tiel rapide. Mi kuregis, ne rigardante kien, nur por malproksimiĝi de la mortigistoj. Kun ĉiu mia paŝo la timo plifortiĝis, kaj fine aliĝis en pensmalsanan (pens'mal'san'a'n) teruron. Mi sentis min senespera (sen'es-per'a). Ĉu mi kuraĝos, kiam ekpafos la kanono, enboatiĝi kune kun tiuj ĉi sangaj rabistoj? Ja iu ajn el ili, ekvidante min, forturnos mian kapon kiel al iu birdeto! Mia foresto mem, ĉu ĝi ne montris ke mi timas ilin, do, komprenas kio okazas? Ĝis, «Hispanolo»! Ĝis, sinjoro Treloni, la kuracisto kaj la ŝipestro! Mi mortos ĉu pro malsato, ĉu de rabista tranĉilo.



Mi kuregis mem ne sciante kien, kaj trovis min ĉe piedo de nealta monto kun duo da suproj. En tiu ĉi parto de la insulo arbaro estis ne tiel densa. Iuloke altiĝis solaj ruĝetaj arboj, kvindek aŭ sepdek futoj altaj. Odroj ĉi tie estis tute aliaj ol sube, ĉe la marĉo. Sed ĉi tie min atendis alia danĝero, kaj koro mia denove ekhaltis pro la teruro.

De supre ekfalas ŝtonetoj, kaj eksaltis inter la arboj. Mi nevole ekrigardis supren, kaj ekvidis estaĵon kiu **kaŝ**is sin post arbo. Kio estas tio, ĉu urso, ĉu homo? Mi sukcesis rimarki nur ke tio estas io nigreta, multhara, kaj haltis terurigita.

Do ĉiuj vojoj ekestis detranĉitaj. Malantaŭe min atendas la mortigistoj, antaŭe – tiu ĉi nekonata estaĵaĉo (est'aj'aĉ'o). Tuj mi decidis ke konata danĝero estas pli bona ol la nekonata. Eĉ Silver ŝajnis al mi ne tiel timiga kiel tiu ĉi arbara naskiĝaĉo (nask'iĝ'aĉ'o). Mi turniĝis kaj, rerigardante ĉiuminute, ekkuris en direkton de la boatoj.

La estaĵo preterkuris min, kaj okazis antaŭe. Mi estis tre laca. Sed eĉ se mi ne sentus lacon, mi, malgraŭ ĉio, ne povus kuri pli rapide ol tiu ĉi rapidega malamiko. La estaĵo kuris de arbo al arbo kun rapideco de herbmanĝulo. Ĝi moviĝis sur du piedoj, home, kvankam tre proksime al tero. Jes, tio estas homo. Nun mi klare vidis tion.

Mi ekmemoris ĉion kion mi aŭdis pri homoj-hommanĝuloj, kaj volis jam voki helpon. Sed min iom kuraĝigis penso pri tio ke antaŭ mi troviĝas ne io alia ol homo. Mia timo antaŭ Silver tuj reviviĝis. Mi haltis, pensante kiel mi liberiĝu de la malamiko, kaj tiam aperis la respondo: ja mi havas pistolon! Kiam mi komprenis ke mi ne estas senarmila, al mi revenis la kuraĝo, kaj mi decide ekiris al la insulano.

Li denove **kaŝ**iĝis sed, ŝajne, vidis min, ĉar kiam mi direktiĝis al li, li eliris el la postarbo, kaj volis iri renkonten. Poste li sendecide paŝis surloke, ekretiriĝis (ek're'tir'iĝ'is), rigardante min, kaj subite, al mia miro, falis sur la teron, kaj kun petego suprenigis al mi la manojn.

Mi denove haltis.

– Kiu vi estas?

– Ben Gan, – respondis li. – Mi estas malfeliĉa Ben Gan. Dum tri jaroj mi konversaciis kun neniuj homoj.

Tio estis same blanka homo kiel mi, nur tre sunbruligita (sun'brul'ig'it'a). Liaj vestoj estis ege malnovaj.

– Tri jaroj! – kriis mi. – Ĉu vin trafis ŝiprompiĝo (ŝip'romp'iĝ'o)?

– Ne, amiko, – diris li, – oni lasis min ĉi tie, sur la insulo.

Mi aŭdis pri tiu ĉi terura ago de piratoj:

homon kiu faris ion malbonan oni elŝipigas sur neloĝatan insulon, kaj lasas lin tie sola kun iom da pulvo kaj kugletoj.

- Mi estas lasita sur tiu ĉi insulo antaŭ tri jaroj, - daŭrigis li, - de tiam mi manĝis bestaĵon, kreskaĵojn, kaj apudbordajn marestaĵojn. Mi opinias ke homo scipovas resti viva ĉie, kien ajn oni ĵetu lin. Sed se vi scius, amiko, kiel deziras mia koro veran homan manĝon! Ĉu vi kunhavas ion manĝeblan?... Ne? Dum multaj longaj noktoj vidis mi bongustaĵojn. Mi malfermis la okulojn, kaj ili malaperis.

- Se mi sukcesos reveni sur la ŝipon, - diris mi, - vi ricevos multe da bongustaĵoj.

Li tuŝis miajn vestojn, miajn manojn, kaj silente, infane, ĝojis ke vidas antaŭ si homon.

Aŭskultinte mian respondon, li ekrigardis min.

- Se vi sukcesos reveni sur la ŝipon? Sed kiu povas malhelpi al vi?

- Ja certe ne vi, - respondis mi.

- Certe ne mi! - kriis li. - Kiel oni nomas vin?

- Ĝim, - respondis mi.

- Ĝim, Ĝim... - Jes, Ĝim, mi vivis tiel malbonan vivon ke ne havas deziron eĉ rakonti pri ĝi. Ĉu vi kredas, rigardante min, ke mia patrino estis ege bona virino? Ŝi estis

bonkora, – diris li. – Mi kreskis laborema, bona knabo, kaj scipovis legi tiel rapide ke oni ne kaptis kie finiĝas unu vorto kaj komenciĝas la alia. Kaj jen kio okazis pri mi, Ĝim. Kaj tio okazis ĉar mi, kun aliaj knabaĉoj, komencis monerĵetadi (mon'er'ĵet'ad'i). Komencis mi de tio, kaj... Mia patrino diris ke mi finos malbone, kaj vere okazis tiel. Sed Ĉielo mem sendis min sur la insulon. Mi multe pensis ĉi tie en soleco. Kaj nun jam neniu drinkaĵo forigos min de bona vojo. Certe al drinkaĵo ankaŭ nun mi ne kontraŭos, sed nur de tre malmulta, por feliĉo... Mi donis al mi vorton reboniĝi (re'bon'iĝ'i), kaj mi faros tion! Kaj, Ĝim... – li ĉirkaŭrigardis, kaj mallaŭtigis sian voĉon, – mi havas multe, ege multe.

Ĉi tie mi komprenis ke la malfeliĉulo vere pensmalsaniĝis pro la soleco. Verŝajne tiu ĉi penso ekvideblis sur mia vizaĝo, ĉar li diris ankoraŭfoje:

– Jes, mi havas nun multe, ege multe! Aŭskultu, Ĝim, mi faros el vi homon! Aĥ, Ĝim, vi eĉ ne scias kiel bonas al vi ke vi unua trovis min!.. – Subite lia vizaĝo aliiĝis, kaj li kaptis mian manon:

– Diru veron, Ĝim: ĉu ne estas tio ŝipo de Flint?

Min trafis feliĉa penso: tiu ĉi homo povas ekesti nia kunulo. Kaj mi tuj respondis al li:

– Ne, ne de Flint. Flint mortis. Sed, se vi volas scii veron, jen vero al vi: sur la ŝipo estas iuj el ŝipanaro de Flint, kaj tio estas por ni granda malfeliĉo.

– Ĉu estas ĉe vi... unupiedulo? – kriis li.

– Silver? – demandis mi.

– Silver? Jes, lia nomo estis Silver.

– Li estas kuiristo ĉe ni. Li estras la tutan rabistaron.

Li tenis mian manon, kaj dum tiuj ĉi vortoj preskaŭ rompis ĝin.

– Se vin alsendis Longa Ĝon, – diris li, – mi perdis la vivon... Sed ĉu vi scias kie vi troviĝas?

Mi tuj decidis kion mi faru, kaj rakontis al li ĉion: kaj pri nia vojaĝo, kaj pri la malfacilaĵoj en kiuj ni okazis.

Li aŭskultis ĉiun mian vorton kaj, kiam mi finis, li diris:

– Vi estas bona knabo, Ĝim. Bone. Fidu al Ben Gan, kaj li helpos; vi vidos. Diru: kiel agos via sinjoro pri homo kiu savos lin de la malfeliĉo?

Mi diris al li ke sinjoro Treloni estas plej bonkora homo sur tero.

– Jen kiel... Sed, ĉu vi scias, – daŭrigis Ben Gan, – mi ne intencas peti de li... lokon de pordisto (pord'ist'o). Ne, tion mi tute ne volas! Mi volas scii: ĉu li konsentos doni al mi eĉ unu milon da moneroj el mono kiu ankaŭ

sen tio estas mia?

– Mi estas certa ke li donos, – respondis mi. – Ĉiuj matrosoj devis ricevi de li sian parton de la trezoroj.

– Kaj ĉu li kunprenos min en nian landon? – demandis li, enrigardante miajn okulojn.

– Certe! – kriis mi, – la sinjoro estas vera ĝentlemano. Krom tio, se ni saviĝos de la piratoj, via helpo estos tre bezonata sur la ŝipo.

– Do li vere prenos min, – diris li ride-tante. – Kaj nun aŭskultu kion mi rakontos al vi, – daŭrigis li. – Mi estis sur ŝipo de Flint kiam li enterigis siajn trezorojn. Kun li estis ankoraŭ ses matrosoj, – fortegaj homoj. Ili troviĝis sur la insulo ses aŭ sep tagoj, kaj ni sidis sur nia malnova «Foko».

En unu el la tagoj ni ekaŭdis pafon de sur la bordo, kaj ekvidis boaton. En la boato sidis Flint.

oo

**kaŝi** = *English: hide.*







manon denaskan (de'nask'a'n) ol ĝentlemanon de bonokazo, ĉar ankaŭ li estis iam ĝentlemano de bonokazo.

- El tio, kion vi klarigas ĉi tie, mi komprenis preskaŭ nenion, - diris mi, - sed tio ne tre gravas nun, ĉar mi, malgraŭ ĉio, ne scias kiel reveni sur la ŝipon.

- Jes, - diris li, - tio ne estas facila afero. Sed bone, mi havas boaton kiun mi faris per miaj manoj. Ĝi estas kaŝita sub blanka ŝtonego. Se ne estos alia eliro ni povos veni al la ŝipo per ĝi, kiam estos pli mallume... Sed kio estas tio? - kriis li subite.

Tiumomente (tiu'moment'e) de la ŝipo ekaŭdiĝis kanonpafo. Sed ĝis sunsubiro restis ankoraŭ ne malpli ol du horoj!

- Tie okazas batalo! - kriis mi, - kuru post mi!

Kaj mi ĵetis min kuri al la ŝiphaltejo malgraŭ ĉiuj miaj antaŭaj timoj. Apud mi facile kaj rapide kuris la insula malliberulo.


- Tien, - diris li, - tenu tien, amiko Ĝim! Pli proksimen al la arboj! Jen, ĉi-loke mi unufoje trafis herbmanĝulon. Nun ili ne mal-supreniĝas ĉi tien, ili kuradas nur sur la montoj, ĉar timas min... Hej! Jen estas la enterigejo. Ĉu vi vidas la supraĵetojn? Mi venadis ĉi tien, sed malmultfoje.

Li paroladis, kurante, ne atendente respondon, kaj mi ja ne povis respondi.

oo

**fosi** = English: dig, delve.

## 497 **fusilo**



*pistolo*



***fusilo***

**Fusilo** estas pafilo longa. Oni tenas ĝin per du manoj.

oo

Post tiu ĉi kanonpafo venis silento. Sed poste ekaŭdiĝis pafoj **fusilaj**. Kaj denove silento.

oo

**fusilo** = English: rifle.

## 498 flago

- *Sur unu el ŝipaj mastoj oni povas vidi **flagon** de lando, anoj de kiu estas havantoj de la ŝipo. Super franca ŝipo oni vidas francan **flagon**, super japana – la japanan.*
- *Ĉu piratoj lasas la **flagon** kiam ili kaptas ŝipon por navigi ĝin? Ne, ili suprenigas sian nigran, piratan **flagon**.*

oo

Poste, super la arbaro, kvaronmeje de ni, aperis brita **flago**.

### Rakontas la kuracisto

La du boatoj lasis «Hispanolo»-n duonhoron antaŭ la dua. La ŝipestro, sinjoro Treloni kaj mi sidis en la kajuto, kaj pensis kion fari. Se estus plej facila vento, ni atakus subite la sesopon da ribeluloj, suprenigus la ankron kaj forirus en la maron. Sed vento forestis. Kaj, krom tio, venis Hanter, kaj sciigis ke Ĝim Hokins ensaltis boaton, kaj foriris kune kun la piratoj al la bordo.

Ni, certe, eĉ ne minuton opiniis ke Ĝim Hokins estas malfidelulo (mal'fidel'ul'o), sed tre maltrankviliĝis pri li. Matrosoj, kun kiuj li forveturis, estis tiel malamikaj, ke mi ne es-

peris vidi Ĝimon denove.

Ni venis sur la ferdekon. Estis varmege. Staris tia odoraĉo, ke mi eksentis min ne tre bone: tio estis odoro de unu el danĝeraj malsanoj. Sesopo da malfideluloj sidis sub la veloj sur antaŭa parto de la ferdeko. La boatoj staris ĉe la bordo, apud elfluejo de unu el la riveretoj. En ĉiu el ili sidis matroso. Unu el ili gaje fajfis bone konatan kanteton.

Atendi estis neelteneble, do ni decidis ke mi kun Hanter iros per boateto por konatiĝi kun ĉirkaŭaĵoj. Ni ekremis rekte al loko kie, laŭ la mapo, troviĝas (trov'ig'as) barilo.

Rimarkinte nin matrosoj, gardantaj la boatojn, maltrankviliĝis. La kanteto ĉesiĝis. Ni vidis kiel ili konversacias, verŝajne decidante kion fari. Se ili sciigus Silveron, ĉio, verŝajne, irus alie. Sed eblas ke ili ricevis ordonon ne lasi la boatojn iu ajn okaze. Ili trankviliĝis, kaj unu el ili denove ekfajfis.

Bordo apud tiu ĉi loko iom eniras la maron, tial mi remis al post tiu ĉi elstaraĵo, por ke ni ekestu nevideblaj al niaj malamikoj.

Elsaltinte la bordon mi ekkuris, kiom eble rapide, gardante la kapon de la bruliga suno. En la du manoj mi tenis ŝargitajn pistolojn.

oo

**flago** = English: flag.



## 500 muro

- Plimulto da domoj havas kvar **murojn**.
- Malnovaj urboj havis **murojn** kiuj gardis ilin de malamikaj atakoj. Iam tio estis arbotrunkaj **muroj**, iam – la ŝtonaj.

oo

En **muroj** de la domo videblis paffenestretoj (paf'fenestr'et'o'j). Ĉirkaŭ la domo troviĝis ejo libera de kreskaĵoj, ĉirkaŭigita per la arbotrunka barilo ses futoj alta, sen iu ajn pordo. Trarompi ĝin estus malfacile. Kaj ĝi ne gardis atakantojn. El la domo oni povus tute libere trafi ilin.

Donu al atakatoj bonajn gardantojn, multe da manĝeblaĵoj (manĝ'abl'aĵ'o'j), kaj ili kontraŭstaros eĉ centon da atakantoj.

Plej bona estis tiu fluanta akvo. Kvankam en kajuto de «Hispanolo» ankaŭ estis ne malbone: multe da armiloj, multe da pafaĵoj, multe da manĝeblaĵoj kaj bonegaj vinoj, sed ion ni ne ordigis: en ĝi forestis akvo.

Mi staris kaj pensis pri tio, kiam subite ekaŭdiĝis terura antaŭmorta krio. Ne unufoje renkontis mi perfortan (per'fort'a'n) morton: mi mem servis en soldataro de altsinjoro de Kemberlando, kaj mem ricevis vundon ĉe Fontenua, – sed tiu ĉi krio venis ĝis mia koro

mem. «Mortis Ĝim Hokins», – pensis mi.

Tre gravas esti batalinta soldato, sed esti kuracisto gravas pli. Oni povis perdi eĉ ne minuton. Mi tuj rapide revenis al la bordo, kaj ensaltis la boaton. Feliĉe Hanter okazis bonega remisto. Ni flugis reen. La boato alproksimiĝis la ŝipon, kaj mi denove surgrimpis ĝin.

Miaj amikoj ne sciis kion fari. Sinjoro Treloni sidis blanka kiel papero, kaj – bonkora homo! – pensis pri danĝeroj al kiuj ni trafis pro li. Vizaĝo de unu el matrosoj, sidantaj sur antaŭa ferdeko, ankaŭ estis blanka.

– Tiu homo, – diris ŝipestro Smolet, per la kapo montrante lin, – ankoraŭ ne alkutimiĝis al raboj. Kiam li ekaŭdis la krion li preskaŭ perdis la komprenon. Ankoraŭ iom, kaj li estos nia.

Mi rakontis pri kion mi vidis, kaj ni kune preparolis niajn agojn. Maljunan Redrut-on ni lokigis en trairejon inter la kajutoj kaj antaŭa parto de la ferdeko, donante al li ĉu tri, ĉu kvar ŝargitajn fusilojn. Hanter venigis la boaton al malantaŭa parto de la ŝipo, kaj mi kun Ĝojs ekis plenigi ĝin per pulvo, fusiloj, kaj manĝeblaĵoj. Poste ni malsuprenigis en ĝin bareleton kun rumo, kaj mian kuracistan ujon.

Dume sinjoro Treloni kaj la ŝipestro venis

sur la ferdekon. La ŝipestro vokis maljunan matroson.

- Sinjoro Hends, - diris li, - ni estas duopaj ĉi tie, kaj ĉiu el ni havas duopon da pistoloj. Tiu el vi kiu penos sendi iun ajn sciigon al surborduloj, estos mortigita surloke.

La rabistoj ne sciis kion fari. Poste ili ĵetis sin al la traĭro, kun intenco ataki nin de malantaŭa flanko sed, kiam ili trovis tie Redruton kun la fusiloj, ili tuj ĵetis sin reen. Sur la ferdeko aperis kapo de unu el ili.

- Suben, hundo! - kriis la ŝipestro.

La kapo subiĝis, la sesopo da aĉuloj malaperis ie kaj, portempe, kvazaŭ trankviliĝis.

Mi kun Ĝojs plenigis la boateton ĝis kiom ĝi povis elteni, ĵetante en ĝin ĉion ajn. Poste ni malsupreniĝis mem trans la ŝiprandon kaj, remante per ĉiuj niaj fortoj, ni ekflugis al la bordo.


La dua nia veturo tre maltrankviligis la boat-gardantojn. La kanteto denove silentiĝis.

oo

**muro** = *English: wall.*



# 501 kabo



**kabo** = *English: cape, headland.*

Jes, sinjoro leganto, vorto "**kabo**" estas lasta, kvncent-unua vorto de tiu ĉi Esperanto-lernilo.

Sed, se vi volas esti bona multvorta esperantisto, legu:

Estas ja **tiom** (kiom?–**tiom**!) multe da bonaj Esperanto-libroj!

oo

Antaŭ ol ni ĉesis vidi ilin, ĉirkaŭirante la **kab**eton, unu el la matrosoj lasis sian boaton, kaj ekkuris. Mi pensis pri neniigo de iliaj boatoj, sed ektimis ke Silver kun tuta sia rabistaro troviĝas proksime, kaj ke ni perdos ĉion se deziros tro multe.

Post nelonge ni albordiĝis al sama loko, venigis parton de la transportitaj aĵoj al la

fortikejo, kaj ĵetis ilin trans la barilon. Por gardi ilin ni lasis Ĝojs-on. Li restis sola, sed li havis ne malpli ol seson da fusiloj. Post tio mi kun Hanter revenis al la bordo, kaj denove ekis transporti la aĵojn. Laborante tiel ni iom post iom transportis (trans'port'is) la tutan ŝarĝon.

Ĝojs kaj Hanter restis en la fortikejo, kaj mi, remante el ĉiuj miaj fortoj, ekrapidis reen al «Hispanolo». Ni decidis ankoraŭfoje ŝarĝi la boateton.

Tio estis ne tiel malsaĝe kiel povas ŝajni. La malamikoj certe estis pli multnombraj ol ni, sed ni estis pli bone armitaj. Neniu el surbordaj piratoj havis fusilon do, antaŭ ol ili proksimiĝos al la barilo ĝis pistola pafo, la servantoj mortpafos ne malpli ol sesopon da ili.

Sinjoro Treloni atendis min ĉe la ŝipa malantaŭo. Li tuj kuraĝiĝis kaj ĝojiĝis. Kaptinte ĵetitan de mi ŝnuron li altiris la boateton, kaj ni denove rapide ekŝarĝis ĝin per manĝeblaĵoj kaj pulvo.

Poste ni prenis fusilojn kaj sabrojn por mi, por sinjoro Treloni, Redrut kaj la ŝipestro. Restintajn armilojn kaj pulvon ni forĵetis trans la ŝiprandon. Kvankam fundo ĉi tie ne estis proksima, ni vidis ilin, kuŝantajn sur la pura sablo kaj lumigitajn per la suno.

Komenciĝis mara malaltiĝo, kaj la ŝipo ek-

turniĝis ĉirkaŭ la ankro. Sur la bordo, apud la boatoj, aŭdiĝis intervokoj. Kvankam tio montris ke Ĝojs kaj Hanter ankoraŭ ne estas rimarkitaj, ni decidis rapidi.

Redrut lasis sian gardolokon, kaj ensaltis la boaton. Ni venigis ĝin al alia ŝipflanko por preni ŝipestron Smolet.

– Knaboj! – laŭte diris li. – Ĉu vi aŭdas min?

Respondis neniu.

– Mi vokas vin, Abraham Grej.

Silento.

– Grej, – daŭrigis Smolet laŭtvoĉe, – mi lasas la ŝipon, kaj ordonas al vi postiri vian ŝipestron. Mi scias ke vi estas homo bona, ke ankaŭ aliaj ne estas tiel malbonaj kiel penas elmontri sin. En mia mano troviĝas horloĝo. Mi donas al vi duonminuton por aliĝi min.

Silento.

– Iru, amiko mia, – daŭrigis la ŝipestro, ne igu nin perdi la tempon. Tio povas venigi morton al mi kaj al tiuj ĉi sinjoroj.

Ekaŭdeblis bruo, sonoj de batoj, kaj sur la ferdekon elsaltis Abraham Grej. Lia vizaĝo estis tranĉvundita. Li alkuris la ŝipestron.

– Mi estas kun vi, sinjoro, – diris li.

Ili ensaltis la boaton, kaj ni deŝipiĝis. La ŝipo ekestis lasita. Sed al la barilo ni ankoraŭ ne venis.

Tiu ĉi lasta veturo finiĝis ne tiel bone kiel la antaŭaj. Unue, nia boateto estis troŝarĝita (tro'ŝarĝ'it'a). Kvino da plenkreskuloj (plen'kresk'ul'o'j), triopo da kiuj: Treloni, Redrut kaj la ŝipestro, estis pli altaj ol plimulto da homoj. Aldonu la pulvon kaj la manĝeblaĵojn. Ne mirindas do ke supron de la boatarando tuŝetis akvo. Fojfoje (foj'foj'e) iom da ĝi enfluis la boateton. Kiam ni deiris nur centon da futoj, miaj vestoj plene malsekiĝis.

La ŝipestro igis nin lokigi la ŝarĝon iom alie, kaj la boato rektiĝis. Ni, malgraŭ tio, timis moviĝi por ne dronigi ĝin. Krom tio, pro mara malaltiĝo, aperis forta fluo, iranta okcidenten, kaj poste turniĝanta al sudo, en liberan maron.

Nian troŝarĝitan boateton povis dronigi eĉ ondeto. Sed plej malbone estis tio ke la mara fluo portis nin flanken, kaj ne donis al ni alboridiĝi post la **kabo**, kie mi alboridiĝis antaŭe. Se ni ne superus la fluon, ni venus al la bordo ĝuste apud la du boatoj, kie ĉiuminute povis aperi la piratoj.

– Mi ne scipovas direkti al la barilo, sinjoro, – diris mi al la ŝipestro. – La fluo forportas nin. Ĉu vi remu pli forte?

Remis la ŝipestro kun Redrut, kiuj ankoraŭ ne laciĝis, kaj mi sidis ĉe la direktilo.

– Se ni faros tion nin superfluos, – diris la ŝipestro. – Direktu rekte kontraŭ la fluo, ĝis

kiam ni povos kapti direkton pli bonan.

– La fluo jam malfortiĝas, sinjoro, – diris matroso Grej, sidanta antaŭe. – Oni povas iom turniĝi al la bordo.

– Tre bone, ŝatinda, – diris mi al li.

Ni ĉiuj silente prenis lin kvazaŭ dekomence li estis sur nia flanko, kaj kvazaŭ inter ni neniam estis iu ajn malkonseno.

Subite la ŝipestro diris per iom aliĝinta voĉo:

– Kanono!

– Mi jam pensis pri tio, – diris mi, opiniante ke li parolas pri ebleco pafi nian fortikejon per la kanono. – Ili neniam sukcesos surbordigi ĝin. Kaj, se ili sukcesos, ĝi ne trairos la arbaron.

– Ne, vi rerigardu, – diris la ŝipestro.

Rapidante ni tute ne pensis pri la ŝipa kanono. Kvino da aĉuloj jam troviĝis apud ĝi. Mi ekmemoris ke ni lasis sur la ŝipo pulvon kaj kuglegojn.

– Iser estis kanonisto ĉe Flint, – maltrankvile diris Grej.

Mi komencis direkti la boaton rekte al la bordo. Nun ni jam venkis la fluon, kvankam ni iris ankoraŭ malrapide. La boato bonege obeis la direktilon, sed ĝi troviĝis laŭlonge (laŭ'long'e) al «Hispanolo», do estis facile trafi ĝin.

Mi ne nur vidis sed ankaŭ aŭdis kiel

ruĝvizaĝa aĉulo Iser Hends kun bruo venigas kuglegon laŭ la ferdeko.

- Kiu ĉe ni estas plej bona pafanto? - demandis la ŝipestro.

- Sinjoro Treloni, - respondis mi.

- Sinjoro Treloni, mortpafu iun el la rabis-  
toj. Hends-on, se vi povas, - diris la ŝipestro.

Treloni estis trankvila. Li pririgardis  
bruligilon de sia fusilo.

- Singarde, sinjoroj, - kriis la ŝipestro, -  
ne dronigu la boaton! Ni ĉiuj estu pretaj, kaj  
dum la pafo penu ne moviĝi.

Sinjoro Treloni suprenigis la fusilon, la  
remistoj ĉesis remi. Ni moviĝis iom al alia  
rando, kaj ĉio iris bone: en la boaton venis eĉ  
ne akvero. Dume la piratoj turnis la kanonon,  
kaj Hends, staranta kun kuglega enigilo estis  
bonega trafaĵo. Sed... Kiam Treloni elpafis,  
Hends malsupreniĝis, tial la kuglo, superfa-  
jfinta lin, trafis iun el la matrosoj. La vundito  
elkriis, kaj lian krion subtenis ne nur la surŝi-  
panoj: multo da aliaj voĉoj respondis al ĝi de  
la bordo. Rigardante tien mi ekvidis la pirato-  
jn kurantajn el la arbaro al la boatoj.

- Ili tuj debordiĝos, sinjoro, - diris mi.

- Rapidu! - kriis la ŝipestro. - Nun jam ne  
gravas ĉu ni dronigos aŭ ne la boaton. Se ni  
ne sukcesos veni al la bordo estos tre mal-  
bone.

- Debordiĝas nur unu boato, sinjoro, -

rimarkis mi, – anoj de la alia, verŝajne, kuras laŭ la bordo por bari vojon al ni.

– Ili devos pene kuradi, – kontraŭdiris la ŝipestro, – sed maristoj ne estas bonaj kurantoj. Ne ilin mi timas, sed la kanonon. De tiu proksimo eĉ infano ne preterpafos. Diru al ni, sinjoro, kiam vi vidos ke ili proksimigas bruligilon al ĝi; tiam ni penos elturniĝi.

Malgraŭ sia ŝarĝo nia boato moviĝis nun sufiĉe rapide, kaj preskaŭ ne enkaptis akvon. Al ni restis nur tridek aŭ kvardek remilbatojn, kaj ni venus al la sabla bordo kiun senakvigis la mara malaltiĝo. Boaton de la piratoj ni jam ne devis timi: la **kabeto** faris nin nevideblaj. La fluo, kiu antaŭnelonge malhelpis al ni, nun malhelpis al niaj malamikoj. Nur la kanono danĝerigis nin.

– Estus bone halti kaj mortpafigi ankoraŭ iun el ili, – diris la ŝipestro.

Sed estis klare ke la kanono elpafos ĉiuokaze. La rabistoj eĉ ne rigardis sian vunditan kunulon, kvankam li estis viva, kaj ni vidis ke li penas fortiriĝi flanken.

– Prete! – kriis sinjoro Treloni.

– Halt! – resonis la ŝipestro.

Li kaj Redrut tiel forte rebatis per la remiloj, ke la antaŭa boatflanko iom enakviĝis. Ekbruegis kanonpafo, tiu kiun aŭdis Ĝim. (Pafo de sinjoro Treloni ne venis al li).

Ni ne rimarkis kien falis la kuglego. Mi opinias ke ĝi flugis super niaj kapoj, kaj ke nian malfeliĉon venigis vento kiun ĝi okazigis. Ne gravas kial, sed nia boato kaptis per sia rando akvon, kaj komencis droni. Ni estis jam proksimaj al la bordo. Mi kaj la ŝipestro bonorde ekstaris unu kontraŭ la alia. Ankaŭ aliaj tri homoj faris samon.

Se diri veron ni elturniĝis (el'turn'iĝ'is) sufiĉe bonorde: neniu el ni perdis vivon, kaj ĉiuj ni venis al la bordo. Sed niaj manĝeblaĵoj restis sur la fundo kaj, plej malbone, el kvino da fusiloj nur du restis sekaj: mian fusilon mi, enakviĝante, senpripense suprenigis super la kapo, kaj fusilo de la ŝipestro pendis ĉe li per la ellasilo (el'las'il'o) supren. Do ankaŭ ĝi restis seka. Tri aliaj fusiloj dronis kune kun la boateto.



Aldone al ĉiuj niaj malfeliĉoj el la arbaro, jam tute proksime, ekaŭdiĝis voĉoj. Oni povis detranĉi nin de la barilo. Krom tio ni ne sciis ĉu eltenos Hanter kaj Ĝojs, se ilin atakos seso da piratoj. Hanter estis homo forta, sed Ĝojs... li estis helpema servanto, li bonege ordigis vestojn, sed helpi en bataloj li ne tre povis.

Maltrankvilaj, ni venis al la bordo lasinte nian malfeliĉan boateton, sur kiu troviĝis preskaŭ duono da niaj pulvo kaj manĝeblaĵoj.



Kiel eble rapide kuris ni tra la arbaro, kiu disigis nin de la barilo, kaj ĉiumomente pli kaj pli proksime sonis voĉoj de la piratoj. Post nelonge ni ekaŭdis frapon de ties piedvestoj, kaj rompon de kreskaĵoj: la piratoj kuris tra la densejo. Mi komprenis ke nin atendas batalo, tial mi pririgardis mian fusilon.

- Ŝipestro, - diris mi, - Treloni pafas trafe, sed lia fusilo ne funkcias. Donu al li la sian.

Li faris tion, kaj Treloni, same silenta kaj trankvila, haltis por momento, por pririgardi la ŝargon. Nur tiam mi rimarkis ke Grej estas senarmila, kaj donis al li mian sabron. Li prenis ĝin tiel ke estis videble ke nia nova kunulo batalos ĝis lasta ero da sia sango.

Kurante ankoraŭ kvardekon da paŝoj ni venis al rando de la arbaro, kaj okazis antaŭ la barilo. Ni venis ĝuste al ĝia suda flanko. Samtempe sepo da rabistoj, sub estro de Ĝob Enderson, laŭte kriante elsaltis el la arbaro ĉe sud-okcidenta parto de la barilo. Pormomente ili haltis. Mi kaj Treloni elpafis. Samon faris Hanter kaj Ĝojs, sidantaj en la fortikejo. Kvar pafoj eksonis eble ne samtempe, sed ili helpis: unu el la malamikoj falis, aliaj rapide malaperis post arboj.

Denove ŝarginte la fusilojn ni kaŝe ekiris laŭ la barilo por pririgardi la faligitan

malamikon. Li estis morta. Kuglo trafis lian koron. La sukceso ĝojigis nin, sed subite el kreskaĵejo elpafis pistolo. La kuglo preterfajfis min, kaj malfeliĉa Tom Redrut falis sur la teron. Mi kaj sinjoro Treloni pafis en la kreskaĵojn. Sed ni pafis ne sciante kien kaj, plej verŝajne, ne trafis. Post reŝargo de la fusilo mi ĵetis min al malfeliĉa Tom. La ŝipestro kaj Grej jam pririgardis lin. Mi unurigarde komprenis ke la afero estas senespera.

Niaj respondaj pafoj, verŝajne, igis la piratojn retiriĝi, ĉar ni sukcesis sen iu ajn malhelpo transbariligi la malfeliĉan servanton, kaj enigi lin, elfluantan la sangon, en la domon.

Malfeliĉa maljuna kunulo! Li pri nenio miris, nenion timis, kaj diris eĉ ne unu nean vorton de komenco de nia vojaĝo ĝis tiu ĉi tago mem. Li kuraĝe gardis la lokon sur la ŝipo. Ĉiujn ordonojn li plenumis silente, agante ĝisfine. Li havis dudekon da jaroj pli ol iu ajn el ni. Kaj nun tiu ĉi malgajema maljuna fidela servanto mortadis (mort'ad'is) antaŭ niaj okuloj.

Sinjoro Treloni ĵetis sin antaŭ li sur la teron kiel eta infano.

– Ĉu mi mortas, kuracisto? – demandis Tom.

– Jes, amiko mia, – respondis mi.

Li eksilentis, kaj poste petis ke iu tralegu

super li lastajn vortojn.

- Tio estas kutimo, sinjoro, - aldonis li, kaj post nelonge mortis.

Dum tiu tempo la ŝipestro eltiris el sia vesto kelkajn aĵojn. Tio estis brita flago, Libro, iom da ŝnuro, skribiloj kaj ŝiplibro. Li trovis en la domo longan bastonon kaj, kun helpo de Hanter, eligis ĝin supren, sur la doman muron. Poste li mem supreniĝis, kaj aligis al la bastono la britan flagon.

Post tio li komencis pririgardi niajn havaĵojn, kvazaŭ nenio alia estis grava por li. Sed, tempo de tempo, ankaŭ li rigardis Tomon. Kiam Tom mortis, li prenis por li alian flagon.

- Ne malĝoju tiel forte, sinjoro, - diris la ŝipestro al sinjoro Treloni, - li mortis plenumante sian devon (dev'o'n).

Poste li venigis min flanken.

- Sinjoro Livsi, - demandis li, - post kiom da septagaĵoj vi kaj sinjoro Treloni atendas venon de ŝipo kiun oni sendos helpe al ni?

Mi respondis ke la afero prenos multe da tempo. Preteriros ne sep- sed tridektagaĵoj. Nur tiam Blendli elsendos la ŝipon.

- Do pripensu kiam tiu ĉi ŝipo venos ĉi tien, - finis mi.

- Nu, sinjoro, - diris la ŝipestro, - tial estos malfacile al ni.

- Kial? - demandis mi.

– Ĉar dronis tuta ŝarĝo kiun ni prenis dum la lasta veturo, jen kial, – respondis la ŝipestro. – Da pulvo kaj da kugloj ni havas sufiĉe, sed manĝeblaĵoj malmultas.

Ĉi-momente alte super nia domo kun muĝo kaj fajfo preterflugis kuglego. Ĝi falis malproksime post ni en la arbaron.

– Ba! – diris la ŝipestro. – Pafu, knaboj, sed da pulvo vi havas ne tro multe.

Dua pafado estis pli sukcesa. La kuglego preterflugis la barilon, kaj falis antaŭ la domo, suprenigante multegon da sablo.

– Ŝipestro, – diris sinjoro Treloni, – la fortikejo ne videblas de la ŝipo. Ili pafas, verŝajne, al nia flago. Ĉu ne estus pli bone malsuprenigi ĝin?

– Malsuprenigi la flagon? – demandis la ŝipestro. – Ne, sinjoro. Malsuprenigu ĝin iu ajn, sed ne mi.

Kaj ni tuj konsentis kun li. Malnova mara kutimo ordonas ke oni ne malsuprenigu flagon dum batalo. Kaj, krom tio, estis bone montri al la malamikoj ke ilia pafado tute ne timigas nin.

Ili pafis tutan vesperon. Unu kuglego preterflugis niajn kapojn, la dua falis antaŭ la barilo, la tria suprenigis sablon apud la domo. Sed la piratoj devis pafi ne rekten sed supren, tial la kuglegoj perdis sian forton, kaj

enfosiĝis la teron. Do ni ne timis la resalton. Kaj, kvankam unu el ili trarompis nian domon de supro ĝis la subo, ni rapide al kutimiĝis al la pafado.

– Estas en tio ankaŭ bona flanko, – rimarkis la ŝipestro, – en la arbaro, proksime al ni, verŝajne forestas piratoj. La mar-mal-supreniĝo plifortiĝis, kaj niaj manĝeblaĵoj eble aperis jam el sub la akvo. Hej, ĉu estas dezirantoj kuri al la dronigitaj manĝeblaĵoj?

Grej kaj Hanter konsentis antaŭ ĉiuj. Bone armitaj ili transgrimpis la barilon. Sed la manĝeblaĵojn prenis ne ili. Piratoj estis pli kuraĝaj ol ni atendis. Eblas ke ili plene kredis pri la kanonisto, pri Iser Hends. Kvino da rabistoj elprenadis aĵojn el nia dronigita boato, kaj enigis ilin en sian boaton, starantan proksime. Sidantoj en la boato devis ĉiam remi, ĉar la fluo forportis ilin. Silver staris sur posta parto de la boato, kaj ordonis. Ĉiuj piratoj estis armitaj per fusiloj. Eblas ke ili prenis ilin el iu nur al ili konata kaŝejo.

La ŝipestro sidis kun la ŝiplibro en la manoj, kaj komencis skribi: «Aleksandro Smolet – ŝipestro. Devid Livsi – ŝipa kuracisto, Abraham Grej – matroso, Ĝon Treloni – ŝiphavanto, Ĝon Hanter kaj Riĉard Ĝojs – nemaristaj servantoj de la ŝiphavanto. Jen estas ĉiuj kiuj agis laŭ sia devo. Preninte kun si bezonaĵojn, kiuj sufiĉos ne pli ol por dek

tagoj, ili surbordiĝis, kaj suprenigis britan flagon super fortikejo sur Trezorinsulo. Tom Redrut, servanto de la ŝiphavanto, estas mortigita per la rabistoj. Ĝejms Hokins, ŝiplernanto...»

Ankaŭ mi ekpensis pri nia Ĝim Hokins. Subite el la arbaro venis krio.

- Iu vokas nin, - diris Hanter, tiutempa gardanto.

- Sinjoro Livsi! Sinjoro Treloni! Sinjoro Smolet! Hej, Hanter, ĉu tio estas vi? - aŭdis ni.

Mi ĵetis min al la pordo, kaj ekvidis Ĝim Hokins-on. Viva kaj sana li transgrimpadis la barilon.

### **Rakontas Ĝim Hokins**

Tuj kiam Ben Gan ekvidis la britan flagon li haltis, kaptis mian manon, kaj eksidis.

- Nu, - diris li, - tie estas viaj amikoj.

- Pli ĝuste, ribeluloj, - diris mi.

- Neniam! - kriis li. - Sur tiu ĉi insulo, kien venas neniu krom ĝentlemanoj de bonokazo, Silver suprenigus (supren'ig'us) nigran, nur nigran piratan flagon. Estu ja certa. Tie estas viaj amikoj. Verŝajne okazis batalo, kaj ili venkis. Kaj nun ili troviĝas apud la marbordo, ene de la malnova barilo. Tio estas Flint kiu starigis la barilon antaŭ multe da jaroj. Kiel saĝa estis tiu Flint! Nur rumo

povis venki lin. Li timis neniun, krom Silver. Silver, ĉu vi scias, parolas tre bonkore...

- Bone, - diris mi, - do ni devas iri tien.

- Atendu, - respondis Ben, - atendu. Ŝajne vi estas bona knabo, sed vi estas nur knabo. Ben Gan ne estas malsaĝa. Per neniu drinkaĵo oni venigos min tien... Mi devas mem vidi vian denaskan ĝentlemanon, kaj li, li donu al mi sian vorton. Tiam mi iros. Kaj memoru kion mi diras: Gan multe pli kredas al denaska ĝentlemano. Tiel diru al li. Do, kiam mi ekestos bezonata al vi, vi scias kie trovi min, Ĝim: sur la loko kie vi trovis min ĉi-tage. Kaj kiu venos al mi devas teni ion blankan en la mano, kaj veni sola. Vi diru al ili tiel: «Ben Gan havas kialojn (kial'o'j'n) por tio».

- Bone, - diris mi, - ŝajne mi komprenis vin. Vi volas renkonti sinjoron Treloni aŭ la kuraciston, kaj vidi vin oni povas kie mi trovis vin ĉi-tage. Ĉu ĉio?

- Sed kial vi ne demandas dum kiuj horoj? Tage, ĝis sesa vespere.

- Bone, bone, - diris mi, - ĉu nun mi povas iri?

- Jes, nun vi povas iri, Ĝim, - diris li, forte tenante, kiel antaŭe, mian manon. - Aŭskultu, Ĝim, se vi ekvidos Silveron, vi diros al li nenion pri Ben Gan, ĉu? El vi, vi diras, eĉ unu vorton oni ne eltiros? Bone. Sed, se la

piratoj intencos dormi sur la marbordo, kio se ni faru el iliaj kunulinoj unuopulinojn (un-u'op'ul'in'o'j'n)?

Kanonpafo rompis liajn vortojn. Kuglego traflugis inter la arboj, kaj falis sur sablon tricent futoj de loko kie ni staris. Ni diskuris (dis'kur'is).

Dum horo, aŭ eĉ pli, la insulon tremigis la kanonpafado. Kuglegoj flugis en la arbaro, rompante ĉion sur sia vojo. Mi kaŝis min tie, aŭ tie, sed ĉie ŝajnis al mi ke la kuglego flugas rekte al mi. Iom post iom al mi revenis la perdita kuraĝo. Sed mi ankoraŭ ne decidis veni al la barilo, apud kiu falis plimulto da kuglegoj. Irante ĉirkaŭe, al oriento, mi venis fine al arboj kreskantaj ĉe marbordo mem.

Suno jam subiris, mara vento fajfis en la arbaro, kaj ondigis nigreton de la golfo. La mara malaltiĝo pligrandigis la sablaĵon. Ekestis malvarme. «Hispanolo», kiel antaŭe, staris ankre. Sed super ĝi vere pendis «Ĝoja Roĝer»: nigra pirata flago kun desegnaĵo de morta kapo. Sur la ŝipo aperis ruĝa flamo, kaj longa bruo ekportis super la tuta insulo lastajn sonojn de la kanonpafado. La pafado ĉesiĝis (ĉes'iĝ'is).

Mi kuŝis en la kreskaĵoj kaj pririgardis la okazaĵojn. Sur la bordo, ĝuste kontraŭ la barilo, kelkaj homoj hakis ion. Poste mi eksciis ke ili neniigas nian malfeliĉan boateton. Mal-



proksime, apud elfluo de la rivereto, inter arboj, brulis grandega fajro. Inter la fajro kaj la ŝipo senĉese moviĝis boato. Matrosoj, tiel malgajaj matene, nun, remante, kriis kaj ridis kiel infanoj. Laŭ sonoj de iliaj voĉoj mi komprenis ke la gajecon elvokis rumo.

Fine mi decidis iri al la barilo. Mi troviĝis sufiĉe malproksime de ĝi, sur malalta sablaĵo, kiu troviĝis sur orienta parto de nia bordo. Supreniĝante mi ekvidis malproksime, inter malalta kreskaĵaro, unuopan, sufiĉe grandan ŝtonegon, iom blankan. En mian kapon venis penso ke tio estas sama blanka ŝtonego pri kiu parolis Ben Gan kaj ke, se mi bezonos boaton, mi scias kie trovi ĝin.

Mi malrapide iris laŭ rando de la arbaro ĝis ekvidis antaŭ mi parton de la barilo kiu estis plej malproksima de la maro. La kunuloj renkontis min varme. Mi rakontis al ili pri miaj travivaĵoj, kaj poste ĉirkaŭrigardis.

La domo estis farita el neprilaboritaj (ne'pri'labor'it'a'j) arbaj trunkoj. Apud la domo, ĉe ĝia pordo, estis ordigita loko sub kiu bruete fluis pura akvo. Ĝi eniris grandegan rompitan ujon kiu iam servis en ŝipkuirejo. Ene la domo estis preskaŭ malplena. Nur porfajrujaj (por'fajr'uj'a'j) ŝtonoj kuŝis tie.

Ĉiuj arboj sur la monteto, ĉirkaŭigita per la barilo, estis dehakitaj: el ili oni faris la

barilon kaj la domon. La arborestaĵoj montris ke iam ĉi tie staris bonega arbareto. Sed tero de sur flankoj de la altaĵeto estis forfluita (for'flu'it'a) per ĉielakvoj ĝis pura sablo. Kreskaĵoj videblis nur kie la fluanta akvo eniris la akvuĵon.

Tuj post la barilo komenciĝis densa kaj alta arbaro. Tio, kiel oni diris, povis malhelpi al atakitoj. Malvarma vespera vento, pri kiu mi jam parolis, eniris en la domon inter arbotrunkoj de la doma muro. Ĝi portis kun si multajn sablerojn (sabl'er'o'j'n). La sableroj plenigis la okulojn, kaj trafis nian manĝon. Grej, nia nova kunulo, sidis kun bandaĝita vizaĝo: la rabistoj tranĉis lin. Maljuna Tom Redrut, ankoraŭ ne enterigita, kuŝis ĉe muro, sub brita flago.

Se ni sidus kaj farus nenion, ni, post ne-longe, perdus la kuraĝon. Sed ŝipestro Smolet scipovis trovi laboron por ĉiuj. Li kunvokis nin, kaj ordigis du arojn. En la unuan eniris la kuracisto, Grej kaj mi, en la duan – sinjoro Treloni, Hanter kaj Ĝojs. Kvankam dum la tago ni tre laciĝis, la ŝipestro sendis duopon en la arbaron por venigi brulaĵon. Al alia duopo li ordonis fosi enterigejon (en'ter'ig'e-j'o'n) por Redrut.

La kuracisto ekestis kuiristo, min oni starigis esti apudporda gardisto, kaj la ŝipestro mem iris de unu al alia, ĉiujn kuraĝigis, al

ĉiuj helpis.

Tempo de tempo la kuracisto venadis al la pordo por konversacieti kun mi.

- Tiu ĉi Smolet, - diris li al mi, - estas homo multe pli bona ol mi. Se mi mem diras tion, Ĝim, tio gravas.

Veninte duan fojon li, post ioma silento, turnis la kapon, kaj enrigardis miajn okulojn.

- Tiu ĉi Ben Gan, ĉu oni povas fidi lin? - demandis li.

- Mi ne scias, sinjoro, - respondis mi, - mi ne tute certas ke lia kapo estas en ordo.

- Se vi ne tute certas, ĉio estas en ordo, - diris la kuracisto. - Kiam homo dum tri jaroj sidas sur nelogata insulo, Ĝim, ĝi ne povas resti sama al vi aŭ mi. Tiel estas faritaj ni, homoj. Vi diras ke li multe pensas pri bongustaĵoj, ĉu?

- Jes, sinjoro, - respondis mi.

- Bone, Ĝim, - diris li, - vidu kiel bonas esti ŝatanto de ili: vi eble rimarkis ĉe mi tiun ĉi ujon. En ĝi kuŝas io vere bongusta kaj pli-fortiga. Ni donu tion al Ben Gan.

Antaŭ la vespermanĝo ni enterigis maljunan Tomon en la sablon. Post tio ni senvestigis niajn kapojn, kaj iom da tempo staris super liaj restaĵoj, malgraŭ la malvarma vento.

Oni alportis multe da brulaĵo el la arbaro, sed al la ŝipestro tio ne sufiĉis:

– Matene mi igos vin labori kiel oni devas,  
– diris li.

Vespermanĝinte kaj drinkinte iom da varma drinkaĵo la ŝipestro, sinjoro Treloni kaj la kuracisto malproksimiĝis por preparoli la aferojn. Sed, verŝajne, nenio bona venis en iliajn kapojn. Manĝeblaĵoj estis ĉe ni tre malmultaj, do ni devis aŭ morti pro malsato antaŭ veno de la helpo, aŭ fordoni nin al la piratoj. Al ni restis nur unu afero: mortigi kiel eble pli da tiuj ĉi rabistoj, mortigi ilin ĝis ili malsuprenigos sian nigran flagon aŭ foriros per «Hispanolo» en liberan maron.

El dek-naŭopaj ili ekestis jam dek-kvinopaj, se preni ankaŭ duopon da vunditoj kaj unu trafitan apud la kanono, kiu, se ne mortis, estis vundita grave. Ĉiufoje, enirante interpafadon, oni devas gardi niajn homojn, kaj memori ke ĉe ni estas du fidindaj kunbatalantoj: rumo kaj malsanoj.

Rumo komencis jam sian laboron: inter ni kaj la piratoj estis ne malpli ol duonmejlo, sed preskaŭ tutan nokton aŭdis ni kantojn kaj kriojn. La kuracisto diris ke post nelonge aperos ankaŭ malsanoj: ilia noktejo troviĝas apud marĉo, kuracilojn ili havas neniujn, tial post sepo da tagoj duono el ili jam ne staros sur la piedoj.

– Do, – diris la kuracisto, – se ili ne sukcesos mortigi nin tujn, ili estos ĝojaj lasi

la insulon. Ili havas la ŝipon, kaj ĉiam povas reveni al sia malnova «laboro»: esti maraj rabistoj.

– Tio estas unua ŝipo kiun mi perdis, – diris ŝipestro Smolet.

Mi ege laciĝis. Longe turniĝis mi antaŭ ol endormiĝi, sed poste mi dormis kiel morta.

Ĉiuj jam delonge ekstaris, matenmanĝis, kaj alportis brulaĵojn, kiam mi malfermis la okulojn pro bruo kaj krioj.

– Blanka flago! – diris iu.

Kaj tuj eksonis mira krio:

– Silver, tio estas Silver!

Mi saltis de sur la dormoloko, kaj ĵetis min al enmura paffenestreto.

Kaj vere, al la arbotrunka barilo venis du homoj. Unu el ili tenis en la manoj ion blankan, kaj dua, tio estis neniu alia ol Silver mem, trankvile staris apude.

Mi ne memoras tiel malvarman matenon. La malvarmo traigis min tutan. Ĉielo estis klara, suproj de arboj ruĝiĝis en lumo de supreniĝanta suno, sed malsupre, kie troviĝis Silver kaj ties kunulo, ankoraŭ estis mallume.

Nokta malvarmo kaj marĉoj, jen estas malfeliĉoj de la insulo.

– Ĉiuj sur la lokojn! – ordonis la ŝipestro.

– Mi estas certa ke ili pripensas iun malbonaĵon.

Poste li alkriis la rabistojn:

– Kiu iras? Haltu, aŭ ni pafos!

– Blanka flago, – kriis Silver.

La ŝipestro eliris el la pordo, kaj ekstaris post iu gardaĵo por ke malfidelula kuglo ne danĝerigu lin. Turniĝante al ni li ordonis:

– Aro de la kuracisto, al la loko ĉe la paf-fenestretoj! Kuracisto Livsi, mi petas vin, prenu nordan muron. Ĝim – orientan, Grej – okcidentan. Helpantoj, ŝargu la fusilojn! – Poste li denove alparolis la rabistojn:

– Kion vi deziras de ni per via blanka flago? – demandis li.

Ĉi-foje respondis ne Silver sed la alia pirato.

– Ŝipestro Silver, sinjoro, volas veni al via ferdeko, kaj ordigi kun vi interkonsenton (inter'konsent'o'n)! – kriis li.

– Ŝipestro Silver? Mi ne konas tiun. Kiu li estas? – demandis la ŝipestro.

Ni aŭdis ke li aldonis duonvoĉe:

– Jen kiel! Jam ŝipestro! Rapida supreniĝo!

Longa Ĝon respondis mem:

– Tio estas mi, sinjoro. Tiuj ĉi malfeliĉuloj nomis min ŝipestro post via forkuro, sinjoro. Ni estas pretaj denove subiĝi al vi, sed, kompreneble, tion oni devas preparoli. Kaj, dume (dum'e), donu al mi vian vorton, ŝipestro Smolet, ke mi revenu de ĉi tie viva, kaj ke vi

ne komencu pafadon antaŭ ol mi deiros de la barilo.

– Mi havas tute neniun deziron konversacii kun vi, – diris ŝipestro Smolet, – sed se vi volas, bone, venu ĉi tien. Sed se vi pripensas malfidelaĵon...

– Tio sufiĉas, ŝipestro! – gaje kriis Longa Ĝon. – Nur unu via vorto sufiĉas. Veran ĝentlemanon, ŝipestro, mi rekonas tuj, estu certa.

Mi vidis ke homo kun la blanka flago penis halti Silveron. En tio estis nenio mirinda, ĉar la ŝipestro parolis ne tro kortuŝe. Sed Silver nur ridis responde, kaj amike frapis lin, kvazaŭ penso pri iu danĝero ŝajnis al li malsaĝa. Li venis al la barilo, transĵetis sian bastonon, kaj poste transgrimpis mem nekutime rapide.

Mi devas diri ke mi estis tiel kaptita pri ĉio okazanta, ke jam ne memoris ke mi estas gardanto. Mi lasis mian gardolokon ĉe orienta paffenestreto, kaj staris post la ŝipestro kiu sidis sur la ĉepordaĵo (ĉe'pord'aĵ'o), subtenante la kapon per la manoj, kaj rigardante en la akvujon. Trankvile li fajfetis al si «Post mi, gejunuloj».

Al Silver estis turmente malfacile iri supren sur la sabla monteto. Ĉi tie, kun sia bastono, li estis senhelpa kiel surtera ŝipo. Sed li kuraĝe kaj silente venkis la vojon, kaj

haltis antaŭ la ŝipestro. Sur li estis liaj plej bonaj vestoj.

- Jen estas vi, ŝatinda, - diris la ŝipestro, suprenigante la kapon. - Sidu.

- Enlasu min en la domon, ŝipestro, - petis Longa Ĝon, - dum tiu ĉi malvarma mateno, sinjoro, ne tre bonas sidi sur sablo.

- Se vi, Silver, - diris la ŝipestro, - volus resti fidela homo, vi sidus nun en via kuirejo. Do, aŭ vi estas mia ŝipkuiristo, kaj tiam mi estas bona al vi, aŭ vi estas ŝipestro Silver, ribelulo kaj pirato; tiam atendu de mi nenion krom pendumilo.

- Bone, bone, ŝipestro, - diris Silver, sidante sur la sablon, - sed poste vi devos doni al mi la manon por ke mi povu supreniĝi... Nembone vi ordiĝis ĉi tie!.. Hej, tio estas Ĝim! Bonan matenon, Ĝim!.. Ĉion bonan al vi, kuracisto! Vi sidas ĉi tie kune kiel feliĉaj gepatroj kun siaj infanoj, se oni povas diri tiel...

- Al la afero, - interrompis lin la ŝipestro, - diru por kio vi venis.

- Ĝuste, ŝipestro Smolet, - respondis la kuiristo, - afero antaŭas ĉion. Mi devas diri al vi ke via ĉi-nokta okazaĵo sukcesis. Iu el vi scipovas bati per bastonego. Kelkaj el miaj homoj estis malbone mirigitaj pri la afero. Ne, ne iuj: ĉiuj. Ankaŭ mi mem, mi devas diri. Eblas ke nur tial mi venis ĉi tien. Sed,



ŝipestro, duan fojon tiu ĉi ago ne sukcesos al vi! Vi verŝajne opinias ke ni ĉiuj estis morte ebriaj? Kredu al mi, mi tute ne estis ebria, mi nur laciĝis kiel hundo. Se mi malfermus la okulojn eron de minuto antaŭe, vi ne forirus de mi. Li ankoraŭ estis viva kiam mi alkuris lin.

– Daŭre, – trankvilege diris ŝipestro Smolet.

Ĉio kion diris Silver ne povis esti komprenebla por la ŝipestro, sed li eĉ ne per moveto malkaŝis tion. Sed mi komprenis ion. Mi ekmemoris lastajn vortojn de Ben Gan, kaj komprenis ke nokte li eniris noktejon de la rabistoj kiam ili, ebriaj, kuŝaĉis ĉirkaŭ la fajro. Mi estis ĝoja pensi ke de nun restis vivaj nur dek-kvaroj da niaj malamikoj.

– Unuvorte jen kio, – diris Silver, – ni volas trovi la trezorojn, kaj ni trovos ilin. Kaj vi, certe, volas savi viajn vivojn. Vi ja havas la mapon, ĉu?

– Verŝajne, – respondis la ŝipestro.

– Mi estas certa ke vi havas ĝin, – daŭrigis Longa Ĝon. – Kial vi parolas kun mi tiel malamike? Tio venigos neniun bonon al vi. Ni bezonas vian mapon. Jen estas ĉio. Kaj al vi, homoj, ni deziras neniun malbonon...

– Ĉesu, – interrompis lin la ŝipestro. – Mi ne estas tia. Ni ĝuste scias kio vere estas via deziro. Sed tio nin tute ne maltrankvilas, ĉar

viaj manoj okazis tro mallongaj.

– Se Ejb Grej... – komencis Silver.

– Halt! – kriis sinjoro Smolet. – Grej nenion diris al mi, kaj mi pri nenio demandis lin. Por mi, se vi volas scii, estus pli bone lasi malsekaĵon de vi, de li, kaj ankaŭ de tuta tiu ĉi insulo ol fari tion. Ĉu estas klare?

Tiu ĉi eksplodo de sentoj ŝajne trankviligis Silver-on. Li komencis jam ruĝiĝi, sed nun li detenis sin.

– Laŭvole, – diris li, – pensu kion vi volas.

La du viroj longe kaj silente sidis, rigardante unu la alian.

– Jen pri kio ni volas interkonsenti, – diris fine Silver, – vi donas al ni la mapon, por ke ni povu trovi la trezorojn. Vi ĉesu mortigi malfeliĉajn matrosojn, kaj disrompi iliajn kapojn kiam ili dormas. Se vi konsentas pri tio vi havas du eblecojn.

Ebleco unua: post surŝipigo de trezoroj vi revenos sur la ŝipon. Mi donas al vi mian vorton ke mi surbordigu vin iuloke bonorde.

Se la unua ebleco ne plaĉas al vi, ĉar multaj miaj matrosoj delonge malamas vin: vi turmentis ilin per senbezonaĵaj laboroj, jen dua ebleco: ni lasos vin ĉi tie, sur la insulo, kun duono da manĝeblaĵoj. Kaj mi sendos al vi unuan el ŝipoj kiun ni renkontos. Prenu tion. Pli multe vi ne ricevos. Mi esperas, – kaj li laŭtigis la parolon, – ke ĉiuj viaj homoj ĉi tie,

en la domo, aŭdas miajn vortojn, ĉar dirita al unu estas dirita al ĉiuj.

- Ĉu tio estas ĉio? - demandis ŝipestro Smolet.

- Tio estas mia lasta vorto! - respondis Ĝon. - Se vi ne konsentas, parolos ne mi sed niaj fusiloj.

- Bonege, - diris la ŝipestro, - nun aŭskultu min. Se vi ĉiuj venos al mi senarmitaj, unu post alia, mi devigas min transporti vin en Londonon, kaj transdoni al la landestraro.

Sed se vi ne venos, mi ne estos Aleksandro Smolet, supreninta ĉi tie flagon de mia lando, se mi ne venigos vin al morto. Trezorojn vi ne trovos. Foriri per la ŝipo vi ne sukcesos: neniu el vi scipovas navigi ĝin. Ankaŭ batalantoj vi estas malbonaj: kontraŭ unu Grej estis via kvinopo, sed li foriris de ĉiuj. Vi forte sursabliĝis, ŝipestro Silver, kaj ne facile deiros vi de tiu ĉi sablaĵo. Tio estas lasta bona vorto kiun vi aŭdas de mi. Dum alia renkonto mi enigis kuglon en vin. Kaj nun - iru for de ĉi tie, ŝatinda, kaj rapide!

Okuloj de Silver ekflamis.

- Donu al mi manon por ke mi povu supreniĝi! - kriis li.

- Mi ne donos, - respondis la ŝipestro.

- Kiu donos al mi manon? - muĝis Silver.

Neniu el ni moviĝis. Eligante aĉajn insul-

tojn Silver tiriĝis ĝis la ĉepordaĵo (ĉe'pord'aĵ'o), kaptis ĝin, kaj nur tie sukcesis ekstari.

- Vi estas nenio por mi, - kriis li, - post unu horo mi varmigis vian malnovan fortikejon kiel barelon kun rumo. Ridu, Ĉielo mortigu vin, ridu! Post unu horo vi ridos alie. Tiuj el vi kiuj restos vivaj ege volos ekesti mortaj!

Kaj denove insultante li ekiris sur la sablo. Kvar- aŭ kvin-foje komencis li transgrimpi la barilon, sed falis. Fine homo kun la blanka flago helpis al li kaj, post unu minuto, ili malaperis post la arboj.

Tuj post foriro de Silver la ŝipestro, tutan tempon rigardanta nur lin, turniĝis, kaj rimarkis ke sur gardolokoj staras nur Grej.

- Al gardolokoj! - muĝis li.

Ni ĵetis nin al la paffenestretoj.

- Grej, - diris li, - mi enigis vian nomon en la ŝiplibron. Vi plenumis vian devon kiel oni devas fari tion... Sinjoro Treloni, vi mirigis min! Kuracisto, ja vi estis soldato! Se vi tiel plenumis vian devon ĉe Fontenua, pli bone vi ne lasus vian dormejon.

Gardoloko de la kuracisto estis ĉe paffenestretoj. Aliaj devis ŝargi fusilojn. Ni ĉiuj ruĝiĝis: estis pro kio insulti nin. La ŝipestro silente rigardis nin. Poste li ekparolis denove:

- Amikoj, - diris li, - mi renkontis Silver-

on per ŝipranda kanonpafado. Mi pripense faris tion. Laŭ liaj vortoj post malpli ol horo ni estos atakataj. Vi scias ke ili estas pli multnombraj ol ni, sed ni troviĝas en fortikejo. Antaŭ minuto mi povus eĉ diri ke ni estas pli bone ordigitaj. Mi estas certa ke ni povas venki ilin, se ni volos venki.

Poste li ĉirkaŭiris nin ĉiujn, kaj rekonis ke ĉi-foje ĉio estas en ordo. En du mallongaj muroj de la domo: en orienta kaj okcidenta, estis nur du fenestretoj. En la suda (la = muro), kie troviĝis la pordo, - ankoraŭ du. Kaj en la norda - kvin. Ĉe ni estis dudek fusiloj por la sesopo. El la brulaĵo ni ordigis ion similan al tabloj. Sur ĉiu el ili kuŝis pulvo, kugloj, kaj kvar ŝargitaj fusiloj, por ke ni ĉiam havu ilin ĉe la mano. Inter la fusiloj kuŝis la sabroj.

- Malbruligu la fajron, - diris la ŝipestro, - jam estas varme, kaj ĝi nur turmentas la okulojn.

Sinjoro Treloni elportis postfajrajn restaĵojn, kaj disĵetis ilin sur la sablon.

- Hokins ankoraŭ ne matenmanĝis... Hokins, prenu vian matenmanĝon, kaj manĝu sur via loko, - daŭrigis ŝipestro Smolet. - Rapidu, amiketo, vi devas sukcesi pri bona satiĝo. Hanter, disdonu al ĉiuj varman drinkaĵon.

Dum ĉiu el ni agis laŭordone, la ŝipestro

ĝisfunde pripensis niajn agojn.

- Kuracisto, al vi mi donas la pordon, -  
diris li. - Rigardu bone, sed ne tro eliĝu.  
Staru ene, kaj pafu el post la pordo... Hanter,  
vi prenu orientan muron... Ĝojs, amiko mia,  
prenu la okcidentan...

Sinjoro Treloni, vi estas plej bona nia  
pafanto, - prenu kune kun Grej nordan  
muron. Tio estas plej danĝera flanko. Se ili  
sukcesos alkuri ĝin, kaj pafi nin tra la fen-  
estretoj, niaj aferoj estos tre malbonaj... Mi  
kaj vi, Hokins, estas malbonaj pafantoj. Ni  
ŝargos fusilojn kaj helpos al ĉiuj.

Ordonoj de la ŝipestro estis trafaj. Tuj  
kiam suno lumigis suprojn de la arboj, ekestis  
varme. Post nelonge la sablo ege varmiĝis. Ni  
deĵetis la suprajn vestojn. Ĉiu staris ĉe sia  
gardoloko, ene de la varmo kaj maltrankvilo.  
Post unu horo ekestis klare ke kontraŭ ni  
pretiĝas atako.

- Mi volus demandi, sinjoro, - diris Ĝojs,  
- se mi vidos iun, ĉu mi devas pafi?

- Certe! - kriis la ŝipestro.

- Bone, sinjoro, - respondis Ĝojs, same  
trankvile.

Nenio okazis, sed demando de Ĝojs igis  
nin ĉiujn esti pretaj. Pafantoj tenis la fusilo-  
jn, la ŝipestro staris ene de la ĉambrego.

Subite Ĝojs suprenigis sian fusilon, kaj  
elpafis. Sono de lia pafo ankoraŭ ne sukcesis

silentiĝi kiam oni alpafis nin de ĉiuj flankoj. Kelkaj kugloj batis arbotrunkojn de la muroj. Sed enflugis eĉ ne unu el ili. Ĉirkaŭ la arbotrunka barilo kaj en la arbaro denove (de'nov'e) ekestis silente kaj trankvile. Eĉ ne unu herbeto moviĝis, en la arbaro videblis neniu fusilo. Niaj malamikoj malaperis.

– Ĉu vi trafis iun? – demandis la ŝipestro.

– Ne, sinjoro, – respondis Ĝojs. – Ŝajnas ke ne, sinjoro.

– Ankaŭ tio bonas ke vi diras veron, – diris ŝipestro Smolet. – Ŝargu lian fusilon, Hokins... Kuracisto, kiom da pafoj, laŭ via opinio, venis al via flanko?

– Mi povas respondi ĝuste, – diris kuracisto Livsi, – tri pafoj. Mi vidis tri lumetojn: du apude, kaj unu iom pli malproksime, de okcidento.

– Tri! – Kaj kiom sur via flanko, sinjoro Treloni?

Sed tie ĉi estis malfacile respondi. De nordo oni pafis multe. Sinjoro Treloni certigis ke estis sep elpafoj, Grej – ke estis ok aŭ naŭ da ili. De oriento kaj okcidento venis nur du pafoj. Ŝajnis ke novan atakon oni devis atendi de nordo. De aliaj flankoj oni pafis nur por erarigi nin. Malgraŭ tio ŝipestro Smolet ne aliigis lokiĝon de la homoj.

– Se la rabistoj sukcesos transgrimpi la barilon, – diris li, – ili povas kapti iun ajn

sengardan fenestreton, kaj trafi nin ĉiujn ene de nia fortikejo.

Sed ni havis ne sufiĉe da tempo por pripensoj. Subite de nordo eksonis laŭta «hura», kaj negranda aro da piratoj elsaltis el la arbaro, kaj ĵetis sin al la barilo. Samtempe oni denove komencis pafi nin de ĉiuj flankoj. En la pordon enflugis kuglo, kaj rompis fusilon de la kuracisto.

La atakantoj grimpis sur la barilon. Sinjoro Treloni kaj Grej pafis denove kaj denove.

Tri el la atakantoj falis, unu el ili enen (en'en). Sed poste ni ekvidis ke unu el ili estas ne vundita sed nur timigita, ĉar li tuj surpiediĝis (sur'pied'iĝ'is), kaj malaperis en la arbaro. Duopo kuŝis sur la tero, unu forkuris, kvaro kaptis lokojn sur nia flanko de la barilo. Sepo aŭ oko da aliaj piratoj, havante verŝajne kelkajn fusilojn ĉiu, senĉese pafis nian domon, sidante en densejo. Sed tiuj pafoj okazigis al ni neniun malbonon. Kvaroj da enrompiĝintoj kuris, kriante, al la domo. Sidantoj en la arbaro ankaŭ kriis, por kuraĝigi la amikojn.

Niaj pafistoj pafis senĉese, sed ili tiel rapidis ke ŝajne trafis eĉ ne unufoje. En unu momento kvaroj da piratoj surgrimpis la monteton, kaj atakis nin. Kapo de Ĝob Enderson aperis ene de unu el la fenestretoj.

– Batu, batu ilin! – muĝis li per laŭtega



voĉo.

Sammomente alia pirato, kaptinte fusilon de Hanter, iom eltiris ĝin, kaj batis Hanteron tiel forte, ke la malfeliĉulo falis. Dume tria, kiu sukcesis ĉirkaŭkuri la domon, aperis subite en la pordo, kaj ĵetis sin kun sabro sur la kuraciston.

Nun niaj aferoj okazis similaj al tiuj en kiuj ĝis nun troviĝis niaj malamikoj. Nur antaŭnelonge ni pafis el la gardejo sengardajn piratojn, sed nun, per nenio gardataj, ni ne scipovis rebati la malamikojn. Pro la pafado videblis nenio. Nur tial ni restis vivaj. Mi aŭdis kriojn kaj pistolajn pafojn.

– Al eliratako, antaŭen, al manbatalo! Sabroj! – kriis la ŝipestro.

Mi kaptis la sabron. Iu alia, ankaŭ kaptante la sabron, iom tranĉis per ĝi mian manon, sed mi eĉ ne sentis tion. Mi ĵetis min al la pordo, al suna lumo. Iu elsaltis post mi, mi ne scias kiu. Rekte antaŭ mi la kuracisto postkuris malsupren atakintan lin piraton. Mi vidis kiel la kuracisto faligis lin, kaj batis per la sabro ties vizaĝon.

– Ĉirkaŭkuru la domon! Ĉirkaŭkuru la domon! – kriis la ŝipestro.

Malgraŭ malordo kaj bruo mi rimarkis ke lia voĉo aliiĝis. Senpripense subiĝinte al la ordono mi ekkuris, kaj tuj trafis Enderson-on. Tiu ekmuĝis, kaj ties sabro aperis super mia

kapo. Mi ne sukcesis eĉ ektimi. Flankiĝante de la morta bato mi desaltis, malbonpaŝis en la sablo, falis, kaj daŭrigis fali malsupren.

Kiam mi, dum la atako, elsaltis el la pordo, aliaj piratoj jam grimpis trans la barilon por finiĝi nin. Unu el ili, en ruĝa nokta kapvesto, jam transigis la piedon, preta desalti. Mia falo de la monteto okazis tiel rapida, ke kiam mi supreniĝis sur la piedojn, ĉio ankoraŭ restis sama: la pirato en ruĝa kapvesto sidis sur la barilo, kaj kapo de iu alia nur eliĝis el trans la barilo. Sed dum tiu ĉi ege mallonga tempo la batalo finiĝis. Venko restis ĉe ni.

Grej, elsaltinta el la pordo post mi, kuŝigis surloke la altan matroson antaŭ ol tiu sukcesis duan fojon suprenigi la sabron. Alia pirato estis mortpafita ĉe fenestreto tiumomente kiam li intencis pafi enen. Li turniĝadis antaŭmorte sur la sablo, ne lasinte (las'int'e) el la manoj sian pistolon. Trian, kiel mi jam diris, morthakis la kuracisto.

El kvaroj da piratoj, transgrimpintaj la barilon, viva restis nur unu. Lasinte sian sabron sur la batalloko li, plena de mortteruro, grimpis sur la barilon por forkuri.

– Pafu, pafu lin el la domo! – kriis la kuracisto. – Kaj vi, kuraĝuloj, en la gardejon!

Sed malgraŭ liaj vortoj elpafis neniu. Lasta el la atakintoj sukcese transgrimpis la bar-

ilon, kaj malaperis kune kun aliaj en la arbaro. Post minuto el la atakintoj restis neniu, se ne paroli pri kvino da homoj: kvaro kuŝis ene de la fortikejo, unu – post la barilo. Sed tiuj kiuj restis vivaj povis ĉiuminute alkuriantajn fusilojn, kaj denove ekpafi.

Nun ni ekvidis niajn perdojn. Hanter kuŝis apud sia paffenestreto. Ĝojs, kun trapafita kapo, eksilentis por ĉiam. Sinjoro Treloni subtenis la ŝipestron, kaj iliaj vizaĝoj estis blankaj.

– La ŝipestro estas vundita! – diris sinjoro Treloni.

– Ĉu ĉiuj forkuris? – demandis sinjoro Smolet.

– Ĉiuj kiuj povis, – respondis la kuracisto. – Sed kvino el ili jam neniam kuros.

– Kvino! – kriis la ŝipestro. – Ne tiel malbone. Ĉe ili falis kvinopo, sed ĉe ni nur triopo: do ni estas nun kvaro kontraŭ naŭo. Tio estas pli bone ol estis komence: ŝepo kontraŭ dek-naŭo.

La rabistoj ne revenis. Neniu el ili eĉ pafis el la arbaro. «Ili ricevis jam sufiĉe por tiu ĉi tago», – diris pri ili la ŝipestro. Ni povis trankvile bandaĝi la vunditojn, kaj ordigi la tagmanĝon. Kuiris ĉi foje sinjoro Treloni kaj mi. Malgraŭ danĝero ni faris tion ne en la domo. Sed ankaŭ ĉi tie ĉio falis el niaj manoj, tiel teruraj estis laŭtaj krioj de la vunditoj.

El oko da homoj, trafitaj dum la batalo, vivaj restis nur tri: la pirato, trapafita ĉe la fenestreto, Hanter kaj ŝipestro Smolet.

La unua estis senespera; post nelonge li mortis. Al Hanter malgraŭ ĉiuj niaj penoj ne revenis la kompreno. Li travivis tagon, kaj ankaŭ mortis.

Vundoj de la ŝipestro estis turmentaj sed ne danĝeraj. Lin trabatis du kugloj. La kuracisto diris ke la ŝipestro certe resaniĝos, sed dum kelkaj septagaĵoj li ne devas iri, movi la manojn, kaj eĉ multe paroli.

Tranĉo sur mia mano okazis tute malgrava.

Post la tagmanĝo sinjoro Treloni kaj la kuracisto eksidis apud la ŝipestro, kaj komencis pripensi la aferojn. Poste la kuracisto prenis siajn pistolojn, kapveston, sabron, mapon kaj fusilon kaj, transgrimpinte la barilon de norda flanko, rapide malaperis en la densejo.

Mi kaj Grej sidis en malproksima parto de la ĉambrego por ne aŭskulti pri kio konversacias niaj superuloj. Grej estis ege mirigita per ago de la kuracisto.

– Ĉu ne trafis kuraciston Livsi iu pensmalsano? – diris li.

– Ne, – respondis mi, – el ni ĉiuj li perdos la kapon lasta.

– Eblas ke jes, – diris Grej, – sed se lia kapo estas sana, do malsana estas la mia.

– Mi opinias ke li iras konversacii kun Ben Gan.

Poste okazis ke mi ne eraris.

Dume varmo en la ĉambrego ekestis terura. En mia kapo ekmoviĝis ne tro bona penso. Mi pensis pri la kuracisto kiu iras ene de la malvarmeta arbaro, kaj aŭskultas birdetojn, dum mi turmentiĝas en loko kie kuŝaĉas la mortintoj, kaj ĉio estas malpurigita per sango.

Malamo en kiun enigis min nia fortikejo estis preskaŭ sama ol la timo. Mi laboris, kaj ĉiuminute pliiĝis mia kontraŭstaro al tiu ĉi loko. Neniu rigardis min, kaj mi komencis ordigi la forkuron: plenigis miajn vestojn per manĝeblaĵoj.

Vi povas nomi min malsaĝulo. Jes, tio estis ege danĝere, sed mi faris ĉion kion mi povis fari. Tiuj ĉi manĝeblaĵoj dum iom da tagoj ne donos al mi morti pro malsato. Krom tio mi prenis du pistolojn. Kuglojn kaj pulvon mi havis, tial mi sentis min bonege armita.

Mia intenco, se diri veron, estis ne tiel malbona. Mi volis veni al la ĉeborda sablaĵo, trovi la blankan ŝtonegon, kiun mi rimarkis antaŭe, kaj rigardi ĉu ne sub ĝi kaŝas Ben Gan sian boateton. La afero, laŭ mi, povis venigi al ni bonon, sed mi sciis ĝuste ke oni neniam donos al mi plenumi ĝin; do mi de-

cidis forkuri nerimarkita.

Kvankam miaj intencoj estis bonaj, la ago certe estis aĉa; sed memoru ke mi estis nur knabo, kaj ke mi jam venis al la decido.

Post nelonge aperis bona okazo por la forkuro, ĉar sinjoro Treloni kaj Grej komencis rebandaĝi (re'bandaĝ'i) la ŝipestron. La vojo ekestis libera. Mi transgrimpis la barilon, kaj malaperis en la densejo. Antaŭ ol oni rimarkos mian foreston mi foriros jam tiel malproksimen ke povos aŭdi neniujn vokojn.

Tiu ĉi dua mia pensmalsanula ago estis eĉ pli malbona ol la unua, ĉar en la fortikejo restis nur duopo da sanaj homoj. Sed, same al la unua, ĝi helpis al ni saviĝi.

Mi direktiĝis rekte al orienta bordo de la insulo por iri laŭ mara flanko de la sablaĵo nerimarke de la ŝipo, staranta en la golfo. Tago jam proksimiĝis al vespero, kvankam suno staris ankoraŭ alte. Irante tra la arbaro mi aŭdis ne nur senĉesan bruegon de ondofrapoj, sed ankaŭ brueton de la arabaj suproj. Tio montris ke ĉi-taga vento estas pli forta ol kutime. Post nelonge mi eksentis malvarmeton. Ankoraŭ kelkaj paŝoj, kaj mi venis al la arbarrando. Antaŭ mi kuŝis maro, lumigita per suno. Apud la bordo aŭdiĝis ondofrapado.

Maron apud Trezorinsulo mi neniam vidis trankvila. Eĉ kiam suno lumigas blindige, kaj

vento forestas, ankaŭ tiam ondegtoj frapobruet ĵetas sin sur la bordon. Sur la insulo oni ne povas trovi lokon kie ne aŭdiĝus tiu ĉi frapado.

Mi iris laŭborde. Fine, decidinte ke mi jam sufiĉe iris al sudo, mi ekgrimpis, sub gardo de densaj kreskaĵoj, al supro de la sablaĵo. Antaŭ mi estis golfo. La vento, kvazaŭ laciĝinte, jam trankviliĝis. La akvo inter la insuloj estis senmova. Ĝi estis tiel trankvila, ke «Hispanolo» videblis en la mara akvo tuta, de supro de la masto, kun pendanta tie nigra flago, ĝis la subo.

Apud la ŝipo mi ekvidis boaton. Sur ĝia malantaŭo sidis Silver. Mi rekonis lin de iu ajn malproksimo. Li konversaciis kun du piratoj, starantaj sur la ferdeko. Sur unu el ili videblis ruĝa kapvesto. Tio estis sama aĉulo kiu antaŭnelonge penis transgrimpi la barilon. Ili konversaciis kaj ridis, sed inter ili kaj mi troviĝis tuta mejlo, tial, kompreneble, mi povis aŭdi eĉ ne vorton.

Poste al mi venis terura nehoma krio. Komence mi ektimis, sed poste rekonis voĉon de Ŝipestro Flint, la papago. Al mi eĉ ŝajnis ke mi vidas la birdon sur mano de Silver.

La boato deiris, direktiĝis al la bordo, kaj homo en la ruĝa kapvesto, kune kun sia kunulo, eniris la kajuton.

Suno malaperis post Velo. Mallumiĝis

rapide. Mi komprenis ke eblas perdi eĉ ne minuton, se mi volas trovi la boateton.

La blanka ŝtonego estis bone videbla tra la kreskaĵoj, sed ĝi troviĝis sufiĉe malproksime, pli-malpli okonon da mejlo laŭ la sablaĵo; do mi perdis multe da tempo por veni al ĝi. Multfoje mi devis iri tra la kreskaĵoj. Estis preskaŭ nokto kiam mi tuŝis per la manoj flankon de la ŝtonego. Sub ĝi troviĝis eta kaverno. Ene mi trovis boateton de Ben Gan.

El ĉiuj memfaritaj boatoj la tiu estis, se oni povas diri tion, plej memfarita. Ben faris ĝin el arbaĵoj kaj bestaj feloj. Mi ne scias kiel eltenis ĝi plenkreskan homon: eĉ mi lokiĝis en ĝi malfacile. Ene mi trovis tre malaltan sidlokon, kaj duflankan remilon. Neniam antaŭe vidis mi fiŝistajn boatetojn per kiuj vojaĝis iamaj britoj. Sed poste mi sukcesis konatiĝi kun ili. Por ke vi vidu pense boateton de Ben Gan, mi diru ke ĝi estis simila al plej unua, kaj plej malsukcesa el tiuj boatetoj. Sed, malgraŭ tio, ĝi havis plej gravan econ de la iamaj boatoj: oni povis libere porti ĝin de loko al loko.

Nun vi povas pensi ke, se mi trovis la boateton, venis jam tempo reveni en la fortikejon. Sed dume en mia kapo aperis alia penso. Ĝi tiel ekplaĉis al mi, ke eĉ ŝipestro Smolet ne sukcesus forigi min de ĝi. Mia in-



tenco estis alproksimiĝi dum la nokta mallumo al «Hispanolo», kaj distranĉi la ankran ŝnuregon. Marfluo ĵetu la ŝipon ie ajn sur la bordon.

Mi estis certa ke la rabistoj, kiuj ricevis tiel fortan rebaton ĉi-matene, intencas suprenigi la ankron kaj foriri en la maron. Oni devis malhelpi al tio. Sur la ŝipo restis eĉ ne unu boato, do mi povis plenumi la intencon sen iu ajn malfacilaĵo. Atendante kiam plene mallumiĝos mi eksidis sur la sablon, kaj komencis manĝi.

Estus malfacile trovi nokton pli bonan por tiu ĉi ago. Kiam malaperis lastaj lumetoj de la tago, sur Trezorinsulon venis plena mallumo. Do kiam mi, preninte la boateton, eliris el la kaverneto, kaj ekiris al la akvo, en la plena mallumo videblis nur du lumoj. Unua – sur la bordo. Mi rekonis grandan fajron ĉe la marĉo apud kiu drinkaĉis la piratoj. La alia estis nur enakva rebrilo: tio lumis fenestreto sur malantaŭa parto de la ŝipo.

Mara malaltiĝo jam komenciĝis, tial inter la akvo kaj la kaverneto liberiĝis longa malseka sablaĵo. Trairinte ĝin, kaj ankoraŭ kelkajn paŝojn en la akvo, mi rapide mal-suprenigis la boateton.

Ĝi okazis tute bona por homo de mia alto. Ĝi estis bone movigebla sed, samtempe, tiel turniĝema, ke direktigi ĝin estis preskaŭ nee-

ble. Oni faru pri ĝi kion oni volas, sed ĝi senĉese turniĝis.

Ankaŭ Ben Gan diris poste ke remi en ĝi povis nur kiu «jam al kutimiĝis al tio». Certe mi ankoraŭ ne sukcesis al kutimiĝi al la boateto. Ĝi estis preta iri iun ajn direkton, krom tiu kiun mi bezonis. Plej multfoje ĝi turniĝis al la bordo; do, se ne la mara malaltiĝo, mi neniam venus al la ŝipo.

Por mia feliĉo la malaltiĝo kaptis min, kaj ekportis. Ĝi portis min rekte al «Hispanolo». Komence mi rimarkis nigraĵon kiu estis eĉ pli nigra ol la ĉirkaŭa mallumo. Poste mi ekvidis la ŝipon kaj la mastojn. Jen mi okazis apud la ankra ŝnurego, kaj kaptis ĝin. La ŝnurego estis ege rekta: per tiu forto la ŝipo penis fortiriĝi de la ankro.

La mara malaltiĝo bruis ĉe randoj de la ŝipo kiel monta rivero. Unu bato de mia tranĉilo, kaj «Hispanolo» ekflugos kien tiu ĉi rivero portos ĝin.

Sed mi ĝustatempe komprenis ke, se mi distranĉos (dis'tranĉ'o's) la ŝnuregon, ĝi batos min kun forto de ĉevala piedo, kaj la boateto kune kun mi iros al marfundo. Mi haltis, kaj komencis atendi.

Eblas ke mi finfine lasus mian intencon, sed facila venteto komence sud-orienta, kaj poste suda, iom post iom iĝis sud-okcidenta.

Subite alfluginta (al'flug'int'a) ventego

movigis «Hispanolo»-n kontraŭ la fluo. La ŝnurego, al mia ĝojo, iom liberiĝis, kaj la mano, per kiu mi tenis ĝin, por momento enakviĝis. Komprenante ke oni ne povas perdi la tempon mi elkaptis mian tranĉilon, malfermis ĝin, kaj unu post alia komencis distranĉi erojn de la ŝnurego. Kiam restis distranĉi nur duopon da eroj, la ŝnurego ektiriĝis denove, kaj mi komencis atendi alian ventobaton.

El la kajuto delonge jam aŭdiĝis laŭtaj voĉoj. Sed, verdire, mi estis tiel kaptita per mia laboro ke preskaŭ ne rimarkis ilin. Nun, pro la nenifaro, mi komencis aŭskulti.

Mi rekonis voĉon de maljuna Iser Hends, kiu iam estis kanonisto ĉe Flint. Alia voĉo estis, certe, voĉo de mia konato en la ruĝa kapvesto. Kaj tiu kaj la alia, laŭ la voĉoj, estis tute ebriaj, kaj daŭrigis la drinkadon. Unu el ili, kun ebria krio, malfermis la fenestretton, kaj ĵetis ion en la akvon. Plej verŝajne malplenan botelon.

Sed ili ne nur drinkis; ili superĵetis unu la alian per pensmalsanulaj insultoj. Ŝajnis al mi ke la afero proksimiĝas al interbatiĝo. Poste la voĉoj trankviliĝis, sed nur por, post kelkaj minutoj, aperi denove.

Sur la bordo, inter la arboj, mi vidis flamon de la fajro. Tie iu kantis tre malnovan matrosan kanton. Dum nia vojaĝo mi multfoje

aŭdis ĝin. La kanto estis tiel longa ke neniu kantanto scipovis trakanti ĝin tutan. Mi memoras el ĝi nur kelkajn vortojn: «La tuta sepdek-kvinopo ne revenis en sian landon: ili dronis.» Mi pensis ke tiun ĉi malgajan kanton ili kantas, verŝajne, ĉar perdis matene tiom da siaj kunuloj. Sed poste mi komprenis ke tiuj ĉi rabistoj scipovas kunsenti (kun'sent'i) ne pli ol maro sur kiu ili veladas.

Poste denove venis ventobato. La ŝipo denove ekmoviĝis al mi en la mallumo. Mi eksentis ke la ŝnurego malrektiĝis, kaj per unu forta bato mi distranĉis lastajn ĝiajn erojn.

Mia boateto tute ne sentis la venton, tial mi subite okazis ĉe flanko de «Hispanolo». La ŝipo malrapide turniĝis ĉirkaŭ si, movigata per la fluo. Mi remis el ĉiuj miaj fortoj, ĉiutage atendente ke tio dronigos min. Sed la ŝipo tiris mian boateton kune kun si, do mi tute ne scipovis deiri. Fine tio sukcesis al mi, kaj mi jam esperis liberiĝi de la danĝera kunulo. Sed tiam en miajn manojn trafis finaĵo de la pendanta ŝnurego. Mi tuj kaptis ĝin. Por kio mi faris tion mi ne scias. Sed kiam la ŝnurego okazis en miaj manoj mi decidis enrigardi fenestreton de la kajuto. Mi iom supreniĝis per la ŝnurego, kaj ekvidis parton de la kajuto. Dume la ŝipo, kaj ĝia kunulo, la boateto, rapide moviĝis pro la mara fluo. Ni jam troviĝis kontraŭ la surborda

fajro. La ŝipo laŭte «ekparolis», kiel diras maristoj, tio estas, komencis brue dishaki ondojn. Do antaŭ ol mi enrigardis la fenestreton mi ne povis kompreni kial la ŝipanoj rimarkas nenion. Sed ununura rigardo sufiĉis por kompreni ĉion. Starante en mia boateto mi povis ĵeti en la kajuton nur unu rigardon. Hends kaj lia kunulo, kaptinte unu la alian, troviĝis en interbatiĝo.

Mi revenis sur la sidlokon. Ankoraŭ unu momento, kaj la boateto pleniĝus per akvo. Antaŭ miaj okuloj staris teruraj vizaĝoj de la piratoj ĉe malforta lumo de la lumigilo. Mi fermis la okulojn por doni al ili denove alku-timiĝi al la plena mallumo.

La senfina kanto fine ĉesiĝis, kaj la malpliiĝinta ĉefajra kunularo (kun'ul'ar'o) ekkantis alian, tiel konatan al mi kanton:

***Dek-trio da maristoj  
En ujo por mortinto  
Jo-ho-ho, kaj botel' kun rum'***

Pensante pri tio kion faras nun rumo en kajuto de «Hispanolo» mi mire eksentis subitan okazaĵon: mia boateto aliigis la direkton. Rapideco de la fluo plifortiĝis. Mi malfermis la okulojn. Ĉirkaŭ mi, kun fajreroj de iuj marlumetoj, bruis malaltaj ondoj. «Hispanolo», kiun la fluo portis kelkajn futojn post mi,

ankaŭ ŝajne aliigis la direkton. Mi neklare vidis ĝiajn mastojn sur la malluma ĉielo.

Mi rerigardis, kaj koro mia falis: la fajro brulis nun ĝuste post mi. Do, la fluo turniĝis flanken, portante kun si kaj la altan ŝipon, kaj mian facilan boateton. Nun la brua fluo tiris nin tra la interinsulejo en liberan maron. Subite la ŝipo faris ankoraŭ unu turniĝon, kaj sammomente mi ekaŭdis komence unu krimon, kaj poste la alian. Eksonis piedfrapoj, kaj mi komprenis ke la ebriuloj ĉesis sian interbatiĝon. La malfeliĉo malebriigis la duopon.

Mi kuŝis sur fundo de mia boateto transdonante mian vivon al Ĉielo. Elirinte el la interinsulejo mi trafos fortegajn apudbordajn ondojn, kiuj rapide liberigos min de ĉiuj miaj malfacilaĵoj. Mi ne timis morton, sed estis turmente kuŝi senfare, kaj atendi kiam ĝi venos.

Mi kuŝis tiel kelkajn horojn. Ondoj superĵetis min per akveroj. Ĉiu nova ondo povis alporti morton. Sed iom post iom min kaptis laco. Malgraŭ la teruro mi falis en dormemon. Dormante mi vidis lokojn de mia infaneco, kaj malnovan «Admiralo Benboŭ».

Kiam mi malfermis la okulojn estis jam tute lume. Mi ekvidis ke min portas laŭ sudokcidenta bordo de Trezorinsulo. Suno jam supreniĝis, sed staris post granda de Velo,

kiu malsupreniĝis al maro per negrimpeblaj ŝtonegoj. Ŝiptiriga kabo kaj monteto Boato troviĝis apude. La monteto estis senkreskaĵa kaj malluma, kaj la kabon ĉirkaŭigis elmaraj ŝtonegoj.

De mi ĝis la insulo estis ne pli ol kvaronmejlo. Do mi decidis preni remilon, kaj remi al la bordo. Sed, post nelonge, mi estis devigata lasi tiun ĉi intencon: inter la elmaraj ŝtonegoj muĝis tre altaj ondoj. Ili, unu post alia, saltegis supren, kaj rompiĝis kun kanonpafa bruego. Mi vidis ke proksimiĝante al la bordo mi aŭ dronos en tiuj ĉi ondoj, aŭ perdos fortojn, penante surgrimpi la negrimpeblaĵon (ne'grimp'eb'l'aĵ'o'n). Sed ne nur tio haltis min. Sur la ŝtonegoj troviĝis iuj grandaj timigaj bestoj. Iam ili brue ĵetis sin en la akvon. Ili estis kelkdekaj, kaj eligis laŭtajn sonojn. Poste mi eksciis ke tio estas marhundoj, tute sendanĝeraj bestoj. Sed ili ŝajnis teruraj, tial mi perdis deziron iri al la insulo. Pli bone morti pro malsato ene de la maro ol stari vizaĝo al vizaĝo kontraŭ tiuj ĉi danĝeroj.

Dume aperis alia ebleco saviĝi. Norde de Ŝiptira kabo troviĝis longa sablaĵo, liberiĝinta pro la mara malaltiĝo. Kaj pli norde videblis alia kabo, kiu sur nia mapo nomiĝis Arbara. Ĝi tute superkreskis per grandegaj arboj, malsupreniĝantaj al la akvo.

Mi memoris vortojn de Silver pri tio ke laŭ okcidenta bordo de Trezorinsulo estas fluo kiu direktiĝas al nordo. Mi komprenis ke ĝi jam kaptis min, kaj decidis ne perdi la fortojn kaj, preterirante Ŝiptiran kabon, peni albordiĝi al kabo Arbara, kiu ŝajnis al mi multe pli gastema.

La maro alte ondiĝis. De sudo iris malforta vento, helpanta al mi moviĝi laŭ la fluo. Ondoj supreniĝis kaj malsupreniĝis. Se la vento estus iom pli forta mi delonge dronus. Sed dum tiu ĉi venteto oni povis nur miri pri mia eta facila boato.

Kuŝante sur ĝia fundo, kaj rigardante flanken mi ne unufoje vidis egan ondon super mia kapo. Jen ĝi falos sur min... Sed ne, mia boateto, eksaltante, flugis laŭ ĉi-murego kiel birdo. Iom post iom mi tiel kuraĝiĝis, ke eĉ ekremis. Sed tio okazis danĝera. Timigita, malseka, mi denove ekkuŝis sur la fundo. La boateto, ŝajne, tuj venis al sia antaŭa singardemo, kaj portis min inter la ondoj.

Mi komprenis ke remi ne eblas. Sed se mi estas senpova aliigi direkton, kiel mi venos al la bordo? Mi ektimis, sed ne perdis la kapon. Antaŭ ĉio mi komencis singarde forigi per mia matrosa kapvesto enboatetan akvon. Poste mi penis kompreni kial la boateto tiel facile moviĝas laŭ la ondoj. Mi rimarkis ke ĉiu ondo, kiu de bordo aŭ de ŝipo ŝajnas esti grandega



glata monto, pli similas al aro da montetoj kun siaj pikaj supraĵoj. La boateto, se oni ne malhelpas al ĝi, scipovas trovi vojon inter ili.

«Bonege», – decidis mi, – «gravas kuŝi senmove kaj ne malhelpi. Sed iam, en sendanĝeraj lokoj, mi povas iom post iom remi al la bordo».

Tiel mi faris. Kuŝante sur la fundo mi tempo de tempo movigis la remilon, kaj direktigis la boateton al la insulo. Tio estis ne tre multedona laboro kaj, troviĝante kontraŭ Arbara kabo, mi komprenis ke preteriros ankaŭ ĝin, kvankam la bordo estis sufiĉe proksima. Mi vidis malvarmetajn suprojn de la arboj. Ili moviĝis pro la vento. Mi estis certa ke alian kabon mi ne preteriros.

La tempo iris, kaj mi jam sentis deziron trinki. Suno blindige lumis kaj relumiĝis en la ondoj. Mara akvo sekiĝis sur mia vizaĝo. Surbordaj arboj estis tiel proksimaj, sed la fluo rapidege portis min preter la kabo.

Sed kion mi ekvidis ĉi tie aliigis ĉion. Duonmejle, aŭ eĉ pli proksime, mi ekvidis «Hispanolo»-n. Ĝi iris sub ĉiuj veloj. Certe oni ekvidos kaj prenos min. La trinkdeziro tiel turmentis min ke mi eĉ ne sciis ĉu ĝoji aŭ malĝoji. Sed ne longe mi pensis pri tio, ĉar min kaptis sento de mirego: «Hispanolo» iris sub tri veloj. Ili estis blankaj kaj ventoplenaj. La ŝipo direktiĝis nord-okcidenten. Mi pensis

ke la piratoj decidis ĉirkaŭiri la insulon, kaj reveni la antaŭan haltejon. Poste ĝi komencis pli kaj pli direktiĝi okcidenten, kaj nun mi pensis ke mi jam estas rimarkita, kaj ke oni postkuras min. Sed subite ĝi turniĝis kontraŭ la vento, kaj senhelpe haltis kun pendantaj veloj.

«Veraj ursoj!» – pensis mi, – «ili drinkaĉis, ŝajne, ĝis senkompreno».

Dume la ŝipo denove turniĝis, ekiris rapide unu-du minutojn, kaj denove haltis.

«Hispanolo» iris iam antaŭen, iam malantaŭen, senĉese revenante al tiu direkto kiun ĝi jam lasis. Al mi estis klare ke la ŝipon navigas neniu. Sed kien malaperis la homoj? Ili estas aŭ morte ebriaj, aŭ lasis la ŝipon. Se mi venos sur la ferdekon, mi eble povos redoni la ŝipon al ĝia ŝipestro. Se mi povus eksidi en la boato, kaj komenci remi, mi certe venus al ĝi.

Subite mi vere ekvolis surŝipiĝi. Deziro pri novaj agoj kaptis min, kaj penso pri bareleto kun drinka akvo plifortigis mian pensmalsanulan decidon. Mi eksidis, kaj min tuj de kapo ĝis la piedoj malsekigis ondo. Sed nun tio ne timigis min. Kunigante (kun'ig'ant'e) ĉiujn miajn fortojn mi singarde ekremis. La ŝipo rapide proksimiĝis. La rabistoj, verŝajne, forkuris. Eĉ se ili ne forkuris, do ili kuŝas mortebriaj en la matrosa ĉambro. Tie mi

ŝlosos ilin, kaj faros pri la ŝipo kion mi volos.

Obeante la fluon «Hispanolo» malrapide turniĝis ĉirkaŭ si. Mi ekvidis ĝian malantaŭon. Fenestreto de la kajuto estis malfermita. Super la tablo mi ekvidis la brulantan lumigilon, kvankam jam delonge venis tago. La ŝipo ekmalrapidis, ĉar nun ĝi moviĝis nur laŭ la fluo.

Ĝis la ŝipo restis ne pli ol tricento da futoj kiam vento denove plenigis la velojn. La ŝipo turniĝis, kaj denove ekflugis laŭ la ondoj kiel birdeto. Komence mi ekmalesperis (ek'-mal'esper'is), sed poste ekĝojis: la ŝipo iris rekte al mi.

Subite mi komprenis kiu danĝero atendas min. La ŝipo rapide proksimiĝas. Jam ne restis tempo por iu pripenso. Oni devas peni saviĝi. Mi troviĝis sur ondosupro kiam antaŭa parto de la ŝipo distranĉis apudan ondon. La ŝipelstaraĵo (ŝip'el'star'aĵ'o = plej antaŭa parto de la ŝipo) jam pendis super mia kapo.

Mi eksaltis, dronigante la boateton. Per la manoj kaj piedoj mi kaptis la ŝnuraron. Terurigita ekpendis mi super la ondoj. Posta bato donis al mi kompreni ke la ŝipo jam dronigis mian boateton, kaj ke mi havas jam neniun eblecon lasi «Hispanolo»-n.

Tuj post kiam mi surgrimpis la ŝip-elstaraĵon, unu el la veloj ekbruis kanonpafe,

pleniĝis kaj turniĝis. La ŝipo ekstremitis. Sed, post momento, kvankam aliaj veloj ankoraŭ estis plenventaj, la antaŭa velo denove malpleniĝis kaj ekpendis. Pro la neatendita frapo mi preskaŭ falis en la akvon. Ne perdante tempon mi ekmoviĝis manpiede laŭ la ŝipelstaraĵo, kaj falis per kapo suben sur la ferdekon.

Sur tiu ĉi antaŭa parto de la ferdeko, kie mi troviĝis, videblis neniu. La ferdeko estis malpurega pro spuroj de piedoj. Malplenaj boteloj moviĝis antaŭen kaj malantaŭen. Subite «Hispanolo» denove ekiris laŭvente. La ŝipo ekstremitis, la velaro ekmoviĝis, kaj mi ekvidis malantaŭon (mal'antaŭ'o'n) de la ŝipo.

Tie troviĝis la du piratoj. «Ruĝa kapvesto» kuŝis senmove. Liaj manoj estis disĵetitaj. Iser Hends sidis kun la kapo malsupren. Liaj manoj senhelpe pendis; la vizaĝo, malgraŭ ties sunbruniĝo, estis blanka.

La ŝipo saltis kiel malobeema ĉevalo. Dum ĉiu ĝia salto ankaŭ rabisto en la ruĝa kapvesto saltetis. Sed, al mia teruro, lia vizaĝo restis sama: kiel antaŭe li kvazaŭ ridetis. Kaj Hends, post ĉiu ŝipsalto, malsupreniĝis pli kaj pli al la ferdeko tiel, ke fine mi ĉesis vidi lin. Ĉi tie mi rimarkis apud ili, sur la ferdeko, sangon, kaj decidis ke ili, dum ebria batalo, mortigis unu la alian. Sed,

subite, kiam la ŝipo por kelkaj momentoj ekhaltis, Iser Hends eksidis pli alte sur la sama loko. Laŭ sonoj kiujn li eligis dum tio mi komprenis ke li estas ege malforta. Ĉu helpi al li?

Sed mi ekmemoris kion mi aŭdis sidante en la barelo por pomoj, kaj miaj kortuŝaj sentoj tuj malaperis. Mi proksimiĝis al li.

– Jen, mi denove estas sur la ŝipo, sinjoro Hends, – diris mi.

Li malfacile suprenigis al mi la okulojn, sed eĉ ne ekmiris: tiel malbone li sentis sin. Li diris nur unu vorton:

– Rumon!

Mi komprenis ke oni ne povas perdi la tempon. Laŭ la ŝtuparo mi enkuris la kajuton. Estas malfacile priskribi kiu malordo estis tie. Ĉio estis faligita kaj disrompita. La rabistoj verŝajne serĉis la mapon. Ĉio estis malpura. Dekoj da malplenaj boteloj disĵetitaj tie moviĝis de muro al muro, obeante la ŝip-moviĝojn. Ene de tiu ĉi malordo brulis, kiel antaŭe, la lumigilo. Bareletoj forestis. Laŭ multego da malplenaj boteloj mi komprenis ke la piratoj, de la ribelkomenco mem, malebriiĝis eĉ ne unufoje. Serĉante mi trovis duondrinkitan botelon por Hends. Por mi mi prenis iom da manĝo.

Supreniĝinte sur la ferdekon mi venis al la ŝip-direktilo, kaj kunigis tie ĉion, ne proksime

al Hends. Mi ĝissate trinkis akvon, kaj nur post tio donis al Hends la botelon. Li eldrinkis ne malpli ol duonon.

- Jes, - diris li, - ĝuste tion mi bezonis!  
Mi eksidis, kaj komencis manĝi.

- Ĉu vi grave vundiĝis? - demandis mi lin.

- Se la kuracisto estus ĉi tie, - respondis li, - mi resaniĝus rapide. Sed vi vidas, ĉio iras kontraŭ mi... Tiu ĉi aĉulo mortis, - aldonis li, per la kapo montrante homon en la ruĝa kapvesto. - Malbona li estis maristo... Sed de kie vi aperis?

- Mi venis ĉi tien por estri la ŝipon, sinjoro Hends, - diris mi. - Ĝis nova ordono opiniu min via ŝipestro.

Li ekrigardis min, sed diris nenion. Lia vizaĝo iom ruĝiĝis, sed li ĝis nun estis malforta, kaj tempo de tempo falis flanken.

- Interalie (= inter aliaj aferoj), - daŭrigis mi, - ne plaĉas al mi tiu ĉi flago, sinjoro Hends. Se vi ne kontraŭas, mi malsuprenigu ĝin.

Mi alkuris la maston, tiris la ŝnuron, malsuprenigis la aĉan nigran flagon, kaj forĵetis ĝin trans la ŝiprandon, en la maron.

- Ĉielo gardu nian landestron! For ŝipestron Silver! - kriis mi.

Li rigardis min, ne suprenigante la kapon, kaj vizaĝo lia montris ion malbonan.

– Mi opinias... – diris li fine, – mi opinias, ŝipestro Hokins, ke vi estus konsenta veni al bordo. Ĉu ni priparolu tion?

– Kial ne, sinjoro Hends – respondis mi, – daŭrigu, – kaj mi denove revenis al la manĝo.

– Tiu ĉi homo... – komencis li, malforte kapmontrante la mortajon, – lia nomo estis O’Brajen... Mi kaj li suprenigis la velojn, kaj volis reveni en la golfon. Sed li mortis. Mortis, kaj fino. Mi ne scias kiu nun navigos la ŝipon. Sen miaj klarigoj vi ne scipovas fari tion. Do aŭskultu: donu al mi manĝi kaj trinki, bandaĝu mian vundon, kaj mi, kontraŭ tio, montros al vi kiel navigi la ŝipon. Ĉu vi konsentas?

– Sed sciu, – diris mi, – ke reveni al haltejo Ŝipestro Kid mi ne intencas. Mi volas enigi la ŝipon en Nordan golfon.

– Bone, – diris li, – ĉu vere mi estas malsaĝulo? Mi bone komprenas ke mi jam faris mian movon, kaj maltrafis. Ĉu vi volas veni en Nordan golfon? Bonvolu. Mi helpos al vi navigi la ŝipon eĉ al subo de mia pendumilo.

Liaj vortoj ŝajnis al mi nemalsaĝaj. Ni interkonsentis. Post tri minutoj «Hispanolo» iris jam laŭ bordo de Trezorinsulo. Mi esperis ĝustatempe preteriri Nordan kabon por veni al Norda golfo ĝis la marsupreniĝo. Tiam ni venigos «Hispanolo»-n al la bordo, atendos malsupreniĝon, kaj povos lasi la ŝipon.

Mi ŝlosis la direktilon, malsupreniĝis en la kajuton, trovis mian havaĵujon, kaj prenis el ĝi unun el vestaĵaj donacoj de mia patrino. Kun mia helpo Hends bandaĝis per tio sian pikan sangantan vundon en supra parto de la piedo. Iom manĝinte kaj drinkinte li videble plifortiĝis, eksidis pli rekte, komencis paroli pli laŭte kaj klare, unuvorte ekestis jam tute alia homo.

Vento estis niadirekta. La ŝipo flugis kiel birdo. Preterkuris la bordo. Ĝi aliiĝis ĉi-minute. Alta parto de la insulo restis jam malantaŭe. Nun ni kuregis preter malalta sabla bordo superkreskita per iuj arbetoj. Finiĝis ankaŭ tio, kaj ni preteriris la monteton kiu estis plej norda parto de la insulo.

Al mi plaĉis navigi la ŝipon. Akvo kaj manĝo estis ĉe mi sufiĉaj, penso pri forkuro el la fortikejo jam ne turmentis min, ĉar mi venis al tiel grava venko. Ĉio estus bona se ne okuloj de la maljuna matroso. Li senĉese rigardis min, kaj sur lia vizaĝo tempo de tempo aperis iu ne tre bona rideto. En tiu ĉi rideto estis io senforta kaj turmenta: malgaja rideto de maljunulo. Samtempe estis en ĝi io malfidela. Mi laboris, kaj li ridetis kaj rigardis, rigardis min.

La vento, kvazaŭ penante fari bonon al ni, denove ekestis niadirekta. Vojon ĝis eniro en Nordan golfon ni trairis sen iuj ajn mal-



facilaĵoj. Sed eniri ĝin ĝis ioma altiĝo de maro ni timis, ĉar forestis la ankro. Oni devis atendi. La maljuna matroso instruis min kiel haltigi la ŝipon kaj, post longaj penoj, mi sukcesis. Poste ni eksidis, kaj komencis manĝi.

– Ŝipestro, – diris li fine kun sama nebona rideto, – ĉi tie kuŝaĉas mia malnova ŝip-kunulo O’Brajen. Ĉu vi forĵetu lin trans la ŝiprandon? Mi ne estas tro kredema, kaj ne sentas min malbone pro tio kion mi faris. Sed, laŭ mi, li estas ne tre bezonata sur la ŝipo. Kion vi opinias?

– Mi ne havas forton por tio kaj, krome, tia laboro ne plaĉas al mi. Laŭ mi li kuŝu, – diris mi.

– Ĝi estas vere malfeliĉa ŝipo, tiu ĉi «Hispanolo», Ĝim, – daŭrigis li, duonfermante la okulojn, – kiom da homoj estas mortigitaj, kiom da malfeliĉaj matrosoj perdis siajn vivojn de tempo kiam mi kaj vi lasis Bristolon! Neniam mi vidis tiel malfeliĉan vojaĝon. Jen ankaŭ O’Brajen mortis. Sed ĉu li vere mortis? Mi estas homo neinstruita, kaj ne scipovas legi. Diru al mi rekte: ĉu mortulo vere estas morta, aŭ iam reviviĝos?

– Vi povas mortigi homon, sinjoro Hends, sed ne tiun parton de ĝi kiu estas senmorta, – diris mi. – Sciu: O’Brajen estas nun en Ĉielo kaj, eble, rigardas nin.

– Hej! – diris li, – kiel malbone! Okazis ke mi nur perdis la tempon. Sed, laŭ mi, tiu ĉi senmorta homa parto ne povas venigi iun ajn gravan malbonon. Mi ne timas ĝin, Ĝim. Aŭskultu, mi volas peti vin: malsupreniĝu en la kajuton kaj alportu al mi... mi jam ne memoras kion... jes, alportu al mi botelon da vino, Ĝim. Tiu ĉi rumo estas tro forta por mi.

Mi ne kredis ke vino plaĉas al li pli ol rumo. La afero ŝajnis esti klara: li volas ke mi foriru de la ferdeko. Sed por kio? Li ne rigardas miajn okulojn. Iam li rigardas ĉielon, iam mortan O'Brajen-on. Kaj li ĉiam ridetas. Ĉi tie eĉ novnaskito komprenus ke li ion intencas.

Mi tuj decidis kiel mi agu, sed mi ne montris al li miajn pensojn.

– Vinon? – demandis mi. – Bonege. Sed kiun – ĉu blankan, ĉu ruĝan?

– Tute ne gravas, amiko, – respondis li, – gravas nur ke ĝi estu forta kaj multa.

– Bone, mi alportos al vi vinon, sinjoro Hends. Sed mi devos serĉi ĝin.

Mi ekkuris suben, penante frapi per la piedvestoj kiel eble pli laŭte. Poste mi deprenis (de'pren'is) ilin, kaj venis en matrosan ĉambron; tie mi supreniĝis laŭ la ŝtuparo, kaj singarde eligis la kapon. Hends tute ne pensis ke mi povas pririgardi lin, kaj plej malbonaj miaj pensoj okazis veraj.

Li supreniĝis, kaj sufiĉe rapide, manpiede,

ekmoviĝis sur la ferdeko, kvankam, ŝajne, lia vundita piedo turmentis lin. Post duonminuto li venis al loko kie troviĝis ordigita ŝnurego, kaj eltiris el sub ĝi longan tranĉilon, ĝis tenilo malpurigitan per sango. Li pririgardis ĝin, tuŝis per la mano la tranĉan randon, enigis ĝin sub sian veston, kaj rapide revenis la antaŭan lokon.

Mi eksciis ĉion kion mi bezonis: Iser povas moviĝi, li estas armita. Li penis forigi min de la ferdeko; tio montras ke mortigato (mort'ig'at'o) estos ĝuste mi. Kion li intencas fari post mia morto: ĉu tiriĝi trans tuta insulo de Norda golfo ĝis fajrejo de la piratoj ĉe la marĉo, ĉu pafi el la kanono, vokante helpon de la kunuloj, tion mi certe ne sciis. Mi povis fidi al Hends nur ĝis kiam niaj deziroj estis samaj: ankaŭ li volis venigi la ŝipon en sendanĝeran lokon, de kiu ĝin, poste, oni povos elpreni sen tro da penoj. Ĝis tiam mia vivo ne estas danĝerigata.

Pensante mi ne perdis tempon: mi kaŝeniris (kaŝ'en'ir'is) la kajuton, surtiris la piedvestojn, kaptis botelon da vino, kaj revenis sur la ferdekon.

Hends kuŝis same kiel mi lasis lin. Liaj okuloj estis duonfermitaj, kvazaŭ li estas tiel malforta ke eĉ lumo malhelpas al li. Li ekri- gardis min, per kutima frapo forrompis supron de la botelo, kaj eldrinkis ĝin preskaŭ

ĝis la fundo, dirante kiel kutime:

- Por via sano! - Eĥ Ĝim, Ĝim, - diris li poste, - mi jam tute disfalis! Longe mi ne vivos. Post iom da tempo ankaŭ mi estos en Ĉielo.

- Sur via loko, sentante min tiel malbone, - diris mi, - mi farus kion oni ĉiam faras: dirus antaŭmortajn petojn.

- Petojn? - demandis li, - pri kio?

- Kial «pri kio»? - kriis mi. - Ĉu vi ne scias kion vi petu? Nur antaŭnelonge vi demandis min pri mortintoj. Vi malfidele rompis vian devon. Tutan vivon vi vivis en malvero kaj sango. Jen, ĉe viaj piedoj kuŝas homo antaŭnelonge mortigita per vi. Kaj vi demandas min pri kio vi petu! Pri Ĉiela bono, sinjoro Hends, jen pri kio!

Mi parolis iom pli varme ol devis, ĉar mi pensis pri la granda tranĉilo kaŝita sub liaj vestoj, kaj pri tio ke li decidis mortigi min.

Li denove eldrinkis, kaj poste respondis:

- Tridek jaroj mi veladas sur maroj. Mi vidis kaj bonon kaj malbonon: ventegojn kaj senventajn tagojn, malsaton, tranĉilbatalojn, kaj multon alian; sed kredis al mi: eĉ ne unufoje mi rimarkis ke bonaj faroj alportas al homo iun ajn bonon. Vivas kiu batas unua. Mortaj ne mortigas. Tio estas tuta mia kredo. - Aŭskultu, - diris li subite per tute alia voĉo, - sufiĉas parolaĉi. Maro jam altiĝis. Agu laŭ

miaj ordonoj, ŝipestro Hokins, tiam ni enigis la ŝipon en la golfon, kaj finos la aferon.

Vere, al ni restis trairi ne pli ol du mejlojn. Sed la navigo estis malfacila. Eniro en Nordan golfon okazis malrekta. Sed mi estis bona plenumanto, kaj Hends – bonega ordonanto. Tuj kiam ni preteriris la du kabojn, de ĉiuj flankoj nin ĉirkaŭigis tero. Bordo de Norda golfo same dense ĉirkaŭkreskis per arbaroj kiel bordo de la Suda. Sed la golfo mem estis pli longa kaj, verdire, pli memorigis elfluejon (el'flu'ej'o'n) de iu rivero, ol golfon.

Rekte antaŭ ni, ĉe suda bordo, videblis restaĵoj de rompita ŝipo. Tio estis granda trimastulo (tri'mast'ul'o). Ĝi tiel longe staris ĉi tie, ke sur ĝia ferdeko dense elkreskis florantaj arbetoj. La vidaĵo estis malgaja, sed ĝi montris al ni ke tiu ĉi golfo plene bonas por esti nia ŝiphaltejo.

– Rigardu, – diris Hends, – jen estas bonega loko por albordiĝo. Pura sablo, neniuj ondoj, ĉirkaŭe arbaro, floroj...

– Ĉu la ŝipo ne eksidos sur la sablaĵon (sabl'aĵ'o'n), se ni albordiĝos? – demandis mi.

– Estos facile movi ĝin de tie, – respondis li. – Dum malaltiĝo ĉirkaŭigu per ŝnurego iun el tiuj grandaj arboj; la finon prenu ĉi tien. Poste atendu la maraltiĝon. Kiam ĝi venos,

tuta ŝipanaro kaptas la ŝnuregon kaj tiras ĝin. Tiam la ŝipo mem deiros de la sablejo kiel junulino. Kaj nun, fileto, rigardu duokule. La ŝipo iras tro rapide. Tien, tiel, rekten, tien, rekten...rekten!

Li donis ordonojn kiujn mi plenumis rapide kaj ĝuste... Subite li kriis:

– Al la vento, amiko!

Mi per ĉiuj fortoj turnis la direktilon. «Hispanolo» turniĝis, kaj rapide ekproksimiĝis al bordo superkreskata per malaltaj arboj.

Mi estis tiel kaptita per ĉiuj ĉi agoj, ke tute ne pensis pri mia intenco pririgardi la maljunan matrosan. Mi pensis nur pri momento kiam la ŝipo tuŝos per sia fundo la sablon.

Tiel mi mortus, sed subita maltrankvilo igis min ekrigardi. Eblas ke mi ekaŭdis iun brueton, aŭ per flanko de la okulo ekvidis ion moviĝantan sed, rigardante, mi ekvidis Hends-on jam tute proksime al mi kun la tranĉilo en la mano. Niaj rigardoj renkontiĝis, kaj ni laŭte elkriis. Mi ekkriis pro la timego. Li ekmuĝis kiel maltrankvila bovo, kaj ĵetis sin antaŭen, sur min. Mi desaltis, kaj lasis el la manoj tiun parton de la velaro kiun mi tenis ĉi-momente. Tio savis mian vivon: la parto batis Hends-on, kaj li haltis. Antaŭ ol Hends sukcesis kompreni la okazaĵon mi el-

saltis el kaptejo en kiun li enigis min.

Nun mi povis kuradi laŭ tuta ferdeko; mi povis elturniĝi de li kiom mi volis. Antaŭ la granda masto mi haltis, eltiris la pistolon, direktigis ĝin, kaj... Hends iris rekte sur min, sed pafo ne okazis: la pulvo estis malseka. Kial mi ne reŝargis miajn pistolojn? Ja mi havis tute sufiĉe da tempo! Tiam mi ne starus kiel ĉedoma besto antaŭ la mortiganto.

Malgraŭ sia vundo Hends moviĝis mirinde rapide. La haroj falis sur lian ruĝan pro la peno vizaĝon. Mi ne havis tempon eltiri mian duan pistolon. Krom tio mi estis certa ke ankaŭ ĝi ne funkcias. Unu afero estis klara: mi devas iri malrekte. Se ne, li enigis min al malantaŭo, kiel antaŭnelonge enigis min antaŭen. Se li sukcesos en tio, la tuta tranĉilo eniĝos mian trunkon. Mi ĉirkaŭkaptis per la manoj la grandan maston, kaj atendis.

Vidante ke mi intencas elturniĝi, Hends haltis. Iom da tempo li montris ke li tuj ĵetos sin sur min. Tio similis al miaj iamaj apuddomaj kuradoj. Sed certe tiam mia koro neniam batiĝis tiel forte. Jes, nun mi estis pli moviĝema ol tiu ĉi maljuna maristo kun vundita piedo. Tial mi iom ekkuraĝis, kaj eĉ ekpensis per kio tio ĉi povas finiĝi.

«Certe», – pensis mi, – «mi povas teni min sufiĉe longe, sed finfine li, malgraŭ ĉio, finigos min...»

Dum ni staris unu kontraŭ la alia, «Hispanolo» subite entranĉiĝis en la sablon, kaj forte flankiĝis. Ni, preskaŭ kuniĝante, falis al la ŝiprando. La mortinto en la ruĝa kapvesto ankaŭ okazis tie. Mi forte batiĝis per la kapo je trunko de la maljuna matroso. Sed, malgraŭ la bato, mi sukcesis eksalti unua: sur Hends-on falis la mortinto.

La subita flankiĝo de la ŝipo faris kuradon sur la ferdeko neebila. Estis bezonate trovi iun alian eblon saviĝi, perdante eĉ ne eron da minuto, ĉar mia malamiko tuj ĵetiĝos sur min. Mi tre rapide kaptis la ŝnurŝtuparon (ŝnur'ŝtup'ar'o'n), kaj ekgrimpis supren. Mia rapideco savis min: sub mi denove ekvideblis la tranĉilo.

Pro la malsukceso Iser Hends mire rigardis min de malsupre. Mi ricevis iom da libera tempo. Ne perdante ĝin mi reŝargis (re'ŝarg'is) unun el la pistoloj. Poste, por plia certeco, – ankaŭ la alian.

Hends komencis kompreni ke ion li perdis. Post ioma pripenso li malfacile kaptis la ŝnurŝtuparon kaj, tenante la tranĉilon ne per la manoj, komencis malrapide supreniĝi, kun laŭtaj krietoj posttirante (post'tir'ant'e) la vunditan piedon.

Mi sukcesis reŝargi la pistolojn antaŭ ol li trairis trionon de la vojo. Tiam, tenante la pistolojn en la manoj mi ekparolis lin.



- Ankoraŭ unu paŝo, sinjoro Hends, - diris mi, - kaj ene de via kapo restos nenio! Mortaj, kiel vi scias, ne mortigas, - aldonis mi ridetante.

Li tuj haltis. Laŭ la vizaĝo mi rimarkis ke li pripensas ion. Sed pensis li tiel malfacile, tiel malrapide, ke mi, ĝoja pri mia sendanĝero, laŭte ekridis. Por ekparoli li elprenis (el'pren'is) la tranĉilon:

- Ĝim, - diris li, - kaj vi, kaj mi, ni faris multe da malĝustaj (mal'ĝust'a'j) aferoj. Ni devas ĉesi tion. Mi finigus vin, se ne tiu ĉi frapo. Jes, ĉiam io malhelpas al mi, ĉiam! Kion fari, mi, delonga maristo, devos obei ŝiplernanton.

Mi aŭskultis liajn vortojn, kaj ĝoje ridis. Mi sentis min kiel ĉedoma virbirdo, surfluginta barilon.

Sed subite li faris rapidan permanan movon. Io trafajfis kiel ĵetpikilo. Mi eksentis baton. Supro de mia mano okazis aligita al la masto. Pro terura sento kaj subito de la okazaĵo (okaz'aĵ'o), ne scias ĉu pripense aŭ neintence, mi elpafis el la du pistoloj. Ili tuj elfalis el miaj manoj. Sed falis ne nur ili: kun longa krio la maljuna matroso lasis la ŝnurŝtuparon, kaj per kapo suben falis en la akvon.

Pro la ŝipflankiĝo (ŝip'flank'iĝ'o) mi ekestis sidanta (sid'ant'a) super akvo de la golfo. Hends algrimpis malpli alten ol sidis

mi. Nur unufoje aperis li supre. Kiam la akvo trankviliĝis, mi ekvidis lin. Li kuŝis, kuntiriĝinte sur la pura sablo, proksime al la ŝipo. Iam, pro moviĝo de la akvo, ŝajnis ke ankaŭ li moviĝas kaj penas ekstari. Sed... li ekestis manĝo por fiŝoj sur sama loko kie li intencis vidi min.

Mi sentis min malbone. Varma sango fluis laŭ la trunko. La tranĉilo, kiu aligis (al'ig'is) supron de mia mano al la masto, bruligis. Sed ne tio timigis min. Min terurigis penso ke mi povas fali en tiun ĉi trankvilan akvon kie kuŝas la morta matroso. Per tuta mia forto kaptis mi la bastonegon sur kiu mi sidis, kaj fermis la okulojn por ne vidi la danĝeron. Sed iom post iom mia kapo klariĝis, la koro ekbatis pli trankvile, kaj mi revenis al mi mem.

Antaŭ ĉio mi penis eltiri la tranĉilon. Sed ĉu pro tio ke ĝi forte eniĝis (en'ig'is) la maston, ĉu pro mia portempa malforto mi, kun ekstremo ĉesis penojn eltiri ĝin. Sed ĝuste tiu ĉi trematako helpis al mi. La tranĉilo tuŝis la manon nur iomete, tial la ekstremo okazis liberiga. La sango ekfluis pli ol antaŭe, sed mi eksentis min libera. Certe miaj vestoj restis aligitaj (al'ig'it'aj) al la masto, sed mi liberiĝis ankaŭ de ili.

Sur la ferdekon mi revenis per aliflanka ŝnurŝtuparo (ŝnur'ŝtup'ar'o). Neniu forto igus min malsupreniĝi per ŝtupoj de kiuj falis Iser.

Mi eniris la kajuton por bandaĝi la vundon. Ĝi okazis nedanĝera, kaj ne malhelpis al mi movi la manon. Mi ĉirkaŭrigardis. Nun la ŝipo estis sole mia, do mi komencis pripensi kiel liberiĝi de morta O'Brajen. Kiel mi jam diris, li troviĝis ĉe la ŝiprando. Mi jam alku-timiĝis al mortintoj, kaj preskaŭ ĉesis timi ilin. Mi suprenigis lin, kaj ĵetis en la akvon. Kiam malklaraĵoj resurfundiĝis (re'sur'-fund'iĝ'is), mi ekvidis kaj O'Brajen-on kaj Iser-on. Ili kuŝis apude. Kapo de O'Brajen, malgraŭ ties juneco, estis tute senhara. Ĝi kuŝis sur trunko de la mortiganto. Rapidaj fiŝetoj preteriris la duopon.

Mi restis sola sur la ŝipo. Komenciĝis mara malaltiĝo. Suno staris jam tre malalte. Venis vespera marvento kaj, kvankam de oriento la golfon gardis monteto kun du suproj, la ŝnuraro kaj la veloj komencis brui. Mi ekvidis ke tio danĝerigas la ŝipon, tial mi mal-suprenigis velojn kiujn mi povis malsuprenigi. Kion fari, mi devis lasi «Hispanolo»-n al tio kio atendas ĝin. Ja ankaŭ mi estis lasita al tio.

Vesperiĝis. Lastaj lumoj de suno, trabatinte la arbarmaldensejon (arb'ar'mal'dens'e-j'o'n), lumigis la florantan rompitan trimastulon. Iĝis malvarme. La akvo, fortirata per la mara malaltiĝo, komencis foriri. La ŝipo pli kaj pli turniĝis sur sia flanko.

Mi venis antaŭan parton de la ŝipo, kaj ekrigardis malsupren. La marfundo estis tre proksima. Mi per la du manoj kaptis la ŝnuregon, malsupreniĝis (mal'supr'e'n'iĝ'is), kaj venis al la bordo, lasante «Hispanolo»-n kuŝi sur la flanko kun unu el la veloj en la akvo. Suno subiris, kaj inter la arboj bruis vento.

Do, ankaŭ tio finiĝis. Finiĝis per sukceso: la ŝipo estas elkaptita el manoj de la rabistoj, kaj ni povas eĉ nun iri per ĝi en la maron. Mi volis rapide reveni en nian fortikejon kaj rakonti al ĉiuj pri la okazaĵoj. Verŝajne oni iom insultos min pro la memvola foriro, sed kupto de «Hispanolo» estas bonega afero; eĉ ŝipestro Smolet devos diri ke mi tute ne perdis la tempon. Pensante tiel, kun bonegaj sentoj iris mi por veni al la arbotrunka barilo post kiu, mi pensis, atendas min miaj amikoj.

Mi bone memoris ke pli orienta el la du riveretoj, enfluantaj golfon Ŝipestro Kid, komenciĝas ĉe Dukapa monteto. Tial mi turniĝis al ĝi, esperante (esper'ant'e) transiri la rivereton. Mi venis al loko kie mi renkontis Ben Gan-on, kaj ekiris singarde, rigardante ĉiuflanken.

Estis preskaŭ mallume. Irante inter du suproj de la monteto mi ekvidis relumon de fajro. Mi decidis ke, verŝajne, Ben Gan kuiras sian vespermanĝon, kaj ekmiris pri lia nesin-

gardemo (ne'sin'gard'em'o). Se ĉi-relumon vidas mi, ankaŭ Silver povas vidi ĝin el sia noktejo ĉe la marĉo.

La nokto iĝis pli kaj pli malluma. Dukapa monteto malantaŭe, kaj supro de Velo al mi kiel solaj vojmontriloj, sed ili pli kaj pli malklariĝis en la mallumo. Malforte lumis, tremante, malmultaj steloj. La iro estis malfacila. Subite ekestis iom pli lume. Mi ekrigardis supren. Tra la arbara densaĵo mi ekvidis ion grandan, kaj komprenis ke supreniras luno. Ekestis multe pli facile iri, kaj mi ekrapidigis la paŝadon (paŝ'ad'o'n). Tempo de tempo mi eĉ kuris, tiel mi deziris pli rapide veni al la barilo. Sed, enirante la arbareton, ĉirkaŭantan (ĉirkaŭ'ant'a'n) nian fortikejon, mi ekmemoris pri singardo, kaj ekiris ne tiel rapide: malgaje finiĝos miaj aferoj se mi, erare opiniata esti malamiko, estos mortpafita per la amikoj.

Luno supreniĝis pli kaj pli. Ĉiuj arbaraj maldensejoj ekestis lumigitaj per ĝi. Sed rekte antaŭ mi, inter la arboj, mi rimarkis lumon tute ne similan al la luna. Ĝi estis varma, ruĝa, kaj iam, ŝajne, iom lumiĝis-mallumiĝis. Verŝajne tio bruletas restaĵoj de fajro. Sed kio okazas tie? Fine mi venis al rando de la arbareto. Okcidenta flanko de la barilo estis lumigita per luno. Ĉio alia, kaj la domo mem, troviĝis en mallumo. Post la domo finbrulis

grandega fajro. Videblis neniu. Silento. Nur vento bruis inter la arboj. Mi haltis mirigita kaj, eble, iom timigita. Ni neniam ordigis grandajn fajrojn. Laŭ ordono de la ŝipestro ni gardis la brulaĵojn. Tial mi ekmaltrankvilis, ĉu ne okazis io al miaj amikoj dum mia foresto. Mi kaŝe iris al orienta flanko de la fortikejo, ĉiam tenante min en mallumo, kaj transgrimpis la barilon en loko kie la mallumo estis plej densa. Mi singarde proksimiĝis al la domo, kaj subite trankviliĝis.

Mi ne ŝatas bruojn kiujn eligas dormantoj; min turmentas homoj kiuj faras tion. Sed ĉi-foje laŭta kaj trankvila dormobruo de miaj amikoj ŝajnis al mi ege plaĉa. Ĝi trankviligis min, kiel trankviligas ene de maro nokta krio de gardanto: «Ĉio estas en ordo!»

Unu afero estis klara al mi: gardado ĉe ili estas malbonega. Se tio estus ne mi sed Silver kun siaj rabistoj, neniu el miaj amikoj ekvidus la mateniĝon. «Verŝajne», – pensis mi, – «ĉio ĉi okazis pro vundiĝo de la ŝipestro». Kaj mi denove insultis min pro tio ke mi lasis la amikojn kiam ili havas neniun eĉ por ordigi la gardadon.

Mi venis al la pordo, kaj enrigardis enen. Tie estis tiel mallume, ke mi vidis nenion. Krom dormobruoj aŭdiĝis ankaŭ iuj aliaj sonoj: ĉu frapoj, ĉu frapetoj. Kun manoj antaŭen mi eniris la domon. «Mi kuŝos sur mian

kutiman lokon», – pensis mi, ridetante, – «kaj matene ĝojos, rigardante iliajn mirigitajn vizaĝojn». Mi trafis iun dormanton. Li turniĝis sur alian flankon, sed ne eldormiĝis.

Subite en la mallumo ekaŭdiĝis tranĉa krio: «moneroj, moneroj, moneroj!»

Sed tio estas Ŝipestro Flint, papago de Silver! Tio estas ĝi kiu frapis per la flugiloj. Jen kiu gardis la dormantojn pli bone ol iu ajn gardisto. Jen kiu per sia krio sciigis pri mia apero!

Mi ne havis tempon forkuri. Aŭdante tranĉan krion de la papago la dormantoj eksaltis. Ekaŭdiĝis voĉo de Silver. Post insultaj vortoj li kriis:

– Kiu iras?

Mi ĵetis min al la pordo, sed trafis iun; desaltis, kaj trafis en manojn de iu alia. Tiu forte kaptis min.

– Nu, Dik, alportu ĉi tien brulantaĵon, – diris Silver.

Unu el la rabistoj elkuris el la domo, kaj revenis kun lumigilo.

Ruĝa lumo de la brulantaĵo eklumigis la ĉambregon, kaj ĉiuj plej malbonaj miaj timoj okazis veraj: la piratoj tenis la fortikejon kaj ĉiujn niajn manĝeblaĵojn. La bareleto kun rumo, kaj ĉio alia, troviĝis sur samaj lokoj. Al mia teruro mi rimarkis neniun malliberulon. Verŝajne ĉiuj miaj amikoj estas jam mortaj.

Kial mi ne mortis kune kun ili!..

Nur seso da piratoj restis vivaj, kaj ili ĉiuj estis ĉi tie, antaŭ mi. Kvino da ili, kun ruĝaj pro ĉiama ebriiĝo vizaĝoj, jam staris sur la piedoj. La sesa nur iom supreniĝis de sia kuŝejo. Li estis morte blanka. Lia kapo estis ĉirkaŭbandaĝita (ĉirkaŭ'bandaĝ'it'a). Do li estas vundita, kaj vundita antaŭnelonge. Mi ekmemoris ke dum la batalo ni pafe trafis unun el la piratoj, kiu poste malaperis en la arbaro. Verŝajne tio estas li.

La papago sidis sur Longa Ĝon, kaj purigis la flugilojn. Silver estis pli malgaja ol antaŭe. Li ĝis nun portis la saman veston en kiu li aperis ĉe ni por la interparolo, sed nun ĝi estis malpura.

– Hej, – diris li, – ja tio estas Ĝim Hokins! Venis por esti gasto, ĉu? Eniru, eniru, tio estas tre bona ago de via flanko. – Li sidis sur la bareleto. – Dik, enigu la brulantaĵon (brul'ant'aĵ'o'n) inter arbotrunkoj de la muro. Kaj vi, ĝentlemanoj, kuŝu, ne turmentu vin. Vi tute ne devas stari rektiĝinte antaŭ sinjoro Hokins. Do, Ĝim, – daŭrigis li, – vi estas ĉi tie. Mi de unua rigardo vidis ke vi estas scipova knabo, sed nun mi vidas ke vi estas eĉ kuraĝulo.

Certe mi eĉ ne unu vorton diris por la respondo. Ili starigis min ĉe muro, kaj mi staris rekte, penante kiel eble trankvile rigardi



vizaĝon de Silver. Sed en mia koro mi sentis malesperon.

– Se vi venis al ni por esti gasto, Ĝim, – daŭrigis Silver, – mi diros al vi kion mi pensas. Vi ĉiam estis bona al mia koro, ĉar vi ne estas timulo. Rigardante vin mi rememoras tempon kiam ankaŭ mi estis same juna. Mi ĉiam volis ke vi venu al ni, ricevu vian parton de la trezoroj, kaj vivu estante multhava ĝentlemano. Kaj jen, fileto, finfine vi venis. Ŝipestro Smolet estas bona maristo, tion mi diris ĉiam, sed li volas tro multe de siaj subuloj. «Devo antaŭas ĉion», – diras li. Ankaŭ la kuracisto ne ŝatas vin post kion vi faris. Do, al viaj amikoj vi jam ne povas reveni: ili ne prenos vin. Tial, se vi ne volas ordigi iun trian opon, vi devas kuniĝi kun ŝipestro Silver.

Nu, ne tiel malbone: tio montras ke miaj amikoj vivas. Kaj, kvankam mi estis preta kredi al Silver ke ili malkontentas pro mia forkuro, mi ekĝojis.

– Mi eĉ ne parolas pri tio ke vi troviĝas en niaj manoj, – daŭrigis Silver, – ja vi mem vidas tion. Mi ne ŝatas timigi. Do, se vi volas, aliĝu (al'iĝ'u) al ni libervole. Sed se tio ne plaĉas al vi, Ĝim, vi povas libere diri «ne». Libere, nenion timante. Vi ja vidas kiel bone mi konversacias kun vi.

– Ĉu vi volas ke mi respondu? – demandis mi per tremanta voĉo.

En lia rideta parolo mi sentis mortan danĝeron. Mia vizaĝo flamis, la koro terure batiĝis.

– Neniu devigas vin, amiketo, – diris Silver. – Pripensu la aferon bone. Ni ne havas kien rapidi.

– Bone, – diris mi, iom pli kuraĝe, – se vi volas ke mi decidu sur kiun flankon mi iru, vi devas klarigi al mi kio okazas, kial vi estas ĉi tie, kaj kie estas miaj amikoj.

– Kio okazas? – diris malgaje unu el la piratoj. – Multon mi donus, por kompreni kio okazas ĉi tie...

– Silentaĉu, ĝis oni demandas vin! – insulte interrompis lin Silver, kaj poste, kun sama ĝentlemaneco, li denove turniĝis al mi. – Antaŭ nelonge, sinjoro Hokins, – diris li, – venis al ni kuracisto Livsi kun blanka flago. «Viaj homoj lasis vin, ŝipestro Silver», – diris li, – «la ŝipo foriris». Jes, dum ni drinkis rumon kaj kantis kantojn, la ŝipo malaperis. Mi ne povas nei tion. Neniu el ni pririgardis ĝin. Ni elkuris al la bordo, kaj preskaŭ falis surloke. «Do», – diris la kuracisto, – «ni interkonsentu». Kaj ni interkonsentis, mi kaj li. Ni ricevis viajn manĝeblaĵojn, vian rumon, vian fortikejon, kaj la brulaĵojn, kiujn vi tiel antaŭvide (antaŭ'vid'e) kunigis ĉi tie; do ĉion. Kaj ili foriris. Kie ili estas nun mi ne scias.

Sed ankaŭ vin ni enigis en la interkonsenton, – daŭrigis Silver. – Jen lastaj vortoj de la kuracisto: «Kiomope vi foriras?» – demandis mi. – «Kvarope», – respondis li, – «kaj unu el ni estas vundito. Kie estas tiu ĉi knabaĉo mi ne scias, kaj scii ne volas», – diris li, – «ni estas jam tute sataj pri li». – Jen estas liaj vortoj.

– Ĉu tio estas ĉio? – demandis mi.

– Ĉio kion vi devas scii, fileto.

– Kaj ĉu nun mi devas decidi?

– Jes, nun vi devas decidi, – diris Silver.

– Bone, – diris mi, – mi ne estas tiel malsaĝa, kaj scias kio atendas min. Faru pri mi kion vi volas. Al mi tio ne gravas. De tempo kiam mi renkontis vin mi al kutimiĝis rigardi en okulojn de morto. Sed antaŭe mi volas ion diri al vi, – daŭrigis mi. – Estas malbone, tre malbone al vi. Vi perdis la ŝipon, vi perdis la trezorojn, vi perdis viajn homojn. Via afero estas senespera. Se vi volas scii kiu faris ĉion ĉi, do sciu: ĉion faris mi, kaj neniu alia. Mi sidis en la barelo por pomoj en nokto kiam ni alproksimiĝis la insulon, kaj mi aŭdis ĉion kion diris vi, Ĝon, kaj vi, Dik Ĝonson, kaj kion diris Hends, kiu kuŝas nun sur mara fundo. Ĉion kion mi aŭdis mi transdonis dum la sama horo. Tio estas mi kiu fortranĉis la ankran ŝnuregon de la ŝipo. Tio estas mi kiu mortigis la homojn kiujn vi lasis sur ĝi. Tio

estas mi kiu enigis la ŝipon en lokon kie vi neniam trovos ĝin.

Do malbonaj estas ne miaj sed viaj aferoj, kaj mi tute ne timas vin. Vi povas mortigi aŭ liberigi min, kiel vi volas. Sed nun mi diros ankoraŭ ion, kaj sufiĉas.

Se vi lasos min viva, mi penos savi vin, kiam vi staros antaŭ pendumilo pro viaj pirataj agoj. Nun decidu. Mia morto alportos neniun bonon al vi.

Mi eksilentis. Al mia miro neniu el ili eĉ moviĝis de la loko. Ili rigardis min kiel bovoj. Ne ricevinte respondon mi daŭrigis:

- Al mi ŝajnas, sinjoro Silver, ke vi estas estro ĉi tie. Se mi mortos, rakontu al la kuracisto ke mi mortis estante viro.

- Mi pripensos tion, - diris Silver per tia voĉo ke mi ne povis kompreni ĉu li priridas (pri'rid'as) min, aŭ ĉu plaĉas al li mia kuraĝo.

- Memoru, - kriis maljuna matroso, nomo de kiu estis Morgan, kaj kiun mi vidis en drinkejo de Longa Ĝon en Bristola ŝiphaltejo, - tio estas li kiu rekonis tiam Nigran Hundon!

- Ankaŭ tio ne estas ĉio, - aldonis Silver, - li estas sama knabaĉo kiu prenis la mapon el havaĵujo de Bili Bons. Finfine Ĝim Hokins trafis niajn manojn!

- Ellasu lian sangon! - kriis Morgan, insultante.

Li eltiris la tranĉilon, kaj eksaltis kun tia

facileco kvazaŭ li estus dudekjarulo.

– Al la loko! – kriis Silver. – Kio vi estas, Tom Morgan? Eble vi opinias ke ŝipestro ĉi tie estas vi? Mi instruos vin obei! Ne penu stari kontraŭ mi! Dum lastaj tridek jaroj ĉiu kiu staris sur mia vojo trafis pendumilon aŭ ekestis fiŝa postmanĝo. Memoru, Tom Morgan: ĝis nun neniu restis viva post kontraŭstari min.

Tom eksilentis, sed aliaj daŭrigis paroli:

– Tom diras veron, – diris unu.

– Sufiĉe da estroj estis super mi, – aldonis alia, – mi ne donos al vi fari kion vi volas, Ĝon Silver.

– Ĝentlemanoj, kiu el vi volas amike konversacii kun mi? – ekmuĝis Silver. Li sidis sur la bareleto. – Nu, kion vi bezonas? Diru rekte. Aŭ vi perdis paroleblecon (parol'eb'lec'o'n)? Eliru, kiu volas, mi atendas. Ne por tio mi vivis multajn jarojn, ke iu ebrulo staru sur mia vojo. Vi konas niajn kutimojn. Vi opinias vin ĝentlemanoj de bonokazo. Bone, eliru, mi pretas. Kiu havas sufiĉe da kuraĝo, eligu sian tranĉilon, kaj mi, kvankam sur la bastono, pririgardos kio estas ene de li.

Neniu moviĝis. Neniu respondis.

– Ĝuste tiel vi agas ĉiam, – daŭrigis Silver. – Kuraĝuloj, ĉu! Ne tro kuraĝaj en batalo. Aŭ vi ne povas kompreni homan parolon? Ja mi, mi estas ĉi tie ŝipestro: vi nomis min

tia. Mi estas via ŝipestro, ĉar de iu ajn el vi ĝis mi – bona mara mejlo. Vi ne volas batali kontraŭ mi, kiel kutimas ĉe ĝentlemanoj de bonokazo. Tial obeu min! Al mi plaĉas tiu ĉi knabaĉo. Tian mi ankoraŭ ne vidis. Li multe pli similas viron ol timuloj kiel vi. Tial aŭskultu: kiu tuŝos lin, havos aferon kun mi.

Venis longa silento. Mi, rektiĝinte, staris apud la muro. Mia koro ankoraŭ batis forte, sed ĉe mi aperis espero. Silver sidis, kaj estis ege trankvila; nur per flankoj de la okuloj pririgardis li sian malobeeman anaron (an'ar'o'n).

Piratoj venis en malproksiman parton de la ĉambro, kaj komencis konversacii. Ilia konversacio sonis kiel brueto de rivero. Iam ili returnis, kaj ruĝa lumo de la brulantaĵo falis sur iliajn vizaĝojn. Sed rigardis ili ne min, ili rigardis Silveron.

– Ŝajne vi intencas ion diri al mi? – demandis Silver. – Do parolu, mi aŭskultas.

– Sinjoro, – komencis unu el la piratoj, – vi multfoje rompis niajn kutimojn. Sed estas kutimo kiun ankaŭ vi ne povas rompi. Anaro kontraŭas kaj, mi diru, tiu ĉi anaro havas samajn eblecojn kiel ĉiu alia. Ni havas povon kunveni kaj interparoli. Vi, sinjoro, estas nia estro, sed mi, laŭ miaj povoj, volas eliri por partopreni la kunvenon.

Post tiuj ĉi vortoj tiu alta matroso pli-

malpli tridekjara, kun malbonkora vizaĝo, trankvile ekiris al la eliro, kaj malaperis post la pordo. Aliaj eliris post li. Ĉiu el ili diris ion al Silver:

– Laŭ kutimo, – diris unu.

– Al matrosa kunveno, – diris Morgan.

Mi kaj Silver restis duope, lumigitaj per la brulantaĵo.

– Aŭskultu, Ĝim Hokins, – diris la ŝipkuiristo per preskaŭ neaŭdebla mallaŭto, – vi troviĝas ege proksime al morto, kaj al io eĉ pli terura: al turmentoj. Ili volas depreni mian estrecon. Sed vi rimarku: mi ne lasos vin. Komence mi ne volis vin gardi, sed vi diris kelkajn vortojn, kaj mi aliigis miajn intencojn. Mi estis senespera pro miaj malsukcesoj kaj pro pensoj pri pendumilo kiu danĝerigas min. Aŭdante viajn vortojn mi diris al mi: gardu Hokins-on, Ĝon, kaj Hokins gardos vin. Vi estas lia lasta espero, Ĝon, kaj li estas via lasta espero, decidis mi. Vi savos al si helpanton, kiam la afero venos ĝis pendumilo.

Mi komencis kompreni lian intencon.

– Ĉu vi volas diri ke vi perdis ĉion? – demandis mi.

– Jes, – respondis li. – Se forestas ŝipo, tio montras ke restas nur pendumilo. Kiam mi ekvidis ke la ŝipo forestas, mi komprenis: ni perdis ĉion. Kaj tiuj ĉi, ili parolaĉu. Ili ĉiuj es-

tas nur senkapaj timuloj. Mi penos savi vian vivon. Sed aŭskultu, Ĝim, ago kontraŭ ago: vi savos Longan Ĝonon de pendumilo.

Mi estis miregita (mir'eg'it'a). Ĉe kiun espereton kaptiĝas tiu ĉi maljuna pirato, tiu estro!

– Mi faros ĉion kion mi povos, – diris mi.

– Bonege, – kriis li. – Do estas ebleco ke min oni ne pendumos. Komprenu min, Ĝim, – daŭrigis li, – mi ankoraŭ havas kapon sur la trunko, kaj mi decidis transiri flankon de sinjoro Treloni. Mi scias ke vi kaŝis la ŝipon en iu sendanĝera loko. Kiel vi faris tion mi ne scias, sed mi estas certa ke la ŝipo estas navigebla. Hends kaj O'Brajen okazis malsaĝuloj. Mi neniam fidis ilin. Rimarku: mi pri nenio demandas vin, kaj al aliaj ne donos demandi. Mi vidas kiam miaj aferoj iĝas malbonaj, estu certa, kaj veran homon mi ankaŭ vidas tuj... Eĥ, kun viaj junaj fortoj, kaj miaj vivoscioj ni kune farus multajn aferojn!

Li prenis iom da rumo el la bareleto.

– Ĉu vi volas drinki, amiko? – demandis li.

Mi neis.

– Sed mi drinkos, Ĝim, – diris li, – antaŭ mi staras tiaj malfacilaĵoj ke mi devas plifortigi min! Bonokaze, kial la kuracisto fordonis al mi la mapon, amiko Ĝim?

Sur mia vizaĝo aperis tia miro ke, li kom-



prenis min.

- Jes, li donis al mi la mapon... Kaj ĉi tie kaŝas io, Ĝim...

Li denove eldrinkis la rumon, kaj movis sian grandan kapon kiel homo atendanta malbonon.

Kunveno de la piratoj daŭris jam multe da tempo, kiam unu el ili revenis en la domon kun peto preni la brulantaĵon. Silver konsentis, kaj la sendito foriris, lasinte nin en mal-lumo.

- Proksimiĝas maltrankvilego, Ĝim, - diris Silver. - Li parolis kun mi amike.

Mi venis al proksima paffenestreto, kaj elrigardis la apuddoman ejon. La fajro preskaŭ ĉesiĝis. Lumon ĝi donis jam neniun. Ne mirindas ke la kunvenantoj bezonis la brulantaĵon. Ili staris inter la domo kaj la barilo. Unu el ili tenis la brulantaĵon, alia sidis sur la tero; en lia mano estis malfermita tranĉilo, lumigita ĉu per luno, ĉu per la brulantaĵo. Aliaj iom malsupreniĝis, kvazaŭ rigardante kion tiu faras. En manoj de la sidanto aperis libro. Mi eĉ ne sukcesis ekpensi de kie ili prenis tiel nekutiman por rabistoj aĵon, kiam la sidanto supreniĝis, kaj ĉiuj kune ekiris al la domo.

- Ili iras, - diris mi, kaj revenis la antaŭan lokon. Mi ne volis ke la piratoj rimarku

ke mi pririgardis ilin.

- Bonvenon (bon'ven'o'n), amiketo, ili iru!  
- gaje diris Silver. - Mi ankoraŭ havas per kio renkonti ilin.

La pordo malfermiĝis, kaj kvino da piratoj nedecide kuniĝis ĉe la eniro, igante iun el ili iri antaŭen. La sendito iris malrapide kaj timeme, haltante post ĉiu paŝo, kaj tenante ion en la mano.

- Venu pli proksimen, amiko, - diris Silver, - kaj ne timu: mi ne formanĝos vin. Donu kion estas ĉe vi. Mi konas kutimojn. Al sendito mi faros neniun malbonon.

Kuraĝigita per tiuj vortoj, la rabisto plirapidigis la paŝojn kaj, enigante ion en manon de Silver, ekrapidis reveni al siaj kunuloj.

La ŝipkuiristo enrigardis sian manon.

- Nigra skribaĵo! Ĝuste pri tio mi pensis, - diris li. - Kie vi prenis paperon?.. Sed kio estas tio? Aĥ vi malfeliĉaj! Vi eltranĉis tion el Libro! Nu, vi ricevos pro tio! Kiu malsaĝulo tranĉis la Libron?

- Ĉu vi vidas! - diris Morgan. - Kion mi diris? Nenio bona venos el tio.

- Jes, nun vi ne elturniĝos de pendumilo, - daŭrigis Silver. - De kiu malsaĝulo vi prenis tiun ĉi Libron?

- De Dik, - diris iu.

- De Dik? Nu, Dik, petegu Ĉielon, - ĉar via kanto estas finita. Veron mi diras al vi.

Sed tiam ekparolis la grandegulo.

- Sufiĉas parolaĉi, Ĝon Silver, - diris li, - la anaro, kiel ordonas kutimo de ĝentlemanoj de bonokazo, decidis sendi al vi nigran sciigaĵon. Legu kio estas skribita tie. Tiam vi parolos alie.

- Tre bone, Ĝorĝ, - respondis Silver, - vi estas ĉe ni aferulo, kaj konas niajn kutimojn. Do kio estas skribita ĉi tie? Ha! «Forigita» (for'ig'it'a). Jen kio! Kaj kiel bonas la skribo! Kiel en libro. Ĉu tio estas vi kiu scipovas skribi tiel, Ĝorĝ? Ja vi, frato, intencas esti unua ĉi tie. Mi ne miros se nun oni faros vin ŝipestro.

- Hej, - diris Ĝorĝ, - ne malhelpu al decido de la anaro. Se oni aŭskultas vin, vi estas kaj tia, kaj alia, sed nun via kanto finiĝis. Deiru de la barelo, kaj obeu la decidon!

- Sed mi opiniis ke vi vere konas kutimojn, - respondis Silver, - sed tio ne gravas: se vi ne konas, - mi konas ilin. Vi iom atendu, ĉar mi ĝis nun estas via ŝipestro. Via devo estas klarigi al mi kion vi havas kontraŭ mi, kaj aŭskulti miajn respondojn. Ĝis tiam via nigra skribaĵo tute ne gravas. Ni vidu kio okazos el tio.

- Ne timu, ni ne rompos la kutimojn, - respondis Ĝorĝ, - do tiel:

Unue, vi disfalis la tutan aferon. Vi ne havos sufiĉe da kuraĝo kontraŭdiri tion.

Due, vi donis al niaj malamikoj foriri, kvankam ili estis ĉi tie en vera kaptilo. Kial ili volis foriri mi ne scias. Sed estas klare ke pro io ili volis tion.

Trie, vi ne donis al ni postkuri ilin. Ho, ni vidas vin tutan, Ĝon Silver! Vi rigardas du flankojn.

Kvare, vi gardas tiun ĉi knabaĉon.

- Ĉu tio estas ĉio? - trankvile demandis Silver.

- Tute sufiĉas, - respondis Ĝorĝ. - Pro viaj eraroj oni pendumos nin sekiĝi sub suno.

- Nun aŭskultu kion mi respondos. Mi faros tion laŭorde. Vi diras ke mi disfalis la tutan aferon, ĉu? Sed vi ja scias kion mi volis. Se vi obeus min, ni ĉiuj manĝus nun bongustaĵojn, kaj tuta nia oro bonorde troviĝus jam sur nia «Hispanolo»! Sed kiu malhelpis al mi? Kiu rapidigis min, vian ŝipestron? Kiu sendis al mi nigran skribaĵon eĉ en unuan tagon de nia veno al la insulo, kaj komencis tutan tiun ĉi malordaĉon (mal'ord'aĉ'o'n)? Kiu komencis tion? Ender-son, Hends kaj vi, Ĝorĝ Meri. El tiuj ĉi malobeantoj nur vi restis viva. Kaj nun vi grimpas esti ŝipestro. Vi, pro kiu falis preskaŭ tuta nia afero! Ne, kiom mi vivas, mi ne vidis ion similan!

Silver eksilentis. Laŭ vizaĝo de Ĝorĝ, kaj de la aliuloj mi vidis ke vortoj liaj ne

perdiĝis.

- Tio estas unua respondo! - kriis Silver. Li sonis tiel ke la muroj tremis. - Estas aĉe konversacii kun vi. Vi ne havas saĝon, vi ne havas memoron. Mi miras ke viaj patrinoj lasis vin iri en maron! Ĉu vere vi estas ĝentlemanoj de bonokazo? Pli bone vi estus laboristoj!

- Ĉesu la insultojn, - diris Morgan, - respondu pri aliaj aferoj.

- Ha, pri aliaj! - kriis Ĝon. - Ankaŭ la aliaj estas bonaj. Vi diras ke nia afero disfalis. Sed vi eĉ ne komprenas kiel proksimaj ni estas al pendumilo! Ni estas tiel proksimaj ke mi jam sentas ĝin. Mi jam vidas kiel ni pendas, kaj super ni ĉirkaŭflugas grandaj nigraj birdoj. Maristoj montras nin, dum nin oni forportas pli kaj pli malproksimen; tien, de kie oni ne revenas. «Kiu estas tio?» - demandas iu. - «Tio estas Ĝon Silver. Mi bone konis lin», - respondas alia. Jen kio povas veni al ĉiu el ni pro Ĝorĝ Meri, Hends, Enderson, kaj aliaj malsaĝulaĉoj!

Kaj nun pri kvara afero, pri tiu ĉi knabaĉo. Sed li estas ja nia lasta espero. Ĉu mortigi lin? Ne, amikoj miaj, mi ne faros tion. Multon, tre multon ricevos ni kontraŭ li. Interalie, mi ankoraŭ ne parolis pri la afero tria. Bonege, mi parolos pri ĝi. Eble por vi tute ne gravas ĉiutagaj venoj de kuracisto, de ku-

racisto kiu lernis en altlernejo! Ĉu al via trapafita kapaĉo, Ĝon, jam ne estas bezonata kuracisto?

Kaj vi, Ĝorgo Meri, kiun nur antaŭ ses horoj frapis tremiga malsano, – ĉu vi ne volas esti kuracata? Ĉu vi ne scias ke ĉi tien devas veni dua ŝipo por helpo? Sed ĝi post nelonge venos. Jen kiam ni bezonos la knabaĉon.

Poste afero dua: vi diras ke mi faris interkonsenton. Sed vi mem petegis min fari ĝin! Vi timis morti pro malsato, kaj mortus pro ĝi, se ne mi... Sed ne tio gravas. Rigardu: jen por kio mi interkonsentis!

Kaj li ĵetis al ili paperon. Mi tuj rekonis ĝin. Tio estis mapo kun tri ruĝaj krucetoj (+++), kiun mi trovis iam sur fundo de havaĵujo de Bili Bons. Mi tute ne povis kompreni kial la kuracisto fordonis ĝin al Silver.

Apero de tiu ĉi mapo mirigis la rabistojn eĉ pli ol min. Ili ĵetis sin al ĝi kiel malsataj lupoj. Ili elkaptis ĝin unu de alia kun insultoj, krioj, kaj infana rido. Oni povus pensi ke ili ne nur tuŝas la oron per la manoj, sed jam finis transporti ĝin sur la ŝipon.

– Jes, – diris iu, – tio estas subskribo (ŝub'skrib'o) de Flint, mi bone konas ĝin.

– Bonege, – diris Ĝorgo, – sed kiel ni forveturigos la trezorojn, se ni ne havas ŝipon?

Silver subite eksaltis, tenante la manon

sur la muro.

- Lastfoje mi konversacias kun vi, Ĝorĝ! - kriis li. - Ankoraŭ unu kontraŭa vorto, kaj mi albatalos vin... Kiel? De kie mi scias kiel! Tion vi diru al mi; vi kaj aliaj, kiuj perdis nian ŝipon! Sed ne, mi ne atendas de vi saĝan vorton: via kapo tute ne havas saĝon! Sed parolu kiel vi devas paroli, se ne, mi instruos vin fari tion!

- Vere, - diris maljunulo Morgan.

- Certe! - aldonis la ŝipkuiristo. - Vi perdis nian ŝipon. Mi trovis al vi la trezorojn. Kiu el ni faris pli? Sed ne, nun mi ne volas esti via ŝipestro. Prenu kiun vi volas. Por mi sufiĉas!

- Silver! - kriaĉis ĉiuj. - Piedulon por ĉiam! Piedulon en la ŝipestro!

- Jen kion vi ekkantis nun! - kriis la kuiristo. - Ĝorĝ, amiko mia, vi devos atendi ĝis alia okazo. Via feliĉo ke mi estas homo bonkora. Sed kion ni faru kun tiu ĉi nigra skribaĵo, amikoj? Ĝi, ŝajne, ne estas nun bezonata. Dik perdis ion senmortan eltranĉinte parton de sia Libro... Por kio?

- Sed eble tiu ĉi Libro ankaŭ nun povas esti bona por io? - demandis Dik, kiun ŝajne tre maltrankviligis ties faro.

- Libro, parto de kiu estas fortranĉita! - teruriĝis Silver. - Nun ĝi estas ne pli grava ol iu kantaro (kant'ar'o).

– Ankaŭ kantaro povas venigi bonon, – diris Dik.

– Prenu tion, Ĝim, kiel memoraĵon, – diris Silver, donante al mi la nigran skribaĵon.

Ĝi ne estis granda. Unu ĝia flanko estis blanka: Dik eltranĉis lastan parton de la Libro; sur alia ĝia flanko videblis kelkaj vortoj. En mian memoron entranĉiĝis tri el ili: «hundoj kaj mortigistoj». Tiu ĉi flanko estis nigrigita per brulrestaĵoj, kiuj malpurigis mian manon. Sur la pura flanko, ankaŭ per brulrestaĵoj, estis skribita nur unu vorto: «Forigita». Nun tiu ĉi nigra skribaĵo kuŝas antaŭ mi, sed la surskribo (sur'skrib'o) estas jam preskaŭ nelegebla.

Tiel finiĝis okazaĵoj de tiu ĉi nokto. Drinkinte rumon ni ekdormis. Silver igis Ĝorgon Meri esti gardanto, kaj diris ke li estas mortigota (mort'ig'ot'a = oni mortigos lin), se li preterrigardos ion.

Mi longe ne povis fermi la okulojn. Mi pensis pri homo kiun mi mortigis, pri danĝero en kiu mi troviĝas, kaj antaŭ ĉio pri faroj de Silver, kiu per unu mano tenas aron da rabisoj, kaj per la alia kaptas ĉion eblan kaj neeblan por savi sian vivon.

Li trankvile kaj brue dormis. Sed mi pensis per kiuj danĝeroj li estas ĉirkaŭigata, kaj kiu malbona postmorta vivo atendas lin.



Min eldormigis (pli ĝuste nin ĉiujn eldormigis, ĉar eksaltis eĉ gardisto, dormetanta ĉe la pordo) klara laŭta voĉo, sonanta el la arbarrando:

– Hej, anaro, eldormiĝu! Kuracisto iras!

Kaj vere, tio estis la kuracisto. Mi ekĝojis, aŭdante lian voĉon, sed al mia ĝojo aldoniĝis malbonaj sentoj. Mi ekmemoris mian neobeon, mian forkuron de la amikoj. Kaj al kio venigis ĉio ĉi? Al tio ke mi estas kaptita per la rabistoj kiuj ĉiuminute povas ĉesi mian vivon. Estis malfacile al mi rigardi okulojn de la kuracisto.

La kuracisto, verŝajne, eldormiĝis ĝis lumigo, ĉar tago nur komenciĝis. Mi alkuris fenestreton, kaj elrigardis. Li staris malsupre, sur sama loko kie iam staris Silver.

– Bonan matenon, sinjoro! – kriis Silver, ridetante. – Ĝorĝ, helpu al kuracisto Livsi suriri la ferdekon... Ĉio estas en ordo, kuracisto. Viaj malsanuloj estas multe pli gajaj ol antaŭe!

Tiel li parolis, starante sur supro de la monteto kun la bastono submane; tute sama Ĝon, laŭ ties voĉo kaj rido.

– Ni ja havas iun bonan novaĵon por vi, sinjoro, – daŭrigis li, – unu malgranda alveninto, ha-ha-ha! Nova loĝanto, sinjoro! Li dormas kiel birdeto, kreu al mi. La tutan nokton dormis li apud Ĝon, rando ĉe rando.

Dume kuracisto Livsi transgrimpis la barilon, kaj venis al la kuiristo. Mi aŭdis kiel ekstremis lia voĉo kiam li demandis:

– Ĉu Ĝim?

– Li mem, – respondis Silver.

La kuracisto subite haltis. Ŝajnis ke li ne sukcesas moviĝi de la loko.

– Bone, – diris li fine. Komence ni pririgardu malsanulojn.

La kuracisto eniris la domon kaj, post malvarma kapmovo en mian flankon, komencis pririgardi malsanulojn. Li tenis sin trankvile, kvankam certe sciis ke lia vivo inter tiuj ĉi malfidindaj homoj pendas sur hareto. Li parolis kiel loka kuracisto kiu envenis iun vilaĝan loĝejon.

Ankaŭ la piratoj tenis sin kvazaŭ okazis nenio, kvazaŭ li, kiel antaŭe, estas ilia ŝipa kuracisto, kaj ili, kiel antaŭe, estas laboremaj kaj obeemaj matrosoj.

– Al vi estas pli bone, amiko mia, – diris li al rabisto kun bandaĝita kapo. – Alia sur via loko ne restus viva. Sed via kapo okazis ege fortika. Kaj kio pri viaj aferoj, Ĝorgo? Ĉu vi prenis la kuracilon? Diru, ĉu li prenis la kuracilon?

– Kial ne, sinjoro, kial ne! Li prenis, sinjoro, – respondis Morgan.

– De kiam mi ekestis kuracisto ĉe ribeloj, aŭ, pli ĝuste, mallibereja (mal'liber'ej'a)

kuracisto, – diris kuracisto Livsi kun bonkora rideto, – mi opinias ke mia devo estas gardi vin por nia landestro Ĝorĝo, kaj por pendumilo.

La rabistoj interrigardis, sed pretersilentis la vortojn de la kuracisto.

– Dik malbone sentas sin, sinjoro, – diris iu.

– Ĉu malbone? – demandis la kuracisto. – Hej, Dik, venu ĉi tien. Ho, mi tute ne miras ke li sentas sin malbone! Ankaŭ ĉe li komenciĝas la tremiga malsano.

– Jen kio okazas al kiu tranĉis Libron, – diris Morgan.

– Tio okazas al kiuj estas malsaĝaj kiel bovoj, – kontraŭdiris la kuracisto. – Al kiuj ne komprenas ke seka kaj pura loko estas pli bona ol danĝera marĉo. Tre eblas ke ĉiuj vi kaptis la malsanon, amikoj miaj, kaj ŝajnas al mi ke nur post multe da tempo vi liberiĝos de ĝi. Ekloĝi ĉe marĉo!... Silver, vi mirigis min! Vi ja ne estas tiel malsaĝa kiel aliaj, sed vi tute ne komprenas kiel gardi sanon de siaj subuloj... – Bonege, – diris la kuracisto post kiam li pririgardis malsanulojn, kaj donis al ili kuracilojn, kiujn ili trinkis kun tiel ridinda obeemo kvazaŭ ili estus lernantoj de iu bonfara lernejo, sed ne rabistoj. – Kaj nun, se vi ne kontraŭas, mi volus konversacii kun tiu ĉi junulaĉo. – Kaj li kapmove montris mian

flankon.

Ĝorĝ Meri, kiu staris ĉe pordo, ruĝiĝis, turnis sin al la kuracisto, kaj kriis:

– Neniam!

Silver frapis per la mano la bareleton.

– Silenton! – muĝis li, kaj ĉirkaŭrigardis kiel danĝera besto. – Kuracisto, – daŭrigis li bonvoĉe, – mi estis certa ke vi volos konversacii kun Ĝim, ĉar mi scias: tiu ĉi knabo estas proksima al via koro. Vi faras tiel multe al ni, kaj ni, kiel vi vidas, sentas al vi tiun fidon ke trinkas viajn kuracilojn kiel rumon. Mi tuj ordigos ĉion... Hokins, ĉu vi povas doni al mi vian vorton, vorton de juna ĝentlemano, ĉar vi estas ĝentlemano, kvankam viaj gepatroj ne estas homoj multhavaj, ke vi ne forkuros?

Mi donis al li la vorton.

– Tial, kuracisto, – diris Silver, – transgrimpu la barilon. Poste mi venigos Ĝimon malsupren. Li estos ĉe tiu ĉi flanko de la bariĵo, vi – ĉe la transa (trans'a); sed tio ne malhelpos al vi konversacii amike. Ĉion bonan al vi, sinjoro! Ĉion bonan al sinjoro Treloni kaj al ŝipestro Smolet.

Tuj post eliro de la kuracisto malamo de la piratoj, detenata pro timo antaŭ Silver, eksplodis denove (de'nov'e). Ili kriis al Silver ke li agas duflanke, ke li volas savi sian felon, kaj ke li malfideligas ĉiujn aliajn. Unuvorte ili bonege komprenis liajn intencojn. Mi eĉ

opiniis ke li ne sukcesos elturniĝi, tiel travideblaj estis ĉi-foje liaj agoj. Sed li estis multe pli saĝa ol ili ĉiuj kune, kaj lia nokta venko donis al li egan superecon. Li nomis ilin malsaĝuloj, kaj diris pri mi ke de la konversacio kun la kuracisto ne eblas elturniĝi; montris al ili la mapon, kaj demandis: ĉu vere ili volas rompi la interkonsenton en saman tagon kiam oni povas komenci serĉon de la trezoroj?

- Jes! - kriis li, - venos tago kiam ni montros veron al ili, sed ĝis tiu tempo mi faros ĉion por ĝojigi tiun ĉi kuraciston!

Li ordonis bruligi fajron, prenis sian bastonon, kaj kune kun mi pene ekiris suben, lasante la piratojn en plena nenikompreneo.

- Ne rapidu, fileto, ne rapidu, - diris li al mi, - ili tuj ĵetos sin sur nin se rimarkos ke ni rapidas.

Ni malrapide malsupreniĝis laŭ la sablo al loko kie trans la barilo atendis nin la kuracisto. Silver haltis.

- Ankaŭ tion vi enskribu, kuracisto, - diris li. - Kaj Ĝim, li rakontu al vi kiel mi savis lian vivon, malgraŭ tio ke preskaŭ perdis mian estrecon. Aĥ, kuracisto, kiam homo navigas sian boaton apud morto li volas aŭdi eĉ plej etan bonan vorton! Mi petegas vin, kuracisto, estu bonkora al mi, donu al mi eĉ iun esperon!

Nun, deirinte siajn kunulojn, Silver iĝis tute alia homo. Lia voĉo tremis. Neniam li parolis tiel varme kaj pete.

– Ĉu vere vi timas, Ĝon? – demandis kuracisto Livsi.

– Kuracisto, mi ne estas timulo. Ne, mi eĉ iomete ne timas, – sed mi diras al vi rekte: min tremigas penso pri pendumilo. Vi estas homo bonkora. Pli bonan mi ne vidis dum mia vivo. Vi certe memoros faritan de mi bonon, kvankam ankaŭ la malbonon vi memoros. Mi foriras flanken, ĉu vi vidas, kaj lasas vin kun Ĝim. Ankaŭ tion vi enskribos en miajn bonfarojn, ĉu?

Li foriris flanken, por ke al li ne venu sonoj de nia parolo, eksidis sur arborestaĵon, kaj komencis fajfetii. Li turniĝis de flanko al flanko, rigardante jen min kun la kuracisto, jen la malobeemajn piratojn, kiuj kuradis tien kaj reen ĉe fajrejo, bruligis la fajron, portis manĝaĵojn por la matenmanĝo.

– Do, Ĝim, – malgaje diris la kuracisto, – vi estas ĉi tie. Kion oni faras tion oni ricevas, knabo mia. Mi ne havas sufiĉe da kuraĝo insulti vin. Nur pri unu afero mi diros al vi: se ŝipestro Smolet estus sana, vi ne kuraĝus forkuri de ni. Vi agis malbone, vi foriris kiam li estis vundita, kaj ne povis deteni (de'ten'i) vin perforte.

Mi devas diri ke dum tiuj ĉi vortoj miaj

okuloj malsekiĝis.

- Sinjoro Livsi, - petegis mi, - bonvolu ne insulti min! Mi mem sufiĉe faris tion. Mia vivo pendas sur hareto. Se Silver ne savus min mi estus jam morta. Mi ne timas morton, kuracisto, mi timas nur turmentojn. Se ili komencos turmenti min...

- Ĝim... - interrompis min la kuracisto, - jam per tute alia voĉo, - Ĝim, mi ne povas aŭskulti tion. Transgrimpu la barilon, kaj ni forkuru.

- Sinjoro Livsi, - diris mi, - ja mi donis la vorton.

- Mi scias, mi scias! - kriis li. - Kion fari, Ĝim! Mi prenu tiun ĉi malbonfaron sur min. Ja ne povas mi lasi vin ĉi tie. Saltu!

- Ne, - respondis mi, - ja vi mem ne agus tiel. Ankaŭ sinjoro Treloni, kaj la ŝipestro ne farus tion. Do ankaŭ mi tenos mian vorton. Silver kredas al mi. Mi donis al li la vorton, kaj mi revenos en la domon. Sed, sinjoro Livsi, vi ne ĝisaŭskultis (ĝis'aŭskult'is) min. Se ili komencos turmenti min, mi ne eltenos, kaj diros kie estas kaŝita la ŝipo. Jes, sinjoro, mi forprenis la ŝipon. Ĝi staras nun ĉe suda bordo de Norda golfo. Dum maraltiĝo ĝi supreniĝas, dum malaltiĝo ĝi sursidas la sablaĵon.

- Ŝipo! - kriis la kuracisto.

Per kelkaj vortoj mi rakontis al li ĉion kio

okazis. Li aŭskultis min en plena silento.

- Jes, - rimarkis li, kiam mi finis, - ĉiufoje vi savas nin de certa morto. Ĉu vere vi pensas ke nun ni donos al vi malaperi? Tio estus malbona reago al ĉio kion vi faris por ni. Vi sciigis nin pri la ribelo, vi trovis Ben Gan-on. Pli bonajn aferojn vi ne faros dum tuta via vivo, eĉ se vi ĝisvivos centjariĝon (cent'jar'iĝ'o'n). Tiu ĉi Ben Gan - oj-uj-uj! Interalie... Silver! - kriis li, - Silver, mi volas ion diri al vi, - daŭrigis li, kiam la kuiristo proksimiĝis, - ne rapidu serĉi la trezorojn.

- Mi, sinjoro, faras ĉion kion mi povas, sed ne petu de mi neeblon, - diris Silver, - nur per serĉo de la trezoroj mi povas savi mian vivon, kaj vivon de tiu ĉi malfeliĉa knabo.

- Bone, Silver, - respondis la kuracisto, - se estas tiel, mi diru al vi ankoraŭ ion: kiam vi trovos la lokon, estu singarda.

- Sinjoro, - diris Silver, - vi diris al mi aŭ tro multe, aŭ tro malmulte. Kion vi intencas? Kial vi lasis la fortikejon? Kial vi donis al mi la mapon? Mi ne komprenis kaj ne komprenas tion. Sed, malgraŭ tio, mi blinde plenumis ĉion kion vi diris al mi, kvankam vi esperigis min eĉ ne per unu vorto. Ne, tio estas tro!.. Se vi ne volas rekte klarigi al mi viajn intencojn, diru tion, kaj mi ellasos la direktilon.

- Ne, - pripense diris la kuracisto, - mi



ne povas klarigi al vi la aferon. Se mi diros ankoraŭ eĉ unu vorton, la ŝipestro ege insultos min. Sed, malgraŭ ĉio, mi donos al vi etan esperon, Silver: se vi kaj mi elturniĝos el tiu ĉi kaptilo (kapt'il'o), mi penos savi vin de pendumilo, se tio ne devigos min diri malveron.

Vizaĝo de Silver tuj aliĝis.

– Eĉ patrino mia ne povus diri ion pli bonan! – kriis li.

– Tio estas unua afero kiun mi povas diri al vi, – aldonis la kuracisto, – kaj jen la dua: tenu tiun ĉi knabon apud vi kaj, se vi bezonos helpon, voku min. Mi penos fari ion por vi, kaj tiam vi vidos ke mi scias pri kio mi parolas. Ĝis revido, Ĝim!

Kuracisto Livsi prenis pormomente mian manon tra la barilo, kapmovis al Silver, kaj per rapidaj paŝoj eniris la arbaron.

– Ĝim, – diris Silver kiam ni restis duopaj, – mi savis vian vivon, kaj vi – la mian. Mi ĉiam memoros tion. Mi vidis ke la kuracisto petis vin forkuri. Mi ne aŭdis vian respondon sed mi vidis vian neon (ne'o'n). Tion, Ĝim, mi bone memoros. Ĉi-tage por mi unuafoje aperis espero post la malsukcesa atako sur la fortikejon. Kaj tio okazis pro vi. Serĉon de la trezoroj, Ĝim, ni komencas blinde, kaj tio tute ne plaĉas al mi. Sed mi kaj vi forte tenos nin unu ĉe la alia, kaj savos niajn vivojn mal-

graŭ ĉio.

Unu el piratoj, laborantaj ĉe la fajro, kriis al ni ke la matenmanĝo estas jam preta. Ni eksidis sur sablo apud la fajro, kaj komencis manĝi.

La rabistoj ordigis tian fajron ke oni povus prifajrigi sur ĝi eĉ bovon. Post nelonge la fajro ekbrulegis tiel forte, ke al ĝi oni povis proksimiĝi nur de ventoflanko. Samon ili faris pri manĝeblaĵoj: ili prifajrigis multe pli da bestaĵo ol povis formanĝi. Poste unu el ili, kun malsaĝa rido, ĵetis restaĵojn en la fajron, kiu ekflamis eĉ pli forte, formanĝante tiun ĉi nekutiman brulaĵon.

Neniam en la vivo vidis mi tiajn homojn. Ĉion ili faris senpripense; neniigis manĝeblaĵojn, dormis estante gardantoj... Ili povis fari nur kion oni faras unubate, sed plenumi iun longdaŭran agon ili ne scipovis.

Eĉ Silver, sidanta flanke kun sia papago, diris al ili nenion kontraŭ tiu ĉi disĵetemo. Kaj tio tre mirigis min, ĉar mi sciis kiel singarda kaj antaŭvida li estas.

– Jes amikoj – diris li, – tio estas via feliĉo ke vi havas unupiedulon kiu ĉiam pensas por vi. Mi scias nun kion mi bezonis scii. La ŝipo estas ĉe ili. Dume mi ne scias kie ili ĝin kaŝas. Sed kiam la trezoroj estos ĉe ni, ni traserĉos la tutan insulon, kaj denove kaptos la ŝipon. Kaj tiam, knaboj, ĉar ĉiuj boatoj

troviĝas en niaj manoj, ĉio estos en ordo.

Tiel paroladis li, manĝante la varman bestaĵon. Li esperigis ilin kaj, samtempe, kiel ŝajnis al mi, ankaŭ sin mem.

– Kaj nia malliberulo, – diris li, – lastfoje konversaciis kun sia amiko. El ilia konversacio mi eksciis ĉion kion mi volis scii, sed venis fino. Kiam ni iros serĉi la trezorojn, mi tiros lin post mi per ŝnuro: li estas por ni pli ol oro, tial ni tenos lin bonorde por iu ajn okazo. Sed kiam ni havos kaj la ŝipon kaj la trezorojn, kiam ni gaje eniros liberan maron, tiam ni parolos kun sinjoro Hokins kiel oni devas paroli. Li ricevos sian parton laŭ siaj agoj.

Ne mirindas ke ili ekĝojis. Sed mi, mi ege ekmalĝojis kaj senkuraĝiĝis. Se ĉio iros laŭ intencoj de Silver, li certe faros tion. Kaj certe li iros al pirata libero sed ne al tiu malforta espero liberiĝi de pendumilo kiun ni povas doni al li. Sed se io vere igos Silveron teni donitan al la kuracisto vorton, ankaŭ tiam antaŭ ni staras mort-danĝero. Nekredemo de la pitatoj ĉiuminute povas aliĝi al certeco. Tiam li kaj mi devos gardi niajn vivojn: li – unupiedulo, kaj mi, knabeto, kontraŭ kvinopo da fortegaj matrosoj. Aldonu al tiu ĉi danĝero la nekompreneblajn agojn de miaj amikoj. Kial ili lasis la fortikejon? Kial ili fordonis la mapon? Kion volis diri la kuracisto

dirante al Silver: «Kiam vi trovos la lokon tenu vin preta»?

Tial kompreneblas ke la matenmanĝo ŝajnis al mi ne tro bongusta, kaj ke mi senespero ektiriĝis post la rabistoj por serĉo de la trezoroj.

Tio estis sufiĉe nekutima vidaĵo: ĉiuj estis en malpuraj matrosaj vestoj; ĉiuj, krom mi, estis bonege armitaj. Silver portis du fusilojn kaj sabron. En la vestojn li enigis du pistolojn. Krom tio super lia mano sidis Ŝipestro Flint, senĉese kaj senorde krianta maristajn ordonojn.

Mian trunkon oni ĉirkaŭigis per ŝnuro, kaj mi obeeme tiriĝis post la ŝipkuiristo. Oni tiris min kiel instruitan urson.

Dum iuj portis fosilojn, aliaj portis manĝaĵojn kaj drinkaĵojn por la tagmanĝo. Mi rimarkis ke tuta manĝeblaĵo vere estas prenita el nia tenejo, kaj komprenis ke Silver diris veron ĉi-nokte. Se li ne interkonsentus kun la kuracisto, la rabistoj, perdintaj la ŝipon, bezonus serĉi lokajn bestojn, kaj posttrinki la bestaĵon per akvo. Sed akvon ili ne tre ŝatas, kaj kapto de bestoj estas laboro malfacila por maristoj.

Ni ĉiuj ekmoviĝis, eĉ pirato kun trapafita kapo, al kiu estus multe pli sane kuŝi en malvarma loko. Unu post alia ni venis al la bordo

kie atendis nin la boatoj. Eĉ la boatoj montris malsaĝan malpripenson de tiuj ĉiam ebriaj piratoj: ili estis malpuraj, sur la fundoj staris akvo, kaj sidaĵo de unu el ili okazis rompita. Oni decidis preni la du boatojn por ke neniu el ili malaperu. Fine ni debordiĝis.

Dum la vojo komenciĝis konversacioj pri la mapo. La ruĝa kruceto (+) estis tro granda, kaj certe ne povis bone montri la lokon. Klarigoj sur alia flanko de la mapo estis tro mallongaj kaj neklaraj. Se leganto memoras, tie estis skribite:

«Alta arbo sur flanko de Velo, direkto al nordo de nordo-nordo-oriento. Homrestaĵa insulo, oriento-sudo-oriento, kaj al oriento. Dek futoj.» Do, plej grava montrilo estis alta arbo.

Rekte kontraŭ ni la ankran haltejon fermis altaĵo du- aŭ tri-cent futoj alta, kiu norde kuniĝis kun suda flanko de Velo; sude staris altaĵo nomata Antaŭa Masto. Sur la altaĵo kreskis kaj altaj kaj malaltaj arboj. Jen tie, jen tie unu el ili superis aliajn per pli-malpli kvardek futoj. Kiun el tiuj ĉi arboj ŝipestro Flint nomis alta oni povis trovi nur sur la loko per nordmontrilo (nord'montr'il'o). Sed ni faris eĉ ne duonvojon kiam ĉiu trovis por si iun altan arbon. Nur Longa Ĝon diris ke oni devas atendi venon al la loko. Ni gardis la fortojn, kaj post longa remado albordiĝis ĉe

elfluejo de dua rivereto, kiu fluas laŭ arbara flanko de Velo. De tie ni komencis supreniĝi al la altteraĵo (alt'ter'aĵ'o).

Komence nian iron tre malfaciligis marĉoj kaj kreskaĵoj. Sed iom post iom ni supreniĝis, kaj la tero iĝis pli ŝtona, la kreskaĵoj – pli altaj kaj maldensaj. Ni proksimiĝis al plej bona parto de la insulo. Ĉi tie staris florantaj bonodoraj arbetoj. Tie kaj alie supreniĝis ruĝaj trunkoj de altaj arboj. Staris suno, sed malforta venteto malvarmigis niajn vizaĝojn. Rabistoj iris dise (dis'e). Ili gaje interkriis. Silver tiriĝis post ĉiuj, tenante min per la ŝnuro. Estis malfacile al li suprengrimpi la ŝtonan montoflankon. Ne unufoje mi devis subteni lin: se ne, li falus de la monteto.

Tiel trairis ni pli-malpli duonmejlon, kaj venis jam supren, kiam subite rabisto, iranta flanke, laŭte ekkriis pro la teruro. Li kriis senĉese, kaj ĉiuj alkuris lin.

– Ĉu vi opinias ke li venis al la trezoroj? – demandis maljuna Morgan, preterkurante nin, – ne, ne, ni ankoraŭ ne venis al tiu arbo...

Tio kion la krianto trovis ne estis trezoroj. Ĉe malsupro de alta arbo kuŝis restaĵoj de homo. Herboj dense trakreskis ĝin, delokigante iujn etajn erojn. Kelkloke sur ĝi videblis restaĵoj de vesto. Mi estas certa ke inter ni estis eĉ ne unu homo kiun ne traflugus terurmalvarmo (terur'mal'varm'o).

- Tio estis maristo, - diris Ĝorĝ Meri, kiu estis pli kuraĝa ol aliaj, kaj de proksimo pririgardis la restaĵojn, - la vesto estas marista.

- Certe marista, - diris Silver, - mi opinias ke vi ne atendis trovi ĉi tie Ĉiel-servanton. Sed kial tiuj ĉi restaĵoj kuŝas tiel nekutime?

Kaj vere, kvankam tie kaj alie etaj eroj estis iom movigitaj de sia loko, la restaĵaro kuŝis rektiĝante. Piedoj montris unun flankon, kaj la manoj, kuŝantaj super la kapo, kiel ĉe homo preta ensalti akvon, - la alian.

- Hej, mi komencas kompreni! - diris Silver, - nu, prenu ni la nordmontrilon. Ĝuste! Jen staras supro de monteto sur Homrestaĵa insulo. Nun ni vidu laŭ la nordmontrilo kien montras tiu ĉi mortaĵo... - Ĝuste tiel mi pensis! - kriis la kuiristo, - tio estas vojmontrilo. Ĝi montras al Norda stelo kaj, samtempe, al la oraj moneroj. Ĉe mi ĉio malvarmiĝas pro nura penso pri Flint. Tio estas unu el ties ridetaĵoj (rid'et'aĵ'o'j). Li restis ĉi tie kun seso da kunuloj, kaj mortigis ilin ĉiujn. Poste el unu el la mortintoj li ordigis por si la montrilon... La homrestaĵo estas longa, la haroj sur la kapo estas ruĝaj... Hej, ja tio estas Alardajs! Ĉu vi memoras Alardajs-on, Tom Morgan?

- Eĉ tre bone, - diris Morgan, - li devis

redoni al mi monon kaj, krom tio, li kunprenis mian tranĉilon kiam iris al la insulo.

– Do, la tranĉilo devas esti ĉi tie, – diris alia rabisto, – Flint estis ne el kiuj priserĉas sian fraton mariston. Kaj birdoj... Ja ne povis ili forporti tiun ĉi tranĉilon!

– Jes, Ĉielo vin prenu! – kriis Silver.

– Sed ĉi tie estas nenio, – diris Meri, – iu monereto restus, aŭ io alia...

– Vere! Vere! – konsentis Silver, – io ĉi tie estas ne tre klara. Jes, amikoj miaj. Sed se Flint estus viva, ni ne troviĝus nun en tiu ĉi loko. Ni estas sesopaj, ankaŭ tiuj estis sesopaj, sed nun de ili restis tre malmulte.

– Ne, estu certaj, li mortis: mi per miaj okuloj vidis lin morta, – resonis Morgan, – Bili venigis min al li. Flint kuŝis kun moneroj sur la okuloj.

– Certe li mortis, – diris pirato kun bandaĝita kapo, – sed se iu iradu sur tero post sia morto, tio certe estas Flint. Ja kiel malfacile li mortis!

– Jes, mortis li malbone, – rimarkis alia, – li jen kriaĉis, jen ordonis rumon, jen komencis kantaĉi «Dek-trio da maristoj»-n. Krom tio li kantis nenion. De tiu tempo, se diri veron, mi ne ŝatas tiun kanton... Estis terure varme. Fenestro estis malfermita. La homo de minuto al minuto debordiĝos al Ĉielo, sed li kriaĉas la kanton kvazaŭ okazas nenio...



- Nu, sufiĉas! - diris Silver, - sufiĉas paroli! Li mortis, kaj ne iradas sur tero. Kaj, eĉ se li volus eliri el sia enterigejo (en'ter'ig'ej'o), tio okazus nokte; sed nun, kiel vi vidas, estas tago... Sufiĉas paroli pri la mortinto. Ja nin atendas la oraj moneroj.

Ni ekiris. Sed, kvankam suno lumis plenforte, la piratoj jam ne diskuris, kaj ne vokis unu la alian de malproksime. Ili iris kune, kaj konversaciis duonvoĉe: en tiun teruron enigis ilin la mortigita pirato.

Parte pro malfortigo kiun venigis tiu ĉi teruraĵo, parte pro laciĝo de Silver kaj de malsanaj piratoj, sur supro de la altteraĵo la tuta aro haltis.

La altteraĵo estis iom malsupreniĝanta al okcidento, tial de loko kie ni sidis malfermiĝis vidaĵo al du flankoj.

Antaŭe, post suproj de arboj, ni vidis Arbaran kapon, ĉirkaŭitan per ondofrapoj. Malantaŭe videblis ne nur interinsulejo kaj Homrestaĵa insulo, sed ankaŭ libera maro. Rekte antaŭ ni supreniĝis Velo, parte superkreskita per maldensa arbareto, parte nigra per ŝtonaj muroj. Silenton rompita nur malproksima bruego de la ondofrapado. Neniu velo sur la maro. Senton de soleco pliigis ankaŭ malproksimo de la vidaĵoj.

Silver pripense rigardis sian nordmontrilon.

– Ĉi tie estas tri altaj arboj, – diris li, – ili ĉiuj rekte montras Homrestaĵan insulon. Flanko de Velo, kiun ni serĉas, estas, mi opinias, jen tiu nigraĵo. Nun ankaŭ infano trovas la trezorojn. Laŭ mi estus bone antaŭe manĝeti.

– Mi ne tre volas; – diris Morgan, – post ekmemoro pri Flint tuj malaperis ĉe mi deziro manĝi.

– Jes, filo mia, via feliĉo ke li mortis, – diris Silver.

– Kaj kian vizaĝaĉon li havis! – kriis la tria pirato, ekstremante, – ĝi estis nigra-nigra!

– Tio okazas pro rumo, – aldonis Meri. – Nigra! Certe nigra! Pro rumo oni nigriĝas, tio estas vero.

Pro vido de la homrestaĵo, kaj pro memo-roj pri Flint la homoj ekparolis pli kaj pli mal-laŭte, kaj venis fine al preskaŭ neaŭdebla parolo kiu tute ne rompis la arbaran silenton.

Sed subite el proksima densejo iu alta voĉo ekkantis la bone konatan kanton:

***Dek-trio da maristoj  
En ujo por mortinto  
Jo-ho-ho, kaj botel' kun rum'***

Morta timo kaptis la piratojn. Ĉe tuta sesopo la vizaĝoj tuj iĝis blankaj. Iuj eksaltis sur la piedojn, duopo kaptis unu la alian.

Morgan falis sur la teron.

- Tio estas Flint! - kriis Meri.

La kanto ĉesiĝis same subite kiel ĝi komenciĝis.

La tago estis suna kaj klara, voĉo de la kantanto - viva kaj, oni povas diri, sufiĉe bona, do mi ne povis kompreni teruron de miaj kunuloj.

- Sufiĉas al vi! - malfacile diris Silver, - tiel ni tute ne sukcesos. Faru turnon, knaboj. Certe tio estas io tre nekutima, kaj mi ne scias kiu aĉadas (aĉ'ad'as) tie; sed mi estas certa ke tio estas ne mortinto sed viva homo.

Dum li parolis, al li revenis kuraĝo, kaj lia vizaĝo iom ruĝiĝis. Aliaj, pro ties vortoj, ankaŭ kuraĝiĝis. Sed subite denove eksonis sama voĉo. Nun ĝi ne kantis sed kriis, kvazaŭ de iu malproksimo, kaj muroj de Velo mal-laŭte resonis tiun ĉi krion:

- Darbi Makgroŭ! - kriis la voĉo, - Darbi Makgroŭ!

Poste ekaŭdiĝis aĉaj insultoj, kaj denova krio:

- Darbi, alportu al mi rumon!

Rabistoj enkreskis la teron, iliaj okuloj preskaŭ elfalis. La voĉo jam delonge malaperis, sed ili daŭre staris kiel enfositaj, kaj silente rigardis antaŭen.

- La afero estas klara, - diris iu, - oni devas forkuri.

– Tio estis liaj lastaj vortoj, – diris Morgan, – lastaj vortoj antaŭ la morto!

Dik prenis sian Libron, kaj komencis plenvoĉe legi ĝin. Antaŭ ol eniri maron kaj ekesti rabisto li kreskis en kredanta familio.

Nur Silver, kvankam tremis pro la timo, tute ne volis aŭdi pri retiriĝo.

– Sur tiu ĉi insulo neniu eĉ aŭdis pri Darbi, – diris li senkomprene, – neniu krom ni... – poste li elkriis: – Aŭskultu! Mi venis ĉi tien por elfosi trezorojn, kaj neniu homo aŭ mortaĵo haltos min. Mi ne timis Flinton kiam li estis viva, kaj ne timos lin mortan. Kvaronmeje de ni kuŝas sepcent-milo da oraj moneroj. Ĉu iu ajn ĝentlemano de bonokazo povas returni de tiel multa mono nur pro iu ni-gravizaĝa drinkulo, aldone eĉ mortaĉa?

Sed liaj vortoj ne redonis kuraĝon al la rabistoj. Kontraŭe, ili nur plifortigis ilian teruron.

– Silentu Ĝon! – diris Meri, – ne parolu malbone pri la mortinto!

Aliaj estis tiel kaptitaj per la timo ke povis diri eĉ ne unu vorton. Ili ne havis kuraĝon eĉ por diskuri. La timo igis ilin proksimiĝi al Silver, ĉar li estis plej kuraĝa el ili. Kaj vere, li jam sukcesis parte liberiĝi de la timo.

– Ĉu laŭ vi tio estas mortinto? Eblas ke jes, – diris li, – sed min mirigas unu afero. Ni ĉiuj klare aŭdis ke tiu montoflanko resonis la

krion. Jes, monto aŭ muro multfoje resonas voĉon de homo... Sed diru, ĉu iu ajn vidis sun-nigraĵon ĉe iranta mortinto? Se ili ne havas sun-nigraĵon, do ili ne havas ankaŭ rekrion. Ne povas esti alie.

Tiuj ĉi klarigoj ŝajnis al mi malfortaj. Sed vi neniam povas scii antaŭe kion pensos homo kredanta. Al mia miro Ĝorĝ Meri ekstentis grandan liberiĝon.

- Vere, - diris li, - kian kapegon tenas vi sur via trunko, Ĝon! Ĉio estas en ordo, amikoj! Vi nur prenis malĝustan direkton. Certe la voĉo iom similas tiun de Flint. Sed multe pli ĝi similas voĉon de...

- Jes, tio estas voĉo de Ben Gan! - muĝis Silver.

- Vere! - kriis Morgan, supreniĝante, - tio estas voĉo de Ben Gan!

- Sed ĉu ne estas samo? - demandis Dik, - Ben Gan estas morta, kaj Flint estas morta...

Sed aliaj matrosoj pensis tute alie.

- Li estas nenio, tiu Ben Gan! - kriis Meri. - Ĉu viva li estas, ĉu morta, tio estas same malgrava!

Oni ne ĉiam povas vidi tiel rapide plifortiĝantajn homojn. Sur iliaj vizaĝoj denove eklumis ruĝo. Post kelkaj minutoj ili, kvazaŭ okazis nenio, konversaciaĉis, kaj nur aŭskultis ĉu ne aperos denove tiu ĉi voĉo. Sed ĉio

estis silenta. Do, preninte la fosilojn, ili ekiris antaŭen.

Antaŭ ĉiuj iris Meri, tenante en la mano nordmontrilon de Ĝon. Li diris veron: ĉu vivas Ben Gan, ĉu estas li morta, lin timis neniu. Nur Dik, kiel antaŭe, tenis en la manoj sian Libron, time ĉirkaŭrigardante. Sed lin jam kunsentis (kun'sent'is) neniu. Silver eĉ priridis lian timemon:

– Mi ja diris al vi ke vi senigis vian Libron de iu ajn forto. Ĉu vi vere opinias ke la mortinto timos ĝin?

Sed Dik-on oni jam ne povis trankviligi per vortoj. Postnelonge ekestis klare al mi ke li vere malsanas. Pro la varmego, laco kaj timo, ties malsano, antaŭdirita per kuracisto Livsi, rapide plifortiĝis.

Sur la supro estis malmulte da arboj, kaj la iro ekestis multe pli facila. Nun ni malsupreniĝis, ĉar, kiel mi jam diris, la alteraĵo havis etan malsupreniĝon al okcidento. Arboj grandaj kaj malgrandaj staris malproksime unu de alia. Inter malaltaj kreskaĵoj videblis maldensejoj, forbruligitaj per la suna varmego.

Irante al nord-okcidento ni proksimiĝis al flanko de Velo. Malsupre bone videblis Okcidenta golfo, kie tiel antaŭnelonge (antaŭ'ne'long'e) la marfluo ĵetis kaj turnis mian boaton.

Unua alta arbo al kiu venigis nin la nord-montrilo okazis ne tiu. Ankaŭ la dua.

La tria supreniĝis super la aliaj preskaŭ ducent-fute. Tio estis grandegulo kun ruĝa trunko kelkhomkapta (kelk'hom'kapt'a). De la maro tiu ĉi arbego certe estis videbla de malproksime, kiel de orienta tiel de okcidenta parto de la insulo. Ĝi povis servi ankaŭ kiel direktmontrilo por ŝipoj. Sed al miaj kunuloj gravis ne grandeco de la arbo; ilin kaptis maltrankviliga scio pri sepcent-milo da oraj moneroj, troviĝantaj apude (apud'e).

Pro tiu ĉi penso ĉiuj iliaj timoj malaperis. Eklumiĝis la okuloj, la paŝoj ekestis pli rapidaj, pli fortaj. Ili pensis nur pri mono atendanta ilin, pri feliĉa, senpripensa (sen'pri'pens'a), disĵeta vivo, kiun alportos al ili la mono.

Silver saltis per sia bastono. Li eligis insultojn kiel pensmalsanulo, kiam flugbestetoj alsidis lian varmiĝintan malsekan vizaĝon. Li fortege tiris la ŝnuron, rigardante min kun morta malamo. Li jam ne penis kaŝi siajn pensojn. Mi povis legi ilin kiel en libro. Okazinte finfine du paŝojn de la dezirata oro li jam ne pensis pri siaj vortoj, kaj pri antaŭdiroj de la kuracisto. Li certe esperis kapti la trezorojn, kaj poste, nokte, trovi «Hispanolo»-n, tranĉmortigi nin ĉiujn, kaj eniri la maron, kion li intencis dekomence.

Frapita per tiuj ĉi maltrankvilaj pensoj mi malfacile tiriĝis post la piratoj, kaj multfoje falis pro la ŝtonoj. Tiam Silver tiris la ŝnuron, ĵetante sur min sangdezirajn (sang'dezir'a'j'n) rigardojn.

Dik tiriĝis lasta, parolante insultojn kaj alĉielajn petojn. Lia malsano plifortiĝis. Tial mi sentis min eĉ pli malfeliĉa.

Aldone al tio antaŭ miaj okuloj nevole staris ĉi tieaj iamaj okazaĵoj. Mi kvazaŭ vidis rabiston kun nigriĝinta vizaĝo, kiu mortadis en Savano, kriante kanton, kaj ordonante rumon. Ĉi tie li per siaj manoj mortigis sesopon. Tiu ĉi trankvila arbareto pleniĝis tiam per antaŭmortaj krioj. Ŝajnis al mi ke ankaŭ nun mi aŭdas kriegojn de la malfeliĉuloj.

Ni eliris el la densejo.

– Post mi, amikoj, – kriis Meri.

Kaj ĉiuj ĵetis sin kuri. Subite, ne trakurinte (tra'kur'int'e) eĉ tridekon da futoj, ili haltis. Ekaŭdiĝis laŭtaj miraj krioj. Silver saltegis per sia bastono. Post momento ankaŭ li subite haltis.

Antaŭe troviĝis granda elfosaĵo, farita verŝajne delonge, ĉar ĝiaj randoj jam disfalis, kaj sur la fundo kreskis herbo. En ĝi ni ekvidis tenilon de fosilo, kaj iom da barelrestaĵoj. Sur unu el ili estis elbruligita surskribo «Foko» – nomo de ŝipo, havanto de



kiu estis Flint.

Ĉio estis klara. Iu jam trovis kaj forprenis la trezorojn. Sepcent mil oraj moneroj malaperis.

Ŝajnas ke de tempo kiam aperis Tero ne okazis tiel subita disrompo de tiel grandegaj esperoj. Tuta sesopo staris kiel trafita per ĉielfajro. Silver unua venis al rekompreno (re'kompren'o). Per tuta sia koro deziris li tiun ĉi monon. Ankaŭ nun li, por momento, ŝtoniĝis, sed nur por momento. Li ne perdis la kapon, rekaptis (re'kapt'is) sin, kaj sukcesis pripensi siajn agojn ĝis kiam iu alia komprenis kiu malfeliĉo trafis lin.

– Ĝim, – mallaŭte diris li, – jen, prenu, kaj estu preta.

Kaj li enigis en mian manon dupafan pistolon. Samtempe li komencis iom post iom moviĝi al nordo tiel, ke la elfosaĵo okazu inter ni kaj la kvino da rabistoj. Poste Silver ekrigardis min, kaj movis la kapon, kvazaŭ dirante: «La afero tute ne estas facila». Kaj mi estis konsenta kun li. Lia rigardo denove ekestis amika. Al mi ne plaĉis tiu ĉi dupensado. Mi ne eltenis, kaj mallaŭte diris:

– Do vi denove aliigis (ali'ig'is) la flankon, ĉu?

Sed li ne sukcesis respondi. La rabistoj, kriante kaj insultante, ensaltis la elfosaĵon, kaj komencis forigi teron per la manoj, disĵe-

tante la barelrestaĵojn.

Morgan trovis moneron. Li prenis ĝin, elegante fluon da insultoj. La monero estis ora. Kelkajn momentojn ĝi iris de mano al mano.

– Monero! – muĝis Meri, montrante ĝin al Silver, – ĉu tio estas viaj sepcent miloj? Vi, ŝajne, ŝatas ordigi interkonsentojn, ĉu? Laŭ vi, maljuna malsaĝulo, vi ĉiam sukcesas!

– Fosu knaboj, fosu, – diris Silver kun malvarma rideto, – eble vi elfosos ion manĝeblan.

– Manĝeblan! – kriaĉis Meri. – Knaboj, ĉu vi aŭdis? Li sciis ĉion! Rigardu lian vizaĝon, sur ĝi tio estas klare skribita.

– Hej, Meri! – rimarkis Silver, – vi ŝajne denove intencas ekesti ŝipestro, ĉu? Mi vidas ke vi estas multdezira knabo.

Sed ĉi-foje ĉiuj estis sur flanko de Meri. La rabistoj komencis elgrimpi el la fosaĵo, malame rigardante nin. Sed al nia feliĉo ili ĉiuj okazis sur kontraŭa flanko.

Tiel staris ni, duopo kontraŭ la kvinopo, kun la fosaĵo inter ni. Neniu flanko decidiĝis ataki unua. Silver staris senmove. Li staris trankvile pririgardante la malamikojn, tenante sin per la bastono. Li vere estis kuraĝa homo.

Fine Meri decidis kuraĝigi siajn subtenantojn per parolo.

– Amikoj, – diris li, – rigardu, ili estas nur

duopaj; unu - maljuna senpiedulo, kiu venigis nin ĉi tien, la alia - hundaĉeto (hund'aĉ'et'o), de kiu mi jam delonge volas eltranĉi la koron. Do jen, knaboj...

Li suprenigis la manon, kaj altigis la voĉon, preta ordoni atakon. Sed subite - paf! paf! paf! - el la densejo frapis tri fusilaj pafoj.

Meri falis per la kapo malsupren, rekte en la fosaĵon. Pirato kun bandaĝo sur la kapo ektorniĝis kaj falis flanken. Triopo da aliaj ekforkuris.

Sammomente Longa Ĝon elpafis el la pistolo rekte en Meri, kiu penis elgrimpi el la fosaĵo. Meri, mortante, ekrigardis vizaĝon de sia mortiganto.

- Ĝorĝ, - diris Silver, - mi opinias ke ĉio inter ni estas jam en ordo, ĉu?

El la maldensejo elkuris kuracisto, Grej kaj Ben Gan.

- Antaŭen, - kriis la kuracisto, - rapidu, knaboj! Ni devas detranĉi ilin de la boatoj.

Ni ekkuris antaŭen, kurante tra kreskaĵoj, kelkloke sufiĉe altaj.

Silver penis ne malantaŭiĝi. Per sia bastono li saltis rapide. Laŭ vortoj de la kuracisto eĉ juna homo ne eltenus tian laboron.

Kiam ni alkuris la malsupreniĝon li malantaŭis nin jam per kvaronmejlo, kaj tute perdis

la forton.

- Kuracisto, - kriis li, - rigardu, ne estas kien rapidi!

Kaj vere, ni povis ne rapidi. Ni venis al maldensejo, kaj ekvidis ke la tri restantaj rabistoj kuras en direkton de Antaŭa Mastro. Do ni vere troviĝas jam inter la forkurantoj kaj la boatoj, kaj povas trankviliĝi. Longa Ĝon, kun malseka vizaĝo, malrapide proksimiĝis al ni.

- Vi venis ĝustatempe, kuracisto, por savi nin... Hej, tio estas vi, Ben Gan? - aldonis li, - ne multon oni povas diri: bona knabaĉo vi estas!

- Jes, tio estas mi, - respondis la iama pirato, timeme turniĝante. - Ĉu ĉio estas en ordo ĉe vi, sinjoro Silver? - demandis li post longa silento.

- Ben, Ben, - respondis Silver, - kion vi faris al mi!

La kuracisto sendis Grejon por preni iun el la frap-fosiloj kiujn forĵetis la forkurantoj.

Dum ni nerapide malsupreniĝis al la boatoj la kuracisto kelkvorte rakontis kio okazis dum lastaj tagoj.

Pense duonmalsana solulo Ben Gan estis plej grava parto de la rakonto.

Ben, laŭ vortoj de la kuracisto, dum siaj longaj solecaj iradoj tra la insulo trovis kaj la homrestaĵon kaj la trezorojn.

Tio li forprenis de la homrestaĵo ties aĵo-

jn, kaj elfosis la monerojn el la tero. Tio estis li kiu per siaj fortoj transportis la tutan oron el sub la arbego en kavernon ĉe Dukapa monto, en nord-orienta parto de la insulo. Tiu pena laboro, deviganta (dev'ig'ant'a) multtagan iradon, estis finita nur antaŭ sesdek tagoj ĝis veno de «Hispanolo». Tion la kuracisto eksciis de li en tago de atako sur nian fortikejon. Postan tagon, vidante ke la ŝipo malaperis, la kuracisto iris al Silver, fordonis al li la mapon, kiun oni jam ne bezonis, kaj lasis al la rabistoj la fortikejon kun ĉiuj ĝiaj manĝeblaĵoj, ĉar en kaverno de Ben Gan estis multe da bestaĵo kiun Ben Gan kaptis per siaj manoj.

Tiel miaj amikoj ricevis eblecon translokiĝi el la fortikejo al Dukapa monto, por gardi tie la trezorojn malproksime de la malsanigaj marĉoj.

- Certe, knabo mia, - aldonis la kuracisto, - via foresto tre malĝojigis min, sed antaŭ ĉio mi devis pensi pri tiuj kiuj sindone (sin'don'e) plenumis sian devon. Ja nur pro viaj agoj vi ne estis tiam kune kun ni.

Sed dum la mateno, kiam li ekvidis min en manoj de la piratoj, li komprenis ke ili mortigos min kiam ekscios pri malapero de la trezoroj. Tial li lasis sinjoron Treloni gardi la ŝipestron, prenis kun si Grej-on kaj Ben Gan-on, kaj ekiris rekte al la grandega arbo. Vi-

dante dumvoje nian aron li sendis Ben Ganon antaŭen, ĉar piedoj de Ben estas tre rapidaj. Tiu konis kredojn de siaj iamaj kunuloj, kaj decidis timigi kaj, samtempe, iom haltigi ilin. Grej kaj la kuracisto kaŝiĝis proksime al la arbego antaŭ ol tien venis serĉantoj de la trezoroj.

– Kiel bone ke Hokins estis apud mi! – diris Silver, – se ne lia ĉeesto, vi, kuracisto, farus nenion eĉ se oni distranĉus min.

– Certe! – respondis kuracisto Livsi ridante.

Dume ni venis al la boatoj. Unun el ili la kuracisto tuj disbatis per la pikfosilo, kaj per la alia ni ĉiuj ekremis al Norda golfo. Ni devis remi ok aŭ naŭ mejlojn. Silver, kvankam morte laca, sidis ĉe remiloj, kaj remis kune kun ni.

Ni eniris liberan maron. Ĝi estis trankvila. Kiam ni preteriris Dukapan monton mi ekvidis nigretan eniron en kavernon de Ben Gan, kaj apud ĝi homon, kiu staris kun fusilo en la manoj. Tio estis sinjoro Treloni. Ni suprenigis la manojn, kaj elkriis «hura», dum kio Silver kriis plej laŭte.

Post ankoraŭ tri mejloj ni eniris Nordan golfon, kaj ekvidis «Hispanolo»-n. Ĝi, senvela, moviĝis surakve tien kaj reen. La maraltiĝo suprenigis ĝin de la sablaĵo.

Se tie estus vento, aŭ se en Norda golfo

estus same forta fluo kiel en la Suda, ni povus perdi la ŝipon por ĉiam. Ĝi povis esti ĵetita malproksimen sur la bordon. Sed, feliĉe, ĉio finiĝis bonorde, se ne paroli pri disfalo de unu el la veloj. Ni ĵetis en la akvon alian ankron. Poste, per la boato, ni venis al Ebria golfo, loko plej proksima al kaverno de Ben Gan. Tie ni albordiĝis, kaj sendis Grejon al «Hispanolo» por ke li gardu la ŝipon dumnokte.

Ni supreniĝis al la kaverno. Renkontis nin sinjoro Treloni. Kun mi li konversaciis tre amike. Pri mia forkuro li diris nenion: ne laŭdis min, kaj ne insultis. Sed kiam Silver alparolis lin, li ruĝiĝis.

- Ĝon Silver, - diris li, - vi estas aĉa malverulo! Ega malverulo, sinjoro! Oni petegis min ne fari pri vi kion oni devus fari, kaj mi respondis jese. Sed mortintoj, sinjoro, pendas sur vi kiel ŝtonegoj...

- Vi estas tre bona al mi, sinjoro, - respondis Longa Ĝon.

- Ne kuraĝu diri al mi tion! - kriis sinjoro Treloni, - pro vi mi malplenumas mian devon!

Ni eniris la kavernon. Ene estis multe da loko. El sub la ŝtonoj eliris purega akvo. Apud brulanta fajro kuŝis ŝipestro Smolet. Malproksime de la eniro videblis monteto da oraj moneroj. Tio estis trezoroj de Flint, pro kiuj ni faris tiel longan lacigan vojon, kaj pro kiuj

mortis dek-sepo da homoj el ŝipanaro de «Hispanolo». Kiom da homaj vivoj, kiom da sango prenis kunigado de tiu ĉi oro! Kiom da bonegaj ŝipoj estis dronigitaj! Kiom da kuraĝaj homoj, kiujn oni igis iri en maron kun bandaĝitaj okuloj, estis mortigitaj! Kiom da malvero kaj kanonpafado! Sur la insulo ankaŭ nun troviĝas triopo: Silver, maljuna Morgan kaj Ben, kiuj iam prenis parton en ĉiuj ĉi teruraĵoj.

– Eniru, Ĝim, – diris la ŝipestro. – Vi eble estas bona knabo, sed mi donas al vi mian vorton ke mi neniam prenos vin veladi, ĉar vi estas unu el ŝatulaĉoj... Ha, tio estas vi, Ĝon Silver! Kio venigis vin al ni?

– Mi revenis plenumi miajn devojn, sinjoro, – respondis Silver al la ŝipestro.

– A-a! – diris la ŝipestro, kaj aldonis nenion.

Kiel bone mi vespermanĝis tiuvespere, ĉirkaŭigita per ĉiuj miaj amikoj! Kiel bongusta ŝajnis al mi bestaĵo de Ben, kiun ni postdrinkis per malnova vino, prenita de «Hispanolo»! Neniam estis homoj pli gajaj kaj feliciaj ol ni.

Silver sidis post ĉiuj, pli malproksime de la fajro, sed manĝis li multe, kaj rapide ek saltis se aperis bezono priservi iun. Li ridis kune kun ni, do, denove ekestis bonkora kaj servema ŝipkuiristo.



Matene ni komencis labori. Ĝis la bordo estis mejlo. Oni devis transporti (trans'port'i) tien nian oron, kaj de tie, per la boato, venigi ĝin sur ferdekon de «Hispanolo» – pena laboro por tiel malmultaj homoj.

La tri rabistoj, ĝis nun troviĝantaj sur la insulo, ne tro maltrankviligis nin. Sufiĉis teni unu gardanton sur supro de la monteto, kaj ni povis ne timi subitan atakon. Krom tio ni opiniis ke ĉe tiuj ĉi homoj por longa tempo malaperis deziro al novaj atakoj.

Ni laboris senlace. Grej kaj Ben Gan boatveturigis la oron sur la ŝipon, aliaj portis ĝin al la bordo. Eĉ forta plenkreskulo povis porti nur malmulte da oro. Ĉar mi ne havis forton por tio oni lasis min en la kaverno, kaj ordonis enigi la monerojn en ujojn en kiuj antaŭe estis manĝeblaĵoj.

Same kiel en havaĵujo de Bili Bons ĉi tie troviĝis moneroj de malsamaj landoj kaj tempoj, sed certe ili estis pli multnombraj. Mi ŝatis kunigi ilin laŭ landoj kaj tempoj. Sed tio estis laciga laboro.

Sur la moneroj oni povis vidi vizaĝojn de ĉiuj landestroj de lastaj cent jaroj. Estis ankaŭ tre nekutimaj orientaj moneroj. Do ĉi tie troviĝis moneroj de tuta Tero.

Tago iris post tago, sed fino ne videblis. Ĉiutage ni transportis al la ŝipo multegon da

trezoroj, sed multe pli da ili restis en la kaverno.

Tutan tempon ni aŭdis nenion pri la restantaj rabistoj. Fine, se mi ne eraras, la trian vesperon, kiam mi kaj la kuracisto supreniĝis sur la monteton, de sube, el ne-travidebla mallumo, vento venigis al ni ĉu krion ĉu kanton. Aŭdi ĝin klare ni ne sukcesis.

- Tio estas la rabistoj, - diris la kuracisto.

- Ili ĉiuj estas ebriaj, sinjoro, - eksonis de post mi voĉo de Silver.

Silver estis tute libera kaj, malgraŭ nia malvarmo, denove komencis teni sin kun ni kiel ŝatata kaj amikema servanto. Malgraŭ la neamikemo li penis priservi ĉiujn. Sed ĉiuj rigardis lin kiel sendoman hundon. Nur mi kaj Ben Gan estis pli bonaj al li. Ben Gan ĝis nun timis sian antaŭan estron; kaj mi memoris ke li savis mian vivon kvankam, certe, mi povus pensi pri li eĉ pli malbone ol iu ajn alia: mi ja memoris ankaŭ aliajn liajn intencojn.

Do la kuracisto neamike respondis al la rimarko de Silver:

- Sed eblas ke ili estas malsanaj...

- Ĝuste, sinjoro, - diris Silver, - sed por vi kaj mi tio tute ne gravas.

- Ŝajnas ke vi, Silver, ne estas homo tro bonkora, - rimarkis la kuracisto. - Mi scias ke miaj sentoj ŝajnos al vi iom nekutimaj, sed se

mi vere estus certa ke unu el ili malsanas, mi, eĉ danĝerante mian vivon, irus por doni la kuracistan helpon.

– Vi farus grandan eraron, sinjoro, – respondis Silver, – vi nur perdus vian vivon. Mi estas nun sur via flanko, kaj ne volus ke viaj kunuloj perdu homon kiel vi. Vi multon faris por mi. Sed tiuj homoj ne scipovas teni sian vorton. Eĉ pli, ili neniam kredus al via vorto.

– Sed vi, kontraŭe, bone tenas vian vorton, – diris la kuracisto. – Tion oni povis vidi antaŭ nelonge.

De tiam ni preskaŭ nenion sciis pri la triopo da piratoj. Nur unufoje ni aŭdis malproksiman fusilpafon; ni decidis ke ili pafis iun beston. Ni kunsidis (kun'sid'is), kaj decidis ne preni ilin kun ni, sed lasi sur la insulo. Ben Gan ege ĝojis pri tiu decido. Ankaŭ Grej konsentis pri ĝi. Ni lasis al ili multe da pulvo, kuglojn, iom da kuraciloj, kaj aliajn bezonaĵojn, ilojn, vestojn, malnovan velon, kaj iom da ŝnuro.

Post tio ni havis nenion por fari sur la insulo. La ŝipo estis jam ŝarĝita per la oro kaj trinkakvo kaj, por iu ajn okazo, per restaĵoj de la bestaĵo. Fine ni suprenigis la ankron, kaj eliris el Norda golfo. Super ni pendis la sama flago sub kiu ni batalis gardante nian fortikejon kontraŭ la piratoj.

Tiam klariĝis ke la rabistoj pririgardis nin pli bone ol ni opiniis, ĉar, elirinte el la golfo kaj proksimiĝinte al suda finaĵo de la insulo, ni ekvidis la triopon: ili staris sur la sablaĵo kun petege suprenigitaj manoj. Al ni estis malfacile lasi ilin sur la nelogata insulo, sed alian eliron ni ne havis. Kiu scias, ĉu ne ekribelus ili denove se ni prenis ilin sur la ŝipon. Krom tio estas iom turmente transporti al naskiĝlando homojn kiujn atendas pendumilo.

La kuracisto alvokis ilin, kaj diris ke ni lasis por ili manĝeblaĵojn, pulvon, kaj komencis klarigi kiel tion ĉi trovi. Sed ili alvokis nin, kaj petegis ne doni al ili morti solaj. Fine, vidante ke la ŝipo malproksimiĝas (mal'proksim'ig'as), unu el ili, mi ne scias kiu, kun bestaĉa krio kaptis sian fusilon kaj elpafis. La kuglo preterfajfis kapon de Silver, kaj trafis iun el la veloj. Ni ekestis pli singardaj kaj, kiam mi decidis elrigardi el post la gardaĵo, la piratoj jam forestis sur la sablaĵo, kaj la sablaĵo mem ekestis preskaŭ nevidebla. Iom poste, al mia nepriskribebla (ne'pri'skrib'abl'a) ĝojo, malaperis ankaŭ plej alta monto de Trezorinsulo.

Ni estis tiel malmultaj, ke estis bezonate labori eĉ post laciĝo. La ŝipestro disdonis ordonojn kuŝante ĉe malantaŭa parto de la ferdeko. Li jam resaniĝis, sed ĝis nun bezonis trankvilon. Ni tenis direkton al plej proksima

ŝiphalteja urbo por dungi tie matrosojn: sen ili ni ne kuraĝis iri al nia lando.

Vento multfoje aliiĝis, kaj forigis nian ŝipon de bona direkto; krom tio nin dufoje atakis fortega mara maltrankvilo. Tial ni tute perdis la fortojn ĝis venis al tiu ĉi urbo.

Suno jam iris suben kiam ni fine ĵetis ankron en la bone fermita ŝiphaltejo. Nin ĉirkaŭigis boatoj kun lokaj homoj kiuj, kontraŭ mono, estis pretaj doni al ni lokajn manĝeblaĵojn. Bonkoraj vizaĝoj (plejmulte nigraj), bongustaj kreskaĵoj kaj, plej grave, lumetoj de la domoj, ĉio ĉi estis tiel malsimila al tiu malgaja kaj sanga Trezorinsulo!

La kuracisto kaj sinjoro Treloni decidis eniri la vesperan urbon. Ili prenis kun si ankaŭ min. Sur la bordo ni renkontis ŝipestron de brita kanonŝipo, konatiĝis, kaj venis sur lian ŝipon. Tie ni konversaciis, manĝis, drinkis, kaj revenis sur «Hispanolo»-n kiam komenciĝis jam suneliro.

Sur la ferdeko estis nur unu homo, Ben Gan, kiu komencis krii pri sia terure malbona ago. Okazis ke Silver forkuris. Ben rakontis ke li mem helpis al Silver enboatiĝi, ĉar estis certa ke ni estas endanĝerigataj (en'-danĝer'ig'at'a'j) «ĝis kiam sur la ŝipo restas tiu ĉi unupieda malbonulaĉo».

Sed la kuiristo forkuris ne kun malplenaj

manoj. Li, rimarkita per neniuj, trarompis muron, kaj kaptis iom da mono: tricenton aŭ kvarcenton da oraj moneroj, kiuj certe helpas al li en ties posta vivo. Ni estis ĝojaj ke liberiĝis de li.

Ne dezirante esti multparola mi diros nur, ke dunginte iom da novaj matrosoj, ni bonorde venis al Bristol. «Hispanolo» revenis ĝuste tiutempe kiam sinjoro Blendli jam komencis pripensi alsendon de alia ŝipo. El la tuta ŝipanaro revenis nur kvinopo. Malgraŭ tio «Hispanolo» okazis pli feliĉa ol tiu ŝipo pri kiu kantis la piratoj: «Tuta sepdek-kvino ne revenis al sia lando: ili dronis, kaj kuŝas nun sur mara fundo».

Ĉiu el ni ricevis sian parton de la trezoroj. Iuj agis pri la mono saĝe, aliaj, kontraŭe, malsaĝe. Ŝipestro Smolet lasis la maran servon. Grej ne nur gardis sian monon sed, subite decidinte sukcesi en la vivo, eklernis maran aferon. Nun li estas navigisto kaj kunhavanto de bonega ŝipo. Li jam havas vivkunulinon kaj infanojn.

Ben Gan, post kiam li ricevis sian milon da moneroj, disĵetis ĉion dum tri septagaĵoj, pli ĝuste dum dek naŭ tagoj, ĉar dum la dudeka tago li aperis ĉe ni tute senmona. Sinjoro Treloni faris pri Ben ĝuste kion tiu timis: li donis al li lokon de pordega gardisto. Ben Gan vivas ĝis nun, malamikas kaj amikas

kun lokaj knaboj, kaj ĉiun sepan tagon bonege kantas ene de la urbeto kantistaro.

Pri Silver ni aŭdis nenion. La timiga unupieda maristo por ĉiam malaperis el mia vivo. Verŝajne li trovis sian nigrulan kunulilon, kaj feliĉe loĝas ie kun ŝi kaj kun Ŝipestro Flint. Ni esperu pri tio, ĉar liaj eblecoj pri bona postmorta vivo estas tre malverŝajnaj (mal'ver'ŝajn'a'j).

Alia parto de la trezoroj: neoraj moneroj kaj armiloj, ĝis nun kuŝas kie enterigis ilin Flint. Kaj, laŭ mi, ili kuŝu. Nun oni per nenio venigos min sur tiun ĉi sangan insulon. Dormante, mi ĝis nun aŭdas frapojn de ondoj, disrompiĝantaj (dis'romp'iĝ'ant'a'j) ĉe ĝiaj bordoj, kaj elsaltas el la dormoloko kiam ŝajnas al mi ke mi aŭdas tranĉan voĉon de Ŝipestro Flint: «Moneroj, moneroj, moneroj!»

oo

## Vortaro

### A

<b>-a</b>	84	<b>alt'a</b>	130
adj. endg;		high, tall	
<b>aĉ'a</b>	339	<b>am'o</b>	191
abominable, awful		love	
<b>ad</b>	358	<b>amik'o</b>	212
adds the idea of continuous or frequent action		friend	
<b>afer'o</b>	478	<b>an'o</b>	136
affair, matter		member, unit	
<b>ag'i</b>	400	<b>Angl'i'o</b>	28
act, behave		England	
<b>ajn</b>	482	<b>ankaŭ</b>	22
-ever, -soever		also; too	
<b>aĵ'o</b>	238	<b>ankoraŭ</b>	277
thing (object, matter, stuff)		still; yet	
<b>akv'o</b>	249	<b>ankr'o</b>	430
water		anchor	
<b>al</b>	68	<b>ant</b>	164
to, towards		present active participle	
<b>ali'a</b>	119	<b>antaŭ</b>	149
other		before, in front of; previously	
		<b>aparat'o</b>	157
		apparatus, device, machine	
		<b>aper'i</b>	182
		appear	



**apud** 150

at, beside, close to,  
near

**ar'o** 118

collection, group, set

**arb'o** 6

tree.

**arm'i** 427

to arm, equip with  
weapons.

**-as** 66

present tense

**at** 324

present passive partici-  
ple

**atak'i** 469

attack

**atend'i** 275

wait; await; expect

**aũ** 79

or

**aũd'i** 190

hear

**aũskult'i** 329

listen

## **B**

**bandaĝ'o** 495

bandage

**bar'i** 491

bar, block

**barel'o** 462

barrel

**baston'o** 369

stick

**bat'i** 246

beat, strike

**batal'o** 222

battle, combat, fight

**best'o** 213

animal, beast

**bezon'i** 407

(have) need (of)

**bird'o** 5

bird

**blank'a** 411

white

**blind'a** 370

blind, sightless

**boat'o** 452

boat, craft

<b>bon'a</b> good	181	<b>çar</b> because	245
<b>bord'o</b> bank, shore	289	<b>çe</b> at, by, on	325
<b>botel'o</b> bottle	331	<b>çes'i</b> cease, leave, stop	155
<b>bov'o</b> ox	251	<b>çeval'o</b> horse	335
<b>Brit'i'o</b> Britain	26	<b>çi</b> proximity	81
<b>bru'o</b> noise	201	<b>çiam</b> ever, always	151
<b>brul'i</b> burn, be on fire	298	<b>ciel'o</b> sky	189
		<b>Çin'i'o</b> China	29
		<b>çio</b> everythingĵ	173
<b>cent</b> hundred	99	<b>çirkaũ</b> (a)roud, round	290
<b>cert'a</b> certain, sure	354	<b>çiu</b> everyone (body)	172
<b>cifer'o</b> figure, cypher, digit, numeral, numerical symbol	36	<b>çu</b> whether	15
<b>çambr'o</b> room	167		

**D**

<b>da</b>	98	<b>direkt'o</b>	473
quantity of		direct	
<b>danđer'o</b>	240	<b>dis</b>	285
danger, peril		separation, dispersal	
<b>daŭr'i</b>	445	<b>do</b>	444
continue, endure, go on		hence, then, therefore	
<b>de</b>	53	<b>dom'o</b>	13
of; from		house	
<b>decid'i</b>	378	<b>don'i</b>	179
decide, determine		give	
<b>dek</b>	95	<b>dorm'i</b>	169
ten		sleep	
<b>demand'o</b>	47	<b>drink'i</b>	318
question		booze, swill, tipple	
<b>dens'a</b>	490	<b>dron'i</b>	420
dense, close-packed		drown, sink	
<b>desegn'i</b>	73	<b>du</b>	17
design, sketch		two	
<b>dev'o</b>	196	<b>dum</b>	257
duty, obligation		during	
<b>dezir'i</b>	326	<b>dung'i</b>	433
desire, want, wish		employ, hire, engage	
<b>dir'i</b>	56		
say speak		<b>E</b>	
		<b>-e</b>	40
		adverb	

<b>ebi'o</b>	272	<b>er'o</b>	322
possibility; -able, -ible		item, part	
<b>ebri'a</b>	366	<b>erari'i</b>	307
drunk, inebriated		be incorrect, make mistake	
<b>ec'o</b>	374	<b>esper'i</b>	460
quality, state		hope, expect	
<b>eĉ</b>	327	<b>est'i</b>	19
even		is; to be	
<b>eg'a</b>	252	<b>estr'o</b>	162
augmentative: to a high degree strengthens (increases, intensifies) the root idea		head, cheaf	
<b>ej'o</b>	199	<b>et'a</b>	265
place (bilding, establishment, room)		diminutive: a high degree weakens (diminishes) the idea in the root	
<b>ek-</b>	114		
the commencement of a continuous acting		<b>F</b>	
<b>eksplod'i</b>	205	<b>facil'a</b>	296
blow up		easy, simple, light	
<b>el</b>	34	<b>fajf'i</b>	393
out of, from		whistle, pipe	
<b>em'o</b>	368	<b>fajr'o</b>	211
inclination, disposition		bonfire, fire	
<b>en</b>	32	<b>fal'i</b>	186
in		fall	
		<b>far'i</b>	60
		do, make	

<b>fel'o</b> skin (of animal)	309	<b>flor'o</b> flower	160
<b>feliĉ'a</b> happy	421	<b>flu'i</b> flow, current, flux	486
<b>fenestr'o</b> window	384	<b>flug'i</b> fly	11
<b>ferdek'o</b> deck	461	<b>foj'o</b> time, occasion	260
<b>ferm'i</b> close	174	<b>for</b> away	138
<b>fid'i</b> trust	428	<b>fort'a</b> strong	216
<b>fidel'a</b> Faithful	472	<b>fortik'a</b> firm, hefty, resistant, sturdy	458
<b>fil'o</b> son	193	<b>fos'i</b> dig, delve	496
<b>fin'i</b> finish	204	<b>Franc'i'o</b> France	25
<b>fiŝ'o</b> fish	310	<b>frap'i</b> knock	338
<b>flag'o</b> flag	498	<b>frat'o</b> brother	226
<b>flam'o</b> blaze, flame	299	<b>fund'o</b> bottom	476
<b>flank'o</b> side, flank	291		

**funkci'i** 158  
function, act, operate,  
work

**fusil'o** 497  
rifle

**fut'o** 412  
foot

## G

**gaj'a** 438  
gay, merry

**gard'i** 242  
guard

**gast'o** 315  
guest

**ge-** 72  
both sexes

**golf'o** 380  
gulf

**grand'a** 121  
great; big, large, vast

**grav'as** 364  
important, serious

**grimp'i** 475  
climb

**gust'o** 241  
taste

## Ĝ

**ĝentleman'o** 408  
gentleman

**ĝi** 75  
it

**ĝis** 247  
till, until

**ĝoj'i** 347  
joy

**ĝust'a** 481  
right, correct, exact

## H

**hak'i** 259  
chop, hew

**halt'i** 409  
halt, stop

**har'oj** 236  
hair

**hav'i** 82  
have

**help'i** 320  
help

**herb'o** 239  
grass; herb, plant

<b>hom'o</b>	7	<b>ind'a</b>	429
human, person		worth, deserving of	
<b>hor'o</b>	375	<b>infan'o</b>	70
hour, time of day		child	
<b>hund'o</b>	74	<b>instru'ist'o</b>	44
dog		teacher	
	<b>I</b>	<b>insul'o</b>	312
		island	
<b>-i</b>	88	<b>insult'i</b>	470
infinitive		attack with insulting words	
<b>-i-</b>	54	<b>int</b>	336
country		past participle active	
<b>iam</b>	140	<b>intenc'i</b>	381
some time, once		intention	
<b>ig'i</b>	152	<b>inter</b>	165
make, cause to be, render		between	
<b>iġ'i</b>	137	<b>io</b>	131
become, come to be		something, anything	
<b>il'o</b>	133	<b>iom</b>	129
tool, instrument, appliance		a certain amount, a little of	
<b>ili</b>	41	<b>ir'i</b>	8
they		to go	
<b>in'o</b>	55	<b>-is</b>	61
female, feminine		past tense	

<b>ist'o</b>	197		
profession, interest			
<b>it</b>	221		
past passive			
<b>iu</b>	177		
someone			
		<b>J</b>	
<b>-j</b>	2		
plural			
<b>ja</b>	403		
indeed! certainly, rather			
<b>jam</b>	234		
already, by now, by then			
<b>Japan'i'o</b>	31		
Japan			
<b>jar'o</b>	314		
year			
<b>jen</b>	373		
behold, here is, are			
<b>jes</b>	16		
yes			
<b>jun'a</b>	166		
young			
			<b>ĵ</b>
		<b>ĵet'i</b>	161
		throw	
			<b>K</b>
		<b>kab'o</b>	501
		cape, headland.	
		<b>kaj</b>	18
		and	
		<b>kajut'o</b>	453
		cabin, saloon	
		<b>kanon'o</b>	463
		cannon	
		<b>kant'i</b>	176
		sing	
		<b>kap'o</b>	227
		head	
		<b>kapt'i</b>	288
		snatch, catch	
		<b>kaŝ'i</b>	494
		hide	
		<b>kavern'o</b>	256
		cavern	
		<b>ke</b>	89
		that (conj )	



<b>kelk'a'j</b>	353	<b>kon'i</b>	103
some, few		know, be acquainted with	
<b>kial</b>	274	<b>konsent'i</b>	379
why		consent, agree	
<b>kiam</b>	116	<b>kontraŭ</b>	228
when, at what time		against, opposit, con- trary to	
<b>kie</b>	105	<b>konversaci'i</b>	330
where, in which (what) place		convers/e, chat, talk	
<b>kiel</b>	159	<b>kor'o</b>	435
like, in what way		heart	
<b>kio</b>	21	<b>kred'i</b>	446
what		believe, think	
<b>kiom</b>	96	<b>kresk'i</b>	237
how much		grow, increase	
<b>kiu</b>	35	<b>kri'i</b>	135
which		cry (out)	
<b>klar'a</b>	419	<b>krom</b>	406
clear		apart from, except	
<b>knab'o</b>	71	<b>kugl'o</b>	405
boy		bullet, shot	
<b>komenc'i</b>	359	<b>kuir'i</b>	434
commence		cook	
<b>kompren'i</b>	102	<b>kun</b>	120
understand		with, along	

<b>kur'i</b> run	163	<b>land'o</b> land	27
<b>kurac'i</b> cure, treat, care for	334	<b>las'i</b> leave	306
<b>kuraĝ'a</b> courage	333	<b>last'a</b> last, just gone	454
<b>kuŝ'i</b> lie	168	<b>laŭ</b> along, according to	286
<b>kutim'o</b> custom	414	<b>laŭt'e</b> loud	351
<b>kvankam</b> although	440	<b>leg'i</b> read	59
<b>kvar</b> four	23	<b>lern'ant'o</b> pupil	46
<b>kvazaŭ</b> as it were	394	<b>li</b> he	51
<b>kvin</b> five	90	<b>liber'a</b> free	467
	<b>L</b>	<b>libr'o</b> book	58
<b>la</b> the	14	<b>lingv'o</b> language	45
<b>labor'o</b> labour, work	195	<b>liter'o</b> letter	1
<b>lac'a</b> tired, worn-out	464	<b>loĝ'i</b> inhabit, live, reside	33

<b>lok'o</b> place	106	<b>marĉ'o</b> marsh	308
<b>long'a</b> long	184	<b>Mars'o</b> Mars	109
<b>lum'o</b> light	200	<b>mast'o</b> mast	485
<b>lun'o</b> moon	268	<b>maten'o</b> morning	301
<b>lup'o</b> wolf	253	<b>matros'o</b> seaman, sailor	436
<b>M</b>			
<b>mal</b> exact opposite	124	<b>mejl'o</b> mile	367
<b>malgraŭ</b> in spite of	447	<b>mem</b> self	361
<b>mamut'o</b> mammoth	255	<b>memor'i</b> remember	232
<b>man'o</b> hand	218	<b>mi</b> I, me	49
<b>manĝ'i</b> eat	214	<b>mil</b> thousand	100
<b>map'o</b> map	422	<b>minut'o</b> minute	450
<b>mar'o</b> sea	316	<b>mir'i</b> wonder, marvel at	397
		<b>moment'o</b> moment, instant	352

<b>mon'o</b> money	321	<b>ne</b> not, no	12
<b>mont'o</b> mountain	156	<b>neniam</b> never	230
<b>montr'i</b> display, show	148	<b>nenio</b> nothing, not any thing	154
<b>mort'i</b> die	192	<b>neniu</b> nobody	188
<b>mov'i</b> move	391	<b>ni</b> we	76
<b>muĝ'i</b> roar	254	<b>nigr'a</b> black	350
<b>mult'e</b> many, much, a lot	142	<b>nokt'o</b> night	141
<b>mur'o</b> wall	500	<b>nom'o</b> name	52
<b>N</b>			
<b>-n</b> direction towards; ac- cusative	67	<b>nombr'o</b> amount	97
<b>nask'i</b> give birth to	225	<b>nord'o</b> north	423
<b>naŭ</b> nine	94	<b>nov'a</b> new	231
<b>navig'i</b> navigate, cruise, sail	431	<b>nul</b> zero	37
		<b>nun</b> now	63

<b>nur</b>	57
only	
<b>O</b>	
<b>-o</b>	39
noun, substantive	
<b>obe'i</b>	348
obey	
<b>odor'o</b>	271
smell, odour	
<b>ok</b>	93
eight	
<b>okaz'i</b>	178
happen, occur	
<b>okcident'o</b>	426
west	
<b>okul'o</b>	171
eye	
<b>ol</b>	123
than	
<b>on'o</b>	390
fraction	
<b>ond'o</b>	488
wave	
<b>oni</b>	112
one, they, folks, people	

<b>op'o</b>	302
collective numeral: together, in group(s)	
<b>opini'o</b>	451
opinion	
<b>ord'o</b>	415
order	
<b>ordon'i</b>	243
order (command)	
<b>orient'o</b>	425
east	
<b>or'o</b>	323
gold	
<b>-os</b>	62
future tense	
<b>P</b>	
<b>paf'i</b>	134
fire, shoot	
<b>papag'o</b>	455
parrot	
<b>paper'o</b>	385
(piece of) paper	
<b>parol'i</b>	9
speak, talk	
<b>part'o</b>	377
part	

<b>paŝ'o</b>	468	<b>pistol'o</b>	382
step, pace, stride		pistol	
<b>patr'o</b>	194	<b>plaĉ'i</b>	432
father		please, be pleasing	
<b>pen'i</b>	349	<b>planed'o</b>	111
try, endeavour		planet	
<b>pend'i</b>	341	<b>plej</b>	223
hang		most	
<b>pend'um'i</b> (484)		<b>plen'a</b>	465
execute by hanging		full	
<b>pens'i</b>	175	<b>plen'um'i</b>	
think		fulfil, accomplish	
<b>per</b>	170	<b>pli</b>	122
with (tool, organ, member)		more	
<b>perd'i</b>	279	<b>pom'o</b>	471
lose (no longer have; fail to keep in sight)		apple	
<b>pet'i</b>	183	<b>por</b>	108
ask (as a favour)		for	
<b>pied'o</b>	264	<b>pord'o</b>	344
foot		door	
<b>pik'i</b>	262	<b>port'i</b>	215
pick, lance		carry	
<b>pirat'o</b>	357	<b>post</b>	147
pirate, bucaner		(time) after; (place) behind	

<b>pov'as</b> can, be able	87	<b>rajd'i</b> ride	342
<b>pren'i</b> take	180	<b>raket'o</b> rocket	107
<b>preskaŭ</b> almost	477	<b>rakont'o</b> story (narrative)	69
<b>pret'a</b> ready	292	<b>rand'o</b> edge	474
<b>preter</b> go past, pass by; miss, beside the mark	267	<b>rapid'a</b> quick, rapid, fast	235
<b>pri</b> about	65	<b>re</b> again, anew, a second time, once more	132
<b>pro</b> because of; owing to	217	<b>rekt'a</b> direct, straight	456
<b>proksim'a</b> near, close	125	<b>rem'i</b> row, propel with oars	489
<b>pulv'o</b> (gun) powder	457	<b>renkont'i</b> meet; encounter	278
<b>pur'a</b> clean, pure	443	<b>respond'o</b> answer	48
<b>R</b>			
<b>rab'i</b> rob, take by force	389	<b>rest'i</b> remain, stay	284
		<b>ribel'o</b> rebel, mutiny, revolt	459
		<b>ricev'i</b> receive	418

<b>rid'i</b> laugh	448	<b>sam'a</b> same	229
<b>rigard'i</b> look	85	<b>san'a</b> healthy	207
<b>rimark'i</b> notice, observe	399	<b>sang'o</b> blood	293
<b>river'o</b> river	283	<b>sat'a</b> full, satiated	295
<b>romp'i</b> break	371	<b>sav'i</b> save	402
<b>rostr'o</b> trunk, snout	263	<b>sci'i</b> know	101
<b>ruĝ'a</b> red	466	<b>se</b> if	80
<b>rum'o</b> rum	319	<b>sed</b> but	30
	<b>S</b>	<b>sek'a</b> dry	297
<b>sabl'o</b> sand	487	<b>sen</b> without	146
<b>sabr'o</b> sabre	343	<b>send'i</b> send	209
<b>saĝ'a</b> wise	258	<b>sent'i</b> feel	250
<b>salt'i</b> jump, leap	206	<b>sep</b> seven	92



<b>serĉ'i</b> look for, seek	282	<b>spur'o</b> spoor, footprint	305
<b>serv'i</b> serve	410	<b>star'i</b> stand	10
<b>ses</b> six	91	<b>stel'o</b> star	115
<b>si</b> Reflexive pronoun Refers only to the 3-d person	83	<b>sub</b> under	198
<b>sid'i</b> sit	43	<b>subit'e</b> sudden, abrupt, unex- pected	300
<b>silent'a</b> silent	392	<b>sud'o</b> south	424
<b>simil'a</b> similar	345	<b>sufiĉ'as</b> enough	404
<b>sinjor'o</b> Mr.	311	<b>sukces'i</b> succeed	388
<b>skrib'i</b> write	355	<b>sun'o</b> sun	113
<b>sol'a</b> alone, lone	365	<b>super</b> above	492
<b>soldat'o</b> soldier, trooper	145	<b>supr'o</b> top, summit	153
<b>son'o</b> sound	386	<b>sur</b> on, upon	104

<b>Ŝ</b>		<b>tag'o</b>	187
		day	
<b>ŝajn'i</b>	346	<b>temp'o</b>	139
seem		time	
<b>ŝarg'i</b>	493	<b>ten'i</b>	276
chargi		hold	
<b>ŝarĝ'i</b>	449	<b>Ter'o</b>	110
load		Earth	
<b>ŝat'i</b>	437	<b>terur'o</b>	483
appreciate		terror	
<b>ŝi</b>	77	<b>tia</b>	480
she		of that kind	
<b>ŝip'o</b>	144	<b>tial</b>	281
ship, boat		therefore, for that reason	
<b>ŝlos'i</b>	383	<b>tiam</b>	117
lock		then, at that time	
<b>ŝnur'o</b>	441	<b>tie</b>	128
rope, line		there, in that place	
<b>ŝton'o</b>	244	<b>tiel</b>	233
stone		so, in that way	
<b>ŝtup'o</b>	208	<b>ties</b>	337
stair, step		of that (those), that one's, his, etc	
<b>T</b>		<b>tigr'o</b>	287
<b>tabl'o</b>	328	tiger	
table			

<b>tim'i</b> fear	202	<b>trink'i</b> drink	248
<b>tio</b> that	20	<b>tro</b> too	356
<b>tir'i</b> draw, pull	396	<b>trov'i</b> find	280
<b>tiu</b> that	42	<b>trunk'o</b> trunk	499
<b>tra</b> through	304	<b>tuj</b> at once, immediate	362
<b>trafi</b> hit	266	<b>turment'i</b> torment, cause severe sufferg.	439
<b>tranĉ'i</b> cut, cleave	340	<b>turn'i</b> turn	372
<b>trankvil'a</b> calm, tranquil	273	<b>tuŝ'i</b> touch	270
<b>trans</b> across	395	<b>tut'a</b> whole, intact	398
<b>tre</b> very	127		
<b>trem'i</b> tremble, quake, shake, shiver	360	<b>U</b>	
<b>trezor'o</b> treasure	313	<b>-u</b> volitive mood	64
<b>tri</b> three	3	<b>uj'o</b> container, holder	317
		<b>ul'o</b> person, animal, object	219

<b>um</b>	484	<b>vest'o</b>	387
word of no defined meaning		article of clothing	
<b>unu</b>	4	<b>vetur'i</b>	401
one		travel	
<b>urb'o</b>	24	<b>vi</b>	50
town, city		you	
<b>urs'o</b>	269	<b>vid'i</b>	86
bear		see, sight	
<b>-us</b>	224	<b>vilaĝ'o</b>	332
verb, conditional		village	
		<b>vin'o</b>	479
		wine	
		<b>vir'o</b>	143
		man (opp women)	
		<b>viv'o</b>	185
		life	
		<b>vizaĝ'o</b>	442
		face, visage	
		<b>voĉ'o</b>	363
		voice	
		<b>voj'o</b>	261
		way, route, road	
		<b>vojaĝ'o</b>	417
		journey	
		<b>vok'i</b>	376
		call to, cry out	

<b>vol'as</b>	78
will	
<b>vort'o</b>	38
word	
<b>vund'o</b>	220
wound	